**<u>Opozicio dum la komunisma tempo:</u>**

# Prago 1968 kaj ĝia antaŭhistorio

## Diversaj formoj kaj esprimoj de la kontraŭ-stalinisma protesto en orienta Eŭropo inter 1948 kaj 1968

### Histori-politologia analizo de la stalinisma sistemo fone de la rezisto kontraŭ ĝi ĝis la disbatado de la „Praga Printempo“ en 1968

*Omaĝe al la demokratia opozicio en la iamaj socialismaj landoj*
*Memore pri Milovan Đilas (1911-1995), Ota Šik (1919-2004) kaj Leszek Kołakowski (1927-2009)*

*Ĉi tiu studo estis verkita kun la intenco montri al la (maldekstrisme submigrata) Esperanto-movado la karakteron de la komunismo, kiel ĝi ekzistis en la „socialismaj“ landoj inter 1917/45 kaj 1989/91. Ĉar la Esperanto-movado, kiu praktike ĉiam staris flanke de la regantaj potenculoj (de Stalin ĝis Fidel Castro), de kiuj ĝi esperis subtenon por Esperanto, neniam kritikis la grandskalan lezadon de la homaj rajtoj kaj ignoris la drastan subpremadon de la demokratia intelekta opozicio fare de la regantaj reĝimoj en tiuj landoj kaj anstataŭ kritiki tiun mizeron konstante polemikis kontraŭ la „kapitalismo, Usono kaj la angla lingvo“, oni devas konkludi, ke tiu Esperanto-movado evidente simpatiis, rekte aŭ malrekte, sekrete aŭ malferme, kun la marksismo, socialismo aŭ komunismo, kies parenco ĝi estis sur (soci)lingvistika kampo, kun fatalaj sekvoj. La Esperanto-movado neniam raportis objektive pri la kontraŭ-stalinisma opozicio en la sovetia bloko, ekskludante tiun temon kun la klarigo, ke ĝi estas politike neŭtrala. Anstataŭ distanciĝi de ili, la Esperanto-movado en la socialismaj landoj estis intime ligata kun la komunismaj reĝimoj de tiuj landoj kaj fakte fariĝis ilia politika komplico. Tiuj reĝimoj uzurpis la ideojn de la Esperanto-movado (ekzemple la pacismon) kaj misuzis Esperanton por sia politika propagando. Kvankam la Esperanto-movado asertas, ke ĝi celas plibonigi la mondon per komuna lingvo, ĝia reala kontribuo al la monda paco kaj homaj rajtoj estas minimuma, eĉ nulaj aŭ nur teorioj, dum la ĉi-rilataj strebadoj de la sube menciitaj opoziciuloj estas realaj kaj ege honorindaj, eĉ se dum la komunisma tempo ili bedaŭrinde ne estis tiel sukcesaj kaj celtrafaj kiel dezirate, ĉar ili estis malhelpataj, subpremaaj kaj persekutataj de la stalinistoj en la sovetia bloko.*

*Originale verkita kun tradukitaj eroj en Esperanto de Andreas Künzli*

„Fantomo hantas en Eŭropo – la fantomo de la komunismo.“
„Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu“.
*Karl Marx kaj Friedrich Engels, Manifesto de la Komunisma Partio. 1872-1893.*

„Por ni la komunismo ne estas starigenda stato, sed idealo, laŭ kiu la realeco orientiĝos.“
*Karl Marx kaj Friedrich Engels, Germana Ideologio. 1845-46.*

„La filozofoj interpretis la mondon laŭ diversaj manieroj, gravas ŝanĝi ĝin.”
*Karl Marx,Tezoj pri Feuerbach. 1845.*

„La historio de la ĝisnuna socio estas la historio de klasbataloj.“
*Karl Marx kaj Friedrich Engels, Manifesto de la Komunisma Partio. 1872-1893.*

„Esti radikala signifas kapti la aferon ĉe la radiko.“
*Karl Marx, Kritiko de la jura filozofio de Hegel. Enkonduko. 1843-44.*

„La revolucioj estas la lokomotivoj de la historio.“
*Karl Marx, La klasbataloj en Francio 1848 ĝis 1850. 1850.*

„La perforto estas la naskilo de ĉiu malnova socio, kiu gravediĝis per nova socio.“
*Karl Marx pri la akumulado. La Kapitalo. 1a volumo. 1867.*

„La libereco estas antaŭjuĝo de la burĝoj.“
„Libereco en la kapitalismaj socioj estas daŭre pli malpli tio, kio ĝi estis ankaŭ en la antikvaj grekaj demokratioj: Libereco estis por la posedantoj de sklavoj.“
„Sen malferma klasbatalo kontraŭ la tuta burĝaro oni ne povas paroli pri socialisma revolucio.“
„La venko de la proleta revolucio en la mondo estas certa.“
„Konfido estas bona, sed kontrolo estas pli bona.“
„Sinjoro verkisto, ĉu vi estas libera de via burĝa eldonisto?“
„Estas malnova saĝo, ke en la politiko oni devas lerni de la malamiko.“
„Kiu volas neniigi la kapitalistojn, tiu devas detrui ilian valuton.“
„Pacismo kaj abstrakta pacpredikado estas formo por erarigi la laboristan klason.“
„Amasaj mortpafoj estas legitima rimedo de la revolucio.“
„Juro estas kio utilas al la proleta klaso.“

„Demokratio estas la antaŭa stadio de la socialismo.“
„Tiel longe ke la ŝtato ekzistas, libereco ne ekzistas.“
„La proletaro kondukos nin al la venko.“
„La religio estas speco de spirita fuzelo.“
*Vladimir Iliĉ Lenin (1879-1924)*

„Markso inventis la instrumentojn de la socialisma revolucio kaj kreis la bazon de la nova potenco, sed en la liberala kaj industria Eŭropo li ne povis evoluigi ilin.“ *Milovan Đilas*

„En 1956 la (komunisma) sistemo estis skuita, sed ne venkita, ĉar Ĥruŝĉov provis venki la stalinismon per stalinismaj rimedoj.“ *Isaac Deutscher / Robert Havemann*

„La efektivaj regantoj [en la landoj de la ´reala socialismo´ ne estas la laboris-ta klaso sed] estas kompare malgranda grupo de funkciuloj de la plej supra pinto de la partio.“ *Robert Havemann*

„Socialismo aŭ komunismo ekzistas en orienta Eŭropo nur, ĉar komunismaj partioj havas la monopolon de la politika kaj ekonomia povo super la socio, do iusence temas ne nur pri monpolisma, sed ankaŭ pri formala socialismo. (…) Anstataŭ diktaturo de la proletaro oni havas diktaturon de la monopola burokratio.” *Jacek Kuroń kaj Karol Modzelewski*

„Socialismo ne estas realigebla sen demokratio. Sen demokratio ne povas estiĝi socialismaj liberecoj por la laborantaj homoj. Sen demokratiaj kondiĉoj la burokratio transformiĝos al tavolo de la regantoj kun neimageblaj subpremaj rimedoj. El la vidpunkto de la demokratia socialismo la praktikata sistemo en la ŝtatoj de la orienta bloko ne povas esti nomata socialisma sistemo. Sed ĝi povas esti nomata komunisma sistemo, ĉar ĝi estiĝis surbaze de la historia akaparo de la potenco fare de komunismaj partioj, kiuj praktikas ĝin per la helpo de oficiala partia kaj ŝtata ideologio. Ĝi estas false nomata socialisma sistemo. Pli karakterize estas nomi ĝin ´partiburokratia´ aŭ ´ŝtatmonopolisma´ sistemo.“ *Ota Šik*

„La dogmema interpretado de la verkoj de Markso kondukis al ekonomie katastrofaj misevoluoj en la socialismaj popolrespublikoj. Hodiaŭ ni scias, ke le eksproprietigo de la bazaj industrioj en la socialismaj popolrespublikoj ne estis eksproprietigo, sed transdono al la ŝtato.“ *Günter Grass*

„La sovetia modelo ne estis socialisma modelo kaj Sovetunio ne estis socialisma ŝtato. Sovetunio estis granda mondpotenco, kies interesoj estis tiu de mondpotenco. En la socialismaj ŝtatoj efektiviĝis nur la unua fazo de la socialismo, nome la eksproprietigo de la posedantoj de la produktiloj. Karakterize por la sovetia modelo estis, ke ĝia teorio baziĝis sur la analizo de la ekonomio de la 19a jarcento. La teorio de la sociigo de la posedo pere de la ŝtatigo fiaskis.“ *Evžen Löbl*

„La historio kruele ludis kun la apostoloj de la marksismo-leninismo: Kaj iliaj venkoj kaj malvenkoj estis ´malhistoriaj´: ili fiaskis kie laŭ sia opinio ili devintus venki, kaj ili venkis kie ili devintus fiaski. Eĉ pli: Ofte ili malvenkis, kiam ili agis ´historie´, kaj kiam ili agis ´malhistorie´, ili venkis. La revolucio de la industria proletaro fiaskadis, de Hamburgo ĝis Ŝanhajo.“ *Zbigniew K. Brzezinski*

„Praktike ĉiu unuopa prognozo de Markso evidentiĝis malĝusta.“ *Richard Pipes*

„Demokratio kaj socialismo devas esti kunaj. La malfortigo de la demokratio, la malrespektado de ĝia rilato al la socialismo senvalorigas la socialismon kaj kondukas ankaŭ en socialismaj ŝtatoj al krizoj.“ *Alexander Dubček (1988)*

„En la mondkoncepto de la socialismo ekzistas nenio, kio postulus la personkulton, la malaltigon de la rolo de la amasoj aŭ la estingon de la individueco de la homo.” *Valentin Falin*

„La komunismo povas esti komparata kun memimunmalsano: Ĝi ne mortigas la mekanismon mem, sed ĝi malfortigas ĝin tiel forte, ke ĝi perdas la kapablon kontraŭbatali la virusojn de malsanoj. La komunismo detruas la invidivuan mensan intelekton kaj inversigas la valorojn de la libera, evolupova socio sur la kapon. La komunisma ideologio ne nur atakas la planton sed ankaŭ la radikojn kaj venenas la grundon.“ *Garri Kasparov*

„La marksismo ne povas esti respondecigita por la krimoj de la stalinismo.“ *Gregor Gysi*

**Enhavo (subtitoloj):**


4 1a parto: Enkonduko

4 Esenco de la stalinisma sistemo kaj antaŭkondiĉoj por la protesto kontraŭ la komunisma reĝimo

7 1a parto: Fundamentoj de la starigo de la komunisma kaj stalinisma sistemo en la „socialismaj“ landoj de orienta Eŭropo dum kaj post la Dua Mondmilito

7 Situacio en 1945 kaj akaparo de la potenco fare de la komunistoj en la orienteŭropaj lando

26 2a parto: Esencaj motivacioj por la orienteŭropa kontraŭstarado kontraŭ la stalinisma sistemo

28 Opozicio kaj kontraŭstaro kontraŭ la sovetia stalinismo

28 Unua akto de la kontraŭmoskva protesto: Jugoslavio 1948

30 Albanio kaj Bulgario

33 Dua akto de la kontraŭmoskva protesto: GDR 1953

38 La 1950aj jaroj en Sovetunio, Hungario, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio

43 Preskaŭ-revolucio dum la XXa partia kongreso de KPSU en februaro 1956

46 La pola oktobro 1956 kaj ĝia duonsukcesa pola eksperimento

49 Diskuto: Ĉu en oktobro 1956 Pollando ankoraŭ estis komunisma kaj suverena ŝtato ?

51 La hungara ribelo de 1956

60 Reformoj kaj restalinismiĝo en la orienta bloko en la tempo de Ĥruŝĉov

68 Reagoj en Rumanio, Bulgario kaj Albanio

71 La 1960aj jaroj sub la kondiĉoj de ´plurisma´ komunisma bloko

71 La orienta bloko post la konstruado de la Berlina Muro (1961)

73 La XXIIa partia kongreso de KPSU de 1961

75 Ĥruŝĉov-doktrino, Comecon kaj la sinteno de Rumanio

77 La reformoj de Liberman en Sovetunio

86 Ekonomia analizo de Ota Šik

90 La faligo de Ĥruŝĉov en 1964

92 Ĉeĥoslovakio post la falo de Ĥruŝĉov

96 Daŭrigo de la politika subpremado en la tempo de Breĵnev kaj la klopodo rehonorigi Stalinon

101 Andrej Saĥarov

103 Ekstera politiko de Sovetunio kaj la sinteno de la satelitoj en orienta Eŭropo

107 Nova junulara maldekstro en Pollando

108 La skandalo ĉirkaŭ Jacek Kuroń kaj Karol Modzelewski en la varsovia universitato

111 La ribelo de marto 1968 en Pollando

112 Daŭrigo de la lukto por reformoj kaj konflikto kun la verkistoj, studentoj kaj la slovakoj en Ĉeĥoslovakio en 1967

118 La falo de Novotný kaj la elekto de Dubček kiel nova partiestro en januaro 1968

120 La „Praga printempo“ vekas esperojn kaj rikoltas kontraŭstaron

123 De Novotný al Svoboda, nova KP-prezidio kaj nova registaro de Ĉeĥoslovakio

124 La fama „Agadprogramo“ de la ĉeĥoslovaka KP de la 5a de aprilo 1968

127 Duboj, timo, esperoj pesimismo kaj optimismo alternas

129 La aliancanoj parolas pri „kontraŭ-revolucio“

132 La „Manifesto de la 2000 vortoj“ kaj la histeria reago de la aliancanoj
136 Kunveno en Varsovio sen ĉeĥoslovakoj kaj la fifama „Varsovia letero“
140 La kunvenoj de Čierna nad Tisou kaj Bratislavo
146 Per ĉiuflanka premo kaj rapidaj paŝoj survoje al la interveno
149 La mistera(j) „petletero(j)“ al Breĵnev
151 La interveno de la trupoj de la Varsovia Pakto en Ĉeĥoslovakio en detaloj, arestado kaj deportado de Dubček kaj de la ĉeĥoslovaka registaro al Sovetunio
157 Reagoj en Ĉeĥoslovakio kaj eksterlande
162 La „Moskva protokolo“ de la 26a de aŭgusto 1968
173 Survoje al la „normaligo“ (aŭ „normaliĝo“)
175 Fino de la „Praga printempo“ - de Dubček al Husák (1969)
179 1970 kaj poste
180 Kio estis la „Praga printempo“ kaj kial ĝi okazis kaj kial ĝi estis haltigita?
183 La „Praga printempo” post la komunismo
186 Nomoj de menciitaj personoj, nur komunistoj (regantaj politikistoj kaj disidentoj; laŭlande kaj alfabeta vico)
194 Utiligita kaj kroma pritema fakliteraturo

## 1a parto:

## Enkonduko

### Esenco de la stalinisma sistemo kaj antaŭkondiĉoj por la protesto kontraŭ la komunisma reĝimo

Kiel ĝenerale konate, la socialisma revolucio devintus okazi en la civilize kaj ekonomie altevoluintaj kapitalismaj landoj de la Okcidento, do ekzemple en Anglio, Germanio, Francio aŭ Usono. Anstataŭ tio ĝi okazis en la socie ruinigita kaj ekonomie subevoluinta Ruslando. Sed ankaŭ post ĝia enkonduko en Ruslandon, tiu revolucio ne efektiviĝis en la kapitalismaj landoj de okcidenta Eŭropo, kiel Vladimir Lenin kaj la bolŝevistoj esperis. En Ruslando tiu revolucio stagnis jam en la fazo de la „proleta diktaturo“,[1] radikaliĝis dum la „milita komunismo“[2] en la Rusa Enlanda Milito (1918-21)[3] ĝis la enkonduko de la „Nova Ekonomia Politiko“ (NEP) en 1921, kiam la ekonomio pliboniĝis,[4] kaj kulminiĝis en la teroro de la „matura“ stalinismo de la 1930aj jaroj.[5] La stalinismo estis kruda, ege brutala, barbara metodo por antaŭenpuŝi la perfortan kolektivigon de la agrikulturo, kiu estis unu el la ideologiaj celoj de la komunistoj, la eksproprietigon de la „kapitalistoj“, t.e. la konfiskon de la posedo de la privatuloj, kaj la industriigon de ekonomie subevoluinta lando. Sed unuavice ĝi estis metodo por enradikigi la komunisman potencon en Ruslando por ĉiam. En tio la apliko de marksismaj-leninismaj, socialismaj aŭ komunismaj ideoj estis fakte nura preteksto por praviĝi kaj sekurigi la akaparon, efektivigon kaj stabiligon de la povo fare de la komunistoj en tiu lando kaj neniigi la („klasajn“) malamikojn de la komunisma reĝimo. Sub Vladimir Lenin kaj Iosif Stalin,[6] du ideologiaj aventuristoj kaj altgradaj politikaj gangsteroj, kiuj celis altrudi tiun komunismon al la popoloj de Ruslando, la burĝa demokratio estis abolita kaj la

[1] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Diktatoreco_de_la_proletaro.
[2] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Militkomunismo.
[3] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Rusia_Enlanda_milito.
[4] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Nova_Ekonomia_Politiko.
[5] Mi ne traktas ĉi tie la klasikajn teoriajn kaj ideologiajn diferencojn inter marksismo, leninismo, bolŝevismo, stalinismo, socialismo kaj komunismo. Ĉi-koncernajn difinojn oni povas trovi en Vikipedio. Cetere, la vikipediaj artikoloj en Esperanto estas ofte tro resumaj kaj nekompletaj, tiel ke estas rekomendinde konsulti la saman artikolon en unu el la plej grandaj lingvoj, ĉefe angla, germana aŭ rusa.
[6] Substrekitaj nomoj havas ligilon al koncerna biografio en Vikipedio en la parto post la ĉefa teksto.

origina soveta (konsilia) sistemo estis anstataŭigita per la bolŝevisma burokratia sistemo. Lige kun tiu „malkapitalismiga“ procezo la kapitalo en Ruslando estis akumulita kaj koncentrita en la manoj de la komunisma ŝtato, kvankam tia akumulado estis kritikita de Karlo Markso en ties ĉefaj verkoj. La gvidaj reprezentantoj de tiu nova komunisma ŝtato estis nomitaj kaj karakterizitaj de Milovan Đilas kaj Miĥail Voslensky kiel „nova klaso“ aŭ „nomenklaturo“ de la komunismaj funkciuloj. La posedo estis akaparita de tiu klaso anstataŭ distribuita al la socio, kiu devis posedi ĝin kolektive. Do, la politikan subpremadon kaj ekonomian ekspluatadon de la laboristoj kaj kamparanoj en Ruslando nun ne efektivigis la „kapitalistoj“, sed la komunistoj, kiuj uzurpis la ideojn de la socialistoj kaj misuzis la laboristojn kaj kamparanojn, en kies nomoj ili parolis, por siaj ideologiaj kaj politikaj celoj. Dum en okcidenta Eŭropo la laborista movado sukcese kontraŭstaradis la negativajn sekvojn de la industria revolucio, la rusa laborista movado, el kiu la komunistoj mem parte originis, grandparte perdis sian influon. La komunistoj ne nur ekkontrolis la sindikatojn, sed eĉ transformis ilin al obeema instrumento de la komunisma potenco, kiu false nomis sin „socialisma“. Sub tiaj kondiĉoj, en kiu mankis ĉiaj bremsiloj kaj kontroliloj flanke de la sindikatoj kaj politikaj instancoj, la rusa industriigo adoptis eĉ pli brutalajn formojn ol tio estis la kazo en okcidenta Eŭropo. Ĝi baziĝis grandparte sur la sistemo de la deviga laboro, kiu kruele punis laboristojn, kiuj malrespektis iujn leĝojn aŭ regulojn, tiel ke la tuta laborkulturo similis al la sklaveco de pasintaj jarcentoj. Tian ekstreman fitraktadon eĉ ne spertis la laboristoj en la okcidenta kapitalismo. Sub la preteksto de la egalrajteco virinoj povis esti devigitaj al peza laboro, kiun kutime plenumis nur viroj. La „kulakoj“[7] estis koncentritaj en kolĥozoj kaj sovĥozoj,[8] kie iliaj rajtoj estis formalaj kaj iliaj devoj realaj. Iu pola komunisto trafe nomis tiun sistemon „industria servuteco“, kaj iu eksa komu-nisto parolis pri „pli ol ekspluatado“.

La plej impresan priskribon de totalisma ŝtato en sia plena groteskeco, ridindeco kaj danĝereco verŝajne postlasis la fama angla aŭtoro George Orwell (1903-50) en sia mirinda romano „1984“, kiun li verkis en la jaroj 1946-48 kaj publikigis en junio 1949. Kiel kadra modelo por la verko servis stalinisma Sovetunio kaj por la literatura figuro de la „Granda Frato“ la sovetia diktatoro Stalin mem.[9] La unika genieco de la romano konsistas en sia plena kompreno de la karaktero de la totalisma sistemo, kiu en principo jam realiĝis en Sovetunio sub Stalin, kaj en sia intuicia profeteco koncerne la estontecon de la orienteŭropaj landoj, kiujn tiu sistemo ankoraŭ atendas. La tutan sensencecon kaj vanecon de la marksismo-leninismo por la praktika vivo, la estiĝon kaj enkondukon de tiu instruo en Ruslando probable plej bone klarigis kaj analizis la fama usona historiisto *Richard Pipes* en sia libro pri la historio de la komunismo. Li montris, ke praktike ĉiu unuopa prognozo de Markso evidentiĝis ne nur malĝusta, falsa kaj erara, sed ankaŭ ke neniu ekonomia imperativo, kiu estis postulita de Marx aŭ Engels, ludis iun rolon por la komunisma revolucio en Ruslando. La laboristoj kaj kam-paranoj, kiuj cetere malamike rilatis unu al la aliaj, tute ne interesiĝis pri marksismaj-leninismaj teorioj, kiuj estis la afero de kelkaj realecfremdaj intelektuloj, utopiaj socialistoj kaj radikalaj revoluciuloj. La venĝema provinca pseŭdonobelulo Lenin-Uljanov, kiu reinterpretis kaj ´kompletigis´ la marksismon laŭ sia gusto, kaj liaj amikoj fanatike celis forigi la carismon kaj kun ĝi la tutan burĝan kaj kapitalisman ordon, akaparante la politikan povon, kion ili sukcese faris, kiel konate, per simpla puĉo fare de malgranda kaj tre efike organizita armita grupo de „bolŝevistoj“ kontraŭ la burĝa Provizora Registaro, la 25an de okrobro (7an de novembro) 1917 en Sankt-Peterburgo.[10] Tiu fatala perforta evento, kiu evidente ne povis esti evitita pro la malforteco de la tiama rusa registaro, poste estis glorita kiel „Granda Oktobra Socialisma Revolucio“. Kvankam neniu tiutempano vere interesiĝis pri la enkonduko de la marksismo-leninismo kiel politika, ekonomia kaj socia sistemo, la duono de la homaro poste estis infektita per tiu danĝera viruso. Ĉar neniu volis enkonduki la komunisman sistemon (eĉ en Germanio, Aŭstrio, Pollando kaj Hungario la socialisma revolucio estis sukcese rifuzita), ĝi devis esti perforte altrudita al la popoloj, kiuj dum jardekoj suferis pro eksterordinara subpremado, mallibereco, politika teroro, ekspluatado kaj drastaj materiaj mankoj.[11]

[7] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Kulako.
[8] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Kolĥozo, https://eo.wikipedia.org/wiki/Sovĥozo.
[9] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/1984_(romano).
[10] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Oktobra_Revolucio. Pri la antaŭhistorio de Lenin en Svislando vd. sub. http://www.planlingvoj.ch/Lenin_Svislando.pdf.
[11] Vd. Richard Pipes: Communism. A brief History. (London 2001); Kommunismus. (Berlin 2003). (Pri la aŭtoro vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Richard_Pipes).

La komunisma eksperimento finiĝis en orienta Eŭropo nur en 1989, en Ruslando 1991. La komunismo kaŭzis tutmonde pli ol 100 milionoj da mortviktimoj kaj sennombrajn aliajn viktimojn. Okaze de Marx-jubileoj oni ĉiam emfazis, ke tiu filozofo mem ne kulpis pri tiu homara katastrofo.

La unua signifa protesto kontraŭ la politiko de la bolŝevistoj formiĝis dum la ribelo de la matrosoj de Kronŝtadt en marto 1921 (kiam Lenin ankoraŭ vivis). La ribeluloj postulis, ke la diktatora regado de la bolŝevisma partio de Ruslando estu forigita kaj ke la demokratio estu restarigita. Konkrete tio signifis, ke oni postulis novajn elektojn al la sovetoj (konsilioj), liberecon de la gazetaro kaj parolo, eblecojn de la libera manifestaciado, liberigon de la politikaj prizonuloj, sovetojn sen bolŝevistoj, malcentralizon de la potenco, memregadon de Kronŝtadto, reenkondukon de la metilaboro, kompletajn rajtojn koncerne la terposedon, k.a. La ribelo estis sufokita de la Ruĝa Armeo,[12] kaj la ribeluloj estis aŭ mortigitaj aŭ deportitaj al prizonoj en norda Ruslando. Kvankam la ribelo ne povis nuligi la bolŝevismajn reformojn, ĝi tamen ne estis tute vana, ĉar ĝi rezultigis la transiron de la t.n. „Milita Komunismo“ al la „Nova Ekonomia Politiko“ en 1921. Fakte, Lenin jam frue komprenis la burokratiigajn tendencojn en la komunisma partia aparato kaj atentigis pri tiu problemo por eviti ĝin. Estante malsana, li perdis la kontrolon favore al Stalin, kiu akaparis la potencon kaj fariĝis ĝenerala sekretario de la burokratia aparato de la komunisma partio de Sovetunio kun senskrupulaj ambicioj formi kaj kontroli la aferojn en Sovetunio.

Ĉar la konstruado de la nova burokratia sistemo kaŭzis kontraŭstaron ankaŭ en la vicoj de la malnovaj komunistoj, kiuj ankoraŭ kredis je la principo de la egaleco kaj justeco, ilia protesto devis esti sufokita per brutalaj metodoj fare de la novaj potenculoj. La senkompata efektivigo de la industriigo de la subevoluinta lando estigis enormajn sociajn tensiojn, tiel ke la stalinisma reĝimo vidis sin konfrontata kun malkontenta laboristaro, kolektivigita kamparanaro kaj parto de la partia membraro, kiu estis ĉagrenata pro la senpotencigo de la sovetoj, la progresanta burokratio aŭ la privilegioj de la nova klaso. Eĉ la armeoj de prizonuloj kaj parto de la soldatoj estis plenaj de malamo kontraŭ tiu reĝimo. Sed iom post iom la kernaj protagonistoj de la bolŝevisma partio akiris la regado-monopolon kaj senskrupule elŝaltis ĉiujn spektrojn de la aktiva opozicio, precipe la maldekstrajn socialismajn revoluciulojn kaj la menŝevikojn, el la sovetoj, kiuj estis iliaj ĉefaj rivaloj. Se mencii konkretajn nomojn, temas pri antagonismaj grupoj kun Trockij, Buĥarin, Kamenev, Zinovev, Martov, Ĉernov, Tomskij, Rykov k.a. kiel reprezentantoj de la unua flanko, kaj Stalin, Malenkov, Molotov, Mikojan, Kaganoviĉ, Voroŝilov, Kalinin k.a. je la alia flanko.[13]

Gravan rolon en tiu subprema laboro ludis la stalinisma sekreta polico, unu el la plej fifama kaj kruela en la historio de la homaro, kiu konis neniujn skrupulojn, hezitojn kaj timojn por persekuti, subpremi kaj neniigi kritikistojn, kontraŭlojn kaj malamikojn. La komunisma sekreta polico estis reeldono aŭ daŭrigo de la carisma sekureca polico, sed la dimensio de la persekutado estis multoble pli granda.[14] La teroro de la totalisma despotismo de la stalinisma diktaturo, kiu cetere okazis en la nomo de la rusa naciisma ŝovinismo, direktis sin kontraŭ la propra popolo de Sovetunio kaj kaŭzis milojn, eble milionojn da senkulpaj viktimoj. La „Granda Teroro“ de la 1930aj jaroj[15] do trafis plej diversajn popolgrupojn: komunistojn, partiajn membrojn, kamparanojn, ekleziulojn, burĝojn, nerusajn etnojn,[16] adeptojn de Trockij, eksterlandajn agentojn, k.c. Kiu ne konsentis pri la ideologio aŭ politiko de Stalin, tiu riskis esti kvalifikita kiel „malamiko de la popolo“ kaj devis timi esti arestita, malliberigita aŭ murdita, kiel tio okazis krom al centmiloj da sovetiaj civitanoj ankaŭ al sennombraj polaj, jugoslavaj, germanaj kaj ĉinaj kamaradoj, kiuj estis likviditaj, kiam ili troviĝis en Sovetunio.

Tiel, la sovetia burokratia sistemo de la stalinismo perdis jam antaŭ la dua mondmilito la trajtojn de la origine intencata sovetsistemo, de kiu restis nur la fasado aŭ perverse tordita versio. La „Granda Teroro“ en Sovetunio, kiu poste estis tabuita, ne estas klarigebla nur per la senskrupula cinika despotismo de unuopa paranoja diktatoro (do de Stalin), sed per tio, ke por la burokratia sistemo ekzistis nenio pli danĝera ol la aŭtentika, sincera komunisto, kiu reprezentis la ideon de la socia justeco kaj kiu insistis

---

[12] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ruĝa_Armeo.

[13] Certe estus utile kaj interese analizi la biografiojn de tiuj ĉefaj protagonistoj de la bolŝevisma partio por pli bone kompreni la karakteron de tiuj homtipoj, kiuj enkondukis la komunismon en Ruslandon kaj formis la novan klason aŭ nomenklaturon. Kelkajn biogramojn oni povas trovi en Vikipedio, sed prefere oni legu solidajn sciencajn librojn.

[14] Vd. Ronald Hingley: Die Russische Geheimpolizei 1565-1970. Bayreuth 1972.

[15] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Großer_Terror_(Sowjetunion).

[16] Vd. precipe: Alexander N. Jakowlew: Ein Jahrhundert der Gewalt in Sowjetrussland. Berlin 2004.

pri ĝia efektivigo. Nature, iuj karakterizaj tradicioj de la historio de Ruslando kaj la persona karaktero de Stalin, kiu estis komparita kun caro Ivano la Kruela, esence kontribuis al tiu teroro.

Post la dua mondmilito tiu stalinisma sistemo estis perforte enkondukita, per elŝatado de aliaj politikaj partioj kaj likvido de la demokratio, ankaŭ en la orienteŭropajn landojn, kiuj estis okupitaj de la Ruĝa Armeo kaj integritaj en la sovetkomunisman blokon, regitan de Moskvo, kiu iom post iom estis hermetike fermita disde la cetera mondo, precipe de la Okcidento. Sub tiaj kondiĉoj ĝuste kritikemaj socialistoj kaj komunistoj, kiuj celis enkonduki la „veran" socialismon, estis persekutitaj, ĉikanitaj kaj mortigitaj en la satelitaj ŝtatoj de Sovetunio, kiel montros ĉi tiu artikolo pli sube.

## 1a parto: Fundamentoj de la starigo de la komunisma kaj stalinisma sistemo en la „socialismaj" landoj de orienta Eŭropo dum kaj post la Dua Mondmilito.

### Situacio en 1945 kaj akaparo de la potenco fare de la komunistoj en la orienteŭropaj landoj

Kune kun la forpelo de la venkita germana armeo, la Ruĝa Armeo de Sovetunio enpenetris la landojn de orienta Eŭropo, kiuj estis liberigitaj de la hitleraj nazioj, kiuj tie furoris per grandskalaj mortigado, bruligado kaj detruado.[17] La sekvanta sovetia okupacio de tiuj landoj ne signifis aŭtomate la politikan monopolon de la komunistoj.

Por la postmilita periodo Sovetunio havis, koncerne orientan Eŭropon, minimume jenajn kvin celojn. Unue la landoj situantaj ĉe la okcidenta limo de Sovetunio devis esti liberigitaj de la germana influo. La sovetianoj ne deziris, ke la evoluo, kiel ĝi prezentis sin post la unua mondmilto, ripetiĝu. La dua intenco de la sovetianoj estis eviti, ke en tiuj landoj la politikan povon akaparos elementoj, kiuj malamike rilatas al Sovetunio. Agnoskante la gravegan kontribuon de Sovetunio ĉe la konkerado de nazia Germanio, la Okcidento, precipe Winston Churchill, ĉefministro de Britio, kiu traktis kun Stalin kaj Roosevelt, poste Truman en Teherano (1943), Jalto kaj Potsdamo (1945) pri la postmilita ordo en Eŭropo,[18] facile cedis la dezirojn de Stalin, praktike perdante sian intereson pri orienta Eŭropo, kiun oni konsideris milita predo de Sovetunio. Nature, en 1945 oni ankoraŭ ne povis scii, kio en tiuj landoj, kiuj baldaŭ malaperos malantaŭ la fera kurteno de la komunisma mondo, okazos kelkajn jarojn poste. Lige kun tiuj du unuaj ĉefceloj, la okcidentanoj do apenaŭ kontraŭstaris, ke la sovetianoj ekspluatu la konkeritan militan predon por ekonomiaj celoj kadre de la rekonstruado de Sovetunio kaj de la pagado de reparacioj, kiu devis okazi en formo de havigo de industriaĵoj, kiujn la sovetianoj malmuntis en tiuj landoj kaj transportis al Sovetunio. Due, la sovetianoj celis eviti, ke en tiuj landoj reinstaliĝos la kapitalisma sistemo, ĉar ili timis, ke per tio tiuj landoj povus plani malamikajn paŝojn kontraŭ Sovetunio per la helpo de la Okcidento kiel natura aliancano. La postulo de la Okcidento, ke la politika sistemo de la orienteŭropaj landoj devos esti demokratiaj, nature povis nur veki la suspekton de Moskvo, kiu planis instali "demokration" en tiuj landoj laŭ propra kompreno, kiu havos nenion komunan kun la burĝa, liberala demokratio de la Okcidento. Kapitalismo kaj demokratio estis konsideritaj kiel ĝemeloj, kiuj certe ne povos pace rilati al Sovetunio, kiel la Kremlo supozeble konkludis. Kaj laste, certe ludis rolon ankaŭ la ideologia konsidero de la sovetianoj, kiuj enplanadis la okupitajn orienteŭropajn landojn por disvastigi la socialismon por atingi ĝian finan venkon. Tiu celo devis esti atingita per „socialismaj revolucioj", efektivigitaj de lokaj komunistoj, kiuj estas subtenitaj de Moskvo. Per tio la sovetianoj celis pravigi la politikajn, ekonomiajn kaj sociajn reformojn en tiuj landoj por eviti la impreson, ke en la kazo de la orienteŭropaj landoj temas pri sovetia okupacio.[19]

En la unuopaj landoj la vojo al la komunisma diktaturo, kiu en la fono estis gvidata de la sovetiaj komunistoj, prenis jenan evoluon:

Kadre de la sekreta aldona protokolo de la t.n. Hitler-Stalin-Pakto de la 23a de aŭgusto 1938 la ŝtata teritorio de ***Pollando*** estis dividita laŭ la riveroj Narev, Vistulo kaj San en du „interes-sferoj" –

---

[17] Vd. ekzemple sub http://www.osteuropa.ch/schreckensorte.htm.
[18] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Teherana_Konferenco, https://eo.wikipedia.org/wiki/Jalta_konferenco, https://eo.wikipedia.org/wiki/Pocdama_Konferenco.
[19] Laŭ Zbigniew K. Brzezinski: Der Sowjetblock. Köln/Berlin 1962, p. 25-30.

sovetia kaj germana.[20] Tiu traktato estis la kondiĉo, por ke Pollando povu esti atakata de la germana armeo la 1an de septembro 1939. La 17an de septembro sekvis la invado de la Ruĝa Armeo, kiu okupis la teritorion de orienta Pollando (nomatan Kresy).[21]

Pro geografiaj aŭ geostrategiaj (kaj historiaj) kialoj Sovetunio estis aparte interesata pri Pollando, ĉar tra Pollando Moskvo povis plu vastigi sian influon al meza Orienteŭropo. Certe, Pollando estis taŭga lando, ĉar la popolo havis fortan kontraŭ-germanan sintenon, kio ebligis pravigi la kunlaboron de Pollando kun Sovetunio.

En 1945 la situacio de Pollando estis pli ol malfacila. Ĝi devis konstrui novajn ŝtatajn strukturojn sur ŝanĝita teritorio, sur kiu troviĝis fremdaj trupoj kaj kiu devis digesti la enormajn translokadojn de la loĝantaro. Pollando perdis 46 procentojn de sia antaŭmilita teritorio kaj unu kvinon de la loĝantaro. La detruoj pro la milito estis gigantaj. Varsovio estis grandparte detruita, precipe ĝiaj partoj flanke de la iama varsovia geto. Al tio aldoniĝis problemoj en la interna politiko, kaj en la ekstera politiko Pollando fariĝis ludilo de la grandpotencoj. En aŭgusto 1945 Pollando interkonsentis kun Sovetunio pri la orienta limo. En la orienta parto de Pollando, kiu nun apartenis al Sovetunio, vivis 12 milionoj da homoj, de kiuj 3,5 milio-noj estis poloj. Kiel okcidenta limo de Pollando estis fiksita, en sekreta traktato inter Sovetunio kaj la t.n. Lublina Komitato[22] kaj poste en interkonsento kun la aliancanoj, la limo laŭ la riveroj Odro kaj Niso. Per tio la teritorio de Pollando estis ŝovita okcidenten laŭ unika maniero. Dum multaj poloj estis loĝigitaj en tiu okcidenta regiono, milionoj da germanoj estis forpelitaj aŭ perdis sian patrujon (inter kiuj granda parto fizike pereis) kaj eksproprietigitaj kaj senrajtigitaj de la komunisma Lublina Komitato, kies prezidanto nomiĝis Edward Osóbka-Morawski, kiu ne estis komunisto, sed maldekstra socialisto. La pola popolo esperis, ke la provizora registaro troviĝanta en la okcidenta ekzilo, revenos al Pollando. Sed la sovetianoj certe klopodis eviti tion. En majo 1945 Sovetunio transdonis al Pollando la administradon de la okcidentaj teritorioj. La koncernan ministerion transprenis la komunisto Władysław Gomułka. Unuafoje Pollando fariĝis kvazaŭ homogena nacia ŝtato de etnaj poloj, sen judoj, germanoj, ukrainoj, blankrusoj kaj litovoj, kiuj ŝrumpis al sensignifaj neglektindaj etnaj mallplimultoj. Grandparto de la judoj estis murditaj de la nazioj dum la dua mondmilito,[23] plimulto de la germanoj estis forpelitaj de polaj komunistoj kaj naciistoj, praktike ĉiuj anoj de aliaj etnaj minoritatoj (precipe ukrainoj, blankrusoj kaj litovoj) estis „transprenitaj“ de Moskvo kaj loĝigitaj en „iliaj“ stalinismigitaj respublikoj en Sovetunio. Tio estis senprecedenca tragedio por kelkcent mil homoj, kiuj antaŭ la milito pace kunvivis en Pollando, kie la eksterma teroro de la nazioj kaj sovetkomunistoj kontraŭ la pola elito[24] postlasis malfortigitan nacion, kiu povis esti manipulata kaj traktata laŭplaĉe sen tro timi la proteston de la Okcidento.

Post la starigo de la „Registaro de la Nacia Unueco“ la komunistoj provis fortigi sian potencon. Sed ili devis renovigi sian partion. La malnova Pola Komunisma Partio estis likvidita kadre de la granda stalinisma teroro, dum kiu preskaŭ ĉiuj anoj de ĝiaj Centra Komitato kaj prezidio estis mortigitaj de la sovetianoj en 1937-38.[25] En januaro 1942 en la varsovia subtero estis fondita nova pola komunisma partio, la t.n. Pola Laborista Partio.[26] Sed la komunisma partio trovis malgrandan subtenon de la pola popolo kaj rapide perdis du trionon de sia membraro ankoraŭ ĝis aŭgusto 1945. En aŭgusto 1945 Stanisław Mikołajczyk, ano de la pola ekzilregistaro dum la dua mondmilito en Londono,[27] refondis la Polan Popolpartion (PSL), kiu reprezentis en sia programo demokratiajn kaj merkat-ekonomiajn ideojn de burĝaj

---

[20] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Pakto_Ribbentrop-Molotov.

[21] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Soveta_invado_en_Pollandon.

[22] La Lublina Komitato estis fondita en julio 1944 kaj apogata de Sovetunio kaj servis ekde la 1a de januaro 1945 kiel provizora registaro de Pollando (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Lubliner_Komitee).

[23] La historio de la holokaŭsto en Pollando kaj orienta Eŭropo bedaŭrinde devas resti ekskludita en ĉi tiu studo, kiu ne celas trakti tiun gravan kaj tragikan epizodon de la homara historio.

[24] En ĉi tiu rilato oni devas aparte mencii la masakron de Katyn apud Smolensk de aprilo/majo 1940 kontraŭ ĉ. 4400 kaptitaj poloj, ĉefe oficiroj, fare de anoj de la sovetia NKVD. Ĉi tiu masakro estis parto de grandstila amasmurdo kontraŭ entute 22-25 mil polaj elituloj, ĉefe profesiaj aŭ rezervaj oficiroj, policistoj kaj aliaj civitanoj de Pollando, inter ili multaj intelektuloj. Ŝovante la kulpon al la germanaj nazioj, kiuj anoncis la trovon de la ĉi-koncerna amastombejo en aprilo 1943, la sovetianoj neis ĉi tiun krimon ĝis 1990, kiam Miĥail Gorbaĉov transprenis la respondecon por tiuj murdoj kaj senkulpiĝis ĉe la pola popolo. (Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Masakro_de_Katin). Du aliaj incidentoj de tiu periodo koncernis la masakron de Jedwabne de julio 1941 (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Massaker_von_Jedwabne) kaj la pogromon de Kielce de julio 1946 (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Pogrom_von_Kielce), en kiuj judoj fariĝis viktimoj de polaj antisemitoj. Sekve al la pogromo de Kielce dekmiloj da judoj, kiuj postvivis la holokaŭston, forlasis Pollandon.

[25] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kommunistische_Partei_Polens_(1918-1938).

[26] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Polska_Partia_Robotnicza.

[27] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Polnische_Exilregierung.

laboristoj, metiistoj kaj kamparanoj, disponigante pri 800 mil membroj en majo 1946 kaj fariĝante potenca konkurento de la komunisma partio, kiu en la fino de 1947 havis pli ol 820 mil membrojn, plejparte laboristoj.[28] En februaro 1946 estiĝis la t.n. „Demokratia Bloko“, al kiu aliĝis ankaŭ la maldekstraj „lublinaj partioj“.[29]

La sovetianoj jam frue (en 1944) antaŭvidis la scenaron de la politika opozicio, kiun ili klopodis kontraŭbatali kaj elŝalti per potenca kaj efika sekureca aparato, al kiu apartenis diversaj sekurecaj organoj, kiuj havis la taskon observi la evoluon en la lando kaj sufoki la politikajn kaj armeajn centrojn de la subtera movado kaj de la ekzilregistaro. La ministerio de la ŝtata sekureco (Urząd Bezpieczeństwa, UB) estis gvidata de komunisto, kiu kontrolis ĉiujn policajn trupojn. Al ĉiu nekomunisma ministro estis trudita komunisma anstataŭanto.

Krom tio, la komunistoj starigis la „Komitaton de la Nacia Unueco“, kiu estiĝis per kunfando de la kontraŭleĝa Pola Laborista Partio (kiu estis fondita en 1942 laŭ ordono de Komitern) kaj la „Komitato de la Polaj Patriotoj“ (fondita en Moskvo en 1941). La 5an de januaro 1945 tiu komitato estis agnoskita de Sovetunio kiel nova registaro de Pollando. Laŭ interkonsento en Jalto tiu komitato, en kiu konsistis el 16 komunistoj kaj kvar nekomunistoj el eksterlando, estis agnoskita ankaŭ de la Okcidento. En decembro 1945 la fondo de novaj partioj estis malpermesita, kio permesis samtempe pli efike kontraŭbatali la ekzistantajn partiojn, precipe la Popolpartion de Stanisław Mikołajczyk kaj la armitan kontraŭ-komunisman subteran movadon. Per amasaj arestoj kaj politikaj murdoj oni provis elŝalti la ĉefajn kontraŭulojn.

Impreson pri la potenco de la pola rezista movado, kiu agadis ĉefe kontraŭ la komunistoj, donas jenaj ciferoj: En printempo 1947 la komunisma reĝimo sciigis, ke 21´176 personoj sidas en la malliberejoj pro politikaj kaŭzoj. En la „amnestia periodo“, kiu finiĝis en aprilo 1947, 55´277 membroj de kontraŭ-komunismaj organizaĵoj transdonis sin kun ĉ. 15 mil armiloj al la aŭtoritatoj. En 1945 estis mortigitaj fare de rezistanoj 1427 komunismaj sekurecaj policistoj kaj 2000 partiaj membroj. Inter 1945 kaj 1948 estis mortigitaj ĉirkaŭ 30 mil personoj.[30]

La unuaj elektoj okazis en januaro 1947, post malbela kampanjo kontraŭ la partioj, kiuj ne apartenis al la „Demokratia Bloko“. Sed pri liberaj kaj justaj balotoj oni tute ne povis paroli. La listoj de elektantoj estis ´purigitaj´, tiel ke pli ol duonmiliono da elektantoj ne povis utiligi sian politikan rajton. 98 kandidatoj de PSL estis forstrekitaj. La elektokomisionoj estis konsistigitaj ĉefe per membroj de la Pola Laborista Partio aŭ membroj de la blokpartioj, dum membroj de PSL ne estis reprezentataj. Al ili oni ankaŭ grandparte rifuzis la eblon nombri la voĉojn. Kelkajn tagojn antaŭ la balotado pli ol 80 mil membroj de PSL estis arestitaj, ĉirkaŭ 100 eĉ estis mortigitaj fare de anoj de la sekureca servo UB. En la tago de la balotado mem la anoj de la Laborista Partio estis transportitaj grupe al la balotejoj, kie ili voĉdonis kolektive kaj publike (individua kaj sekreta voĉdonado estis ebla, sed oni devis atendi en longaj vicoj, kie oni estis prispionita de la sekreta servo). Por atingi la deziratan rezulton oni amase ĵetis falsitajn balotilojn en la urnojn. Mikołajczyk minacis bojkoti la elektojn kaj Usono admonis respekti la konvencion de Potsdamo, kiu antaŭvidis liberajn kaj justajn elektojn. Sed Varsovio kaj Moskvo rifuzis tiun admonon kiel enmiksiĝon en la internajn aferojn de Pollando. La oficiala rezulto de la baloto alportis 80 procentojn por la „Demokratia Bloko“, kiu estis dominita de komunistoj kaj maldekstruloj, kaj nur 10 procentojn por PSL. Sed PSL asertis, ke ĝi ricevis 60-80% procentojn de la voĉoj, dum la „Bloko“ ricevis, cetere laŭ raporto de la KGB-agento Aron Palkin al Stalin, kiu partoprenis la falsadon de la balotoj, nur 50 procentojn. Do, la balotoj, kiuj estis reĝisoritaj de Stalin persone, estis evidente manipulitaj kaj falsitaj. Sed la protesto de la Okcidento restis senefika. Sekve, PSL ricevis nur 49 de 433 mandatoj en la Sejmo, dum la „Demokratia Bloko“ ricevis 384 voĉojn.[31] Tio estis tro malmulte, por ke PSL povu ludu gravann politikan rolon. Gomułka kondamnis la politikon de Mikołajczyk kaj de lia partio kiel detruan kaj maljustan kaj triumfis pri lia malvenko. La 4an de februaro 1947 Mikołajczyk, kiu estis apogita de la kamparanoj, sed al kiu persone mankis reala politika potenco, ĉar li eĉ ne estis subtenita de la Okcidento, demisiis de siaj registaraj funkcioj. En la sama tago la komunisto (fakte stalinisto) Bolesław Bierut estis elektita kiel prezidento de Pollando. Kelkajn tagojn poste oni instalis novan registaron sub la gvido de Józef Cyrankiewicz de la komunisma partio. Dum 25 jaroj li restis ĉefministro de Pollando.

[28] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Polskie_Stronnictwo_Ludowe.
[29] Partioj apartenantaj al tiu bloko vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Blockpartei#Polen.
[30] Brzezinski, p. 29.
[31] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Sejmwahl_in_Polen_1947.

PSL ne plu partoprenis en la nova registaro. Kvankam la komunisma partio okupis nur 5 de 24 ministerioj, ĝi tamen kontrolis la plej gravajn. La 19an de februaro la Sejmo adoptis novan konstitucion, kiu enkondukis „ŝtatan konsilion“ kiel registaran organon, kiu rajtis akcepti leĝojn kaj proklami dekretojn. En la sekva tempo la komunistoj okupiĝis pri la sistema detruado de la opozicio pere de stalinismaj farsprocesoj kaj persekutado de nekomunistoj. Mikołajczyk, kiu timis esti arestita en Pollando, fuĝis al Usono. Sed la opoziciuloj tamen daŭrigis sian batalon en la subtero. La 21an de decembro 1948 okazis la unuiĝo de la Pola Laborista Partio kaj Pola Socialisma Partio – la nova organizaĵo nomiĝis Unuiĝinta Pola Laborista Partio (PZPR). Sur la nova teritorio estiĝis la Pola Popola Respubliko, kiu estis nenio alia ol komunisma diktaturo gvidita de polaj stalinistoj, kiuj estis manipulitaj de Moskvo. Post 1948 la iamaj burĝaj partioj kiel la Unuiĝinta Kamparana Partio, la Demokratia Ligo kaj kelkaj kristanaj partioj estis unuigitaj kaj egalŝaltitaj laŭ du blokpartioj, dum la komunisma partio konservis la absolutan plimulton en la parlamento.

Koncerne la ekonomion, la komunistoj frue agis. Ankoraŭ antaŭ la militfino estis eldonita dekreto de la 6a de septembro 1944 pri la konfiskado de la tuta terposedo, se ĝi mezuris pli ol 100 hektaroj. Bonvena milita predo estis la sennombraj farmbienoj, kiuj estis forlasitaj de la germanoj. La 3an de januaro 1946 sekvis la dekreto pri la konfiskado de la ĉefaj branĉoj de la popola ekonomio. Posedantoj, kiuj perdis sian havaĵon, ne ricevis kompenson. Tamen, la polaj komunistoj insistis pri la „kunekzistado“ de tri ekonomiaj sektoroj: publika, privata kaj korporacia, kio diferencigis la polan de la sovetia modelo.

* * *

Post la militfino de 1945 ***Ĉeĥoslovakio*** estis restarigita en siaj antaŭmilitaj limoj, escepte de Karpatukrainio, kiun Sovetunio aneksis. Kiam en majo eksplodis la ribelo de la ĉeĥa popolo, usonaj trupoj aperis en la urbo Plzeň, kiun ili liberigis. Sed la usonaj trupoj ne haltis en Plzeň, sed daŭrigis sian kurson en orienta direkto, kvankam kun la sovetianoj estis interkonsentite, ke la usona armeo restu ĉe la fiksita militlimo. Malgraŭ tio, la 7an de majo la usona armeo liberigis la urbeton Rokycany. Ili eĉ atingis la urbojn Příbram kaj Kralovice kaj preskaŭ alvenis en Prago. Ĉar la sovetianoj atingis Pragon nur je la 9a de majo, la usonanoj povintus liberigi Pragon, kion ili ne rajtis far kaj devis retiriĝi al la interkonsentita limo. La 12an de majo tuta Bohemio estis okupita de sovetiaj trupoj kaj la germana resisto estis disbatita.[32]

La germana kaj parto de la hungara popoloj estis grandparte forpelitaj aŭ translokitaj. La popoloj de Ĉeĥoslovakio ankoraŭ estis impresataj de la ŝoko de la germana okupacio. Edvard Beneš, disĉiplo de T.G. Masaryk, kiu subskribis en Londono traktaton pri amikeco kun Sovet-unio, revenis al sia patrujo kaj transprenis la oficon de la prezidento. Kun li revenis en majo 1945 la ekzilregistaro, kiu estis koalicio de kvin (laŭ alia fonto ok) partioj, ĉeĥaj kaj slovakaj, kiuj formis la mal-dekstre orientitan „Nacian Fronton“. La komunistoj okupis la ministeriojn de la internaj aferoj, financoj, agrikulturo kaj informado. La socialdemokrato Zdeněk Fierlinger fariĝis ĉefministro. Ĉiuj gravaj politikaj decidoj estis faritaj de la „Nacia Fronto“, opozicio ne ekzistis. Partioj, kiuj kunlaboris kun la nacisocialistoj, estis malpermesitaj. La specifaĵo de tiu lando estis, ke jam en la intermilita tempo la komunistoj ĝuis sufiĉe grandan apogon de la popolo (precipe en Ĉeĥio). Pro la bolŝevismigo sub Klement Gottwald la partio tamen perdis multajn elektantojn.[33] Per tiu maldekstra politika orientiĝo la vojo al la socialismo (aŭ komunismo) estis pli facile aŭ pli nature preparebla en Ĉeĥoslovakio ol en aliaj landoj. Laŭ la registara programo (programo de Kaschau) jam en oktobro 1945 ĉiuj bankoj, asekurejoj, ŝtalaj kaj ferfabrikoj estis ŝtatigitaj. Multaj entreprenoj, kiuj apartenis al germanoj kaj iliaj kunlaborintoj, estis konfiskitaj. En la kamparo oni efektivigis reformon de la grundo. La opcio de la socialismo kiel politika, ekonomia kaj socia sistemo de la estonto ŝajnis esti alloga por granda parto de la popolo de Ĉeĥoslovakio, kun fatalaj sekvoj.

La ĝeneralajn balotojn en majo 1946 venkis la ĉeĥoslovaka komunisma partio per 38 procentoj kaj tiel fariĝis la plej forta partio en la lando, precipe en la ĉeĥa (bohema kaj morava) parto. En Slovakio la komunistoj ricevis nur 30 procentojn, dum la liberal-demokratoj havis 62 procentojn. Por Beneš kaj la nekomunismaj partioj tiu rezulto signifis katastrofon, ĉar evidente ili subtaksis la potencon kaj influon

[32] Vd. https://www.radio.cz/de/rubrik/tourist/pilsen-wurde-am-6-mai-durch-die-us-armee-befreit. La militlimo inter la usona kaj sovetia zono estis interkonsentita en Jalta kaj iris laŭlonge de la linio České Budějovice-Plzeň- Karlovy Vary meze tra okcidenta Bohemio.
[33] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Komunista_Partio_de_Ĉeĥoslovakio.

de la komunistoj. Intertempe, la membraro de la tutĉeĥoslovaka KP rekreskis pli kaj pli. Sub la premo de Sovetunio, en 1947 Ĉeĥoslovakio (kaj aliaj orienteŭropaj landoj) devis rezigni pri la partopreno en la Marŝala Plano de Usono por restarigi la ekonomion de Eŭropo.[34] Pollando kaj Ĉeĥoslovakio intencis peti aliĝon al la Marŝala plano de la Okcidento, kio estis krude evitita de Stalin. Anstataŭ tio Stalin fondis la organizaĵon de la Konsilio por Reciproka Ekonomia Helpo, nomita ankaŭ Comecon,[35] por eviti la eksiĝon de la konkeritaj landoj el la sovetia ekonomia kadro kaj akcelis la sovetiigon kaj rusigon de la koncernaj landoj, kiuj estis okupitaj de la Ruĝa Armeo kaj kie estis instalitaj komunismaj regantoj, kiuj obeis al Moskvo.

Dume, la komunistoj komencis prepari la transprenon de la tuta politika povo en la lando. Ili kondutis pli kaj pli senskrupule en la registaro kaj ignoris la decidojn de la Nacia Fronto, kio fortigis la tensiojn ene de la registaro. Kiam en Prago ok gvidaj policaj funkciuloj estis eksoficigitaj kaj anstataŭigitaj per komunistoj, dek du nekomunismaj ministroj anoncis, ke ili rifuzos partopreni en la kunsidoj de la registaro. La 20an de februaro tiuj ministroj eĉ demisiis. Ili esperis, ke Beneš aŭ proklamos novajn balotojn aŭ instalos registaron de oficistoj. Sed anstataŭ tio la komunistoj mobilizis la popolan milicon. La oficejoj de la nekomunismaj partioj kaj loĝejoj de iliaj membroj estis traserĉitaj, parlamentanoj estis arestitaj senkonsidere al ilia statuso de la imuneco. Kiam la demokratoj rifuzis iujn postulojn de la komunistoj, ĉi tiuj reagis, la 21an de februaro, per aranĝado de amasa manifestacio, sendante sian laboristan milicon, kiu ampleksis 200 mil anojn, sur la Vaclavan Placon, por esprimi sian volon. La komunisto Klement Gottwald, kiu oficis kiel ĉefministro post Fierlinger, alvokis ŝtatprezidenton Beneš renovigi sian registaron, en kiu la komunistoj devis ricevi la ŝlosilajn ministerojn. Post longa hezito, vespere la 25an de februaro Beneš, kiu ne plu kapablis rezisti la premon de la komunistoj, cedis. La 25an de februaro Gottwald estis taskita de li formi novan registaron. Publike li anoncis, ke la prezidento akceptis ĉiujn liajn proponojn. Kelkajn monatojn poste Beneš demisiis kaj Gottwald fariĝis lia posteulo.[36] Oni parolis pri komunisma puĉo, kiu efektiviĝis post forta premo fare de la komunistoj mem. La politika krizo de februaro 1948 kaŭzis, ke la partnera koncepto de la partioj en la Nacia Fronto estis anstataŭigita per sistemo, kiu estis dominita de la komunisma partio. Malgraŭ tio, la Nacia Fronto formale pluekzistis, sed fariĝis malplena korpo. Per tiu historio la socialisma „revolucio" estis efektivigita en tiu lando.

La ĉeĥoslovaka tragedio fariĝis eĉ pli evidenta pro la mistera morto (suicido?) de Jan Masaryk, tiama ministro pri eksterlandaj aferoj, kaj pro la demisio de prezidento Edvard Beneš, kiu rifuzis subskribi la novan konstitucion de majo 1948. Kelkajn monatojn poste li forpasis. Do, en majo 1948 oni abolis la trian res-publikon kaj Gottwald proklamis novan Ĉeĥoslovakan Respublikon kun alia konstitucio, kiu validis ĝis 1960.

Historiistoj de tiu tempo asertis, ke Gottwald ne havis tro grandan intereson transpreni la sovetian modelon, preferante propran „demokratian" ĉeĥoslovakan vojon al la socialismo. Do, Ĉeĥoslovakio (t.e. la ĉeĥoslovaka KP) tiam havintus la principan eblon elekti inter la sovetia kaj jugoslavia ekonomia modeloj. Tiu opcio tamen ne malhelpis al Gottwald kritiki Jugoslavion, kiu, kiel konate, elektis apartan vojon, kio nature signifis praktike la finon de la imagoj pri propra ĉeĥoslovaka vojo. Kvankam la ĉeĥoslovaka KP kredis, ke ĝi ricevos sufiĉan liberan spacon, se ĝi apogas la kontraŭ-jugoslavian kurson de Moskvo, tio estis grandega penseraro, kiu havis fatalajn sekvojn.

Anstataŭ demokratio aŭ jugoslavia modelo, senprecedence radikaliĝis la interna politiko, ekfuroris la stalinisma teroro, kiu celis kaj trafis diversajn grupojn de la socio, kies kontraŭ-komunisma sinteno estis suspektita. Subpremitaj kaj persekutitaj estis en principo ĉiuj civitanoj, kiuj havis burĝan pasintecon (ekzemple la tipo de la familio de Václav Havel), aŭ kiuj estis konsideritaj kiel klasaj malamikoj. Socialdemokratoj, kiuj malaprobis la kunfandigon de sia partio kun la komunisma partio – temis pri ĉirkaŭ 200 mil personoj –, estis same koncernataj de la stigmatizado. Ekleziuloj, precipe katolikaj, spertis fortan premon; pluraj episkopoj estis malliberigitaj, la katolika eklezio estis praktike devigata labori en la subtero. La reprezalioj kulminis en la jura farsproceso kontraŭ Rudolf Slánský, kiu estis gvida figuro de la ĉeĥoslovaka KP, kaj liaj kamaradoj, kiuj devis esti punitaj kiel „titoistoj". La procesoj portis nepretervideblan antisemitisman karakteron: 11 de 13 kondamnitoj estis judoj![37] La pintaj politi-

---

[34] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Plano_Marshall.

[35] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Konsilio_de_Reciproka_Ekonomia_Helpo.

[36] Laŭ https://www.radio.cz/de/rubrik/geschichte/wie-die-kommunisten-an-die-macht-kamen-der-februar-1948.

[37] Pli detale vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Slánský-Prozess; Gerber, J.: Ein Prozess in Prag. Das Volk gegen Rudolf Slánský und Genossen. 2017. La antisemitismo de la sovetiaj komunistoj konsistis el pluraj motivoj. La bolŝevistoj konsi-

kaj respondeculoj de tiuj jaroj nomiĝis Antonín Zápotocký, Viliam Široký kaj Antonín Novotný, kiuj sekvis al la regado de Gottwald. Samtempe oni volis trafi slovakajn „naciistojn“, eĉ komunismajn. Tiel, la slovaka komunisto Gustáv Husák, kiu partoprenis en la slovaka nacia ribelo de 1944,[38] estis enkarcerigita dumvive. Aliflanke, Jozef Tiso, la gvidanto de la dummilita slovaka ŝtato, kiu alianciĝis kun Hitlera Germanio, estis pendigita de komunisma ĉeĥoslovaka popoltribunalo post dubinda jura proceso en aprilo 1947 en Bratislavo.[39] Ĉiuj tiuj temoj kaj nomoj restis strikte tabuitaj dum la komunisma Ĉeĥoslovakio, kiu konis neniun pardonon por siaj kritikantoj kaj kontraŭstarantoj, kiuj estis senkompate subpremitaj kaj persekutitaj en la nomo de la justa afero de la socialismo, kiu montriĝis brutala monstra diktaturo.

* * *

La 21an de aprilo 1945 sovetiaj trupoj atingis Berlinon, kie kvar tagojn poste komenciĝis la kruela batalo por konkeri la ĉefurbon de la detruita Germana Regno. Adolf Hitler mortigis sin la 30an de aprilo en sia berlina bunkro. La 2an de majo la germanoj kapitulacis antaŭ la sovetia armeo kaj la 7an de majo ili faris la samon antaŭ la aliancanoj kun validiĝo je la 8a de majo je la dekunua horo vespere, kiam la milito estis oficiale proklamita kiel finita.[40]

Koncerne la maldekstran partian pejzaĝon, en ***orienta Germanio*** ekzistis la Socialdemokratia Partio (SPD) kaj la Komunisma Partio (KPD), kiuj kverelis inter alie pri la kialoj de la sukcesa kariero de la nacisocialistoj en la Vejmara Respubliko kaj ilia „venko“ en 1933, kiam Hitler akaparis la potencon en tiu lando kaj ŝanĝis ĉion en Eŭropo. Aparte agreseme profiliĝis la komunistoj, kiuj misfamigis la socialdemokratojn kiel „socialfaŝistojn“ kaj simile. En 1945 ekzistis kaj en la socialdemokratia kaj en la komunisma partioj postuloj reunuigi la partion de la laboristaro. Sed la Sovetia Armea Administracio (SMAD) estis kontraŭ tiu plano, ĉar ĝi supozis, ke la komunisma partio fariĝos la ĉefa politika potenco en orienta Germanio, kiu estis okupita de la sovetia armeo. La celo de Moskvo (t.e. Stalin) fakte estis establi la sovetian socialisman sistemon en tuta Germanio. Sed la realeco en la koncernataj landoj tamen montris, ke la komunistoj disponis pri malforta apogo ĉe la popolo, kiu deziris restarigi la tradician demokration eble kun socialisma orientiĝo. Pro tio Moskvo devis ŝanĝi sian strategion rilate la komunisman partion en Germanio. Ankoraŭ en novembro 1945 Stalin kaj Walter Ulbricht lanĉis laŭtan kampanjon por sekurigi la gvidan rolon de la komunisma partio. En tio la komunistoj krude enmiksiĝis en la aferojn de la socialdemokratia partio por atingi la rapidan rezulton de unuecigita partio. Al ili helpis ĉefe la sovetianoj, kiuj fortigis la premon en la regionoj, kiuj troviĝis sub ilia influo. Ulbricht diris, ke „ĉio devas aspekti demokratie, sed ni devas kontroli ĉion.“ Komence de 1946 en la landoj de la Sovetia Okupata Zono (GDR tiam ankoraŭ ne ekzistis kiel ŝtato) oni minacis, ĉantaĝis aŭ arestis multajn socialdemokratojn, kiuj kontraŭstaris tian unuigon, subfosante la socialdemokratian partion. Inter decembro 1945 kaj aprilo 1946 per tiaj ĉikanoj estis koncernataj miloj da socialdemokratoj, kelkaj eĉ estis mortigitaj. Kiu ne estis rekte koncernata kiel socialdemokrato, tiu simple timis ĉikanojn, minacojn, ĉantaĝojn kaj malliberigon. Sennombraj anoj fuĝis al Okcidento.

La 1an de marto 1946 la konferenco de la funkciuloj de SPD decidis organizi voĉdonadon en la sovetia zono kaj Berlino pri la unuiĝo kun KPD. Post diversaj diskutoj pri tio, ĉu la tuja unuiĝo kun KPD kaj la voĉdono okazu en la sovetia zono kaj en Berlino, la 31an de marto en Berlino devis okazi la planita voĉdono de la SPD-anoj. Sed en orienta Berlino sovetiaj soldatoj malhelpis la procedon, fermante la voĉdonejojn tridek minutojn post ilia malfermo, sigelante la voĉdonskatolojn kaj forpelante la homojn, kiuj volis voĉdoni. En la okcidentaj sektoroj 71,3 procentoj de la SPD-membroj partoprenis en

---

deris la judojn aparte obstina religia grupo, kiu estas ideologie malfacile konvertebla. Inter la gvidaj opoziciuloj de Stalin troviĝis famaj judoj kiel Trockij, Zinovev, Kamenev k.a., kiujn la sovetia diktatoro persekutis kaj likvidigis. Dum la stalina tempo miloj da judoj estis persekutitaj, deportitaj aŭ mortigitaj en Sovetunio. Alia kritiko de la stalinistoj koncernis la laŭdiran malamikan karakteron de la cionismo, pri kiu la sovetiaj ideologoj asertis, ke ĝi deflankigas la judajn „laboristojn“ de la „klasbatalo“ kaj ke ĝia aparta juda patriotismo estas tre danĝera. Post ĝia fondo, Moskvo konstatis amare, ke la juda ŝtato (Israelo) preferas aparteni al la okcidenta mondo anstataŭ sekvi la sovetian ekzemplon. Eĉ Ĥruŝĉov praktikis tradiciajn antaŭjuĝojn kontraŭ la judoj, pri kiuj li opiniis, ke ili „ne konas grupan disciplinon, laboras sen kolektivo, estas individuistoj, interesiĝas kaj diskutas pri ĉio ajn kaj fine tamen havas plej diversajn opiniojn“.

[38] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Slovaka_nacia_ribelo. Ankaŭ Alexander Dubček (kaj lia frato) aktive partoprenis en la slovaka ribelo de 1944, kiun li konisderis pli esenca momento por la liberigo de Slovakio kompare kun la invado de la Ruĝa Armeo. Kompare kun Husák Dubček ne estis trafita de stalinismaj reprezalioj.

[39] Pri la historio de Slovakio vd. http://www.planlingvoj.ch/Slovakio-historio.pdf.

[40] La Supera Soveto de USSR nuligis en unuflanka deklaro la militan staton kun Germanio nur la 25an de januaro 1955.

la voĉdono. La rezulto estis, ke 82 procentoj rifuzis „tujan kunfandiĝon" kun KPD, dum 62 procentoj voĉdonis por agadalianco kun la komunistoj. Ĉi tiu rezulto tamen ne signifis, ke la Centra Komisiono de SPD submetiĝis al la esprimo de la volo de la voĉdonintoj. La okcidentaj kontraŭuloj de la unuiĝo (aŭ kunfandiĝo) preferis fondi propran memstaran berlinan SPDn. Misuzante la rezulton de la voĉdonado, la sovetianoj kaj KPD-anoj komencis propagandan kampanjon kaj uzurpis kaj manipulis la SPD-anojn, kiuj estis malhelpataj partopreni en la voĉdonado en la orienta sektoro, farante proprajn kalkulojn, en kio ili asertis, ke anstataŭ 82 procentoj ekzistis nur 29,5 procentoj da kontraŭuloj de la unuiĝo.

Dum la okcidentaj SPD-anoj reorganizis sin en Berlin-Zehlendorf en nova organizaĵo, en Berlino okazis la 15a partia kongreso de KPD kaj la 40a partia kongreso de SPD, dum kiuj oni unuanime decidis fondi la Socialisman Unuecan Partion de Germanio (SED). La 21-22ajn de aprilo 1946 en la admirala palaco de orienta Berlino okazis la unuiga kongreso de SPD kaj KPD por la tuta sovetia zono. La pli ol mil delegitoj estis deklaritaj je 47 procentoj kiel anoj de KPD kaj je 53 procentoj kiel anoj de SPD; 230 delegitoj venis el la okcidentaj sektoroj. Cetere, en la voĉdonoj, kiuj antaŭe okazis en la okcidentaj zonoj, la unuiĝo estis ĉie rifuzita. Kiel prezidantoj de la nova partio estis elektitaj Wilhelm Pieck (KPD) kaj Otto Grotewohl (SPD), iliaj anstataŭantoj fariĝis Walter Ulbricht kaj Max Fechner. Kiam en oktobro 1946 okazis elektoj al la Komunuma Asembleo de Grand-Berlino, SPD ricevis 48,7% ĉe partopreno de 92,3%, dum SED ricevis nur 19,8%, CDU 22,2% kaj LDP 9,3%. La partiaj preferoj de la voĉdonintoj do estis tute klaraj. Tio restis la sola libera baloto en Tutberlino, ĉar en la sekvo tiaj balotoj ne plu okazis pro la disdivido de la urbo. Per la helpo de SED la sovetianoj komencis nun skismigi la urbon per neagnosko de la elektita ĉefurbestro Ernst Reuter flanke de la sovetia urbkomandanto. Ili likvidis la Komunuman Asembleon per la helpo de organizitaj sabotuloj (kiujn SED nomis „popolamasoj"), la sovetia urbkomandanto forlasis la Komandejon de la Aliancanoj kaj blokis la okcidentajn sektorojn de Berlino.

Post ioma tempo la okcidentaj aliancanoj permesis la SED-partion ankaŭ en la okcidentaj sektoroj kaj la sovetianoj allasis SPDn ankaŭ en la orienta urboparto. Do, SPD daŭrigis ekzisti en la orienta sektoro, sed estis malhelpata partopreni en elektoj flanke de la „Nacia Fronto de la demokratia Germanio". Ankaŭ la refondo de SPD fare de kontraŭuloj de la unuigo estis malhelpita de la sovetianoj. Aliflanke, en la okcidentaj sektoroj SED ludis nur marĝenan rolon. En la sovetia zono (inluzive de Grand-Berlino) la unuopaj partioj havis jenajn membronombrojn: KPD (aprilo 1946): 624´000; SPD (31a de marto 1946): 695´400; SED (aprilo 1946): 1´297´600.[41] Ke SED havis nesufiĉan subtenon ĉe la popolo, montris la parlamentaj elektoj en la orientgermanaj landoj en oktobro 1946. Malgraŭ la forta apogo flanke de la sovetianoj, SED ĉie maltrafis la absolutan plimulton, kvankam ĝi fariĝis la plej forta partio. La rezulto estis por SED tiel seniluziiga, ke por eviti similajn scenarojn en estonto la balota leĝo devis esti ŝanĝita en la sovetia zono, tiel ke oni estonte balotis nur laŭ unuecaj listoj, kiuj nature favoris la SED-partion. La elektoj en la posta GDR estis efektivigitaj nur laŭ tiu sistemo por garantii al SED ties preskaŭ entprocentan venkon.[42] Pri liberaj balotoj kaj elektoj oni do nature ne plu povis paroli, ĉar ankaŭ la sovetia zono, kie la 7an de oktobro 1949 estis proklamita la konstitucio de Germana Demokratia Respubliko (GDR), transformiĝis al komunisma diktaturo, kiu manipulis la ŝtatajn aferojn laŭ la sovetia modelo kaj tiel fariĝis marioneto aŭ satelito de Sovetunio, kun fatalaj sekvoj por la politiko, ekonomio, juro kaj kulturo. La (socialisma) „demokratio" de la laboristoj kaj kamparanoj en GDR, kiu establiĝis kiel stalinisma ŝtato kun unusola reganta politika partio, fariĝis pura farso. GDR malaperis malantaŭ la „fera kurteno" de la sovetia imperio, kiu povis manipuli tiun kolonion tiel longe kiel la „Malvarma Milito" daŭris,[43] kaj Germanio restis dividata inter la grandpotencoj.

En la komenco ankoraŭ ekzistis iugrada egaleco inter la KPD-anoj kaj SPD-anoj, sed ekde 1949 la socialdemokratoj komencis perdi sian influon en SED, ĉar la plej gravaj postenoj estis okupitaj de iamaj KPD-anoj. Inter 1948 kaj 1951 okazis purigoj kaj arestoj de tro kritikemaj socialdemokratoj.

* * *

[41] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Zwangsvereinigung_von_SPD_und_KPD_zur_SED.
[42] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Landtagswahlen_in_der_SBZ_1946.
[43] Pri la historio de la „Malvarma Milito" vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Malvarma_milito.

Ankaŭ ***Hungario*** multe suferis dum la dua mondmilito. En marto 1944 estis formita nova hungara registaro kun Döme Sztójay kiel ĉefministro. En mallonga tempo la juda loĝantaro estis senrajtigita per 107 diversaj leĝoj kaj ekde aprilo ĝi estis deportita al la naziaj koncentrejoj kaj neniigejoj de Aŭŝvico kaj aliaj lokoj. Ĉi tiun laboron organizis Adolf Eichmann, la reprezentanto de Berlino en Hungario por tiu ĉi afero. En du monatoj estis deportitaj pli ol 437 mil judoj el Hungario. Komence de julio la intermilita hungara reganto Miklós Horthy ordonis interrompi la deportadon de la judoj. En oktobro la Ruĝa Armeo trapasis la hungaran limon kaj okupis la orienton de la lando. La 15an de oktobro Horthy estis forigita de sia posteno, kaj la potenco estis transdonita al la faŝisto Ferenc Szálasi, kiu daŭrigis la deportadon de la judoj kun la sekvo, ke ankoraŭ kelkmil judoj pereis en la budapeŝta geto kaj dum la transportado al la koncentrejoj. Budapeŝto, kiu estis ripete trafita de britaj kaj usonaj bomboj dum tiu jaro, fine de decembro estis ĉirkaŭita kaj izolita de sovetiaj trupoj. Dum la bataloj, kiuj daŭris ĝis februaro 1945 kaj kaŭzis 38 mil mortintajn civilulojn, Budapeŝto estis grandparte detruita. La judoj en la budapeŝta geto estis liberigitaj de la sovetia armeo. La milito finiĝis en Hungario la 4an de aprilo.

Unue, la aliancanoj kaj la postmilita generacio de hungaroj mem antaŭvidis demokratian konstitucion por Hungario. En oktobro 1944 ili (t.e. Churchill kaj Stalin) ankoraŭ ne estis tute certaj, ĉu Hungario apartenu estonte al la sovetia aŭ okcidenta sfero. La sovetianoj, kiuj okupis la landon, komence ne malhelpis al la provizora registaro, kiun konsistigis „kontraŭfaŝismaj“ fortoj, precipe oficiroj kaj membroj de la antaŭmilitaj partioj, kaj kiu estis gvidita de ĉefministro Béla Miklós-Dálnoki, kiu estis elektita de la provizora Nacia Asembleo en Debrecen kun sovetia aprobo. Malantaŭ la kulisoj la sovetianoj nature ne restis pasivaj. Estis starigitaj novaj organoj de la polico kaj sekreta servo, kiuj komencis akuzi kaj kondamni militkrimulojn kaj kunlaborintojn de la nazioj kaj estis gviditaj de la komunisto Péter Gábor. Laŭ hungaraj indikoj, 60 mil homoj estis akuzitaj, pli ol 10 mil kondamnitaj kaj 200 ekzekutitaj. Inter la ĉi-lastaj troviĝis 3 ĉefministroj de la militaj jaroj plus la hungara faŝisto Ferenc Szálasi kaj la ministroj de lia registaro. Post tio estis efektivigita radikala reformo de la grundo. Pri Hungario respondecis la sovetia marŝalo Kliment Voroŝilov, kiu tiris la fadenojn en tiu lando kaj komunikis al la hungaraj politikistoj, ke en 1945 oni intencas okazigi parlamentajn elektojn. Malgraŭ la evidentaj klopodoj de la sovetianoj manipuladi tiujn elektojn, ili povis okazi la 7an de novembro sen malhelpoj. Ilin nete gajnis la Partio de la Malgrandaj Kamparanoj per 57 procentoj, dum la aliaj kiel la Socialdemokratia Partio kaj la komunistoj ricevis nur po 17% de la voĉoj.[44] Malgraŭ tiu malforto, pli kaj pli grandan influon akiris en la hungara politiko la hungaraj komunistoj (stalinistoj), kiuj revenis el Sovetunio: Mátyás Rákosi, Ernő Gerő, József Révai, László Rajk kaj János Kádár. Béla Miklós-Dálnoki abdikis post la elektoj, sed restis aktiva en la politiko antaŭ ol definitive forlasi ĝin. La 1an de februaro 1946 la monarkio, kiu formale pludaŭris ankaŭ sub Horthy, estis abolita kaj la respubliko proklamita. Zoltán Tildy, protestanta pastoro kaj membro de la Partio de la Malgrandaj Kamparanoj, fariĝis nova prezidento, kiu nomis sian partian amikon Ferenc Nagy nova ĉefministro.

En januaro 1946 komenciĝis la forpelado de la germanoj el Hungario. Koncernataj estis pli ol 185 mil personoj, kiuj estis senditaj al diversaj sektoroj de Germanio. Samtempe, okazis interŝanĝoj de 95 mil hungaroj el Slovakio al Hungario kaj 73 mil slovakoj el Hungario al Slovakio.

Intertempe, la sovetianoj komencis detrui la demokratian sistemon de Hungario, dispecigante la Partion de la Malgrandaj Kamparanoj, arestante ĝian ĝeneralan sekretarion Béla Kovács en februaro 1947, igante ĉefministron Ferenc Nagy elmigri al eksterlando (Svislando) en majo de la sama jaro. Lian ekzemplon baldaŭ sekvis ankaŭ la prezidanto de la Nacia Asembleo, Béla Varga. Fine de majo, Lajos Dinnyés, kiu estis lojala adepto de la komunistoj, transprenis la oficon de la ĉefministro. Al lia koalicia registaro apartenis László Rajk kiel ministro pri eksteraj aferoj kaj János Kádár kiel ministro pri internaj aferoj. Laŭ sovetia premo tiu registaro devis malakcepti la ekonomian helpprogramon de Usono, la t.n. Marŝalan planon, kaj subskribi ekonomian kaj kreditan konvencion kun Sovetunio. Fine de julio 1947 la parlamento estis dissolvita.

Ankaŭ la duonliberaj parlamentaj elektoj de la 31a de aŭgusto 1947 finiĝis por la komunistoj per seniluziiĝo, malgraŭ krudaj provoj manipuli kaj falsi ilin kiel en novembro 1945. Kvankam la maldekstra bloko ricevis 61 procentojn de la voĉoj kaj la komunistoj fariĝis per 22,25% la plej forta

[44] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Parlamentswahl_in_Ungarn_1945.

unuopa partio, la komunistoj maltrafis la absolutan plimulton.[45] En junio 1948 la maldekstraj socialdemokratoj kaj la komunisma partio estis formale kunigitaj al la Partio de la Hungaraj Laboristoj (MDP), kiu portis tiun nomon ĝis la 1a de februaro 1949. Ĉi tiu partio, kiu nombris 1,1 milionojn da membroj, okazigis sian unuan kongreson en junio, dum kiu la eksa socialdemokrato Árpád Szakasits estis elektita kiel prezidanto kaj Mátyás Rákosi fariĝis ĝenerala sekretario. Unu tagon poste la parlamento elektis Szakasits prezidento de la respubliko. Zoltán Tildy estis arestita kaj kondamnita kadre de unu el tiuj fifamaj farsprocesoj. La saman sorton cetere travivis ankaŭ la katolika kardinalo kaj primaso de Hungario, József Mindszenty, kiu estis kondamnita al dumviva malliberigo kaj fariĝis la ĉefa simbolo de la kontraŭ-komunisma opozicio en Hungario. La fondo de la t.n. Hungara Sendependa Popola Fronto, kiu okazis la 1an de februaro 1949, finis la sorton de la opoziciaj partioj. La 15an de majo de tiu jaro ankoraŭfoje okazis parlamentaj elektoj, por kiuj krom MDP kandidatiĝis ankaŭ la bloko de diversaj partioj (iuj kamparanaj, popola kaj radikala partioj). Sed tiuj elektoj, kiuj utiligis unuecajn listojn, estis ŝajnigaj aŭ pseŭdaj, ĉar ili jam okazis post la politika egalŝaltado de la hungara politika sistemo kaj disdividis la mandatojn laŭ fiksa sistemo. Laŭ la oficiala rezulto la partio MDP (kiu ricevis la plej multajn mandatojn) atingis kun la malgrandaj blokpartioj 97,1 procentojn de la voĉoj. Kontraŭaj voĉoj estis nur 165 mil kaj nevalidaj voĉoj estis 86 mil.[46] La 20an de aŭgusto 1949 estis proklamita nova hungara konstitucio laŭ sovetia modelo, kiu transformis Hungarion al komunisma „Popola respubliko“ kaj forigis ĉiujn obstaklojn por starigi komunisman diktaturon, kiu estis regita de la stalinisma potenculo Mátyás Rákosi. Ankaŭ Hungario malaperis malantaŭ la „fera kurteno“ por 40 jaroj.

* * *

Rilate ***Rumanion*** la sovetianoj estis certaj, ke tiu lando apartenos grandparte („90%“) al la sovetia influa sfero, kiel Churchill kaj Stalin neoficiale interkonsentis en oktobro 1944 en Moskvo laŭ sugesto de la brita ĉefministro. La rumana armeo, kiu batalis flanke de hitlera Germanio, travivis grandan malvenkon en decembro 1942 en Sovetunio. Kiam en februaro 1945 la grandpotencoj Usono, Sovetunio kaj Grandbritio konferencis en Jalto, la komunismaj partioj jam komencis realigi siajn intencojn – la orienteŭropaj landoj devis esti sovetiigitaj. La maniero integri tiujn landojn en la sovetian blokon efektiviĝis en ĉiuj koncernataj landoj laŭ la samaj principoj kaj mekanismoj: kruda enmiksiĝo flanke de Moskvo sen ajna respekto de la politika volo de la koncernata popolo, sovetia helpo al la lokaj komunistoj atingi la celojn, subpremado kaj forigo de konkurencaj nekomunismaj politikaj fortoj kaj kunigo de la maldekstraj partioj en bloko sub komunisma gvido, manipulado kaj falsado de parlamentaj elektoj, eliminado de la politika opozicio kaj egalŝaltado de la politika pejzaĝo, ŝanĝo de la konstitucio, proklamo de popola respublko, enkonduko de la „diktaturo de la proletaro“, kiu signifis la regadon de unusola politika partio (nome la komunisma), instalado de marionetaj ĉefministroj kaj prezidentoj, kiuj devis apliki la volon de la sovetianoj, limigo de la bazaj civitanaj rajtoj kaj liberecoj kaj totala kontrolado de la socio helpe de la sekreta polico, pri la rimedoj sur ekonomia kampo ni tute ne parolis. Ankaŭ Rumanio fariĝis ege kruda kaj tragika ekzemplo en ĉi tiuj rilatoj,

La 23an de aŭgusto 1944, en la tago de la kapitulaco de Rumanio, la rumana reĝo Mikaelo Ia ankoraŭ instalis la registaron de Constantin Sănătescu flanke de la armeo, kiu konsistis precipe el senpartiaj fakuloj. Samtempe, la kvar partioj (kamparana, naciliberala, socialdemokratia kaj komunisma) transprenis la politikan respondecon kaj unuiĝis en junio 1944 en „Nacidemokratia Bloko“. Post kiam la Ruĝa Armeo en aŭgusto komencis ataki Rumanion, la bizara diktatoro Ion Antonescu, kiu kunlaboris kun la germanoj, estis forigita helpe de tiu bloko kaj per la apogo de la reĝo kaj arestita de sovetiaj agentoj. La 25an la reĝo proklamis la militon al Germanio. Sub la regado de Antonescu (kiu puĉis kontraŭ la reĝo la 6an de septembro 1940[47]) centmiloj da rumaniaj kaj ukrainiaj judoj estis senditaj al koncentrejoj en Transnistrio, kiu estis okupata de Rumanio, kie multaj el ili mizere pereis.

Rigarde al la intencoj de Sovetunio, la komunisma partio, kiu antaŭ la milito ludis nur marĝenan rolon en Rumanio kaj estis malpermesita en 1924, fariĝis pli kaj pli grava faktoro. Multaj gvidaj figuroj de tiu partio, kiu havis eble milon da membroj, troviĝis en la eksterlanda ekzilo. Post la puĉo kontraŭ

[45] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Parlamentswahl_in_Ungarn_1947.
[46] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Parlamentswahl_in_Ungarn_1949.
[47] En la intermilita tempo Rumanio estis sinsekve regata de la reĝoj Ferdinando Ia (ĝis 1927), Mikaelo Ia (ĝis 1930 kaj 1940-47) kaj Karolo IIa (1930-40).

Antonescu, diversaj rumanaj komunistoj kiel Vasile Luca kaj Ana Pauker revenis el Sovetunio al Rumanio, kie ili komencis dikti la tonon. En oktobro 1945 Gheorghe Gheorgiu-Dej, kiu de 1933 sidis en diversaj rumaniaj prizonoj, fariĝis, kun la aprobo de Stalin, ĝenerala sekretario de la rumana KP, kiu ricevis la nomon Rumana Laborista Partio (PMR).

Sed la rumana popolo esence preferis la socialdemokratian partion, al kiu la homoj amase aliĝis, anstataŭ al la komunisma partio. En oktobro 1944 la KP finis sian aliancon kun la kamparana kaj la naciliberala partioj kaj formis novan unuiĝon, kiu orientiĝis laŭ la maldekstraj politikaj fortoj. El tio estiĝis la „Naci-Demokratia Fronto“, al kiu apartenis la komunistoj, socialdemokratoj, la partio de Petru Groza kaj du grupiĝoj, kiuj originis el la kamparana kaj naciliberala partioj. Post kiam la sovetianoj misfamigis iun grandan manifestacion de la kamparana partio kiel „por-faŝisman“ elpaŝon, Sănătescu estis devigita demisii. Sed la reĝo denove taskis lin formi registaron, kiu devis akcepti Petru Groza kaj Gheorghiu-Dej kiel ministrojn. Sub la premo de la maldekstruloj Sănătescu ree sentis sin devigita demisii, kion li faris la 2an de decembro 1944 por definitive forlasi la registaron. Lia posteulo fariĝis Nicolae Rădescu, kiu kiel Sănătescu reprezentis la reĝan armeon.

Kiel Voroŝilov por Hungario, Andrej Viŝinskij, la iama ĉefakuzanto dum la stalinismaj procesoj en la tridekaj jaroj en Sovetunio, respondecis por Rumanio. Li ripete vizitis Rumanion por esprimi sian opinion. Kiam fine de februaro 1945 li aperis en Bukareŝto, li postulis ŝanĝon de la rumana registaro. En Rumanio Viŝinskij kondutis ege krude kaj arogante, precipe kiam li sentis kontraŭstaron flanke de la reĝo, kiu tute ne ŝatis kaj akceptis lian altrudan manieron. La 28an de februaro Viŝinskij submetis ultimaton al la reĝo, de kiu li postulis trovi novan ĉefministron, kaj minacis Rumanion per malagrablaj sekvoj, se la reĝo ne obeos. Dezirita de la sovetia flanko kiel ĉefministro estis la nomita Petru Groza, kiu reprezentis la maldekstran kamparanan partion. Sed la reĝo rifuzis tiun kandidaton kaj cedis al la premo nur post kelkaj tagoj, tiel ke Groza ekoficis kiel ĉefministro la 6an de marto 1945. Lian registaron, kiu havis 18 membrojn, konsistigis 14 anoj de la „Naci-Demokratia Fronto“. Per tiu registaro, kiu do estis kontrolita de komunistoj, kvankam ĝi aspektis kiel koalicio kaj estis prezidita de nekomunisto, Moskvo do atingis klaran celon, dum en Germanio la milito ankoraŭ ne estis finata. Paralele okazis en la tuta lando eksoficigo de la oficantaj urbestroj, tiel ke de 58 prefektejoj 56 estis ricevitaj de komunistoj kaj ties komplicoj. La okcidentaj aliancoj rimarkis, ke la sovetianoj sekrete subtenas la rumanajn komunistojn, sed ili restis indiferentaj kaj senpovaj, ĉar pli grava tasko estis senarmigi la rumanajn taĉmentojn kaj fini la militon en Eŭropo.

Jam en marto 1945 la rumana registaro decidis reformon de la grundo, kiu antaŭvidis la konfiskon de la grundo, senmoveblaĵoj, bruto kaj agrikulturaj maŝinoj. Tiuj rimedoj fortigis la komunisman regadon en Rumanio.

Rumanio daŭre suferis sub la stigmo de ŝtato kun faŝima karaktero, kiu faris propagandon kontraŭ Sovetunio, pro kio la rumanoj devis esti punitaj. Dekreto de la 20a de januaro 1945 ordonis puni militkrimulojn. Okazis arestoj de reprezentantoj de la malnova reĝa reĝimo, Antonescu kaj aliaj personoj staris antaŭ la tribunalo en majo 1945. Pro siaj krimoj, kiujn ili faris dum la milito, ili estis kondamnitaj al la morto kaj pafekzekutitaj.

La 19an de novembro 1946 en Rumanio okazis parlamentaj elektoj, kiujn gajnis la komunistoj per 378 de 414 mandatoj, ne sen drasta manipulado de la balota proceduro. La kamparana partio ricevis nur 33 kaj la naciliberala partio 3 mandatojn. La usona reprezentanto Berry protestis kontraŭ tiu rezulto, kiun li nomis nova senprecedence malalta nivelo de balotoj sur la Balkano. Sed Groza, al kiu plaĉis la rolo, kiun li povis ludi, kaj la sovetianoj estis tre kontentaj. La okcidentanoj komprenis, ke ili definitive perdis la politikan ludon en Rumanio, kiu falis en la manojn de Sovetunio, kaj ke liberaj elektoj en tiu lando estas iluzio. En februaro 1947 Rumanio subskribis pactraktaton kun siaj iamaj militaj kontraŭuloj, kiu baziĝis sur la armistico de septembro 1944. Rumanio ricevis nordan Transsilvanion, sed devis rezigni pri suda Dobruĝo, Besarabio kaj norda Bukovino. Sovetunio ricevis la rajton havi tiom multajn trupojn en Rumanio, kiom ĝi deziras. Alia traktato de majo 1945 kun Rumanio donis al Sovetunio, kiu estis interesata pri la rumaniaj terresursoj (precipe gaso kaj nafto) kaj la kemia industrio, la eblon radikale ekspluati la rumanan ekonomion, kiun ĝi finfine ruinigis kaj dezertigis. La problemoj de la rumana popolo, kiu havis preskaŭ nenion por manĝi aŭ aĉeti, ne interesis la sovetianojn, ĉar Rumanio devis pagi

reparaciojn per diversaj varoj.[48] En Moldavio furoris terura malsat-katastrofo, tiel ke la usona Ruĝa Kruco devis sendi nutraĵojn.

Sub la premo de Moskvo Groza pli kaj pli alproksimiĝis al la pozicioj de la komunisma partio kaj de Sovetunio. En printempo 1947 li disbatis la restaĵojn de la politika opozicio kaj sendis ĝiajn gvidantojn en la prizonon. La kamparana partio estis malpermesita la 15an de aŭgusto 1947.

La pli kaj pli forta komunisma premo kaŭzis ankaŭ, ke la reĝo estis devigita abdiki, kion Mikaelo faris la 30an de decembro 1947, ĉar lia situacio estis senespera. Kiel lia patro, reĝo Karolo IIa, kiu vivis en Brazilo, ankaŭ Mikaelo devis forveturi al eksterlando.

Okaze de la elektoj al la Nacia Asembleo de marto 1948 la Rumana Laborista Partio, kiu kandidatiĝis kadre de la kolektiva listo „Naci-Demokratia Fronto", ricevis 405 de 414 mandatoj. La 13an de aprilo 1948 oni proklamis la „Rumanan Popolan Respublikon", kiu ricevis novan konstitucion, kiu estis aprobita en la sama tago. Kvankam la potencon havis la parlamento, la realan povon posedis la Centra Komitato de la KP kaj ties politburoo. La planekonomio estis enkondukita fine de 1948 kaj en 1950 sekvis la unua kvinjara plano. Kun tio sekvis rapida sovetiigo de la lando, kiu signifis la ŝtatigon de la industrio, bankoj, transporto, komerco, malsanulejoj, teatroj kaj kinejoj kaj la enkondukon de la kolektiva posedo. En 1950 90% de tiuj celoj estis atingitaj. Sekvis ankoraŭ la ŝtatigo de la hoteloj kaj pensionoj kaj objektoj, kiujn iam posedis „burĝaj elementoj". Laŭ la modelo de Sovetunio la peza industrio ricevis la prioritaton malfavore al la konsumindustrio, agrikulturo kaj konstruado de loĝejoj. La entreprenoj kunfandiĝis en grandaj kombinatoj, kiuj oni nomis „industriaj centroj", kaj la agrikulturo estis kolektivigita. Pro la kontraŭstarado de la kamparanoj tiu procezo tamen malrapidiĝis. La sovetiecaj kolĥozoj povis esti enkondukitaj nur en 1959 (en tiu tempo Pollando kaj Jugoslavio jam estis abolintaj ilin). La fino de la kolektivigo estis proklamita en 1962. La produktado de la energio estis akcelita pere de karbo kaj akvo, dum la nafto estis eksportita. La urboj estis „modernigitaj" laŭ sovetia maniero, kio donis al tiuj novaj loĝcentroj tre malagrablan aspekton. La kreskantan mizeriĝon de la urbaj periferioj oni tamen ne toleris kaj celis eviti. La monde fifama sekureca servo „Securitate", kiu estis instalita en 1948, ricevis la taskon grandskale kontroli la ŝtaton kaj socion. La libereco de la gazetaro estis limigita. La ortodoksa eklezio perdis siajn rajtojn.

La fruaj jaroj de la komunisma regado en Rumanio estis karakterizataj de politika malstabileco kaj amasaj arestoj de politikaj kontraŭuloj. Diversaj grupoj batalis por la potenco: jen la grupo ĉirkaŭ Ana Pauker kaj Vasile Luca, kiuj pasigis la militon en Sovetunio, jen la grupo de Gheorghe Gheorghiu-Dej, kiu dummilite restis en prizonoj de Rumanio. Tria grupo formiĝis ĉirkaŭ Lucrețiu Pătrășcanu, kiu kaŝiĝis en Rumanio dum la Antonescu-tempo kaj partoprenis en la registaroj de reĝo Miĥaelo post la puĉo kontraŭ Antonescu. Petru Groza ludis la rolon de ĉefministro, kiu evidente tre plaĉis al li, ĝis la 2a de junio 1952, kiam li ankoraŭ fariĝis, formale, „honora prezidento" de la respubliko. Kiel nova ĉefministro sekvis lin la stalinisto Gheorgiu-Dej. Vasile Luca perdis siajn politikajn funkciojn en majo 1952 pro „dekstra deflankiĝo" kaj estis ekskludita el la KP kiel tio okazis ankaŭ al Ana Pauker (kiu devenis de juda familio), kiu estis kiel Luca jure kaj politike persekutita. Pătrașcanu estis denuncita de Gheorgiu-Dej kiel usona kaj brita agento, klasifikita kiel „titoisto" kaj ekzekutita post proceso en aprilo 1954 en la prizono de Jilava. Sub Ceauşescu ili estis rehonorigitaj. Alia politika viktimo nomiĝis Gheorghe Tătărescu, kiu estis vicĉefministro kaj ministro pri eksterlandaj aferoj en la registaro de Groza. Ĉar li kritikis la komunisman transformadon de Rumanio, li devis eksiĝi el la registaro en novembro 1947 kaj estis sendita en la malliberejon, kiun li povis forlasi nur en aŭtuno 1955.

* * *

Ne malpli krude Stalin traktis ankaŭ ***Bulgarion***. Dum la legendeca kunveno de Churchill, Eden, Stalin kaj Molotov de oktobro 1944 en Moskvo, kie la demando de la influaj sferoj sur la Balkano estis traktita, Bulgario estis ŝovita 80-procente al la sovetia sfero. Tio estis enorma venko, kvazaŭ donaco por Stalin, kiu havis fatalajn sekvojn por la koncernataj landoj, kiuj falis sub sovetian hegemonion, sen ajna kontraŭstaro de la Okcidento.[49] Bulgario eble estas iom aparta kazo pro sia tradicia „amo" al Ruslando, kiu

[48] Ĉar Sovetunio montris sin „grandanima", la ŝuldoj de Rumanio estis duonigitaj en 1948 kaj la repagoj finiĝis en 1952. Sed Rumanio estis malplena.
[49] Ŝajnas, ke Churchill faris tiun komplezon kvazaŭ por danki al Stalin, ke Moskvo rezignis pri la subteno de la komunisma subtera armeo en Grekio. Sekve, Bulgario fariĝis la viktimo de tiu „marĉandaĵo", kiun la orienteŭropaj landoj devis konsideri kiel perfidon. Churchill mem konsideris la rezulton „justa". La greka partizana movado, kiu estis gvidata de komunistoj, estis

liberigis la landon de la turkoj en la 19a jarcento. Malgraŭ tio Bulgario fariĝis tragika viktimo de la senskrupula konkeremo de Moskvo.

Kiam la Ruĝa Armeo atingis la Danubon fine de aŭgusto 1944, Konstantin Muraviev entreprenis hastan provon eviti la sovetian konkeron de sia lando. Li nuligis la aliancon kun Germanio kaj proklamis la eksiĝon de Bulgario el la milito. Sed estis tro malfrue. La propono pri armistico al la adreso de Moskvo estis ignorita de ĝi. La 5an de septembro Sovetunio proklamis la militon al Bulgario. La Ruĝa Armeo enpenetris Bulgarion kaj okupis la landon sen renkonti konsiderindan reziston. En la nokto al la 9a de septembro la registaro de Muraviev estis forpuĉita de la armeo kaj anstataŭigita per iu „Nacia komitato" de la „Patrolanda Fronto". Ĉi tiu „deveti septemvri" devis funkcii por Bulgario kvazaŭ kiel la 25a de oktobro (7a de novembro) 1917 en Ruslando, por ke la socialismo en Bulgario ricevu legitimecon.

Dum la monarkia tempo[50] la komunisma partio de Bulgario estis malpermesata, giaj gvidantoj Georgi Dimitrov kaj Vasil Kolarov devis fuĝi al eksterlando (Sovetunio). La bulgara KP estis gvidita de la moskva oficejo, kiu estis reprezentita de Georgi Dimitrov (iama gvidanto de Komintern), Vasil Kolarov, Georgi Damjanov kaj Vâlko Ĉervenkov. Tiuj fatalaj lakeoj de Stalin reaperis en Bulgario kun la sovetia armeo kaj tuj pretendis la regopovon, kio ne povis okazi sen konfliktoj kun aliaj politikaj partioj, kiuj estis tradicie establitaj en Bulgario.

Sed la decidoj pri Bulgario estis jam delonge faritaj en Moskvo. En 1941 Dimitrov rekomendis al la kamaradoj en Bulgario kunigi la kontraŭfaŝismajn fortojn al koalicio kadre de „Patrolanda Fronto". Sed la nekomunismaj politikistoj de Bulgario ne estis interesataj pri tia kuniĝo. Precipe la potenca Kamparana Popolunuiĝo kaj la Demokratia Partio kontraŭstaris tiun ideon. Tiel, la ĉefa aliancano de la komunistoj fariĝis nur iu radikala maldekstra parto de la Kamparana Popolunuiĝo, la t.n. Pladne-grupo, kiu estis gvidita de Nikola Petkov, kiu adoris Sovetunion. Kiel menciite, la 9an de septembro 1944 la „Patrolanda Fronto" transprenis la regadon en Bulgario.

En la unua registaro de la „Patrolanda Fronto", en kiu la komunistoj, kiuj tiam ankoraŭ estis malforta partio, koaliciis kun la partioj Zveno kaj Pladne, la gvidantoj de la ŝtata puĉo de majo 1934 okupis la postenojn de la ĉefministro (Kimon Georgiev) kaj de la milita ministro. En tiu registaro la komunistoj okupis nur la ministeriojn de la internaj aferoj kaj de la justico. Per tiu povo ili strebis iom post iom elimini siajn kontraŭulojn. Precipe la monarkiistoj, kiuj kunlaboris kun la germanoj dum la milito, devis esti elsarkitaj. Kiu inter la signifaj politikistoj de la malnova reĝimo ne povis fuĝi al eksterlando, tiu estis senkompate malliberigita aŭ mortigita. La forpelo de tiuj homoj kreis vakuon de la potenco, kiun la komunistoj povis rapide plenigi. La emocie provokita etoso de la venĝo kaj finkalkulado kun „monarki-faŝismaj", „naci-reakciaj" kaj „kontraŭ-demokratiaj" elementoj kaŭzis neimageblan teruron. Amaso da veraj kaj imagataj kontraŭuloj de la komunistoj estis persekutitaj kaj eliminitaj tre rapide laŭ sanga maniero, kiu estis unika en sudorienta Eŭropo. En tio Georgi Dimitrov ludis esencan rolon, ĉar ankoraŭ el Moskvo li alvokis en telegramo subskribita de li kaj sendita al Bulgario al tiu teroro, kiu trafis milojn da homoj. La ministro pri internaj aferoj, Anton Jugov, starigis „popolajn milicojn", kiuj postĉasis en senkompata kampanjo la celitajn personojn en la tuta lando. En jura proceso 86 gvidaj bulgaraj politikistoj estis akuzitaj pro ŝtata perfido kaj ekzekutitaj. Inter ili troviĝis princo Kirilo kaj kelkaj registaranoj, kiuj kunlaboris kun la akso.[51] Sub la gvido de la ministro pri justico, Dobri Terpeŝev, spontane formiĝis fifamaj „popolaj tribunaloj", kiuj kondamnis 2138 altrangajn oficirojn kaj iamajn registaranojn al morto, dum 3500 aliaj laŭdiraj simpatiantoj de la malnova monarkia reĝimo estis dumvive senditaj al prizonoj. Tiu sorto trafis ankaŭ Konstantin Muraviev, kiu pereis en la malliberejo. Aliaj politikistoj, kiuj rifuzis kunlabori kun la komunistoj, malaperis en kruelaj laborkoncentrejoj.

Post kiam la komunistoj elimimis la enlandajn kontraŭulojn, ili povis daŭrigi fari la samon kun la internaj rivaloj de la „Patrolanda Fronto". Ankaŭ en tio ili ricevis efikan apogon flanke de la sovetia okupacia potenco, kiu provizis la bulgarajn komunistojn per denuncaj informoj kaj kompromita materialo pri demokratiaj politikistoj. La unua viktimo de tiu kampanjo fariĝis d-ro Georgi M. Dimitrov,

---

kruele detruita per esenca brita apogo. En Bulgario ĉiuj fortoj, kiuj esperis ricevi okcidentan apogon kaj kontraŭstaris la komunisman minacon, estis forigitaj.

[50] Inter 1879 kaj 1946 Bulgario estis monarkio kadre de la Tria Bulgara Regno. Ĝiaj regantoj estis princo Aleksandro Ia de Battenberg (ĝis 1886), princo/caro Ferdinand Ia de Saksio-Koburgo kaj Gotha (ĝis 1918), caro Boris IIIa de Saksio-Koburgo (ĝis 1943) kaj Simeon IIa de Saksio-Koburgo (aŭgusto-septembro 1946).

[51] Pri la signifo vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Akso_Berlino-Romo-Tokio.

nomita Gemeto (la kongruo de lia nomo kun tiu de la komunisto Georgi Dimitrov estis pura hazardo), kiu revenis el la eksterlanda ekzilo, kien li fuĝis post arestoj kaj turmentoj fare de la carisma polico. Li simpatiis kun la Pladne-partio, kies partoprenon en la „Patrolanda Fronto” li subtenis. En Bulgario li komencis kontraŭbatali la regado-ambiciojn de la komunistoj. En oktobro 1944 li estis elektita kiel ĝenerala sekretario de la Kamparana Popolunuigo, kiun li klopodis establi kiel opozicion al la maldekstruloj. Intertempe ankaŭ en Bulgario estis starigita Kontrolkomisiono de la aliancanoj, kiu devis observi la konstruadon de demokratiaj strukturoj en la venkitaj kaj okupataj landoj. Sed kiam Dimitrov-Gemeto iĝis politike premita kaj misfamigita de la komunistoj, li rezignis esti politike aktiva kaj fuĝis en la usonan ambasadejon, kiu helpis al li forveturi al eksterlando. Por la komunistoj la malapero de Gemeto signifis grandan sukceson. La dua politikisto, kiu tro memstare agis por la gusto de la komunistoj, estis Nikola Petkov, gvidanto de la Pladne-grupo. Sed la grupo skismiĝis kaj Petkov estis devigita forlasi sian registaran funkcion (en julio 1945). Sama skismo okazis ankaŭ en la kazo de la socialdemokratoj, kies prezidanto Grigor Ĉeŝmedĵiev estis devigita demisii.

En aŭtuno 1946 okazis radikala purigo de „reakciaj” oficiroj en la bulgara armeo. La milita ministro kolonelo Damjan Velĉev, kiu estis ankaŭ unu el la gvidantoj de la Zveno-grupo, devis forlasi sian oficon kaj estis anstataŭigita per la komunisto Georgi Damjanov. La popola referendumo de la 8a de septembro 1946 rezultigis la pledon por la likvido de la monarkio – oficiale nur kvar procentoj de la voĉdonintoj volis konservi ĝin (pri kio ekzistis dubo). La 15an de septembro estis proklamita la „Bulgara Popola Respubliko”. Vasil Kolarov fariĝis prezidento de la prezidio de la Nacia Asembleo kaj per tio provizora ŝtatestro. Simeono, la sekvanto sur la cara trono, kiu tiam estis nur 9-jara, forveturis kun sia patrino al eksterlando.

En oktobro 1946 la parlamento estis dissolvita. Okaze de la elektoj de la 18a de novembro komunisto Georgi Dimitrov kandidatiĝis pinte de unueca listo de la „Patrolanda Fronto”. En la baloto partoprenis ankaŭ la sendependaj socialdemokratoj kaj la Kamparana Popolunuiĝo, kies nova estro fariĝis Nikola Petkov. Spite al sufiĉe gravaj provoj manipuli la baloton, la opozicio ricevis 30 procentojn de la voĉoj. Sed komunisto Georgi Dimitrov fariĝis nova ĉefministro. La komunistoj komprenis, ke ilia potenco ankoraŭ ne estas plene firmigita kaj ke la sekurigo de tiu absoluta regadopovo necesigis la elŝaltadon de la opozicio. Petkov riproĉis al la komunistoj, ke ili manipulis kaj falsis la formadon de la registaro. Ĉar ankaŭ la usonaj balot-observantoj konstatis, ke la opozicio estis malhelpata, ili postulis, ke du demokratiaj politikistoj, kiuj ne apartenis al la „Patrolanda Fronto”, estu akceptitaj de la nova registaro. Sed Dimitrov scipovis prokrasti la aferon kaj gajni tempon por definitive finkalkuli kun la opoziciuloj.

Unu tagon post la ratifo de la pactraktato fare de Usono, la 5an de junio 1947 Nikola Petkov estis arestita (kun la aprobo de Georgi Dimitrov) kaj akuzita pro ŝtata perfido. Surbaze de falsita pruvmaterialo oni lanĉis farsproceson kontraŭ li, kiu finiĝis per la kondamno de tiu populara politikisto al morto la 16an de aŭgusto 1947, kelkajn tagojn post kiam la menciita pactrakto ekvalidis kaj la Kontrol-komisiono de la aliancanoj ĉesigis sian laboron en Bulgario. Malgraŭ akraj internaciaj protestoj Petkov estis ekzekutita la 23an de septembro. La 4an de decembro la Granda Nacia Asembleo adoptis novan konstitucion, kiu anstataŭis la liberalan „Târnovo”-konstitucion de la jaro 1879. Laŭvorte ĝi similis la t.n. „Stalin”-konstitucion de 1936. Ĝi eĉ garantiis la liberecojn de la opinio, gazetaro kaj kunvenado kun la kondiĉo, ke tiuj liberecoj ne direktu sin kontraŭ la ŝtato. La stalinisma sistemo do estis enkondukita per sistema moskva reĝisorado ankaŭ en Bulgarion. En la sekvaj monatoj la komunistoj daŭrigis la procezon de la politika egalŝaltado en la „Patrolanda Fronto”. Aliaj partioj estis malfonditaj kaj malaltigitaj kiel marionetoj kaj la plimulto de iliaj deputitoj estis arestitaj. Ankaŭ Kosta Lulĉev, la gvidanto de la socialdemokratia partio, estis trafita de tiu sorto. En novembro 1948 li estis kondamnita al 15-jara arestpuno pro ŝtata konspiro. La socialdemokratoj, kiuj restis en la koalicio, kunfandiĝis en aŭgusto 1948 kun la komunisma partio. Ankaŭ la Zveno-grupo malaperis. La „Patrolanda Fronto” fariĝis novtipa politika amasorganizaĵo, kiu estis kontrolita kaj manipulita de la komunistoj. Ekster ĝi aliaj politikaj fortoj havis neniun ekzistorajton. Georgi Trajkov, gvidanto de la Kamparana Popolunuiĝo, ĉesis defendi la tradician agrikulturan doktrinon kaj agnoskis la gvidan rolon de la komunistoj. Postrestis iu ŝajnkoalicio, kiu konsistis el regantaj komunistoj kaj diversaj politikaj oportunistoj, kiuj hipokrite submetiĝis al la dikto de la KP, de kiu ili esperis ricevi iujn avantaĝojn. En decembro 1948 Georgi Dimitrov povis proklami, ke en Bulgario la „proletaro” transprenis la povon. Bulgario fariĝis politike ekzakta kopio de stalinisma Sovetunio, al kiu ĝi sklave servis, pro kio en la tuta mondo oni mokis pri tiu socialisma lando kiel 16a respubliko de Sovetunio. Kiam Georgi Dimitrov grave malsaniĝis, li subite

malaperis el Bulgario kaj forpasis la 2an de julio 1949 en sanatorio apud Moskvo. En la sama tago Vasil Kolarov transprenis la oficon de la ĉefministro, kiun li konservis ĝis sia morto la 23an de januaro 1950 en Sofio. Lia posteulo fariĝis Vâlko Ĉervenkov.

* * *

La historio de la transpreno de la politika potenco fare de la komunistoj en ***Albanio*** diferencas de la ĝis nun konata modelo, ĉar Albanio liberiĝis de la nazioj sen la helpo de eksterlandaj grandpotencoj kaj la komunistoj proprapove akaparis la politikan potencon, t.e. sen sovetia interveno.

Regita de reĝo Ahmet Zogu, Albanio estis senreziste okupita de italaj trupoj en la sankta vendredo de la 7a de aprilo 1939. Zogu fuĝis eksterlanden kaj Vittorio Emanuele IIIa fariĝis nova reĝo de Albanio kiel nova protektejo de Italio. En la sekvo la italoj instalis en Albanio italan marionetan registaron kaj utiligis ĝin por ataki Grekion, kio okazis la 28an de oktobro 1940. Diference de Albanio, grekaj trupoj sukcesis kontraŭbatali la italan invadon kaj eĉ okupis kelkajn albanajn urbojn en la sudo. Nur kiam la germanoj lanĉis sian balkanan konkeron en aprilo 1941 la situacio ŝanĝiĝis, kiam Jugoslavio kaj Grekio estis okupitaj de la germana armeo. Kosovo kaj partoj de Makedonio estis unuigitaj kun Albanio, kiu staris sub la regado de fasisma Italio. Post kiam Italio kapitulacis la 8an de septembro 1943, germa-naj taĉmentoj okupis Albanion kaj senarmigis la italojn.

La germanoj havis nur limigitan kvanton da trupoj kaj milita personaro en Albanio. Pro tio la germanoj favoris la formadon de propra albana registaro, kiu tamen pli malpli libervole kunlaboris kun Germanio, kiu laŭ propra deklaro celis afable trakti la landon. Ĉar la albanoj esperis, ke ili estos liberigitaj de la britoj, ili pretis komplici kun la germanoj nur ĝis iu grado. Krom tio, ili timis refali sub la influon de Serbio (t.e. Jugoslavio). Tiel, en septembro 1943 tri albanoj fondis iun Nacian Komitaton, kiu proklamis la sendependecon de Albanio, kaj starigis provizoran registaron. Kiel ĉefan taskon tiu registaro konsideris la kunvokon de nacia asembleo, kiu devis decidi pri la estonta statuso de la lando. La asembleo, kiu konsistis el 243 parte elektitaj kaj parte nomitaj delegitoj, komencis labori en la 1a de oktobro 1943 en Tirana. La asembleo reinstalis la konstitucion de 1928 kaj elektis konsilion de regantoj. La 5an de oktobro formiĝis registaro prezidita de Rexhep Mitrovica, kiu estis kosovano. Sub tiu nova strukturo la lando rekomencis funkcii, sed krom Germanio, kiu toleris ĝin, la plimulto de la internacia komunumo ne pretis agnoski la sendependecon de Albanio sub tiaj kondiĉoj. Ĉar post la milito la albanoj ne volis esti konsiderataj kiel komplicoj de la germanoj, la posteulo de Mitrovica, Fiqri Dine, proklamis en julio 1944 Albanion neŭtrala ŝtato. Sed la aliancanoj ne estis impresitaj de tiu sinteno kaj daŭre apogis la fortojn, kiuj batalis kontraŭ la germanoj. Dine demisiis fine de aŭgusto por esti anstataŭigita per Ibrahim Biçaku, kiu formis la plej lastan albanan registaron antaŭ ĝia transpreno fare de la komunistoj. La 2an de oktobro 1944 la germanaj trupoj ricevis la ordonon forlasi Albanion, kion ili faris sen urĝo.

La unuaj albanaj partizanaj grupoj estis formitaj de maldungitaj policaj kaj armeaj oficiroj. Ĉar Albanio estis pure agrikultura lando sen laborista klaso, ĝi disponis nur pri tre malgranda nacia komunisma movado. Propra tradukita marksisma literaturo en albana lingvo eĉ ne ekzistis antaŭ 1941. Albanoj estis precipe membroj de eksterlandaj komunismaj partioj, ekzemple Mehmet Shehu, kiu unue estis membro de la hispana kaj poste de la itala KP. Kelkaj albanoj estis instruitaj ankaŭ de Komintern en Sovetunio. Laŭ la albana historiografio, la unua albana komunisma grupo estis fondita en la urbo Korça en 1928, kiu poste havis 40 membrojn. Aliaj komunismaj ĉeloj estiĝis en 1934 en la urbo Skhodra kaj en Ateno (Grekio). Pro skismiĝo aperis nova grupo en Korça. Inter ĉiuj tiuj grupoj, kiuj havis verŝajne ne pli ol 200 anoj entute, regis ideologia malkonkordo. En aŭtuno 1939 oni provis kunlaborigi la grupojn de Korça (Korçë) kaj Shkodra (Shkodër). Tiucele estis fondita centra komitato, kiu konsistis el 4 membroj. Sed pro malkonkordo inter la anoj tiu CK malfondiĝis en printempo 1940. Nova iniciato estis lanĉita post la germana atako kontraŭ Sovetunio en junio 1941, kiam Komintern alvokis la komunismajn partiojn de ĉiuj landoj enkonduki la „kontraŭfaŝisman liberigan batalon". Por la albanaj komunistoj tio signifis, ke ili estis devigitaj fondi partion, kiu devis transpreni la gvidadon de la nacilibera batalo en Albanio. Tio okazis la 8an de novembro 1941 en Tirana (Tiranë). En tiu okazo komenciĝis la kunlaboro inter la albana KP kaj la jugoslava KP, kiu estis gvidata de Josip Broz (nomita Tito). En somero 1942 la albanaj komunistoj kunvokis konferencon, en kiu devis partopreni ĉiuj rezistaj movadoj. Ĝi okazis la 1an de oktobro en Peza (Pezë) apud Tirana. Dum la konferenco, kiun ĉeestis 20 personoj, estis fondita iu „Nacia Liberiga Fronto", kiu estis gvidata de seppersona konsilio. La akceptita „Platformo de la nacia liberiga batalo" antaŭvidis la mobilizadon de la patriotismaj fortoj senkonsidere al diversecoj klasaj, religiaj kaj originaj, la instaladon de „naciaj liberigaj konsilioj" kiel organoj de la popola potenco en la

liberigitaj regionoj kaj la preparadon de ĝenerala armita popola ribelo kiel fina etapo de la partizana milito. Sed en la konferenco de Peza ne aperis ĉiuj nekomunismaj politikistoj, ekzemple Midhat Frashëri, kiu preferis organizi la reziston sen jugoslavia helpo. En novembro 1942 Frashëri fondis sian „Nacian Fronton" (Balli Kombëtar),[52] kiu same kiel la „Nacia Liberiga Fronto" komprenis sin superpartia organizaĵo kun ĉiuj albanaj patriotoj kiel celpubliko.

Laŭ la imago de kelkaj politikistoj, la postmilita Albanio devis esti libera kaj demokratia, sen ekspluatantoj kaj sen ekspluatatoj. Neniu kamparano devis resti sen propra grundo, neniu laboristo sen sekura vivenspezo. Por feŭduloj ne devis esti loko en Albanio. Tio estis la revo de la socialistoj. En januaro 1943 la „Nacia Fronto" organizis sian unuan kongreson, kiu elektis okpersonan CK sub la gvido de Midhat Frashëri. Tiel, la „Nacia Fronto" baldaŭ fariĝis danĝera konkurento de la komunisma fronto. Sed en la komenco oni ankoraŭ serĉis okazojn por kunlabori.

Dum la 1a landa kongreso de la Komunisma Partio de Albanio, okazinta en marto 1943 en Labinot (Labinot), Enver Hoĝa estis elektita kiel ĝenerala sekretario de la CK de la partio. Multajn jarojn Hoĝa studis kaj laboris en Francio kaj Belgio, antaŭ ol reveni al Albanio en 1936, kie oni malpermesis al li labori (ĝis 1939) kaj kie li povis vendi nur tabakon en Tirana. Kvankam Hoĝa esprimis skeptikon pri la karaktero de la fronto de Frashëri, li konsentis kunsidi kun ĝi komence de aŭgusto en Mukja (Mukje) apud Kruja (Krujë). La kunsido finiĝis per interkonsento. Oni decidis fondi „Komitaton por la savo de Albanio", kiu devis konsisti el po 6 reprezentantoj de la Fronto de Frashëri kaj de la komunisma fronto kaj funkcii kiel provizora registaro.[53] Sed la interkonsento ne estis realigita kaj fiaskis. Post tiu konferenco la diversaj partizanaj grupoj estis kunigitaj al „Nacia Liberiga Armeo" kun 10 mil batalantoj kaj 20 mil rezervuloj. De somero 1943 la albanaj partizanoj ricevis armilojn el Britio. Ŝajnas, ke la jugoslavia KP tamen ne estis tre feliĉa pri tiu interkonsento, kiu tuŝis ankaŭ la demandon de Kosovo, kiun la jugoslavoj volis posedi, pro kio ĝi estis reprenita okaze de dua konferenco de la komunisma fronto, okazinta en septembro en Labinot. La monarkiistoj forlasis la komunisman fronton kaj fondis en novembro propran organizaĵon kun la nomo „Legaleco", kiu preferis batali kun la fronto de Frashëri. Tiu situacio kondukis al albana enlanda milito, tiel ke ambaŭ grupoj eĉ pretis kunlabori kun la germanoj, kun fatalaj sekvoj.

En majo 1944 la komunisma fronto organizis en Përmeti (Përmet) la „1an Kontraŭfaŝisman Kongreson de la Nacia Liberigo". Dum ĝi estis starigita „Kontraŭfaŝisma Konsilio de la Nacia Lieberigo", kiu konsistis el 121 membroj kaj devis havi la funkcion de provizora parlamento. Siaflanke ĝi nomis 13-personan „Kontraŭfaŝisman Nacian Liberigan Komitaton" kun Enver Hoĝa kiel pintulo de la provizora registaro. Al reĝo Zogu, kiu organizis propran rezistan movadon en Britio, oni malpermesis reveni al Albanio. Per tio la sorto de Albanio, kiu devis fariĝi komunisma, estis decidita. Okaze de la 2a kongreso de la „Kontraŭfaŝima Konsilio", okazinta en oktobro 1944 en Berati (Berat), la „Kontraŭfaŝisma Nacia Liberiga Komitato" estis transformita al la „Demokratia Registaro de Albanio". Enver Hoĝa estis elektita ankaŭ kiel ĝenerala sekretario de la CK de la Komunisma Partio de Albanio kaj kiel ĉefkomandisto de la albana armeo. Krom tio li fariĝis ĉefministro. Per tio li posedis sufiĉe grandan potencon kaj do povis, fine de novembro, kun sia registaro iri al la ĉefurbo Tirana, kiu jam estis liberigita de partizanoj. Per la foriro de la germana armeo fine de novembro 1944 tuta Albanio estis libera. La milito kostis la vivon de ĉirkaŭ 30 mil albanoj.

Enver Hoĝa nun estis tre interesata pri baldaŭa internacia diplomatia agnosko de sia registaro. Kvankam li asertis, ke lia potenco kovras la tutan landon, ekzistis regionoj, precipe en la nordo, kiuj restis kontrolitaj de la fronto de Frashëri kaj de la grupo „Legaleco". Antaŭ ĉio Hoĝa esperis, ke Usono kaj Britio agnoskos lian registaron. La Okcidento faris sian agnoskon dependa inter alie de liberaj parlamentaj elektoj en Albanio, kiuj jes okazis la 2an de decembro 1945 tamen sen konformi al la normoj, kiuj estis postulitaj de la Okcidento, ĉar la komunistoj zorgis pri tio, ke nur kandidatoj de la unueca listo de la „Demokratia Fronto" povis kandidatiĝi. La rezulto estis 93,8 procentoj por la kandidatoj de tiu listo, ĉe balot-partopreno de 90,2 procentoj. La 11an de januaro 1946 la Nacia Asembleo proklamis la „Albanan Popolan Respublikon", dum la komunisma partio ricevis la nomon Partio de la Laboro de Albanio. La 14an de marto 1946 nova konstitucio estis akceptita. Ĝi baziĝis grandparte sur la jugoslavia konstitucia modelo, kiu similis la sovetian Stalin-konstitucion de 1936, nature sen la federismo. La

---

[52] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Balli_Kombëtar.
[53] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Abkommen_von_Mukja.

ŝtatigo de la posedo estis malanticipe leĝigita de tiu konstitucio. La 23an de marto formiĝis nova registaro, kiun estris denove Enver Hoĝa, kiu transprenis ankaŭ la ministeriojn de la eksteraj aferoj kaj defendo. Anstataŭanta ĉefministro kaj ministro pri internaj aferoj fariĝis Koçi Xoxe, rivalo de Hoĝa, kiu poste estis persekutita kaj likvidita.

Sed aliaj gravaj incidentoj dume prokrastis la agnoskon de la albana komunisma popolrespubliko. Ankaŭ Sovetunio, kiu konsideris Albanion parto de la jugoslavia influa sfero, ne urĝis agnoski ĝin. Pro tio Jugoslavio estis la unua ŝtato, kiu diplomatie agnoskis la albanan komunisman registaron probable jam en 1946. Ĝin sekvis Pollando kaj Sovetunio en novembro. De la Okcidento la komunisma Albanio povis atendi malmulton, kaj Stalin kredis, ke por Moskvo ĝi estas perdita, ĉar estis klare, ke Albanio fariĝos integra parto de la jugoslavia ŝtato.

En tiun novan socialisman popolrespublikon la nova reĝimo estis aparte rigore enkondukita. La persekutoj kaj subpremoj okazis jam antaŭ ol por tio estis kreitaj la konsitituciaj kondiĉoj. Kiel en Bulgario, veraj kaj imagitaj kunlaborantoj de la germanoj estis akuzitaj antaŭ „popolaj tribunaloj“ kaj ofte kondamnitaj al morto. Ĉiuspeca rezisto kontraŭ la aktuala politiko de la partio kaj registaro estis konsiderata kiel konspiro kaj traktita kiel tia. Unikaj estis la purigoj de la albana komunisma partio de internaj malamikoj. Ĉiuj viktimoj devis enkalkuli la riskon esti fizike likviditaj aŭ enprizonigitaj. De la fonda generacio praktike nur Enver Hoĝa postvivis la puri-gojn. Jam komence de 1945 la komunistoj komencis senposedigi la „faligitan klason de la eksplua-tistoj“; la entreprenoj de la „popolaj malamikoj“ estis ŝtatigitaj, de kio estis koncernataj praktike ĉiuj branĉoj de la ekonomio, precipe la minejoj, transporto, metio. En septembro 1946 oni realigis reformon de la agrikulturo. Kruele trafitaj estis precipe la posedantoj, kiuj mem ne prilaboris la grundon. La radikala tutlanda konfiskado de diversaj privataj posedaĵoj trafis ankaŭ la posedantojn de fruktaj ĝar-denoj, vinberejoj, olivujoj k.a. produktejoj. De tiu konfiskado profitis unuavice sengrundaj kamparanoj, kiuj ricevis kelkajn hektarojn por prilabori. La resto de la lando estis utiligita por starigi ŝtatajn entreprenojn.

Kadre de la konflikto inter Sovetunio kaj Jugoslavio en 1948 la albanaj komunistoj kaptis la okazon proklami sian rompon kun Belgrado per la kondamno de la gvidantoj de la jugoslavia KP kiel perfiduloj kaj trockiistoj. Sekve, Tirana politike kaj ekonomie alproksimiĝis al Moskvo, kiu donis al Albanio grandanimajn kreditojn kaj ampleksan ekonomian helpon, kiu esence konsistis el malnovaj maŝinaroj. Miloj da sovetiaj „konsilistoj“ anstataŭis la jugoslavojn. Ankaŭ la aliaj socialismaj landoj devis helpi al Albanio kadre de la interŝanĝo en la Comecon-sistemo per 133 milionoj da dolaroj (kiujn ili mem ne havis). En la ekstera politiko Albanio partoprenis ĉiujn kampanjojn kontraŭ la „jugoslava ŝovinismo“, relevante la kosovan demandon, sed lasante ĝin domi ĝis 1991. En Albanio la komunistoj praktikis similan personkulton kiel en stalinisma Sovetunio. Ĝis januaro 1990 Stalin restis en Albanio adorata kiel ĉefa teoriisto de la marksismo-leninismo, kun fatalaj sekvoj por tiu malgranda lando, en kiu komencis regi similaj cirkonstancoj kiel en Norda Koreio, pro kio Albanio kun ĝia nekutime kaprica registaro estis internacie evitita kaj izolata.

* * *

Je la fino de ĉi tiu tema ĉapitro restas ankoraŭ la kazo de ***Jugoslavio*** por trakti, kiu havas kelkajn specifajn trajtojn. Ĉi tie la rezisto kontraŭ Germanio, kiu enpenetris Jugoslavion la 6an de aprilo 1941 per aera atakado de Belgrado, komenciĝis de la serba nacia flanko, kiu estis reprezentita de la movado de la t.n. ĉetnikoj sub la gvido de kolonelo Dragoljub (Draža) Miĥailović.[54] Li ne pretis akcepti la senkondiĉan kapitulacon de Jugoslavio kaj retiriĝis kun siaj partizanoj en la montaron de Ravna Gora en okcidenta Serbio, de kie li provis apliki la taktikon de geriloj. Per tiu taktiko, kiu estis esence defenda, li kontrastis kun la strategio de la komunismaj partizanoj, kiuj celis ofensivan atakadon de la malamiko. La problemo de la komunistoj estis, ke pro la Hitler-Stalin-pakto ili devis resti pasivaj. La situacio esence ŝanĝiĝis nur post la germana atako kontraŭ Sovetunio en junio 1941. Tiam la CK de la komunisma partio de Jugoslavio (kiu estis malpermesita en 1921) decidis lanĉi armitan reziston. Alia obstaklo por la efika kunlaboro de ambaŭ partizanaj movadoj estis iliaj ideologiaj diferencoj. Dum Miĥailović intencis konservi la tradiciojn de la reĝa Jugoslavio, Josip Broz (nomita Tito), la gvidanto de la komunismaj partizanoj, celis la social(ism)an revolucion. Pro tio la interparoloj de ambaŭ partizanaj gvidantoj en

[54] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ĉetnikoj.

septembro/oktobro 1941 en la montaro de Ravna Gora kondukis al neniu rezulto. Male, en novembro eĉ eksplodis bataloj inter ambaŭ partizanaj grupoj. En la komenco Miĥailović estis konsiderita kiel pli forta grupo, ĉar li ĝuis la apogon de Italio kaj Britio. Sed baldaŭ la ĉetnikoj, kiuj estis kontraŭbatalitaj kaj de la komunistoj kaj de la kroataj naciistoj (ustaŝoj[55]), havis grandajn problemojn. Altigita de la ekzila registaro en Londono kiel brigada generalo, en januaro 1942 Miĥailović fariĝis milit-ministro de tiu registaro kaj ĉefkomandisto de la „Jugoslavia armeo en la patrujo". Eĉ la administracio de la serba registaro de Milan Nedić, kiu estis marioneto de la germanoj, enhavis lojalulojn de Miĥailović, pro kio lia influo estis pli granda ol tiu de Tito. Kiam la germanoj atakis la ĉetnikojn en septembro 1942, ili suferis grandajn perdojn, tiel ke Miĥailović preferis daŭrigi siajn aktivecojn en la zono, kiu estis okupata de la italoj (Montenegro kaj Hercegovino). Tie la ĉetnikoj estis eĉ oficiale tolerataj, kio tute ne plaĉis al la germanoj kaj ustaŝoj. La itala milit-kapitulaco de la 3a de septembro 1943 signifis gravan baton por la ĉetnika movado, kiu perdis la italan protekton kaj estis devigita aranĝiĝi kun la germanoj, se ĝi volis pluekzisti. La brita registaro ĉesigis liveri armilojn al la ĉetnikoj jam en somero. En la nova konstelacio la germanoj celis kolekti ĉiujn kontraŭ-komunismajn fortojn. Tiu kuniĝo reale okazis post la teherana konferenco de la 28a de novembro – 1a de decembro 1943,[56] kiu decidis apogi la partizanojn de Tito. Per la premo de Churchill la jugoslavia reĝo Petar II. Karađorđević (1934-45), kiu de la 14a de aprilo 1941 restadis en la eksterlanda azilo,[57] alvokis en septembro 1943 ĉiujn jugoslavojn aliĝi al la „Popola Liberiga Armeo" de Tito. Por Miĥailović la batalo estis praktike perdita, des pli ke la germanoj komencis forlasi Jugoslavion en oktobro 1944.

Komence, la Tito-partizanoj havis enormajn malfacilojn konkeri terenon kaj devis plurfoje ŝanĝi sian militan strategion. Sed dum la legendeca "longa marŝo" tra la regionoj, kiuj suferis pro la teroro de la ĉetnikoj kaj ustaŝoj, ili povis fortigi siajn taĉmentojn, kiuj kreskis al 130-150 mil batalantoj fine de 1942. Tito petis armean helpon de Sovetunio, sed ĝi sendis neniujn armilojn nek municion, pro politikaj konsideroj. Tio malhelpis al la „Kontraŭfaŝisma Popol-Liberiga Konsilio de Jugoslavio" (AVNOJ), kiu estis starigita la 26an de novembro 1942 en Bihać, esti agnoskita kiel registaro, kvankam ĝi plenumis tiajn funkciojn.[58] Sed la partizanoj de Tito ne rezignis. Ili daŭrigis sian pezan vintran marŝon tra la neĝkovrita montaro kaj luktis kontraŭ italaj, germanaj kaj kroataj trupoj, perdante 12 mil batalantojn. Fine de majo 1943 aperis armeaj reprezentantoj el Britio en la rezidejo de Tito en Montenegro por admiri kaj festi la heroan batalon de líaj partizanoj. Tio nature signifis esencan gajnon de prestiĝo kaj gravan rekonon de ilia batalo fare de la okcidentaj aliancanoj. Pro la itala kapitulaco en septembro 1943 la partizanoj de Tito povis ricevi kelkajn avantaĝojn.

La 29an de novembro 1943 okazis en Jajce, Bosnio, kie situis la nova rezidejo de Tito, la 2a konferenco de AVNOJ, dum kiu oni kreis la „Nacian Komitaton por la Liberigo de Jugoslavio", kiu eksplicite transprenis ankaŭ la rolon de provizora registaro. Kiel unua paŝo de la elŝaltado de la opozicio, al la londona ekzilregistaro oni neis la rajton reprezenti Jugoslavion, kaj al la reĝo oni malpermesis reveni en la landon ĝis kiam la popoloj de Jugoslavio estos voĉdonintaj post la milito pri la ŝtata formo de Jugoslavio. En Jajce Tito ricevis la titolon de marŝalo. Ĉi tiun internan sukceson sekvis ekstera progreso per la fortigo de la pozicio de la Tito-adeptoj en la menciita konferenco de Teherano en novembro/decembro. Ankoraŭ en decembro delegacio de la partizanoj traktis en Aleksandria (Egiptio) pri liverado de armiloj, kiu ankaŭ baldaŭ okazis. Tito, kies ĉefa apoganto estis Churchill, estis agnoskita de la aliancanoj kiel memstara komandisto. En la sama tempo ankaŭ Moskvo agnoskis la komitaton de AVNOJ kiel solan jugoslavian registaron. La nova ĉefo de la londona ekzilregistaro fariĝis la kroato Ivan Šubašić, kun kiu Tito interkonsentis pri principa kunlaboro. La 21an de septembro 1944 Tito flugis al Moskvo por diskuti kun Stalin pri sovetia armea interveno en Jugoslavio (!!!). Oni interkonsentis, ke la sovetia armeo partoprenu en la liberigo de Jugoslavio, sed ke ĝi retiriĝu tuj post la fino de la milito. La britoj, kiuj kredis, ke Jugoslavio estas ilia influa zono, estis nature konsternataj pri la interkonsento de Tito kun la sovetianoj, ĉar ĝi estis farita sen konsultado de la okcidentaj aliancanoj. Dum la oktobra konferenco en Moskvo Stalin kaj Churchill interkonsentis pri po 50-procenta influo en Jugoslavio.[59]

---

[55] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ustaše.
[56] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Teherana_Konferenco.
[57] En la intermilita tempo Jugoslavio estis regata sinsekve de tri reĝoj de la dinastio Karađorđe: Petar I. Karađorđević (1918-21), Aleksandar I. Karađorđević (1921-34) kaj Petar II. Karađorđević (1934-45).
[58] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Antifaschistischer_Rat_der_Nationalen_Befreiung_Jugoslawiens.
[59] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Moskva_Konferenco_(1944).

Komence de oktobro 1944 sovetiaj trupoj komencis invadi Jugoslavion de la orienta flanko (Bulgario). De tiu invado ankaŭ la partizanoj de Tito, kiuj eniris Serbion, povis profiti. La 20an de oktobro Belgrado estis konkerita de taĉmentoj de la Ruĝa Armeo kune kun la partizanoj de Tito. Dum en Serbio la milito estis en principo decidita, en Kroatio kaj Slovenio ĝi daŭris ankoraŭ ĝis printempo 1945. La fino de la ustaŝoj kaj ĉetnikoj estis tragika: Post la malapero de la germana armeo ili estis kaptitaj de la britoj kaj transdonitaj al la partizanoj de Tito, kiuj faris kurtan proceson kun ili kaj simple mortigis grandan kvanton da ili. Parto de la ustaŝoj sukcesis kun sia gvidanto Ante Pavelić, kiu regadis la t.n. „Sendependan Ŝtaton Kroatio“, kiu ĝuis la komplican apogon de Germanio, Italio kaj de la Vatikano,[60] fuĝi al Sudameriko (Argentino), kie li fondis propran kroatan ekzilregistaron, dum en Jugoslavio li estis kondamnita al morto. En tiu kroata ŝtato estis aranĝita kruela persekutado kaj murdado de sennombraj serboj, judoj, ciganoj, ortodoksaj kristanoj, kroataj, muzulmanoj kaj komunistoj. Tragika simbolo de la holokaŭsto en Kroatio fariĝis la iama koncentrejo de Jasenovac, kie pereis ne ekzakte konata nombro da homoj.[61] La mortigo de Pavelić en 1957 estis aranĝita de la fifama jugoslavia sekureca servo UDBA,[62] kiu mem likvidis sennombrajn laŭ rekta ordono aŭ kun la aprobo de Tito, kiu mem fariĝis rekte aŭ malrekte klasika komunisma krimulo.

La unua provizora registaro de Jugoslavio, kies ĉefministro fariĝis Tito, efektiviĝis la 8an de marto 1945. 20 de 28 registaranoj devenis de AVNOJ, ministro pri eksteraj aferoj fariĝis Ivan Šubašić de la londona ekzilregistaro, kaj kvin anoj reprezentis antaŭmilitajn partiojn, kiuj politike ne kompromitiĝis dum la milito. La membronombro de la komunisma partio, kiu forte influis la registaran administracion, kreskis dummilte al 140 mil. La partizanaro fariĝis normala armeo kun 350 mil soldatoj. La KP dominis ankaŭ la „Nacian Fronton“, kiu estis fondita en aŭgusto 1945 en Belgrado kaj analoge funkciis kiel la diversaj maldekstraj aŭ komunismaj frontoj en la aliaj orienteŭropaj landoj. Okaze de la elektoj al la Konstituci-dona Nacia Asembleo fakte kandidatiĝis nur la „Nacia Fronto“ kun unueca listo. Ĝi atingis 90 procentojn de ĉiuj donitaj voĉoj. La KP, kiu intertempe gajnis enorman prestiĝon, iusence nature dominis la politikon pro manko de alternativo. La 29an de novembro la Konstituci-dona Nacia Asembleo unuafoje kunvenis kaj proklamis la popolan respublikon. La ´burĝaj´ politikistoj tiam jam forlasis la registaron pro protesto kontraŭ la limigoj de la civitanaj rajtoj kaj pro la sociala politiko, kiun ili ne povis aprobi. La sama ideologia fanatiko, kiu estis observebla en la aliaj „socialismaj“ landoj, ripetiĝis nun ankaŭ en Jugoslavio. Granda parto de la ekonomio jam estis ŝtatigita, antaŭ ol la diskuto pri la konstitucio estis malfermita. Ĉiu, kiu apogis la okupaciajn potencojn, perdis sian posedon. La 22an de aŭgusto 1945 estis ankaŭ lanĉita reformo de la agrikulturo. Konfiskita estis la posedaĵo de ĉiuj civitanoj, kies grundo ampleksis pli ol 45 hektaroj. Koncernataj de tiu reformo estis precipe bankoj, industriaj entreprenoj, la eklezio, la monaĥejoj, la ustaŝoj kaj la ĉetnikoj kaj la etna minoritato de la jugoslaviaj germanoj, kiuj devis senti la venĝon de la komunistoj. Fakte oni devas paroli pri krima persekutado, kiun Tito planis kunlabore kun la sovetianoj. La unua pogromo kontraŭ la t.n. danubaj ŝvaboj okazis en oktobro 1944 en Vršac en Vojvodino, kie 1083 anoj de tiu etna minoritato estis mortigitaj. Poste la purigado en la vicoj de la jugoslaviaj germanoj vastiĝis en tuta Banato kaj aliaj najbaraj regionoj, kie la germana popolo sub la kondiĉoj de la milita juro ricevis la kolektivan punon, estante deportita en laborkoncentrejojn de Jugoslavio kaj Sovetunio. Laŭ la censo de 1948 restis nur 55´537 de iam ĉirkaŭ 600´000 jugoslaviaj germanoj. La persekutado, forpelado kaj ekstermado de la etnaj germanoj de Jugoslavio apartenis al tiuj genocidoj (aŭ etnocidoj), kiuj apenaŭ estis publike traktitaj en la postmilita Eŭropo, kaj en Jugoslavio tiu temo nature restis strikta tabuo.

Entute, la krima energio de Josip Broz Tito kaj parto de liaj partizanoj-komunistoj estis konsiderinda. Ankoraŭ dum la dua mondmilito Tito partoprenis en diversaj krimaj decidoj kaj agadoj, kiuj poste estis traktitaj de neniu oficiala Tito-biografio. Post la germana atako kontraŭ Belgrado Tito eldonis sloganon, laŭ kiu oni devis ĉiurimede kontraŭbatali la malamikon kaj akceli la socialisman revolucion: Prefere oni mortu ol kapitulacu antaŭ la malamiko. La preteco de ĉiu soldato fariĝi viktimo devis esti totala. La „senkompromisa kaj senkompata forigo de ĉiuj aliaj popolaj malamikoj“ devis esti „la devo de la revoluciuloj“. Per „ĉiuj eblaj“ rimedoj oni devis lukti kaj batali: Per „pafiloj kaj pistoloj, maŝinaj fusiloj, bomboj, grenadoj, dinamito kaj aliaj eksplodaĵoj, per tranĉiloj, batoringoj, feraj stangoj, oleaj lampoj, ŝnureskaloj, pikdrato, najloj, ŝpatoj, marteloj, fajliloj, ktp.“ Evidente, tiuj instrumentoj apartenis al la preferita armilaro de Tito, kiel oni scias el la 20aj jaroj, kiam simila materialo estis trovita en

[60] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Sendependa_Ŝtato_Kroatio.
[61] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/KZ_Jasenovac.
[62] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/UDBA.

konspira loĝejo en Zagrebo, kie Tito kaŝiĝis. Edvard Kardelj (1910-79), la slovena ĉefideologo de Tito, parolis pri la neceso de la „senkompata persekutado" kaj „fizika ekstermado" de la kontraŭuloj (ĉi tiu fivorto estis populara kaj sub Hitler kaj sub Stalin).

La forpuŝado de kontraŭuloj, politikaj opoziciuloj kaj homoj kun aliaj opinioj konis neniujn limojn. Sole en Belgrado ekzistis ĉirkaŭ dudek prizonoj kaj mortpafejoj, kaj la arbitre efektivigitaj ekzekutoj ĉesis nur fine de 1945. Ankaŭ en Kroatio, kien la Tito-partizanoj enmarŝadis, kapoj amase ruladis. Agento Jefto Šašić ricevis la ordonon „mortigi" homojn, kiuj rifuzis esti „indulgitaj". Šašić transportis la ordonon al Slovenio, kie ĝi estis senprokraste efektivigita en majo 1945 ĉe miloj da enlandaj Tito-kontraŭuloj, precipe ĉe la batalantoj de Ustaŝo kaj de la ĉetnikoj, sed ankaŭ ĉe kroataj kaj slovenaj memdefendantoj („domobrancoj"), ĉe adeptoj de la serba generalo Nedić kaj de la konservema politikisto Ljotić. Miloj da potencialaj viktimoj, kiuj fuĝis al Aŭstrio, estis resenditaj de la britoj (!) al Jugoslavio kaj transdonitaj al la ekzekutistoj de Tito. Oni kalkulis 191´790 malliberulojn, inter kiuj estis 30´000 etnaj germanoj, kiuj staris fronte al sia mortosorto. Post kiam Kardelj en 1944 esprimis la ideon aneksi la sudan parton de Aŭstrio kun la helpo de aŭstraj komunistoj, Tito ordonis al sia tria armeo la 15an de majo 1945 okupadi la „parton de la aŭstra limregiono", kiu estis kontrolita de armeanoj de la sovetia marŝalo Tolbuĥin, komandisto de la 3a Ukraina Fronto. Ivan Maček, kiu tiam estis ministro pri internaj aferoj de Slovenio, konfirmis al Dedijer la verecon de ĉiuj tiuj krimoj, kiuj estis persone ordonitaj de Tito en Kroatio kaj Slovenio. Post la kolapso de la Tito-reĝimo en Slovenio estis malkovritaj pli ol 600 amastombejoj, kiuj estis la rezulto de la venĝemo de Tito. Miloj da viktimoj estas supozitaj en perbetone fermitaj minejoj, kie ili estis murditaj de la titoismaj bandoj per gaso. Jože Dežman ricevis la taskon esplori tiujn amastombejojn.[63]

Ankaŭ la murdo al Draža Miĥailović estis krimo de Tito. Post perfido fare de ĉetnika komandisto, la 13an de marto 1946 Draža Miĥailović finfine estis arestita de agentoj de OZNA,[64] kiuj estis kaŝitaj kiel ĉetnikoj, en la serbia-bosnia limregiono. Post stalinismeca farsproceso Miĥailović estis kondamnita al morto kaj pafekzekutita la 17an de julio kune kun naŭ aliaj akuzitoj.

La nova konstitucio de la „Federacia Popolrespubliko de Jugoslavio" estis publikigita la 31an de januaro 1946. Al tiu nova ŝtato apartenis Serbio, Kroatio, Slovenio, Bosnio-Hercegovino, Makedonio kaj Montenegro. Serbio ampleksis ankaŭ la aŭtonomajn provincojn Vojvodino kaj Kosovo-Metohija. Ĉiu unuopa respubliko ricevis propran konstitucion, kiu devis harmonii kun la tutŝtata konstitucio. La konstitucio enhavis ankaŭ la bazajn rajtojn, kiuj estas karakterizaj por demokratioj. La opozicio estis elŝaltita per tio, ke oni fiksis la principon, ke oni povas esti punita, se oni utiligas la dekstrajn partiojn por ŝanĝi la konstitucion en „kontraŭdemokratia senco". Ekster la „Nacia Fronto" politikaj agadoj ne plu estis permesataj. Ene de la Fronto nur la „Popola Kamparana Partio" aŭdacis fari memstaran politikon. Sed pro kritiko kontraŭ la ekonomia politiko ĝia gvidanto Dragoljub Jovanović devis esti ekskludita el la partio, kaj la Supera Tribunalo eĉ kondamnis lin al naŭjara arestpuno en laborprizono. La ŝtato gvidis la ekonomion, kaj la rajto je privata posedo estis garantiita je certaj kondiĉoj. La 5an de decembro 1946 ĉiuj entreprenoj de Jugoslavio,  kiuj havis tutŝtatan signifon, estis ŝtatigitaj, – tio estis praktike la resto de la privata industrio. La 28an de aprilo 1947 oni decidis pri la unua kvinjara plano, kiu estis aranĝita laŭ la sovetia modelo. La kolektivigo de la agrikulturo sekvis en Jugoslavio pli frue ol en la aliaj komunismaj landoj, sed ĝin oni ne tuj radikale efektivigis por ne timigi la amason da kamparanoj, kiuj tamen konsistigis tri kvaronojn de la jugoslavia popolo. La realigon de la „socialisma transformado" de la agrikulturo oni decidis en julio 1948. La nombro de la kooperativoj kreskis, sed daŭre ekzistis pli ol 2 milionoj da privataj kamparanaj entreprenoj, kiuj prilaboris 76% de la agrikultura tereno.

* * *

Ĉiuj tiuj landaj ekzemploj ilustras, ke en neniu de tiuj landoj la komunistoj estis dezirataj kiel ĉefaj regantoj aŭ gajnis parlamentajn balotojn. Nur post esenca manipulado kaj falsado de balotoj la komunismaj partioj estis altruditaj al la orienteŭropaj popoloj kaj al la popolo de orienta Germanio, nature per la helpo kaj premo de Sovetunio, kiu havis neniun skrupulon detrui la demokratian sistemon aŭ eviti ĝian restarigon, kaj per ruza, trompa kaj perforta maniero instalis la stalinismon en la koncernaj landoj. Por atingi siajn celojn la komunistoj aplikis ruzan kaj perfidan strategion, kiu je la fino evidentiĝis eĉ ege sukcesa. La komunistoj akiris sian potencon tra koalicioj, kiujn ili forĝis kun burĝaj kaj maldekstraj par-

[63] Pliajn detalojn pri la krimoj de Tito vd. sub http://www.planlingvoj.ch/Tito_Jugoslavio.pdf.
[64] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/OZNA.

tioj. Pere de la formado de t.n. „popolaj” aŭ „naciaj frontoj”, kiuj kunigis la „kontraŭfaŝimajn” politikajn fortojn, la burĝaj elementoj estis forpuŝitaj. Plurestis ŝajnkoalicioj de la komunistoj, kiuj toleris la „blokpartiojn”, kiuj perdis sian politikan sendependecon, ĉar la komunismaj partioj akiris la absolutan povon. Plej radikale la komunistoj (fakte stalinistoj) furoris en Bulgario kaj Albanio, kie la faritaj krimoj restis strikte tabuitaj dum la tuta komunisma tempo ĝis 1989.

Kune kun la enkonduko de la sovetia sistemo okazis rusigo de la sociaj kaj politikaj strukturoj de la landoj, kiuj ektroviĝis sub sovetia okupacio: Pollando, Ĉeĥoslovakio, Germana Sovetia Zono (poste GDR), Hungario, Rumanio, Bulgario, komence ankaŭ en Albanio kaj Jugoslavio. En la novaj satelitaj ŝtatoj, false kaj cinike nomitaj „popolaj demokratioj“, rusoj funkciis kiel „konsilistoj“ en la politiko kaj armeo, sovetiaj ambasadoroj krude enmiksiĝis en la internan aferojn de tiuj landoj kaj diktis al iliaj registaroj, kion ili devas fari. La rusa lingvo estis enkondukita kiel unua deviga fremdlingvo, la sistemo de la kolĥozoj kaj sovĥozoj estis instalita en la agrikulturo, la personkulto ĉirkaŭ la ĉefaj stalinismaj gvidantoj fariĝis integra elemento de la politika kulturo. Sovetiaj varoj, plej ofte de malbona kvalito, estis venditaj al la satelitaj ŝtatoj kontraŭ tro altaj prezoj, dum tiuj ŝtatoj devis eksporti siajn produktojn kontraŭ malaltaj prezoj en Sovetunion. Grandparto de la rumana nafto estis ekspluatita kaj eksportita al Sovetunio. La historiografio estis reviziita kaj la sekreta polico subpremis kaj sufokis ĉiujn opoziciajn ĝermojn.

Tiel, anstataŭ „komunumo de la socialisma frata ŝtataro“ kreiĝis nova koloniisma imperio, kiu estis regita kaj kontrolita de malgranda grupo de stalinismaj funkciuloj, kiuj sidis en la Kremlo kaj en la politburoo de la Komunisma Partio de Sovetunio, kiu estis gvidata de Stalin (ĝis marto 1953). La gvidantoj de la satelitaj ŝtatoj de Sovetunio blinde sekvis la politikon, kiu estis difinita de la Komunisma Partio de Sovetunio en Moskvo kaj kiu ne estis kritikebla. Kvankam la satelitaj ŝtatoj formale konservis sian suverenecon, ilia premata situacio, kiu similis al la atmosfero sub la fromaĝoklosŝo, fariĝis pli kaj pli neeltenebla por multaj civitanoj de la koncernaj landoj kaj vole-nevole kondukis al gravaj tensioj, konfliktoj, krizoj, protestoj kaj ribeloj en la Orienta Bloko,[65] pri kiuj temos en la venontaj ĉapitroj.

* * *

**2a parto:**

**Esencaj motivacioj por la orienteŭropa kontraŭstaro kontraŭ la stalinisma sistemo**

La ĉefa mondhistoria obstaklo por la sovetia satelita imperio konsistis en tio, ke en la sama tempo, kiam ĝi estis konstruita, disfalis la monda kolonia sistemo en Afriko kaj Azio. Do, oni povas diri, ke la stalinisma imperio, kiu baziĝis sur samaj ideoj (de subpremado, persekutado kaj ekspluatado k.a.), estis historie jam eksa afero. Pro tio ĝi devige rikoltis la kontraŭstaron de la konkeritaj kaj okupitaj orienteŭropaj landoj kaj popoloj, kies batalo por la sendependeco jam elformiĝis dum la turka kaj aŭstrahungara fremd-regadoj, des pli ke ĝi estis ankoraŭ fortigita de la germana okupacio dum la dua mondmilito. Tiuj popoloj pagis ege altan prezon por reakiri sian sendependecon kaj ankoraŭ ne povis antaŭvidi, ke ilin baldaŭ trafos nova, sovetkomunisma jugo. Do, ilia *konscio pri kaj strebado al la naciaj sendependeco, memstareco kaj suvereneco disde Sovetunio* estis probable la plej forta motivacio de la orienteŭropa revolucio.

Krom la motivacio de la nacia sendependeco gravis por la orienteŭropaj popoloj la konstruado de la *demokratia ŝtatordo*, kvankam la demokratia tradicio en tiuj landoj estis malforta, krom en Ĉeĥoslovakio, precipe Bohemio. Sed la pereo de la naziismo kaj faŝismo renaskis la demokratian ideon, kaj sub la kondiĉoj de la sovetia okupacio ĝi eĉ ankoraŭ fortiĝis. La demokratia ideo estis alia grava obstaklo por la sovetia diktaturo, kiu ĉiukaze estis konstruita sur sablo, ĉar la demokratia spirito vastiĝis tra la tuta mondo.

Ankaŭ en jena, tria rilato la stalinismo naĝis kontraŭ la ĝeneralaj tendencoj. La *kultura kaj civiliza niveloj* en la orienteŭropaj landoj estis *pli alte evoluinta* ol en Ruslando/Sovetunio, pro kio la

[65] Pri la signifo vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Orienta_Bloko.

orienteŭropaj popoloj konsideris la importadon de la sovetia politika sistemo fremda elemento, kiu ne kongruis kun ilia pli alta kultura stato. La orienteŭropaj popoloj sentis, ke la stalinismo situas sur pli malalta kultura ebeno kompare kun ilia sistemo kaj do instinkte aŭ apriorie ne povis akcepti ĝin, ĉar por ili la stalinismo signifis rebarbarigon de iliaj kulturo kaj vivstandardo. Oni pensu ekzemple pri la pli alta teknologia nivelo kaj pli altnivela politika kulturo de Ĉeĥoslovakio en la intermilita tempo, kiuj ambaŭ estis komplete detruitaj post la enkonduko de la komunisma reĝimo. La politika sistemo de tiu lando estis transformita laŭ la gusto de Stalin, ĝia ekonomio organizita laŭ la imago de Sovetunio. Krom tio, landoj kiel Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario kaj Rumanio estis intime ligitaj kun la Okcidento, de kiu ili nun estis perforte fortranĉitaj. Ekzemple ankaŭ la „socialisma realismo" en la arto vekis perplekson, abomenon kaj rifuzon en tiuj landoj. Do, en orienta Eŭropo la stalinisma sistemo estis percepteta kiel fremda, artefarita, fragila kaj altrudita strukturo, kvankam laŭ la propagando ĝi estas dezirata, historie necesa, libervola, nevenkebla kaj nerompebla.

Sed, por ne resti unuflanka, necesas aldoni, ke ekzistis ankaŭ inversaj tendencoj, stimuloj kaj motivacioj, kiuj helpis la konstruadon de la stalinisma sistemo en orienta Eŭropo. Ili ĉiuj estis ankritaj en la komunisma movado de orienta Eŭropo, kiu estis tiam sufiĉe forta.

Unue, necesas averti pri tio, ke la plimulto de komunismaj partioj en Orienta Eŭropo dependis de la sovetia helpo por akapari la povon kaj ankaŭ por defendi ĝin. Nur la jugoslaviaj kaj albanaj komunistoj konkeris la povon grandparte el propra forto, kvankam en la komenca tempo ankaŭ ili profitis la apogon de Sovetunio por daŭre teni sian povon, ĉar ili ne estis tiel fortaj kiel la propagando asertis. En sia „Nova Klaso" Milovan Đilas skribis, ke la orienteŭropaj landoj ne fariĝis satelitoj de Sovetunio, ĉar ili atendis avantaĝojn de ĝi, sed ĉar ili estis tro malfortaj por eviti ĝin.

Due, la Ruĝa Armeo efektive estis bonvenigata de certaj partoj de la popolo kiel liberiganto (de la faŝisma jugo). Ne nur la anoj de la komunismaj partioj, sed ankaŭ multaj senpartiaj laboristoj, intelektuloj kaj parto de la junularo kredis, ke per la fino de la dua mondmilito komenciĝis nova pozitiva erao, kiu kondukos la homaron al la realigo de la socialismaj ideoj en la senco de marksismaj teoriuloj. Ĉar Sovetunio aperis kiel unua socialismo ŝtato de la mondo, ekzistis neniu kialo ne agnoski ĝin kiel modelon, ĉar ekzistis nur tiu modelo, des pli ke oni ne konis ĝin el propra sperto. La sovetiaj konsilistoj diris al la homoj en la „liberigitaj" landoj, ke ili nur celas disponigi siajn spertojn al iliaj landoj kaj komunismaj partioj por helpi la konstruadon de la socialismo. La okcidentan demokration la sovetianoj kaj multaj orienteŭropaj komunistoj ne konis, ĉar ili neniam vivis ekster sia propra lando kaj agadis nur kadre de la komunisma partio. Stalin estis la idolo de multaj intelektuloj kaj verkistoj, kiuj vidis en li la reprezentanton de la nova erao kaj konsideris lin genio kaj daŭriganto de la verko de Lenin, kiu laŭdire realigis la ideojn de Markso. Nur tiuj komunistoj, kiuj estis en Moskvo kaj spertis la stalinismajn purigojn, estis informitaj pri la kruda realeco, kiu regis en la „unua lando de la socialismo". Sed ili silentis aŭ mensogis. Multaj el ili kiel Josip Broz (Tito), Đilas, Kołakowski aŭ Havemann mem iam estis admirantoj de Stalin kaj de la stalinismo, ĉu pro naiva idealismo kaj sintrompo, ĉu pro nescio, ĉu pro oportunismo aŭ vera konvinkiĝo. Ili apogis la stalinismon tiel longe, ke ili kredis, ke Sovetunio celas konstrui la mondan komunismon kaj ke iliaj landoj partoprenas en tiu projekto, kiun ili taksis grandioza kaj nobla.

La vekiĝo de tiuj membroj estis ŝoka, kiam ili komprenis, ke la Ruĝa Armeo kaj la sovetianoj ne venis kiel liberigantoj, sed kiel okupantoj, subpremantoj kaj ekspluatantoj, ke ĉe tiu formo de socialismo temas pri reĝimo, kiu en plej kruda maniero baziĝis sur maljusteco kaj grandstila lezado de la homaj rajtoj, ke temas pri politiko, kiu ne efektivigis la ideojn de Markso kaj ne konstruis la socialisman socion, sed kiu instalis krudan burokratian sistemon, kiu estis eĉ pli terura ol la carisma sistemo mem.

Same kiel en Sovetunio, ankaŭ en la novaj satelitaj ŝtatoj de orienta Eŭropo ekestis la sama partia burokratio. Ĉi tiu procezo eĉ pli rapide progresis ol en Sovetunio mem. La plimulto de la novaj funkciuloj ne estis malnovaj revoluciuloj, sed profesiaj burokratoj, kiuj revenis kun la Ruĝa Armeo el la sovetia emigracio, kie ili serĉis protekton dum la faŝisma tempo, de kiu ili estis persekutitaj (kiel ekzemple Ulbricht, Dimitrov, Gottwald, Rákosi kaj Imre Nagy). Tiuj komunistoj estis instalitaj en siaj landoj de Moskvo kune kun la sovetia okupacio, ĉar en tiujn landojn la socialismo devis esti enkondukita de supre, kvankam oni parolis pri „revolucio" laŭ la modelo de la 25a de oktobro (7a de novembro) 1917 en Ruslando. Tiuj importitaj komunistoj, kiuj vivis longe en la sovetia emigracio, ofte ne plu konis la realaĵojn en siaj patrujoj. Ili estis komplete rusigitaj kaj sovetiigitaj (Georgi Dimitrov eĉ havis la sovetian ŝtatanecon), eĉ iom forgesis sian originan lingvon, fariĝis ĝisostaj stalinistoj kaj agis kiel sovetiaj ko-

munistoj, apostoloj kaj profetoj de Stalin, al kiu tiuj lakeoj blinde obeis kaj senkondiĉe plenumis liajn ordonojn (kvankam kelkaj el ili klopodis poste emancipiĝi).

La seniluziiĝo pri la misuzita marksismo-leninismo kondukis en la vicoj de la komunismaj idealistoj al la rekonsciiĝo pri la originaj ideoj de Lenin kaj Markso, do, al la renaskiĝo de la klasika marksismo kaj al la revo pri pli homeca socialismo. Ĉio tio rolis kiel aldonaj stimuliloj aŭ eksplodaĵoj por la sekvonta orienteŭropa („kontraŭ-")revolucio. La iniciato por tiu revolucio eliris de la orienteŭropaj komunistoj kaj de la komunismaj partioj mem, kiuj estis traktitaj de Moskvo kiel filioj en eksterlando. Ĉi tiu emancipiĝo baldaŭ direktis sin kontraŭ la centro en Moskvo mem, kio kondukis tiujn partiojn kaj landojn, kiuj estis regitaj de ili, al komplikaj rilatoj kun Moskvo kaj la komunismaj partioj en la ceteraj socialismaj landoj. La emancipiĝo de tiuj filioj estis samtempe ligita kun la konscio pri la propra ebleco regadi absolutisme, kiel ili lernis tion de la sovetia modelo, ĉar finfine ili mem estis stalinisme konstruitaj partioj, kiuj ne volis dividi siajn atingojn kaj privilegiojn kun aliaj kaj egoisme kaj ĵaluze defendis la proprajn interesojn kaj influojn. Ĉi tiu strebado estis integre ligita kun la volo esti sendependa, memstara kaj suverena, do tiu klopodo kongruis kun la deziro je nacia memstareco kaj suvereneco, kiel supre menciite, sed ĉi-foje sub komunismaj kondiĉoj. La menciitaj emancipiĝaj procezoj estis la ŝlosilo por la sekvonta orienteŭropa revolucio, celanta la liberiĝon de la stalinisma jugo, kiu estis iniciatita parte de la popolo kaj parte de la regantaj komunistoj mem, akompanate de la provokoj de la disidentoj (kiuj perdos la ludon). Ĉi tiu strebado estis ligata kun altgradaj riskoj, kiel montros la eventoj en 1953 en GDR, en 1956 en Hungario kaj Pollando kaj en 1968 en Ĉeĥoslovakio, ĉar la provo emancipiĝi kaj liberiĝi estis sufokita de la moskva poststalinisma centro, kun fatalaj sekvoj por tiuj, kiuj lanĉis kaj organizis ĝin.

Tiel, post la dua mondmilito en la orienteŭropaj landoj estiĝis paradoksa, komplika kaj ege tragika situacio.

Dum la supre menciitaj faktoroj (konscio pri la nacia suvereneco, demokratio kaj pli altgrada kulturo) estis pli stabilaj kaj pli longdaŭraj, la „stalinismaj" faktoroj montriĝis malstabilaj kaj provizoroj. Rimarkinda estas la fakto, ke la relative malgrandaj komunismaj partioj de la elito rapide fariĝis amasaj organizaĵoj kun centmiloj da membroj, kio ebligis al ili teni la politikan povon. Tio nature donis al ilia ekzistado certan legitimecon, kiu estis apenaŭ pridubita de la plimulto de la homoj, kiuj kredis, ke la socialismo estas definitiva kaj esperis, ke ĝi estos plibonigebla. Nature, tiu erara kredo havis fatalajn sekvojn.

### Opozicio kaj kontraŭstaro kontraŭ la sovetia stalinismo

### Unua akto de la kontraŭmoskva protesto: Jugoslavio 1948

La klopodo forpuŝi nekomunismajn partiojn aŭ integri ilin en superpartiajn unuecajn strukturojn (kiel naciaj frontoj) sub la gvido de komunistoj ne okazis sen protestoj kiel ekzemple en Hungario aŭ Rumanio en 1947, sed tiuj fruaj kaj limigataj rezistaj reagoj staris en la ombro de la grandaj kaj sensaciaj kontraŭ-stalinismaj kaj -sovetiaj ribeloj de postaj jaroj en la orienta bloko.

La unua granda krizo en la sovetia bloko koncernis Jugoslavion, kiu emancipiĝis de Moskvo kaj riskis gigantan kverelon kun Stalin, kiu kondukis al la kondamno kaj ekskludo de la jugoslavoj el lia bloko, ĉar ili aŭdacis kritiki lin.

Kial ĝuste Jugoslavio? Kompare kun aliaj komunismaj landoj, Jugoslavio ne ´pruntepreni s´ aŭ ´importis´ la revolucion per la ´helpo´ de Sovetunio, sed mem aranĝis ĝin. Kvankam dum la dua mondmilito ili batalis sub la ruĝa stelo, la jugoslaviaj partizanoj, gviditaj de Tito, agis kiel nacia movado, formante apartan grupon de revoluciuloj sine de la Jugoslavia Naciliberiga Armeo[66] kaj de la Ligo de la Jugoslaviaj Komunistoj,[67] havante historie malmulton komunan kun Lenin kaj la rusaj aŭ sovetiaj bolŝevikoj.

[66] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Jugoslavaj_Partizanoj. Pri la evoluo de la partizana milito en Jugoslavio vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Geschichte_Jugoslawiens#Der_Partisanenkrieg.
[67] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ligo_de_Komunistoj_de_Jugoslavio.

Iam estante nura sekcio de Komintern,[68] la jugoslavoj rifuzis esti financataj de Moskvo. La memstaremo de la jugoslavoj vekis fruan suspekton de Stalin, kiu traktis ilin laŭ sia maniero. Kiam la jugoslaviaj komunistoj restadis en Sovetunio, cento da ili fariĝis viktimoj de la stalinismaj purigoj, tiel ke en la politburoo de Milan Gorkić praktike restis nur Josip Broz (Tito), kiu mirakle evitis esti likvidita de Stalin, dum multaj aliaj kamaradoj (kaj liaj unuaj du edzinoj) estis trafitaj de la stalinisma teroro. Pli kaj pli Tito negative reagis al la nekutima desupra aroganteco de Stalin kaj de la sovetiaj oficiroj kaj „konsilistoj", kiuj aperis en Jugoslavio, kie sub diversaj pretekstoj ili enmiksiĝis en la internajn aferojn de la jugoslaviaj komunistoj, kiujn tiu truda kaj sovaĝa konduto de la sovetianoj, al kiu apartenis ankaŭ diversaj mensogoj, senskrupula spionado, varbado de agentoj por la sovetia sekureca servo kaj brutala perforto kontraŭ jugoslaviaj virinoj, ŝokis kaj konsternis. Estante memfieraj homoj, la jugoslavoj sentis sin malegale traktitaj de la sovetianoj kaj ofendiĝis. La enorma prestiĝo de Tito savis la jugoslavian komunisman partion de interna skismo, kiu estus povinta havi fatalajn sekvojn por la tuta lando. La skribajn plendojn de la CK de KPJ Stalin kaj Molotov respondis per tio, ke ili vidis en ili „pruvojn de kontraŭ-sovetia kaj kontraŭrusa politiko" – kutima reago, kiam la rusoj alfrontis kritikon de ekstere. Oni akuzis la jugoslavojn, ke ili starigis maldemokratian reĝimon (!!!) kaj eliminis la marksismon.

Stalin decidis fari kurtan proceson kun la jugoslavoj, pri kiuj li senlime ĉagreniĝis kaj seniluziiĝis. La konflikto de Stalin kun Tito kaj la jugoslaviaj komunistoj kondukis al la eksigo de KPJ el Kominform[69] en 1948. Post tiu puno, kiu estis malfacile digestebla, la jugoslavoj komencis senprokraste pravigi sian sintenon kaj disvastigis siajn vidpunktojn tra la komunisma mondo, aperigante plurajn eldonaĵojn en diversaj lingvoj, kaj submetis la stalinisman reĝimon al akra kritiko. Oni riproĉis al la sovetianoj, ke ili subordigis la aliajn komunismajn landojn de orienta Eŭropo al statuso de satelitoj kaj praktikas sklavigon de la Baltaj Ŝtatoj kaj okupacion de partoj de Germanio kaj Aŭstrio. La sovetianoj estis nomitaj imperiistoj kaj rabistoj, kiuj subpremas kaj subjugas la okupatajn landojn per drastaj metodoj. La sovetiaj komunistoj krome estis akuzitaj, ke ili perfidis la socialismajn principojn kaj elektis la vojon de la malnova carisma Ruslando, kiu praktikis la politikon de la grandrusaj ŝtatinteresoj, ke ilia celo ne estas la monda revolucio, sed la rusa ŝovinisma mondhegemonio pri la ceteraj popoloj. La internan evoluon de Sovetunio la jugoslaviaj komunistoj kondamnis kiel krudan ŝtatkapitalismon kun propra burokratia sistemo, kiu estas senprecedenca en la historio kaj kiu intencas fari nenion alian ol ekspluati la socion kaj la laboristojn, kiuj fariĝis malbone pagitaj industriaj sklavoj, kiuj ne ricevis la eblon profiti el la gajno de la produktado, ĉar la ŝtataj burokratoj mem akaparas tiun monon en formo de gigantaj salajroj kaj kiuj devas elteni la arbitron de burokrateca diktatoro. Se Lenin scius tion kaj vidus la misformiĝon de la socialismo en Sovetunio, li turnus sin en sia tombo. Ĉi tiun kritikon Tito prezentis okaze de la VIa kongreso de KPJ en 1952, kvar jarojn post la eksigo el Kominform. Tiu tuta lavango de kritiko sendube estis forta tabako por la sovetianoj, sed en la esenco la analizo de la jugoslaviaj komunistoj estis nature ĝusta kaj prava.

La unua skismo de la internacia komunisma movado do estis perfekta. Moskvo reeĥis per alvoko al la jugoslaviaj laboristoj kaj intelektuloj denove iri en la montaron kiel partizanoj kaj elimini iliajn gvidantojn, ĉar ili estas faŝismaj murdistoj kaj usonaj spionoj. Stalin reagis per ekonomia kaj politika blokado kontraŭ Jugoslavio, klopodante izoli la landon por eviti plian disvastiĝon de la „nacia komunismo" al aliaj komunismaj landoj.

Sed la jugoslavia propagando havis ankaŭ pozitivan efikon el la vipunkto de ĝiaj aŭtoroj. La polaj komunistoj kritikis la kolektivigon de la agrikulturo, kiu estis ordonita de Moskvo. La tiama rumana ministro pri justico faris la samon (kio kaŭzis, ke li estis arestita kaj mortigita). La konata germana komunisto Wolfgang Leonhard fuĝis en marto 1949 el orienta Berlino al Jugoslavio.[70] Lian ekzemplon sekvis 8500 aliaj kamaradoj en la diversaj komunismaj landoj.

Sed Moskvo daŭrigis sian venĝon kontraŭ komunistoj, kiuj montris sin mallojalaj, kaj komencis purigi ankaŭ la komunismajn partiojn kaj persekuti tiel nomitajn „titoistojn" en la diversaj komunismaj landoj. Centmiloj da kamaradoj, t.e. ĉirkaŭ 25 procentoj de la membraro, perdis sian apartenon al la landa KP en Pollando, Rumanio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Bulgario kaj GDR. Kontraŭ eminentaj partiaj

---

[68] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Tria_Internacio.
[69] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Kominform.
[70] Lia patrino Susanne Leonhard-Köhler, kiu estis germana verkistino, estis arestita en 1936 en Sovetunio kaj pasigis 12 jarojn en la gulago de Vorkuta kaj Siberio, pri kio ŝi verkis interesan libron. (Vd. http://www.gulag.memorial.de/person.php?pers=140).

funkciuloj kiel László Rajk (Hungario), Rudolf Slánský (Ĉeĥoslovakio), Trajĉo Kostov (Bulgario) kaj Lucrețiu Pătrăşcanu (Rumanio) estis lanĉitaj aĉaj juraj farsprocesoj, kiuj finiĝis per la fizika likvido de tiuj „titoismaj perfiduloj“, kiuj aŭdacis kritiki la stalinismon. En Pollando Władysław Gomułka kaj Marian Spychalski estis arestitaj, sed mirakle evitis sian mortigon. En Moskvo iuj studentoj protestis kontraŭ la stalinismo – tri el ili estis kondamnitaj al morto.

Unuflanke, la heroa emancipiĝo de la jugoslaviaj komunistoj disde Moskvo kaj Stalin estis granda triumfo por Jugoslavio, kiu estis admirita de la tuta nekomunisma mondo, kvankam la ribelo tragike finiĝis. Aliflanke, la jugoslaviaj komunistoj metis sin sub propran premon, ĉar ili devis nun prezenti al la propra popolo alternativon al la stalinisma komunismo, kiu laŭ ili forlasis la originajn ideojn kaj celojn.

La fondo de la laborista memadministra sistemo en la entreprenoj de Jugoslavio[71] estis la unua respondo, kiun la jugoslaviaj komunistoj donis al la popolo. Ĝi devis reale anstataŭi la burokratecan sistemon, kiu estis transprenita de Sovetunio. Iusence tiu memadministra sistemo baziĝis sur la ideoj de la origina konsilia sistemo, kiu posedis revolucian signifon por ĉiuj ´veraj´ komunistoj, ĉar ĝi memorigis la komencojn de la sovetkomunismo sub Lenin, kiu siaflanke baziĝis sur la idearo de Markso.[72] Tiu memadministra sistemo ne fariĝis nur simbolo de la jugoslavia komunismo, sed ĝi celis ankaŭ esti alternativa, dua komunisma modelo kun ĝenerala signifo, kiu povis esti kopiata ankaŭ de aliaj komunismaj landoj, eĉ de Sovetunio mem. En la jugoslavia laborista memadministrado oni do vidis la komencon de demokratia evoluo ene de la komunisma ekonomia sistemo. Por la kuraĝa enkonduko de tiu sistemo Jugoslavio poste eĉ ricevis ne nur laŭdojn, sed ankaŭ monkreditojn de la Okcidento.

La jugoslavia „revolucio“ de la jaro 1948 do havis kvinoblan signifon: ĝi montris al la aliaj komunismaj ŝtatoj kaj partioj, ke oni povas sin defendi sukcese kontraŭ la sovetia hegemonio, ĝi generis la praktikan nacian komunismon kaj fondis alternativan, duan modelon konkurence kun la sovetia modelo. Krome, ĝi kreis pli demokratecan plurismon en mondo, kiu konis nur la monolitan principon kaj ĝi pruvis, ke komunisma lando povas funkcii memstare ankaŭ ekster la sovetia bloko. Nature, la esenca problemo de Jugoslavio estis, ke ĝi konservis la komunisman sistemon, kiu poste mem montris la samajn simptomojn, trajtojn kaj problemojn kiel la sovetia komunismo.

Restas la demando kial Stalin ne riskis lanĉi militon kontraŭ Jugoslavio por devigi ĝin resti en la sovetia bloko. Kiel ni scias, li elektis alian solvon, nome la eksigon de la jugoslavia KP el la sovetia bloko kaj la alvokon al batalo kontraŭ la „titoismo“, kiu estis analoge traktita kiel la „trockiismo“. Ĉu li rezignis pri milito kontraŭ Jugoslavio, ĉar li komprenis, ke Tito estas tro forta kaj memstara kontraŭulo kaj ke milito en tiu lando kun siaj obstina rezista kaj memkonscia partizana tradicioj estus malfacile gajnebla ?

## Albanio kaj Bulgario

Sed ekzistis ankaŭ problemoj kun Albanio kaj Bulgario. Kvankam ne temis pri popolaj ribeloj, estu ĉi tie aldonitaj la epizodoj de la albana emancipiĝo disde Jugoslavio kaj la (fiaskinta) projekto de la balkana federacio, kiu estis planata de Tito kaj de la gvidanto de la bulgara KP, Georgi Dimitrov. Ambaŭ eventoj povas esti konsiderataj kiel klopodoj de la kontraŭstaro kontraŭ Stalin, kies enmiksiĝo en la aferojn de la balkanaj landoj vekis suspekton kaj proteston en la koncerntaj landoj, kun fatalaj sekvoj por la koncernataj popoloj. Unue pri Albanio.

Kiel raportite, en ***Albanio*** en 1944 la komunistoj transprenis la povon sub la gvido de Enver Hoĝa, kiu enkondukis en sian landon brutalan subpreman unupartian reĝimon, kiu komplete elŝaltis kaj malpermesis ajnan politikan opozicion. Lojalaj partizanoj formis la fifaman albanan sekurecan servon Sigurimi, kiu starigis totalan kontrolon en la lando kaj mortigis milojn da homoj en la venontaj kvardek jaroj. Simile kiel en la kazo de Jugoslavio, la albanaj komunistoj starigis la miton kaj legendon, ke ili mem gvidis la kontraŭfaŝisman liberigan militon por legitimigi la propran regadopretendon. Ĉar nek Sovetunio nek la okcidentaj aliancanoj havis aliron al Albanio, Jugoslavio fariĝis iusence la natura aliancano de tiu lando, kiu devis, laŭ la intenco de Tito, fariĝi respubliko de la jugoslavia federacio.

[71] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Arbeiterselbstverwaltung.
[72] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Räterepublik; Theodor Bergmann: Arbeiterselbstverwaltung. En: Historisch-Kritisches Wörterbuch des Marxismus. Vol. 1, p. 487.

Ambaŭ ŝtatoj ŝajnis kunfandiĝi pli kaj pli. En julio 1946 Jugoslavio kaj Albanio subskribis pactraktaton, al kiu sekvis tuta aro da konvencioj pri teknika kaj ekonomia kunlaboro, kiu devis servi al la integriĝo de Albanio en la jugoslavia ekonomia spaco. La rilatoj estis tiel intimaj, ke oni decidis enkonduki komunan valutan union kaj la serbkroatan lingvon kiel lernfakon en albanajn lernejojn. Jugoslaviaj konsilistoj enpenetris la albanan armeon, albanajn ministeriojn kaj diversajn instancojn kaj entreprenojn. Por helpi al la malsataj albanoj, Jugoslavio sendis dudek mil tunojn da cerealo. Estis fonditaj multaj komunaj entreprenoj sur la kampoj de la montara industrio, fervoja konstruado, en la nafta kaj energia sektoroj kaj en la ekstera komerco. La telefona reto ligiĝis kun tiu de Jugoslavio. Do, Albanio fariĝis pli kaj pli dependa de Jugoslavio, kiu „aĉetis“ en Tirana la apogon al sia politiko per altaj kreditoj.[73] La por-jugoslavia kurso de Tirana atingis sian kulminon en printempo 1948, kiam Koçi Xoxe proponis peti Belgradon akcepti Albanion kiel respublikon de la jugoslavia federacio. Ŝajnas, ke Stalin eĉ konsentis, ke Albanio estu ´glutita´ de Jugoslavio. Sed multaj albanoj sentis sin humiligitaj, kiam Albanio ne estis invitita al la fondkunveno de Kominform en Pollando en 1947 kaj anstataŭ tio estis reprezentita de Jugoslavio. Ene de la albana KP do formiĝis du kontraŭdiraj tendaroj pri tiu kontestata por-jugoslavia kurso, en kiuj venkis unue la frakcio de Koçi Xoxe, kiu subtenis tiun kunlaboron de sia lando kun Jugoslavio. Do baldaŭ aperis neeviteblaj kvereloj inter ambaŭ registaroj, ĉar la albanoj volis mem utiligi la produktantan industrion, dum la jugoslavoj vidis en Albanio unuavice ekspluateblan liveranton de naturaj resursoj kaj produktanton de agrikulturaj varoj. Kiam la albanoj submetis al Belgrado ekonomian planon, kies celo esti havigi al Albanio pli altgradajn memstarecon kaj sendependecon, Belgrado reagis negative kaj la CK de la jugoslavia KP akre kritikis la albanan partian ĉefon Enver Hoĝa pro ties kaprica politiko.

Sed la albanaj gvidantoj radikale ŝanĝis sian rilaton al Jugoslavio, kiam Kominform ekskludis la jugoslavian KP en junio 1948 pro ideologiaj diferencoj. Tito kaj liaj kamaradoj estis konsideritaj kiel malamikoj de Albanio. Komence de julio ĉiuj jugoslaviaj konsilistoj estis forpelitaj de la lando, ĉiuj komunaj traktatoj kaj konvencioj estis nuligitaj kaj la limo estis fermita. En la sekvo la albanaj komunistoj alproksimiĝis al stalinisma Sovetunio. Enver Hoĝa, kiu enkondukis la radikalan ŝanĝon, utiligis la okazon por purigi la partian aparaton de rivaloj kaj kontraŭuloj. Sennombraj funkciuloj estis persekutitaj kiel laŭdiraj „titoistoj“, arestitaj, kondamnitaj kaj ekzekutitaj, ankaŭ Koçi Xoxe, iama ministro pri internaj aferoj. La jugoslavia ekonomia helpo estis anstataŭigita per sovetia helpo kaj la kvinjara ekonomia plano estis suspendita, anstataŭ jugoslaviaj konsilistoj sovetiaj fakuloj inundis la landon. En februaro 1949 Albanio aliĝis al la Konsilio por Reciproka Ekonomia Helpo (Comecon), en 1955 al la Varsovia Pakto (aŭ Traktato),[74] kiu estis fondita kiel reago al la fondo de NATO kaj kiel „pacprojekto“ por protekti la socialismajn landojn kontraŭ „imperiisma agreso“.[75]

La enkonduko de la sovetia „socialismo” (t.e. stalinismo) en ***Bulgarion*** dume ne ekskludis la eblecon gvidi ankaŭ memstaran regionan politikon. Tio montriĝis kiam ĉe la bulgaroj kaj jugoslavoj revekiĝis la ideo krei „Balkanan Federacion”. Fakte, ĉi tiu revo por kunligi la sudslavajn landojn ne estis nova, kaj ĝin havis ne nur socialistoj kaj komunistoj, aŭ nur bulgaroj kaj jugoslavoj, kiuj kredis, inter alie, ke per tia unuiĝo la „makedona demando“ povos esti solvita. Kaj Tito kaj Georgi Dimitrov, gvidanto de la bulgara KP, estis entuziasmaj apogantoj de la federacia opcio, kiu devis inkluzivi ankaŭ Albanion. Post la transpreno de la politika povo fare de la komunistoj en tiuj landoj la momento ŝajnis esti veninta por revivigi la projekton. Fakte, eĉ Stalin komence favoris ĝin, ĉar li esperis, ke la konstruado de forta sudslava unio povos bridi la malfacile kontroleblajn ambiciojn de la fiera jugoslavia partizana gvidanto Josip Broz Tito. Krom tio, li kredis, ke tia projekto neŭtraligos la britajn interesojn, kiuj tradicie ekzistis en Balkanio. Sed la aferoj ne tute evoluis en la direkto dezirita de Stalin, ĉar Tito kaj Dimitrov montriĝis ĉi-rilate tro memstaraj kaj kapricaj. Tito nepre kontraŭstaris la enmiksiĝon de ekstere, precipe de Moskvo, kaj havis proprajn planojn: Kune kun greka Makedonio, Albanio kaj partoj de Aŭstrio kaj Hungario (!!!) li celis enkadrigi Bulgarion kiel sepan respublikon en tian sudslavan union. Sed tia koncepto tute ne plaĉis al la bulgaroj, kiuj preferis havi federacion de egalrajtaj partneroj. Kiam la diversaj planoj estis submetitaj al Stalin, la sovetia gvidanto decidis favori la jugoslavian varianton. La 2an de aŭgusto 1947 jugoslavoj kaj bulgaroj renkontiĝis en Bled kaj subskribis kontrakton pri ekono-

---

[73] Vd. krome https://de.wikipedia.org/wiki/Geschichte_Albaniens#Anlehnung_an_Jugoslawien_(1944–1948).

[74] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Geschichte_Albaniens#Anlehnung_an_Jugoslawien_(1944–1948) kongrue kun Peter Bartl: Albanien. Vom Mittelalter bis zur Gegenwart. Regensburg 1995, p.

[75] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Varsovia_Traktato. Pli detale kaj pli fake pri la fondo kaj la fondaj principoj de la Varsovia Pakto vd. Csizmas p. 6-20.

mia, kultura kaj ĝenerala kunlaboro kaj interkonsentis pri la starigo de komuna „Unio de la sudslavaj popolrespublikoj”. Tio estis konfirmita okaze de la reciproka vizito de Tito la 27an de novembro en Evksinograd apud Varna, Bulgario. Tie Tito emfazis, ke la komuna ŝtato estos fortika unuiĝo, kiu kapablos defendi sin en ĉiu kazo. La jugoslav-bulgara aventuro ne estis finita. Kiam en januaro 1948 Dimitrov invitis ankaŭ Rumanion, Hungarion, Albanion, Ĉeĥoslovakion, Pollandon kaj eĉ Greklandon (post la komunisma venko en la civitana milito) aliĝi al tia balkana federacio kaj klarigis la ĉi-rilatajn aferojn en la gazeto *Pravda,* Moskvo reagis kun ĉagreno kaj per vetoo. Stalin rifuzis la planon de Tito kaj Dimitrov starigi „duan centron de la monda komunismo” kaj komencis suspekti, ke la bulgara gvidanto fariĝis nura lakeo de Tito. En telegramo, kiun Dimitrov ricevis el Moskvo, la sovetia diktatoro nemiskompreneble sciigis al la bulgara partiestro, ke lia sinteno ne estas aprobinda kaj ke la dogana unio, kiun li celis starigi kun Rumanio, ne estas dezirinda. Post kiam la gazeto *Pravda* publikigis akran kritikon kontraŭ la artikolo de Dimitrov pri ĉi tiu temo, la bulgaro konsterniĝis kaj panike defends sin per la fatala averto, ke oni ne devus publike montri al la malamikoj, ke ekzistas diferencoj inter la sovetiaj kaj bulgaraj komunistoj. Kiam la 10an de februaro 1948 bulgara kaj jugoslavia delegacioj estis vokitaj al Moskvo, la „konsultiĝo“,[76] dum kiu la malharmonio inter la diversaj flankoj, precipe sovetia kaj bulgara, klare manifestiĝis, finiĝis per draŝa sovetia kritiko al la adreso de ambaŭ delegacioj, en kiuj Dimitrov ĉeestis kaj Tito mankis. Okazis eĉ akra kunpuŝiĝo inter Dimitrov kaj Stalin, kiu riproĉis al la bulgara kolego, ke rilate la federaciajn planojn li tro multe babilas en intervjuoj kvazaŭ kiel foira virino aŭ kvazaŭ li daŭre estus la ĝenerala sekretario de Komintern. Dedijer notis en sia Tito-biografio la tutan naŭzan konversacion, dum kiu Dimitrov estis daŭre interrompita de Stalin, kiu estis ege kolera. Milovan Đilas poste rakontis en siaj libroj,[77] ke la heroo de Lepsiko estis traktita kaj humiligita de la sovetianoj, precipe de Stalin kaj Molotov, kiel bubo, kiu „staris kun ruĝaj oreloj kaj ruĝaj makuloj sur lia vizaĝo” antaŭ Stalin „kiel batita hundo”, al kiu la sovetianoj „ŝtopis la buŝon“. Sed ne nur Dimitrov enkasigis fortajn riproĉojn de Stalin kaj devis konfesi siajn „erarojn”. Ankaŭ Trajĉo Kostov, alia membro de la bulgara delegacio, kiu volis diskuti pri ekonomiaj temoj kaj aŭdacis interrompi la diskuton kun Stalin kaj kritiki la sovetian ekonomian politikon, rikoltis la koleron de Stalin kaj restis negative fiksita en lia memoro (kio havos fatalajn sekvojn). Dum ĉi tiu moskva renkontiĝo la rilatoj inter sovetianoj unuflanke kaj bulgaroj kaj jugoslavoj aliflanke sendube ege suferis, kun fatalaj sekvoj. Kiel konate, la jugoslavoj estis eksigitaj el Kominform (la 28an de junio 1948 laŭ sovetia propono) kaj Georgi Dimitrov estis malpotencigita de alia stalinisto, Vâlko Ĉervenkov, kiu fariĝis la nova forta homo de Bulgario.

Sed ankaŭ la fido de la jugoslavoj je la bulgaroj estis detruata, kiam en aprilo 1948 ili ricevis tre malagrablan leteron el Sofio, kiu estis subskribita de Ĉervenkov kaj kiu enhavis diversajn ofendojn kontraŭ la jugoslavoj. En la letero estis riproĉite al la jugoslavoj, ke ili ne sufiĉe aprezas la rolon de Sovetunio lige kun la batalo kontraŭ la imperiismo kaj ke ili neas kelkajn principojn de la marksisma-leninisma doktrino. Ĉervenkov, la aranĝita lakeo de Stalin, kontestis, ke la jugoslavoj mem liberigis sin de la germana okupacio, ĉar tia venko ne povis esti ebla sen Sovetunio kaj sen la sovetia armeo, ktp. Fine, Ĉervenkov eĉ minacis la bulgarajn komunistojn per la averto, ke oni kontraŭbatalos ĉiajn „kontraŭ-marksismajn vidpunktojn de gvidaj jugoslaviaj kamaradoj“, se ili estos disvastigataj en Bulgario kaj „damaĝe influos“ la membraron de la bulgara CK. Ĉi tiu mesaĝo, kiun la jugoslavoj konsideris kruda kaj perfida, fakte signifis kaŭzon por ĉesigi la interparolojn pri la jugoslav-bulgara federacio kaj faris ankaŭ pliajn kontaktojn kun Dimitrov superfluaj kaj sensencaj. Kiel plej lasta amiko de Tito en la orienta bloko Dimitrov gratulis lin je lia baldaŭa naskiĝtago en majo. La postan monaton Tito same faris por gratuli al Dimitrov okaze de ties naskiĝtago, kion Dimitrov danke respondis, por la plej lasta fojo. Por pre

[76] Kiu estas dokumentita en la *Taglibro* de Georgi Dimitrov, interese priskribita de V. Dedijer en la ĉapitro 19 de lia *Tito-biografio* (sbkr. 1952, germane 1953, en Esperanto 1954), kaj anekdotece prinotita de M. Đilas en *Interparoloj kun Stalin* (Stuttgart 1963, p. 217-226) kaj en *Memoroj* (München 1992, p. 183-193). Dedijer menciis, ke Stalin kredeble havis la planon enkadrigi Bulgarion kaj Jugoslavion en Sovetunion, kaj laŭ Đilas eĉ ekzistis la plano de Stalin de la fizika likvido de Tito kaj de la jugoslaviaj gvidantoj. Dedijer menciis, ke en 1952 bulgaraj „teroristoj“ provis mortigi Titon, sed finfine alia alta oficiro fariĝis la viktimo de tia atenco.

[77] Kiel Đilas rakontis en siaj *Memoroj*, Tito kaj Dimitrov persone tre ŝatis unu la alian, ankaŭ ekzistis reciproka simpatio inter la jugoslava kaj bulgara (ĉefe serba kaj makedona) popoloj. Stalin rimarkis tiujn simpatiojn kaj klopodis intrigi inter bulgaroj kaj jugoslavoj, ekzemple tro laŭdante la jugoslavojn kaj mokante pri bulgaroj aŭ malrespekte traktante GD kaj aliajn bulgarajn kamaradojn. Sed kiel Đilas ankaŭ klarigis, la rilatoj inter jugoslavoj kaj bulgaroj „ne estis naturaj“, ĉar „la rilatojn alternis malvarma suspekto kaj romantika, infaneca entuziasmo“. (Memoroj, germana eldono 1992, p. 146).

mi Jugoslavion post ĝia rompo kun Stalin, la bulgaroj sendis soldatojn al la komuna landlimo, kion la jugoslavoj konsderis kiel krudan provokon, kiun Dimitrov ŝajne jam ne plu povis eviti.

Post sia fatala malsaniĝo Georgi Dimitrov forlasis Bulgarion, kiel raportite, por kuraciĝi en Sovetunio, kie li forpasis la 2an de julio 1949 en la aĝo de nur 67 jaroj.[78]

La posta tragedio de titoisma Jugoslavio konsistis en tio, ke Tito kaj lia komunisma partio en principo ripetis la samajn erarojn de Stalin, kiam li aplikis liajn metodojn dum la persekutado de propraj kontraŭuloj kaj malamikoj inter la komunismaj kamaradoj. Dekmiloj da homoj estis eksigitaj el la jugoslavia komunisma partio kaj miloj da opoziciuloj estis senditaj en la prizonojn de la jugoslavia gulago, kiu troviĝis sur la insularo de la Adriatika maro,[79] ĉar ili havis alian opinion ol Tito. Tiuj krimoj estis tabuitaj dum la tuta Tito-tempo, do neniam povis esti jure persekutataj aŭ publike diskutataj kaj estis iom post iom malkovritaj kaj publike traktitaj nur post lia morto en 1980 kaj precipe post la tragika fino de titoisma Jugoslavio en 1991.

## Dua akto de la kontraŭmoskva protesto: GDR 1953

La 6an de marto 1953 Stalin forpasis, kio kaŭzis amsan histerion ĉe la popolo. En Sovetunio senprokraste komenciĝis la lukto por lia postsekvo. Ĉefministro de Sovetunio kaj posteulo en la ofico kiel unua sekretario de KPSU fariĝis Georgij Malenkov, prezidanto de la prezidio de la Supera Soveto estis Kliment Vorošilov. Nikita Ĥruŝĉov, kiu estis nur la n-ro 5 en la hierarkio de la partio post la morto de Stalin, oficiale fariĝis unua sekretario de KPSU la 7an de septembro 1953.[80] La gvidantaro de la sovetia KP skismiĝis laŭ diversaj grupoj, kiuj havis diversajn sintenojn kaj imagojn pri la interna kaj ekstera politiko. Tio konfuzis la internacian komunisman movadon kaj faris la popolojn de orienta Eŭropo aparte atentemaj.

Koncerne ***Jugoslavion***, la anonco, ke reformoj estos enkondukitaj, ne estis vana promeso. La adopto de la memadministra sistemo kaŭzis, ke la centre planita ekonomio estis grandparte abolita. La laboristoj rajtis kundecidi kaj partopreni en la monprofito de la entreprenoj. Jugoslavio komencis praktikadi miksitan formon de planita kaj merkata ekonomioj, kio estis akompanata de la permeso de kapitalismaj metodoj. Krom tio, Jugoslavio realigis reformon de la agrikulturo, kie la kolektivaj formoj estis likviditaj, kaj politikan reformon kun veraj elektoj kaj konkurencaj kandidatoj.

En la komunisma gazetaro Milovan Đilas publikigis serion de sensaciaj artikoloj, en kiuj li klarigis kiel eblus transformi la stalinismon al demokratia socialismo. Por tio necesis laŭ li libera diskutado, jura ŝtateco, egaleco de ĉiuj civitanoj antaŭ la leĝo, rezigno pri la privilegioj de la komunistoj, libera kunludo de la ekonomiaj fortoj por atingi profitecon de la entreprenoj, ktp. Đilas timis, ke ankaŭ Jugoslavio povus esti difektata de la stalinisma burokratio. Li celis venki la marksisman-leninisman skemon, kiu disigis la mondon laŭ du tendaroj – jen socialisma, jen kapitalisma. Đjilas eĉ aŭdacis postuli, ke la profesiaj partiaj funkciuloj, kiuj laŭ li nur malhelpis likvidi la burokratian kulturon, estu amase maldungitaj kaj anstataŭigitaj per honoroficaj oficistoj. Li postulis ankaŭ, ke la popolo povu decidi mem la aferojn en la ŝtato, dum la komunisma partio limigu sian rolon al tiu de konsilanto de la socio. Tiel, la diferencoj inter komunistoj kaj popolo devus malaperi. Sed la kontraŭstaro flanke de la komunisma partio estis atendebla, kaj granda. Ĝia Centra Komitato rifuzis tiujn ideojn kaj senkompate ekskludis ilian aŭtoron en januaro 1954 el sia sino. Kiam Đilas ankaŭ postulis la enkondukon de opozicia partio por fini la komunisman monopolon, li estis eĉ arestita kaj kondamnita pro konspirado al 18-monata prizona puno, sed dume nur provizore kiel averto por li. Malgraŭ tiuj ĉikanoj, ankaŭ poste Đilas ne ĉesis agi kiel kuraĝa kritikisto kaj senkompromisa opoziciulo, kvankam li estis krude traktita de Tito, ĉar li aŭdacis kritiki lian sistemon, pro kio li aliflanke ĝuis grandan prestiĝon en Okcidento.

---

78 Studon pri Georgi Dimitrov en Esperanto vd. sub kaj http://www.planlingvoj.ch/Georgi_Dimitrov_Bulgario.pdf. Dum la tuta komunisma tempo en Bulgario oni praktikis bizaran kaj tre malhonestan personkulton ĉirkaŭ GD kaj prisilentis ĉiujn krimojn, kiujn li faris en la nomo de Stalin en Bulgario, kaj ĉiujn konfliktojn, kiujn li kaj aliaj gvidaj bulgaraj komunistoj havis kun li. Simila ordonita personkulto nature okazis ankaŭ ĉirkaŭ Tito en Jugoslavio, kvankam li ne malpli ol GD en BG kulpis pri gravaj krimoj kontraŭ la homeco kaj la homaj rajtoj en la propra lando, kiuj estis strikte tabuitaj de la komunistoj.

79 La ĉefa prizono de tiu gulago troviĝis sur la insulo Goli otok (vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Goli_Otok).

80 Malenkov, Vorošilov, Ĥruŝĉov, Kaganoviĉ, Molotov, Mikojan aŭ aktive partoprenis la organizadon de la stalinisma teroro de la 30aj jaroj kontraŭ kulakoj, „popolaj malamikoj", partiaj membroj, polaj civitanoj, k.m.a., aŭ portis gravan respondecon por tiuj krimoj.

La malkontenteco en vastaj partoj de la jugoslavia popolo evidentiĝis per la eksplodo de tumultoj en majo 1955 precipe en ***Kroatio*** kaj ***Bosnio***, kie la polico brutale sufokis la ribelon, kiu kaŭzis laŭ raporto de atestantoj mortintojn kaj vunditojn kaj centojn da arestitaj kamparanoj. La nervoza komunisma partio reagis per purigo de siaj vicoj kaj forpelis kelkajn altrangulojn laŭ kutima stalinisma maniero.

En la ekstera politiko Jugoslavio atingis grandan sukceson, kiam en tiu tempo la nova sovetia gvidanto Nikita Ĥruŝĉov vizitis kun Bulganin kaj Mikojan Belgradon, kie ili reprenis la akuzojn, kiujn Stalin siatempe faris kontraŭ la jugoslaviaj kamaradoj en la jaroj 1948-49. Ĥruŝĉov eĉ cedis al Jugoslavio la rajton elekti sian propran vojon al la komunismo kaj per tio legitimis la ekzistorajton de la jugoslavia nacia komunismo, nuligante la ´fatvon´, kiu estis elpuŝita de Moskvo kontraŭ Jugoslavio. La jugoslavoj, kiuj ne tro sentis sin impresitaj de la sovetia kaĵolado,[81] do povis senti sin grandaj venkintoj en la historia kverelo kun la potenca Sovetunio, kiu konfesis sian eraron. Kiam Ĥruŝĉov, kiu montis neniun intereson pri la laborista memadministrado de Jugoslavio, proponis, ke Jugoslavio revenu al la sovetia bloko, la jugoslavoj afable respondis, ke ili preferas resti neŭtralaj kaj praktiki la aktivan kunekzistadon kun aliaj komunismaj ŝtatoj, kion Ĥruŝĉov ja ne plu malpermesis.

Dum en Jugoslavio la situacio ŝajnis trankviliĝi, okazis alia dramo en ***Ĉeĥoslovakio***, kie la stalinisma registaro efektivigis reformon de la valuto, kiu kaŭzis, ke la ŝparita mono de la laboristoj kaj dungitoj perdis sian valoron. Fine de majo, komence de junio 1953 homoj komencis protesti en la bohemia urbo ***Plzeň*** kontraŭ la politiko de la Komunisma partio de Ĉeĥoslovakio, kiu estis gvidata de stalinistoj, per striko en la loka Škoda-fabriko. La koleregaj protestantoj atakis la urbodomon, starigis barikadojn sur la stratoj kaj detruis komunismajn simbolojn. Kelkaj lokaj komunistoj kaj uniformitaj policistoj aliĝis al la protesto aŭ estis devigitaj aliĝi al ĝi. La proteston partoprenis ankaŭ 2000 studentoj. La registaro de la slovaka stalinisto Viliam Široký sendis 8000 policistojn kaj 2500 armeajn soldatojn al Plzeň. La kunpuŝiĝo kaŭzis ĉirkaŭ 220 vunditojn, sed neniun mortinton. 2000 personoj estis arestitaj, la milita juro estis proklamita, la gvidantoj de la ribelo estis kondamnitaj al longaj prizonaj punoj, unu el ili poste eĉ estis ekzekutita post ricevo de la mortkondamno. La komunistoj kaj policistoj, kiuj aliĝis al la ribelo, estis aparte rigore traktitaj.

Fakte, strikoj estis lanĉitaj ankaŭ en 19 aliaj industriaj lokoj de Bohemio kaj Moravio kiel en Kladno kaj Ostrava, sed ili okazis sen perforto kaj post semajno estis ĉesigitaj. Estimeble 360´000 laboristoj partoprenis en tiuj strikoj kaj ĉirkaŭ 250´000 homoj protestis sur la stratoj. La komunismaj gvidantoj kondamnis la eventon kiel provokon lanĉitan de „agentoj de la imperiismo". La komunisma partio ricevis la ordonon purigi siajn vicojn de suspektitaj „socialdemokratiaj" elementoj kaj forigi nelojalajn membrojn. La armeo anoncis, ke ĝi senprokraste sufokos ajnan ribelon, se tia denove okazos en estonto. La anoncitaj reformoj estis tamen nuligitaj, krom la reformo de la valuto, kaj la prezoj estis parte reduktitaj.[82] Ĉi tiu incidento, kiu donis impreson pri la protesta potencialo de la laboristoj en komunisme regita lando, igis la gvidantojn en la Kremlo fortigi la kontrolon pri siaj satelitoj en orienta Eŭropo, kvankam iliaj perfortaj rimedoj ne povis eviti novajn protestojn ankaŭ en estonto, kiel montros la kazo de la ribelo de la jaro 1953 en orienta Germanio (GDR), pri kiu temas en la venonta ĉapitro.

En orienta Germanio, kiu ekde la fino de la dua mondmilito estis okupata de la sovetia armeo, oni persekutis kritikajn homojn, precipe studentojn, dekomence. La lasta plej granda ondo de arestadoj kontraŭ kritikaj aŭ opoziciaj studentoj de la lepsika universitato okazis en 1948. Inter la arestitoj troviĝis Wolfgang Natonek, demokratie elektita (de LDPD kaj CDU) estro de la studenta konsilio. SED malŝatis lin, ĉar li defendis la lepsikan universitaton kontraŭ la politikaj ambicioj de la regantaj komunistoj. En novembro 1949 li estis arestita de la sovetia sekreta servo NKVD kune kun 20 aliaj studentoj. En marto 1949 li estis kondamnita de iu sovetia armea tribunalo laŭ la punjuro de RSFSR al 25-jara arestpuno en laborlagro kaj estis retenita en diversaj prizonoj de la sovetia zono de Germanio. Post sia liberiĝo en 1956 li forlasis orientan Germanion kaj translokiĝis al FRG.

En oktobro 1950 formiĝis studenta grupo ene de FDJ (Libera Germana Junularo), kiu estis gvidita de Herbert Belter. Lia grupo kolektis informojn pri la situacio en la „zono", havigis ilin al la okcidentberlina radiostacio RIAS kaj disdonis flugfoliojn en la universitato kaj en la centro de Lepsiko, per kiuj oni i.a. postulis liberajn balotojn. Belter kaj aliaj estis arestitaj de la GDR-polico, transdonita al la sovetiaj aŭtoritatoj, kiuj malliberigis lin en la prizono de la sovetia sekreta servo MGB en Dresdeno.

[81] Vd. Crankshaw, Der rote Zar, p. 21-26.
[82] Pli detale vd. ankaŭ sub https://cs.wikipedia.org/wiki/Plzeňské_povstání_(1953).

Poste li estis transportita al Moskvo, kie li estis kondamnita en nepublika sekreta proceso de la sovetia armea tribunalo en januaro 1951. Antaŭ la tribunalo Belter plendis, ke en la „zono” mankas la liberecoj de la konscienco, parolado kaj gazetaro. En aprilo la prezidio de la Supera Soveto rifuzis peton pri indulgo kaj mortpafigis lin. La viktimo estis kremaciita kaj enterigita en amastombejo en la Donskoj-tombejo en Moskvo. Pri ĉi tiu skandalo oni eksciis nur post 1990 el la malfermitaj sovetiaj arkivoj, kio kaŭzis, ke Belter estis oficiale rehonorigita de la sovetia justico en majo 1994.[83]

En printempo 1953 ekstrikis laboristoj de grandaj entreprenoj, inter alie en iu fama fabriko en Hennigsdorf apud Berlino. La strikoj koincidis kun ŝvelanta nutrokrizo, kiu estis tipa kaj ofta fenomeno en la centre planita komunisma ekonomio, kiu favoris la militan sektoron kaj la pezan industrion. En tiu tempo GDR, plennome ***Germana Demokratia Respubliko***, fondita en 1949 kiel socialisma ŝtato, estis regita de la „betona” stalinisto Walter Ulbricht. La 1an de majo 1953, okaze de la „Tago de la laboro”, unu miliono da GDR-anoj ankoraŭ festparadis antaŭ la ligna podio sur la placo, kie iam staris la intertempe mallaperigitaj ruinoj de la dummilite detruita imperiestra kastelo, sur kiu Ulbricht kaj la anoj de la politburoo de la komunisma partio de GDR, kiu tie nomiĝis „Socialisma Unueca Partio” (SED), ridete mansvingis kaj prononcis solenajn paroladojn. La kontestata politiko de la regantaj komunistoj kondukis la landon al la ribelo de la 17a de junio 1953, pri kiu temos en la sekvo.

La 26an de majo la konsilio de la ministroj de GDR ordonis starigi zonon de kontrolo kaj barado inter okcidenta Berlino kaj GDR kaj interrompis la telefonliniojn inter ambaŭ urbopartoj. Multaj stratoj, kiuj ligis ambaŭ partojn, estis blokitaj aŭ fermitaj de la orienta flanko. Okcidentaj berlinanoj povis viziti la orienton nur en esceptaj kazoj. Fakte jam en januaro la oriento ĉesigis la transliman tram- kaj bustrafikon. Tiuj ĉikanoj kolerigis la berlinanojn; 80 mil orientaj berlinanoj laboris en la okcidento kaj 40 mil okcidentaj berlinanoj pergajnis sian monon en la oriento. Tiun nedeziratan trafikon la regantaj komunistoj en orienta Berlino kaj Moskvo volis interrompi.

La 28an de majo la sama registaro de GDR ordonis altigon de la labornormoj je 10 procentoj, kio signifis, ke la devigo labori pli multe kaj pli rapide je sama pagado fariĝis leĝa neceso, malgraŭ la pli kaj pli akriĝanta ekonomia krizo en la lando, kiu manifestiĝis precipe per manko de multaj nutraĵoj kaj varoj por la popolo. La 11an de junio la partio neatendite proklamis „novan kurson” en la ekonomio, kiu estis postulita de Moskvo, tamen sen nuligi la ordonitan altigon de la labornormoj. Kelkaj homoj konsideris tiun cedon kiel malforton de la KP kaj utiligis la momenton por konkretaj agadoj. En diversaj lokoj okazis provoj liberigi prizonulojn. En dekoj da urboj de GDR komenciĝis strikoj kaj manifestacioj, agrikulturaj entreprenoj malfondiĝis, membroj amase forlasis la partion SED, precipe la laboristaro estis malkontenta. Sed Ulbricht reagis al kritiko, strikoj kaj protestoj kun alergio kaj alvokis esti pli atentema pri kontraŭ-socialismaj provokantoj.

La 12an de junio okazis en iu konstruejo de la Stalina ŝoseo unua kunveno de laboristoj, kiuj rifuzis rezolucion, laŭ kiu la laboristoj devis „libervole” akcepti la dekprocentan altigon de la labornormoj. Alkuris SED-funkciuloj por diskuti kun la laboristoj, promesante la reprenon de la normoj. Sed la partio dume ne reprenis ilin.

La 15an de junio ekstrikis la laboristoj de grandaj kontruejoj en la Stalina ŝoseo kaj en la malsanulejo de Friedrichshain. Gravan rolon ludis la sindikatisto Max Fettling, kiu klopodis pozitive kontribui al la konflikto.

En la frua mateno de la 16a de junio 80 laboristoj, al kiuj survoje aliĝis centoj da homoj, marŝis de la Stalina ŝoseo ĝis la Domo de la ministerioj en la Lepsika strato, kie kolektiĝis miloj da protestantoj, kiuj volis paroli kun Ulbricht aŭ Grotewohl. Sed la klopodo estis vana. Subite tamen aperis iu ministro, kiu anoncis, ke la labornomoj estis reprenitaj, sed tio evidente ne plu tro interesis la amason, kiu prifajfis la ministron. Krom la postuloj repreni la altigitajn labornormojn kaj enkonduki laboristajn konsiliojn en la entreprenojn eksonis ankaŭ politikaj postuloj kaj aŭdiĝis unuafoje la deziro pri la reunuiĝo de Germanio lige kun la ideo de la germana nacia komunismo. La homoj postulis la malfondon de la partio SED kaj la demision de la registaro, la realigon de liberaj kaj sekretaj elektoj, la liberigon de ĉiuj politikaj

[83] Belter ne estis la sola, kiu spertis tian sorton. Pri aliaj orientgermanoj, kiuj estis deportitaj al Moskvo, kie ili estis akuzitaj, kondamnitaj kaj likviditaj, rakontas jenaj du libroj: Roginskij, A., Rudolph, J. k. Drauschke, F.: „Erschossen in Moskau ...“ Die deutschen Opfer des Stalinismus auf dem Moskauer Friedhof Donskoje 1950-1953. 3a plene prilaborita eldono. Berlin 2005; Rudolph, J., Drauschke, F. k. Sachse, A.: Hingerichtet in Moskau. Opfer des Stalinismus aus Berlin 1950-1953. Berlin 2007.

prizonuloj kaj la foriron de la sovetia armeo el GDR. Krom tio estis formulitaj iuj socipolitikaj kaj soci-ekonomiaj postuloj, kiuj koncernis la laboron kaj ĉiutagan vivon de la GDR-anoj, la pagadon de la salajroj laŭ la malnovaj normoj, la senprokrastan malaltigon de la vivokostoj kaj la rezignon pri punado de la strikantoj kaj iliaj gvidantoj.

Dume formiĝis aliaj protestmarŝoj en la centro de orienta Berlino. Do, vespere, la 16an de junio, en diversaj punktoj de orienta Berlino protestadis ĉirkaŭ 20 mil homoj. La sciigo pri la protestoj fulmrapide disvastiĝis en tuta Berlino per la apogo de la radiostacio RIAS, kiu komencis detale raporti pri la okazaĵoj. La berlina SED-partio kunsidis en la Friedrichstadt-palaco, antaŭ kiu okazis stratataj bataloj. Ulbricht petis de la sovetianoj la ordonon pafi kontraŭ la ribelanta plebo, kion Moskvo tamen strikte rifuzis.

Por la venonta tago, la fama 17a de junio, la laboristoj proklamis la ĝeneralan strikon kaj alvokis la laboristojn kolektiĝi sur la Strausberga placa. La protesta kaj strika viruso rapide vastiĝis tra orienta Berlino kaj atingis ankaŭ la entreprenojn en la urboj de centra kaj suda GDR – Halle, Magdeburg, Leipzig, Dresden. La laboristoj de Bitterfeld eĉ transprenis la politikan gvidon. El Hennigsdorf moviĝis potenca marŝkolono tra okcidenta Berlino kontraŭ la oriento. Ankaŭ el la direkto de Köpenick ŝoviĝis alia amaso kontraŭ la urbocentro. Jam matene sur plej diversaj stratoj kaj placoj de orienta Berlino, ankaŭ ĉe la Brandenburga Pordego, staris diversaj manifestaciantaj amasgrupoj. La strikoj kaj protestoj, kiuj cetere okazis spontane sen centra gvido en 700 diversaj lokoj de GDR, eĉ en amaseto da vilaĝoj, estis partoprenitaj de 400 mil ĝis 1,5 milionoj da homoj, ekzaktaj ciferoj mankas.[84] En milo da entreprenoj oni strikis. Do temis pri grandskala protest-ondo, kiu kaptis preskaŭ la tutan landon. Eĉ membroj de la junulara organizaĵo FDJ kun siaj bluaj ĉemizoj estis videblaj inter la protestantoj. La protestantoj sturmis 250 publikajn konstruaĵojn. En Berlino oni bruligis la grandan malnovan varvendejon Columbus-domo kaj la restoracion Domo Patrio ĉe la Potsdama placo, same iun ejon de la Nacia Fronto. Aliaj sturmis la distriktan sidejon de SED en la Frederika strato, kies internajn instalaĵojn oni detruis, aŭ invadis la Domon de la ministerioj, antaŭ kiu protestis inter 30 kaj 40 mil homoj. Aliaj ribeluloj ĵetis ŝtonojn kontraŭ la domon de la Centra Komitato de la SED-partio aŭ enpenetris diversajn policejojn. Junuloj forprenis la ruĝan flagon de sur la Brandenburga Pordego. Ĉe la sektora limo gardistaj dometoj estis bruligitaj kaj limŝildoj estis forigitaj, homoj senĝene trapasis la limon, sed la cetera trafiko estis haltigita. Ĉar la sekurecaj servoj de GDR estis komplete senhelpaj kaj ne sukcesis eviti la ĝeneralan kaoson, la sovetiaj trupoj devis esti vokitaj por fari ordon.

La sovetia armeo kompreneble ne povis aprobi aŭ toleri tian ribelon en orienta Germanio, kiu alprenis la formon de kontraŭkomunisma revolucio de la popolo – la regantaj komunistoj parolis pri „faŝisma puĉo, kiu estis organizita de la Okcidento” (kio nature estis plumpa mensogo) – kaj kiu minacis la pluan ekzistadon de la komunisma reĝimo (kio ja estis evidenta vero). Lavrentij Berija, la potenca ministro pri internaj aferoj de Sovetunio, ordonis la senprokrastan sufokadon de la ribelo. En la nokto de la 16a al la 17a de junio kunvenis altrangaj sovetiaj funkciuloj kun la politika pinto de GDR por diskuti la intervenon de la armeo. Marŝalo Sokolovskij, unu el la grandaj armeaj gvidantoj de la dua mondmilito, kiu alvenis el Moskvo al Berlino, ricevis la taskon disbati la laboristan ribelon en GDR. La tuta orientgermana polica kaj sekureca aparato ricevis alarman signalon, kaj en la sidejo de la Ministerio de la ŝtata sekureco, kiu estis gvidita de Wilhelm Zaisser, oni komencis organizi la intervenon.

La 17an de junio 1953 la sovetia armea administracio proklamis la militan staton en 167 lokoj de GDR. Post la proklamo de la milita stato en orienta Berlino mem la limo estis fermita kaj ĉia cirkulado inter orienta kaj okcidenta Berlino malpermesita. En la urbocentro de orienta Berlino aperis entute 600 sovetiaj tankoj, kiuj tamen ne pafis kontraŭ la protestantoj mem, kompare kun iuj orientgermanaj „popolpolicistoj”, kiuj ŝajne ne hezitis fari tion, sed pri tio ekzistas nur vagaj konoj. Homoj mortis aŭ vundiĝis ne nepre unuavice pro pafado, sed ĉefe pro perfortaj kunpuŝiĝoj laŭ diversaj manieroj. Krom la apero de tankoj kaj soldatoj okazis ankaŭ diversaj perfortaj bataloj inter civitanoj. Sed atakoj kontraŭ sovetiaj tankoj mem, kiuj veturis malrapide, tamen okazis malofte. En la strato ´Sub la Tilioj´ unu tanko tamen mortigis unu personon pro akcidento. Homoj starigis krucon, sed la polico rapide forigis ĝin. La sovetiaj tankoj tamen kaŭzis tiel teruran bruon, ke la ŝokitaj homoj aŭtomate forkuris. La tumultoj daŭris ĝis la vespero, sed la protestoj komencis lami, ĉar la sovetiaj tankoj plenumis sian taskon kaj ilia laboro havis sian efikon. La ribelo havis neniun perspektivon, ĉar mankis al ĝi trafa koncepto,

[84] Ekzistas detalaj raportoj de MfS (Stasi) pri la strik-situacio en la entreprenoj de GDR, vd. http://www.ddr-im-blick.de.

kunordigita gvidado kaj la ebleco paroli kun partiaj kaj ŝtataj funkciuloj, kiuj ne estis atingeblaj por la civitanoj. Vespere je la naŭa horo la ribelo estis praktike sufokita. En la sekvanta nokto la polico kaj sovetiaj organoj arestis 2500 personojn, en la sekvaj tagoj estis kaptitaj ankoraŭ kelkmil homoj pli. La strikoj estis diversloke daŭrigitaj, sed pro la arestado de multaj strikantaj gvidgrupoj iliaj fortoj iom post iom elĉerpiĝis kaj la strikoj finiĝis. La 23an de junio la sektoraj limoj denove malfermiĝis kaj la 11an de julio ls sovetianoj nuligis la militan staton en orienta Berlino.

Krom amaso da ruinigitaj objektoj, la rezulto de la bataloj estis 46 vunditaj policistoj kaj materia damaĝo, kiuj kaŭzis kostojn en alteco de duonmiliono da markoj. Kvankam en Okcidento oni multe troigis la nombron de viktimoj, nur 55 mortviktimoj estas dokumentitaj kaj 20 aliaj kazoj restis malklaraj. Krom tio la sovetiaj trupoj mortpafis 19 ribelulojn post tribunala proceso kaj verŝajne ankoraŭ dudekon da propraj soldatoj, kiuj laŭdire rifuzis pafi kontraŭ la ribelulojn, sed tiuj indikoj estas kontestataj de iuj aliaj fontoj. La vero estas, ke entute ĉirkaŭ 1600 personoj estis kondamnitaj de GDR-tribunaloj lige kun la fama ribelo de junio 1953 en GDR.[85] Malgraŭ lia pozitiva rolo, kiun li ludis dum la ribelo, Max Fettling estis arestita la 19an de junio de la polico en sia loĝejo kaj kondamnita en komuna proceso ankaŭ kontraŭ aliaj laboristaj aktivuloj „pro longe organizata agenta aktiveco" al dekjara arestpuno en malliberejo, kiun li povis forlasi en somero 1957 (poste li fuĝis kun sia edzino al okcidenta Berlino). Wilhelm Zaisser, la tiama ministro pri ŝtata sekureco, provis senpotencigi partiestron Ulbricht (ankoraŭ per la apogo de Berija), kies diktatoran regadostilon li kritikis, sed la puĉprovo fiaskis, ĉar Ulbricht havis la apogon de Malenkov en Moskvo, kiu tiam estis la ĉefa potenculo post la morto de Stalin.[86] Ulbricht kaptis la okazon por defendi kaj venĝi sin, riproĉante al la „frakcio Zaisser-Herrnstadt" „trockiismon" kaj ke tiuj homoj estas „malamikoj de la germana popolo, de la partio kaj de la laborista klaso". Zaisser, kiu devis ludi la kulpulon, ĉar li ne antaŭvidis kaj evitis la ribelon, en julio estis eksigita el la politburoo kaj forigita kiel ministro pri ŝtata sekureco. Iusence Zaisser ludis mallibervole la paradoksan rolon de opoziciulo, kvankam li estis intime ligata kun la komunisma subprema ŝtataparato. Nova gvidanto de tiu organo fariĝis Ernst Wollweber.

Krom la sovetianoj, aliaj trupoj de la orienta bloko ne intervenis en la konflikton. Laŭ validaj traktatoj, la usonanoj ne rajtis tuŝi la sovetian sektoron. En Okcidento, precipe FRG kaj Usono, iuj homoj kredis, ke la ribelo estis aranĝita de la sovetianoj kaj komunistoj por voki trupojn al Berlino por povi konkeri la tutan urbon aŭ prepari la reunuigon de Germanio laŭ orientaj imagoj. La brita ĉefministro Winston Churchill, kiu vidis siajn proprajn planojn en danĝero, eĉ pravigis la sovetianojn, ke ili havis la rajton sufoki la ribelon. La polico de okcidenta Berlino almenaŭ klopodis per diversaj rimedoj eviti la sturmon de amasoj da homoj kontraŭ orienta Berlino. La okcidenta politiko praktike lasis la ribelon al ĝia sorto, ĉar pro la paralizata politika situacio oni povis fari praktike nenion kaj la orienta sektoro de Germanio estis, kiel dirite, nealirebla por la okcidentaj aliancanoj. Kanceliero Konrad Adenauer vojaĝis la 19an de junio al (okcidenta) Berlino por funebri pri la mortintoj de la tragika evento en orienta Berlino, kiu signifis la unuan gravan krizon de la stalinisma potenco ekster Sovetunio kaj esence ŝanĝis la rigardon al la komunisma sistemo kaj en okcidento kaj en oriento.

Inter la plej (mal)konataj viktimoj de la orientgermana laborista ribelo de junio 1953 estas menciendaj la kazoj de Herbert Stauch kaj Paul Othma.

Kiam la 17an de junio 1953 la ribelo eksplodis ankaŭ en Magdeburgo, Herbert Stauch, entreprenisto en ĉi tiu urbo, aliĝis al la protestantoj, ĉar li sentis sin solidara kun iliaj postuloj, kiuj koncernis inter alie la liberigon de politikaj malliberuloj kaj la demision de la GDR-registaro. Stauch estis elektita de la protestantoj kiel proparolanto, kiu devis transdoni iliajn mesaĝojn al la ĉefo de la disktrikto. Vespere Stauch estis arestita de la GDR-polico kaj transdonita al sovetia tribunalo, kiu faris kurtan proceson kun li, ĉar la verdikto jam estis preta. Stauch ankoraŭ petis la tribunalon rezigni pri malmilda puno, sed la tribunalo akuzis lin pro „banditismaj aktivecoj" kaj kondamnis lin al la mortpuno. Post tio Stauch estis kaptita de tri sovetiaj soldatoj, kiuj kondukis lin en iun angulon de la prizona korto, kie la 18an de junio li estis senkompate mortpafita de tri germanaj popolpolicistoj. Stauch neniam estis enterigita. Laŭ oni-diro, kiun disvastigis tiam prizonanoj, li estis bruligita en la kelo, kie troviĝis la hejtiloj. En GDR la fa-milio de Stauch trafis gravajn reprezaliojn: la infanoj ne povis ricevi pli altan lernejan kleriĝon kaj la

[85] Pli detale vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Ribelo_en_GDR_en_1953. Pri ĉi tiu ribelo ekzistas sufiĉe granda fakliteraturo en diversaj lingvoj, ekzemple en la germana lingvo: Kowalczuk, I.-S.: Der 17. Juni 1953. C.H. Beck 2013, kaj Baring, A.: Der 17. Juni 1953. DVA 1983.
[86] Pri la sorto de Berija vd. piednoton 119.

patrino oficiale ne rajtis labori. Detalojn pri ĉi tiu kazo oni eksciis nur post la fino de GDR, kiam la arkivoj malfermiĝis. En 1996 li estis rehonorigita de la armea ŝtata prokuroro de Ruslando, kiu konfirmis la „politikajn krimojn“ de Stauch, kiuj estas supre menciitaj.[87]

Paul Othma laboris kiel elektrika teknikisto en iu fabriko de Bitterfeld. La 17an de junio li elpaŝis kiel proparolanto de la strika komitato de sia urbo, postulante, simile kiel Stauch, liberajn balotojn, la liberigon de politikaj prizonuloj kaj politikajn ŝanĝojn, kion SED interpretis kiel esprimon de la malfido kontraŭ la partio. Pro tiu kuraĝo oni nomis lin „leono de Bitterfeld“. Tri tagojn post la disbatita ribelo Othma estis arestita. Ankaŭ dum la esplorado en la prizono en Halle li ne rezignis pri la postuloj de la strikintoj. En novembro li estis kondamnita „pro plenumita krimo laŭ art. 6 de la konstitucio de GDR“ al 12-jara arestpuno en prizono. Krom tio, lia posedaĵo kaj lia domo estis konfiskitaj, kio kaŭzis, ke lia edzino fariĝis senrimeda kaj dependis de parencoj. En la prizonoj de Coswig, Torgau kaj Waldheim li ĉiam ripetis, ke li celis senperfortan agadon kaj la demokratiigon de GDR. Liaj petoj pri indulgo estis rifuzitaj. Kvankam en 1964 li estis aĉetita de FRG, la instancoj de GDR malpermesis lian forveturon. Pri la aĉeto Othma, kiu malsaniĝis je la hepato, do nenion eksciis, tiel ke li revenis de la prizono en Brandenburg rekte al sia antaŭa loĝloko.

La kritikaj opinioj, deziroj, proponoj kaj postuloj de la malkontentaj civitanoj de GDR en principo estis apogitaj de pluraj prestiĝaj personecoj kaj funkciuloj de la partio SED kiel Heinz Brandt, sekretario de SED-Berlino, Robert Havemann, konata sciencisto, kontraŭfaŝisto kaj komunisto, Rudolf Herrnstadt, konata (juddevena) ĵurnalisto, kiu kritikis la stalinismajn metodojn en la gazeto *Nova Germanio*, kaj Anton Ackermann, kandidato de la SED-politburoo. Ĉiuj tiuj GDR-eminentuloj poste devis elteni gravajn reprezaliojn flanke de la SED-reĝimo, kiu en siaj trajtoj restis stalinisma ĝis la fino, konante neniun komprenon aŭ pardonon por la kritikistoj de la politika sistemo.

Kvankam la sovetianoj fakte jam intencis forigi lin de sia ĉefposteno en GDR, ĉar eĉ por ilia gusto li estis tro kaprica kaj malkonvena aŭtokrato, Walter Ulbricht restis estro de la partio fakte ĝis 1971, kio signifis, ke la popolo de orienta Germanio devis ankoraŭ longe elteni lian diktaturon, kun fatalaj sekvoj.

La jugoslavoj reagis al la ribelo en GDR kun la sento, ke ili pravis. En la jugoslavia partia gazeto *Borba* aperis artikolo de la gvida komunisma teoriisto Edvard Kardelj, kiu fanfaronis pri la ribelo en GDR kiel „historie signifa” kaj „grava okazaĵo post la jugoslavia rezisto de la jaro 1948“. En la strikoj kaj protestoj de orienta Germanio li vidis „la karakteron de aŭtentika revolucia amasagado de la laborista klaso kontraŭ sistemo, kiu nomas sin ´socialisma´ aŭ ´proleta´“, „klasan proteston de la germana laboristaro kontraŭ la ŝtatkapitalismaj kondiĉoj, kiuj estis truditaj de la okupantoj al ĝi en la nomo de la ´socialisma mesiismo´, kvankam tiujn kondiĉojn ne eblas agnoski kiel ´socialismajn´ kaj ´proletajn´.

### La 1950aj jaroj en Sovetunio, Hungario, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio

La 17a de junio 1953 en GDR signifis grandan ŝokon por la potenculoj en la moskva Kremlo, kie probable eksplodis paniko. Ĥruŝĉov timis, ke la ribela viruso povus trafi ankaŭ aliajn socialismajn landojn. El Hungario lin atingis informoj pri malkontenta popolo, kiu ne hezitos baldaŭ ribeli kontraŭ la stalinisma subpremado fare de partiestro Rákosi kaj ke la kamparanoj forpelos la komunismajn funkciulojn per siaj sterkoforkoj. Do, Hungario, kie la rusa fobio tradicie esis forta, riskis fariĝi la venonta problemkazo en la orienta bloko.

Sed ankaŭ en ***Sovetunio*** mem ekzistis tiaj problemoj – nome inter prizonanoj de la stalinisma gulago en Siberio.[88] En julio 1953 amase strikis gulagaj laboristoj en la tendara zono de *Vorkuta*, Norda Ruslando, kiuj protestos konrau malbonaj laborkondiĉoj. La protesto komenciĝis per la ĉesigo de la laboro en iu ŝakto (n-ro 7), kie la laboristoj fondis propran komitaton kaj postulis paroli kun reprezentanto de la sovetia registaro aŭ de la politburoo de KPSU por prezenti siajn dezirojn. Sed anstataŭ tio Moskvo sendis armean komisionon, konsistantan el 30 oficiroj, kiuj devis esplori la aferon. Dume, la strika viruso atingis ankaŭ aliajn ŝaktojn de la regiono, kie la homoj postulis malaltigi la punojn de la

[87] Herbert Stauch servis en la nazia armeo ĉe la aviadiloj kaj funkciis kiel ĉefserĝento en la teknika servo. La nomoj kaj kazoj de Belter, Stauch kaj Othma estis menciitaj de Hubertus Knabe en sia libro „Die Täter sind unter uns. Über das Schönreden der SED-Diktatur“. Berlin 2008. Alikaze ili estus verŝajne forgesataj.
[88] Liston de lagroj de la gulago vd. sub http://www.gulag.memorial.de/slager.php?suche=A.

malliberuloj, kiuj parte daŭris jardekojn. En ĉi tiu rilato famiĝis precipe ŝakto n-ro 29, kie la laboristoj elektis proprajn gvidantojn kaj kie okazis publika manifestacio. La 1an de aŭgusto la ribelo en ĉi tiu ŝakto estis tamen senkompate sufokita de sekurecaj trupoj, kio kaŭzis 64, laŭ alia fonto 89 mortigitajn prizonulojn, sed entute pereis dum la disbatado de tiu ribelo 481 homoj.[89] Multaj politikaj malliberuloj el GDR estis senditaj al la prizonaro de Vorkuta.[90]

Krom en Vorkuta, ankaŭ en aliaj puntendaroj de Sovetunio eksplodis ribeloj post la morto de Stalin, ekzemple en Norilsk, Karaganda kaj en la Malproksima Oriento, kiel la germana komunisto Joseph Scholmer raportis en sia unika raporto de *Kuracisto en Vorkuta*, ĉar li mem estis malliberulo en Vorkuta. Tiam fakte 12-15 milionoj da gulagaj laboristoj ribelis en Sovetunio kaj esence kontribuis al la fermo de multaj malliberejoj de la stalinisma gulago, kiu cetere apenaŭ plu havis sencon por la reĝimo. La primitiveco de la gulaga ekonomio ne povis konkurenci kun la moderna industria produktado kaj faris la laboron en tiuj tendaroj tro malprofita kaj finfine superflua. La sovetia verkisto Aleksandr Solĵenicyn priskribis tiujn problemojn en siaj romanoj pri la sovetia gulago. Krom tio, ekzistis la risko, ke la prizonuloj solidariĝas kun ties vartistoj kaj inverse.

Alia granda ribelo okazis en la speciala punlagro n-ro 4 de MVD de Kengir en Kazaĥio, kiu daŭris de 16a de majo ĝis la 26a de junio 1954. Tiu „StepLag“ situis proksime de la urbo Schesqasghan kaj havis en tiu tempo lokon por pli ol 10 mil malliberuloj. En la ribelo partoprenis multaj veteranoj de la dua mondmilito kaj internigitoj el la baltaj landoj kaj okcidenta Ukrainio. Fine, sovetiaj gardistoj reatingis la kontrolon pri la lagro per la helpo de la armeo, kiu sendis tankojn. Dum tiu ribelo mortis aŭ estis lezitaj ses ĝis sepcent homoj. [91]

Sur la kampo de la sovetia literaturo aperis kelkaj interesaj verkistoj kiel Olga Bergholz, Vera Inber, Konstantin Paustovskij, Nikolaj Abalkin, Leonid Zorin Aleksandr Tvardovskij, Vladimir Pomerancev, Nikolaj Pogodin kaj Ilja Erenburg, kiuj utiligis la pli liberalan klimaton kaj komencis skribi kritikajn tekstojn, kio kaŭzis al ili tre malagrablajn problemojn. La ĉefa libro de Erenburg, *Degela vetero*, kiu unue aperis en 1954 en la literatura revuo *Znamja*, traktis la historion de la falo de iu senkora burokratia fabrikestro kaj entenis ankaŭ amnovelon. La nomo de Stalin ne estis menciita, sed tuŝitaj estis la skandalo de la fifama proceso kontraŭ la kuracistoj de la jaro 1952 kaj la deportado de homoj en la tendarojn de la gulago. La socrealisma verkisto Miĥail Ŝoloĥov akre atakis la verkon, kaj ankoraŭ en 1963 eĉ Ĥruŝĉov distanciĝis de ĝi kiel „misinterpretaĵo de la eventoj, kiuj estas ligataj kun la personkulto”. Malgraŭ tiu kritiko la libro fariĝis granda leg-sukceso kaj en Sovetunio kaj en eksterlando.[92]

Olga Bergholz lamentis en la *Literatura gazeto* pri la „malvarmeco de la sentoj” kaj pri la manko de „homeco” en la sovetia liriko. Ĉar tiuj tekstoj estis kontrabanditaj al la libera mondo, la homoj ekster Sovetunio eksciis pli kaj pli da detaloj pri la hororo de la stalinismo, kiu furoris en la 30-50aj jaroj en tiu lando, kaj pri la terura vivo en Sovetunio. Sed la tiel nomata „socialisma realismo“ restis deviga formo en la arto kaj lteraturo, kaj kiu ne volis respekti ĝin, tiu estis ekskludita el la sino de la kasto de la oficialaj sovetiaj verkistoj kaj artistoj.

Fakte, jam dum la 19a partia kongreso de KPSU (B), okazinta en aŭtuno en 1952, kiam Stalin ankoraŭ vivis, Georgij Malenkov lamentis en sia parolado pri la primitiveco de la sovetia arto, kiu laŭ li ne plu povis kontentigi la bezonojn de la amasoj kaj de la partio. Tio estis nova, neatendebla tono en la kulturpolitiko. La publikaĵoj de la malŝatata kulturideologo Andrej Ĵdanov (kiu forpasis en 1948) estis eliminitaj kaj verkistoj kiel Miĥail Soŝĉenko kaj Vladimir Majakovskij, kiuj estis malpermesataj, estis rehabilititaj kaj iliaj verkaĵoj estis denove legeblaj en sovetiaj revuoj kiel en *Nova mondo* kaj *Oktobro*. Erenburg, kies literatura verko estis kontestata laŭ sia valoro kaj kiu mem ofte aprubte povis ŝanĝi siajn politikan orientiĝon kaj kulturan preferon tamen sen forlasi siajn principajn originajn konvinkojn, perceptis la socialisman realismon nur kiel specon de filozofio, kiu ne malhelpu al la diverseco de la arto, kion li skribis en artikolo en la *Literatura gazeto*. Dum la „tutunia konferenco de junaj kritikistoj”, okazinta en septembro 1953, Paustovskij proklamis la „militon al la diletanta sovetia literaturo”. La gazeto *Pravda* (vero) alvokis la aŭtorojn skribi la veron pri la aferoj. La redaktoro de la revuo *Teatro*

89 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Aufstand_von_Workuta.
90 Vd. Roland Bude, R.: Workuta. Strafe für politische Opposition in der SBZ/DDR. (Schriftenreihe des Berliner Landesbeauftragten für die Unterlagen des Staatssicherheitsdienstes der ehemaligen DDR, Band 30). Berlin 2010.
91 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kengir-Aufstand; https://de.wikipedia.org/wiki/StepLag.
92 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Tauwetter_(Roman).

sugestis entute rezigni pri la socialisma realismo (pro kio li baldaŭ devis forlasi sian postenon) kaj la aŭtoroj de iu artikolo publikigita en la revuo *Demandoj de la filozofio* proponis ekstrakti la sekcion pri la aplikata kulturo el la kulturministerio kaj krei propran akademion por arto kaj literaturo por doni pli da libera spaco al la kulturkreantoj.

Kvankam ĉiuj tiuj verkistoj konfirmis, ke ili kredas je la komunismo, ilia kritiko pli kaj pli maltrankviligis la partiajn oficialulojn kaj funkciulojn, kiuj tamen timis tro da honesteco kaj vero. La ĉefredaktoroj de *Nova mondo* kaj *Oktobro* estis elŝanĝitaj, kio rememorigis la siatempajn praktikojn sub Ĵdanov, kiu senkompate kontraŭbatalis malkonformajn verkistojn kiel Aĥmatova, Pasternak kaj Soŝĉenko, reĝisoron kiel Ejzenŝtejn kaj kompozitorojn kiel Prokofjev kaj Ŝostakoviĉ, postulante la hegemonion de la „socialisma realismo”.

Ankaŭ la scienco luktis kontraŭ enorma ideologia dogmismo. Kiel konate, en la tempo de Stalin furoris la biologiaj teorioj de Trofim Lysenko kaj Olga Lepeŝinskaja, dum samtempe oni kontraŭbatalis la teoriojn de Albert Einstein. La sovetia gazeto *Partia vivo* skribis: „La libereco de la traktado de sciencaj problemoj ne estas identa kun la libereco prediki la burĝan ideologion kaj disvastigi kontraŭmarksismajn vidpunktojn en tiu aŭ alia scienco.“

Malgraŭ tiu blokado de la libereco, la ribela movado de la sovetiaj intelektuloj ne estis finata. Ne forgesinda estas ankaŭ la sinteno de la sovetia junularo, kies politika apatio kaj letargio simbolis la esprimon de la protesto kontraŭ la reĝimo en formo de pasiva rezisto, kun rimarkindaj sekvoj.[93]

Kiam studentoj de la Ĵdanov-universitato postulis malkaŝi mankojn de la sovetia sistemo, la partio reagis alergie. La gazeto *Novaĵoj de la altlernejo* skribis pri „demagogiaj paroloj” pri „demokratio” en certaj studentaj kunvenoj, kvankam „ili ne ĉiam scias, pri kio temas”. Nu, temis pri la diferencoj inter burĝa kaj socialisma demokratio, tiel ke oni povas supozi, ke la studentoj reprezentis ankaŭ opiniojn aŭ konsiderojn, kiuj deviis de la imagoj pri „socialisma demokratio”. Moskvaj studentoj fondis la grupon „Veraj leninistoj”, tiel ke en novembro 1956 – la jaro de la fama „sekreta parolado” de Ĥruŝĉov (vd. sube) – kelkaj anoj de tiu grupo estis arestitaj pro la suspekto, ke ili starigis subteran organizaĵon, kvankam ilia aktiveco komenciĝis per lanĉo de literatura diskutgrupo. Ofte studentoj ŝatis produkti murgazetojn eĉ sine de la Komsomolo[94] kiel en la Leningrada Teknologia Instituto, pro kio ili estis krude atakitaj de *Komsomolskaja pravda*. Laŭ la komento de la sindikata gazeto *Trud* (laboro), la murgazeto de la moskva universitato *Tribuno* faris „kalumniajn ekscesojn kontraŭ la sovetia gazetaro, kiuj estis prunteprenitaj el la burĝa gazetaro”, ĉar tiuj murgazetoj entenis tradukojn el BBC-novaĵoj pri Hungario.

En oktobro 1956 okazis debato pri iu kritika libro de la nekonvena verkisto Vladimir Dudincev,[95] al kiu kelkmil sovetiaj studentoj esprimis sian solidarecon, ĉar li aŭdacis rakonti en sia libro pri la heroo Lopatkin, kiu estis inventisto, kiu estis atakita de la konsternataj partiaj aparatuloj, kies ĉikanojn kaj reprezaliojn li devis elteni kaj kiuj sendis lin al la gulago por deviga laboro. La partia burokrataro reagis konsternite, kaj eĉ Ĥruŝĉov, la iama malklera kamparano, kiu abomenis, same kiel Stalin, intelektulojn, malŝatis la verkon de tiu aŭtoro, kio kaŭzis, ke li fariĝis vaste konata. Lia literaturo estis festita de ĝiaj adorantoj kiel „literaturo de la grandaj veroj” kaj kontraŭ la „ĝisnuna literaturo de la mensogoj”. Kontraŭ la vivo de la verkisto mem estis faritaj du atencoj, kiujn li bonŝance postvivis. Lige kun tiuj eventoj, kiuj estas hodiaŭ forgesataj same kiel multaj aliaj menciitaj protestoj en Sovetunio kaj la orienta bloko, naskiĝis la t.n. „samizdato”, la neoficiala subtera literaturo en Sovetunio.

Ankaŭ la filma produktado troviĝis en granda krizo dum la stalinisma tempo kaj devis kvazaŭ esti reinventita. En septembro 1953 la kompozitoro Aram Ĥaĉaturjan plendis pri la malbona kvalito de la muziko, en 1956 Dmitrij Ŝostakoviĉ, kies verkaĵoj estis negative pritaksitaj antaŭ 20 jaroj, kritikis la „primitivigon de la arto” entute. La gazeto *Sovetia muziko* devis konstati, ke ne plu eblas subpremi la ĵaz-muzikon en Sovetunio, kiu mirakle eksonis dum la monda festivalo de la junularo kaj studentaro en Moskvo en somero 1957. Kvankam lia arto estis konsiderita kiel dekadenco, en aŭtuno 1956 estis montrita ekspozicio de pentraĵoj de Pablo Picasso, kiu estis membro de la komunisma partio de Francio, simpatiis kun la konstruado de la socialismo en Sovetunio kaj pentris kuriozan portreton de Stalin.[96] Tiu

---

93 Vd.; Kersten H.; Aufstand der Intellektuellen, Stuttgart 1957. Dua ĉapitro.
94 Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Komsomolo.
95 Vd. La koncerna libro nomiĝas „La homo ne vivas nur de pano“.
96 Vd. https://espionart.com/2014/02/28/stalin-by-picasso-or-portrait-of-a-woman-with-moustache, https://www.mlpd.de/2012/kw21/parteilicher-kuenstler-erzuernt-biedermaenner-aller-couleur-picassos-stalinportraet.

ekspozicio, kiu instaliĝis en la Puŝkin-muzeo de Moskvo, povis okazi cetere nur dank´ al la klopodoj de Ilja Erenburg, kiu ankaŭ verkis pri Kazimir Maleviĉ, Ljubov Popova, Vladimir Tatlin kaj Aleksander Rodĉenko kaj okupiĝis pri la rehonorigo kaj pozitiva prezentado de tuta aro da iam persekutitaj sovetiaj verkistoj kiel Anna Aĥmatova, Andrej Belyj, Aleksandr Blok, Boris Pasternak, Sergej Jessenin, Osip Mandelŝtam, Vladimir Majakovskij, Marina Cvetaeva, Isaak Babel, k.a.

Se ĝis nun la baltaj respublikoj (Litovio, Latvio kaj Estonio) estis neglektitaj en ĉi tiu studo, necesas aldoni, ke precipe studentoj de la universitato en Vilno (Litovio) tute ne restis pasivaj. Oni povas imagi, kion ili faris, se en februaro 1957 la litova gazeto *Ruĝa flago* plendis, ke tiuj studentoj aŭskultas okcidentajn radioelsendojn kaj reprezentis „provokajn opiniojn" pri Hungario.[97]

* * *

Kelkajn tagojn post la ribelo en GDR la Kremlo vokis hungaran partian delegacion al Moskvo. La kamaradoj el ***Hungario*** devis aŭdi draŝan kritikon, ke la reĝimo de Mátyás Rákosi kondukis la hungaran ekonomion al la rando de la abismo, ke ĝi ruinigis la agrikulturon, praktikas tro ekscesan industriigon, koterian politikan kulturon kun personkulto kaj arbitre traktas la popolon. La sovetianoj ŝajne komprenis, ke simple sufoki ribelojn ne sufiĉas, sed ke oni devas ŝanĝi la politikon kaj ekonomion kun la celo plibonigi la situacion en la koncernaj landoj. La hungara KP estis gvidita de la stalinista kvaropo Mátyás Rákosi, Ernő Gerő, Mihály Farkas kaj József Révai, kiuj cetere estis hungaraj judoj. Oni klarigis al ili, ke la hungara popolo en ajna momento povus ribeli, ĉar fakte iam okazis strikaj provoj en iuj industriaj entreprenoj kaj manifestacioj inter kamparanoj en kelkaj vilaĝoj. Malenkov, Berija kaj Ĥruŝĉov, la ĉefoj de la sovetia KP, postulis, ke la hungaraj komunistoj senprokraste reviziu la hungaran ekonomian planon. Postulita estis ankaŭ elŝanĝo de membroj en la politburoo; Farkas kaj Révai devis forlasi ĝin kaj Rákosi devis demisii kiel ĉefministro, sed li tamen rajtis konservi sian postenon kiel partiestro. Nova ĉefministro fariĝis Imre Nagy, kies kritiko de la ĝisnuna kurso estis konsiderita de la sovetianoj kiel prava. Sed kun Nagy la sovetianoj aĉetis iusence la katon en la sako, ĉar ili ne povis esti certaj, ĉu li jes aŭ ne principe aplikos siajn ideojn kaj ŝanĝos la politikon de la agrikulturo ekzemple laŭ la modelo de Jugoslavio, kiu abolis la kolektivan agrikulturon. Fakte, Hungario estis la dua socialisma lando, kiu rezignis pri la kolĥozoj. Nu, ankaŭ Nagy povis perdi sian honoron en ajna momento (kiel tio ankaŭ okazos iom poste). Do, Nagy komencis reformi la stalinisman sistemon: li reduktis la kapaciton de la peza industrio kaj akcelis la produktadon de nutraĵoj, li proklamis amnestion por prizonuloj, liberigante la laŭdirajn „titoistojn", li fermis la hungaran ´gulagon´ (kiel Berija faris en Sovetunio) kaj permesis al dekmiloj da familioj, kiuj antaŭe estis deklaritaj kiel ´fremdaj klasaj elementoj´, reveni al Budapeŝto, li nuligis la fifamajn nigrajn listojn kaj forigis la timatajn policajn tribunalojn.

Dum la kamparanoj ĝojis pri tiu nova vento, la malnova bando de Rákosi, kiu daŭre okupis oficojn kaj postenojn en la administracio kaj timis, ke ĝi perdos la potencon, komencis venĝi la novan kurson de Imre Nagy, kiu estis kritikita de Rákosi pro la enkonduko de laŭdire maltaŭgaj reformoj. Post iom da tempo evidentiĝis, ke malgraŭ tiuj reformoj la vivnivelo ne kreskis, kio kaŭzis novan malkontentecon ĉe la popolo, kiu nun protestis sur la stratoj de la ĉefurbo.

Kiam en januaro 1955 la hungara politburoo denove devis veturi al Moskvo, riproĉojn devis ĉifoje aŭdi Imre Nagy laŭ simila maniero kiel ili estis siatempe faritaj al la jugoslavoj en 1948. Nome temis pri laŭdiraj subtaksado de la gvida rolo de la KP, neado de la klasbatalo kaj naciismo. Kiam la sovetianoj riproĉis al Nagy ankaŭ, ke li ne respektas la modelon de la sovetiaj kolĥozoj, li perdis la paciencon (estis konate, ke Nagy facile povis perdi la nervojn) kaj mem riproĉis al la sovetianoj, ke ili faris gravajn erarojn ĉe la enkonduko de la kolĥoza sistemo. La posteuloj de Stalin estis perpleksaj kaj verŝajne ne pardonis al li tiun deliron, aŭ herezaĵon.

La 4an de marto 1955 la Centra Komitato de la hungara KP kondamnis nun la politikon de Imre Nagy, kiu devis forlasi la postenon de la ĉefministro kaj estis eĉ ekskludita el la sino de la gvidaj organoj, dum Rákosi revenis al sia antaŭa posteno kaj daŭrigis la antaŭan stalinisman kurson. Sed nun en Hungario formiĝis la protesto de la intelektuloj, kiuj fondis klubon nomitan laŭ Lajos Kossuth, gvidinto de la naciliberiga movado kontraŭ la aŭstroj en la 19a jarcento. La intelektuloj, kiuj kolektiĝis en tiu klubo, opiniis, ke ne plu eblas rezigni pri la liberecoj, kiuj estis donitaj al la popolo dum la regado de Imre Nagy kaj ke oni pretos defendi ilin se necese. Kiam la reprezalioj kontraŭ la kulturo rekomenciĝis, ankaŭ

[97] Kersten, ĉap. II.

la Verkista Asocio adoptis opozician sintenon. La komunismaj verkistoj publikigis memorandon al la adreso de sia partio, en kiu ili protestis kontraŭ la cenzuro kaj la maldungo de iuj ĵurnalistoj kaj postulis senprokraste ĉesigi tiujn praktikojn kaj farojn. Kiel reago Rákosi klopodis silentigi la verkistojn per grandstila kontraŭa operaco. Imre Nagy estis eksigita el la KP, sed ĉirkaŭ li formiĝis grupo de komunistoj, kiuj rompis kun la burokratia sistemo de la stalinismo.

* * *

En ***Pollando*** la regantaj komunistoj timis, ke tia ribelo kiel en GDR povus ankaŭ okazi en la propra lando, des pli ke tie la labornormoj estis altigitaj pli draste ol en GDR. Analoge al la hungara Kossuth-klubo ankaŭ en Pollando estiĝis simila diskutejo kun la nomo „Kurba cirklo", en kiu kolektiĝis ĉefe intelektuloj, sed kiu allogis ankaŭ aliajn popoltavolojn. La cirklo rapide fariĝis anstataŭa forumo por la malpermesataj publikaj kunvenoj, en kiuj oni traktis temojn ekster la oficiala politiko, kiuj rapide penetris la konscion de la amasoj. Krom tio ekzistis kelkaj verkistoj kiel Adam Ważyk kaj Julian Przyboś, kiuj kreis kritikan literaturon, kiun la cenzuro rigardis kun ĉagreno. La poemoj de Ważyk, iama ´kortega´ poeto de la pola KP, kiu kvazaŭ transformiĝis de Saŭlo al Paŭlo, estis plenaj de sinistra etoso pri la naŭza ĉiutaga vivaĉo en Pollando. En 1957 li eksiĝis el la pola KP. En 1964 li subskribis la „Leteron de la 34", kiu enhavis proteston kontraŭ la limigo de la libereco paroli en Pola Popola Respubliko. Post tio la cenzuro malpermesis la publikigon de liaj verkoj en la radio kaj televido. En 1968 li subskribis protest-leteron kontraŭ la subpremado de la studentaj protestoj kaj la „Memorandon 101" kontraŭ la ŝanĝo de la konstitucio en la senco de la „eterna amikeco kun Sovetunio". Laŭ Przyboś, la socialisma realismo „korelativis kun la politika teroro en la arto" kaj estis „estetika pseŭdoteorio", kiu en Pollando ne plu trovos adeptojn.

La renoma lodza sociologo Józef Chałasiński opiniis, ke la principoj de la marksismo-leninismo, kiu rigidiĝis en dogmoj, kaj ĝia monopolo kulpas pri la stagnado kaj degenero de la sociaj sciencoj en Pollando kaj estas reviziendaj kaj kompletigendaj, dum la scienco mem bezonas liberaliĝon.

En somero 1954 iu altranga pola funkciulo fuĝis al Okcidento, kie li raportis pri la turmentaj praktikoj de la pola sekureca servo. Post tiuj malkovroj en januaro 1955 ribelis kelkaj membroj de la Centra Komitato de la pola KP, kiuj postulis esplori la aferon. Kiel rezulto estis arestita la vicministro pri ŝtata sekureco, dum lia ĉefo restis netuŝita. Tio kaŭzis grandan embarason al la polaj gvidantoj, inter kiuj Władysław Gomułka povis forlasi la malliberejon.

Gravan rolon por venki la totalisman ŝtaton ludis tiutempe la pola gazetaro, aŭ almenaŭ parto de ĝi, ĉar ĝi komencis reprezenti vidpunktojn de la intelektuloj kaj rompis tabuojn de la politiko kaj historio en ĝis nun nekutima maniero. La egalŝaltita pola gazetaro, kiu dum jaroj funkciis kiel parolilo de la stalinismaj partiaj strukturoj, finfine komprenis sian rolon, ke ĝi devus batali por la vero, libereco, homa digno anstataŭ disvastigi mensogojn de komunismaj demagogoj. Temis precipe pri periodaĵoj kiel *Nowa Kultura, Przęglad Kulturalny, Prasa Polska, Życie Literackie, Życie Warszawy* kaj aliaj, kiuj helpis prepari la politikajn ŝanĝojn. Eĉ la oficiala organo de la pola KP, *Trybuna Ludu*, la teoria revuo *Nowe drógi* kaj la organo de la pola junularo, *Sztandar Młodych*, ludis novan melodion, kiu perpleksis la legantojn, kiuj esprimis sian konsternon, ke la pola gazetaro raportas nur pri cenzuritaj temoj. La homoj volis legi artikolojn pri aktualaj temoj, kiuj koncernis Pollandon kaj la mondon. La ekzempleroj de gazetoj, kiujn pro sia senlima tedeco antaŭe neniu legis, estis rapide forvenditaj kaj ilia eldonkvanto elĉerpita kaj fariĝis alloga raraĵo, ĉar la homoj amase aĉetis ilin. Tre apartan rolon ludis la varsovia studenta gazeto *Po prostu*, kiu estis legata ankaŭ de la junaj oficiroj de la pola armeo. Kun eldonkvanto de 150 mil ekzempleroj ĝi fariĝis unu el la plej legataj gazetoj en la lando kaj estis atentita eĉ en eksterlando, ĉar ĝi publikigis sensaciajn analizojn pri la pola realeco kaj rompis historiografiajn tabuojn. La registaro de Cyrankiewicz devis konsideri kelkajn konsekvencojn kaj anstataŭigi diversajn funkciulojn, kiuj havis iun stalinisman heredaĵon, precipe en la ministerioj de la internaj aferoj, sekureco kaj justico, per pli junaj fortoj. Je la fino devis forlasi sian postenon ankaŭ la ĉiopotenca ĉefo de la planado Hilary Minc, kiu estis tro forte kritikita de la ekonomikistoj kaj al kiu oni donis la respondecon por la ekonomia mizero en la lando.

* * *

En ***Ĉeĥoslovakio*** en junio 1955 la verkisto Josef Rybák kritikis la personkulton en la kultura kaj literatura vivo. Poste precipe slovakaj aŭtoroj kiel Ivan Kupec polemikis kontraŭ la partia kontrolo, kiu limigis la liberecon de la krea arto. Lia kolego Dominik Tatarka protestis kontraŭ la daŭra enmiksiĝo de

la verkista asocio en la literaturan kreadon kaj kontraŭ la ĉikanado de aŭtoroj kaj rifuzis la altrudon de la socialisma realismo. Antonín Zápotocký, la nova ŝtatestro de Ĉeĥoslovakio, kiu rimarkis la ribelemon de la intelektuloj kun zorgo kaj alergio, reagis en decembro 1955 dum kunsido de la verkista asocio, al kiu li mem apartenis kiel aŭtoro de romanoj, per jena ortodoksa admono: „En niaj klopodoj konstruadi la socialismon ni ne povas cedi. Al tiu principo ĉio devas submetiĝi, ankaŭ nia literatura kaj arta kreado. (…) La liberecon, kiun la verkistoj postulas, ni ne povos doni al ili, ĉar se ni donus ĝin, ni ne plu estus kapablaj konstrui la socialismon. Ni ne toleros agadon, kiu malhelpos nin konstrui la socialismon. La artistoj devas kompreni tion, precipe tiuj, kiuj revas pri senlima libereco, pri ´la arto por la arto." La verkistoj kaj artistoj ne povis lasi tian admonon kiel finan punkton. Dum la dua kongreso de la ĉeĥoslovakaj verkistoj, kiu okazis en la parlamentejo en Prago, pluraj membroj leviĝis kaj senhezite esprimis sian opinion. Ekzemple la dramatikisto Miroslav Stehlík avertis, ke laŭ li la plimulto de la teatraĵoj suferas je mizera kvalito, la lirikisto František Hrubík lamentis, ke la ĉeĥa poezio estas strangolita de dogmoj, kaj Vitězlav Nezval, kiu estis konata kiel komunisto laŭ partia linio, aldonis, ke la poezio svarmas je sloganoj sen pentri bildon pri la reala vivo. Vašek Káňa kritikis sin mem pro tio, ĉar li konfesis, ke li silentis, kiam li vidis, ke aliajn homojn oni traktis maljuste kaj kiel oni ofendis la homan dignon. La proteston kontraŭ la kulturburokratio transprenis Jaroslav Seifert, memorigante pri lirikistoj kiel František Hálás, Kárel Teiges kaj Konstantin Biebl, kiuj faris suicidon post la komunisma puĉo en 1948, ĉar ili kontraŭstaris la enkondukon de la partia diktaturo kaj estis persekutitaj pro tio. Seifert, kiu mem estis ĉikanita kaj izolita, postulis liberigi la verkistojn, kiuj estis trafitaj de la mallibereco.

### Preskaŭ-revolucio dum la XXa partia kongreso de KPSU en februaro 1956

***Sovetunio*** travivis sian propran politikan tertremon dum la XXa partia kongteso de KPSU, kiu okazis de la 14a ĝis la 25a de februaro 1956 en Moskvo kaj signifis esencan turnopunkton en la historio de tiu partio, de Sovetunio kaj de la stalinismo entute. Ĝi estis la unua tutlanda partia kongreso post la morto de Stalin. La eventon Nikita Ĥruŝĉov utiligis por finkalkuli kun Stalin kaj lia terora reĝimo, kiujn li senkompate kondamnis dum sia „sekreta parolado" kun la celo prepari la landon al la poststalinisma erao kaj por enkonduki reformojn.

La paroladon antaŭis esplorlaboro de speciala komisiono, kiu estis taskita kolekti materialon pri la amasaj reprezalioj plenumitaj sub Stalin. La koncerna raporto de Pjotr Pospelov kaj Averkij Aristov, kiuj subskribis gin, liveris la esencajn informojn por la parolado de Ĥruŝĉov, al kiu kontribuis pluraj homoj.[98] La anoj de la politburoo de KPSU vigle diskutis tiujn embarasajn temojn de la reprezalioj kaj la stalinisma teroro por decidi kio estu publike dirita kiel, kiam, kie kaj de kiu. En tio Ĥruŝĉov kaj la ceteraj membroj de la politburoo, kiuj estis rekte koncernataj de la stalinismaj krimoj, zorgis, ke ilia propra rolo en tiuj krimoj ne estu tuŝita, ĉar finfine ankaŭ Ĥruŝĉov dankis sian karieron al Stalin en la partio kaj ŝtato, en kiu li partoprenis en la persekutado de opoziciuloj kaj en la purigoj en la vicoj de partiaj membroj.

Nur post longa diskuto la politburoo konsentis, ke la krimoj de Stalin kaj la problemo de la personkulto estu prezentataj al la delegitoj dum la kongreso mem. Molotov, Malenkov kaj Kaganoviĉ, kiuj mem esence partoprenis en la organizado de la ruĝa teroro de la 30aj jaroj, estis kontraŭ tro akra kritiko de Stalin. Dum la preparado de la kongreso nur malmultaj partianoj eksciis pri la intencoj, celoj kaj trajtoj de la sekreta parolado, kiu devis esti prezentata en la fina, fermita kunsido de la XX partia kongreso.

La XXa partia kongreso estis malfermita per granda laŭdado de la historiaj meritoj de Stalin. Ankaŭ post la morto de Stalin, tiu kongreso disvolviĝis kiel kutime, ĉar la stalinismaj paradigmoj en ĉiuj sferoj de la vivo en Sovetunio daŭre validis. Inter la multnombraj dumkongresaj prelegantoj elpaŝis inter alie Miĥail Suslov kaj Anastas Mikojan, kiuj aludis kiel unuaj la fifarojn, misevoluojn kaj erarojn, kiuj okazis sub Stalin.

Sian „sekretan paroladon" Ĥruŝĉov do prezentis la 25an de februaro, matene je la 10a horo, kiel planite en la plej lasta tago de la konferenco kiel plej lastan kontribuaĵon.[99] Al la mortinta supergvidanto

---

[98] La raporton de tiu komisiono oni trovas sub https://www.alexanderyakovlev.org/almanah/inside/almanah-doc/55752. Pri la antaŭaj preparaj diskutoj vd. Naumov (1997).

[99] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Pri_la_kulto_de_personeco_kaj_ĝiaj_konsekvencoj.

Ĥruŝĉov riproĉis, ke li faris „ne malmultajn erarojn kaj en la teorio kiel ankaŭ en la praktiko", ke li lezis bazajn normojn de la partio kaj malrespektis la leĝojn, ke li altrudis al la partianoj sian opinion kaj subpremis ĉian kontraŭstaron per kruda perforto, ke en la plej lasta tempo de sia regado li eĉ ne plu informis la partianojn pri siaj decidoj. Stalin estis akuzita pro tio, ke li praktikis amasan subpremadon en la nomo de la registaro, ke sennombraj kamaradoj estis arbitre kaj senkulpe neniigitaj aŭ senditaj en la gulagon, tiel ke la partio suferis gravajn perdojn de gvidantoj. Ĥruŝĉov raportis pri devigaj kolektivigoj, pri koncentrejoj kaj amasmurdoj. Krom tio, Stalin estis kulpigita pri tio, ke dum la dua mondmilto li deportis tutajn popolojn de Sovetunio al Siberio, escepte de la ukrainoj, kiuj sukcesis eviti tian sorton nur pro tio, ĉar ili estis tro multnombraj kaj oni ne sciis kien sendi ilin. Krome, Ĥruŝĉov neis, ke Stalin posedis „eĉ la plej bazajn konojn pri la gvidado de milito". Malgraŭ tio, Stalin senkrupule lasis altigi kaj gloradi sin kiel granda gvidanto en sia oficiala biografio, kiun li mem manipulis kaj redaktis.

Per tiu unika kaj neatendita parolado ĉiuj mitoj kaj legendoj pri la senerara gvidanto, pri la teoria geniulo, la kara kaj saĝa patro de la popoloj, la altruisma homo kaj laŭdire plej bona disĉiplo de Lenin, je kiuj granda parto de la popoloj kredis, estis detruitaj kaj elvaporiĝis.

Sed tio ankoraŭ ne estis ĉio. En sia parolado Ĥruŝĉov rehonorigis parte ankaŭ la kritikantojn kaj malamikojn de Stalin, la opoziciulojn de la 1930aj jaroj kaj adeptojn de Trockij, la kamaradojn Kamenev, Zinovev kaj Buĥarin. Stalin estis nerekte kulpigita, ke li mem ordonis mortigi kamaradon Kirov, kio servis kiel preteksto por lanĉi farsprocesojn kontraŭ la opozicio, kiuj siaflanke servis al la purigado de la partio kaj likvido de milionoj da homoj inter 1934 kaj 1938 kiel malamikoj de la popolo, kiuj senspure malaperis. Krome, li kritikis la eksigon de Jugoslavio el la komunisma tendaro, rehonorigis la t.n. „titoistojn" kaj liberigis la jugoslaviajn komunistojn de ĉiu kulpo. Krom tio, lia parolado enhavis diversajn hipotezojn pri la ebleco, ke la socialismo povas evolui laŭ diversaj formoj kaj ke la unuopaj komunismaj landoj povas mem elekti sian vojon. La kunlaboro kun diversaj politikaj kaj ekonomiaj sistemoj estis proklamitaj kiel ebla kaj dezirinda. La principojn de la landa suvereneco, de la neenmikŝiĝo en la internajn aferojn de aliaj landoj kaj de la egalrajteco de ĉiuj landoj Moskvo promesis respekti. Kominform estis malfondita en aprilo 1956.

La delegitoj, por kiuj tiu parolado fariĝis vera ŝokterapio, estis impresataj, sed multaj reagis negative al la tuta kritiko pri Stalin, kvankam ili samtempe sentis, ke la politika kurso ŝanĝiĝos. La plimulto de la delegitoj tamen apogis la sintenon de la Stalin-kritikantoj.[100]

La detruado de la Stalin-mitologio, kiu evidentigis la abismon inter vero kaj mensogo en la oficiala historiografio kaj en la propagando, kiu ilustris la misuzadon de la potenco kaj la fatalan personkulton ĉirkaŭ Stalin, kaŭzis senteblan tertremon kaj grandegan konfuzon ĉe la membroj de KPSU, kiu estis grandparte diskreditata. Ankaŭ la leninismo, kies teorioj parte ricevis fortan baton, travivis gravan krizon de la kredindeco. La kritikado de Stalin eĉ esence malfortigis la pozicion de Sovetunio en la mondo kaj lasis jugoslavojn, ĉeĥojn kaj GDR-anojn, kiuj jam ribelis kontraŭ la stalinismo, kaj aliajn triumfi. Sovet-unio kaj ĝia komunisma partio ne plu povis pretendi aŭtomate la gvidan rolon en la aliaj socialismaj landoj. Ĉi tiu nova situacio nepre kaj devige distancigis ilin de Moskvo. En Sovetunio mem oni devis okupiĝipri la demando kiel daŭre kunteni la socialisman blokon kaj kial la homoj ne ribelis kontraŭ Sta-lin por liberiĝi de la tiranio.

Ĵurnalistoj kaj gastoj, kiuj ne apartenis al la partio, ne rajtis aŭskulti la sekretan paroladon de Ĥruŝĉov, kiu okazis malantaŭ fermataj pordoj, kaj la registrado per sonbendo estis strikte malpermesita. Ĉeestantoj en la prezentado de la sekreta parolado rakontis post 1989, ke la homoj, kiuj sidis en la salono, aŭskultis ĝin per totala silentado kaj paralizanta konsterniĝo. Diskuto ne okazis, kaj ajna buŝa aŭ skriba informado de la ekstera publiko estis strikte malpermesita al la delegitoj.

Tiel, la fama parolado de Ĥruŝĉov de la 25a de februaro 1956 dume restis sekreta kaj nepublikigata en Sovetunio. La sovetia reĝimo traktis tiun paroladon konfidence, ĉar ĝi timis, ke surbaze de la kritiko pri Stalin la popolo komencos diskuti pri la politika sistemo entute, kio povus konduki al ĝia kolapso, kion oni volis eviti. Sed ĉar detaloj pri ĝi tamen pli kaj pli atingis la eksteran mondon, Ĥruŝĉov decidis, ke la referaĵo estu sendita, la 1an de marto, kiel interna letero al la membroj kaj kandidatoj de la CK-prezidio kaj al la sekretarioj de la CK. La 5an de marto la prezidio de la CK decidis havigi la tekston ankaŭ al „ĉiuj komunistoj kaj komsomolanoj, sed ankaŭ al senpartiaj laboristoj, dungitoj kaj kol-

[100] Vd. https://ria.ru/spravka/20160214/1373484679.html.

ĥozaj kamparanoj". Tiel, 18 milionoj da sovetiaj civitanoj unuafoje eskciis pri la krimoj de sia idolo. Ankaŭ la gvidantoj de aliaj komunismaj partioj same ricevis la tekston, sed publika diskuto tamen ne okazis. Tiuj, kiuj legis la sekretan paroladon de Ĥruŝĉov, verŝajne vekiĝis kiel post nekutima koŝmaro, aŭ fatala premsonĝo.

En Okcidento oni eksciis pri la sensacia evento nur malrapide kaj laŭ diversaj onidiroj. La okcidentaj registaroj klopodis akiri la tekston de la parolado pere de siaj sekretaj servoj. Oni eĉ promesis pagi unu milionon da dolaroj al tiu, kiu trovos ĝin. La pola ĵurnalisto Wiktor Grajewski fakte sukcesis ricevi, tra unu el la sekretariinoj de Edward Ochab, nova ĉefo de la reganta pola komunisma partio, la originalan manuskripton por kelkaj horoj, tiel ke li povis fari (malkompletan) kopion, kiun li havigis al la israela ambasado en Varsovio, kiu havigis ĝin al sia registaro, kiu pludonis ĝin al Mosado. Mosado plusendis ĝin al CIA, kiu konsideris la tekston aŭtentika. Cetere, la trovinto vane atendis sian monpremion, ĉar CIA konsideris sin mem trovinto de la teksto. Post diskuto kion oni faru per tiu teksto, la usona prezidento Dwight D. Eisenhower decidis publikigi ĝin. Tio okazis, la 4an de junio, tra la Ministerio de la eksteraj aferoj de Usono kaj en la gazeto *New York Times*, poste tra diversaj radiokanaloj kiel *Libera Berlino*. Kelkajn semajnojn poste la teksto aperis en retradukita rusa versio en Okcidento. La plena teksto estis publikigita en Ruslando nur en 1989.[101]

Eĉ se ĝi devis esti konsiderata kiel kuraĝa, trafa kaj prava, la parolado de Ĥruŝĉov tamen suferis gravajn kontraŭdirojn kaj mankojn kaj estis ankaŭ akre kritikita de la kontraŭ-stalinismaj kaj kontraŭ-komunismaj fortoj en la libera mondo. Kvankam la nova sovetia gvidanto ja kondamnis la personon de Stalin, en kies karaktero li vidis la kaŭzojn por la esencaj problemoj, la personkulto kaj la krimoj faritaj en la nomo de la komunisma partio en Sovetunio, baziĝanta sur la doktrino de la marksismo-leninismo, lia parolado ne enhavis sinceran kritikon de la stalinismo kiel sistemo en si mem. Male, tiu sistemo kun sia burokratia strukturo kaj politika monopolo de la komunisma partio, la politikaj privilegioj por ĝiaj membroj, la ŝtata posedo de la produktiloj kaj la centra planekonomio ne estis abolita per la morto de sia dua ĉefa protagonisto, sed ĝi estis daŭrigita kaj Sovetunio restis totalisma diktaturo.

Ĝenerale, la amasoj en Sovetunio restis pasivaj post la malmuntado de Stalin malgraŭ la degela vetero, kiu prezentis sin al ili kiel taŭgan okazon por renversi la komunisman reĝimon. Sed en Kartvelio, patrujo de Stalin, la kritiko de la XXa partia kongreso kontraŭ Stalin trafis sur malfekundan grundon. Okaze de publika solenaĵo pri la memoro de Stalin, okazinta en la 5a de marto 1956, en kelkaj urboj de Kartvelio protestis kelkmil lernejanoj kaj studentoj, kiuj evidente sentis sin ofendataj en sia nacia fiero, kiu ne eltenis la laŭdiran kalumniadon de ilia fama samnaciano, kiu gvidis Sovetunion dum jardekoj. Kiam soldatoj pafis kontraŭ la homojn, kelkdeko da ili mortis kaj centoj estis vunditaj. Pli granda grupo estis arestita kaj multaj personoj estis akuzitaj kaj kondamnitaj al multjaraj arestpunoj en malliberejo. Ĥruŝĉov ordonis fermi la Stalin-muzeon de Gori kaj lasis forigi la bildon de Stalin el la armea muzeo en Moskvo.

La protestoj en Kartvelio koincidis kun manifestacioj en Bakuo (Azerbajĝano), kie iuj homoj pledis por Molotov anstataŭ Ĥruŝĉov kiel posteulo de Stalin. Ŝajnas, ke la Stalin-lojalulo Bagirov celis lanĉi iun movadon kontraŭ la politiko de Ĥruŝĉov. Sed li estis arestita, kondamnita de iu armea tribunalo al morto kaj mortpafita en aprilo.

Ĝis nun nur la jugoslavoj aŭdacis ribeli kontraŭ tiu sistemo kaj eĉ sukcesis liberigi sin de ĝi, kvankam stalinismaj spuroj restis konservitaj ankaŭ en la jugoslavia komunismo. La poloj kaj hungaroj baldaŭ volis imiti ilian ekzemplon, uzante la degelan veteron en Sovetunio, kiu estis sensacie enkondukita per la „sekreta parolado" de Ĥruŝĉov en februaro 1956. Kun kiu sukceso aŭ malsukceso ili faris tion, ni vidos en la sekvaj ĉapitroj.

---

[101] Nome en *Izvestija CK KPSS*, n-ro 3, 1989; la germanlingva traduko aperis en 1990 en la eldonejo Dietz en orienta Berlin. Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/XX._Parteitag_der_KPdSU; https://www.1000dokumente.de/pdf/dok_0014_ent_de.pdf (germanlingva teksto); http://www.coldwar.ru/hrushev/cult_of_personality.php (ruslingva teksto), https://en.wikipedia.org/wiki/On_the_Cult_of_Personality_and_Its_Consequences (anglalingve), http://mizerski.com/2008/referat-chruszczowa (pola lingvo).

**La pola oktobro 1956 kaj ĝia duonsukcesa pola eksperimento**

Bolesław Bierut, la ĉefo de la pola komunisma partio (PZPR), suferis korinfarkton post la parolado de Ĥruŝĉov, kiun li havis la okazon legi anticipe, kaj restis en Moskvo por kuracado. Neatendite li forpasis la 12an de marto 1956. La morto de tiu stalinisto kaŭzis vakuon de la potenco en Pollando. Kontraŭ la volo de Ĥruŝĉov Edward Ochab fariĝis lia posteulo, ĉar li estis la kandidato de kompromiso en partio, kiu suferis pro opinia malunueco.

Senkompare kun aliaj landoj, Pollando estis ege brutale traktita de Stalin, do, la procezo de la malstalinismigo estis des pli drasta neceso en ĉi tiu lando, kiu tiel multe suferis dum la milito kaj pro la plena izoliĝo disde la Okcidento. La komunismo povis esti altrudita al Pollando nur pro tio, ke Sovetunio venkis en la dua mondmilito kaj okupis la landon per sia armeo. Kvankam la poloj estis dankemaj al la sovetianoj pro la (parta) liberigo de sia lando de la germana okupacio, ili neniam akceptis la komunisman reĝimon laŭ stalinisma modelo, pro kio ili kontraŭbatalis ĝin de la unua tago de ĝia enkonduko. Samtempe ili ne forgesis, ke la sovetianoj rabis ilian orientan teritorion (Kresy).

En marto de la sama jaro en Pollando okazis malferma protesto de la intelektularo okaze de kunsido de la Arta kaj Kultura Konsilio. La literaturkritikisto Jan Kott, la verkisto Anton Słonimski kaj la filozofo Leszek Kołakowski reagis sub la impreso de la eventoj en Sovetunio, proklamante la bankroton de la stalinismo kaj postulante la demokratiigon de la socio kaj socialismo. La supre menciita diskutklubo „Kurba cirklo” kontaktis la laboristojn en la entreprenoj, intelektuloj kaj laboristoj kunvenis por diskuti pri la aktualaj politikaj problemoj.

Ankaŭ la polaj laboristoj mem reagis, komencis striki kaj fondis laboristajn konsiliojn en la entreprenoj. Moskvo estis provokita per tio, ke Varsovio kaj Belgrado subskribis komunan deklaraĵon pri politikaj rilatoj je egalrajtaj kondiĉoj.

Fine de junio la ribelo de Poznań anoncis la t.n. „polan oktobron”. La protesto en ĉi tiu okcidentpola urbo estis kaŭzita de gazetaraj raportoj pri malbonaj loĝkondiĉoj, nesufiĉa provizado per varoj, burokratiismo kaj disipado. Apartan konsterniĝon provokis postulo de novaj impostoj, dum la salajroj, de kiuj precipe la laboristoj de la ZISPO-maŝinfabrikoj estis koncernataj, restis malaltaj. Post kiam diversaj plendoj ĉe lokaj instancoj alportis neniun rezulton, la protestantoj elektis delegacion, kiun ili sendis al Varsovio por diskuti kun reprezentantoj de la sindikato kaj registaro, sed ankaŭ tie neniu vere volis paroli kun la delegacianoj. Kiam oni ankoraŭ anoncis altigon de la labornormoj, kiel siatempe en orienta Germanio, la laboristaro forlasis sian fabrikon kaj marŝis en la urbocentron de Poznań. Survoje aliĝis aliaj laboristoj, studentoj kaj lernantoj, tiel ke 30´000 manifestaciantoj kolektiĝis sur la merkata placo. Kune ili atakis la urbodomon, la partian sidejon kaj iris liberigi la politikajn prizonulojn el la malliberejo. Aperintaj tankoj unue restis pasivaj, eĉ male, tri el ili aliĝis al la ribelo, sed ne pafis. Kiam la ribeluloj volis ataki ankaŭ la konstruaĵon de la ŝtata sekureco, eksplodis gravaj bataloj inter armataj manifestaciantoj unuflanke kaj armeo, polico kaj milico aliflanke. La bataloj kaŭzis 53 aŭ 57 mortintojn, 200 aŭ 300 vunditojn kaj kelkcent arestitojn. En septembro oni lanĉis juran proceson kontraŭ 58 ribeluloj.[102]

Kvankam la ribelo de Poznań estis kruele disbatita de la armeo, ĝi almenaŭ efikigis la rehonorigon de Władysław Gomułka,[103] kiu ankoraŭ troviĝis ekster la partio, de kiu li estis eksigita en 1948, kaj pri kiu oni ne sciis, ĉu li revenos al la povo aŭ estos evitita de siaj kontraŭuloj. Fakte, granda parto de la pola popolo vidis en Gomułka la solan popularan politikiston, kiu estas kapabla reformi la sistemon sen

[102] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ribelo_de_Poznań.

[102] Gomułka, kiu apartenis al la subteraj fondintoj de la komunisma Pola Laborista Partio, fariĝis ĝia ĝenerala sekretario kaj post la milito funkciis en la nova komunisma registaro de Pollando kiel vicĉefministro kaj ministro pri la „regajnitaj polaj teritorioj“. En la pola komunisma partio (PZPR) baldaŭ eksplodis kvereloj pri la politika kurso, en kiuj Gomułka reprezentis nacian polan komunisman solvon. Sed en Pollando la tendaro de la adeptoj de Stalin ĉirkaŭ Bolesław Bierut gajnis la lukton kun moskva apogo. En aŭgusto 1948 Gomułka, al kiu la stalinistoj riproĉis „dekstran nacian devojiĝon“, estis forigita. Li devis esti traktata en jura proceso, kiu tamen neniam okazis. Tiel Gomułka eskapis la sorton de siaj kamaradoj Rajk en Hungario, Slánský en Ĉeĥoslovako kaj Kostov en Bulgario. En 1951 li tamen estis arestita kaj eksigita el la partio, sed en 1954 oni liberigis lin denove.

[102] Pri la loko vd. https://pl.wikipedia.org/wiki/Żerań kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Fabryka_Samochodów_Osobowych.

intercivitana milito kaj sen publika konflikto kun Sovetunio. La 18an de oktobro Gomułka unuafoje partoprenis denove en kunsido de la CK de la KP. Jam la venontan tagon Ĥruŝĉov urĝis al Varsovio por malhelpi la reelekton de Gomułka kiel nova ĝenerala sekretario de la pola KP. Samtempe sovetiaj trupoj, kiuj troviĝis en kazernoj, moviĝis kaj poziciiĝis ĉirkaŭ Varsovio. La laboristoj de Żerań,[104] kiuj unue rimarkis tiun moviĝon, alarmis la tutan landon, kiu jam preparis sin al kunpuŝiĝo kun la Ruĝa Armeo. En la vespero de la 19a de oktobro 30´000 mil studentoj, kiuj kolektiĝis en la Varsovia Politeknikumo, certigis al Gomułka siajn simpation kaj apogon. La intelektuloj okupis la Varsovian Radiostacion kaj dissendis propran programon. La industriaj laboristoj gardis siajn fabrikojn kaj patroladis tra la stratoj. Spontane formiĝis armata popola polico kaj iu kontraŭstalinisma sekureca korpuso poziciiĝis urborande kontraŭ la sovetiaj tankoj. La laborista konsilio de Żerań, la ĉefredaktoro de *Po prostu* kaj la sekretario de la Varsovia Partia Komitato vizitis la Armean Akademion kaj povis konvinki la oficirojn, ke ili aliĝu al ilia afero. La pola armeo, kiu degeneris post la masakro en Poznań, forlasis siajn sovetiajn generalojn. Generalo Witaszewski ricevis la ordonon aresti 231 personojn, sed la efektivigo de lia ordono povis esti evitita. Pluraj armeaj komandantoj komunikis al siaj ĉefoj, ke ili ne plu pretas uzi perforton kontraŭ la laboristoj.

Dum la restado de Ĥruŝĉov en Varsovio, kie oni ne sciis, ĉu la Ruĝa Armeo intervenos, okazis gigantaj manifestacioj, kiujn konsistigis ĉefe laboristoj kaj studentoj, kiuj postulis la reenpostenigon de Gomułka kiel ĉefon de la KP de Pollando. La spirito de la deziro, ke Pollando fariĝu sendependa de Moskvo, rimarkeble ŝvebis en la aero. Spite al la kontraŭstaro de Ĥruŝĉov, la plimulto de la CK de la pola komunisma partio voĉdonis por Gomułka kiel nova ĉefo de la partio. Post tio Gomułka alvokis Ĥruŝĉov-on, ke li ordonu al la sovetiaj trupoj senprokrastan retiriĝon al siaj kazernoj, alikaze li informos tra la radio la polan nacion pri la krimaj agadoj de la sovetianoj. La ordono estis donita kaj la sovetia delegacio reflugis al Moskvo. Ĥruŝĉov sendis al Gomułka telegramon, en kiu li gratulis al li okaze de lia elektiĝo kiel ĉefo de la pola KP. Moskvo pretis agnoski la novan gvidanton en Varsovio, kondiĉe ke li ne plu kritiku la sovetian okupacion de Pollando. La kastela paco estis perfekta.

En sia unua parolado, kiu daŭris sep horojn, Gomułka prezentis nete negativan bilancon pri la politiko de la pasintaj jaroj. Ĝi enhavis la konfeson pri la totala fiasko de la sesjara plano, akran kritikon pri la diskriminaciaj kondiĉoj de la polaj komercaj kontraktoj kun Sovetunio, kondamnon de la deviga kolektivigo de la agrikulturo kaj pravigan takson de la laborista ribelo en Poznań. Krome li emfazis la rajton de la pola nacio al sendependeco kaj promesis bazajn reformojn. Ĉe la popolo, kiu retrovis sian fidon je la registaro, regis grandaj entuziasmo kaj espero pri pli libera ordo. La poloj ĝojis, ke ili kontraŭstaris la potencan najbaron. Unuafoje la laboristoj, kiuj mem influis la eventojn en Pollando, ege fieris pri tiu historia atingo.

La regado de Gomułka, kiu dume trankviligis la situacion en Pollando, havis plurajn gravajn sekvojn, kiuj parte similis al la reformoj en Jugoslavio, kies modelo de la aŭtonomeco de la entreprenoj, de la malcentralizado de la industrio kaj de la limigo de la potenco de la planorganoj ŝajnis esti alloga alternativo. Laboristaj konsilioj estis fonditaj, la sindikatoj adoptis pli sendependan kurson. Per diversaj strikoj la laboristoj parte atingis la plenumiĝon de siaj postuloj. La novajn vojojn en la industrio akompanis ŝanĝita politiko de la agrikulturo. De iamaj 10 mil kolektivoj restis nur 2 mil. La ŝtata kreditpolitiko subtenis nun ankaŭ mezajn kaj grandajn kamparanojn. La privata entreprenado ricevis pli da spaco. La nombro de privataj komercaj entreprenoj duobliĝis al 20 mil firmaoj. Sur la kampo de la ideologio okazis diskutoj pri la signifo de la diktaturo de la proletaro kaj ĝia kongruo kun la demokratio. En la centro de la intereso staris ankaŭ la demando de la gvida rolo de la partio. 20 milionoj da poloj ne apartenis al ĝi. Praktike neniu signifa pola teoriulo ankoraŭ agnoskis la pretendon de la marksismo-leninismo validi kiel sola universala doktrino, kiu povas doni respondon al ĉiuj demandoj de la vivo. La dogmisme interpretita tezaro de la marksismo-leninismo, kiel ĝi estis aktuale instruita, estis konsiderita kiel produkto de la stalinismo. Leszek Kołakowski, fama la filozofo kaj reprezentanto de la „humanisma maldekstro", postulis, ke ĉiu aserto de la marksismo-leninismo estu reekzamenata laŭ sia daŭra aktualeco. Alia konata sociologo kaj historiisto Jerzy Szacki eĉ konstatis, ke la homoj en Pollando ĉesis kredi la marksismon kaj ke neniu plu restarigos tiun kredon. Li postulis anstataŭigi la institucian marksismon per intelekta marksismo. Adam Schaff, alia fama pola marksisma filozofo kaj membro de la CK de la pola KP, kies ĉefideologo li estis, opiniis, ke „esti marksisto signifas ĉiam serĉi novajn kaj pli bonajn

solvojn de la sciencaj problemoj, troi ĉiam pli larĝan empirian bazon kaj pli vastan kontakton kun la praktika sperto por eviti erarojn kaj malplenajn spekulativojn". Por fari komparon kun la situacio en GDR, ĉiujn tiujn reformemajn homojn oni estus tie verŝajne sendinta al la malliberejo. Pro tio oni ne povis kaj ne povas sufiĉe alte taksi la signifon de la ideologiaj diskutoj en Pollando de la tiama tempo por la spirita evoluo en la komunisma regadotereno, ĉar la opinioj de la menciitaj filozofoj kaj sociologoj signifis rompon kun la ĝis nun validaj principoj de la marksisma teorio. Alia pola sociologo, Włodzimierz Wesołowski, parolis pri „katarso"[105] de la marksismo, en kiu la mitoj rompiĝis. El ideologio li volis denove fari sciencon. Lige kun tiu revizio de la marksismo-leninismo oni strebis purigi la lingvon de terminoj kiel „proletoj de ĉiuj landoj", „reakcio", „konstruado de la socialismo" k.a. kaj klopodis restarigi bonajn rilatojn kun la okcidenta mondo. Edda Werfel, la edzino de la ĉefredaktoro de *Trybuna Ludu*, trovis preskaŭ genian formulon por la nova stato de Pollando, se ŝi modifis en iu artikolo la koncernajn frazojn en la Komunisma Manifesto laŭ jena amuza maniero: „En orienta Eŭropo cirkulas la fantomo de la homa socialismo, kiu timigas ne nur la kapitalistojn, sed ankaŭ la stalinistojn."

Tiel, Gomułka do fariĝis la simbolo de la „pola vojo al la socialismo". La ribelo de Poznań, kiu antaŭe estis deklarita kiel „faŝisma puĉo" de por-germanaj elementoj, estis rehonorigita kiel prava protesto de la tieaj laboristoj, la jura proceso kontraŭ la ribeluloj estis ĉesigita, la pola armeo estis repoligita, diversaj stalinistoj estis forigitaj el multaj gvidaj pozicioj, 400 kolĥozoj estis malfonditaj kaj liberaj korpopaciaj estis restarigitaj, la agrikulturo estis grandparte reprivatigita, la rilatoj kun la katolika eklezio, kun kiu la „kastela paco" estis interkonsentita, malstreĉiĝis, la cenzuro estis abolita kaj la kultura, arta kaj literatura vivo povis spiri libere. Mieczysław Jastrun kritikis la verkistojn de la landoj de la orienta bloko, ke ili ne defendis la malfortajn kaj malavantaĝigitajn homojn, sed male apogis la flankon de la potenculoj kaj venkintoj. Plie, la scienco estis liberigita de la ideologia premo kaj la sociologio estis reestablita, la laboristaj konsilioj estis oficiale permesataj. La ŝtata komunisma junulara organizaĵo ZMP praktike ĉesis ekzisti kaj estis anstataŭigita per novtipaj organizoj, kiuj tamen estis reunuigitaj en nova „Asocio de la Socialisma Junularo" (ZMS), ĉar la partio rigardis al tiu nedezirinda dissplitiĝo de la junularo kun skeptiko. La Sejmo denove meritis esti nomata parlamento, ĉar en la baloto de januaro 1957 la popolo povis elekti inter pluraj kandidatoj kaj la partioj ricevis frakciojn. Pollando komencis ĝui certagradan aŭtonomecon kadre de la orienta bloko, precipe en la ekstera politiko, kiu nature devis kongrui kun tiu de Sovetunio. Eksiĝi el la Varsovia Pakto kaj kritiki Sovetunion ne eblis. Per tiu nova politiko la ekonomio kreskis kaj la socio en Pollando moderniĝis. La urboj rapide evoluis per nova infrastrukturo kaj la loĝejoj estis ekipitaj per televidiloj kaj elektrikaj aparatoj.

Sed Gomułka restis ambigua figuro kun ŝanĝiĝanta vizaĝo. Zorgante pri la unueco de la partio, dum la IXa plenkunsido de la pola KP en majo 1957 li atakis kaj „reviziistojn" (al kiuj apartenis laŭ li la grupo de Kołakowski) kaj „dogmulojn", kiuj ambaŭ damaĝis al la partio, kiel li opiniis. La reĝimo de Gomułka, kiu pli kaj pli adaptis sin al la kurso de Ĥruŝĉov, baldaŭ montris pli malafablan aspekton. Pollando restis dependa de la katenoj de Moskvo, kio faris la iam popularan registaron de Gomułka pli kaj pli malŝatinda ĉe la liberecama pola popolo, kun fatalaj efikoj.

Ankaŭ al Moskvo la pola eksperimento tute ne plaĉis. Kune kun la ortodoksuloj de SED en GDR la sovetia gazeto *Pravda* kalumniis la novan vojon de Pollando, kun nekonataj sekvoj.

La entuziasmo de la poloj pri Gomułka do ne daŭris tro longe, ĉar oni komprenis, ke li ne estas sincera apoganto nek la motoro de la dezirindaj reformoj. La aktuala liberaligo havis aliajn kaŭzojn, kiujn Gomułka ne influis. La degela tempo ne estis lia verko. Tial li ankaŭ ne sukcesis daŭrigi la normaligan procezon, kvankam li havintus la potencon por tio. La polaj komunistoj elektis lin, ĉar li estis speco de taŭga oportuna kompromisulo por tiu konkreta periodo. La popolo havis neniun influon al lia elekto. La potencon li pludonis al la konservativuloj kaj al la ministerio de la internaj aferoj, kiuj rekomencis organizi la ŝtatajn reprezaliojn kontraŭ kritikemaj intelektuloj, dum samtempe la subpremado de la katolika eklezio refortiĝis. Do, kun la humanisma socialismo Gomułka havis nenion komunan.

---

105 Pri la signifo vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Katarso kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Katharsis.

**Diskuto: Ĉu en oktobro 1956 Pollando ankoraŭ estis komunisma kaj suverena ŝtato ?**

1956 estis sendube ege signifa jaro en la historio de komunisma Pollando, ĉar ĝi esence influis la diskuton inter historiistoj kaj ĵurnalistoj de tiu lando, kiu travivis gravajn ŝanĝojn. Tiuj ŝanĝoj estis tiel drastaj kaj evidentaj, ke neniel eblas ignori aŭ subtaksi ilin kaj iliajn sekvojn. Pri la okazaĵoj de la pola oktobro 1956 verkis pluraj eminentaj polaj aŭtoroj kiel Wiesław Władyka, Zbysław Rykowski kaj Paweł Machcewicz, kiuj okupiĝis ankaŭ pri la demandoj, ĉu la politika sistemo de Pollando en si mem ŝanĝiĝis en oktobro 1956 kaj ĉu ŝanĝiĝis la grado de la suvereneco de la pola ŝtato ene de la orienta bloko kaj rilate al Sovetunio. Alia interesa pola historiisto (kiu estis subpremita de la komunisma reĝimo, ĉar li kritike rilatis al la komunisma ŝtatdoktrino), estis Tomasz Strzembosz, kiu skribis, ke dum la tuta komunisma tempo Pollando estis iusence okupata de fremda potenco (nome sovetunia), pro kio ĝi estis nek sendependa nek suverena ŝtato. Ĝia totalisma sistemo ĝuste servis al tio por forpreni la sendependecon de Pollando kaj la liberecon de la poloj. Laŭ li, la signifo de la jaro 1956 konsistis en tio, ke en ĉi tiu jaro la malferma formo de la okupacio estis anstataŭigita per „bone kamuflita" okupacio. Laŭ Strzembosz, la jaro 1956 do nur ŝanĝis la gradon de la subpremado, kvankam la sistemo restis en si mem la sama. La verkisto Andrzej Urbański konstatis, ke post duobla totalisma periodo (nacisocialisma kaj stalinisma) la libereco de Pollando esence refortiĝis en kaj post 1956. Kaj la historiisto Antoni Czubiński eĉ asertis, ke la postmilita Pola Unuiĝinta Laborista Partio (PZPR) ne estis komunisma partio; ĝi nur nodiĝis kun la marksismo kaj komunismo, sed ĝi neniam fariĝis vere marksisma aŭ komunisma (nu, pro tio ĝi ankaŭ ne nomiĝis tiel, aK). La politikan profilon de Pollando Czubiński priskribis jene. Laŭ tio la sistemo, kiu estis trudita al Pollando en la jaroj 1947-52, estis ŝtata kapitalismo, karakterizata per diversaj bizancaj pruntaĵoj (burokratiismo, nepotismo, korupto). Ĝin kovris tipe polaj tradicioj kiel ekzemple manko de disciplino, mankanta sistemeco en la efektivigo de antaŭe fiksitaj planoj, tro granda rolo de paroloj anstataŭ faroj, la influo de la romkatolika eklezio, la tradicia ligiteco de la kamparanoj kun sia tero. Kiel rezulto estiĝis specifa sistemo, en kiu ĝis la fino nenio estis certa. En ĝi regis tipe feŭda hierarkio kaj kortegaj principoj, sed samtempe ankaŭ granda liberalismo. Miksiĝis ecoj, kiuj estas tipaj por la orient-okcidenta limregiono. Orientaj kondutpraktikoj interŝanĝiĝis kun granda entuziasmo por la Okcidento kaj ĝia adorado. Grandan influon havis la katolikismo kaj por la konduto de la homoj kaj por la funkciado de la politikaj instancoj. Ŝajnas, ke tiu karakterizo validis por la stalinisma periodo en Pollando, ĉar por la periodo post 1956 Czubiński neis la teorion pri la ekzisto de politika totalismo. Laŭ Krzysztof Pomian, la politika karaktero de la Pola Popola Respubliko tamen ŝanĝiĝis, ĉar la totalisma sistemo estis anstataŭigita per la aŭtoritatisma varianto. Ĉi tiu ŝanĝo estis akompanata de la limigo de la arbitraj praktikoj de la partia aparato kaj de la sekurecaj organoj kontraŭ la civitanoj, de la konsento pri la persona posedo de la kamparanoj (temis pri la perdo de la totalisma kontrolo pri la vilaĝoj kaj pri reprivatiga ondo en la urboj), de la rezigno provi detrui la totalan kontrolon de la eklezio super la socio kaj de la rezigno pri la ideologia monopolo, krome de la mildigo de la severa izoliteco de Pollando rilate al la Okcidento kaj de la permeso de la limigita interŝanĝo de homoj kaj de la kulturo kun ĝi. Ke en tiu tempo oni jam ne plu povis paroli pri totalisma reĝimo en Pollando, rimarkis ankaŭ Andrzej Walicki, kiu baziĝis ĉi-rilate sur la klasikaj difinoj de Hannah Arendt.[106] Laŭ tiu historiisto Pollando tiam transiris al posttotalisma kaj de facto nekomunisma versio de la ´reala socialismo´ en Pollando. La pola ŝtato jam rezignis pri siaj ambicioj eduki la socion en la totalisma senco, t.e. trudi al ĝi la komunisman ideologion, kiu devis esti aplikata en ĉiuj sferoj de la vivo kaj pensado, por ke la socio libervole batalu por la nova kredo. La Pola Unuiĝinta Laborista Partio, kiu en 1956 ricevis sufiĉe vastan socian aprobon, eĉ rapide ĉesis esti komunisma partio, ĉar la psikologiaj kaj ideologiaj diferencoj inter la membroj de tia vaste akceptata politika organizaĵo kaj la nemembroj forviŝiĝis, kio ebligis al ambaŭ grupoj certagradan reciprokan akceptecon kaj kunlaboron. La pola vojo al la socialismo de Gomułka kaj la okcidenteca konsumismo sub Gierek faris Pollandon el la vidpunkto de la stalinismaj komunistoj la plej malforta, kritika kaj opoziciema membro de la socialisma bloko, kio nature maltrankviligis la stalinistojn kaj sovetianojn. Ankaŭ Krystyna Kersten evitis utiligi la nocion de la totalismo por karakterizi la tiaman politikan sistemon de Pollando kaj subtenis la opinion, ke post 1956 la komunistoj iom post iom rezignis pri la granda plano de la reedukado de la pola socio, kio okazis ĉefe dank´ al la forta kontraŭstaro flanke de tiu socio kaj de la kulturo kontraŭ fremda transplantaĵo. Laŭ ŝi, la totalismo eĉ ne havis ŝancon reale establiĝi en Pollando, kie la socio rifuzis la fremdan elementon de la komunismo, kvankam ĝi nature povis prepari sian fundamenton ĝis iu grado, detruante la tradiciajn strukturojn kaj atomigante la socion. La sistemo,

[106] En 1951 aperis ŝia libro „La originoj de la totalismo", kiu liveris la esencajn difinojn kaj la fundamenton de la t.n. scienca diskuto pri la totalismo (vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/La_Originoj_de_Totalismo).

kiun la komunistoj enkondukis en Pollando, restis nura diktaturo de unu politika partio, kiu ne vere enradikiĝis en la socio kaj restis konservita nur pro la potenco de Sovetunio. Anstataŭ pri totalismaj trajtoj ŝi preferis paroli pri koloniismaj principoj. Samtempe Kersten atentigis, ke en Pollando multaj elementoj de la totalismo nature daŭre ekzistis dum la jaroj inter 1945 kaj 1989. Malgraŭ tio, en Pollando la totalismo neniam trovis sian plenan prosperon. La evoluciaj ŝanĝoj malfortigis la ideologian, politikan kaj ekonomian rigorismon kaj grandigis la insulojn de la libereco, kvankam la sistemo, sur kiu la ordo kerne baziĝis, restis netuŝita. Jerzy Andrzej Paczkowski, kiu ne pretis bagateligi aŭ beligi la aferojn, parolis en la kazo de la komunisma Pollando pri moderna despoteco, kies ĉefaj ecoj estis plene monocentrismaj kaj kiu ampleksis ĉiujn sferojn de la vivo, agnoskante la leninisman interpretadon de la marksisma ideologio, kiu estis deviga. La situacion post 1956 li difinis kiel stalinismon sen ĝenerala teroro. Ĉar la celo de la totalismo estas sekurigi la submetadon de la socio al tia sistemo kaj ĝian adapton al ĝi, oni do povus riski la aserton, ke ekzakte tia stato ekzistis en Pollando ankaŭ post 1956 kaj ke ĝi daŭris ĝis 1980, malgr aŭ liberaliĝoj. En tiu tempo elformiĝis stato, en kiu la plimulto de la socianoj adekvate reagis al la atendoj de la potenculoj, kaj pli ol tio ili ne postulis de tiu socio. Oni nomis tiun staton „nova socia kontrakto“, kio signifis, ke la potenculoj lasis la homojn vivi kaj la subuloj lasis la potenculojn regadi. La sociologino Hanna Maria Świda-Ziemba aparte emfazis la aŭtonomecon de la persona privateco, kiun la jaro 1956 alportis al la poloj. Sed la limo de la liberecoj estis rigore determinita de la monopoligita potenco kaj de la politika polico. La influo sur la formadon de la publika politika vivo restis rezervata al la reganta elito. Se ili estus dezirintaj tion, la potenculoj estus povintaj en ajna momento ŝanĝi la regulojn kaj repreni la rajtojn kaj liberecojn, kiujn la homoj posedis kaj al kiuj ili jam alkutimiĝis, per unusola administra decido. La ŝanĝoj de 1956 do ne signifis la definitivan finon de la totalisma reĝimo, sed ili atestis ĝian liberaliĝon. Kvankam post 1956 la pola socio pli kaj pli kapablis rezisti la totalismajn tendencojn, kiel Jerzy Holzer observis, la liberecoj, kiujn la Gomułka-reĝimo malfermis al la popolo, favoris laŭ Wojciech Roszkowski kreskantan indiferentiĝon en la sinteno de la homoj rilate al la mensogoj kaj kontraŭdiroj, kiujn la oficiala ŝtata propaganda liveris kaj disvastigis, kaj kunu kun tio ankaŭ al la totalismaj elementoj, kiuj tamen daŭre ekzistis en tiu sistemo. La skalo aŭ abismo inter teorio kaj praktiko, inter realeco kaj propagando fariĝis pli mallarĝa, kio signifis, ke tiu sistemo povis daŭri pli longe. Oni povus ankaŭ paroli pri tio, ke la poloj fariĝis pli kaj pli imunaj kontraŭ totalismo kaj komunismo. Tial, laŭ Marcin Kula malveras la percepto de la pola popolo, kiu konstante ribelis kontraŭ la regado de la pola komunisma partio. Male, pli vere estas, ke signifa parto de tiu popolo vidis en la komunismo multajn pozitivajn ecojn, avantaĝojn kaj eblojn kaj rilate al la intencoj de tiu sistemo kaj koncerne la ´ombran´ ekonomion, de kiu oni eĉ povis profiti. La homoj samtempe kaj rifuzis la sistemon (politike) en principo kaj vivis kun ĝi en akceptebla simbiozo (praktike), ĉar ili ne havis alian eblon (aK). Ĉiukaze Kula konkludis, ke la liberalaj reformoj de la jaro 1956 estis granda paŝo antaŭen kaj ke ili eĉ estis daŭripovaj, tiel ke Pollando atingis en oktobro de tiu jaro staton, pri kiu aliaj socialismaj landoj komencis diskuti nur en 1989 (kiam por la socialismo la tempo estis tro malfrua, aK).

Sur la ekonomia kampo Janusz Żarnowski kredis, ke la sociekonomiaj ŝanĝoj de la unua postmilita jardeko eĉ ebligis al Pollando finrealigi kelkajn neplenumitajn taskojn de la industria revolucio de la 19a jarcento, kiuj okazis en la okcidentaj landoj jam longe antaŭe, tiel ke Pollando do iom reatingis similan nivelon.

Nature, el la vidpunkto de la ŝtata suvereneco la dua mondmilito estis perdata por Pollando, kiel emfazis Andrzej Werblan, alia interesa analizisto de la pola stalinismo. Kvankam ankaŭ post oktobro 1956 Pollando estis senigita de la libereco elekti sian politikan sistemon, la grado de la politika aŭtonomeco de Pollando konsiderinde kreskis, tiel ke tiu popola respubliko atingis pli grandan aŭtonomecon ol iu ajn alia socialisma lando de la sovetia bloko. Nature, Gomułka ne celis nuligi la limigojn de la suvereneco de Pollando, sed li konsciis pri la nesufiĉa akcepteco de la komunisma reĝimo en la pola socio. Aliflanke, li devis respekti la postulojn de Sovetunio rilate la novajn okcidentajn teritoriojn de Pollando, kies limoj devis resti netuŝeblaj kaj nerevizieblaj, same la novaj orientaj limoj de Pollando, kvankam ili evidente estis dubindaj, ĉar ili estis arbitre ŝanĝitaj en unika maniero. Sian internan personaran politikon Gomułka tamen faris sen demandi iun ajn kaj li ankaŭ kontraŭstaris la altigon de la rimedoj por la armeo kaj la diplomatia korpuso, kie la suvereneco estis limigita. Samtempe li aktivigis la eksteran politikon laŭ propraj gusto kaj bontrovo, ekzemple koncerne la rilatojn kun FRG fine de la sesdekaj jaroj. Laŭ tiuj paradigmoj, la plej grandan politikan aŭtonomecon Pollando do sendube havis post oktobro 1956, dum en la jardeko sub Gierik ĝi denove fariĝis pli malgranda. Sed la provoj de Gomułka gvidi aŭtonoman politikon nature rikoltis akrajn reagojn en Moskvo, tiel ke li devis iomete cedi.

La parta suvereneco de Pollando tamen povis esti konservita. Tial laŭ Andrzej Korzon, en la kazo de Pola Popola Respubliko oni devas paroli, anstataŭ pri protektejo, pri provinco kadre de la imperio, kiu tamen posedis sufiĉe grandan aŭtonomecon. Kvankam al la regado de PULP ne ekzistis alternativo, la situacio de Pollando estintus pli malfavora, se ĝi estintus regata de la t.n. Natolin-grupo, kiu kontraŭstaris ĉiuspecan liberaligon. Konsiderante ĉiujn tiujn facetojn, Andrzej Walicki rifuzis konsideri tiun periodon kiel sovetian okupacion de Pollando. Malgraŭ tio, la polaj historiistoj ankoraŭ ne scipovas definitive respondi ĉiujn demandojn pri la pola dependeco de Sovetunio, ĉar mankas gravaj informoj kaj scioj, kiujn oni eble ankoraŭ trovos en certaj partiaj arkivoj, kiam ili malfermiĝos. Por povi respondi tiujn demandojn oni devus detale koni ĉiujn facetojn de la pola dependeco de Sovetunio. Nu, la diversajn mekanismojn de la dependeco oni ja konas, sed oni estas tro malbone informata pri la dimensio de la manovrebloj, kiujn la polaj regantoj havis rilate al la sovetianoj. Por scii tion oni devus pli bone koni la decidojn, kiuj estis faritaj en Varsovio kaj Moskvo, kaj la interrilatojn, kiuj ekzistis inter la partiaj gvidantaroj de ambaŭ landoj, kiel Krystyna Kersten trafe klarigis.[107]

### La hungara ribelo de 1956

Dum la XXa partia kongreso de KPSU, okazinta en februaro en Moskvo, en Hungario oni rehonorigis Béla Kun, la fondinton de la hungara komunismo kaj gvidinton de la kurta hungara konsilia respubliko de 1919. En majo 1937 li estis arestita kiel „trockiisto“ kaj mortpafita en 1938 aŭ mortis en 1939 sekve al kruela turmentado, kiun li devis elteni en la sovetia malliberejo. Ĉi tiu rehabilitado rememorigis al la hungaroj la Rajk-proceson de 1949, kiu finiĝis per mortkondamno kaj ekzekuto de tiu hungara komunisto kaj liaj kamaradoj, kiuj estis denuncitaj kiel „titoistoj“.

En marto 1956 Rákosi konfesis kun hezito, ke la akuzo estis konstruita, sed li tamen laŭdis sin mem, ke li malkaŝis la „bandon de Rajk“. Nun aperis la vidvino de László Rajk, Júlia Földi, akompanita de sia sesjara filo, en la „Petőfi-cirklo“, kiu estis fondita en 1955 sed unuafoje kunvenis nur en marto 1956. Tie ŝi postulis en junio la abdikon de Rákosi kaj dignan entombigon de sia edzo. Ĉeestis du mil homoj, kiuj furore bonvenigis ŝin. Ŝi akre kritikis la kondiĉojn en la hungaraj prizonoj, kie la opoziciuloj ĉirkaŭ Rajk estis aĉe traktitaj kaj kie ŝi mem pasigis kvin jarojn. Júlia alvokis la publikon ne diskuti kun murdistoj, sed doni al ili la taŭgan punon. Multaj ĉeestantoj, ankaŭ oficiroj, leviĝis de la sidlokoj kaj vokis „Rákosi malsupren! Vivu Hungario!“ Tio estis la horo de la morto de la stalinisma reĝimo en Hungario. En la komenco la kunvenoj de la „Petőfi-cirklo“ okazis en la Kossuth-klubo kaj poste en la universitato, kiu povis akcepti pli grandan publikon. En junio en la „Petőfi-cirklo“ elpaŝis ankaŭ la fama nekonformisma marksisma filozofo György Lukács antaŭ 2000 aŭskultantoj, kvankam al li estis malpermesite publike prelegi en la budapeŝta universitato. Ankaŭ Lukács parolis pri „humana socialismo“. La kulminon de la publika intereso la Petőfi-cirklo“ atingis, kiam la 27an de junio en la Centra Domo de la Popola Armeo estis diskutitaj demandoj de la libereco de la gazetaro antaŭ 6000 ĉeestantoj. Dum la konata verkisto Tibor Déry lamentis pri manko de libereco en Hungario, la eksstalinisto Géza Losonczy, kiu fariĝis demokrato, postulis la rehonorigon de Imre Nagy.

Rákosi reagis kun kolero. La eldono de la partia organo *Szabad Nép* de la 24a de junio, kiu ankoraŭ laŭdis la „Petőfi-cirklon“ kiel „valoran forumon“ por la publika diskuto, semajnon poste devis kondamni ĝin. La opoziciaj intelektuloj estis konsideritaj kiel burĝaj agentoj, kiuj celas reenkonduki la kapitalismon.[108]

En la CK Rákosi sukcesis ricevi decidon, kiu kondamnis la Petőfi-cirklon „kontraŭpartia kaj kontraŭ-popola“ entreprenaĵo. Krom tio, li kompilis liston de 400 personoj, kiuj devis esti senprokraste arestitaj; sur la plej supra loko troviĝis Imre Nagy mem. Sed tiu evoluo ne plaĉis al la ĉirkaŭaĵo de Rákosi. Unu el la membroj de la politburoo informis la sovetian ambasadoron pri la afero, kiu telefonis

[107] Laŭ Friszke. La koncerna artikolo entenas la indikojn de la polaj fontoj, kiuj esence originas el la unua duono de la 1990aj jaroj.

[108] Pri la situacio de la intelektuloj en la KP Arthur Koestler skribis en sia aŭtobiografio: „Ni komunismaj intelektuloj kun burĝa deveno estis tolerataj, sed malmulte aprezataj en la partio; kaj ĉi tiu fakto estis ŝovita sub niajn nazojn tage kaj nokte. Ni estis tolerataj, ĉar Lenin volis tion kaj ĉar Sovetruslando ne povis elturniĝi sen la kuracistoj, inĝenieroj kaj sciencistoj de la antaŭrevolucia inteligencio kaj sen la malŝatataj eksterlandaj fakuloj. Sed al ni ne estis montrata pli da fido kaj respekto ol al la kategorio de ´utilaj´ judoj en la Tria Regno, kiuj devis porti brakbendon, por ke ili ne estu erare senditaj al la gasĉambroj, antaŭ ol la tempo de ilia utileco pasis. La proleto okupis en la germana KP iusence la pozicion de la ´arjulo´. (…) (Vd. Koestler, Arthur: Das rote Jahrzehhnt. Wien/Zürich 1991, p. 64.)

al Moskvo, kiu sendis Molotov-on al Budapeŝto por esplori la aferon. Rákosi estis forigita de sia posteno „laŭ propra deziro“, sed ŝajnas, ke tio okazis laŭ la deziro de Tito. Rákosi fuĝis al Sovetunio kaj estis anstataŭigita per la stalinisto Ernő Gerő. Do, la sistemo ricevis novan gvidanton, sed ĝi mem ne ŝanĝiĝis. La komencita malstalinismigo de Hungario tamen ne povis esti ĉesigita. La sovetia ambasadoro traktis la situacion kun Imre Nagy. Multaj Rákosi-funkciuloj devis forlasi siajn oficojn, kaj la Verkista Asocio elektis novan prezidanton kaj malaperigis la stalinistojn el sia sino.

La 21an de oktobro okazis ŝtata funebra ceremonio por László Rajk kaj la ceteraj viktimoj de la stalinismo. Centmiloj da homoj preterpasis iliajn ĉerkojn kun sinistra mieno de la vizaĝo. Posttagmeze en Budapeŝto komenciĝis diversaj manifestacioj. Ili signifis la starton por la publika hungara popolribelo de 1956. En Szeged 3000 studentoj eksiĝis el sia asocio kaj fondis novan organizaĵon, kiu atingis aliajn universitatojn. Kiam Hungarion atingis la novaĵo, ke Gomułka fariĝis nova partia ĉefo en Pollando, multaj hungaroj opiniis, ke tio devus esti ebla ankaŭ en ilia lando.

La 22an de oktobro en la Teknika Altlernejo de Budapeŝto estis diskutita reforma programo konsistanta el 16 punktoj. Ĝi postulis la senprokrastan forveturon de la sovetia armeo el Hungario, la sekretan reelekton de ĉiuj funkciuloj de la komunisma partio, novan formiĝon de la hungara registaro sub la gvido de Imre Nagy kaj liberajn elektojn de la parlamento, publikan kondamnon de Rákosi kaj ties konsorcianoj, reekzamenadon de la rilatoj kun aliaj komunismaj ŝtatoj kaj publikigon de ĉiuj komercaj traktatoj kaj kontraktoj pri reparaciaj pagoj, reorganizadon de la ekonomio kaj reviziadon de la sistemo de la labornormoj kaj pli malaltajn liverajn kvotojn por la kamparanoj, radikalan egaligon de la salajroj, reekzamenadon de ĉiuj politikaj kaj ekonomiaj krimoj per sendependaj tribunaloj, kompletan liberecon de la opinio kaj gazetaro, forigon de la Stalin-monumento kaj restarigon de la malnova hungara Kossuth-blazono. La venontan tagon okazis manifestacio de la studentoj kaj laboristoj ĉe la Petőfi monumento. Oni montris flagojn kaj sloganojn kaj kantis kantojn de liberigaj movadoj. Radio Budapeŝto raportis pri la evento. Ĉe la Bem-monumento la verkisto Péter Veres laŭtlegis manifeston de la Verkista Asocio, en kiu oni postulis „sendependan nacian politikon sur socialisma bazo“. Ekmarŝis amaso da studentoj, kiuj vokis plej diversajn sloganojn, inter alie „morton por Rákosi!“ kaj disdonis flugfoliojn. En iu punkto de la urbo la marŝantoj devojiĝis laŭ du diversaj direktoj ´, daŭrigante al la parlamento kaj al la Stalin-placo, kie staris la Stalin-monumento. Ĉe iu fenestro de la parlamento aperis Imre Nagy, kiu seniluziigis la protesantojn per la alvoko, ke ili iru hejmen. Sur la Stalin-placo dume estis faligita la statuo de Stalin. Vespere Gerő disaŭdigis paroladon tra la radio, en kiu li ofendis la manifestaciantojn kiel „malamikojn de la popolo“, „kalumniantojn de Soveta Unio“, „mensogantojn“ k.s. Post tiu paroldo ekflamis batalo ĉe la budapeŝta radiostacio, kie kolektiĝis ribelemaj studentoj por disaŭdigi sian programon tra la radio. Kvankam la permeso estis formale donita, neniu tia disaŭdigo okazis en la radio, tiel ke la homoj sentis sin trompitaj. Ili enpenetris la konstruaĵon, kiu estis okupita de anoj de la sekureca polico, kiuj komencis pafi. La senarma amaso kriegis kolere. Por ricevi apogon, la policistoj vokis tankojn de la hungara armeo. Sed la soldatoj de la tankoj malobeis la ordonon de iu generalmajoro kaj solidariĝis kun la protestantoj. Laboristoj alportis armilojn el iu municia deponejo, kaj iuj ribeluloj komencis pafi. Pluraj homoj mortis aŭ vundiĝis surloke. La furioza amaso eniris la radiodomon, kiun oni okupis, iom poste la samo okazis ĉe la ĉefredaktejo de la partia organo. La venontan tagon la ribelo disvastiĝis tra tuta Hungario. Tion povis eviti nek sovetiaj trupoj, kiuj troviĝis en la lando, nek alvokoj de Nagy, nek la elŝanĝo de Gerő per János Kádár. La bataloj inter ribeluloj kaj du sovetiaj tankdivizioj daŭris kvin tagojn. Tiam la Ruĝa Armeo retiriĝis el Budapeŝto. La 29an de oktobro ŝajnis, ke la popola ribelo estis gajnita, ĉar granda parto de la popolo partoprenis en ĝi. Eĉ parto de la armeo aliĝis al la revoluciuloj.

La stalinisma ŝtataparato estis anstataŭigita per naciaj, revoluciaj kaj laboristaj konsilioj. En la vilaĝoj la kamparanoj malfondis la kolĥozojn, la komunisma partio disfalis. El ĝia cindro Nagy kaj Kádár fondis la „Socialisman Laboristan Partion“. Diversaj agentoj de la sekreta polico, kiujn la popolo povis kapti, esti linĉitaj surstrate. Nagy proklamis la abolon de la unupartia reĝimo kaj anoncis liberajn elektojn. Moskvo konfesis, ke ĝi faris erarojn en la rilatoj kun la popoldemokratioj (kiel la socialismaj landoj estis nomitaj), kaj anoncis, ke oni pli forte respektos la principon de la „kunekzistado“ kiel bazon de la interŝtataj rilatoj kadre de la orienta bloko. Sed tio estis formalaĵo, fakte trompo aŭ mensogo, ĉar la 31an de oktobro sovetiaj trupoj transiris la limojn de Hungario kaj rapide veturis de Ukrainio kaj Rumanio kontraŭ Budapeŝto. Nagy proklamis Hungarion neŭtrala ŝtato kaj la eksiĝon de sia lando el la Varsovia Pakto. En la nokto Kádár malaperis por sekrete formi kontraŭan registaron.

La 3an de novembro Nagy siavice formis registaron, kiu konsistis el pluraj partioj, al kiu apartenis ankaŭ tri socialdemokratiaj ministroj. Pál Maléter, ministro pri defendo, kiu aliĝis al la ribeluloj, kaj Kovács, ĉefo de la generala stabo, estis transportitaj al la sovetia ĉefkomandejo, kie ili estis arestitaj de la rusoj. La venontan tagon komenciĝis dua atako de la sovetia armeo kontraŭ Budapeŝto. La bataloj daŭris denove kvin tagojn. Kiam la militaj fortoj de la ribeluloj elĉerpiĝis, ili klopodis plubatali per civilaj rimedoj, ekzemple per fondado de laboristaj konsilioj, instalado de civilaj administraj organoj en la komunumoj, lanĉado de sendependaj gazetoj kaj enpostenigo de sendependaj juĝistoj, starigo de liberaj sindikatoj ktp. Sed ĉiuj klopodoj estis vanaj. Imre Nagy, kiu ne plu sciis kion fari en tiu tikla situacio, fuĝis en la ambasadejon de Jugoslavio, de kie li estis logita eksteren, kie sovetianoj arestis kaj forportis lin.

La 11/12ajn de decembro la Centra Laborista Konsilio ankoraŭfoje organizis ĝeneralan strikon por protesti kontraŭ la restarigo de la diktaturo. Post tio la konsilio estis malfondita. La registaro de Kádár proklamis la militan staton. Dum kaj post la ribelo dekmiloj da hungaroj, inter ili amaso da gejunuloj, forlasis sian patrujon kaj fuĝis okcidenten, kie la elmigrintoj eskapis la komunismon kaj rekomencis sian vivon parte tre sukcese.[109]

La iniciatintoj de la ribelo baldaŭ sentis la venĝon de siaj kontraŭuloj. Géza Losonczy, Gábor Tanczos, sekretario de la Petőfi-cirklo, Sándor Haraszti, prezidanto de la gazetara asocio, Júlia Rajk kaj aliaj estis ekzilitaj kune kun Imre Nagy al Rumanio. Verkistoj kiel Gyula Háy, Zoltán Zelk, Tibor Tardos, Tibor Déry kaj deko da aliaj verkistoj kaj ĵurnalistoj estis arestitaj. Tamás Aczél kaj Tibor Méray sukcesis fuĝi al eksterlando. Nur György (Georg) Lukács rajtis reveni al Budapesto. En januaro 1957 oni malpermesis al la verkista asocio ĉian aktivecon kaj en aprilo sekvis dekreto pri ĝia likvido. Jam en januaro la registaro malfondis la ĵurnalistan asocion.

Kiuj do estis la ĉefaj trajtoj de la hungara ribelo de oktobro-decembro 1956, kiu distingis ĝin de ĉiuj antaŭaj formoj de kontraŭstalinismaj protestoj kaj ribeloj en la orienta bloko:

- La hungara ribelo detruis la hungaran ŝtatan kaj partian aparaton;
- La malnova KP disfalis kaj estis anstataŭigita per novtipa organizaĵo („socialisma laborista partio“), kiu devis esti demokratia anstataŭ stalinisma;
- Krom laboristaj konsilioj aperis ankaŭ revoluciaj instancoj kiel novaj organoj de la potenco kaj administrado;
- Transiro de la unu- al plurpartia sistemo;
- Revivigo de la socialdemokratio;
- Proklamo de la ŝtata neŭtraleco kaj eksiĝo el la Varsovia Pakto;
- Sendependigo de la sindikatoj;
- Fondiĝo de la „demokratia sendependec-movado“, kiu komprenis sin kiel organizaĵon, kiu praktikis sintezon de demokratio kaj socialismo aŭ komunismo) kaj planis koncepton de sintezo de parlamentismo kaj konsilia potenco.

Kiel kaŭzojn de la eksplodo de la hungara ribelo en oktobro/novembro 1956 speciala komisiono de UN, kiu devis esplori la incidenton, nomis la sekvajn: daŭra lezado de la homaj rajtoj fare de la komunismaj partio kaj registaro en la jaroj antaŭ la ribelo; altrudo de la sovetia socia modelo en Hungario kaj konstanta enmiksiĝo en la internajn aferojn de Hungario flanke de Moskvo.

Por pravigi la intervenon la sovetianoj baziĝis sur laŭdira peto de la ĉefministro de Hungario, kiun Ŝepilov, ministro pri eksteraj aferoj de Sovetunio, menciis dum la 582a plenkunsido de la ĝenerala kunveno de UN la 19an de novembro 1956, kaj kiun la ministra konsilio de Sovetunio volis esti ricevinta de li (lia nomo ne estis menciita) la 24a de oktobro. Kiam kaj de kiu tiu laŭdira peto estis subskribita restis ioma enigmo. Iuj sovetiaj trupoj enpenetris en Hungarion fakte jam en la unuaj semajnoj de oktobro, kaj precipe en la nokto de la 23a al la 24a de oktobro je la unua horo aliaj sovetiaj trupoj transiris

[109] Pliaj detaloj de la disvolviĝo de la hungara ribelo de oktobro-decembro 1956 estas priskribitaj sub http://www.planlingvoj.ch/Hungario1956.pdf.

la hungaran limon ĉe Záhony. Iuj sovetiaj trupoj, kiuj jam troviĝis en la lando, ekmoviĝis en Budapeŝto la 24an de oktobro je la 2a horo de la sama nokto, kvankam la petvoko de la hungara registaro al Sovetunio estis disaŭdigita en la hungara radio nur je la 9a horo matene de tiu tago post kiam la dissendado de novaĵoj pri la interveno komenciĝis je la 4h30. Do, la sovetiaj trupoj jam delonge moviĝis, kiam la dubinda petvoko estis publike direktita al Moskvo. Laŭ tiu maniero la nova ĉefministro Imre Nagy, kiu estis elektita la 24an de oktobro, alfrontis la aktualan situacion en sia lando. Efektive la tiama partia ĉefo Ernő Gerő kaj la eksĉefministro András Hegedüs provis dum tagoj ricevi la subskribon de Nagy por iu antaŭdatita letero, en kiu Sovetunio estis petita sufoki la ribelon en la lando. Sed Nagy rifuzis doni sian subskribon (la 30an de oktobro la budapeŝta radio konfirmis, ke Nagy ne subskribis tian peton de la hungara registaro al la sovetia registaro). Surbaze de tiuj faktoj estas do ege dubinde, ke la hungara peto al Sovetunio sendi trupojn, kiu laŭdire estis farita la 24an de oktobro, okazis en la nomo de laŭkonstitucia organo de la Hungara Popola Respubliko.

Estas kurioza ironio de la historio, ke la 1an de novembro 1956 János Kádár diris al Jurij Andropov, sovetia ambasadoro en Budapeŝto, kiam li eksciis pri la plano de Moskvo ataki Hungarion: „Kiel hungara komunisto mi havas la devon batali kontraŭ tiuj trupoj se necese per la armilo en la mano.“

La dua sovetia interveno, kiu komenciĝis la 4an de novembro, estis pravigita per „peto de la registaro de János Kádár“. Sed en la momento de tiu dua interveno ankoraŭ oficis la registaro de Imre Nagy, kies legitimecon neniu kontestis, nek en Hungario nek en alia socialisma aŭ nesocialisma lando. Eĉ la plej altaj reprezentantoj de Sovetunio kiel Suslov kaj Mikojan intertraktis kun ĝi. La fakto, ke Imre Nagy estis ne nur la legitima ĉefministro de Hungario, sed ke li ankaŭ ĝuis la fidon kaj apogon de la sovetiaj instancoj, estis konfirmita eĉ de marŝalo Ĵukov, ministro pri defendo de USSR, la 29an de oktobro en iu deklaraĵo. En tiu momento la registaro de Imre Nagy do ne nur sendis neniun peton al la sovetia registaro por voki sovetiajn trupojn, sed ĝi estis ankaŭ, de la 25a de oktobro ĝis la 4a de novembro, 00a horo, do ĝis ĉirkaŭ tri horoj antaŭ la dua sovetia interveno, en konstanta kontakto kun diversaj reprezentantoj de la sovetia registaro – kaj energie kaj ripete postulis la retiron de la sovetiaj trupoj (fakte jam la 24an de oktobro), kies ĉeesto estis konsiderita de la hungaroj kiel sola obstaklo por restarigi normalajn kondiĉojn. Sed ĉi-rilate la hungara registaro neniam ricevis kontentigan respondon de la sovetianoj. Sub tiaj kondiĉoj ne estas eble, ke iu „Kádár-registaro“ povis direkti peton al Sovetunio en la momento de la dua interveno. Alia pruvilo, ke Imre Nagy estis la sola legitima ĉefministro de Hungario en la momento de la dua interveno, estas la fakto, ke generalo Károly Janza, transdonis la novaĵon pri la enpenetro de la sovetiaj trupoj en la ĉefurbon en la fruaj matenaj horoj de la 4a de novembro nur al Imre Nagy, ĉar la lando konis tiam neniun alian ĉefministron. Krom tio, István Dobi, estro de la prezidia konsilio (do la formala ŝtatestro) de la Hungara Popola Respubliko studis en la nokto de la interveno kun ĉefministro Imre Nagy la aktualaĵojn pri la sovetia operaco. Sen lia ordono ne povis esti formita alia registaro kaj la enoficigo de la nova reĝimo post la puĉo kontraŭ Imre Nagy okazis nur la 7an de novembro. Estas ankaŭ vere, ke la sovetia registaro neniam informis la hungaran registaron pri la efektivaj celoj de la grandstilaj operacoj kontraŭ Hungario. Ĝi ankaŭ neniam konsultis ĝin pri la nombro, forto kaj utiligo de trupoj kaj neniam ricevis ĝian permeson sendi trupojn al Hungario, do ĝi lezis la internacian juron en ĉiuj rilatoj.

Por pli detale analizi la demandon, ĉu Sovetunio lezis la internacian juron per siaj du intervenoj en Hungario en oktobro kaj novembro 1956, devas esti konsiderataj la sovetiaj argumentoj de 1953 pri la difino de agreso. Moskvo klarigis, ke ĝi agis en Hungario surbaze de la difinoj de la traktato pri la Varsovia Pakto kaj asertis, ke ĝi havis sufiĉe larĝan juran bazon por tiuj intervenoj. Ĝi klarigis, ke la traktato antaŭvidas la engaĝigon de armeaj trupoj en la landoj, kiuj subskribis la traktaton pri la Varsovia Pakto. Kvankam tio povas esti, sed tio ne povas esti esplorata ĉi tie, estas grave scii, ke tiu traktato kontraŭdiris bazajn principojn de la UN-Ĉarto. Temas pri la principoj de la nacia aŭtonomeco, la suverena egaleco, la malpermeso minaci alian ŝtaton per apliko de perforto kaj la malpermeso de la enmiksiĝo en la internajn aferojn de alia ŝtato, kio estas ligata kun la malpermeso de la lezado de la teritoria integreco de alia ŝtato. En la preamblo de la traktato de la Varsovia Pakto estis inter alie emfazite, ke la partneroj orientiĝas laŭ la celoj kaj principoj de la UN-Ĉarto kaj engaĝiĝas favore al la fortigo de la amikeco, kunlaboro kaj reciproka helpo. Ankaŭ en art. 1 de la traktato estis konfirmite, ke tio okazas en kongruo kun la principoj de la UN-Ĉarto, ke oni rezignas pri apliko de minacoj kaj perforto kaj intencas solvi konfliktojn per pacaj rimedoj. Krom tio la artikolo entenis eksplicitan malpermeson de la intervena rajto, kaj art. 3 postulis la devon interkonsultiĝi en kazo de konflikto „en la intereso de la monda paco“. Art. 4 referencis al art. 51 de la UN-Ĉarto, kiu antaŭvidas komunan armatan operacon kontraŭ ĉiu atakanto

*de ekstere*. Oni devas rememorigi, ke la Varsovia Pakto estis fondita por defendi sin kontraŭ la atako de ekstera agresanto el la „imperiisma“, t.e. nesovet-komunisma mondo. Sekretaj klaŭzoj, kiuj malgraŭ tiuj solenaj promesoj pravigus la aplikon de perforto kaj intervenoj kontraŭ aliaj ŝtatoj kaj permesus ĉiujn ceterajn malpermesojn de la UN-Ĉarto, ne estis trovitaj en la traktato pri la Varsovia Pakto. La anonco de la sovetia registaro, ke ĝi rajtas interveni en alia ŝtato, se laŭ ĝia opinio la socialismo estas en danĝero en tiu ŝtato, estas alia faceto, kiu kondukos al la fifama „Breĵnev-doktrino“ de la jaro 1968, kiam Sovetunio intervenos en Ĉeĥoslovakio, kie laŭ ĝia opinio la socialisma estis en danĝero, kaj serĉos kredindan pravigon por tiu interveno.

Alia principo de la internacia juro estas, ke la traktatoj estas plenumendaj en bona intenco. Oni povas konkludi, ke se la traktato pri la Varsovia Pakto aplikas alian praktikon ol promesite en la teksto, kiu ne kongruas kun la principoj de la UN-Ĉarto, tiu traktato aŭtomate perdas sian validecon. Ŝajnas, ke tio estis la kazo post de la sovetia interveno en Hungario, sed la Varsovia Pakto daŭris ekzisti ankaŭ poste. Laŭ la praktiko de la internacia juro, ŝtato, kiu estis atakita de alia ŝtato, kun kiu ĝi havas partneran aliancon, rajtas nuligi sian membrecon, se la alia partnero lezis tiun traktaton. Sed estas klare, ke tia scenaro ne plu povis okazi, ĉar per la sovetia interveno la hungara ribelo estis sufokita kaj finita kaj la ordo de la socialisma reĝimo restarigita en Hungario sub la kondicoj de la okupacio.

Plej malfrue dum la hungara krizo de la jaro 1956 evidentiĝis, ke la Varsovia Pakto havas agreseman karakteron kaj endanĝerigis la mondan pacon kaj la internacian sekurecon, ke Sovetunio ne estis preta respekti la validan internacian juron, kiu laŭ ĝi estis inventaĵo de la Okcidento, kaj strebis reinterpreti ĝin laŭ propra maniero en la senco de propra „socialisma juro“, kiu baziĝas sur (marksismaj-leninismaj kaj soveiaj) teorioj, kiujn oni ne trovas en la internacia juro aŭ en la UN-Ĉarto.

La sola membro-ŝtato de la Varsovia Pakto, kiu malaprobis la sovetian intervenon en Hungario, estis Pollando, kie la reganta komunisma partio publikigis la 2an de novembro alvokon al la laborista klaso de Pollando pri la okazaĵoj en Hungario. En tiu alvoko estis notite, ke „ni opinias, ke la popolaj demokratioj kaj socialismaj atingoj en Hungario povas esti defendataj kaj konservataj de la hungara popolo sub la gvido de ĝia laborista klaso el propra forto“, kaj neite, ke tio povas okazi „per interveno de ekstere“. Tiu alvoko estis tiam kuraĝa paŝo de la polaj komunistoj, kiuj sub la gvido de Gomułka[110] komplete ŝanĝos sian sintenon okaze de la sovetia interveno en Ĉeĥoslovakio en aŭgusto 1968.[111]

* * *

Kuriozaj aferoj tiutempe okazis en tiu jaro ankaŭ en ***Germana Demokratia Respubliko (GDR)***, kie la homoj konstatis, ke ankaŭ post la ribelo de junio 1953 la problemoj restis esence la samaj. La stalinisma sistemo restis konservita, ankaŭ partia ĉefo Walter Ulbricht pluregadis kiel stalinisma diktatoro, malgraŭ la personaj ŝanĝoj en Moskvo kaj la kondamno de la stalinismo fare de Nikita Ĥruŝĉov.

En printempo 1956 aperis voĉoj dum iu studenta forumo en orienta Berlino, kiuj postulis la arestadon de stalinismaj ministroj. En Lepsiko studentoj fajfkoncertis kontraŭ Ulbricht, kiu klarigis al la publiko, ke malstalinismigo en GDR ne necesas. La plimulto de la akademia junularo sentis sin solidara kun la hungaraj kaj polaj liberec-batalantoj. Kiel en Pollando kaj Hungario ili postulis la fondon de sendependa junulara organizo kaj la abolon de la rusa lingvo kaj marksisma-leninisma instruado kiel devigaj studfakoj. La reago de la SED-reĝimo estis, ke la partio sendis la policon kaj la bataltrupojn de la entreprenoj kontraŭ la studentoj por timigi ilin, kaj la universitataj prelegejoj estis submigritaj de partiaj funkciuloj. La ŝtato ne pretis ŝanĝi sian altlernejan politikon, kiu estis gvidata, kontroaita kaj defendata de Kurt Hager, kiu plendis, ke oni provas kontrastigi la objektivan verecon kun la partieco, kvazaŭ oni intencus postuli ideologian kunekzistadon. La ŝtata sekretario pri altlernejoj, prof. d-ro Gerhard Harig, estis anstataŭigita per la pli ortodoksa d-ro Wilhelm Girnus, kiu severigis la kondiĉojn por povi komenci universitatan studadon. Vojaĝi al Federacia Respubliko Germanio kaj al la Okcidento iĝis malpermesate por la studentoj de GDR.

Diversloke estiĝis interesaj diskutkluboj, ekzemple ĉirkaŭ Wolfgang Harich, kiu formis parton de la nova opozicio. Harich estis signifa marksisma filozofo, universitata docento pri filozofio, ĵurnalis-

[110] Kiu estis elektita la 21an de oktobro kiel unua sekretario de la pola KP.
[111] Laŭ Csizmas, p. 82-89.

to, literatur-kritikisto kaj brila intelektulo. Harich precipe kritikis la artkomisionon de GDR, al kiu li riproĉis orgojlon, ignoradon, sektemon, mankon de taktiko, burokratiismon kaj diletantismon.

La „grupo Harich“ komprenis sin speco de germana Petőfi-klubo. Dum multaj semajnoj en aŭtuno 1956 en tiu klubo okazis diskutvesperoj, kiujn tamen partoprenis ne pli ol 20-30 personoj, do Harich ne sukcesis atingi pli larĝan publikon, ĉar la kritikaj diskutoj restis limigitaj al universitatoj kaj altlernejoj, do al la interno de la intelekta medio. Laŭ la klarigo de iu iama gvida kunlaboranto de la plankomisiono, la 24an de oktobro 1956 ekzistis la ebleco de eksplodo de nova ribelo en GDR. Kiam la studentoj de la Humboldt-universitato volis protestmarŝi kontraŭ la reĝimo de Ulbricht, ili estis malliberigitaj dum du tagoj kaj noktoj en sia universitato.

En la programo de la „grupo Harich“, kiu neniam estis publikigita, estis skribite, ke „ni ne volas rompi kun la marksismo-leninismo; sed ni volas liberigi ĝin de la stalinismo kaj dogmismo kaj rekonduki ĝin al ĝiaj humanismaj sendogmaj ideoj.“ Oni parolis ankaŭ pri „aparta germana vojo al la socialismo“, kritikis la partion SED, postulante ĝian internan reformadon, kiu devis konsideri ankaŭ la poziciojn de Trockij, Buĥarin kaj de la jugoslaviaj, polaj, hungaraj kaj ĉinaj reform-komunistoj, kondamnis la cenzuron kaj la personkulton kaj alvokis forigi la stalinistojn el la partio. Rilate la ekonomion, la programo enhavis tutan aron da postuloj kiel la transformado de la produktado, enkonduko de laboristaj konsilioj, akcelo de la privata industrio, likvido de la kolĥozoj. Krom tio oni postulis restarigi la intelektan liberecon, ĉesigi la batalon kontraŭ la eklezio, restarigi la aŭtonomecon de la universitatoj, likvidi la sekretan justicon kaj enkonduki la plenan suverenecon de la parlamento, la foriron de la sovetiaj trupoj. Nature, la SED-partio, kies ĉefo Ulbricht sentis sin mem atakita kaj minacita, vidis en tiu sendube radikala programo la provon „restaŭri la kapitalisman ordon“.

Okcidentaj amaskomunikiloj tamen disvastigis la komunikojn kaj artikolojn de la grupo, kiu havis kontaktojn kun Georg Lukács, Ernst Bloch (vd. ĉi-sekve), Paul Merker, Walter Janka kaj Johannes R. Becher, aliaj kritikemaj GDR-intelektuloj. La ĉi-lasta estis io kiel oficiala GDR-poeto, kiu verkis stultajn gloroemojn pri Stalin[112] kaj en 1954 transprenis la gvidon de la nove fondita kultur-ministerio.

Lige kun la fifama skandalo ĉirkaŭ Noel Field[113] kaj la procesoj kontraŭ László Rajk kaj Rudolf Slánský, oni lanĉis juran proceson kontraŭ Paul Merker kaj dumvive ĉikanis lin kiel agenton jen de la francoj jen de la cionistoj, ĉar li pledis, kiel sola membro de la CK kaj politburoo de SED, por repagoj al la viktimoj de la holokaŭsto en GDR, kion la registaro en orienta Berlino strikte rifuzis, ĉar ĝi ne sentis sin respondeca aŭ kompetenta pri tiu afero.

Fine de novembro 1956 Harich kaj aliaj samideanoj estis arestitaj, poste sekvis la arestado de ankoraŭ pliaj membroj de lia grupo, al kiuj oni riproĉis, ke ili „havis en kunlaboro kun okicdentaj sekurecaj servoj la celon subfosi kaj forigi la konstitucian ordon en GDR“. Tiu estis la unua bato de Ulbricht kontraŭ aktivuloj, kiuj post la XXa kongreso de KPSU volis efektivigi verajn reformojn en GDR. Komence de decembro estis arestita ankaŭ Walter Janka, la gvidanto de la berlina Aufbau-eldonejo. Kiel aliaj disidentoj, li estis sendita al la fifama esplorprizono en Hohenschönhausen, kie li havis la ´honoron´ persone konatiĝi kun Erich Mielke, kiu en 1957 fariĝis nova ĉefo de la Ministerio de la Ŝtata Sekureco. Ĉi tiu fifama mistera ĉekista instanco fariĝis giganta administra aparato en GDR, kiu kovris ankaŭ la eksterlandan spionadon kaj la kontroladon de la landlimoj, kaj disponis pri 91 mil oficialaj kunlaborantoj kaj takseble ĝis 189 mil sekretaj kunlaborantoj (ankaŭ kelkaj esperantistoj) ĝis la fino de la 80aj jaroj; per tio ĝi estis la plej granda sekreta servo de la mondo proporcie al la landa loĝantaro inter alie kun la celo grandskale kaj komplete observi kaj kontroli la loĝantaron de GDR, kio faris la „Stasion“, kiun neniu civitano de GDR kaj neniu eksterlandano en GDR povis eskapi, tiel unika organizaĵo.[114]

En du juraj procesoj, kiuj disvolviĝis en principo laŭ la fifama stalinisma maniero, la menciitaj disidentoj estis kondamnitaj en marto kaj julio 1957 pro „formado de konspira kontraŭŝtata grupo“ al multjaraj prizonaj arestpunoj.[115] Per tio Ulbricht celis silentigi la kritikajn intelektulojn en GDR por eviti similajn scenarojn kiel en Pollando kaj Hungario. En la postaj semajnoj sekvis grandstila „puriga kampanjo“ kontraŭ diversaj „kontraŭ-revoluciuloj“, „reviziistoj“ kaj „liberaligaj tendencoj“, precipe en

---

112 Vd. https://www.youtube.com/watch?v=k0bjN5H7gUs.
113 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Noel_Field.
114 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ministerium_für_Staatssicherheit.
115 Per amnestio Harich estis liberigita fine de 1964.

la gazetaro, kie diversaj postenuloj estis elŝanĝitaj. Ulbricht pravigis tiujn operacojn en januaro 1957 ekzemple en la kazo de la kunlaborantoj de la satira gazeto *Eulenspiegel* per la neceso elŝalti „etburĝajn elementojn" kaj forigi „la nihilismon de tiuj personoj", kies „vivo ideologie fremdiĝis rilate al la laborista klaso" kaj kiuj kritikis la „partiajn gvidantojn, la aliancon de la laborista klaso" kaj „ne kapablis ĝuste kompreni la konstruadon de la socialismo".

Alia opozicia centro formiĝis ĉirkaŭ la marksisma filozofo Ernst Bloch, kiu okupis katedron en la filozofia fakultato de la Lepsika universitato. Bloch devenis de juda familio el okcidenta Germanio, kiu estis devigita fuĝi en 1939 al Usono pro la persekutado de judoj sub la nazigermana reĝimo. Bloch ne prisilentis sian simpation kun la maldekstro, sed liaj imagoj pri la socialismo esence diferencis de la imagoj, kiujn havis la potenculoj de GDR. Li ne pretis obei al la partia disciplino de SED kaj ankaŭ ne aliĝis al tiu partio. Malgraŭ tio, li ricevis kaj akceptis altajn ŝtatajn ordenojn de GDR. Lia ideo de la „homeca socialismo" kiel kontraŭtezo al la stalinismo fascinis multajn studentojn. Sian vizion li prezentis en konferenco de komunismaj filozofoj de Eŭropo, kiu okazis mallonge antaŭ la XXa partia kongreso en Moskvo. Tie li metis socialismon, liberecon kaj veron sur la saman nivelon kaj difinis ilin kiel kriteriojn de la komunisma politiko. Tio signifis, ke la komunismo devis esti reformita de interne.

Sed la stalinisma reĝimo kompreneble kontraŭstaris kaj rifuzis tiujn ideojn. En 1955 ankoraŭ povis aperi festlibro honore al la 70a naskiĝtago de Ernst Bloch, en kiu ĉiuj eminentaj filozofoj de GDR esprimis sian adoron pri li. En decembro 1956 *Neues Deutschland* (Nova Germanio) lanĉis malpuran kampanjon kontraŭ li, kiu alprenis pli kaj pli larĝan dimension. En lia ĉefverko „La principo espero",[116] kiu estis tre populara libro inter studentoj, la partiaj oficialuloj malkovris burĝajn, idealismajn kaj mistikajn trajtojn. En tiu kampanjo profiliĝis precipe la komunisto Rugar Otto Gropp, profesoro pri dialektika kaj historia materiismo en la lepsika universitato, kiu konsideris la filozofion de Bloch nemarksisma kaj liajn vidpunktojn aroganta kritiko pri la aktuala ŝtato kaj socia ordo. Kiam en 1957 la malnova reĝimo plene refirmigis sian reakcian pozicion, ĝi prezentis al la memstare pensanta filozofo, kiu reprezentis la saman linion de Georg Lukács, la kvitancon kaj emeritigis lin. La samaj aŭtoroj, kiuj ankoraŭ flatis lin antaŭ du jaroj, nun devis ĵeti la plenan koton kontraŭ lin. Lia instruo estis misfamigita kiel „mallarĝspura marksismo" kun teologia karaktero, kiu finfine subfosas la dialektikan materiismon kiel filozofion de la marksismo, sur kiu baziĝas la tuta teoria konstruaĵo de la komunisma mondo. Lia edzino devis elekti ĉu eksiĝi el la partio aŭ divorci de Bloch. Liaj disĉiploj estis arestitaj aŭ evitis arestadon per fuĝo al eksterlando. Pluraj asistentoj perdis sian laborlokon. De iu okcidenta vojaĝo Bloch ne revenis al GDR post la konstruo de la Berlina Muro en 1961.

Tria opozicia grupo konsistis precipe el ekonomikistoj, kiuj kolektiĝis ĉirkaŭ profesoro Friedrich Behrens, kunfondinto de la Instituto por ekonomiaj sciencoj de la Germana Akademio de la Sciencoj kaj tiama estro de la centra ŝtata oficejo por statistiko kaj posedanto de la nacia premio de GDR (1954). Lia kunlaboranto Arne Benary ellaboris novan ekonomian koncepton, kiu celis homecigi la glaciiĝintan ekonomion, rekomendante la partoprenon de la laboristoj en la entreprena profito. Kiam la eldono de la revuo, en kiu aperis iliaj verkaĵoj, estis konfiskita, leviĝis sufiĉe granda protesto, tiel ke ĝi devis esti represita. La du sciencistoj proponis enkonduki aŭtonoman administradon de la ekonomio kiel alternativon al la planekonomio. Per tio ili antaŭvidis reduktiĝon de la ŝtata burokratio. Sed la partio SED ne estis interesata pri aŭtonoma administrado de la entreprenoj kaj kontraŭstaris ajnan provon enkonduki ĝin, ĉar ĝi timis, ke ĝi povus perdi la kontrolon pri la ekonomio. Okaze de la 30a konferenco de la CK de SED (1957) oni riproĉis al Behrens kaj Benary reviziismon, sekve al kio Behrens, amiko de Bloch, perdis ĉiujn ŝtatajn funkciojn kaj izoliĝis. Pro siaj kritikaj vidpunktoj ili devis elteni gravajn reprezaliojn flanke de la SED-reĝimo.

Inter aliaj samtipaj sciencistoj elstaris homoj kiel profesoroj Jürgen Kuczynski, Gunther Kohlmey kaj Kurt Vieweg, kiuj provis adopti la kampanjon de la „cent floroj" en Ĉinio, kritikante la stalinismon laŭ sia maniero sur la kampoj, sur kiuj ili kompetentis. Kuczynski ja gloris la industriigan politikon de Stalin, sed kritikis liajn brutalan diktaturon kaj dogmemon, kiuj laŭ li malhelpis honestan sciencan opinian debaton. Kohlmey, kiu estis fonda direktoro de la renoma Instituto por ekonomiaj sciencoj kadre de la Germana Akademio de la Sciencoj, verkis pri „demokratia monda merkato". Dum Kuczynski estis devigita kritiki sin mem, Kohlmey estis trafita de la kampanjo „kontraŭ la reviziismo" kaj devis foriri kiel direktoro de sia instituto.

[116] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Das_Prinzip_Hoffnung.

Kiam prof. Kurt Vieweg, direktoro de la Instituto por agrikultura ekonomio, kritikis la ekzistantan agrikulturan politikon de GDR kaj publikigis alternativan programon, kiu antaŭvidis verajn korporaciojn anstataŭ kolĥozoj, la partio diskreditis ĝin kiel provon „restaŭri la kapitalismon en la agrikulturo“. Vieweg estis eksigita de sia funkcio kiel gvidanto de la instituto kaj eliminita de la centra estraro de la kamparana amasorganizaĵo „Asocio por reciproka kamparana helpo“. Pro reprezentado de „kontraŭ-revolucia koncepto“ oni lanĉis partian proceson kontraŭ tiu malnova komunisto (kiu iam estis gvida membro de la „Hitlera junularo“), kiun li evitis per fuĝo al okcidenta Germanio.[117]

La menciitaj intelektuloj ne estis la solaj disidentoj en GDR, kiuj protestis kontraŭ stalinismo kaj restalinismigo. Komence de 1957 okazis prelega striko en la orientberlina Humboldt-universitato, ĉar kontraŭ iu dekano estis lanĉita dubinda politika disciplina proceduro. En Lepsiko 155 universitataj studentoj subskribis rezolucion kontraŭ la deviga instruado de la rusa lingvo. En la Teknika Altlernejo de Dresdeno kelkcent studentoj protestis kontraŭ la malpermeso veturi okcidenten. En orienta Berlino, Lepsiko, Halle kaj Jena ekzistis grupoj de opoziciaj sciencistoj. La orientberlina grupo kaŝe disvastigis literaturon de Trockij kaj Rosa Luxemburg kaj postulis la demision de Ulbricht, reformadon de la SED-gvido kaj de la armeo kaj altigon de la reala signifo de la parlamento. La lepsikaj sciencistoj postulis liberecon de la gazetaro, klerigon, formadon de sendependaj entreprenaj konsilioj kaj malfondon de la ŝtata sekureco „Stasi“. La menciitaj opoziciaj studentaj grupoj estis arestitaj kaj senditaj en la prizonon. En 1957/58 en ses universitatoj okazis 65 arestoj. Ĉio tio ne malhelpis al Ulbricht diri publike, ke la „marksismo-leninismo estas la plej humana instruo, kiu ekzistas“. Ulbricht malŝatis la politikon de Ĥruŝĉov, malpermesis publikigi en GDR lian paroladon pri la ekonomia reformo kaj (false) kredis, ke Molotov estos la homo de la estonto.

La juraj procesoj kontraŭ la studentoj kaj profesoroj kaŭzis amasan fuĝadon de intelektuloj el GDR: En 1957 fuĝis 1894, en 1958 2522 studentoj kaj 208 altlernejaj instruistoj al Okcidento. Tia perdo estis malfacile eltenebla por tia lando, sed ĝi jam anoncis la konstruon de la posta Berlina Muro.

Kvara opozicia grupo formiĝis en la CK kaj politburoo de SED mem. Ĝia gvidanto estis Karl Schirdewan, kiu estis la anstataŭanto de Ulbricht. Al la grupo apartenis Fred Oelssner, ĉefideologo de SED, Ernst Wollweber, ministro pri ŝtata sekureco, kaj du aliaj partiaj teknokratoj. Tiuj kvin kamaradoj komencis opozicii kontraŭ Ulbricht post la XXa partia kongreso en Moskvo. Ili klopodis atingi malstreĉiĝon de la reĝimo, demision de Ulbricht, plifaciligon de la administracio, malburokratian laborstilon, malfondon de malprofitaj kolĥozoj, akcelon de la konsumindustrio kaj nacian reunuiĝon de Germanio per kompromisoj sur ambaŭ flankoj. Schirdewan devis fariĝi nova unua sekretario de la partio SED kun la tasko formi novan politburoon, kio laŭdire estis interkonsentita kun Ĥruŝĉov. La tuto havis la odoron de puĉo. La konflikto kun Ulbricht eksplodis okaze de la 29a kunsido de la CK de SED en novembro 1956, kiam Schirdewan prezentis sian koncepton. Ulbricht baldaŭ venĝis sin. Post la 35a kunsido de la CK de SED en februaro 1958 Schirdewan, Wollweber kaj Oelssner perdis siajn ŝtatajn postenojn. La akuzan paroladon kontraŭ ili Ulbricht mem prezentis. Schirdewan estis ekskludita el la politburoo kaj la CK pro „frakciisma agado“ kaj ricevis alian funkcion.

Kio koncernis la verkistojn de GDR, ili ja ne hezitis formuli sian malkontenton pri la evoluo de la vivo en la germana laborista ŝtato, kiu fariĝis pli kaj pli malvarma kaj malhomeca. Stefan Hermlin malŝatis minacojn de la partio kontraŭ verkistoj, kiuj havis alian opinion ol ĝi, Arnold Zweig avertis pri la perversioj en la lingva semantiko de la ĉiutaga vivo, kiu estas senigita de la homeco kaj de la origina signifo de la nocioj. La (juddevena) literatursciencisto profesoro Hans Mayer de la lepsika universitato, kiu pledis por la ŝanĝo de la literatura klimato en GDR, ne konsentis pri la frazo de Stalin, ke „la verkistoj estas la inĝenieroj de la homa animo“, kiun ankaŭ Ulbricht transprenis, kvankam post la XXa kongreso de KPSU li anoncis, ke Stalin ne plu povas esti konsiderata kiel marksisma klasikulo. Ĉar la cenzuro subpremis ĉiujn kritikajn voĉojn, la verkistoj de GDR ne tro laŭte plendis publike pri la politika situacio, kiel tion faris iliaj polaj kaj hungaraj kolegoj, pro kio aŭtoroj kiel Anna Seghers, Willi Bredel kaj Stefan Heym grandparte silentis. Sed ekzistis kelkaj pli junaj verkistoj kaj artistoj, kiuj ne hezitis laŭte eldiri siajn kritikajn opiniojn reprezente por multaj junaj artistoj en GDR, kiel Heinz Kahlau (disĉiplo de Brecht), Manfred Steubel, Manfried Bieler kaj Jens Gerlach, kiuj kritikis la vulgarigon de la marksismo kaj riproĉis al la ŝtato, ke ĝi malhelpas al la poetoj esti poetoj, kvankam ĝuste al tiuj verkistoj

[117] Vd.. Kiam duonjaron poste li reveturis al GDR, li estis tuj arestita kaj en jura proceso kondamnita de la Supera Tribunalo de GDR pro „perfido de la ŝtato“ al 12-jara arestpuno en malliberejo.

la ŝtato devus helpi, se ili servas al tiu ŝtato. Sed sub la kondiĉoj, kiujn tiu ŝtato disponigis al la verkistoj, veraj talentoj ne povis esti evoluigataj. Alia juna aŭtoro, Günter Kunert, kiu havis judan patrinon, direktis siajn kapricajn satirojn kontraŭ la stalinisma rutino. Gerhard Zwerenz, kiu kuraĝis diri, ke parto de la junularo en GDR estas malkontenta, estis poste akuzita pro „kontraŭ-revoluciaj konsideroj”. La kreantoj de filmoj plendis pri la daŭra enmiksiĝo de la politiko en la produktadon, la teatroj preferis leĝeran amuzadon kaj okcidentajn dramojn, en la arto oni pli kaj pli distanciĝis de la plata naturismo de la socialisma realismo. La ekzistado kiel artisto inter oficialaj devigoj kaj artista sendependeco estis malfacila. La polaj kolegoj havis multe pli grandan liberecon, pro kio ili ofte estis enviitaj de la GDR-anoj. *Sonntag*, la semajna gazeto de la GDR-Kulturligo, volonte presis la nekonformismajn kontribuaĵojn de polaj kaj hungaraj intelektuloj. Ulbricht timis la penson kiel la peston, ke la okazaĵoj en Pollando povus salti al GDR. Sian abomenon de la okcidenta rokmuziko la pruda komunisto kulminigis dum la 11a plenkunsido de la CK de SED (1965) per jenaj fifamaj frazoj: *„Ĉu ni vere devas kopii ĉian fatrason de la Okcidento? Kamaradoj, la monotonecon de la yeah-yeah-yeah, aŭ kiel ĉio tio nomiĝas, oni devus ĉesigi, ĉu ne!”*[118] Povas esti, ke Ulbricht eĉ pli malfidis kaj abomenis la junularon ol Enver Hoĝa, la cinika „patro” de la albana komunismo.

* * *

Eĉ post la morto de Stalin en marto 1953 kaj la fizika likvido de Berija en decembro de la sama jaro,[119] en ***Ĉeĥoslovakio***, regita de Klement Gottwald kaj Antonín Novotný, la stalinismaj persekutoj, arestoj kaj politikaj murdoj estis daŭrigitaj. Per la nova kvinjara plano Prago transprenis la sovetian ekonomian modelon, kiu baldaŭ ruinigis la malnovajn strukturojn de la landa ekonomio kaj ekstera komerco kaj evidentigis gravajn mankojn kaj problemojn en la ekonomio, kiun tiu modelo reprezentas.

Sub la impreso de la sekreta parolado de Ĥruŝĉov dum la XXa partia kongreso de KPSU en februaro 1956, en Ĉeĥoslovakio komenciĝis viglaj debatoj ĉefe inter studentoj. Ekzemple en la Pedagogia Instituto en Prago la plenkunsido kritikis en rezolucio la neobjektivan raportadon pri la Okcidento en la komunisma gazetaro kaj postulis ĉesigi la malhelpadon de eksterlandaj radioelsendoj. Oni postulis ricevi okcidentajn gazetojn kaj revuojn, por ke ĉiu civitano en la lando povu informiĝi pri la aktuala stato de la aferoj. Krom tio, oni deziris, ke la eraroj kaj fuŝoj de la komunismaj ŝtatoj ne plu estu kaŝataj. Oni protestis kontraŭ la senkritika kaj perforta transprenado kaj kopiado de la sovetia sistemo, kvankam ĝi ne taŭgis por la tradicioj de la lando kaj estis tipa sole por Sovetunio. Laŭ la volo de la junaj ribelemaj komunistoj, ĉiuj responsuloj por malpravaj tribunalaj verdiktoj kontraŭ aliaj partianoj, precipe kontraŭ Rudolf Slánský, kiu estis la unua sekretario de la ĉeĥoslovaka KP, kaj liaj kamaradoj, devis esti punitaj. Multaj tiaj partiaj funkciuloj estis kondamnitaj al multjaraj arestpunoj en malliberejoj kaj malaperis en tiel teruraj lokoj kiel Prago-Ruzyně, Prago-Pankrác, Leopoldov kaj Jáchymov,[120] kie ili estis traktitaj kiel en naziaj koncentrejoj aŭ en la sovetia gulago.[121] Nature, la publiko kaj eĉ la subaj partiaj instancoj (precipe en Slovakio) praktike nenion sciis pri tiuj (sekretaj) procesoj, kondamnoj kaj mortigoj kaj malliberejoj. La kazo de la Pedagogia Instituto en Prago ne estis la sola. En multaj altlernejoj kaj universitatoj de Ĉeĥoslovakio okazis tiaj kunvenoj kun vervaj diskutoj kaj samaj decidoj. 253 partiaj organizaĵoj postulis la kunvokadon de eksterordinara partia konferenco. En Slovakio estis amase disdonitaj broŝuroj, kiuj devis instigi al kritika diskutado. Malgraŭ tiuj kelkaj iniciatoj, en 1956 Ĉeĥoslovakio ankoraŭ ne estis matura por ribeli kontraŭ Moskvo kiel en Hungario kaj Pollando, la protestoj estis kontroleblaj, ignoreblaj kaj limigeblaj kiel en GDR al studentaj, intelektulaj,[122] univer-sitataj kaj partiaj medioj.

* * *

Tre interese estas mencii lige kun la supre skizita kunteksto, ke la eventoj en la sovetia bloko havis ankaŭ efikojn sur la komunisman movadon en Azio, precipe en Ĉinio kaj Vjetnamio. En ***norda Vjetna-***

[118] Vd. https://www.youtube.com/watch?v=Q55mQpAGNMc.
[119] Berija estis fizike eliminita la 23an de decembro 1953 laŭ instigo aŭ sub la politika respondeco de Malenkov kaj Ĥruŝĉov. Kvankam lia filo asertis, ke Berija estis mortigita verŝajne jam en junio, kiam li estis arestita, en 2010 la rusoj konfirmis, ke Berija estis mortpafita post jura proceso en la supre indikita dato.
[120] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Pankrác_Prison#Postwar_period, https://de.wikipedia.org/wiki/Jáchymov#20._Jahrhundert; https://en.wikipedia.org/wiki/Leopoldov_Prison.
[121] Kiel ekzemple Eduard Goldstücker, vd. lian aŭtobiografion; http://uran-deutsch-tschechischer-erinnerungsort.info/?page_id=173.
[122] Aparte vd. Kersten H.; Aufstand der Intellektuellen, Stuttgart 1957.

***mio***, pli precize en la provinco, de kiu devenis Ho Ĉi Minh, la gvidanto de la vjetnama komunismo, fine de 1956 ekflamis malkvieto inter kamparanoj, kiuj devis esti briditaj per armeaj trupoj. Nome sub la impreso de la kritiko esprimita dum la XXa kongreso de KPSU kaj ankaŭ de iu parolado de la ĉina komunisma gvidanto Mao Zedong[123] aperis kritiko ankaŭ pri la nordvjetnama politika sistemo. Sed Ho Ĉi Minh, kiu rigardis la XXan partian kongreson en Moskvo kun skeptiko, rifuzis la kritikon kaj riproĉis al Ĥruŝĉov, sen eldiri lian nomon, tro unuflankan traktadon de Stalin, kiu laŭ la nordvjetnama ĉefkomunisto faris gravan kontribuon al la revolucia movado. La eksigo de la ĝenerala sekretario de la nordvjetnama KP, Truoung Ĉinh, restis esence ankaŭ la sola sekvo de la malstalinismgo en tiu lando.[124]

Laŭ Mao, Ĥruŝĉov faris la eraron, ke li kritikis nur la personecon de Stalin kaj la personkulton ĉirkaŭ li, sed evitis kritiki la sistemon kreitan de KPSU mem. En sia „parolado pri cent floroj“ de la 2a de majo 1956 en fermita kunsido de la Plej Supera Ŝtata Konsilio en Pekino Mao alvokis al publika kritika diskutado pri la marksismo inter la popolamasoj, ĉar li opiniis, ke ju pli da floroj (t.e. teoriaj skoloj) ekzistas, des pli firme konstruiĝos la komunismo, ĉar oni volas eviti ideologian unuformecon.[125] Mao kredis, ke la komunisma ideologio estas sufiĉe ankrita en la popolo de Ĉinio kaj do eltenos la ŝtormon de la diverseco de opinioj. Mao estis konvinkata, ke la diverseco de la opinioj helpos eviti amasan kontaŭstaradon kontraŭ la komunismo kaj la komunisma reĝimo.[126] Samtempe Mao subtenis la emancipiĝon de la diversaj komunismaj partioj en orienta Eŭropo, precipe en Jugoslavio, Pollando kaj Hungario. Sovetia armea interveno en Pollando dum la ribelo de 1956 povis esti evitita dank´ al telegramo de Mao el Pekino, sed en la kazo de Hungario tio jam ne plu eblis. Ĉar post la fizika malapero de Stalin en la orienta bloko aperis ideologia vakuo, kelkaj homoj kredis, ke Mao replenigos ĝin. Kiam en Ĉinio mem ekflamis diversaj protestoj kaj ribeloj inter iuj kamparanoj, Mao reagis negative kaj ĉesigis la diskutojn pri la „dialektika materiismo“.

Sed ĉi tiu studo limiĝas al la problemoj de la socialismo kaj komunismo en Eŭropo, precipe orienta. Same mi devas negleki la efikojn de la sekreta parolado de Ĥruŝĉov kaj de la sovetia interveno en Hungario sur la komunismajn partiojn de okcidenta Eŭropo. Estante grandparte stalinismaj, tiuj okcidentaj komunismaj partioj vidis neniun bezonon reformi sin kaj plue kredis je la sankteco de la sovetia komunismo, des pli ke ankaŭ Palmiro Togliatti,[127] la gvidanto de la itala KP, mem ŝovis la kulpon por la krizo de la sovetia sistemo al la personeco de Stalin. Sed la sovetia interveno en Hungario kaŭzis veran ŝokon ĉe la publiko opinio en Okcidento, kiu tuŝis ankaŭ la komunismajn partiojn mem, kiujn forlasis centmiloj da membroj, precipe en ***Francio*** kaj ***Italio***, kie tiu membraro estis profunde seniluziigita pri Sovetunio kaj la sovetia komunismo. Dum en la orienta bloko eblis nur flustre kaj kaŝe paroli pri tiuj eventoj, en Okcidento okazis vigla publika diskuto pri la karaktero de la sovetia komunismo, la intencoj kaj ambicioj de Moskvo, aparte ankaŭ en la komunismaj medioj mem.

La internacia krizo de la komunismo eĉ etendiĝis ĝis ***Brazilo***, kie okazis larĝa gazetara traktado de la eventoj en Hungario. Sed laŭ ordono de la komunisma partio de Brazilo tiu diskuto estis aprubte ĉesigita en februaro 1957. Kiam la redakcioj protestis, 20 kunlaborantoj estis maldungitaj kaj la oficejoj de la redakcioj estis okupitaj de partiaj funkciuloj. Unu el la membroj de la KP-prezidio proklamis sian eksiĝon kaj fondis novan organizaĵon, al kiu krom komunistoj kaj socialdemokratoj aliĝis ankaŭ naciistoj. Ĉi tiu nova organizaĵo estis unue kontraŭbatalita de partiestro Prestea, kiu fifamiĝis pro sia aparteno al iu gerilo en la 20aj jaroj, sed poste tamen apogita de li, tiel ke la stalinisma KP de Brazilo vole-nevole pli kaj pli disfalis.

### Reformoj kaj restalinismiĝo en la orienta bloko en la tempo de Ĥruŝĉov

La sovetia interveno en Hungario ne nur skuis la okcidentan opinion pri Sovetunio kaj la komunismo, sed kaŭzis ankaŭ viglajn diskutojn en la altlernejoj kaj universitatoj de Sovetunio mem. Anstataŭ toleri tiujn diskutojn, Ĥruŝĉov decidis minaci la studentojn ekzemple per jena admono: „Se vi estas malkontentaj pri la registaro, vi povas forlasi la universitaton kaj iri labori. En la kolĥozoj de Azio kaj en la

---

123 Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Mao_Zedong.
124 Pri Ho Ĉi Minh vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ho_Chi_Minh kaj http://www.planlingvoj.ch/Vjetnamio_HoChiMinh.pdf.
125 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Hundert-Blumen-Bewegung.
126 Vd. http://www.spiegel.de/spiegel/print/d-41759842.html.
127 Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Palmiro_Togliatti.

montaraj ŝaktoj ni havas sufiĉe da laborlokoj…!“ Tio eĉ ne estis malplenaj vortoj. En Leningrado oni efektive forpelis 4500 studentojn de la altlernejoj kaj universitatoj. Ĉirkaŭ 3000 studentoj el Moskvo, Leningrado kaj Kievo estis arestitaj, puŝitaj antaŭ tribunaloj, kondamnitaj pro „ŝtataj krimoj“ kaj senditaj al labortendaroj, precipe al Potma 7 en Mordvinio.

Krom tio, Ĥruŝĉov kunvokis kelkajn sovetiajn verkistojn, al kiuj li klarigis, ke li ne hezitos mortpafigi ilin, se tio estas necesa por eviti revolucion en Sovetunio laŭ la hungara modelo. Tiu sinteno kondukis la alvokojn de Ĥruŝĉov al la popolo kunlabori por fari Sovetunion pli bona al la totala absurdo. Kiel Valentin Falin rimarkigis en sia libro „Konfliktoj en la Kremlo“, la diskutoj en la partio kaj gazetaro fariĝis efemeraj kaj nepetitaj ideoj ´el la popolo´ estis ignoritaj, precipe, se ili ne kongruis kun tiuj de la partia ĉefo, kiu volis mem decidi la aferojn.[128]

En januaro 1957 Ĥruŝĉov komencis mildigi kelkajn akuzojn kontraŭ Stalin, kiujn li prezentis en sia sekreta parolado dum la XXa partia kongreso, kaj rekomencis laŭdi la forpasintan sovetian gvidanton kiel „modelan komuniston“ k.s. Precipe li gloris lian talenton neniigi malamikojn kaj konfesis, ke ankaŭ li mem pretas apliki perforton por „savi“ la verkon de Lenin. La anstataŭanta ĝenerala prokuroro Kudrjavcev ĵuris, ke oni reenkondukos la stalinismajn metodojn se necese. Rilate la teorion de la diktaturo de la proletaro Stalin estis rehonorigita kiel klasikulo de la marksismo-leninismo. Reevoluante de Paŭlo al Saŭlo kaj en siaj koro kaj cerbo restante klasika stalinisto, Ĥruŝĉov vole-nevole ŝanĝiĝis de la militema kontraŭstalinisto al duona praviganto de Stalin. Ĥruŝĉov kaj lia KPSU devis inventi la senkulpiĝon de la personkulto, ĉar sen tio ili estus perdintaj la plankon, sur kiu ili staris, kaj malgraŭ la rehonorigo de Staln ili plue devis konservi tiun senkulpiĝon, ĉar sen tio ili estus perdintaj la legitimecon de sia potenco.

Samtempe oni fortigis la premon kontraŭ la gazetaro kaj kulturo. En junio 1957 13 redaktoroj de la revuo *Problemoj de la historio* estis disciplinitaj, ĉar ili kritikis la erarojn de Stalin. La redaktoroj devis promesi, ke ili konsideras la verkon de Stalin „decida“. Post kiam ankaŭ iu grava filozofia gazeto kritike traktis la internajn kontraŭdirojn de Sovetunio kaj okupiĝis pri la procezoj en la okcidenta mondo, la redaktoraro estis elŝanĝita.

Akompane al tiuj reprezalioj, oni rekomencis rusigi la naciajn malplimultojn de Sovetunio kaj revizii ĝian historion. La naciliberigan batalon de la kaŭkazaj popoloj kontraŭ la carismo oni kondamnis kiel „reakcian entreprenon“. En 1959 la rusa lingvo estis proklamita kiel deviga lingvo por ĉiuj sovetianoj.

Gravajn ĉikanojn devis elteni ankaŭ la sovetia verkisto Boris Pasternak, aŭtoro de la verko „doktoro Ŝivago“.  Ĉi tiu romano, kiu estis finverkita en 1956, ne povis esti publikigita en Sovetunio, pro laŭdire kritika prezento de la bolŝevisma revolucio. La unua ruslingva eldono de la libro aperis en aŭgusto 1958 en Nederlando, ĉar la fizika apero de la originala versio estis la kondiĉo por kandidatiĝi por la nobel-premio por literaturo, kiun Pasternak ricevis en tiu jaro.[129] Sen mencii iliajn nomojn, Pasternak faris diferencon inter Lenin, la simbolo de la tiranio, kaj Trockij, kiu ŝajnis esti pli pozitiva figuro, kvankam la sama mortiga brutaleco ne estis fremda al li. En la romano Trockij aperis en la formo de Strelnikov, kiu eĉ laŭaspekte similis al Trockij en la usona filmo „doktoro Ĵivago“, kiu estis produktita en 1965 kun la aktoro Omar Ŝarif en Finnlando kaj Hispanio.[130] En Sovetunio la libro „doktoro Ĵivago“ de Pasternak sekrete cirkuladis kaj kaŭzis kaŝajn diskutojn.

La partia gazetaro skribis pri Pasternak, ke li estas „pli malbona ol porko“ kaj iuj partiaj gvidantoj eĉ postulis lian elpelon el Sovetunio. La partia premo kontraŭ li kaŭzis, ke li devis rifuzi la akcepton de la nobelpremio, krom tio li estis ekskludita el la sovetia verkista asocio. Pasternak, kiu rifuzis forlasi sian patrujon, rapide malsaniĝis kaj forpasis en 1960 pro korinfarkto. Lia enterigo estis akompanata de publika amasmanifestacio, en kiu partoprenis verkistoj, studentoj kaj laboristoj. En Ruslando verkisto estis sinonimo de (politika) batalanto, de reprezentanto kaj konservanto de la vero, de spirita gvidanto. Tial, en Ruslando la tiranoj konsideris la verkistojn iliaj plej teruraj malamikoj, kiujn ili ne hezitis malliberigi, sendi en la gulagon aŭ deklari mensmalsanaj.

---

[128] Vd. V. Falin: Konflikte im Kreml. 1999, p. 51.
[129] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Doktor_Schiwago_(Roman).
[130] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Doktor_Schiwago_(1965).

Aliaj famaj kritikaj rusaj verkistoj de tiu periodo nomiĝis Vasilij Aksjonov, Andrej Voznesenskij, Evgenij Evtuŝenko, Aleksandr Ginsburg. Ĉiuj tiuj verkistoj rifuzis percepti la homon kiel ŝraŭbon de maŝino, kiu estas gvidita kaj kontrolita de unu centra instanco. La perforton ili konsideris kontraŭnatura kaj la mensogon malproduktiva. Evtuŝenko, aŭtoro de la fama poemo „Babij Jar“ (1961), per kiu li avertis pri antisemitismaj tendencoj en Sovetunio, estis bojkotita de la partio, kiu ne nur neis la ekziston de tiaj tendencoj, sed ankaŭ malŝatis la aŭtoron, kiun oni kalumniis kiel perfidulon de la lando, ĉar li publikigis sian biografion en Parizo. La novaĵo ĉe tiuj verkistoj estis, ke ili ne nur traktis aktualajn problemojn de la sovetia vivo, sed ankaŭ utiligis lingvaĵon, kiu draste diferencis de la abstrakta lingvo de la sovetia partia burokratio, kiun la homoj jam ne plu eltenis. Poetumado fariĝis, kiel Voznesenskij klarigis, baza nutraĵo kiel pano. En 1963 aperis en Sovetunio 2236 poeziaj volumoj kun eldonkvanto de 90 milionoj da ekzempleroj. Miloj da homoj kolektiĝis dum iuj „tagoj de la poezio“, kaj la junaj kaj maljunaj verkistoj laŭtlegis siajn verkaĵojn antaŭ centoj kaj miloj da homoj, kiuj senspire kaj kun grandega interesiĝo aŭskultis ilin. La eldono de cent mil ekzempleroj de la revuo *Nova mondo*, en kiu aperis iu teksto de Aleksandr Solĵenicyn pri la vivo en la gulago, estis forvenditaj en la daŭro de nur kelkaj horoj. Sovetunio travivis spiritan revolucion, kiu trabatis la psikologian potencon de la sistemo.

Ankaŭ Vasilij Grossman (judo) ne povis aperigi en Sovetunio sian Stalingrad-romanon „Vivo kaj sorto“. Unuafoje tiu verko aperis ruslingve en Svislando en 1980, germanlingve en 1984. Sed la aŭtoro jam mortis en 1964, post kiam li ankoraŭ devis travivi, kiel la sovetiaj organoj traserĉis lian domon kaj konfiskis ĉiujn materialojn lige kun tiu verko.

La degela tempo en la kulturo kaj la liberalisma kurso en la arto estis finitaj, kiam Ĥruŝĉov en decembro 1962 dum vizito de ekspozicio de avangardismaj pentristoj en la moskva Maneĝo krude primokis kaj kondamnis ilian verkadon kaj kiam en marto 1963 dum renkontiĝo de la partiaj gvidantoj kun verkistoj, artistoj kaj intelektuloj en Moskvo li postulis de ili strikte respekti la partian linion.[131]

Krom la verkistoj, ekde ĉirkaŭ 1960 elpaŝis en Sovetunio novaj opoziciaj grupoj precipe inter sciencistoj kaj la teknikista inteligencio, inter kiuj troviĝis ankaŭ membroj de la komunisma partio kaj komsomolo mem. En la 60aj jaroj fortiĝis ankaŭ la rezisto flanke de diversaj religiaj grupoj kontraŭ ilia persekutado, precipe inter baptistoj, katolikoj de la bizanca rito kaj ortodoksaj intelektuloj. Inter la pli konataj viktimoj de tiu kategorio estis ekzemple Anatolij Levitin-Krasnov (nask. 1915), kiu famiĝis pro siaj publikigoj pri la rusortodoksa eklezio,[132] kaj Boris Talantov (nask. 1901), kiu aperigis artikolojn pri religiaj temoj kaj mortis en 1971 en la malliberejo. La milito, kiun la stalinistoj gvidis kontraŭ la intelektuloj en ĉiuj landoj, kiujn ili regadis, estis senprecedenca en la historio kaj reprezentas apartan kategorion de krimoj en si mem.

Ankaŭ en la ekstera politiko Ĥruŝĉov reprenis kelkajn de siaj pli fruaj cedoj. En Prago li neis la eblon de aparta vojo al la komunismo, kaj en Sofio li klarigis, ke eblas nur unu sola formo de la socialismo. En alianceco kun Pekino Moskvo revarmigis la malnovan skisman konflikton kun Jugoslavio kaj nomis la kondamnon de la jugoslavia KP de junio 1948 fare de Kominform „esence prava“. En Ĉeĥoslovakio Novotný adaptis sin laŭ la aktuala vento el Moskvo kaj aliĝis al la ĉasado kontraŭ la jugoslavia „reviziismo”. En Hungario Imre Nagy estis denuncita kiel perfidulo, kiu celis detrui la unuecon de la socialisma bloko.

Sed la tempoj por Ĥruŝĉov estis malfacilaj, ĉar la ultra-stalinismaj fortoj en la partio volis venĝi lin. La 18an de junio 1957 okazis puĉo kontraŭ Ĥruŝĉov en la politburoo (kiu nun nomiĝis prezidio), kie Molotov celis mem transpreni la povon. Sed Ĥruŝĉov malagnoskis la koncernan voĉdonon kaj postulis kunvoki la plenkunsidon de la Centra Komitato por decidi la aferon. Anstataŭ Ĥruŝĉov estis eliminitaj Molotov, Malenkov kaj Kaganoviĉ, la ĉefaj rivaloj de Ĥruŝĉov, kiel membroj de la prezidio, dum Mikojan, Suslov kaj Kiriĉenko, kiuj apogis sian ĉefon, povis resti. En la sekvo Ĥruŝĉov purigis kaj reduktis la partian aparaton, kio estis ligata kun la forigo de ĉiuj kontraŭuloj. Eĉ marŝalo Ĵukov, kiu kondutis kvazaŭ kiel Napoleono, devis foriri kaj perdis sian oficon kiel ministro pri defendo. Tiel, en marto 1958 Ĥruŝĉov transprenis ankaŭ la oficon de la ĉefministro, kiun antaŭe okupis Malenkov kaj Bulganin. Do, la „kolektiva gvidado“ fariĝis eksa afero. La tuta povo koncentriĝis nun en la manoj de Ĥruŝĉov, kiu fariĝis la ĉefa potenculo de la partio kaj ŝtato samtempe. Per tio denove kreskis la danĝero de la amasiĝo

[131] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Manege_Affair; https://www.zeit.de/1963/13/auseinandersetzung-mit-der-stalin-zeit/komplettansicht, https://vakin.livejournal.com/1454396.html.
[132] Vd. https://www.tandfonline.com/doi/pdf/10.1080/09637499108431520.

de la potenco en la manoj de unuopa persono kaj de la personkulto. Sed ĉar Ĥruŝĉov detruis en sia parolado dum la XXa partia kongreso la principon de la senerareco de la komunisma partio, li mem limigis sian realan potencon, kio diferencigis lin de la potenco de Stalin, kiu estis absoluta.

En 1957 okazis en Sovetunio kelkaj reformoj en la administrado de la industrio kaj en la agrikulturo, sed ankaŭ sur la kampoj de la justico kaj klerigo. En la politikaj kaj ekonomiaj reformoj klare senteblis la influoj de Jugoslavio, Pollando kaj Hungario. Precipe la agrikultura politiko de Stalin evidentigis katastrofajn rezultojn. Sed kun tiuj reformitaj sistemoj aperis ankaŭ novaj problemoj kaj kontraŭdiroj, kiuj ne povas esti traktataj ĉi tie.

Ĉe la ideologia fronto oni diskutis la egalan traktadon de la ŝtata kaj kooperativa (kolĥoza) posedo sur egala nivelo kaj la staton de la marksismo sub Stalin, kiu povis esti karakterizata kiel misformita vulgar-marksismo. Malĝustaj oni trovis ankaŭ la aksiomojn de la akcelo de la klasbatalo dum la konstruado de la socialismo kaj de la ĉirkaŭado de Sovetunio de kapitalismaj malamikoj. Kvankam la malstalinismiga kampanjo estis daŭrigita, dum la XXIa eksterordinara partia kongreso (januaro/februaro 1959) en Moskvo Ĥruŝĉov rehonorigis Stalinon kiel ĉefan gvidanton de la „sukcesa sovetia komunismo dum multaj jaroj“ kaj proklamis la plenan kaj definitivan venkon de la socialismo en Sovetunio. Laŭ Ĥruŝĉov oni komencis kredi en Sovetunio, ke la restaŭro de la kapitalismo en Sovetunio ne plu eblos. La kvinjara plano estis haltigita favore al la enkonduko de sepjara plano ĝis 1965. Kiel ĉefa celo de la ekonomio estis proklamite, ke en 1970 Usono estos preterpasita laŭ po-persona produktado de konsumvaroj.

Malgraŭ ŝajnaj liberaligoj, de kiuj povis profiti ankaŭ la verkistoj, daŭre ŝvelis malkontento en la lando. En diversaj lokoj kiel en Novorossijsk eksplodis protestoj kontraŭ Ĥruŝĉov, kaj en Torĵok (regiono de Kalinin/Tver) strikis laboristoj, kiuj postulis pli altajn salajrojn. La plej granda ribelo de tiu tempo okazis en Temirtaŭ (Kazaĥio), kie 3000 gejunuloj, kiuj estis mobilizitaj de la Komsomolo, protestis kontraŭ la laborkondiĉoj sur iu konstruejo. Dum armeaj soldatoj rifuzis pafi kontraŭ la junulojn, laŭ neoficiala raporto trupoj de la ŝtata sekureco pafis kontraŭ la homojn, inter kiuj 90 pereis.

* * *

Kvankam la gvidantoj de la komunisma partio de ***Ĉeĥoslovakio*** estis informitaj pri la sovetia kritiko kontraŭ Stalin, Novotný estis – kiel Ulbricht, Rákosi kaj aliaj – verŝajne malagrable surprizitaj pri la „sekreta parolado” de Ĥruŝĉov. Certe ili baldaŭ eksciis la tutan tekston de la parolado. Novotný interpretis lian paroladon tiel, ke la kritiko trafis ĉefe la personkulton, sed ne la socialismon en si mem. Do, por eviti endanĝerigon de la propraj persono kaj potenco, Novotný konkludis, ke en Ĉeĥoslovakio neniam ekzistis personkulto, sed maksimume iugrada burokratiigo de la partio – ĉi tiun problemon oni povos solvi per pli forta demokratiigo de la organoj. La kulpon por la eraroj de la eraroj de la pasinteco kaj de la personkulto li simple donis al Gottwald, Zápotocky kaj Slánský, kiun li komparis kun Berija. Laŭ Novotný necesis praktike nur elŝanĝi kelkajn funkciulojn en la ŝtata sekureco kaj rehonorigi kelkajn viktimojn aŭ revizii iliajn punojn. Kondamni la reprezaliojn kontraŭ la popolo ne venis al li kiel ideo. En la komenco, la sekreta parolado de Ĥruŝĉov ne estis konata al la partia publiko nek al la larĝa publiko de la lando mem, kaj laŭ la intenco de Novotný ĝi ankaŭ ne devis esti vaste diskonigita. La partiaj gvidantoj opiniis, ke la tikla diskuto restu limigita al la interno de la partio. Tio montriĝis malfacila, ĉar oni pli kaj pli komprenis, ke la diskuto koncernas kaj interesas ankaŭ vastajn popolajn tavolojn. Ĉio tio maltrankviligis la partianojn, kiuj ne povis haltigi la debatojn aŭ eviti, ke ĝi atingu la socion, des pli ke pli kaj pli da detaloj de la parolado enpenetris la popolon. Ili originis de ĉeĥoslovakaj studentoj kaj civitanoj, kiuj laboris en Sovetunio kaj estis informitaj de siaj sovetiaj konatoj kaj amikoj pri la parolado de Ĥruŝĉov, kiu estis malkaŝita al ĉiuj bazaj organizaĵoj de KPSU kaj en iuj kazoj eĉ al nepartianoj. Krom tio, fragmentoj kaj poste la tuta teksto pli kaj pli atingis ankaŭ aliajn socialismajn landojn, eĉ la okcidentan gazetaron, kiu komencis raporti pri ĝi. Ankaŭ okcidentaj radiostacioj, kiuj disaŭdigis elsendojn en la ĉeĥa lingvo, publikigis kaj analizis la tekston. Homoj, kiuj aŭdis aŭ legis ĝin, estis ofte pli bone informitaj ol la partiaj funkciuloj mem, kiuj ne kapablis respondi ĉi-koncernajn demandojn el la publiko okaze de partiaj kunvenoj kaj postulis esti pli bone informitaj de supre. En ĉi tiu embarasa situacio, la gvidantoj de la ĉeĥoslovaka KP decidis eldoni la sekretan paroladon de Ĥruŝĉov kiel sekretan broŝuron, kiu tamen devis esti laŭtlegita dum ĉiuj partiaj kunvenoj en la tuta respubliko. Per tio oni kvazaŭ oficiale konfirmis la krimojn de Stalin, kio kaŭzis enorman ŝokon en la socio. Precipe la maljunaj komunistoj apenaŭ povis kaŝi siajn konsterniĝon kaj doloron. Ilia ĝisnuna mondo, kiu baziĝis je la fido kaj admiro de Sovetunio, je la lojaleco al Stalin kaj je la kredo, ke la socialismo estas pli justa ol la kapitalismo, estis detruita. Post la laŭtlegado de la teksto leviĝis diversaj gravaj demandoj kial kaj kiel eblis, ke la gvidantoj de la polit-

buroo kaj aparte Ĥruŝĉov mem ne kritikis la aferojn ankoraŭ dum la vivotempo de Stalin – dum la XIXa partia kongreso ili ankoraŭ gloris Stalinon kiel „genion”. Kiel io tia povis okazi en la socialismo, kie unu sola persono povis decidi la sorton de milionoj? Kiuj garantioj ekzistas, ke tio neniam plu ripetiĝos? Kiujn sekvojn tio havas por la partio kaj la tuta lando? Ktp. Ĝenerale oni malaprobis la konkludojn de la propra KP, kiu asertis, ke en Ĉeĥoslovakio ne ekzistis personkulto. Oni postulis, ke la partio donu kredindajn klarigojn pri tiu temo. La partio estis kritikita, ke ĝi izoliĝis rilate al la bazo kaj popolo. La regantaj komunistoj defendis sin per la klarigo, ke ili devas respondeci por ĉiu stultaĵo, ĉar la partiaj organoj decidas sur ĉiuj kampoj, anstataŭ ŝtataj organoj.

Precipe en sciencaj kaj kulturaj medioj de la partio la diskuto kondukis al la akcepto de rezolucioj, per kiuj la partiaj organoj estis alvokitaj klarigi la respondecon pri la misinformado, kiun ili praktikis dum la stalina tempo. La partiaj organizaĵoj eĉ postulis kunvoki eksterordinaran partian kongreson, kiu devis trakti la konkludojn kaj sekvojn por la ĉeĥoslovaka KP. Laŭ la statutoj tia kongreso devis esti kunvokita, se unu triono de la bazaj partiaj organizaĵoj deziras tion. Sed la partiaj gvidantoj reagis kun ĉagreno pri tiaj postuloj. Novotný kaj lia grupo reagis per kontraŭatako: Postuli eksterordinaran partian kongreson ili proklamis „kontraŭ-revolucie” kaj kondamnis kiel „provokon de eksterlandaj spionaj servoj kaj ĉeĥoslovakaj reakciuloj”, kiuj celas „kaŭzi kaoson en la lando”. La ŝtata sekureco trovis pruvojn, ke la tumulto en la partio estis provokita de „imperiismaj agentoj”. La postulon oni interpretis kiel esprimon de la malfido pri la oficantaj gvidantoj, kiuj minacis ĉiujn, kiuj ne kapablas kritiki sin mem, per eksigo el la partio kaj per malfondo de la partiaj organizaĵoj (kio ankaŭ vere okazis). En tio ili atentigis pri ribelaj tendencoj en Pollando kaj Hungario por timigi la homojn pri similaj scenaroj por Ĉeĥoslovako. Tiel, la plimulto de la partiaj organizaĵoj povis esti devigita rezigni pri tiu postulo. Tamen, la partio devis fari cedojn kaj konfesojn. Ekzemple oni decidis starigi specialan komisionon, kiu devis ekzameni la politikajn procezojn. Sed baldaŭ evidentiĝis, ke la partiaj gvidantoj klopodis limigi la diskuton al teknikaj aspektoj, ĉar ili celis eviti kritikan politikan debaton. Novotný ricevis subtenon de la „frataj” partioj en aliaj socialismaj landoj, inkluzive la sovetian, kiuj postulis ĉesigi la kampanjon kontraŭ Stalin. La kritikan debaton oni definitive ĉesigis, kiam montriĝis, ke la ribeloj en Pollando kaj Hungario de la jaro 1956 povis esti sufokitaj. Kvankam Ĥruŝĉov estis la nova ĉefo de la KP en Sovetunio, lia nova politiko ankoraŭ ne venkis en la ceteraj landoj de la bloko, kiuj estis regitaj de konservativaj elitoj. Por eviti similajn scenarojn kiel en Hungario kaj Pollando, en Ĉeĥoslovakio oni nuligis aŭ interrompis ĉiujn liberaligajn reformprocezojn; anstataŭ tio denove ekregis la ortodoksa reĝimo de la stalinisma disciplino kaj la ideologia rigideco. La monopolo de la potenco de la partio kaj ŝtata sekureco estis restarigita. Provoj revizii la burokratian modelon de la socialismo post la XXa kongreso de la sovetia KP estis retropuŝitaj. Sed la konscio de la ĉeĥoslovakaj kaj alilandaj komunistoj pri la krimoj, eraroj kaj fuŝoj de la stalinismo ne plu povis esti elpelita el la cerboj de la homoj. Reiri al la stalinismo, kiel kelkaj ortodoksuloj deziris, ne plu estis pensebla. La konflikto povis esti sole prokrastita por subpremi la malkontenton dum ioma tempo.

Analizante la paroladojn de Ĥruŝĉov dum la XXa kongreso kaj poste, oni klare vidis, ke la sovetia gvidanto ne kapablis nomi la kaŭzojn por la eraroj kaj proponi solvojn por eviti ilian ripetiĝon. Certe, ankaŭ en Ĉeĥoslovakio oni komprenis, ke Ĥruŝĉov ne havis la kuraĝon fari radikalajn politikajn kaj ekonomiajn reformojn, kvankam li probable intencis kaj deziris fari la reĝimon iom pli milda. Sed li volis ricevi la subtenon de la partia aparato, kiun li ne atingis, ĉar la konservativuloj vidis multajn danĝerojn, se oni komencas reformi la sistemon, kiun ili ne volis ŝanĝi, ĉar de ĝi dependis ilia potenco, privilegioj, bonfarto, vivo. Dum la grupo ĉirkaŭ Novotný klopodis eviti ĉiujn kritikajn publikajn diskutojn, la XXa kongreso de la sovetia KP kaj precipe la sensacia sekreta parolado de Ĥruŝĉov, kiun li prezentis dum tiu okazo, signifis la praktikan komencon de la sekva batalo kontraŭ la stalinismo kaj por pli humana socialismo, kian konstrui oni celis en Ĉeĥoslovakio, sed ankaŭ en Hungario kaj Pollando post februaro 1956.[133]

Ĉar la grupo ĉirkaŭ Novotný sufokis ĉiajn publikajn debatojn, la diskutoj dume limiĝis precipe al la intelekta sfero. Inter la kritikistoj la verkisto Ivan Sviták atentigis pri la malkongruo de la propagando kun la scienco, la filozofo Bartos levis la demandon de la dubindeco de la dialektika leĝo de la „negacio de la negacio” kaj la fiziologo Bures elpaŝis kontraŭ la senkritika transpreno de sovetiaj teorioj. Taŭgan okazon por reagi al la decidoj de la XXa kongreso de KPSU kaj la sekreta parolado de Ĥruŝ-

[133] Laŭ la kontribuaĵo de Jiří Pelikán en la libro eldonita de Medwedew, Havemann, 1970.

ĉov por kritiki la situacion en la propra lando ofertis la dua kongreso de la ĉeĥoslovakaj verkistoj de aprilo 1956.

La leviĝo de la verkistoj estis akompanita de la protestoj de studentoj, kiuj postulis plibonigi siajn vivkondiĉojn kaj esprimis kritikon kontraŭ la premo en la instruado. En la universitatoj kaj altlernejoj de la landoj estis publikigitaj rezolucioj, kiuj atentigis pri iliaj deziroj. De la registaro kaj partio ili postulis, ke la ĉeĥoslovakaj politikistoj respektu la decidojn de la XXa kongreso de KPSU, kion ili evidente ne faris. Krom tio, la studentoj volis, ke la gazetaro raportu objektive pri la vivo en Ĉeĥoslovakio kaj eksterlando, ke oni ĉesigu disvastigi mensogojn pri la Okcidento, ke oni haltigu la ĝenadon de eksterlandaj radioelsendoj kaj ke oni importu gazetojn, librojn kaj filmojn el okcidentaj landoj. La studentoj deziris vojaĝi al eksterlando, konatiĝi kun aliaj politikaj filozofioj kaj opiniis malbone, ke oni foruzas paperon por propagandaj celoj kaj kopias la tradiciojn de Sovetunio, kiuj estas fremdaj al Ĉeĥoslovakio. Sed respondojn de la partiaj kaj registaraj instancoj la studentoj vane atendis. La ministro pri klerigo, František Kahuda, ne aperis en studentoj kunvenoj, kvankam li estis invitita de la organizantoj. En Prago kaj Bratislavo studentoj marŝadis surstrate kaj montris afiŝojn kaj simbolojn de la subpremado de la demokratio kaj libereco. La reago de la furiozaj regantaj potenculoj venis senpokraste: Novotný kondamnis la protestantajn studentojm kiel „reakciajn elementojn, kiuj misuzas la universitatojn" kaj postulis „likvidi tiajn provojn".

Ĉio ĉi ne malhelpis la intelektulojn okupiĝi pri aktualaj temoj en la gazetoj kaj revuoj. Ekzemple Milan Jungmann skribis en *Literárni Noviny*, ke la verkistoj kunsideras la elpaŝojn de la partiaj politikistoj kiel „punpredikon" kontraŭ la ribelemaj aŭtoroj kaj postulis krei prosperan etoson por diskutoj, kiel en Sovetunio. Sed li estis unu el la malmultaj vokantoj en la dezerto, ĉar lia slovaka kolego Štefan Drug lamentis en *Kulturní život*, ke „personecoj kun propra opinio ĉe ni komplete elmortis". Ondrej Pavlík, eksa prezidanto de la slovaka Akademio de la Sciencoj, iama vicministro pri edukado kaj universitata profesoro en Bratislavo, estis eksigita el la partio, ĉar li pledis por reformo de la lerneja sistemo. Al Zápotocky restis nur reagi per plumpaj admonoj pri la „socialisma moralo" kaj la „gvida rolo de la partio kaj de la laborista klaso". Do, anstataŭ batali kontraŭ la stalinismo, en Ĉeĥoslovakio oni agis kontraŭ la „reviziismo" kaj la „burĝa" slovaka naciismo inter slovakaj komunistoj kaj subpremis kaj silentigis la kritikan junularon kaj intelektularon per policaj metodoj. Ĉiu suspektinda grupo devis enkalkuli la riskon de reprezalioj. La importo de eksterlandaj literaturo kaj kulturrevuoj restis malpermesata.

Ĉar post la parolado de Palmiro Togliatti, kiu kredis, ke pri la krizo de la sistemo kulpis Stalin persone, Nikita Ĥruŝĉov adoptis tiun ideon kaj opiniis, ke la stalinisman sistemon mem oni ne devas reformi, sed maksimume ŝanĝi ĝian regadoformon, kio ja estas granda diferenco. Ĉi tiu naiva konvinko kondukis al rapida restalinismiĝo de la malstalinismigita politika kaj ekonomia sistemo, kun fatalaj sekvoj, kiuj baldaŭ evidentigis gravajn problemojn en la ekonomio, kiu draste malboniĝis.

Kvankam en Ĉeĥoslovakio en la dua duono de la 50aj jaroj la kresko de la industria produktado kaj de la popola enspezo estis sufiĉe alta, la efikeco de la ekonomio tamen rapide malfortiĝis kaj la misproporcioj en la produktado fariĝis evidentaj. Mankis fakuloj, kaj la rezervo de liberaj laborfortoj elĉerpiĝis, ĉar la popolo ne sufiĉe rapide kreskis. La produktaj rimedoj estis senutile foruzitaj, la teknologia progreso estis tro malrapida, la entreprenoj estis eksmodaj, kaj la tuta produktada strukturo, kiu postulis pli kaj pli da investoj, kiuj malkreskis de jaro al jaro, evoluis en la malĝusta direkto. Plej draste tiu situacio estis sentebla en la agrikulturo, kiu plene kolektiviĝis. Multaj agrikulturaj produktoj devis esti importitaj. Pli kaj pli da varoj ne estis riceveblaj, aliaj produktoj ne konformis al la bezono de la konsumantoj, ilia kvalito malboniĝis kaj multaj eksportvaroj ne povis konkurenci sur la okcidentaj merkatoj. La prezoj de la varoj estis ŝtate fiksitaj, artefaritaj kaj ofte ne realismaj. La homoj havis tro da kuranta mono el siaj salajroj, sed ili ne povis aĉeti per ĝi kion ili volis aŭ bezonis. Por riparoj oni devis atendi dum monatoj. Ege mankis liberaj kaj novaj loĝejoj, kio faris la situacion por junaj geedzoj neeltenebla. Ĉar mankis eksterlanda valuto, turistoj povis ŝanĝi nur malmulte da mono por vojaĝi al fremdaj landoj, kie ili devis draste ŝpari siajn monrimedojn kaj devis vivi tre modere. Por plibonigi la situacion, komence de 1957 la partiaj gvidantoj en Prago decidis reorganizi la planadon de la ekonomio, ĉar en Sovetunio Ĥruŝĉov venis al la konkludo, ke la kaŭzoj de la malbona ekonomia evoluo estas serĉendaj antaŭ ĉio en la sfero de la planado kaj gvidado de la ekonomio, kiuj estis tro centre organizitaj kaj do devis esti malcentralizitaj por malstreĉi la situacion. Kutime Prago sklave imitis ĉion, kion Moskvo faris, sed pli malpli

frue tio kondukis en sakstraton. Kiel en la politiko, ankaŭ en la ekonomio la kaŭzoj de la problemoj ne troviĝis unuavice en la maniero de la regado, sed en la sistemo mem.[134]

Malgraŭ tiuj reformoj, kiuj estis pure kosmetikaj, la disbatado de la hungara ribelo ŝajnis signifi ne nur la finon de la kontraŭstalinisma batalo, sed ankaŭ de la orienteŭropa revolucio en si mem. La tendenco al restalinismigo estis forte sentebla en la socialismaj landoj, antaŭ ĉio en Sovetunio mem.

* * *

En ***Pollando*** en januaro 1957 du profesoroj, Oskar Lange kaj Czesław Bobrowski, membroj de la Ekonomia Konsilio ĉe la Konsilio de ministroj, ellaboris novan ekonomian modelon, kiu celis aŭtonoman administradon de la industrio. Laŭ tiu plano la ekonomio devis esti centre planita sed malcentre administrita. La entreprenoj devis fariĝi memstaraj kaj esti gvidataj de laboristaj konsilioj. La principoj de la konkurenco kaj profitdono devis ludi pli gravan rolon. La revuo *Po prostu* varbis por tiu modelo, kiu montris trajtojn de la jugoslavia modelo kaj celis forigi la burokratecon kaj akceli la demokratiigon de la ekonomia vivo. Alia ekonomikisto, Edward Lipiński, kritikis la stalinisman ordon en la pezindustrio kaj observis, ke la kapitalismo intertempe tamen ŝanĝiĝis kaj en multaj landoj solvis la problemon de la malriĉeco kiel amasa fenomeno. Per ĉi tiu sensacia konstato, la ĝis nun defendita sociekonomia pravigo de la komunismo aŭ socialismo, kiu pretendis solvi ĉi tiun problemon, komplete perdis sian sencon.

Por la parlamentaj elektoj de januaro 1957 rajtis kandidatiĝi ankaŭ homoj proksimaj al la eklezio, de kiuj ok estis elektitaj, tiel ke en la Sejmo aperis malgranda grupo de opoziciuloj. La pola komunisma partio rezignis pri parto de sia monopolo pri la junulara organizo; la disfalanta pola komunisma junulara asocio decidis malfondi sin kaj estis anstataŭigita per la fondo de Socialisma Junulara Ligo. Krom tio rapide disvastiĝis skoltoj kaj kamparanaj gejunuloj. Sed Gomułka, al kiu tiu nova diverseco tute ne plaĉis, volis limigi la plurecon de la pola junularo. En Pollando reaperis verkaĵoj de Rosa Luxemburg, Arthur Koestler kaj Isaac Deutscher, kiuj antaŭe estis subpremitaj. La revuoj *Po prostu* kaj *Nowa kultura* esploris la stalinisman teroron kaj postulis garantiojn, ke ĝi ne ripetiĝu. La estraro de la pola ĵurnalista asocio postulis de Gomułka la rajton de la esprimo de la libera opinio. La sociologio estis reestablita en la scienco. Profesoroj, kiuj antaŭe estis malpermesataj, denove rajtis prelegi en la universitatoj, ekzemple Roman Ingarden kaj Władysław Tatarkiewicz. Provante savi la socialismon, la fama pola sociologo Leszek Kołakowski klopodis spirite kaj morale refreŝigi la marksismon per objektivaj kritikaj debatoj, kvankam liaj kontraŭuloj en la partio interpretis tiujn aktivecojn provo restaŭri la kapitalismon. Kołakowski akuzis la stalinistojn, ke ili limigis la nocion de la komunismo al (politika) potenco kaj (ekonomia) produktado kaj neglektis ĝiajn intelektajn kaj moralajn valorojn. Li rifuzis la strategion de la nura taktiko kaj avertis, ke komunisto, kiu faras krimon, estas krimulo, eĉ se li kredas, ke per tiu sinteno li utilas al la partio aŭ al la ´historia neceso´. Lia koncepto de la „Nova maldekstro" antaŭvidis programon, kiu batalas kaj kontraŭ la „malnova dekstro" (burĝa konservatismo) kaj kontraŭ la „nova dekstro" (stalinismo). Per tio li emfazis la altestimindan idealon de la politika maldekstro, kiu estis laŭ li la sumo de ĉiuj progresemaj postuloj, bezonas novan utopion kaj ne povas esti ligita al konkreta politika partio. Ĝia sinteno estas la „konstanta reviziismo rilate al la realeco" kaj ĝi rezignas pri ideaj kompromisoj kaj rimedoj, kiuj kontraŭdiras ĝin, kvankam ĝi ne nepre rezignas pri (iusence pozitiva, aK) perforto (!!!), ĉar ĝi celas ŝanĝi la rigidiĝintan socian vivon. Laŭ Kołakowski, la dekstruloj estis tiuj fortoj en la partio, kiuj insistas pri la stalinismo kaj defendas tiun sistemon, kiu preferas rezigni pri la pola suvereneco kaj subteni fremdan naciismon. Ili estas la fortoj de la diktaturo de la partia aparato en la politiko kaj ekonomio. Kołakowski prezentis sep punktojn, pri kiuj li atendis, ke la nova maldekstro kaj en Okcidento kaj en Oriento efektivigos ilin: abolo de la privilegioj; forigo de la malegaleco kaj diskriminado kaj de la ekspluatado de iuj landoj far aliaj; batalo kontraŭ la limigo de la libereco kaj por la libera esprimado de la opinio; laikigo de la socia vivo; neniigo de la rasa malamo; venko de la racia pensado kiel integra parto de la socia progreso; evitado de la militigo de la socia vivo kaj de la pensado. Ĉi tiu programo estis presita de la gazeto *Po prostu* en februaro 1957, kiu havis eldonkvanton de 150´000 ekzempleroj kaj kiu estis tre ŝatata ankaŭ inter junaj oficiroj. Ĉirkaŭ tiu ĉi gazeto kolektiĝis la adeptoj de Kołakowski.

La reakcia reĝimo ne longe atendis kaj faris kurtan proceson kun tiuj kritikaj vidpunktoj. La regantaj komunistoj reagis per reenkonduko de la gazetara cenzuro kaj elŝanĝis la ĉefredaktoron de la

---

[134] Laŭ Ota Šik, Prager Frühlingserwachen, ĉapitro 7.

partia organo *Tribuna Ludu*. Gomułka persone direktis agreson kontraŭ Kołakowski, al kiu li riproĉis, ke li rifuzas submetiĝi al la partia disciplino. La septembra eldono de *Po prostu* estis konfiskita kaj la gazeto mem malpermesita,[135] kontraŭ kio kelkcent studentoj protestis. La laboristaj konsilioj estis senpotencigitaj sen kontraŭstaro. La pasiva konduto de la laboristoj montris, ke ilia revolucia vervo elĉerpiĝis, kiel en Hungario. La aŭtonoma administrado de la laboristoj estis submetita al la partia kontrolo. La malamegata „socialisma konkurso“ estis reenkondukita. La du plej liberalaj membroj de la politburoo, Bienkowski kaj Morawski, perdis siajn funkciojn, dum la antaŭe forpelita stalinisma generalo Witaszewski estis revokita kaj enpostenigita kiel anstataŭanta ĉefo de la armea sekretservo. Gomułka evidentiĝis mola rilate al la stalinistoj kaj malmola rilate al la demokrataj komunistoj kaj do montris sian vizaĝon de vera stalinisto.

* * *

Ĉar en ***Hungario*** la revolucio daŭre ŝvelis sub la propraj cindroj, la 15an de januaro 1957 estis proklamita la eksterordinara stato kaj la hungara ribelo estis oficiale deklarita kiel „kontraŭ-revolucio”. Specialaj tribunaloj ricevis la rajton juĝi kaj kondamni partoprenantojn en la ribelo al morto. La sekreta servo estis reformita kaj povis decidi pri vivo aŭ morto. Instaliĝis denove koncentrejoj. Ĝis la mezo de 1957 ĉirkaŭ 60´000 homoj estis koncernataj de reprezalioj. Multaj hungaroj estis deportitaj en Sovetunion. La asocioj de la verkistoj kaj artistoj estis malpermesitaj. Kelkaj intelektuloj estis arestitaj kaj ekzekutitaj aŭ ricevis longajn prizonajn arestpunojn. Ankaŭ infanoj 14-jaraj ne estis protektitaj de tribunalaj juĝoj kaj mortkondamnoj. Okazis nova persekutado de ekleziuloj kaj amasaj arestadoj de protestantaj laboristoj. La aŭtonomaj laboristaj konsilioj malfondiĝis sub la nova politika premo aŭ estis malfonditaj per dekreto. La persono de la direktoro denove fariĝis centra potenculo en la ŝtataj entreprenoj. Faka literaturo, kiu kritike traktis la stalinismon, estis subpremita kaj eliminita. Ĉio tio okazis, kvankam János Kádár, kies politika kurso ŝanceliĝis inter tiu de la stalinistoj kaj reformistoj, konfesis gravajn erarojn en la pasinteco kaj demisiis kiel ĉefministro la 21an de januaro 1958. Ĉar lia registaro havis malaltan prestiĝon ĉe la popolo, Kádár devis ion fari por ne perdi siajn vizaĝon kaj potencon. Imre Nagy ankoraŭ vivis. Sed la 28an de januaro 1958 komenciĝis sekreta jura proceso kontraŭ li kaj aliaj kamaradoj, kiu estis plurfoje interrompita. Je ĝia fino staris mortkondamnoj, probable laŭ moskva ordono, en kio Kádár verŝajne havis neniun influon aŭ kiujn li eble silente aprobis. Stalinisto Révai postulis kiel unua la fizikan likvidon de Nagy. La ekzekutoj de Nagy, Maléter, Szilágyi kaj Gimes okazis meze de junio. La nomoj de tiuj ´herooj´ fariĝis simboloj por la minacata politika sistemo kaj tabuiĝis en la erao de Kádár. Do, fine de 1959 la hungara komunisma partio staris denove sub la influo de la stalinistoj de la Rákosi-bando. Sed Ĥruŝĉov, kiu aperis en Budapeŝto, subtenis Kádár-on, kiu celis sekurigi por sia lando certagradan aŭtonomecon rilate al Sovetunio, kiel Gomułka en Pollando. Kiel ´kompromiso´ servis la eksplicita agnosko de la komunisma reĝimo kaj de la gvida rolo de Sovetunio ĉe samtempa forlaso de la dogmema Rákosi-linio. Ĉiaj signoj de ribelemo kaj ĉia opoziciemo estis senprokraste sufokitaj kaj ĉiuj spuroj de la ribelo de 1956 forviŝitaj. En Hungario ekregis la silento de tombejo, ĝis 1989.

Post la ekzekuto de Imre Nagy, kiun Ĥruŝĉov malgraŭ ĉio denuncis kiel perfidulon, kiu celis detrui la unuecon de la socialisma bloko, la Kádár-reĝimo estis rifuzita kaj en Hungario kaj en eksterlando, ĉar Kádár mem estis konsiderita kiel perfidulo de la ungara popolo. Eĉ la jugoslavoj distanciĝis de Moskvo ankoraŭ pli forte. Sed iom post iom la mondo alkutimiĝis al tiu situacio, en kiu oni klopodis trovi ankaŭ pozitivajn aspektojn. Kadre de la eblecoj Kádár sukcesis mallaŭte fari reformojn, pri kiuj la homoj en aliaj socialismaj landoj de la sovetia bloko povis nur revi. En Okcidento Kádár estis pli kaj pli traktita kun respekto, la specifa, ´liberaligita´ hungara socialismo estis moke nomita „gulaŝa komunismo”[136] kaj Hungario estis ironie apostrofita kiel „plej gaja barako en la komunisma tendaro”.

* * *

En ***Jugoslavio*** Milovan Đilas rompis kun Tito kaj aperigis en Usono la faman libron „La nova klaso“, en kiu li profunde analizis la burokratian karakteron de la socialisma sistemo kaj pro kio li devis sidi en la malliberejo dum multaj jaroj.

[135] Vd. https://pl.wikipedia.org/wiki/Po_prostu_(czasopismo).
[136] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Gulaschkommunismus.

En la antaŭparolo de la libro Đilas konfesis sian kredon je la okcidenttipa „demokratia socialismo”. Laŭ la tradicio de Trockij li traktis la problemon de la stalinisma burokratio, kiu laŭ li fariĝis la bazo de nova klaso de posedantoj, ekspluatantoj kaj ideaj monopolistoj, kiuj interesiĝas pri la proletaro nur el la vidpunkto, ke ĝi helpas apogi ilian luksan vivon pere de sia alta produktiveco. Tiu nova klaso estas regita el absolutismaj despotoj, kiuj sekurigis sian potencon, kiun ili ne plu pretas fordoni kaj celas esti glorataj de la aliaj. Pro tio de la originala marksismo restis preskaŭ nenio, dum en la socialismaj landoj establiĝis nova klaso anstataŭ senklasa socio. La revolucia tempo pasis kaj la nova komunisma klaso, reprezentita de la partia burokrataro, havas nenion plu por diri al la popolo. Đilas rekomendis forpreni de la nova klaso la akiritan posedon kaj neniigi tiun ĉi klason kiel tuton.

Kvankam la libro de Đilas estis konsiderita kiel herezaĵo kaj ĝia kondamnita aŭtoro sendita en la malliberejon, ĝiaj trafaj analizoj kaj sensaciaj konkludoj havis enormajn signifon kaj efikon. En Jugoslavio la ĉefaj ideoj de Đilas fariĝis parto de la programo, kiu estis akceptita de la delegitoj de la fama VIIa kongreso de la Ligo de jugoslaviaj komunistoj de aprilo 1958 en Ljubljana, kiuj batalis kontraŭ ŝtatismo, burokratiismo kaj dogmismo. La laboristaj konsilioj ricevis novajn rajtojn. La ĝusteco de la propra jugoslavia vojo kaj de la jugoslavia modelo (t.e. de la aŭtonoma administrado de la entreprenoj fare de la laboristoj) estis konfirmita kaj pravigita kaj kelkaj bazaj teoriaj ideoj de la sovetia komunismo estis neitaj. La komunisma partio estis difinita kiel egalrajta parto de la laboristaj amasoj anstataŭ supera izolita elito. Do, la rompo kun Sovetunio estis definitiva kaj pliprofundiĝis. La sovetia hegemonio estis kritikita kaj rifuzita kiel nova formo de la koloniismo. Jugoslavio konsideris sin sola vera socialisma ŝtato, dum ĉiuj aliaj socialismaj ŝtatoj moviĝis en la direkto de ŝtatkapitalismaj sistemoj. Ĥruŝĉov estis konsternata pri tiu programo, en kiu Tito sentis sin devigita mildigi kelkajn poziciojn.

La proklamo de la menciita programo de Ljubljana[137] kaŭzis, ke Sovetunio kaj GDR nuligis siajn kreditojn al Jugoslavio. Ĥruŝĉov suspektis en Tito agenton de la „usona imperiismo”, kiu nutras la jugoslavian nacian komunismon per receptoj de la usona kaj brita sekretaj servoj kun la celo restaŭri la kapitalismon en orienta Eŭropo. La regantaj ĉeĥoslovakaj komunistoj kondamnis la libron de Đilas kiel verkon de la vulgara reviziismo. Tito repafis per la averto, ke Jugoslavio protektas la komunismon de la degenero.

### Reagoj en Rumanio, Bulgario kaj Albanio

Interesa afero estas, ke la ribela jaro 1956 en la orienta bloko ne limiĝis al Pollando kaj Hungario, sed etendiĝis ankaŭ al aliaj socialismaj landoj.

En ***Rumanio*** okazis tumultoj kaj manifestacioj inter studentoj, laboristoj kaj kamparanoj en kvin urboj, nome la 27an de oktobro en Bukareŝto, Iaŝi, Cluj, Tîrgu-Mureş kaj Timişoara, kie okazis protesto de studentoj. Oni levis sian voĉon kontraŭ mankanta libereco, malbona provizado per nutraĵoj kaj ĉeesto de la sovetianoj. La plej signifa tumulto eksplodis ĉe la hungara nacimalplimulto, kiu ampleksis 1,5 milionojn da homoj. Ŝajnas, ke inter altrangaj partiaj intelektuloj de la hungara minoritato ekzistis homoj, kiuj simpatiis kun Imre Nagy aŭ postulis la reunuiĝon kun Hungario. La 4an de novembro la ribelo estis disbatita de la rumanaj sekurecaj fortoj kaj perforte ĉesigita. Kiel sekvoj okazis arestoj, purigoj kaj la „reorganizado“ de la aŭtonomaj regionoj de la hungaroj. Partia ĉefo Gheorghe Gheorghiu-Dej timis, ke ankaŭ en lia lando povus okazi simila ribelo kiel en Hungario, pro kio li pledis por rapida interveno de sovetiaj trupoj. Ĉar Moskvo evidente ne vidis kialon por interveni kiel en Hungario, ĉar la protestoj estis kontroleblaj kaj sufokeblaj fare de la lokaj organoj, oni fortigis la trupojn nur ĉe la hungari-rumania limo.

Ĉar la rumana registaro volis nepre eviti tiajn okazaĵojn inter la hungara minoritato, en 1957 ĝi komencis rumanigi tiun komunumon kaj ties loĝregionojn. Unuavice okazis purigoj inter intelektuloj en Transsilvanio, kaj en hungaraj lernejoj estis paralele formitaj rumanaj klasoj, dum la hungaraj klasoj devis estis dissolvitaj kadre de la miksataj klasoj. En 1959 la hungara Bolyai-universitato estis kunfandita kun la rumana Babeș-universitato (Cluj)[138] kaj perdis sian memstarecon. Ĉar al la sovetiaj gvidantoj

[137] Ekzistas germanlingva dokumento, kiu ampleksas 310 paĝojn (vd. https://www.swissbib.ch/Record/295179414).
[138] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Babeş-Bolyai-Universität_Cluj. Sub la posta regado de Ceaușescu la hungara parto de tiu universitato estis draste reduktita.

en Moskvo Rumanio ŝajnis politike sekura kaj stabila, en somero 1958 ili forprenis siajn trupojn el tiu lando.

Al postuloj de verkistoj kaj intelektuloj pli kritike rigardi la propran literaturan produktadon la rumanaj stalinistoj reagis alergie. Kiam ekzemple la verkisto Alexandru Jar alvokis al kritika okupiĝo pri la kaŭzoj de la mankoj en la rumania literaturentrepreno, li estis akre atakita en la partia organo *Scînteia* en junio 1956 kiel „hipokrita, senhonta kaj malkuraĝa" homo kun „naciismaj tendencoj", „anarkiismaj, burĝaj kaj individuismaj" vidpunktoj kaj kiel „mensoganto", kiu prezentas la rumanan literaturon en negativa lumo. Ĉi tiu modela ekzemplo celis timigi la rumaniajn verkistojn, kiuj estis kunvenontaj unuafoje okaze de la unua verkista kongreso en tiu monato. Krom kelkaj aludoj pri „skemismo" kaj „dogmismo" en la literaturo, neniu kuraĝis kritiki la aferojn, kiel tion faris la kolegoj en Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario. Al Panait Istrati, kiu rompis kun la komunismo en la tridekaj jaroj kaj estis stampita kiel „faŝisto", oni pardonis lian pli fruan mispaŝon kaj rebonvenigis lin en la sinon de la verkista komunumo de Rumanio, kvankam li estis jam delonge morta (1935). La studentoj en Iaşi postulis rezigni pri la okazigo de prelegoj pri marksismo-leninismo kaj aboli la rusan lingvon kiel devigan studfakon. Ĉefideologo Miron Constantinescu, kiu oficis kiel unua vicĉefministro kaj edukministro, estis liberigita de siaj funkcioj kaj eliminita el la politburoo, tiel ke unu el la plej potencaj homoj de Rumanio perdis sian signifon, pro kio la rumaniaj intelektuloj ne malĝojis.

* * *

La morto de Stalin kaj la XXa kongreso de la sovetia KP havis konsekvencojn ankaŭ en ***Bulgario***, kie en aprilo 1956 la stalinisto Vâlko Ĉervenkov estis devigita forlasi la postenon de la ĉefministro. Por la reformemuloj de Bulgario tio ja estis ĝojiga evento, sed baldaŭ montriĝis, ke ankaŭ en tiu lando, kiu estis konkerita de la komunistoj, la sistemo en principo ne ŝanĝiĝis, malgraŭ la elŝanĝo de kelkaj pintuloj de la partio kaj ŝtato kiel Todor Ĵivkov kaj Anton Jugov. Ankaŭ bulgaraj studentoj postulis la nuligon de la deviga studado de la marksismo-leninismo. Sed ankaŭ iliaj gvidantoj estis persekutitaj, arestitaj kaj ĉikanitaj, kaj opoziciuloj parte finiĝis per perforta morto.

Inter la plej energiaj kritikantoj de la aktuala situacio en Bulgario troviĝis kelkaj kuraĝaj intelektuloj de la verkista asocio. En aprilo 1956 Pavel Veĵinov lanĉis en la gazeto *Literatura Fronto* sufiĉe akran atakon kontraŭ iuj sistemlojalaj kulturfunkciuloj, literaturkritikistoj kaj redaktoroj, kiuj estis akuzitaj pro tio, ke ili ĉikanas la verkistojn per ideologia edukado anstataŭ okupiĝi pri la kvalito de la bulgaraj literaturo kaj kulturo. La kvereloj estis daŭrigitaj malantaŭ fermitaj pordoj en la partia organizaĵo de la bulgara verkista asocio, kie Ivan Rudnikov, Ivan Martinov kaj Ivan Burin forte atakis la gvidantojn de tiu asocio, al kiuj ili riproĉis, ke ili subpremas diversajn aŭtorojn. Ĉervenkov, kiu ĉeestis en la kunsi-do, utiligis sian potencon por sufoki la konflikton laŭ kutima stalinisma maniero. Vladimir Topenĉarov, ĉefredaktoro de la gazeto *Patrolanda Fronto* kaj bofilo de la likvidita Trajĉo Kostov, akuzis la partion kaj registaron, ke ili kulpas pri la abismo inter ili kaj la popolo. Kiam la renoma ĵurnalisto daŭrigis sian kritikon, la partia ĉeforgano *Laborista Afero* tamen komencis bridi lin. Topenĉarov estis devigita retiriĝi, kaj en februaro 1957 ankaŭ pluraj liberalaj ministroj devis forlasi siajn postenojn. La ĉefo de iu konspira grupo de la sofia universitato estis mortpafita, dum aliaj fuĝis al Turkio.

Kadre de la restalinismigo Ĉervenkov dume revenis en 1958 al la potenco, tiel ke li refariĝis la gvida homo en la bulgara KP. Nun en Bulgario okazis groteska evoluo: Ĝia KP komencis orientiĝi laŭ Pekino kaj en aŭtuno 1958 proklamis „grandan salton" antaŭen por transiri al la komunismo. Kiel en Ĉinio oni kunigis la sovetiecajn kolĥozojn kun aliaj grandaj organizaĵoj. En decembro 1958 la centra organo de BKP raportis pri la fondo de la unua „popolkomunumo" en Bulgario kiel ĝermo de la vera komunismo. Ĉervenkov gloris la aferon kiel ĝustan efektivigon de la marksismo-leninismo kaj nomis la vojon de la ĉina KP al la socialisma konstruado prava. Sed Moskvo observis tiun okazaĵon kun skeptiko kaj malŝato.

Sur iuj insuloj de la Danubo inter Bulgario kaj Rumanio la bulgara komunisma partio kaj la „Patrolanda Fronto" funkciigis unu el la plej kruelaj koncentrejoj por politikaj kontraŭuloj, kiuj estis konataj en la iama orienta bloko – en Belene. La lagro estis fondita en 1944, kontrolita de la bulgara sekureca servo kaj oficiale fermita en 1962. Ĝian plej altan konjunkturon la prizono havis en la tempo de la stalinisto Vâlko Ĉervenkov, do ĉirkaŭ 1952, kiam la lagro havis pli ol 2300 malliberulojn, ĉefe virojn. Pro la malbonaj viv- kaj laborkondiĉoj miloj da homoj mizere pereis en tiu loko, kiu servis ankaŭ

post 1962, fakte ĝis 1989, kiel prizono, kien oni sendis ekzemple turkojn, kiuj kontraŭstaris la bulgarigan kampanjon dum la 80aj jaroj.[139]

* * *

La komunistoj de ***Albanio*** reagis laŭ propra maniero. En tiu lando oficiale validis la kolektiva gvidado de la partio kaj ŝtato kaj la personkulto estis abolita. Sed pli kaj pli evidentiĝis, ke Albanio konservis sian stalinisman reĝimon, kiu estis gvidta kaj kontrolita de Enver Hoĝa persone, kiu fariĝis la homo, kiu havis la tutan potencon, rifuzante ajnan rehonorigon de iamaj kontraŭuloj. Laŭ tiu maniero la albanaj regantoj esprimis sian abomenon pri la realproksimiĝo de Sovetunio al Belgrado, kion la albanaj komunistoj konsideris grava eraro. Eĉ okazis novaj purigoj en la partio, kies viktimoj fariĝis ekzemple vicĉefminis-trino Jakova, kulturministro Spahiu kaj aliaj. Tiel, la malnova anaro de la albana partio estis praktike likvidita.

Preferante la malnovan stalinismon, Enver Hoĝa deklaris en februaro 1957, ke li apogas la linion de Rákosi. En aŭgusto 1958 Tirana retiris sian ambasadoron el Jugoslavio, al kiu oni riproĉis, ke ĝi apogas teroran sistemon, kiu subpremas ĉiujn, kiuj restis fidelaj al la marksismo-leninismo (sed oni certe ne pensis pri Đilas). Kiam en majo 1959 Ĥruŝĉov vojaĝis al Tirana, oni ankoraŭ ne povis observi malboniĝon de la soveti-albanaj rilatoj. Hoĝa ignoris la alvokon de Ĥruŝĉov enkonduki reformojn en Albanion. Krom tio, li rifuzis al la sovetianoj la deziron utiligi la bordon de la mediteranea maro por starigi armeajn bazojn kaj li ankaŭ ne interesiĝis pri la propono, ke Albanio fariĝu feriejo por proletaj turistoj el la Comecon-landoj, kvankam GDR jam ofertis tiajn vojaĝojn. Tiel, Albanio mem izoliĝis dis de la cetera mondo pli kaj pli, kaj por la sovetia imperio ĝi estis perdata por ĉiam.

Dum sia vizito de Moskvo en novembro 1960 Hoĝa kritikis la sovetian kurson kaj la postan jaron komplete rompis kun Sovetunio, ĉesigante la komunajn industriajn evoluprojektojn kaj revokante ĉiujn albanajn studentojn kaj teknikistojn el Sovetunio, kiu estis konsiderita kiel lando kun reviziisma kaj imperiisma politiko same kiel Usono. En la sekvo Tirana alproksimiĝis al Pekino, kiu ĝojis pri la soveti-albana kverelo. Inter rusoj kaj albanoj, kiuj antaŭ unu jaro ankoraŭ interŝanĝis varmajn fratajn kisojn, eksplodis histeria kverelego, kiu kondukis ambaŭ landojn, kies regantoj estis persone senlime ofendataj, eĉ al la rando de milito. Hoĝa postulis la neniigon de la viroj en la Kremlo, kiujn li akuzis, ke ili partoprenis en komploto kun la celo mortigi Stalinon. Unu el la Ĥruŝĉov-proksimaj membroj de la albana politburoo estis mortpafita, Albanio eksiĝis el Comecon. Ĥruŝĉov venĝis sin per fanatikaj akuzoj kontraŭ la albanoj kaj nuligo de kreditoj por Albanio, sed ankaŭ esence ripetis la samajn erarojn rilate al Albanio, kiujn jam Stalin faris en la rilatoj kun Jugoslavio. La rompon de Albanio kun Moskvo la albana verkisto Ismail Kadare priskribis en sia epopea romano „La granda vintro", pro kio li estis histerie kritikita de la regantaj komunistoj kaj poste konsiderita kiel politika disidento.[140]

* * *

Konklude: Ĉiuj tiuj landaj ekzemploj montras, ke post la popolaj ribeloj en Pollando kaj Hungario de la jaro 1956 kaj la kritiko en aliaj socialismaj landoj en orienta Eŭropo la regantaj komunismaj partioj nervoze reagis al tiuj eventoj, kiujn ili volis haltigi per returnado de la rado de la historio por savi kaj konservi sian politikan potencon. Sed la spirito de la kontraŭ-stalinisma revolucio jam forlasis la botelon, ĉar la popoloj en tiuj landoj perdis la kredon je la marksismaj-leninismaj kaj stalinismaj dogmoj laŭ sovetia ludmaniero, kiuj kaŭzis nur politikan teroron, ekonomian mizeron kaj socian malliberecon kaj subpremadon, kaj postulis pli racian, pli humanecan socialismon. La nova procezo ne estis haltigebla, kvankam ĝi ankoraŭ povis esti subpremata de la stalinistoj. Ankaŭ en la pli malsupraj partiaj ĉeloj multaj ´simplaj´ membroj, kiuj reprezentis la t.n. laboristaron, estis malkontentaj pri la situacio kaj fremdiĝis rilate al la elitecaj pintuloj de la komunismaj partioj, kiuj reprezentis la „novan klason" priskribitan de Milovan Đilas kaj devis sekurigi ilian potencon laŭ komisio de Moskvo kaj sufoki ĉian kritikon kaj kontraŭstaron de sube. La movado de la protesto kaj opozicio kaj la disidenteco ĝermis, eksplodis kaj prosperis precipe en la intelektaj medioj, en la universitatoj, ĉe la studentoj, verkistoj kaj artistoj, sed ankaŭ ĉe kelkaj politikistoj, kiuj apartenis al la regantaj komunismaj partioj kaj reprezentis la importitan stalinisman sistemon, kiun la regantaj komunistoj, kiuj estis lojaluloj de la potenculoj en Moskvo, ne volis kaj ne povis reformi. Sed la homamasoj en tiuj landoj volis veran socialismon, kiu garantias kaj

[139] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Belene_(Arbeitslager).
[140] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Der_große_Winter.

efektivigas la spiritan liberecon, materian bonfarton kaj socian justecon; ili ne volis stalinisman diktaturon de lakeoj de Moskvo, en kiu oni persekutas kaj malliberigas civitanojn, kiuj havas alian opinion ol la potenculoj de tiu diktaturo de unusola komunisma partio. Sed kio estis, tio ankoraŭ ne estis ĉio. Sekvis eĉ pli malfacilaj tempoj: La konstruado de la Berlina Muro en 1961, la faligo de Ĥruŝĉov en 1964 kaj la sufokado de la „Praga printempo“ en 1968, kio signifos la totalan subpremadon de la socialismaj landoj fare de Sovetunio, kiu nun neis la ekziston de la stalinismo en la propra lando, kaj la hermetikan malaperon de la Orienta Bloko malantaŭ la Fera Kurteno, kiu formis la limon de la sovetia imperio… politikaj krimoj, kiuj okazis laŭ la ordono de la sovetiaj kaj stalinismaj komunistoj kaj kiuj neniam estis punitaj.

## La 1960aj jaroj sub la kondiĉoj de ´plurisma´ komunisma bloko

Komence de la 1960aj jaroj okazis diseriĝo de la bloko de la monda komunismo, fakte kiel kromsekvo de la orienteŭropaj ribeloj, kiuj celis aboli la stalinismon. Unuflanke oni observis akriĝon de la konflikto inter Moskvo kaj Pekino, kiu havis siajn radikojn jam jardekojn antaŭe. En 1960 Pekino neis, sur politika kampo, la ambicion de Moskvo je la gvido rolo por la komunisma mondo kaj riproĉis al ĝi, en ideologia rilato, ke en Sovetunio regas pseŭdokomunismo. Mao malalte taksis Ĥruŝĉovon kiel komunisman gvidanton, publikigis en Pekino lian verkaron por montri al la publiko la kontraŭdirojn inter la disĉiplo kaj kritikisto de Stalin, publike kritikis kaj akuzis lin pli kaj pli, antaŭdirante lian baldaŭan falon. Ĉar la ĉinaj komunistoj baziĝis sur aliaj historiaj tradicioj, premisoj kaj spertoj, la maoismo, kiu cetere trovis ne malmultajn adeptojn en la tuta mondo, evoluis laŭ aliaj vojo kaj maniero ol la sovetia komunismo, kiu baziĝis sur la okcidenteca marksismo-leninismo, kiu en Ĉinio havis neniun radikan tradicion kaj estis konsiderita kun aziaj skeptiko kaj malfido.

Al la movado de la „blokneŭtralaj” komunismaj landoj apartenis krom Jugoslavio ankaŭ Rumanio, Kubo, Norda Vjetnamio kaj Norda Koreio, kiuj parte iris, kiel supre montrite en la kazo de Albanio, propran vojon.

En Okcidento formiĝis aparta direkto de la socialismo laŭ marksisma-leninisma origino, kiu kulminiĝis en la kontraŭstalinisma eŭrokomunismo kun reformitaj politikaj partioj, kiuj fariĝis parto de la okcidenta demokratio, sed tamen estis kontraŭbatalitaj de la burĝaj partioj sub la gvido de Usono.

Ĉar tiuj temoj ne staras en la centra de nia atento, ni daŭrigos per analizo de la interna evoluo en la sovetia bloko, kie, kiel supre menciite, estis konstruita la Berlina Muro (en aŭgusto 1961) kaj Ĥruŝĉov faligita (en oktobro 1964). Tiu evoluo estis ankaŭ akompanata de la kurioza emancipiĝo de la rumanaj komunistoj kaj de la reformprocezo en Ĉeĥoslovakio, kiu kulminiĝos en la „Praga printempo“, kiun la sovetianoj kaj ties aliancanoj disbatos en aŭgusto 1968, kun fatalaj sekvoj.

## La orienta bloko post la konstruado de la Berlina Muro (1961)

Kiel konate, la Berlina Muro estis konstruita la 13an de aŭgusto 1961 ĉefe pro la fakto, ke pli kaj pli da civitanoj de GDR forfuĝis de la „unua socialisma ŝtato de la laboristoj kaj kamparanoj“, en kiu la komunismo devis esti realigita, ĉar la vivperspektivoj fariĝis pli kaj pli mizeraj kaj sensencaj por ili. Kune kun la konstruado de la Berlina Muro estis fermita ankaŭ la tuta sovetia sektoro ĉe la okcidentgermana limo. Tiu sektoro estis fermita jam antaŭe per bariloj, tiel ke la konstruado de pli firma muro estis nur logika sekvo. Inter 1945 ĝis la konstruo de la Berlina Muro la sovetia zono estis forlasita de 3,5 milionoj da homoj, de kiuj 2,6 milionoj forveturis inter 1949 kaj 1961. Ankaŭ por multaj poloj, ĉeĥoj, slovakoj kaj aliaj civitanoj de socialismaj landoj GDR Berlino signifis taŭgan pordon por forfuĝi.

Ĉi tie ne estas la okazo por rakonti la tutan (antaŭ)historion de la konstruado de la Berlina Muro kaj la hermetika fermado de GDR. Kelkaj kulminaj momentoj estu tamen menciitaj. Ĥruŝĉov estis premita de Ulbricht, kiu volis fermi sian landon kontraŭ la Okcidento, ĉar li ne povis toleri pli da fuĝantoj, inter kiuj estis amaso da junuloj kaj profesiaj fakuloj. La plena kolapso de GDR estis antaŭvidebla, se ankoraŭ pli da homoj turnos la dorson al ĝi. Sed la sovetia registaro longe rifuzis la ideon de la GDR-gvidantoj fermi la limon. Komence de junio la usona prezidento John F. Kennedy renkontis ĉefministron Ĥruŝĉov en Vieno, al kiu li promesis helpi por preni rimedojn por eviti, ke ankoraŭ pli da homoj forfuĝos el GDR sub la kondiĉo, ke la aliro al okcidenta Berlino restos libera. La decido fermi la sektoron estis finfine farita en kunsido de Ĥruŝĉov kaj Ulbricht de la 3a de aŭgusto 1961 en Moskvo.

La plano de la fizika fermo de la limo per muro (en Berlino) estis konfirmita okaze de la kunsido de la politikaj gvidantoj de la ŝtatoj de la Varsovia Pakto de la 3a ĝis 5a de aŭgusto. La plano estis sekreto de la GDR-registaro. Nur la 10an de aŭgusto, do tri tagojn antaŭ la konstruo de la Berlina Muro, la sekreta servo de FRG ricevis unuajn informojn pri la intenco konstrui muron en Berlino. Ankoraŭ la 15an de junio Ulbricht diris dum internacia gazetara konferenco en orienta Berlino la faman frazon, responde al koncerna demando de iu okcidentgermana ĵurnalistino, ke *„neniu intencas starigi muron"*. Do, li nete mensogis. En la nokto de la 12a al la 13a de aŭgusto 1961 la armeo de GDR komencis, apogite de 5000 anoj de la limpolico de GDR, 5000 anoj de la protekta polico kaj de la popolpolico kaj de 4500 anoj de la t.n. batalgrupoj el la civilaj entreprenoj, fermi la stratojn kaj fervojliniojn al okcidenta Berlino. Ankaŭ sovetiaj trupoj estis alarm-pretaj kaj aperis ĉe la limkontrolpunktoj de la aliancanoj. Ĉiuj trafikaj rilatoj inter ambaŭ urbopartoj estis interrompitaj. La trajnoj veturis sen halto tra la legendecaj „fantomaj stacidomoj". Nur la transira punkto en la stacidomo Frederika Strato restis malfermata. La homo, kiu respondecis kiel tiama CK-sekretario por la demandoj de la sekureco kaj la tuta planado kaj efektivigo de la murkonstruado en la nomo de la SED-politburoo, estis Erich Honecker, por kiu do komenciĝis la granda kariero kiel dua, poste unua gvidanto de la ŝtato kaj partio.

Nature, flanke de la oriento devis esti trovita klarigo kaj pravigo por la murkonstruo en Berlino. La sovetia registaro klarigis la 24an de aŭgusto, ke la aeraj koridoroj al okcidenta Berlino estis misuzitaj por transporti okcidentgermanajn „agentojn, revenĝistojn kaj militistojn". Ili asertis, ke okcidenta Berlino ne estas parto de FRG, tiel ke la kompetenco de la aŭtoritatoj de FRG ne povas kovri ankaŭ la teritorion de Berlino. Post la murkonstruo ankoraŭ kelkcent homoj fuĝis al Okcidento, sed la grandaj ondoj de la amasaj fuĝoj tamen povis esti haltigitaj. En la postaj jaroj okazis multaj tragikaj incidentoj ĉe la limo, kiu estis fortikigita per pli kaj pli ĉikanaj bariloj kaj novtipaj mortigiloj, tiel ke multaj homoj, kiuj provis fuĝi tra tiu limo, mizere pereis.

La mondo estis komplete ŝokata pro la konstruado de la muro kaj la hermetika fermo de GDR, kiu aspektis kiel malliberejo de 13 milionoj da homoj, kiuj restis enŝlositaj en tiu parto de Germanio, kiun ili ne plu povis forlasi. Federacia kanceliero Adenauer alvokis la homojn resti trankvilaj kaj anoncis, ke Germanio adekvate reagos kune kun la aliancanoj sen klarigi pri kio konkrete temos. La 16an de aŭgusto okazis protesta manifestacio de Willy Brandt, reganta urbestro de Berlino, kaj 300 mil okcidentaj berlinanoj antaŭ la urbodomo de Schöneberg. La 22an de aŭgusto Adenauer vizitis okcidentan Berlinon.[141] Sed politike ankaŭ la socialdemokrato Brandt restis senpotenca kontraŭ la enmurigo de okcidenta Berlino kaj la tranĉado de sia urbo. Ankoraŭ en la sama jaro la okcidentgermanaj federaciaj landoj fondis la t.n. Centran Registrejon de la landaj justicadminstracioj en Salzgitter por registri lezojn de la homaj rajtoj sur la teritorio de GDR (kiu estos akra dorno en la okuloj de la SED-gvidantoj kaj kontraŭ kiu la registaro en orienta Berlino daŭre protestos). Sed la kreo de tiu instanco, kiu signifis akran provokon por GDR, povis esti nur simbola ago por protesti kontraŭ la fermo de la orienta landoparto. Dum la oriento nomis la muron „kontraŭfaŝisma protektremparo", en okcidento oni nomis ĝin simple „muro de la honto".

La usonaj aliancanoj reagis malrapide, usonaj armeanoj aperis ĉe la limo, Moskvo ricevis diplomatiajn formalaĵojn. Probable ankaŭ Kennedy estis surprizita de la murkonstruo. Ĉar la homaro estis minacita de nova mondmilito, Kennedy opiniis, ke „damne, muro estas pli bona ol milito". En la sekvo de la tragika evento aperis sennombraj komentoj de plej diversaj flankoj, kiuj ne estas trakteblaj ĉi tie. La 26an de junio 1963 Kennedy vojaĝis al Berlino, kie li prononcis antaŭ la urbodomo de Schöneberg paroladon, kiu emfazis la valoron de la libereco, certigis la solidarecon kun Berlino kaj FRG kaj entenis liajn famajn vortojn "Mi estas berlinano".[142]

Ankaŭ en la popolo de GDR la ŝoko de la murkonstruo kaj fermo de la lando estis profunda. Por protekti la muron la reĝimo starigis taĉmentojn de FDJ (centra junulara organizaĵo de GDR) apud la muron por eviti lezojn de ĝi. Estiĝis etoso de teroro kaj timo kontraŭ homoj, kiuj protestis kontraŭ la starigo de la muro, kiu daŭris ĝis la fino de la jaro. Ĉiuspeca protesto kontraŭ la murkonstruo estis tuj rigore sufokikta. La celo de tiuj rimedoj estis psikologie akompani la murkonstruon kaj por montri al ĉiuj kontraŭuloj de la projekto, ke protesti kontraŭ ĝi havas neniun sencon. Multaj tribunaloj kondamnis tiajn homojn al deviga laboro kaj sendis ilin al novaj speciale konstruitaj koncentrejoj. La politika kon-

141 Vd. https://www.konrad-adenauer.de/dokumente/weitere-dokumente/1961-08-22-adenauer-berlin.
142 Vd. https://www.berlin.de/berlin-im-ueberblick/geschichte/artikel.453085.php.

kludo de la murkonstruo estis la „pakto de la amikeco“ inter Sovetunio kaj GDR de junio 1964, kiu devis daŭri dudek jarojn kaj konfirmi la netuŝeblon de la ŝtataj limoj de GDR. Precipe la junularo estis varbita de la partio, por ke ĝi fariĝu lojala elemento de la ŝtato kaj subtenu la politikon de la SED-partio. Sed subite aperis nova opozicia cirklo, kiu nomis sin „Stauffenberg“ kaj al kiu apartenis laboristoj, lernantoj kaj studentoj. Sekve, la partio fortigis la politikan kaj ideologian eduk-laboron, aplikante fian politikon de sukerpano kaj vipo. Aparte talentataj lernantoj ricevis la privilegion esti instruataj en specialaj klasoj, se oni konsideris ilin politike konformismaj. Aliflanke oni nuligis, en printempo 1964, la eblon libere elekti profesion, kvankam tiu rajto estis garantiita de la konstitucio. La profesioj estis nun administre disdonitaj laŭ la bezonoj de la ekonomia plano. La laboro fariĝis ne nur rajto, sed ankaŭ devo. Maldungoj povis esti pli facile faritaj, se la dungito lezis la disciplinon. La studentoj devis skribe devigi sin, ke ili subtenos la politikon de SED kaj de la registaro de GDR kaj partoprenos en la konstruado de la socialismo.

Kiam en aŭgusto 1962 la laboristoj de la Leuna-fabriko komencis striki i.a. kontraŭ malbona provizado de nutraĵoj (kiu estis konstanta problemo en GDR), ili povis senti la rigoran krudecon de la reĝimo. Ĝi sendis trupon de la sovetia armeo tien, kiu ĉirkaŭis la fabrikon, kaj soldatoj de la GDR-armeo okupis la konstruaĵon. La striko disfalis, sed la granda kaj daŭra frustracio restis.

En la nova programo de SED la punkto pri la reunuiĝo de Gemanio estis forstrekita. Anstataŭ tio oni emfazis, ke la socialisma nacio superas la burĝan nacion. Per tio oni celis diri, ke la germana nacio evoluos laŭ du sociaj direktoj kaj ke la okcidenta parto de tiu lando estas malpli valora ol la socialisma parto en oriento.

## La XXIIa partia kongreso de KPSU de 1961

Laŭ Herman Aĥminov (1921-85), kiu apartenis al la dua ondo de rusaj elmigrintoj, la komunisma diktaturo estis nenecesa en Sovetunio, ĉar ĝi fariĝis nur parazita memcelo kaj superflua heredaĵo de la marksisma doktrino. Aĥminov eble estis la unua rusa elmigrinto, kiu en siaj libroj kritike traktis la bolŝevismon el politologia vidpunkto, tiel ke li apartenis al tiuj raraj historiistoj, kiuj antaŭvidis la pereon de la komunismo.[143]

Post novaj purigoj en la universitataj medioj de Moskvo kaj Leningrado, unua protestkunveno okazis la 2an de aprilo 1961 en la aŭditorio de la Pedagogia Instituto de la Leningrada universitato, alia, vizitita de 300 studentoj, en la Energetika Insitituto en Moskvo. En junio 1964 okazis protestkunveno en Moskvo, kiam la aŭtoritatoj volis malpermesi ekspozicion de la pentristo Glazunov. Dum iuj studentoj estis senditaj al „plibonigaj kolonioj“ (t.e. prizonoj de la iama gulago), aliaj forlasis la universitaton kaj komencis agadi inter la popolo kiel „popolaj predikantoj“, kiuj estis speco de nepagitaj profesiaj revoluciuloj, kiuj agadis sen la apogo de iu kontraŭleĝa organizaĵo aŭ partio. Nova modo estis ankaŭ la kantado de bardoj, kiuj prezentis tekstojn de prizonuloj, soldatoj kaj almozpetantoj. Ĝis 1957/58 en la malliberejo de la sovetia gulago daŭre troviĝis inter ok kaj dek milionoj da homoj.

Krom tio okazis ribeloj kaj amasprotestoj en aliaj urboj de Sovetunio kiel en Novoĉerkassk (1960), Krasnodar, Sevastopol, Gorkij, Odeso, Taŝkento (1961). Strikoj eksplodis en tiu tempo en Odeso, Arĥangelsk, Murmansk, Krasnodar, Krivoj Rog same kiel en diversaj entreprenoj de Moskvo kaj Leningrado. En Murom okazis atako kontraŭ iu polica stacio. En Jaroslavl virinoj protestis kontraŭ malsufiĉo de nutraĵoj kaj en Voroneĵ homoj publike plendis, ĉar lakto ne estis havebla. En 1962 okazis tumultoj en diversaj lokoj de la Donbaso (Ukrainio), sed ankaŭ en la rusiaj urboj Ivanovo, Omsk, Rostov, Minsk (Belorusio) kaj aliaj lokoj. Dum stratbataloj en Vladimir estis ĵetitaj t.n. molotovaj koktejloj. En Lugansk kaj aliaj lokoj estis maldungitaj sennombraj laboristoj. En iu porvirina koncentrejo eksplodis ribelo. La dramoj en tiuj lokoj sekvigis plurajn mortviktimojn kaj vunditojn. Kvankam la plimulto de la kazoj de tiuj tumultoj estis ligataj kun nova krizo de la ekonomio, kun reformo de la landa valuto kaj kun la altigo de la prezoj, ili rapide alprenis politika dimension. Por bridi la intelektulojn oni enkondukis novajn instancojn kaj por timigi la junularon kaj laboristaron la mortpunon por kontraŭbatali nepermesatajn grupajn formiĝojn. Krom tio estis enkondukitaj novaj kategorioj de malliberejoj kaj koncentrejoj. Sub tia premo kaj pro fizika elĉerpiĝo de la aktivuloj tiu protestmovado febliĝis en la jaroj

[143] Vd. http://doykov.com/books/Dojkow%20-%20Achminow.pdf (germanlingve) kaj http://doykov.com/books/Ahminov.pdf (ruslingve).

1964/65. Pro la publikigo de nekonformoj tekstoj la poeto Iosif Brodskij pasigis kvin jarojn en tia malliberejo. Ĥruŝĉov komprenis la danĝeran potencialon de la politika rezisto en la lando, kiu ekzistis sub la surfaco kaj eĉ en la profundo de la sovetia socio, pentrante la fantomon de „partio de senpartianoj", kiu estis partio de naŭdek procentoj de la popolo.

La XXIIa partia kongreso de KPSU de oktobro 1961, kiu okazis du monatojn post la konstruado de la Berlina Muro,[144] servis antaŭ ĉio al la celo sankcii la aliancanojn de Mao Zedong kaj regajni Albanion por la propra bloko. La rimedo por atingi tiujn celojn estis la lanĉo de dua malstalinismigo, kiu ĉi-foje direktis sin precipe kontraŭ la triopo Molotov-Malenkov-Kaganoviĉ, kiuj estis malnovaj stalinistoj de la plej sinistra speco kaj malŝate observis la kontraŭstalinan politikon de Ĥruŝĉov, kiun ili konsideris danĝera por la stabileco de la sistemo. Probable ili pravis ĉi-rilate, ĉar la komunisma sistemo efektive estis en danĝero kaj minacata de la disfalo kaj kolapso. Tion sentis kaj rimarkis ankaŭ Ĥruŝĉov mem, pro kio li klopodis reformi kaj savi ĝin. Sed estante mem stalinisto de la malnova skolo, en multaj, precipe ideologiaj rilatoj li ne kapablis transsalti la propran ombron. Krom la menciitaj partiaj funkciuloj, ankaŭ kamaradoj Voroŝilov, Bulganin kaj aliaj malpli konataj anoj de la sama frakcio estis submetitaj al kritiko. Anastas Mikojan, unua vicĉefministro kaj unu el la plej aktivaj apogintoj de Stalin, funkciis nun kvazaŭ kiel ideologia prokuroro kontraŭ la stalinisma opozicio, al kiu li riproĉis, ke per sia sinteno ĝi iriskas kaŭzi trian mondmiliton. Molotov sidis sur la akuza benko kvazaŭ kiel posteulo de Berija kaj kvazaŭa anstataŭanto de Mao en Sovetunio, kontraŭ kiu la tuta polemiko finfine direktiĝis. Malenkov kaj Kaganoviĉ estis akuzitaj pro tio, ke ili ebligis la personkulton ĉirkaŭ Stalin kaj kulpas pri la amasaj persekutoj sub lia regado. Kvankam oni postulis ilian eksigon el la partio, tio tamen ne okazis, ĉar la kontraŭstarado de tiu intenco estis grandega, tiel ke Ĥruŝĉov ne sukcesis fari tion. Se oni estus prezentinta kaj kondamninta ilin antaŭ la tribunalo pro iliaj krimoj dum la stalina tempo, ankaŭ miloj da aliaj iamaj kulpuloj devintus enkalkuli sian kondamnon kaj forpuŝon de la partio. Pro tio ili ne estis kondamnitaj, sed male ricevis laŭordan pension.

Rilate la eksteran politikon, dum la XXIIa partia kongreso de KPSU Ĥruŝĉov klarigis la koncepton de la „paca kunekzistado" inter diversaj ideologiaj kaj sociaj sistemoj, kiu ne devis esti nura „provizora febla armistico inter militoj". La sovetia gvidanto klarigis, ke paca kunekzistado signifas la kunekzistadon de du kontraŭdiraj sociaj sistemoj, kiuj en reciproka interkonsento rezignas apliki la militon kiel rimedon por solvi konfliktojn inter ŝtatoj. Ĉar paco kaj paca kunekzistado ne estas identaj aferoj, Sovetunio devis esti daŭre preparata al milito por konservi la pacon. En la gazeto *Pravda* de la 18a de oktobro 1961 oni povis legi, ke „la principo de la paca kunekzistado ampleksas ne nur la kampon de la ekstera politiko, sed ankaŭ la sferon de la ekonomiaj rilatoj kun eksterlando". La sovetianoj estis konvinkataj, ke „la socialisma ordo finfine venkos ĉie".

En diferenco kun la parolado de Ĥruŝĉov de la jaro 1956, kiu restis sekreta, ĉi-foje larĝaj partoj de la popolo en Sovetunio eksciis pri la okazaĵoj dum la XXIIa partia kongreso, ĉar la paroladoj estis publikigitaj en la sovetia partia gazetaro. Eĉ la forigo de la kadavro de Stalin el la maŭzoleo de Lenin kaj ĝia entombigo apud la Kremla muro estis publike anoncita. Sub Ĥruŝĉov la enlanda kaj internacia prestiĝo de la komunisma partio estis subfosita kaj la falo de ĝia aŭtoritateco progresis paŝon post paŝo. Tio estis malfacile eltenebla por la stalinismaj ortodoksuloj, kiuj daŭre okupis altajn oficojn kaj postenojn en la ŝtato kaj volis eviti plian erozion de la potenco, kiun Ĥruŝĉov kaŭzis per sia hereza maniero trakti la aferojn, kvankam li volis savi la kontrolon de la komunisma partio pri Sovetunio kaj la tuta komunisma bloko.

Do, ankaŭ dum la XXIIa partia kongreso de KPSU temis nur pri kritika traktado de kelkaj personoj, kiuj rivalis inter si kaj estis elŝanĝeblaj. La nova partia programo emfazis „la grandiozajn kaj noblajn trajtojn de la komunismo" kaj malfermis „la brilajn perspektivojn por la tuta homaro", pro kio „la venontaj generacioj parolos kun la sento de dankemo pri la XXIIa kongreso de KPSU". La programo promesis la efektiviĝon de la komunismo ĝis la jaro 1980. Per la proklamo de la „nova homo" la sovetiaj komunistoj celis eviti la disfalon kaj degeneron de la sovetia socio, kiu ankoraŭ troviĝis en antaŭmoderna stadio, malgraŭ historie unika ordoŝanĝo en 1917 kaj radikala industriiĝo dum la stalina tempo. Ĉiuj tiuj utopiaj anoncoj devis doni novan vivosencon al la komunistoj kaj al la homoj en Sovetunio entute. La junularo devis esti liberigita de „negativaj fenomenoj" kaj forprenita de la eksmoda gepatra influo, ĉar la partio volis transpreni la rolon de la edukado.

---

144 Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Berlina_muro.

La propono de la unua sekretario de la Leningrada regiona komitato de KPSU, Ivan Spiridonov, forigi la korpon de Stalin el la maŭzoleo sur la Ruĝa Placo en Moskvo, kiu ankoraŭ estis unuanime subtenata de la delegitoj dum la XXIIa partia kongreso en oktobro 1961, trovis pozitivan rezulton, ĉar oni opiniis, ke Stalin kaŭzis tro grandan malfeliĉon al la partio (sic). La 31an de oktobro 1961, je la 21a horo, la komisiono, kiu devis okupiĝi pri la reentombigo de Stalin, eniris la maŭzoleon, kie specialaj laboristoj malmuntis la travideblan sarkofagon kun la elbalzamigita korpo de Stalin, kiu troviĝis apud tiu de Lenin. Ili remetis lin en lignan ĉerkon post kiam ili ankoraŭ forprenis de lia brusto la oran medalon de la „Heroo de la Socialisma Laboro ´Falĉilo kaj Martelo´“. Je la 22a horo kaj 10 minutoj oficiroj portis la fermitan ĉerkon el la maŭzoleo al la honora tombejo apud la Kremla muro, kaj fermis la tombon per slabo el granito. Pri oficialaj paroladoj dum la entombigo, kiu okazis sub hela lumigo de la ĉirkaŭĵo, oni komplete rezignis. Ie apude okazis parada ripetado sub la sonoj de orkestro kaj la bruo de milita tekniko. La nomo „Stalin“ estis malaperigita de la maŭzoleo. La sovetia gazetaro de la venonta tago mallonge komunikis, ke laŭ plenumo de la deziro de la XXIIa partia kongreso de KPSS la ĉerko kun la korpo de I.V. Stalin estis transigita de la maŭzoleo de V.I. Lenin al la Kremla muro. Kiel memoris la iama prezidanto de la KGB de USSR, Semiĉastnyj, en la mateno de la sekva tago neniu reago flanko de la sovetia publikeco estis konstatebla aŭ rimarkebla.[145]

Probable pro la malbona konscienco de la regantaj stalinistoj tamen neniam realiĝis en Moskvo centra memorialo pri la viktimoj de la stalinisma teroro, ĉar la stalinisma sistemo en principo ne estis abolita, spite al malstalinismigaj intencoj kaj klopodoj. Kvankam Sovetunio transprenis la rotacian principon de la jugoslavia sistemo, esencaj reformoj dume ne plu okazis.

Kiam laŭ decido de la Stokholma sekcio de la „Universala Packonsilio“ en julio 1962 estis kunvokita en Moskvo la „Universala Kongreso por ĝenerala malarmado kaj paco“, en kiu partoprenis 2500 homoj el 121 landoj,[146] vojaĝis al Sovetunio ankaŭ la fama kaj influa franca filozofo Jean-Paul Sartre por prezenti prelegon pri „kultura malarmado“, akcentante la gravecon de la intelekta kunekzistado inter orienta kaj okcidento. Metante la verkiston Franz Kafka en la centron de siaj konsideroj, li alvokis siajn aŭskultantojn traduki kaj publiki lian verkaron,En junio Sartre veturis kun sia verkista kolegino Simone de Beauvoir al Moskvo.[147] La rilato de Sartre al Sovetunio kaj la komunismo estis komplika[148] kaj li estis ege kritikita pro sia simpatio kun la komunistoj. Sarre frue interesiĝis pri sovetiaj historio kaj literaturo. En la 50aj kaj 60aj jaroj li unuflanke kritikis la stalinismon, sed rezignis pri plia kritiko post siaj vojaĝoj al Sovetunio. En 1955 la paro vizitis Pekinon. En 1956 li klare malaprobis la disbatadon de la hungara ribelo, en somero 1965 li vizitis kun de Beauvoir la baltajn respublikojn,[149] kaj en la 70aj jaroj li simpatiis kun francaj maoistoj. Ĝis la fino Sartre engaĝiĝis favore al la sorto de maljuste traktitaj homoj en la mondo kaj fariĝis aktiva kontraŭulo de la usona milito kontraŭ Vjetnamio.[150]

### Ĥruŝĉov-doktrino, Comecon kaj la sinteno de Rumanio

Revene al la historio kun Ĥruŝĉov, Rumanio evidente sentis sin minacata de lia doktrino, pri kiu Bukareŝto eksciis nur en somero 1962 kaj sentis sin trompita. Tiu doktrino esence celis la profundan ekonomiajn integriĝon kaj interplektiĝon de la socialismaj landoj laŭ unueca komunisma kadro sub la gvido de Moskvo. Kiel ĉefa rimedo estis antaŭvidita la ekonomia organizaĵo Comecon,[151] kiu estis fondita en 1949, ĉar la politikaj rimedoj de la stalina tempo estis anstataŭigitaj per ekonomiaj, kiuj ŝajnis esti malpli atakeblaj ol la politikaj. Sed Comecon ne integris la komunismajn landojn, sed efikigis la malon. Ŝajnas, ke Ĥruŝĉov enkalkulis ankaŭ la integradon de Ĉinio, Nordvjetnamio kaj Nordkoreio, sed tiu plano fiaskis. En junio 1962 okazis Comecon-konferenco en Moskvo, dum kiu almenaŭ Mongolio povis esti gajnita. Ĥruŝĉov admonis la membrojn al pli alta disciplino rilate la labordisdividon ene de la organizaĵo, ĉar la manko de la disciplino povis esti konsiderata kiel ĝeno de la unueca kaj kolektiva planado kaj de la

[145] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Мавзолей_Ленина#Сталин_в_мавзолее.
[146] Vd. http://enc.biblioclub.ru/termin/1500088 (ruslingve).
[147] Vd. http://kscheib.de/simone-de-beauvoir-und-jean-paul-sartre-in-moskau.
[148] Vd. http://www.sartre.ch/Sartre-SSSR.pdf.
[149] Vd. http://www.cahiers-lituaniens.org/sartre.htm, https://deepbaltic.com/2019/01/07/it-flew-like-a-shooting-star-sartre-and-de-beauvoirs-week-in-soviet-lithuania.
[150] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Jean-Paul_Sartre.
[151] Vd. piednoton 33.

ekonomia kresko aŭ kiel egoisma sinteno de unuopaj membroj, kiu ne povas esti tolerata, kiel poste skribis pria komento en iu sovetia gazeto.

La doktrino de Ĥruŝĉov, kiu volis eviti la eksiĝon de aliaj landoj el la sovetia bloko laŭ la modelo de Jugoslavio aŭ Albanio, estis plene kaj verve apogita de Todor Ĵivkov, estro de la bulgara KP en Sofio, kiu polemikis, en januaro 1963, kontraŭ Pekino kaj la naciaj egoismoj en orienta Eŭropo, emfazante la gravecon de la progresanta kunlaboro inter la socialismaj landoj. Laŭ li, la perfekta komunisma socio ne povas konsisti el organismoj, kiuj ekzistas izolite unu de la aliaj, sed la komunismo bezonas centran produktadon, unuecan planadon de la popola ekonomio, organizitan disdividon de la materiaj resursoj kaj de la laborfortoj, unuecan prezsistemon, kreon de nova formo de la posedo pere de la komuna konstruado de entreprenoj, ktp. Sed la projekto de ekonomia grandspaco en la danuba regiono, kiun proponis iu sovetia profesoro en iu sovetia gazeto, en kiu la ŝtalfabriko de Galaţi devis esti metita sub la kontrolon de Comecon, estis rifuzita de la rumana registaro, ĉar ĝi ne pretis fordoni sian teritorian suverenecon. Tiajn provojn Bukareŝto interpretis kiel klopodon likvidi la ŝtaton kaj nacion de Rumanio sub la preteksto de pseŭdomarksismaj konsideroj. Forta tabako!

En ***Rumanio*** oni forigis la Stalin-munumentojn nur en la komenco de 1962. En aŭtuno Bukareŝto vekiĝis, kiam eksplodis la fama krizo ĉirkaŭ Kubo,[152] kiam Sovetunio planis starigi nukleajn raketojn sur la kariba insulo. Laŭ konfidenca mesaĝo al la registaro de Usono, la rumana registaro intencis proklami sin neŭtrala en kazo de milito inter ambaŭ mondpotencoj. Ŝajnas, ke Bukareŝto ne estis konsultita de Moskvo rilate la instaladon de raketoj en Kubo, pro kio la regantoj en Bukareŝto ofendiĝis kaj ĉagreniĝis, kun fatalaj sekvoj. Sur la kulmino de la „kuba krizo” Rumanio distanciĝis de siaj devoj en la Varsovia Pakto. Fine de tiu jaro manifestiĝis la unua serioza polemiko inter Bukareŝto kaj Moskvo. Temis pri la legitimado de la komunisma regado en Rumanio. Oni demandis sin, ĉu la komunistoj dankas sian potencon en Rumanio sole al Sovetunio. La cirkonstancoj de la komunismigo de Rumanio estas sufiĉe komplikaj kaj iom diferencas de la evoluo en aliaj landoj, ĉar ĝi estis akompanita de ŝtata puĉo fare de reĝo Miĥaelo kontraŭ la faŝisma diktatoro Antonescu, kiu estis aliancano de la Germana Regno, en aŭgusto 1944. Tiun renverson la komunisma historiografio stilizis kiel kontraŭ-faŝisman ribelon de la rumana popolo. Vole-nevole tiu puĉo aŭ ribelo preparis la enkondukon de la komunisma potenco en Rumanion. Alia vero estas, ke la tro malfortaj germanaj trupoj povis esti repuŝitaj de rumanaj trupoj. Kvankam la gardistoj de Miĥaelo arestis lin, la sovetia historiisto Uŝakov mensogis, kiam li asertis (en 1961), ke Antonescu estis arestita de la sovetia komandejo en Bukareŝto. Tio ne povis esti vera, ĉar la sovetianoj ankoraŭ ne troviĝis en la rumana ĉefurbo. Nur la 29an (aŭ 31an) de aŭgusto la Ruĝa Armeo atingis kaj enkasigis Bukareŝton. Laŭ la oficiala versio la Ruĝa Armeo liberigis Rumanion. Ankaŭ la rumana KP troviĝis en granda dependeco de Sovetunio, kiu diktis la kurson al ĝi, do la rumanaj komunistoj ne povis memstare efektivigi la socialisman revolucion en Rumanio. Lige kun la emancipiĝo de Rumanio en la 60aj jaroj, kiam la rumana KP provis liberigi sin de la sovetia superregado, ĝi plialtigis la marĝenan rolon de la propra komunisma partio dum la puĉo. Oni klarigis, ke la falo de la Antonescu-reĝimo okazis dank al „revolucio de la nacia kaj socia, kontraŭfaŝisma kaj kontraŭ-imperiisma liberiĝo”, t.e. ĝi estis rumana popola ribelo sub la gvido de la rumana KP. Fakte, ke en la tago de la puĉo kontraŭ Antonescu la rumana rezista movado alvokis al ribelo kontraŭ la germana okupacio. Do, la historiografio estis diversmaniere manipulita, reskribita kaj falsita de la komunistoj. Ĝis 1989 la 23a de aŭgusto funkciis kiel nacia festotatgo de Rumanio.[153]

Ĉar la ekzekutiva komitato de Comecon havis sovetian ĝeneralan sekretarion, ekzistis neniu dubo, ke Moskvo estonte pretendos la gvidon de tiu organizaĵo, kiu celis starigi la satelitan sistemon sur novan fundamenton sub la kontrolo de Moskvo. Eĉ al Kubo, kiu kadre de la komuna planado devis koncentriĝi pri agrikulturo kaj dume rezigni pri industrio, Moskvo intencis ordoni ĝian ekonomian politikon. Nu, Pollando kaj Rumanio principe ne estis kontraŭ komuna integrado aŭ integriĝo. Sed kiam en Bukareŝto oni eksciis, ke Rumanio devus longdaŭre koncentriĝi pri agrikulturo kaj malpeza industrio kun limigita energia uzado kaj neglekti aliajn sektorojn, la rumanoj reagis nete negative. Bukareŝto celis eviti la kreon de komuna planinstanco kaj insistis sur la principoj de la egalrajteco, sendependeco kaj nacia suvereneco, atentigante pri tio, ke tiuj principoj estis iam antaŭe fiksitaj en iu moskva deklaraĵo de la internacia komunismo aŭ simile. Bukareŝto vidis ankaŭ la neceson, ke unue oni devus fari diferencon inter agrikul-turaj kaj industriaj landoj, evoluintaj kaj subevoluintaj ekonomioj. Krom tio, Rumanio

[152] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Cuban_Missile_Crisis.
[153] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Königlicher_Staatsstreich_in_Rumänien_1944.

komprenigis al siaj partneroj, ke ĝi intencas resti aŭtarka (laŭ iama ideo de Stalin) kaj kunlabori ankaŭ kun landoj ekster la socialisma bloko (ĉar oni bezonis fakulojn por la propra industrio). Tiel, Rumanio memstare ekrilatis kun GATT, Internacia Monfonduso kaj la Monda Banko. Dum la Comecon-konferenco de julio 1963 la sovetia delegacio montris sin komprenema kaj kompromisema. Tamen, Ĥruŝĉov insistis pri sia doktrino kaj komencis pensi pri intrigo kontraŭ la rumanaj kolegoj.

Sed la rumanoj, kiuj ne volis esti simpla satelito de Sovetunio, ne ŝatis trudojn kaj minacojn el Moskvo. En aŭtuno 1963 la rusa librovendejo kaj la Instituto por sovetiaj studoj estis fermitaj en Bukareŝto. La Instituto „Maksim Gorkij“ perdis sian memstarecon kaj estis submetita al la fremdlingva instituto de la universitato. La rumana eldono de iu sovetia revuo devis ĉesigi sian aperadon. La rusa lingvo estis abolita kiel deviga lernfako por lernejanoj kaj studentoj. Rumanoj, kiuj havis rusajn edzinojn, ricevis la ordonon divorci aŭ estis alimaniere diskriminaciitaj.

La tono rilate al Sovetunio fariĝis pli kaj pli akra en la rumana gazetaro. Sovetunio estis akuzita, ke ĝi praktikas novan koloniismon. La CK de la rumana KP alvokis la partian membraron subteni la deklaron pri sendependeco de la 26a de aprilo 1964 kaj lanĉis kampanjon kontraŭ la Ĥruŝĉov-doktrino, kiu daŭris tri semajnojn. En ĉiuj entreprenoj okazis kunvenoj, dum kiuj la laboristoj rajtis diri sian opinion pri Sovetunio. Ĥruŝĉov nervoziĝis pli kaj pli kaj renkontiĝis kun Tito, kun kiu li diskutis la situacion en Rumanio, al kiu li riproĉis „perversan konduton“ kaj kiun li malrekte minacis per armea interveno. Post kiam Tito vizitis Bukareŝton la situacio iom trankviliĝis. Sed la ekstera liberaliĝo de Rumanio ne povis trompi la fakton, ke en la interna politiko Bukareŝto konservis la malnovan stalinisman linion. Do, temis pri iom alispeca ribelo ol en Hungario de la jaro 1956, kvankam iuj paraleloj ja estis evidentaj, kiuj konsistis precipe en la klopodo emancipiĝi dis de Sovetunio, sen tuŝi la stalinisman sistemon en si mem. Per aliaj vortoj dirite: Laŭ la ekstera politiko Rumanio ŝajne celis imiti la modelon de Jugoslavio, dum en la interna politiko ĝi pli similis al la modelo de Albanio sub Enver Hoĝa.

## La reformoj de Liberman en Sovetunio

Tiel, sub Ĥruŝĉov la sovetia planekonomio atingis kritikan punkton, kiu faris la kontroladon kaj reekzamenadon de ĝia funkcipovo neevitebla. La diskuton pri ĝi ne lanĉis altrangaj anoj de la komunisma partio, sed ekonomikaj fakuloj kaj sciencistoj. Akademiano Anatolij Dorodnicyn atentigis, ke la ekonomio ne plu estas gvidebla de la skribotablo, ĉar ĝi fariĝis tro ampleksa. La matematikisto Viktor Gluŝkov, unu el la fondintoj de la informadiko kaj kibernetiko en Sovetunio, kalkulis, ke sen profunda reformo de la ekonomio ĝis 1980 la laborfortoj en la produktado ne plu sufiĉos, ĉar ili ĉiuj estus bezonataj en la planadministrado, kiu fariĝos pli kaj pli ampleksa. La matematikisto Lazar Ljusternik prilamentis la eksmodan teknikon de la planado, kiu laŭ li troviĝis sur la nivelo de la 17a jarcento. Profesoro Miĥail Birman, alia elstara sovetia matematikisto kaj fizikisto, konsideris la klopodon plani kaj kontroli la movon de ĉiu unuopa laboristo utopia. Kaj la same elstara ekonomikisto kaj statistikisto Vasilij Nemĉinov tutsimple konstatis, ke la aktuala sistemo de la administrado en Sovetunio malhelpas la teknikan progreson kaj kolapsos, se oni ne reformos ĝin. En 1962 ekzistis 200´000 entreprenoj, kiuj produktis 20 milionojn da diversaj varoj. Gvidi kaj kontroli la produktadon kaj administradon de tiuj varoj de supre fariĝis pli kaj pli malfacila tasko.

Tiel, tiuj ege saĝaj sovetiaj sciencistoj, kiuj eble havintus la meriton ricevi la nobelpremion, prave atentigis pri gravaj problemoj, mankoj kaj riskoj de la sovetia plansistemo kaj kvazaŭ prognozis ĝian baldaŭan kolapson. Laŭ diversaj raportoj la sovetia ekonomio perdis vervon kaj multe malpli rapide kreskis ol la usona ekonomio, kvankam Ĥruŝĉov fanfarone anoncis, ke ĝis 1980 Sovetunio atingos kaj eĉ preterpasos la kreskon de la usona ekonomio. Tio nature estis pura propaganda blufo, pri kiu la tuta mondo miris kaj ridis.

Pli precize, la sovetianoj planis atingi inter 1959 kaj 1965 80-procentan kreskon de la industria produktado, antaŭvidis 65-procentan altiĝon de la popolenspezo kaj 40-procentan kreskon de la realaj enspezoj de la homoj. Por atingi tiun kreskon necesis investi 197 miliardojn da rubloj en la popolekonomion, t.e. pli multe ol en ĉiuj antaŭaj jaroj de la ekzistado de Sovetunio kune.[154]

[154] Šik, p. 125.

Post profunda analizo de la situacio de la sovetia ekonomio oni venis al la konkludo, ke la profito de la ŝtataj entreprenoj estas magra, ke multaj konsumvaroj estas arbitre produktitaj, ne estas vendeblaj kaj ne konformis al la bezono de la popolo, ke la infrastrukturo de la entreprenoj estas malnova kaj malefika, ke multaj maŝinoj ne plu funkcias kaj ke la papera burokratio estas tro granda. La plandirektivoj konstante ŝanĝiĝis, kio kaŭzis nervozecon en la entreprenoj. La gigantaj (kaj dubindaj) investoj en la kosman teknologion por altigi la ŝtatan prestiĝon kaŭzis kritikon ĉe vastaj tavoloj, ĉar samtempe mankis ŝuoj, dentobrosoj, valizoj kaj gladiloj, pri la nesufiĉaj kvanto kaj kvalito de la nutraĵoj oni tute ne parolu.

La 9an de septembro 1962 en la gazeto *Pravda*, centra organo de KPSU, aperis faka artikolo verkita de la sovetia ekonomikisto Jevsej Liberman sub la titolo „plano, gajno, premio".[155] La ĥarkova sciencisto, kiu kritikis la aktualajn praktikojn en al sovetia planekonomio, estis konvinkata, ke la socialisma ekonomio en principo superas la kapitalismon, sed ke la socialisma ekonomio ankoraŭ ne elĉerpis sian tutan potencialon. Por teni altan vivnivelon Liberman postulis, ke la produktiveco de la tuta ekonomia sistemo estu altigata, ke la centra administra kaj plansistemo enkonduku efikajn ekonomiajn stimulilojn, ke la materiaj interesoj de la laboranta homo estu pli multe respektataj. Liberman avertis, ke sub la kondiĉoj de la rapide ŝanĝiĝantaj teknologiaj kaj sociaj kondiĉoj la aktuala ekonomiado estas nur mal-facile kaj ne tre efike planebla centre, kvankam tio teknike eblas, tiel ke estus pli bone, se la ĉefaj aktualaj decidoj estus farataj sur pli malsupraj ebenoj de la gvidado, kvankam la centra unueca planado kompreneble restos konservata. Precipe la administrajn metodojn Liberman konsideris grava malhelpilo por la ekonomia progreso. Fakte, Liberman ne volis nur plibonigi la ekonomian administradon, sed la gvidadon de la ekonomia sistemo entute. Al la entreprenoj de la sovetia industrio li rekomendis, ke ili aŭtonome decidu siajn produktplanojn, orientiĝu laŭ la kriterioj de la profito kaj rentabilitato anstataŭ laŭ konfuza multeco de abstraktaj indeksoj kaj planciferoj, enkonduku la profesian ekonomian kontadon kaj disdonu parton de sia gajno al la personaro de la entrepreno. Ĉar la Okcidento reeĥis, ke Sovetunio celas reenkonduki la kapitalismon kaj forlasi la planekonomion, Liberman sentis sin embarase miskomprenita kaj devis pravigi sin kun la bezono akcenti, ke lia celo ne estas reiri al la kapitalisma merkatekonomio. La profito, kies gravecon kiel elemento de la planado li substrekis, estis difinita kiel faktoro, kiu ne estu celo en si mem kiel en la kapitalismo, sed ke ĝi kontribuu al la elformiĝo de unueca funkcia sistemo de la centra planado kaj gvidado de la popolekonomio. Per aliaj vortoj, la profito ne estas la ĉefa celo de la socialisma produktado, sed kiel la rentabilitato ĝi estas esenca ilo por altigi la kvaliton kaj kvanton de la produktado, por altigi la motivacion de la produktistoj kaj por kontentigi la bezonojn de la konsuman-toj en la socialismo. Laŭ Liberman la rentabilitato servis por atingi pli da efikeco kiel rimedo por la laboro de la entrepreno, kiu devas perfektigi la kontrakte interkonsentitan liveradon rilate al kvanto, kvalito kaj elekto de la produktoj kaj por respekti la datlimojn, kiuj estas kontrakte interkonsentitaj inter liverantoj kaj klientoj. La fidinda plenumado de tiuj kriterioj estis laŭ li la bazo por stabila planado, kiu devas esti subtenata de la rentabilitato. Por Liberman estis ankaŭ grave emfazi, ke laŭ la ekonomia teorio de la socialismo la profito (aŭ gajno) ne estas ricevata de iu privata posedanto, sed de la tuta socio kaj do estas dediĉata al celoj, kiuj servas al la evoluo de la tuta socio, pro kio ĝi havas nenion komunan kun la kapitalismo. La sukceso de la reformo dependis laŭ la renoma ekonomikisto de tio, ĉu kaj kiel oni sukcesos trovi la ĝustan ligon aŭ ekvilibron inter la centra planado kaj la ekonomia aŭtonomeco de la entreprenoj, krome de la sukcesa aplikado de ideaj kaj materiaj stimuloj kaj de la saĝa utiligo de la relacioj inter varo kaj mono kaj de la kun ili ligataj kategorioj kiel la profito, prezoj kaj kreditoj, kiuj ricevus en la socialismo novan socian signifon, sed fine ĝi dependus ankaŭ de la nivelo de la organiza kaj ideologi-eduka amaslaboro.[156]

La iom sensaciaj ideoj kaj proponoj de Liberman kaŭzis larĝan diskuton inter ekonomikistoj kaj politikistoj kaj la gazetaj redakcioj ricevis milojn da leteroj. Ekzistis vervaj apogantoj, kiuj troviĝis ĉefe inter gvidantoj de entreprenoj, kaj reakciaj kritikistoj, kiuj sidis precipe en la ŝtataj planinstancoj. Eĉ inter sciencistoj de la ekonomiko formiĝis diversaj grupoj, kiuj aŭ subtenis la proponojn de Liberman aŭ rifuzis ilin. Ĥruŝĉov ne sciis kiun flankon li apogu, des pli ke la dogmo de la planekonomio restis netuŝata. Kvankam tiuj reformprojektoj eble estis iom nekutimaj por Sovetunio, ili estis jam delonge

---

[155] La ruslingvan tekston vd. sub https://cyberleninka.ru/article/n/plan-pribyl-premiya.pdf.
[155] Citite laŭ la enkonduko al la libro de Evsej G. Liberman: Methoden der Wirtschaftslenkung im Sozialismus. Suhrkamp 1974, p. 7-14.

konataj kaj aplikitaj en Jugoslavio, Pollando kaj Hungario kaj kompare kun tiuj landoj postrestis en Sovetunio. Krom kelkaj praktikaj provoj en iuj entreprenoj de la teksaĵbranĉo nenio grandskala okazis sur la reforma kampo en Sovetunio, tiel ke la reformoj sugestitaj de Jevsej Liberman estis maltrafitaj kaj perdiĝis en la sablo, ĉar la ideologia premo kaj politika rezisto kontraŭ ili estis tro fortaj. Nu, Ĥruŝĉov almenaŭ proklamis la prioritaton de la ekonomio super la politiko. Sed ankaŭ tio estis nur platona anonco, ĉar la konsekvencoj, kiujn ili necesigis, ekzemple la anstataŭigo de la prioritato de la pezindustrio per la prioritato de la konsumindustrio, estis nur duone realigitaj. Fakte, pri similaj ŝanĝoj de la industriaj prioritatoj parolis jam Malenkov en la jaro 1953, tamen sen granda efiko en la praktiko.

* * *

La publikigo de la reformproponoj de Liberman en Sovetunio relanĉis ankaŭ la diskuton pri nova ekonomia sistemo en ***GDR***, kiu kiel kutime obee kaj blinde urĝis imiti ĉion novan el Moskvo. Kritiko, kiu antaŭe estis konsiderita kiel kontraŭpartia, nun subite povis esti formulata. Eĉ la supre menciita profesoro Friedrich Behrens, kiu fieris povi atentigi pri la parenceco de siaj ideoj kun tiuj de sia sovetia kolego, povis denove kundiskuti. La GDR-varianto de la nova ekonomia sistemo nomiĝis mallonge NÖSPL. Ĝi estis enkondukita la 1an de januaro 1964. Sed la ideoj de Liberman estis komplete nebuligitaj. Anstataŭ malcentralizado de la ekonomio okazis en GDR koncentrado de ĉiuj entreprenoj laŭ branĉoj en konzernojn kaj trustojn. Ankaŭ la principo de la partopreno en la profito estis modifita en alia senco. Malgraŭ tio, surbaze de la apliko de la ideoj de Liberman rilate la rentabilitaton kaj prezformadon povis esti atingitaj kelkaj plibonigoj. Entute ne estis kreita nova ekonomia sistemo, sed la centra planekonomio estis nur modifita. Sed se GDR volis ekonomie konkurenci kun FRG, ĝi tamen estis devigita fari pli radikalajn reformojn. La ekonomiaj reformoj en la socialismaj landoj staris sub la forta premo de la ideologia pravigo kaj kutime estis ligataj kun la oficiala kondamno de la stalinismo, ne pli, tiel ke ili finfine limigis sin al kosmetikaj ŝanĝoj. La ekonomiaj reformoj krome restis esence sen gravaj politikaj sekvoj, kvankam la junaj generacioj de civitanoj postulis konsekvencojn ankaŭ por la politika sistemo. Tamen, la neceso de la generacia ŝanĝo estis sentebla. En GDR multaj malnovaj funkciuloj estis anstataŭigitaj per pli junaj fortoj. Tio estis la momento por ekonomiaj fakuloj kiel Erich Apel, Günter Mittag kaj Werner Jarowinsky fariĝi novaj membroj de la politburoo de la CK de SED, kiu estis daŭre regita de Walter Ulbricht, kiu mirakle travivis ĉiujn krizojn ĝis nun. La sovetianoj konsideris lin freneza, ĉar li predikis, ke Sovetunio povas lerni de GDR, kies ekonomio estas pli moderna kaj pli altnivela ol tiu de la granda frato.

Aliflanke, kritikaj marksismaj verkistoj kiel Heinz Kahlau, Günter Kunert kaj Peter Hacks ekhavis gravajn konfliktojn kun la ŝtato, ĉar ili ne montriĝis sufiĉe reĝimlojalaj, estis intelekte tro memstaraj aŭ diris kaj skribis aferojn, kiuj ne plaĉis al la reganta partio, kiu cenzuris iliajn verkojn.

La plej elstara kazo de disidenteco tamen restis profesoro Robert Havemann, kiu jam estis prezentita supre.

En septembro 1962 Havemann prezentis en Lepsiko atentokaptan prelegon, kiu rapide cirkuladis en hektografiata formo en opoziciaj cirkloj.[157] En tiu prelego la natursciencisto klarigis, ke la oficiale proklamita Dialektika Materiismo estas nek dialektika nek materiisma. La stalinismon li rifuzis kiel vulgaran marksismon. Ktp. Havemann fariĝis tiel konata kaj populara, ke centoj kaj miloj da studentoj ekinteresiĝis pri li kaj amase aliĝis al lia prelegaro pri „natursciencaj aspektoj de filozofiaj problemoj“, kiujn Havemann organizis en la jaroj 1963/64 en la Humboldt-universitato de orienta Berlino – 1250 homoj enskribiĝis en la listojn de aŭskultantoj. La prelegserion daŭrigis tri seminarioj, en kiuj Havemann profundigis siajn herezajn analizojn pri la reganta komunisma doktrino, kiun li konsideris stultiga kaj morale dubinda por la amasoj. Kiel radikala maldekstrulo Havemann, kiu opiniis, ke la moskva kaj orientberlina moralkodo respegulas burĝan horizonton, postulis la enkondukon de vere revolucia moralo, kiu dissolvas kaj baze ŝanĝas la nuntempan socion en vere humanisma senco de la humileco, fatalisma akcepto de la sorto, espero je pli altnivela justeco, enkadrigo de la homo en la socian hierarkion, ktp. Havemann postulis respekti la esencajn valorojn de la socialisma moralo, kiuj konsistas en la solidareco, rezisto, pridubado de ĉio valida kaj tradicia, memfido, decideco, ŝanĝo de la aferoj kaj kondiĉoj, ktp. La strebadon por atingi la absolutan regadon li nomis malmorala. Por Havemann la komunismo

[157] Vd. Rede auf der Tagung „Die fortschrittlichen Traditionen in der deutschen Naturwissenschaft des 19. und 20. Jahrhunderts“, Leipzig 1962. En: Havemann, Robert: Dialektik ohne Dogma? Naturwissenschaft und Weltanschauung, Rowohlt 2018 (reeldono de 1964, 65, 68, 70).

signifis finan celon, kiu estos neniam atingebla. La prakomunismon li konsideris el scienca vidpunkto fikcio. Havemann estis konvinkata, ke la kapitalismo malaperos ankaŭ sen komunisma aktivismo. La antagonismoj en la socialismaj landoj povas esti venkataj nur per la aplikado de vera demokratio, ne per la lanĉado de artefarita entuziasmo. La neniigon de la liberecaj rajtoj fare de la stalinismo li konsideris diskriminacio de la komunismo.

Kvankam Havemann asertis, ke en aliaj socialismaj landoj ekzistas komunistoj, kiuj pensas simile kiel li, la partio, kiu ne havis medicinon por kuraci la „malsanon de Havemann", komencis observi lian agadon per granda suspektemo. Oni riproĉis al li, ke li praktikas abstraktan pensadon pri la libereco kaj akuzis lin, ke li difektas la moralon de la junularo. La FDJ-gazeto *Forumo* memorigis al li, ke li mem estis stalinisto en 1951/52.[158] Senkonsidere al tiu kritiko, Havemann donis al iu okcidentgermana gazeto provokan intervjuon, en kiu li postulis, ke oni donu al la popolo en GDR eĉ pli multajn liberecojn ol en FRG, ĉar nur laŭ tiu maniero la komunismo povus gajni la batalon kun la Okcidento.

La 12an de marto 1964 la reĝimo tiris la bremson kaj ekskludis la opoziciulon el la partio pro kontraŭpartia sinteno. Semajnon poste okazis kunsido, dum kiu oni decidis forpreni al li la rajton eduki la junularon kiel altlerneja profesoro. La 1an de aprilo Havemann perdis ankaŭ la gvidon de la Fizik-Kemia Instituto de la Humboldt-universitato. Al li restis nur okupiĝi pri malgranda esplorprojekto. Post kiam en okcidenta Germanio aperis lia libro „Dialektiko sen dogmo?" (Rowohlt, Reinbek 1964), kiu enhavis lian supre menciitan berlinan prelegaron, oni minacis lin, ke li perdos ankaŭ tiun projekton, se li ne revizios sian teorion. Sed Havemann rifuzis fari ĝin. En 1965 oni malpermesis al li labori kaj la 1an de aprilo 1966 li estis ekskludita ankaŭ el la Akademio de la Sciencoj de GDR. Al li restis nur publikigi kritikajn artikolojn en la okcidenta gazetaro. Havemann rekomendis komplete reformi la komunisman partion de (okcidenta) Germanio en la senco de la libereco, demokratio kaj pacismo kaj distanciĝi de la sovetia modelo. La reformojn en Ĉeĥoslovakio de la 60aj jaroj Havemann bonvenigis, ĉar en ili li vidis siajn esperojn konfirmitaj. Sed por li la vivo evoluis malbone. En la 1970aj jaroj li devis elteni pliajn ĉikanojn, kiuj praktike signifis hejman arestadon en sia domo en Grünheide, kiu estis seninterrompe observita de la Ŝtata Sekureco. Havemann forpasis en aprilo 1982. Lia rehonorigo fare de SED okazis postmorte en novembro 1989 post la falo de la Berlina Muro.

Kvankam post la konstruo de la Berlina Muro GDR estis hermetike fortranĉita de la ekstera mondo, kelkaj kulturaj niĉoj restis tamen konservataj, en kiuj povis prosperi kelkaj literaturaj aktivecoj, kiuj ne nepre estis konformaj al la oficiala ideologio. Lige kun tiu tempo estas menciindaj la nomoj de tri intelektuloj de GDR, kiuj fariĝis internacie konataj kaj interese kontribuis al la debatoj laŭ diversaj manieroj: Temas pri Stefan Heym, Christa Wolf kaj Wolf Biermann.

Stefan Heym, filo de juda familio el Ĥemnico, estis konata verkisto pro la libro *La tago X* (poste: *Kvin tagoj en junio*), kiu kritike traktis la ribelon de la 17a de junio 1953 en GDR, pro kio ĝi estis malaprobita de la SED-regantoj. En 1960 aperis en Lepsiko liaj rakontoj pri la dividata lando *Ombro kaj lumo*. Temis pri kritikaj skizoj pri la ĉiutaga vivo en GDR, la ekonomia abismo inter oriento kaj okcidento kaj la problemo de la rifuĝado de GDR-civitanoj.[159] La kutiman imagon pri la kapitalisma, mili-tisma kaj faŝisma FRG la aŭtoro kontrastigis kun la teruro de la etmensa diktaturo sub la signo de martelo kaj cirkelo, en kiu la sekreta servo observas kaj kontrolas ĉion kaj ĉiujn. Certe, tiu kritika verkado neevi-teble provokis la konflikton kun la ĉiopotenca ŝtato. Ĉar Heym, kiu verkis ankaŭ legindan biografian romanon pri Radek, frue engaĝiĝis en la kontraŭfaŝisma movado, tiu ŝtato ne povis tro krude trakti lin.

Per sia romano *La dividita ĉielo* (1963) ankaŭ Christa Wolf kontribuis al la diskuto pri la problemoj de la dividata germana lando, la amasa forfuĝado de la GDR-civitanoj al okcidenta Germanio

---

[158] La „stalinisto" Havemann havis ankaŭ kritikantojn, kiuj atentigis pri kelkaj kontraŭdiroj en sia biografio (vd. http://www.max-stirner-archiv-leipzig.de/dokumente/Steigerwald-Havemann.pdf. Biografion kaj publikigon de postlasaĵoj vd. https://www.thalia.de/shop/home/artikeldetails/ID12077942.html).

[159] La provo rifuĝi el GDR estis severe punita kiel ŝtata krimo (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Flucht_aus_der_Sowjetischen_Besatzungszone_und_der_DDR). Cetere, inter 1949 kaj 1981 en GDR estis mortekzekutitaj 52 personoj pro politika „krimoj" (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_von_in_der_DDR_hingerichteten_Personen).

kaj de la individua sorto de homoj, kiuj restis koncernataj de la ŝtata divido post la konstruo de la Berlina Muro.[160]

Karl Wolf Biermann estis germana kantisto kaj lirikisto, kiu translokiĝis nelonge antaŭ la 17a de junio 1953 al GDR kiel 16-jaraĝulo, kie li vivis en iu lerneja internulejo apud Ŝverino. Ankoraŭ kiam li estis lernanto, la sekureca servo klopodis varbi lin kiel neoficialan informanton, sed li rifuzis la proponon. Post la abiturientiĝo en 1955 li komencis studi politikan ekonomion en la Humboldt universitato de Berlino, kion li ĉesigis du jarojn poste por fariĝi, en 1959, asistanto de la reĝisoro de la Berlina Ensemblo. Poste li studis filozofion kaj matematikon en la sama universitato, sed ne ricevis diplomon malgraŭ sukcese finita laboro, dum matematikon li finis per ŝtata ekzameno. En 1960 Biermann, kiu ŝajne disponis pri iuj rilatoj al la familioj de Havemann kaj Honecker,[161] publikigis unuajn kantojn kaj poemojn. En 1961 li fondis en orienta Berlino la Berlinan Laboristan Teatron. La teatraĵo, kiu traktis la konstruon de la Berlina Muro, estis malpermesita, kaj en 1963 la teatro devis esti fermita. Lia kandidatiĝo por la SED-membreco estis rifuzita. Post kiam Biermann elpaŝis en okcidenta Germanio kaj tie publikigis siajn verkaĵojn, la SED-partio reagis en 1965 per totala malpermeso al li elpaŝi kaj publikigi en GDR. Sekve, la Ministerio pri stata sekureco eĉ evoluigis diablan planon por detrui lian personecon. Post fama amaskoncerto en Kolonjo en 1976[162] Biermann perdis la civitanecon de GDR kaj devis resti en la Okcidento. La ekskludo de Biermann signifis gigantan skandalon, kiu havis internacian rezonadon. Liaj pikaj originalaj kantoj tamen pluvivadis en la cerboj kaj koroj de la GDR-anoj kaj iusence fariĝis naciaj popolkantoj de GDR, kiu oficiale konis nur tedan komunisman marŝmuzikon, kiu iel memorigis tiun de la germanaj nazioj. En 1989 Biermann revenis triumfe kaj kantante al Lepsiko.[163]

Nature, la romano „1984“ de George Orwell, kiu tiel trafe priskribis la karakteron de totalisma ŝtato, estis konsiderita en GDR kaj aliaj socialismaj landoj kiel maldigna verkaĉo de la kontraŭ-ŝtata kampanjo, kiu servas al la klasa malamiko por diabligi la socialismon, kalumnii la gvidan rolon de la marksisma-leninisma partio kaj misfamigi Sovetunion. Kiu estis kaptita kiel posedanto aŭ leganto de tiu libro, riskis enkasigi drastan punon, inkluzive longan arestadon en malliberejo.

* * *

Similaj pensuloj kiel Havemann efektive ekzistis ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple ***Pollando***. Profesoro Tadeusz Marian Kotarbiński, prezidanto de la Pola Akademio de la Sciencoj, postulis la senkondiĉan libe-recon de la parolado kiel ĉefan rajton de la homo. Profesoro Stanisław Ossowski, la plej fama tiama pola sociologo, konsideris, ke sen disidentoj kaj reviziistoj aŭtentika spirita kulturo ne estas kreebla. La poeto Anton Słonimski esprimis sin kontraŭ ŝtata cenzuro. La ekonomikisto Edward Lipiński avertis, ke en Pollando kaj aliloke la marksismo degeneris kiel miksamaso de mitoj kaj duonveroj, kiuj servas nur al difinita grupo por defendi sian potencon. Alia sciencisto postulis la punadon de ĉiuj oficistoj, kiuj subpremas kritikajn esprimiĝojn. Sed ankaŭ ĉi tie la reĝimo reagis negative: La aperado de la gazetoj *Przęglad Kulturalny* kaj *Nowa Kultura* estis ĉesigita en majo 1963, la diskutklubo „Kurba cirklo” estis fermita. Iuj ĵurnalistoj kaj publicistoj de la radio kaj televido, inter ili multaj judoj, estis maldungitaj. En marto 1964 34 konataj polaj intelektuloj sendis leteron al la ĉefministro de Pollando, en kiu ili protestis kontraŭ la cenzuro. Sekve 14 de la subskribintoj subite ne plu povis publikigi siajn verkaĵojn. Okazis pluraj surstrataj manifestacioj: en Varsovio studentoj protestis kontraŭ la subpremado de la kulturo kaj aliaj homoj protestis kontraŭ la drasta altigo de la prezoj; en Toruń kaj Przemyśl oni protestis kontraŭ la ĉikanado de la katolika eklezio. Aliflanke, inter 1959 kaj 1964 180´000 hektaroj da grundo estis reprivatigitaj por la kamparanoj, pli multaj kolĥozoj estis malfonditaj ol fonditaj. Eĉ rifuĝintoj el GDR, al kiuj la vojo al Okcidento estis blokita pro la konstruo de la Berlina Muro kaj la fermo de la lando, trovis politikan azilon en Pollando.

* * *

***Hungario*** dume travivis pli trankvilan periodon, se oni ne konsideras la situacion en la agrikulturo kaj la tensiojn en la komunisma partio. Se pli frue Rákosi agis laŭ la principo *„Kiu ne estas por ni, tiu estas kontraŭ ni“,* Kádár preferis agi laŭ la inversa moto *„Kiu ne estas kontraŭ ni, tiu estas kun ni!“*

160 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Der_geteilte_Himmel.
161 Vd. https://www.bild.de/news/2007/affaere-margot-honecker-2989750.bild.html.
162 Vd. https://www.youtube.com/watch?v=GSw5H4tY29A&list=PL50C4BD42B17EE14D; https://www.youtube.com/watch?v=MzwuahHKj-M
163 Vd. https://www.youtube.com/watch?v=3OccyGrsmS0; https://www.youtube.com/watch?v=BdwRQfK7WT8.

Tiu proverbo fariĝis tutmonde konata metaforo kaj devis servi por fari la hungaran komunismon pli simpatia. En 1960 estis proklamita amnestio, kiu liberigis la plimulton de la partoprenintoj en la hungara ribelo de 1956. Senpartiaj homoj ricevis la rajton partopreni en la preparado de la VIIIa kongreso de la hungara komunisma partio, kie oni eĉ povis esprimi kritikon. En iuj elektoj estis prezentitaj du konkurencaj kandidatoj. Aperis libroj, kiuj antaŭe estis malpermesataj. En 1963 malfermiĝis la landlimo por okcidentaj turistoj, kaj en 1964 700´000 hungaroj povis vojaĝi eksterlanden. Konkordato kun Vatikano malstreĉis la rilatojn kun la katolika eklezio. Do, la degela vetero estis ankaŭ klare sentebla en la politiko de Hungario, pro kio Kádár rikoltis multe da internaciaj laŭdo kaj prestiĝo. Sed rilate la kolektivigon de la agrikulturo, kiun ili rigore klopodis puŝi antaŭen, la hungaraj komunistoj tamen restis senkompataj. Kiu kontraŭstaris ĝin, tiu riskis esti arestita kaj prezentita antaŭ tribunalo. Tiel, en 1960 okazis en ĉi tiu rilato 700 juraj procesoj kontraŭ tiaj homoj. Por fari la kolektivigon al la kamparanoj tamen pli akceptebla, oni promesis rekompenci ilin per baza pensio kaj la eblo partopreni en la profito de la produktado.

La pli liberala sinteno rilate al senpartianoj, iamaj ribeluloj kaj la aperigo de okcidenta literaturo kaŭzis senteblan kontraŭstaron de malnovaj stalinistoj kontraŭ Kádár, kiu celis definitive fini la eraon de Rákosi. Kadre de nova purigo dekoj da funkciuloj estis forigitaj de siaj laborpostenoj kaj eksigitaj el la komunisma partio, ankaŭ Rákosi mem. En sia sovetia ekzilo en Krasnodar (Kaŭkazo) li laboris por prepari sian revenon al Hungario por transpreni la povon. Li eĉ sukcesis starigi stalinisman frakcion en la hungara partio, kies anoj, kiuj sidis en la registaro kaj politburoo, konspire intrigis kontraŭ Kádár. La hungara ambasadoro en Pekino eĉ transdonis memorandon al Mao Zedong, kiu entenis akuzon kontraŭ la „titoisto“ Kádár. Sed Kádár faris kurtan proceson kun tiuj perfiduloj, kies arestadon li ordonis. Lia CK decidis ekskludi personojn, kiuj partoprenis kontraŭleĝajn agadojn dum la Rákosi-tempo, de postenoj en diversaj ŝtataj organoj kun jura signifo. Aliflanke, eĉ ekzistis iu sekreta grupo de „opoziciaj komunistoj“, kiuj staris ekster la partio kaj uzis la decidojn de la XXIIa partia kongreso de KPSU por daŭrigi la malstalinismigon de Hungario. Malgraŭ ĉia liberalgo, la gvidaj figuroj ĉirkaŭ Kádár venis al la konkludo, ke Hungario bezonas radikalan ekonomian reformon, kiu devas esti eĉ pli radikala ol tiu de Liberman.

* * *

Interesan evoluon oni observis en ***Bulgario***, kie la komunisma partio dividiĝis laŭ du orientiĝoj: apogantoj de Ĥruŝĉov (Ĵivkov) kaj apogantoj de Mao Zedong (Ĉervenkov), dum Jugov, ministro pri internaj aferoj, kiu mem celis fariĝi estro de la partio, intrigis kontraŭ ambaŭ grupoj. La „naciaj“ komunistoj de Bulgario, kies gvida funkciulo estis la anstataŭanta ministro pri agrikulturo, Kufardĵiev, kiu disponis pri sufiĉe granda influo en la bulgara armeo, celis politike neŭtraligi Bulgarion, aboli la diktaturon kaj dissolvi la kolĥozojn. Por atingi tiujn celojn en la oficira korpuso ĝermis la ideo de ŝtata puĉo, kiu estis planita por marto 1961. Sed en la plej lasta momento Jugov hezitis kaj konfesis la konspiron. En Sofio aperis tankoj kaj la ŝtata sekureco aktiviĝis por kontroli la incidenton. Okazis purigo, kies viktimoj estis i.a. popularaj partizanaj gvidantoj kiel Terkeŝov kaj Panov. En novembro 1961 Ĉervenkov perdis sian lokon en la politburoo kaj estis eksigita el la partio. La postan jaron ankaŭ Jugov devis foriri. La forigo de tiuj funkciuloj malfermis larĝan kaj kritikan diskuton pri la stalinismo kiel en Bulgario ĝi ne povis okazi ĝis nun. Samtempe oni rehonorigis la „titoiston” Trajĉo Kostov, la ĉefan viktimon de la stalinisma farsproceso de la jaro 1949, kiu postmorte ricevis la ordenon de heroo de la socialisma laboro. La kulpo por tiu krimo povis esti atribuita al Ĉervenkov kaj Jugov. Sed la amasaj krimoj de la jaro 1945 de la stalinistoj restis netuŝataj kaj tabuataj, ĝis 1989. Aperis kelkaj poeziaĵoj kaj rakontoj, kiuj prezentis realisman bildon pri la situacio en la prizonoj kaj koncentrejoj de la sekureca servo. Inter la verkistoj, kiuj traktis tiajn temojn, elstaris Nikola Lankov, kiu akuzis la sistemon en si mem. Por trankviligi la homojn, la partio sentis sin devigita fari kelkajn cedojn. Oni anoncis la eksigon de ĉiuj „politike degeneriĝintaj komunistoj“, proklamis amnestion kaj anoncis ekonomiajn reformojn, ĉar la provizado per nutraĵoj estis tre malbona. Per tio oni klare adaptis la politikon al la kurso de Ĥruŝĉov. Malgraŭ tiuj kosmetikaj modifoj la totalisma karaktero de la socialisma reĝimo ne ŝanĝiĝis. Male, protestoj kontraŭ la altigo de prezoj en julio 1962 estis respondìtaj per la anonco, ke oni severigos la labordevigon kontraŭ „pigruloj kaj parazitoj“. La lokaj aŭtoritatoj rajtis devigi ilin al ĝis dujara deviga laboro, la tribunaloj ĝis kvin jaroj.

* * *

Kun Tito Ĥruŝĉov starigis la „kastelan pacon", kiu estis tre kontenta, kaj ***Jugoslavio*** liveris al Moskvo preskaŭ la tutan teorian-retorikan municion por la kverelo kun Pekino. Al la ĉinaj komunistoj Edvard Kardelj, kiu okupiĝis ankaŭ pri la rilatoj inter socialismo kaj milito, riproĉis militan agresemon, aplikon de absolutigita perforto kaj malracian pensadon, kies radikojn li vidis en la ŝtata burokratiismo, malnova teknologio kaj la ideoj de Trockij. La popolkomunumojn li nomis mizeraj, sen allogo por iu ajn.[164] Ankaŭ Ĥruŝĉov mem mokis pri ili.[165] Do, el jugoslavia vidpunkto, en Ĉinio, regita de la etburĝa elemento, venkis la dogmemaj stalinistoj. Por Belgrado la danĝera komunismo moviĝis de Moskvo al Pekino, pro kio la jugoslavoj apogis Ĥruŝĉovon kontraŭ Ĉinio, kiu nomis lin „senhonta perfidulo de la laborista klaso". Samtempe, ili sentis sin rajtigataj kritiki ankaŭ Moskvon, kvankam Ĥruŝĉov signalis, ke li intencas agnoski la laboristajn konsiliojn en Jugoslavio kiel „progreseman fenomenon", kio verŝajne ne estis pensebla sen la konflikto kun Pekino. La plivalorigo de la jugoslavia sistemo fare de Moskvo do kaŭzis al Jugoslavio nemezureblan altiĝon de la prestiĝo.

En la ombro de tiu „kastela paco" de la jaro 1962 Jugoslavio fervore plu dediĉis sin al la evoluigo de la propra socia sistemo. La nova konstitucio de aprilo 1963 proklamis la sistemon de la aŭtonomeco kiel konkretan formon de la popola suvereneco kaj kiel plej altan krean principon, kiu tuŝu ĉiujn sferojn de la laboro kaj publika vivo en Jugoslavio. La rajto je aŭtonomeco estis proklamita kiel necedebla baza rajto de la jugoslavia civitano. Ĉar dum la debato pri la nova konstitucio multaj homoj postulis pli da bazaj rajtoj por la jugoslaviaj civitanoj, la nova konstitucio fiksis ankaŭ la rajtojn de la libereco elekti sian loĝlokon, de la nelezeblo de la persono kaj la leteran sekreton, krome la liberecon de la scienca kaj arta kreado, de la senĝena libereco praktiki religion kaj la rajton plendi kontraŭ la lezado de tiaj rajtoj antaŭ la tribunalo. La entreprena aŭtonomeco estis larĝigita al aro da publikaj institucioj, al la kunlaborantoj de la kulturaj kaj klerigaj instancoj kaj al la san- kaj socia sektoroj. La celo de tiu paŝo estis egaligi la statuson de la oficistoj kaj dungitoj kun la produktistoj. Sen klarigi ĉi tie la detalojn de la nova sistemo, la transformita konsilia sistemo kaŭzis unikan kuriozan sintezon de korporaciaj, konsiliaj kaj monarkiaj ideoj, ĉar Tito fariĝis dumviva ŝtatprezidento, kvazaŭ nova reĝo de Jugoslavio. Sub tiaj kondiĉoj la demokratio nature suferis. Ĉar la komunisma partio daŭre pretendis posedi la monopolon pri la vero, la opinia plurismo estis forte limigita. Disidentoj kiel Milovan Đilas, kiuj devintus esti liberigitaj, daŭre sidis en la prizono. Male, post la apero de lia sensacia libro „Interparoloj kun Stalin" li estis kondamnita pro malkaŝado de ŝtataj sekretoj kaj ne povis profiti la amnestion de novembro 1963. Ankaŭ la renoma revuo *Perspektivoj* estis malpermesita, en kiu grupo de intelektuloj protestis kontraŭ la ĉiopotenco de la komunisma burokratio, la manipulado de la laboristaj konsilioj kaj la „diktaturo de la direktoroj" kaj per tio praktike daŭrigis la kritikon de Đilas. Sed Tito reagis kun alergio kontraŭ tiuj intelektuloj, kiuj laŭ lia opinio difektas la junularon. La saman melodion oni konis jam de GDR kaj aliaj socialismaj landoj. Aliflanke, la principo de la socialisma realismo en la arto kaj kulturo estis entombigita, kvankam Hruŝĉov daŭre polemikis kontraŭ la reprezentantoj de la abstrakta arto kaj igis persekuti sovetiajn verkistojn. Do, intelekta kritiko estis daŭre subpremita kaj diversaj artverkoj estis malpermesitaj aŭ persekutitaj, se ili tro kritikis la regadomonopolon de la partio. Evidentiĝis, ke ankaŭ la titoismo suferis en principo la saman malsanon kiel la stalinismo en la aliaj socialismaj landoj. Klare, ke tiu politika praktiko de la komunisma partio ne vere kongruis kun la demokratia principo de la laboristaj konsilioj kaj de la entreprena aŭtonomeco, kio estigis pli kaj pli da kontraŭdiroj kaj fine kondukis ankaŭ la komplikan jugoslavian socialismon, kiu estis tiel admirita kaj adorita en la mondo, al la absurdo. Kun fatalaj sekvoj.

* * *

La plej fortan eĥon la XXIIa partia kongreso de KPSU (kiu okazis en oktobro 1961 post la konstruo de la Berlina Muro) trovis en ***Ĉeĥoslovakio***, kie la regantaj komunistoj tamen hezitis efektivigi duan malsta-linismigon. La unua duonsukcesa provo de 1956 post la XXa partia kongreso de KPSU limigis sin nur al la liberigo de kelkaj arestitaj stalinistoj. En somero Rudolf Barák, kiu eble povintus ludi la rolon de Ĥruŝĉov en Ĉeĥoslovakio, estis forpelita de Novotný kiel ministro pri internaj aferoj, ekskludita el la partio kaj kondamnita al 15-jara arestado en prizono pro laŭdiraj krimoj. Laŭ tia maniero Novotný libe-riĝis de sia ĉefa rivalo, kiu ŝajnis esti la sola, kiu kapablis kolekti la reformemajn fortojn kaj fariĝi ilia pinta gvidanto. Tamen, almenaŭ la giganta Stalin-monumento sur la Letná-monto estis eksplodigita

[164] Vd. Kardelj, E.: Socijalizam i rat. Osvrt na kinesku kritiku politike koegzistencije. Beograd 1960. Germanlingve: Sozialismus und Krieg. Belgrad 1960; anglalingve: Socialism and war. A survey of Chinese criticism of the policy of coexistence. London 1961; franclingve: Le socialisme et la guerre. Paris 1962.
[165] Vd. Kardelj, E.: Vermeidbarkeit oder Unvermeidbarkeit des Krieges. Reinbek 1961.

kaj la kadavro de Gottwald estis transmetita de sia pompa maŭzoleo al la nacia halo. Karol Bacílek kaj Viliam Široký estis senpotencigitaj. Sed en la nova politburoo (kiu nun nomiĝis prezidio), elektita en decembro 1962, restis esence la samaj malnovaj stalinistoj. Anstataŭ Viliam Široký la oficon de la ĉef-ministro okupis Jozef Lenárt (la 20an de septembro 1963). En la politikon venis la pli liberala komunisto Čestmír Císař, kiu fariĝis ministro pri lernejoj. Lia politiko estis sufiĉe ŝatata ĉe la studentoj, sed en 1965 li devis forlasi sian postenon, kiu kaŭzis proteston flanke de tiuj studentoj[166] Novotný, kiu parto-prenis en la XXIIa partia kongreso de KPSU en Moskvo, tamen estis devigita fari kelkajn konfesojn kaj cedojn.

Sur la paĝoj de diversaj ĉeĥoslovakaj gazetoj kaj revuoj fortiĝis pli kaj pli laŭta kritiko. Sed la reĝimo alergie reagis kontraŭ kritiko kaj minacis kritikantojn kaj kontraŭulojn per konsekvencoj aŭ per malpermesoj. La ideologia organo *Život strany* (Vivo de la lando) polemikis kontraŭ la libereco de la opinioj kaj la liberalismo en si mem, kiun oni kvalifikis danĝero por la libereco, ĉar oni opiniis, ke la absoluta libereco por iuj signifas la malliberecon por aliaj.[167] La opozicio postulis retrakti la Slánský-proceson kaj la slovaka partia organo *Pravda* alvokis rehonorigi la viktimojn de la stalinismo. Alexander Dubček engaĝiĝis en la komisiono de Drahomír Kolder, kiu devis esplori la stalinismajn persekutojn en Ĉeĥoslovakio. La intelektuloj revekiĝis, ĵurnalistoj kaj verkistoj avancis kiel avangarduloj de la publika opinio kaj havis apogantojn ankaŭ inter laboristoj kaj studentoj. Sed Novotný obstine kontraŭstaris la politikan rehonorigon de iamaj viktimoj. La premo fariĝis tamen tiel granda, ke Slánský kaj Clementis (kiuj estis ekzekutitaj) devis esti liberigitaj de ĉiu kulpo. Iamaj altrangaj partiaj funkciuloj kiel Marie Švermová, Gustáv Husák kaj Ladislav Novomeský, kiuj sidis longan tempon en la malliberejo, estis re-honorigitaj. Iuj ka-tolikaj ekleziuloj ricevis siajn rajtojn kaj la kondamno de la slovaka naciismo estis nuligita. En majo 1962 studentoj protestis en Prago kontraŭ la mizera provizado per nutraĵoj – la gvidantoj estis punitaj. La unuan de majo 1963 studentoj ree protestis antaŭ la monumento honore al la nacia poeto Karel Hynek Mácha (1810-36). La Karola universitato en Prago fariĝis centro de la opozicio kontraŭ la Novotný-reĝimo kaj la stalinismo entute. En majo 1963 okazis en Liblice interesa konferenco pri la jud-german-devena verkisto Franz Kafka (1883-1924), kiu estis organizita de Eduard Goldstücker, profesoro por germanistiko, kiu estis viktimo de la Široký-reĝimo kaj longe troviĝis en la malliberejo, inter alie en Leopoldov (Slovakio) kaj Jáchymov (Bohemio), kie li devis labori en la terura ekspluatejo de uranio, kiu servis al la sovetia projekto por konstrui nukleajn bombojn. La judeco de Goldstücker probable ludis rolon en lia persekutado far la tiamaj stalinistoj, kiuj inventis iujn akuzojn rilate al ŝtata perfido, spionado kaj konspiro. Depost la proklamado de la „socialisma realismo“ en la arto kaj literaturo fare de Stalin (en 1934) la verko de Kafka, kiun la komunistoj antaŭe alte aprezis, estis kondamnita kaj rifuzita de la stalinisma literaturkritiko kiel „burĝa dekadenco“, ĉar ĝi neis la normojn de la socialisma realismo kaj ĉar al ĝi mankis la ´pozitivaj´ herooj, kiujn la komunismo sugestis. En Ĉeĥoslovakio Kafka estis kvazaŭ anstataŭigita de la verkisto Julius Fučík, kiu estis mortigita en 1943 de la nazioj kaj stilizita kiel komunisma martiro, kiu pli konformis al la imagoj pri komunisma heroo. Sed Goldstücker kaj aliaj, kiuj estimis la verkaron de Kafka, vidis en ĝi tre aktualajn temojn, ekzemple pri teknikaj misuzoj kun mortigaj sekvoj kaj burokratiaj ekscesoj. Kafka estis majstro de la priskribado de groteskaj situacioj kaj de la detruado de iluzioj. Dum la konferenco, kiu havis ne nur literaturan, sed ankaŭ esence politikan signifon, okazis skandalo: Precipe la oficialaj reprezentantoj el GDR, kiuj ĉeestis ĝin, reagis alergie al la intenco de kel-kaj partoprenantoj trakti kaj interpreti la verkon de Kafka el la vidpunkto de la sen-senceco de la ´kafka-eska´ „socialisma burokratiismo“, kiu *fremdigas* la homon de si mem, ĉar ĝuste tion la marksismo celis eviti. Precipe la verkaĵoj „Proceso“ kaj „Kastelo“ ideale servis al tiaj komparoj. Orienta Berlino, kiu reagis alergie al ĉio „kontraŭ-socialisma“ en Ĉeĥoslovakio, vidis en tiu konferenco la komencon de la „kontraŭ-revolucia furiozado“ en Ĉeĥoslovakio; Goldstücker estis kulpigita kiel ĝia kaŭzanto. Sed Roger Garaudy, komunisto kaj filozofo el Francio, kiu mem ĉeestis ĝin, laŭdis la konfe-rencon pro ĝiaj „kontraŭ-dogmismaj tendencoj“. Dum multaj klarvidaj intelektuloj komprenis la valoron de la verkaro de Kafka por la homa spirito, la komu-nismaj ortodoksuloj do daŭre klopodis ignori kaj malpermesi ĝin. Dum GDR do obstine rifuzis publikigi la verkaron de Kafka,[168] en Sovetunio aperis en

---

[166] Unu jaron poste lia filino, kiu laboris en al praga unversitato, estis arestita dum studenta manifestacio kaj punita per restado en malliberejo. (Vd. Schulze Wesssel, p. 143).
[167] Reitzner, p. 47.
[168] Pri la perceptado de la verkaro de Kafka en la literaturo de GDR vd.: Winnen, A.: Kafka Rezeption in der DDR-Literatur. Würzburg 2006 (vd. Google books).

1964 tuta aro da rakontoj de Kafka, inter alie „En la punkolonio“, en 1965 ankaŭ „La proceso“.[169] En alia konferenco en Karlovy Vary de septembro 1963 la jugoslavia profesoro Franjo Tuđman[170] pridubis la karakteron de la Hitler-Stalin-pakto de 1939, kio kaŭzis proteston de la sovetia flanko. Tiel tiuj konferencoj havis siajn skandaletojn, kiuj siaspece kontribuis al la rompado de tabuoj. La aŭstra komu-nisto Ernst Fischer apogis la ribelan etoson en aŭtuno 1963 dum parolado en la praga universitato kaj alvokis la junularon refreŝigi la marksismon kiel „vivan-tan sciencon“, dum la itala komunisto Palmiro Togliatti definitive adiaŭis la stalinismon kiel sistemon de la personkulto kaj de la limigo kaj subpre-mado de politikaj kaj personaj liberecoj. Ankaŭ en majo 1964 miloj da ĉeĥaj studentoj protestis surstrate, postulis liberecon, vokis „malsupren la tiranio!“ kaj batalis kontraŭ la praga polico. Sed tiaj agadoj ankoraŭ ne povis skui la reĝimon. La regantaj ĉeĥoslovakaj komunistoj reagis per diversaj reprezalioj kontraŭ intelektuloj per rigora disciplinado, juraj persekutoj, policaj esploroj, publikaj misfamigoj kaj administraj malpermesoj. Sed la popolo ne plu to-leris tiujn metodojn de la komunisma subprema aparato kaj reagis per kontraŭstarado, protestado kaj rezistado. En Slovakio la semajna gazeto de la slovaka verkista asocio *Kulturní život* (Kultura vivo) avangardis en la rompado de tabuoj. Ĝi havis eldonkvanton de cent mil ekzempleroj kaj estis legata ankaŭ en Ĉeĥio. La stalinistoj nature ege malŝatis la memstarecon de la gazetaro, kvakam multaj verkis-toj kaj ĵurnalistoj ankaŭ estis komunistoj, sed kutime pli liberalaj. Novotný estis ŝokata kaj konsternata pro tiu nova malfermiteco de la diskuto en Slovakio kaj suspektis Dubček-on kulpa pri tiuj faroj. Dubček estis resendita al Slovakio, kie li kredis, ke lia kariero estas finita. Sed la slovaka partia ĉefo Karol Bací-lek estis baldaŭ forigita kaj anstataŭigita per Aleksandr Dubček (!)

Sub la impreso de la supre menciitaj fanfaronaj ekonomiaj fantazioj de Ĥruŝĉov pri la 80-procenta kresko de la industria produktado, la 65-procenta kresko de la popolenspezo kaj la 40-procenta kresko de la realaj enspezoj de la popolo inter 1959 kaj 1965, ankaŭ en Prago Novotný komencis eŭforie palavri pri ekonomia kreskego en Ĉeĥoslovakio, tiel ke li promesis, ke ankoraŭ lia generacio baldaŭ vivos en la komunismo, t.e. la epoko, en kiu la konsumantoj senpage ricevos varojn laŭ siaj bezonoj. Laŭ la ĉeĥoslovaka plano la popola enspezo devis kreski inter 1961 kaj 1965 je 42 procentoj, kio signifis averaĝan jaran kreskon de 8 procentoj. Tion oni celis atingi per 56-procenta kresko de la industria produktado kaj per 23-procenta kresko de la agrikultura produktado. Por atingi tiel fortan kreskon la investoj devintus kreski je 59 procentoj aŭ je 12 miliardoj da kronoj. Sed la tuta plano, kiu evidentiĝis komplete malrealisma, totale fiaskis. Jam en la jaro 1961 nek la antaŭvidita kresko de la produktado estis atingita nek la planitaj investoj estis plenumitaj, la reala evoluo eĉ multe postrestis la planon. En 1962 la popolenspezo stagnis kaj en 1963 ĝi eĉ reduktiĝis je 2,2 procentoj kompare kun la antaŭa jaro. Anstataŭ kresko de la industria produktado de 56 procentoj ĝi kreskis nur je 19,7 procentoj. Anstataŭ je 23 procentoj, la agrikultura produktado kreskis nur je 0,7 procentoj, kaj la investoj kreskis nur duone de la antaŭviditaj 12 procentoj. La popola enspezo kreskis en tiuj kvin jaroj nur je 10,2 anstataŭ 42 procentoj. La salajroj kreskis pli rapide ol la popola enspezo, kio altigis la aĉetpovon de la konsumantoj, sed la kvanto de la bezonitaj varoj ne kreskis. Krom tio, la kresko de la laborproduktiveco forte malpliiĝis kompare kun la antaŭaj jaroj. Ankaŭ la situacio de la investefiko estis katastrofa. Ĉiuj entreprenoj rapidis plenumi la planon, senkonsidere al la kvalito kaj bezono de la produktitaj aŭ produktotaj varoj. Ĉar ĉiuj entreprenoj staris sub forta premo kaj devis altigi la produktivecon (ĉar alie ili ne estus atingintaj la necesan kreskon de la salajroj), ili ĉiuj devis mensogi kaj trompi per malbonigo de la kvalito kaj manipulado de la produktstrukturoj por fikcie plenumi la kreskon de la produktiveco. Ju pli ofte ili faris tion, des pli grandaj estis la malproporcioj kaj la manko de bezonitaj materialoj. Komencitaj konstruoj ne povis esti finitaj, pli kaj pli da investoj ne povis esti realigitaj. Sub tiaj kondiĉoj la tuta produktado kreskis pli malrapide. Ktp. Tio estigis diablan cirklon, kiun la entreprenoj ne plu sukcesis forlasi. Laŭ Ota Šik, kiu kuraĝe klopodis puŝi la reformadon de la ĉeĥoslovaka ekonomio je la granda risko perdi la propran karieron, la Novotný-registaro ne kapablis kompreni tiujn ekonomiajn interrilatojn. En la prezidio (politburoo) de la KP komplete mankis taŭgaj ekonomiaj fakuloj, ĉar Novotný evitis ilin kiel la diablo timas la benitan akvon, kvankam li dependis de ili. Novotný, kontraŭ kiu la politika premo kreskis pli

[169] Pri ĉi tiu konferenco Goldstücker raportis en sia memuara libro: Prozesse. Erfahrungen eines Mitteleuropäers. München 1989. Vd. ankaŭ https://zeitgeschichte-online.de/thema/kafka-und-der-prager-fruehling, https://de.wikipedia.org/wiki/Kafka-Konferenz kaj https://www.tagesspiegel.de/kultur/literatur/kafka-konferenz-in-liblice-franz-und-der-fruehling/1358318.html; Bahr, E.: Kafka und der Prager Frühling. En: Politzer, H.: Franz Kafka. Darmstadt 1973, p. 516-538; Politzer, H.: Wer hat Angst vor dem bösen Franz? Kafka erscheint im Osten. En: Politzer, H.: Das Schweigen der Sirenen: Studien zur deutschen und österreichischen Literatur. Stuttgart 1968, p. 42-69.
[170] Ĉi tiu naciisma kroato fariĝis en 1990 prezidento de la sendependa kroatia ŝtato.

kaj pli, serĉis la kaŭzojn kaj erarojn sur la absolute malĝusta flanko kaj venis al la konkludo, ke la ĉefa problemo de la komencita reorganizado de la ekonomio estas la *mal*centralizado de ĝiaj strukturoj kaj ke ĝi kulpas pri la ekonomia krizo. Sen ajna objektiva analizo de la veraj kaŭzoj li komencis dispalavri groteskajn stultaĵojn pri loka patriotismo, egoismo kaj perdo de la disciplino de la entreprenoj dank´al pli granda memstareco ktp. Do, Novotný konvinkiĝis, ke la komencita reorganizado devas esti nuligita por ebligi pli fortan centralizadon de la planado. Do, okazis reorganizado de la reorganizado, kio ankoraŭ pli malbonigis la tutan situacion. La nova potenca respondeculo por la planado de la industrio fariĝis Drahomír Kolder, kiu restis ĝis 1968 manipulebla instrumento de Novotný kaj havis grandegan signifon por la sekva evoluo de la ekonomio en Ĉeĥoslovakio, kun fatalaj konsekvencoj.[171]

Krome, Novotný intencis efektivigi konstitucian reformon, per kiu Ĉeĥoslovakio devis fariĝi „socialisma" ŝtato kaj en kiu devis esti fiksita la gvida rolo de la komunisma partio. En tiu konstitucio diversaj slovakaj organoj ricevis minoran signifon, kio havigis al la centraj instancoj en Prago pli grandan potencon kaj kolerigis la slovakojn. Dubček notis en siaj memuaroj, ke ambaŭ ŝanĝojn li trovis malbonaj, sed en tiu tempo ankoraŭ ne eblis esprimi kritikon aŭ ataki la partion, precipe ĝian unuan sekretarion Novotný, kvankam tiu kondutis kiel malgranda diktatoro. Koncerne la propran sintenon pri la socialisma ekonomio Dubček skribis, ke en la komenco li komplete fidis je la centra plansistemo, kvankam ĝi suferis pro siaj videblaj mankoj en la gvidado. Iom post iom li tamen komprenis, ke la sistemo ne estas reformebla, sed devas esti malmuntita. De Dubček Novotný estis karakterizita kiel averaĝa partia funkciulo, laborista tipo, kiu ofte faris primitivan kaj krudan impreson, fajfante pri la opinioj de aliaj, kvankam de malproksime li aspektis objektive kaj malfermite. Ankaŭ Dubček dubis, ke Novotný kapablis kompreni la politikajn kaj ekonomiajn problemojn de la lando, pri kiuj li evidente ankaŭ ne vere interesiĝis, same kiel li rilatis indiferente al la situacio de Slovakio, kiun li komplete malŝatis, mistaksis kaj neglektis, pro kio ĝi restis subevoluinta lando. Do, estis klare, ke Novotný signifis la ĉefan obstaklon por efektivigi reformojn, ĉar li timis, ke li perdos la potencon.

Anstataŭ do distrumpeti la finan celon, ke Ĉeĥoslovakio atingis la etapon de la komunismo aŭ ke la ĉeĥoslovakoj baldaŭ vivos en la komunismo, la XIIa kongreso de la ĉeĥoslovaka KP okazinta en decembro 1962 dediĉis sin al la priskribado de la „misproporcioj" en la ekonomio kaj ne tre entuziasme bilancis la gvidan rolon de la partio precipe rilate la interpretadon de la realeco. La koncerna partia dokumento menciis mankojn ĉe la predikado kaj studado de la marksismo-leninsimo, kiu laŭ la partiaj analizantoj „havas neniun rilaton al la vivo". En aprilo 1964 Vladimír Koucký, estro de la ideologia komisiono de la CK, konstatis, ke en la fakultatoj de la universitatoj cirkulas la opinio, ke „ĉe ni ne ekzistas demokratio nek veraj elektoj".[172]

### Ekonomia analizo de Ota Šik

Grava momento por la ĉeĥoslovaka printempo en la ekonomio estis la publikigo de longa artikolo, kiun Ota Šik verkis en somero 1963, kiu devintus aperi en la partia ĉeforgano *Rudé právo*. Post la (supre menciita) apero de la artikolo de Jevsej Liberman en la moskva gazeto *Pravda* en Sovetunio en septembro 1962, la postan jaron la tempo ŝajnis al Ota Šik matura por fari novan klopodon konvinki la partiestron prepari pli profundan ekonomian reformon, des pli ke la ĉefaj reformideoj de Šik preskaŭ plene kongruis kun tiuj de Liberman. En sia artikolo Šik celis montri, ke ne estas la entreprenoj, kiuj kulpas pri la grandaj ekonomiaj problemoj, kiuj aperis en Ĉeĥoslovakio, kiel Novotný asertis lige kun la malcentralizado de la ekonomia planado, sed kulpas la ordonisma kaj malscienca planado mem. Šik krome montris kial la taskoj de tiu planado por kreskigi la produktadon ne povas esti plenumitaj kaj kial al la entreprenoj konstante mankas rimedoj kaj resursoj, krudmaterialoj, interproduktoj kaj nova teknologio. Sed Ota Šik klarigis ankoraŭ pliajn kaŭzojn de la nefunkciado de la ĉeĥoslovaka ekonomio. Ne la mobilizado de la ideologia agado, kiel Novotný sugestis, sed la enkonduko de merkatekonomiaj mekanismoj (kiuj priskribas la rilatojn inter mono kaj varo) plibonigus la ekonomion de la entreprenoj. Kiam Drahomír Kolder, respondeculo de la partio por la planado de la industrio, legis tiun artikolon, li nete malaprobis ĝin kaj strikte malpermesis al ĉefredaktoro Oldřich Švestka publikigi ĝin en *Rudé právo*. Sed

[171] Šik, ĉap. II, 1.

[172] En siaj memuaroj *Nokta frosto* Zdeněk Mlynář karakterizis Koucký kiel senskrupulan „cinikulon de la potenco, kiu private ŝatis Václav Havel, sed tute negative parolis pri aro da literaturaj verkoj ´en la nomo de la socialisma realismo´, dum en lia loĝejo pendis bildoj de modernaj pentristoj".

intertempe la ekonomio pli kaj pli malboniĝis, tiel ke Novotný mem sentis fortan premon kaj komprenis, ke li devas elpensi ion, se li volas konservi sian postenon. Šik telefonis al Novotný, kiun li ja persone konis kiel samsuferanton de la tempo de la arestado en la infero de la nazia koncentrejo de Mauthausen (Aŭstrio), kie li savis lian vivon,[173] kaj petis aŭdiencon. Novotný konsentis akcepti lin jam en la venonta tago por pridiskuti la aferon. Antaŭ ĉio Šik atentigis la partiestron pri la ege malfavora ekonomia evoluo en Ĉeĥoslovakio, kiu laŭ li ne povis daŭri pli longe. Novotný, pri kiu Šik lamentis, ke li ne estis intelektulo nek fakulo pri ekonomio, opiniis, ke oni devas nur entuziasmigi kaj mobilizi la laboristojn, por ke la plano estu plenumita kaj la ekonomio prosperu. Nature tian primitivan recepton por plibonigi la ekonomion Šik, kiu devis okupiĝi pri tiel komplikaj sferoj kiel la popola ekonomio kaj ekonomiko, pri kiuj Novotný malmulte komprenis kaj apenaŭ interesiĝis, ne povis serioze konsideri. Kiam Novotný proponis al Šik, ke li lanĉu similan diskuton kiel Liberman en Sovetunio, Šik respondis, ke li jam verkis prian artikolon, kiun *Rudé právo* rifuzis publikigi. Novotný koleriĝis kaj tuj telefonis al Švestka por ordoni al li la senprokrastan publikigon de la artikolo de Ota Šik en *Rudé právo*. Kvankam Novotný evidente mem ne legis ĝin, la artikolo aperis jam en la venonta tago en tiu gazeto en plena longeco. Šik, kiu dume gajnis la ludon kun Novotný, raportis, ke la reagoj en la entreprenoj kaj ĉe la popolo estis grandparte pozitivaj kaj entuziasmaj. Novotný eĉ proponis, ke Šik gvidu la koncernan reformkomisionon, kion li ankaŭ konsentis fari je kelkaj kondiĉoj, kiuj estis plenumitaj, kvankam flanke de Kolder oni devis enkalkuli malhelpojn.[174]

En kio do konsistis la reformproponoj de Ota Šik kaj liaj kunlaborantoj ?

Ĝenerale dirite, temis pri la provo renovigi la merkaton aŭ almenaŭ la ĉefajn merkatmekanismojn sub la kondiĉoj de la socialisma planado. Necesis difini la novan manieron de la popolekonomia planado pere de la enkonduko de merkataj mekanismoj. En tio oni samtempe celis eviti la negativajn efikojn de la kapitalisma ekonomia sistemo (ekz. ciklajn ekonomiajn krizojn, amasan senlaborecon). Nu, en tiu nova sistemo la forigo aŭ forfalo de superfluaj laborfortoj ne estis tute ekskludebla, ĉar oni ja celis ŝpari laborfortojn por akceli la teknikan progreson. Fakte ankoraŭ antaŭ la jarfino 1964 180 malprofitaj entreprenoj kaj fabrikoj kun entute 16´000 dungitoj devis esti fermitaj. Ĉi tiujn laborfortojn oni intencis investi en la sektorojn de la servoj, kiuj ĝis nun estis neglektitaj. Ĉi tiu procezo devis krome ankaŭ ebligi la celtrafan profesian reklerigon de la laborfortoj kaj konservi la ekvilibron de la grandaj popolekonomiaj faktoroj kiel la kresko de la produktado kaj de la privata kaj socia konsumadoj, de la investoj, laborokupiteco, cirkulanta monkvanto kaj de la ekstera komerco. Tiuj celoj ne devis esti realigitaj aŭ plenumitaj per centra planado, sed per la helpo de ekonomipolitikaj merkat-instrumentoj kaj ŝtataj mendoj, pere de objektiva politiko rilate al fisko, enspezoj, prezoj, kreditoj, ekstera komerco kaj valuto. Pri la salajroj decidu la entreprenoj mem. Por iuj tiaj teorioj servis la jugoslavia modelo, sed Šik finfine ne konsideris ĝin tute taŭga por Ĉeĥoslovakio. Fakte, Šik ne baziĝis unuavice sur la teorioj de Liberman, sed pli multe sur tiuj de la polaj ekonomiaj reformistoj Oskar Lange kaj Włodzimierz Brus. Kompare kun tiuj Šik multe pli forte atentis la rilatojn inter la centra plano kaj la merkato, kiujn li volis plibonigi, kaj emfazis la gravecon de liberaj prezoj por plibonigi la situacion rilate la mendadon kaj distribuadon de la varoj.[175]

Granda parto de la tempo de la laboro de la komisiono de Šik devis esti investita en la planadon de la transiro de la malnova al la nova sistemo, ĉar la enkonduko de la antaŭviditaj ŝanĝoj povis estis farita nur paŝon post paŝo. Ekzemple la rekalkulado de la administre fiksitaj prezoj al realaj merkatprezoj de la produktoj per la helpo de komputilaj programoj, kio estis monde unika projekto, voris multan tempon. En Jugoslavio oni simple liberigis la prezojn kaj transdonis ilin al la merkata reguligo. Tian sovaĝan ŝanĝon Šik volis tamen eviti, ĉar li timis gigantan inflacion. Li volis eviti, ke en Ĉeĥoslovakio la transformado de la ekonomio estu efektivigata ŝoke por la homoj, sed malrapide kaj en la daŭro de kvin ĝis sep jaroj. En tiu periodo ne devis esti atingataj simple nur altigo de la produktiveco kaj kresko de la produktado kun plibonigita kvalito de la varoj, sed ankaŭ la konverteblo de la ĉeĥoslovaka valuto por povi konkurenci sur la monda merkato, kaj ekvilibrita pagbilanco.

Ĉar en Ĉeĥoslovakio la ekonomia situacio dume malboniĝis, al Novotný restis fari nur promesojn pri plibonigo pere de ekonomiaj reformoj, uzurpante la argumentojn de la reformistoj kvazaŭ kiel

[173] Vd. https://www.youtube.com/watch?v=Oq72w41-SBs, https://www.youtube.com/watch?v=uUAiIndikJU.
[174] Šik, ĉap. II, 3.
[175] La detalojn pri tiu modelo Šik klarigis en libro aperinta en germana lingvo en 1967 kun la titolo „Plano kaj merkato en la socialismo”, kiu enhavis profundan kritikon de la stalinisma kaj jugoslavia ekonomiaj teorioj.

proprajn ideojn por la propaganda kampanjo de la senhelpa partia aparato, kvankam Novotný kaj la ceteraj malnovaj komunistoj mem tute ne estis konvinkataj, sed devis ion entrepreni por trankviligi la malkontentan popolon. Per aliaj vortoj: Novotný pledis por reformoj en la teorio, kvankam en la praktiko li malhelpis ilin. La stalinisto do falis en gravajn dilemon kaj embarason, kiuj fariĝis pli kaj grandaj. Ĉi tiu dilemo estis ligata kun la konfeso, ke en la pasinteco estis faritaj gravaj eraroj, ke la malnova ekonomia evoluo estis malbona kaj ke ĝi enhavas esencajn mankojn, kiuj kaŭzis gravajn problemojn al la ekonomio. Por la reformistoj fariĝis do pli facile rompi tabuojn de la socialisma ideologio kaj publike esprimi novajn ideojn.

Sub tiaj kondiĉoj Šik faris novajn kuraĝajn paŝojn. En iu kunsido de la Centra Komitato[176] en decembro 1963 li prelegis pri la rilatoj inter varoj kaj mono kaj pri la diversaj ekonomiaj kaj sociaj kontraŭdiroj en la socialisma sistemo, kion la ĉeestantoj, inter ili multaj malnovaj dogmemaj ekonomikistoj, aŭskultis kun intereso kaj skeptiko. Kiel Šik rakontis en siaj memuaroj pri la praga printempo, ili estis tiel surprizataj, ke ili estis kvazaŭ paralizataj kaj sentis sin malhelpataj kontraŭreagi. Sed la diskuto estis tiel aktuala, ke la dogmuloj jam ne plu kuraĝis malpermesi tiajn herezajn elpaŝojn de la reformistoj. Male, la kontribuo de Šik estis publikigita en la gazeto *Rudé právo* kelkajn tagojn poste en plena longeco. La dogmuloj ne plu povis eviti la aperon de tia artikolo, ĉar iam ili mem decidis, ke la diskut-kontribuaĵoj de la membroj de la CK ne estu cenzurataj, ĉar ili kredis, ke ili tamen restas lojalaj al la oficiala partia linio. La publikigo de tiu tamen tre kuraĝa artikolo en la ĉefa partia organo signifis grandan sukceson por Šik kaj lia komisiono, kies laboro iĝis iusence agnoskita de plej supre. Ankaŭ poste *Rudé právo* publikigis aliajn kontribuaĵojn de Šik, kiuj formis la esencon de lia reformkoncepto, kiun la partio vole-nevole adoptis ankaŭ mem – tiel longe ke Ĥruŝĉov regadis en Sovetunio. Novotný sklave imitis ĉiun ŝanĝon, kiu venis el Moskvo por konformi al la volo de la sovetiaj regantoj, kiuj finfine decidis ankaŭ la sorton de Ĉeĥoslovakio.

Kiel konate, Ĥruŝĉov subtenis ekonomiajn reformojn ne nur en Sovetunio, sed simpatiis ankaŭ kun reformprogramoj en la orienta bloko kiel en Ĉeĥoslovakio, kie la reformojn de la komisiono de Šik li konsideris speco de eksperimento. Sen la interesiĝo de Ĥruŝĉov pri ekonomiaj reformoj Novotný neniam havintus la kuraĝon permesi tian profundan reformemon en sia lando. Pro tio li ne povis tro malhelpi la reformistojn en sia lando. Sed la ĉefa problemo de Ĥruŝĉov estis, ke li ne kapablis transsalti sian ideologian ombron kaj restis ankrita en la malnova marksisma kaj stalinisma modelo de la ekonomio kaj ke ankaŭ li havis neniun imagon pri moderna ekonomiado, kiu altigu la kvaliton de la planado kaj de la produktado. Kvankam li ja celis aboli la rigidan burokratiismon, praktike li interesiĝis nur pri la reorganizado de la administrado kaj gvidado de la ekonomio surbaze de malnovaj socialismaj (t.e. marksismaj-stalinismaj) principoj, ĉar la kaŭzojn de la problemoj li vidis en la burokratiaj gvidorganoj kaj en la ministerioj, kies akra kritikanto li fariĝis. La centrajn branĉajn ministeriojn li volis anstataŭigi per ekonomiaj konsilioj, ĉar laŭ la opinio de Ĥruŝĉov ili pli multe taŭgis por kompreni la problemojn de la entreprenoj kaj regionoj, en kiuj tiuj entreprenoj troviĝis. Pri kontraŭdiroj en la ekonomia sistemo mem kaj pri enkonduko de merkataj mekanismoj li tute ne pensis. Do, malgraŭ malcentralizado de la centra plansistemo restis konservata inkluzive ĝiajn paradoksojn. Šik observis, ke la enkonduko de tiuj ekonomiaj konsilioj tute ne plibonigis la gvidadon de la produktado, sed male, ke la burokratia aparato ankoraŭ pli ŝveliĝis kaj ke la motivacio de la entreprenoj restis same malalta kiel antaŭe. Sed ŝajnis, ke

[176] Koncerne la hierarkion de la partiaj instancoj, en Ĉeĥoslovakio la plej supera politika organo estis la Partia Kongreso, kiu okazis ĉiujn kvar jarojn. Tiu kongreso decidis pri la politika kurso de la sekvaj kvar jaroj kaj elektis la Centran Komitaton (CK), kiu havis la plej superan potencon ĝis la sekvonta partia kongreso. Ĝiaj anoj kunvenis ĉiujn du monatojn por diskuti la aktualajn problemojn. La CK elektis Prezidion (alia nomo por Politburoo), la Unuan Sekretarion kaj la Sekretariaton por la plenumado de la kurantaj taskoj. En la malfruaj kvindekaj jaroj al la prezidio, kiu kunsidis unufoje en la semajno, apartenis 10-12 plenaj membroj, kiuj havis la voĉdonrajton, kaj pluraj kandidatoj sen tiu rajto. La Sekretariato, kiu funkciis kvazaŭ kiel ekzekutiva organo de la CK kaj de la prezidio, kies ordonojn ĝi efektivigis, ampleksis ĝis 10 sekretarioj kaj „membroj“. La anoj de la Sekretariato kunvenis du- aŭ trifoje en la semajno kaj estis subtenataj de ampleksa administra aparato, kiu disponis pri plurcent funkciuloj en pli ol 20 sekcioj aŭ fakoj, kiuj kontrolis ĉiujn partiajn instancojn kaj partiajn aktivecojn. Tipe por tiu sistemo estis, ke la funkciuloj de la sekcioj kaj fakoj havis pli da potenco ol la ministroj de la registaro kaj kutimis enmiksiĝi en ilian laboron. Ĉe la pinto de la Sekretariato staris la Unua Sekretario. Karakterize por la stalinisma sistemo estis ankaŭ, ke la Unua Sekretario havis la suverenan decidpovon. Li (mal)nomumis la personaron kaj povis influi la konsistecon de la CK kaj per tio tiun de la Sekretariato kaj Prezidio. Koncerne la rilaton inter la slovaka KP kaj la ĉeĥoslovaka KP, la slovaka KP estis grandparte submetata al la ĉeĥoslovaka KP kaj la membroj de la slovaka KP apartenis kolektive al la ĉeĥoslovaka KP. Aparta ĉeĥa aŭ moravia KP ne ekzistis.

Ĥruŝĉov tute ne kapablis vidi kaj kompreni la komplikaĵojn kaj kontraŭdirojn de la plansistemo, kiu validis en Sovetunio, malgraŭ iuj reformoj, kaj elpaŝis kun pli kaj pli absurdaj ideoj kaj proponoj.

Dum sia vizito de Ĉeĥoslovakio, kiu daŭris de la 27a de aŭgusto ĝis la 5a de septembro 1964, Ĥruŝĉov klarigis siajn proprajn reformprojektojn. Dum iu festmanĝado kun li, kiun ĉeestis ankaŭ membroj de la CK de la ĉeĥoslovaka KP, Šik havis la okazon aŭskulti liajn klarigojn pri la reformo de la gvidado en la sovetia agrikulturo kaj mem kontribui al la diskuto per komento kaj demandoj. Ĥruŝĉov obsedis ĉefe pri la malbonaj burokratoj, kiuj submigradas la ministeriojn por malhelpi liajn klopodojn pri la malcentralizado de la planado, ktp. Šik rimarkis, ke la diskuto pri esencaj problemoj de la centra socialisma planado kun li havas absolute neniun sencon, ĉar evidente ili tute ne interesis la sovetian ŝtatestron. Ĥruŝĉov disponis nur pri vertikala imago pri la organizado de la ekonomio, dum horizontala imago komplete mankis al li. Por eviti la riskon, ke Ĥruŝĉov koleros, se oni kontraŭdiros lin, Jiří Hendrych, membro de la CK de la ĉeĥoslovaka KP kaj de la ĉeĥoslovaka parlamento kaj influa funkciulo kaj piliero de la Novotný-reĝimo, klopodis deflankigi la sovetian gaston per alia temo, tiel ke Šik devis sin senti bruskita. Ĉar Ĥruŝĉov principe subtenis la ekonomiajn reformojn en Ĉeĥoslovakio en kia ajn formo, ne necesis provoki lin per herezaj demandoj; plej grave por Novotný estis, ke li ricevis la garantion el Moskvo por la apogo de la reformoj en Ĉeĥoslovakio.[177]

La 17an de oktobro 1964 la Centra Komitato de la ĉeĥoslovaka KP submetis la ekonomian reformon, kiun Šik kaj lia komisiono ellaboris en la pasinta jaro, al ĝenerala diskuto. Kvankam ili neniam estis vere negative kritikitaj, la reformproponoj de la komisiono de Ota Šik estis dekomence kontestitaj en la partio, ĉar la prezidio de Novotný strebis eviti la enkondukon de merkatekonomiaj elementoj kaj preferis konservi la ordonisman strukturon de la stalinisma planekonomio de Ĉeĥoslovakio. Por la komunistoj la vorto merkato estis tabua kaj signifis la diablon, kiu evitas la benitan akvon. La prezidio ripete resendis la reformproponojn al la komisiono de Šik, de kiu la dogmemaj fortoj postulis ŝanĝi kelkajn vortumojn por pli forte respekti la principojn de la socialisma planekonomio kaj de la „gvida rolo de la partio”. Tiel, la komisiono de Šik devis kvarfoje prilabori la proponojn. Aparte alergie la prezidio reagis, kiam ĝi rimarkis, ke Šik volis redukti la rolon kaj influon de la partiaj sekretarioj, kiuj povis enmiksiĝi en la decidojn de la gvidantoj de la entreprenoj. La maniero de la enmiksiĝo de tiuj sekretarioj estis pure arbitra kaj havis nenion komunan kun la logiko de la merkatekonomiaj mekanismoj. Pri la propono liberigi la entreprenojn de la partia enmiksiĝo la komisiono devis rezigni, ĉar la partio suspektis jugoslavian reviziismon. La komisiono devis eĉ timi, ke ĝi estos likvidita, se ĝi insistos pri tiaj proponoj. Pro tio la komisiono iom ŝanĝis la prioritatojn kaj emfazis la signifon de la sindikatoj en la entreprenoj, kiuj pli forte kontribuu per reklerigaj kaj sekurigaj rimedoj ĉe la laboristoj. Per tio oni celis limigi la komandan rolon de la partio. Sed ankaŭ tiaj proponoj ne plaĉis al la prezidio, tiel ke la laboro de la komisiono de Šik similis al la sizifa peno kvadratigi la cirklon. Nur kiam la proponaro entenis la necesajn formalajn formulojn pri la socialisma planado kaj la gvida rolo de la partio, la anoj de la prezidio pretis akceptis la submetitajn paperojn. Kiam en januaro 1965 la CK enkondukis la komencon de la ekonomia reformo, Šik vidis siajn originajn ideojn nebuligitaj. La problemo estis, ke la anoj de tiu prezidio komprenis malmulton pri ekonomio kaj nur interesiĝis pri la konservado de la dogmoj de la socialisma planekonomio kaj de la gvida rolo de la partio. La tiama financministro R. Dvořák estis rigida partia burokrato, kiu faris nenion memstare sen havi la konsenton de la ĉefoj. Plej malklera pri ekonomio estis Novotný mem, tiel ke Šik post kelkaj vanaj provoj rezignis klarigi al li ion ajn pri ekonomio kaj ekonomiaj reformoj, ĉar de li venis nur embarasaj kaj neraciaj reagoj. Pli pozitivaj reagoj venis de la entreprenoj mem, kie Šik ofte prelegis pri ekonomiaj reformoj kaj kie liaj reformideoj trovis pli kaj pli fortajn aprobon kaj apogon. La homoj montris sin pretaj akcepti reformojn, se ili vidis, ke ili povas nur plibonigi ilian materian situacion, kiu estis karakterizata de ĉiutagaj problemoj kaj mankoj de la vara provizado. Nature aperis ankaŭ negativaj reagoj de konservemaj ekonomikistoj, kiuj kolektiĝis precipe en la Ekonomika Altlernejo, kie troviĝis ankaŭ tuta aro da pli junaj ekonomikistoj, kiuj restis lojalaj al la teorioj kaj sanktaj dogmoj de la marksisma ekonomio. Tiuj ekonomikistoj, kiuj ĉiam venis al la samaj konkludoj pri reviziismaj kaj nemarksismaj proponoj, se temis pri la ideoj de Šik kaj de liaj samideanoj, havis malgrandan apogon en la popolo, kiu tamen deziris reformojn.

[177] Šik, ĉap. II, 4, 5.

## La faligo de Ĥruŝĉov en 1964

Isaac Deutscher, kiu analizis la situacion de Ĥruŝĉov longe antaŭ lia falo, trafe atentigis pri jenaj cirkonstancoj: Ĥruŝĉov klopodis venki la stalinismon per la metodoj de la stalinismo. Se Ĥruŝĉov estintus sukcesa, tiukaze la celo estus sanktiginta la rimedojn. Sed lia politiko fiaskis. Kaj tiel Ĥruŝĉov estis kaptita per la propra maŝo. Lia senkompata malkaŝado de la krimoj de la stalina tempo, kiu estis lia ĉefa historia merito, kaŭzis gravegan krizon en la komunismaj partioj en aliaj landoj. Liaj akuzoj estis akvo sur la muelejojn de la kontraŭ-komunismo. Amasaj eksiĝoj el la komunismaj partioj, precipe en Okcidento, estis la rezulto. Tiel, Ĥruŝĉov pli kaj pli trafis sub la kreskantan premon de siaj partiinternaj kontraŭuloj, kiuj riproĉis al li facilanimecon, aŭtokratecon kaj plumpecon. Grandega kaj neriparebla eraro estis, kiam li rifuzis al la ĉinoj la ekonomian helpon por grandstila konstruado de la industrio kaj revokis la sovetiajn teknikistojn kaj fakulojn, ĉesigis liveri maŝinojn, kies baza infrastrukturo jam ekzistis. Ĉion tion li faris por devigi la ĉinojn rezigni pri la popolaj komunumoj, ĉar la sovetia KP konsideris ilin maldekstra devojiĝo. Sed la ĉinoj tute ne intencis cedi la sovetian ĉantaĝon. La rezulto de tiu konflikto estis internacia skismo de la komunisma movado, kiu havis fatalajn sekvojn. Sed Ĥruŝĉov fiaskis ne nur pro Ĉinio, sed unuavice pro la neripareblaj difektoj de la sistemo de la stalinismo mem, kiun li ne sukcesis, ne kapablis, ne volis, ne intencis forigi.[178] Certe, Ĥruŝĉov lernis el faritaj eraroj, kiel Crankshaw opiniis, sed la ribelema kamparano-laboristo el la rusa kaj ukraina provincoj, kiu ĉiam malamis kapitalistojn kaj burĝojn, restis sovaĝa proleta ´porko, kio ĝenis la pli bone edukatajn kolegojn de la politburoo, kvankam ĉiuj estis konstruataj el la sama ligno kaj devis esti konsiderataj kiel gravaj stalinismaj kanajloj kaj krimuloj, kiuj kondutis kiel aŭtokratoj kaj subpremis la liberecojn de la sovetia popolo. Kvankam ĉiuj estis bolŝevistoj, Ĥruŝĉov ne vere estis akceptita de ilia rondo.

Unua puĉkonspiro kontraŭ Ĥruŝĉov okazis jam en 1957 fare de Kaganoviĉ, Malenkov, Molotov, Bulganin, Pervuĥin, Voroŝilov kaj Ŝepilov. Sed Ĥruŝĉov montriĝis dume pli forta kaj sukcesis forpuŝi siajn rivalojn en la venontaj jaroj.

Do, la konspiremo kaj puĉemo kontraŭ Ĥruŝĉov fare de la venĝemuloj en la politburoo ŝvelis jam delonge kaj atingis novan kulminon en 1964. Post sia reveno de iu eksterlanda vojaĝo Ĥruŝĉov iris ferii sur Krimeon kaj ŝajne ne rimarkis, ke en Moskvo prepariĝas (ĉi-foje flanke de Breĵnev, Podgornyj, Suslov, Ŝaljapin, Semiĉastnyj, Ŝelest k.a.) nova konspiro kontraŭ li sen lia scio.

En Moskvo dume cirkulis jam minimume tridek kaŭzoj por pravigi preferindan eksigon de Ĥruŝĉov kiel ĉefo de la partio kaj ŝtato, kiuj estis serioze konsideritaj de la politikaj partoprenantoj: tro hastaj propraj decidoj, senfina politika improvizado, malplena palavrado, ridinda fanfaronado kaj fantaziado, emo al personkulto, malbona gvidstilo, lezado de la principo de la kolektiva gvidado kaj komandemo, korupto kaj burokratia administrado, neevitado de nova ekonomia stagnado, mankanta respektado de la sciencaj scioj kaj nesufiĉaj praktikaj spertoj, indiferenta traktado de la komunisma evoluo, malĝustaj prioritatoj en la industrio, arbitra ordena distingado de Nasser (prezidento de Egiptio), eraroj en la ekstera politiko (kiuj kondukis al la perdo de la sovetia prestiĝo pro la krizo ĉirkaŭ Kubo, minacado de Usono per sovetiaj raketoj, erara taktiko rilate al Ĉinio, krizo de la rilatoj inter Moskvo unuflanke kaj Pekino, Tirana, Bukareŝto aliflanke), fiasko de la ekonomia integrado de orienta Eŭropo, persona ofendado de partiaj reprezentantoj kaj eksterlandaj personecoj, kontraŭdira politiko pri artsterko, sensenca puŝado de la maiza kultivado, multekosta loĝigo en Kazaĥio, troigitaj promesoj de la altigo de la vivnivelo, enmiksiĝo en la konstruplanadon de Moskvo, endanĝerigo de la monolita unueco pro la partia reformo de novembro 1962, nepravigeblaj intervenoj en la kultura vivo kaj misuzado de la potenco. Certe ekzistis ankoraŭ aliaj riproĉoj kiel la aĉetado de tritiko en Okcidento, la tro rapida alproksimiĝo al Federacia Respubliko Germanio sen konsulti la kolegojn en la politburoo kaj liaj kapricaj rilatoj al la ŝtata planinstanco Gosplan kun la celo reorganizi la agrikulturon. Dum Ĥruŝĉov, kiu posedis la atombombon, revis pri novtipaj longdistancaj raketoj (por timigi Usonon), la generalaro ĉirkaŭ Ĵukov preferis potencigi la armeon per kutimaj armiloj (probable por defendi sin kontraŭ Ĉinio).

Plej esenca kaŭzo de la kreskanta malpopulareco de la memstariĝinta eks-stalinisto en partiaj medioj tamen estis, ke lia pli kaj pli kaprica kaj kruda gvidstilo vekis kontraŭstaron ĉe multaj partiaj altranguloj, kiujn Ĥruŝĉov eksigis de siaj postenoj kiel unuaj sekretarioj en la respublikoj pro la rotacia sistemo, kiun li enkondukis en la partio kaj laŭdis kiel triumfon de la demokratio. Kun la eksigo de tiuj altranguloj, iliaj revokado al Moskvo, malaltrangigo kaj humiligo estis ligitaj kun detruo de iliaj karieroj

[178] Laŭ Havemann, vd. bibliografion, libro de 1977, p. 68.

kaj nature kreskintaj personaj retoj, kiujn tiuj multmeritaj partiaj funkciuloj konstruis dum jaroj kaj jardekoj. Ekzemple Leonid Breĵnev, kiu kolektis multajn meritojn en Ukrainio, Moldavio kaj Kazaĥio, estis subite revokita al Moskvo, kie li devis labori kiel minora CK-sekretario. Sed en majo 1960 li perdis ankaŭ tiun postenon kaj anstataŭ Voroŝilov funkciis inter 1960 kaj 1964 kiel prezidanto de la prezidio de la Supera Soveto, kio egalis al la ofico de la ŝtatestro de Sovetunio, sed temis pri posteno sen reala potenco. La ludoj, kiujn Ĥruŝĉov permesis fari al si kun siaj pintaj kunlaborantoj, ne plu estis tolereblaj por la nova kasto de partiaj funkciuloj, al kiu Breĵnev apartenis, tiel ke la taŭga ´solvo´ sekvis post mallonga tempo. La 14an de oktobro 1964 per la aprobo de la Centra Komitato de KPSU Nikita Ĥruŝĉov estis faligita kiel estro de la partio kaj kiel ĉefministro. Kiel oficialan klarigon por la demisio de Ĥruŝĉov la Kremlo publikigis la version, ke li mem petis esti liberigita de sia ofico pro alta aĝo kaj malboniĝo de la sanstato. Ĉar tiu komuniko ne estis tre kredinda en eksterlando, pluraj komunismaj partioj, kiuj estis surprizitaj de tiu okazaĵo, sendis delegitojn al Moskvo por esplori kio vere okazis.

Kvankam Breĵnev probable ludis gravan rolon en la decida bato kontraŭ Ĥruŝĉov, enkalkulante grandan personan riskon, la postsekvanto de Ĥruŝĉov devis fariĝi dume Frol Kozlov, kiu en la tiama partia hierarkio estis la dua numero kaj do estis traktita kiel „kronprinco" por heredi la tronon de la ĝenerala (aŭ unua) sekretario de KPSU. Kozlov estis ´griza´ figuro, konservema aparata karierulo sen ajna persona signifo. Neniu scias, kio estus plue okazinta, se li estus fariĝinta ĉefa potenculo de Sovetunio. Sed la 10an de aprilo 1963 Kozlov estis trafita de grava apopleksio, de kiu li ne plu resaniĝis kaj kiu kondukis al lia morto en januaro 1965. Tial, Leonid Iliĉ Breĵnev avancis kiel dua numero en la partia vico kaj estis elektita kiel lia posteulo en la ofico de la Unua Sekretario de la Centra Komitato de KPSU, dum Kosygin fariĝis nova ĉefministro kaj Mikojan prezidanto de la prezidio de la Supera Soveto (t.e. de iure ŝtatestro).

Post sia eksigo Ĥruŝĉov retiriĝis al sia daĉo, kiu troviĝis tridek kilometrojn for de la Kremlo. En 1966 li perdis ankaŭ sian formalan mandaton en la CK de KPSU. Liaj bildoj malaperis el la publikeco kaj lia nomo estis elsarkita el ĉiuj oficialaj publikaĵoj, tiel ke la popolo iom post iom forgesis lin. Evitita de la partiaj kamaradoj, Ĥruŝĉov izoliĝis kaj mortis la 11an de septembro 1971 en la aĝo de 77 jaroj pro korinfarkto. Anstataŭ ricevi la honoron esti entombigita apud la Kremla muro, kie troviĝas ĉiuj signifaj stalinismaj gvidantoj, li estis private enterigita en la tombejo Novodeviĉi en Moskvo, ŝirmita de la publiko. Kuriozaĵo estis, ke la tombo estis kreita de Ernst Neisvestnyj, kiun Ĥruŝĉov nomis en 1962 „degeneriĝinta artisto".

Estas okulfrape, ke la tuta kulpo denove trafis unuopan partian gvidanton. La tutan mizeron oni serĉis en la karaktero kaj laborstilo de Ĥruŝĉov. Certe, neniu menciita riproĉo estis maltrafa, sed kiel kutime oni ĉirkaŭis la bazajn problemojn de la sovetia sistemo kun sia monopolisma politika partia strukturo, kiuj ekzistis jam delonge kaj kiujn Ĥruŝĉov nur heredis sed ne solvis.

Ne eblas ĉi tie aldoni detalan konkludan analizon pri la rolo kaj la politiko de Nikita Ĥruŝĉov. Sendube, lia rolo kiel politikisto kaj lia politiko mem estis altgrade konfuzaj kaj kontraŭdiraj kaj donas okazon por diskutoj ĝis hodiaŭ. Ajna tro konciza resumo de la periodo de Ĥruŝĉov nature ne povas esti kontentiga.

Ankaŭ Ĥruŝĉov ne rezignis pri „socialismaj atingoj" kiel la sistemo de la ŝtataj direktoroj en la industrio, la kolektiviga ordo de la kolĥozoj en la kamparo, la cenzuro de la arto, kulturo kaj gazetaro, la politika kaj socia kontrolado fare de la sekreta servo kaj la ideologia rigideco, kvankam tiuj atingoj estis la rezultoj de la oktobra revolucio, bolŝevisma perforto, enlanda milito, ekonomia katastrofo kaj de la stalinisma teroro. Ĉiuj tiuj problemoj ne kongruis kun la evolustato de socio, kiu tamen intertempe moderniĝis kaj diversiĝis pro la industriiĝo. Kvankam Stalin kreis la stalinismon, ĝi ne plu estis forigebla, ankaŭ ne per la rimedoj de Ĥruŝĉov, sed male, ĝi pludaŭris en lia tempo. Kvankam li klopodis venki la stalinismon, li verŝajne subite timis, ke per sia malstalinismigo li perdos la kontrolon de la partio, kiu signifis ankaŭ lian personan finon. Kvankam li heroe malkaŝis Stalinon kiel amaskrimulon, li timis la sekvojn de la propraj faroj kaj returnis la revolucion. Ĉiu estro de la partio kaj ŝtato celis konservi la potencon de la partio kaj sian personan potencon. Pro tio Ĥruŝĉov ŝanceliĝis inter pragmatismo kaj utopio, minacado kaj cedado, reformemo kaj ĉesigo de reformprovoj eĉ per la perforto de perarmea interveno kiel en Hungario. Anstataŭ purigi la reputacion de Sovetunio pro la ekzisto de la siberia gulago, kiun li nur parte likvidis, li sufokis la literaturon kaj bruskis la verkistojn kaj intelektulojn, kiuj traktis tiujn temojn, kiuj fariĝis konataj en la tuta mondo, kaj eĉ fondis novajn koncentrejojn, kien li sendis kritikemajn homojn. Anstataŭ venki la ekonomian stagnadon, postlasitan de Stalin, li nebuligis kaj finfi-

ne faligis la rekomendojn de Liberman por la industrio kaj anstataŭ tio faris iun formalan reformon de la ekonomia administrado, vidante la problemojn en la gvidado anstataŭ en la sistemo mem. Anstataŭ dissolvi la malproporciojn inter la industrio kaj agrikulturo kaj likvidi la kolĥozojn laŭ la modelo de Jugoslavio kaj Pollando li akrigis la problemojn en tiuj sektoroj. Anstataŭ forigi la etoson de la timo en lando la sekreta polico daŭrigis sian tradician laboron. Anstataŭ konformi al la postuloj de la junularo, li subpremis ĝin kaj fortigis la intergeneracian konflikton, tiel ke la kolera opozicio pli kaj pli fortiĝis. Anstataŭ restarigi la unuecon de la socialisma bloko li perdis la kontrolon pri ĝi kaj akcelis la skismon de la komunisma movado. Anstataŭ do solvi la bazajn problemojn de Sovetunio li fortigis ĝiajn negativajn elementojn kaj arogante defendis ĝian potencon, tiel ke la antagonismoj ne malpliiĝis, sed kreskis. Kaj anstataŭ fini la orienteŭropan revolucion per raciaj kaj kontentigaj solvoj li nur flamigis kaj incitis ĝin ankoraŭ pli. Ŝanĝo de la sistemo estintus nepre necesa, sed Ĥruŝĉov timis, evitis kaj maltrafis ĝin. La atendoj de la popolo estis grandegaj, sed pro la ideologiaj kaj politikaj katenoj li ne povis plenumi ilin. Ĉar kaj por la partio kaj por la popolo kaj politiko li ne plu estis eltenebla, li devis foriri.

Malgraŭ ĉiuj negativaj punktoj kaj kontraŭdiraj okazaĵoj en la politika kariero de Ĥruŝĉov (oni pensu nur pri lia rolo en la konstruado de la Berlina Muro en 1961 aŭ dum la Kuba krizo de 1962), al tiu altgrade kontestata sovetia gvidanto apartenas honora loko en la historio de la homaro, kiel multaj okcidentaj historiistoj opinias, ĉar li kuraĝis malmunti la stalinisman sistemon, kiu kaŭzis tiom da teruro al la sovetia kaj multaj aliaj popoloj. Post lia sensacia historia „sekreta parolado“ de februaro 1956 rusaj timoj kaj okcidenta malfido estis mildigitaj. Ĉi tiu kurioza politikisto heligis per siaj homecaj ambicioj la malhelon, kiu ĉirkaŭis Ruslandon kaj aliajn partojn de la mondo. Eĉ se li ne tute rezignis pri krudaj provokoj kaj laŭtaj elpaŝoj, kiuj ŝokis la homaron, li forlasis la kutimajn vojojn de la stalinisma politiko kaj kreis la kondiĉojn por pli ekvilibrata kunekzistado, por politiko, kiu determinis la rilatojn inter Okcidento kaj Oriento en estonteco. Precip lia popolo kaj la popoloj en la komunismaj landoj de orienta Eŭropo dankis al li, ke li rompis kun la stalinisma pasinteco, kvankam ĝian malbenon li ne povis tute eskapi aŭ nuligi. Akuzante la teroron kaj kondamnante la personkulton de Stalin, li kontribuis al la homecigo de la sistemo, kiu perdis siajn plej terurajn trajtojn. La malstalinismigo, kiun Ĥruŝĉov iniciatis. postulis grandan kuraĝon de homo, kiu mem longe servis al Stalin kaj ties kruela reĝimo. Tiu kuraĝo ŝanĝis la komunisman mondon kaj la mondon entute. Per la faligo de la idolo, al kiu fatale omaĝis milionoj da komunistoj en la tuta mondo, Ĥruŝĉov faris gravan, pozitivan servon al la homaro kiel neniu antaŭ aŭ post li, kvankam la komunisman pekokazon, kiu malfeliĉe trafis la homaron, li ne povis nuligi. Lia deziro formi pli bonan komunisman socion, restis revo, iluzio, ĉar tiu komunismo aŭ socialismo de Lenin kaj Stalin, kiel ĝi evoluis en Ruslando ekde 1917/18 ĝis la morto de Stalin kaj en principo ankaŭ poste, ne fariĝis esence pli humanisma, ĉar ĝiaj malbonaj trajtoj troviĝis en la ideologio de tiu komunismo. Kvankam ankaŭ Ĥruŝĉov kiel multaj aliaj stalinismaj gvidantoj iĝis koruptita de la politika potenco, li ne estis malbonulo ´denaske´ kaj malgraŭ ĉiuj dubindaj personaj trajtoj konservis sian homecon kompare kun Lenin, Stalin kaj aliaj membroj de la politburoo de la stalinisma kaj poststalinisma epoko, kiuj estis laŭ sia nature malbonaj homoj. Ĝuste ĉi tiu punkto distingis lin de ĉiuj aliaj.[179] Tiu ĉi konkludo eble estas tro pozitiva en la kazo de sovetia gvidanto, kiu estis same envolvita en la stalinismaj krimoj kiel liaj partiaj kunbatalantoj, sed la menciitaj historiaj meritoj de Ĥruŝĉov estas tamen nekont-esteblaj.

### Ĉeĥoslovakio post la falo de Ĥruŝĉov

Nature, ankaŭ por Ĉeĥoslovakio la politika ŝanĝo en Moskvo havis fatalajn sekvojn.

Novotný estis ŝoke trafita pro tiu neatendata novaĵo el Sovetunio. Ankoraŭ kelkajn tagojn antaŭe li akompanis la gian ŝtatestron dum ilia komuna vojaĝo tra Ĉeĥoslovakio kaj subtenis ĉion kion li diris kaj faris. Nun, tiu sovetia aŭtoritato subite ne plu ekzistis kaj Novotný troviĝis en eĉ pli granda dilemo ol antaŭe. Nu, Novotný estis diverse perceptita en Moskvo. Unuflanke, li estis konata kaj malŝatata rilate la internan politikon kiel malfleksiĝema, dogmema kaj nereformema politikisto, sed aliflanke li estis alte aprezata lojalulo de la sovetianoj en la ekstera politiko, ekzemple rilate al Ĉinio. Kiel ajn, la faligo de Ĥruŝĉov kaŭzis ioman malvarmiĝon de la rilatoj inter Prago kaj Moskvo post la surtronigo de Breĵnev.[180]

---

179 Laŭ Neumann-Hoditz, p. 7-8; Crankshaw, p. 72-83.

180 Brahm, p. 14.

En sia malfacila situacio, la ĉagrenata Novotný faris neripareblan eraron kaj plendis ĉe Breĵnev, ke oni ne informis la gvidantojn de la „frataj landoj" anticipe kion oni planas fari kun Ĥruŝĉov. Breĵnev, la nova forta homo en la Kremlo, alergie reagis al lia letero, sed iusence Novotný pravis, ĉar nun li probable devis prediki al la ĉeĥoslovaka popolo ion alian pri la ekonomiaj reformoj, kiujn li kaj Ĥruŝĉov defendis dum pluraj jaroj. Krom tio, Novotný estis neatendite kritikita de Václav David, parlamentano kaj ministro pri eksteraj aferoj de Ĉeĥoslovakio, kiu aktivigis proprajn kontaktojn kun la novaj regantoj en Moskvo.[181] Kiel Ota Šik rakontis en siaj memuaroj, sub tiuj novaj kondiĉoj Novotný pli kaj pli perdis sian stabilecon kaj faris kontraŭdirajn decidojn, serĉante la sekurecon ĉe la novaj mastroj en Moskvo, kiuj pritaksis lin malfidinda partnero.

Sed en Sovetunio oni komencis retroigi la malcentralizadon de la ekonomio, anstataŭigante ĝin per la t.n. „ĥozrasĉot-reformo" de Aleksej Kosygin, kiu iel daŭrigis la ideojn de Liberman kaj koncentriĝis pri la plibonigo de la planado per aplikado de la principo de la rentabilitato de la produktado,[182] kombinante ĝin kun la t.n. ĥozrasĉot-principo de Lenin el la 20aj jaroj, kiu pli forte atentis la rilatojn inter kostoj kaj rikolto (en la senco de gajno).[183]

La altan sciencan nivelon de la planado kaj kalkulado oni celis atingi per la funkciigo de potencaj komputiloj. Laŭ Šik, tiu tuta koncepto, en kiu la nocioj de la merkato kaj konkurenco komplete malaperis, estis kontraŭdira miksaĵo kaj celis nur revivigi la malnovan plansistemon sub la mantelo de novaj frazaĵoj – do temis pri malnova vino en novaj tuboj. Al la entreprenoj oni daŭre altrudis devigajn planojn, kiujn ili nur malfacile povis plenumi. Tiel, en Sovetunio la ekonomio plu funkciis pli malpli laŭ la malnovaj metodoj.

Pro la politika aŭ persona rivaleco inter Kosygin kaj Breĵnev, tiuj reformoj perdiĝis en la sablo, kio kaŭzis eĉ pli da problemoj al la sovetia ekonomio, kiu malkreskis aŭ stagnis kaj ne povis kontentigi la varajn bezonojn de la konsumantoj.[184]

La konfuzata politburoo en Prago kompreneble urĝis adapti sin al la nova politiko de Moskvo kaj strebis eviti la "aventurajn" reformojn proponitajn de la komisiono de Šik, kiu estis pli kaj pli forpuŝita. Samtempe oni tamen ne volis tute rezigni pri ili, ĉar ili ja ĝuis grandan apogon en la popolo kaj malgraŭ ideologia dubindeco povis havi ian utilon. Do, oni ja intencis efektivigi ilin, sed en alia senco. La modifita programo estis prezentita dum kunsido de la CK en januaro 1965, sed la kuriozan lingvaĵon de ĝia enhavo jam neniu plu vere komprenis. En tiu momento la malnova „Ŝtata komisiono por la gvidado kaj organizado", kiu ekzistis ekde la unua malstalinismiga reformo de 1958, nun ricevis novan signifon. Tiu komisiono, en kiu realaj ekonomiaj analizoj ne estis faritaj, ĉefe havis la taskon observi la laboron de la ekonomiaj institucioj, okupiĝi pri la formalaj organizaj kondiĉoj kaj rilatoj de la ekonomia sistemo kaj fari proponojn por ĝia plibonigo. La karaktero de la laboro de tiu komisiono, ĉe kiu iusence temis pri konkurenca strukturo por la komisiono de Šik, do estis iom alia, kvankam ĝi parte eĉ kongruis kun la laboro de la komisiono de Šik. Post la faligo de Ĥruŝĉov tiu komisiono tamen rimarkeble distanciĝis de la komisiono de Šik, kiu riskis komplete izoliĝi. Efektive okazis, ke la politburoo decidis, ke la reformproponoj de la komisiono de Šik estu nun reformulataj de la ŝtata komisiono por la gvidado kaj organizado. Ĉar la komisiono de Šik daŭre ĝuis sufiĉe grandan subtenon de la popolo, Novotný ne kuraĝis likvidi ĝin, tiel ke la distanciĝo dis de la ideoj de Šik devis okazi tiel, ke la popolo apenaŭ rimarkis ĝin. La nova formulado estis farita tiel ruze, ke ekstere ĝi similis al la ideаro de la komisiono de Šik, tiel ke Šik eĉ ne vidis seriozan kialon por distanciĝi de la nova koncepto, kvankam en ĝi malaperis la esencaj ideoj, tiel ke oni principe povis ankaŭ reveni al la malnovaj konceptoj. Finfine, la respondeco por la reformoj estis donita al la planministerio, kio signifis ke la komisiono de Šik fariĝis kvazaŭ superflua kaj estis praktike elŝaltita de la efektivigo de la reformoj. Per tio Novotný esperis forgesigi la reformideojn de sia malnova kontraŭulo kaj ties samideanoj.

---

[181] Ĉefministro en tiu tempo estis Jozef Lenárt. La konsistecojn de la ĉeĥoslovakaj registaroj en tiu tempo vd. sub http://www.kolumbus.fi/~mb3069/dokumentit/tsh.htm.
[182] Pli detale vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/1965_Soviet_economic_reform.
[183] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Khozraschyot. Ĉe ĥozrasĉot temis pri maniero de la kalkulado (aŭ kontado) de la elspezoj kaj enspezoj de entrepreno sub la kondiĉoj de la centra socialisma planekonomio per egala disdivido de la gajno favore al la kunlaborantoj de la entrepreno, en kiu la administre fiksitaj prezoj restas konservataj kaj merkataj mekanismoj estas elŝaltitaj, kvankam oni intencis simuli kapitalismajn konceptojn kaj enkonduki la ideon de la rentabilitato (profito aŭ gajno).
[184] Schattenberg, ĉap. 6.

Ke tiu forgesado tamen ne okazu, precipe la loka gazetaro esence kontribuis al la diskonigo de la reformideoj de Šik, kiun oni ofte invitis prelegi en la regionoj. Samtempe li kaptis la okazon doni intervjuojn al diversaj okcidentaj gazetoj, tiel ke liaj reformklopodoj fariĝis eĉ pli bone konataj ekster Ĉeĥoslovakio. Šik eĉ veturis al GDR por klarigi siajn teoriojn, kvankam la tieaj gvidaj oficialaj ekonomikistoj, kiuj kondutis pli pape ol la papo mem, abomenis kaj rifuzis liajn ideojn. Krom tio, Šik daŭrigis prelegi sine de la CK de la ĉeĥoslovaka KP kaj publikigis siajn artikolojn en la centra organo *Rudé právo*. Kiam la ĉeĥoslovaka ekononomio dume iomete pliboniĝis, aperis simptomoj de ĝenerala memkontenteco, tiel ke Šik devis eĉ pli forte klopodi por komprenigi al la homoj la malnovajn problemojn de la ĉeĥoslovaka ekonomio, kiuj en la esenco ja ne malaperis. Do, la komisiono de Šik ne perdis sian signifon, sed male eĉ akiris malgrandan potencon de la kredindeco kaj kompetento, kio tute ne plaĉis al Novotný, kiu estis komplete diskreditata ĉe la popolo.[185]

Do, Šik ne rezignis kaj, male, decidis, lanĉi kvazaŭ politikan lukton kontraŭ Novotný kun la espero, ke eblos venki lin per la helpo de vastaj popolaj tavoloj, kiuj subtenis la reformojn de Šik. Sen tio la tuta ĝisnuna laboro de Šik estintus vana.[186] Sed tiu lukto havis ankaŭ kelkajn riskojn, ĉar en Moskvo sidis kaj regis la malamikoj de la orienteŭropa revolucio.

Al tiu Moskvo Ota Šik vojaĝis en printempo 1965, post kiam li ricevis inviton de la Ekonomia Instituto de la Akademio de la Sciencoj por prelegi pri la reformspertoj en Ĉeĥoslovakio. Li do kvazaŭ veturis en la kavon de la leono. La sovetiaj kolegoj estis scivolemaj pri liaj opinioj rilate la demandojn de la problemo de la varaj rilatoj en la socialisma ekonomio. Lia ĉi-rilata libro aperis la antaŭan jaron en Prago. Estis lia unua okazo rekte diskuti kun sovetiaj kolegoj. En Sovetunio Šik faris tre ambivalentajn observojn. En diskuto inter kvar okuloj, t.e. inter du unuopaj personoj evidentiĝis, ke la kolegoj kritike rilatis al la sovetia plansistemo. En la diskuto inter pluraj personoj la rusoj estis singardaj kaj esprimis ne pli ol ĝenerale konatajn frazaĵojn, kaj en kompanio kun la direktoro ĉiuj silentis.

Kiam Šik prelegis antaŭ kelkcent aŭskultantoj en granda aŭditorio, li faris strangajn spertojn. En la malhela anonimeco de la salono iuj pli junaj aŭskultantoj elpuŝis laŭtajn konfirmojn pri la pravaj asertoj kaj klarigoj de Šik, dum en la unuaj vicoj sidis maljunaj oficialaj sinjoroj, kiuj montris ege sinistrajn mienojn. Kiam Šik estis akceptita de la planministro Baibakov, li afable kaj interesite aŭskultis, kion Šik diris al li, sed la ĉeĥo komprenis, ke la sovetianoj jam ne plu volis subteni la ideojn de la ĉeĥoslovakaj merkat-reformistoj.

Fakte, en 1964 Liberman mem vizitis Ĉeĥoslovakion, kie li konvinkiĝis, ke la ĉeĥoslovakaj reformoj estis pli profunde pripensitaj ol la sovetiaj konsideroj. Post la falo de Ĥruŝĉov la sovetiaj kolegoj ne plu pretis, kapablis aŭ kuraĝis malferme paroli pri ĉio tio, kvankam oficiale oni ankoraŭ menciis la Kosy-gin-reformon, kiu estis, kiel dirite, adaptaĵo de la Liberman-idearo.

La enkonduko de la prilaborita ekonomia reformo, kiu devis okazi la 1an de julio 1965, estis prokrastita al la 1a de januaro 1966. Šik povis konstati, ke dank´ al plurjara informa, instrua kaj eduka laboro inter partiaj funkciuloj almenaŭ venkis la kompreno, ke la stalinisma sistemo havas neniun sencon kaj ke la avantaĝoj de la reformoj estas evidentaj. Sed la popolo ankoraŭ hezitis adopti ilin, ĉar oni timis senlaborecon kaj aliajn negativajn efikojn. Do, la nova sistemo povis konvinki la homojn nur, se ĝi generos sukcesojn. Tiel, la malnova pensmaniero de la popolo iusence alianciĝis kun la kontaŭstaremo de la konservemaj partiaj funkciuloj, kiuj preferis ŝanĝi nenion, ĉar ili alkutimiĝis al la malnova sistemo.

Novan socialisman ordon por Ĉeĥoslovakio celis ellabori ankaŭ Eugen (Evžen) Löbl, kiu fariĝis kunlaboranto en la reformista grupo de Ota Šik post sia rehonorigo kiel ano de la komunisma partio kaj pri kiu ĉi tie estu dirite kelkaj vortoj. Loebl estis unu el la akuzitoj dum la Slánský-proceso de 1952, kiu kondamnis lin al dumviva arestado en prizono. Li celis pruvi, ke la marksismo-leninismo ne plu taŭgas por la kondiĉoj de la scienc-teknika revolucio kaj la moderna konsumsocio kaj ke ĝi bezonas adapton kaj novajn ideojn. Löbl bone komprenis la obstaklojn por la ekonomiaj reformoj de Šik en Ĉeĥoslovakio, kiuj laŭ li ne malaperos, se oni ne enkondukas racian ekonomian gvidstrukturon, se oni subtenas malprofitajn anstataŭ profitdonaj entreprenoj kaj se ne ekzistas ekvilibro inter makro- kaj mikro-ekonomio.[187]

---

[185] Šik, ĉap. II, 6.
[186] Šik, laŭ ĉap. II, 5.
[187] Bartsch, p. 276-8.

* * *

Post sovetiaj postuloj starigi nukleajn armilojn en Ĉeĥoslovakio, la 15an de oktobro 1965 estis subskribita ĉi-koncerna traktato, laŭ kiu devis esti konstruitaj tri bazoj por meti tiajn armilojn en tiu lando. La traktato enhavis klaŭzon por ĝia aŭtomata longigo je dek jaroj; la bazoj devis esti kontrolitaj kaj priservitaj de la sovetia personaro. La postan jaron marŝalo Greĉko postulis la translokadon de du sovetiaj divizioj ĉe la okcident-ĉeĥoslovaka limo.[188]

Antaŭ la pordo staris nun la XIIIa kongreso de la ĉeĥoslovaka KP, kiu alportis al Ota Šik novajn malagrablajn surprizojn.

Dume, la kontraŭuloj de la reformoj sukcesis konvinki la politburoon enkonduki nur kelkajn principojn de la reformoj kaj ke la kompleta reformo estu lanĉata nur post tri jaroj, kiam ĉiuj grandkomercaj prezoj estos kalkulataj por apliki la merkatmekanismojn. Laŭ Šik tio estis nura ruza taktiko por prokrasti kaj endormigi la reformojn. En februaro 1966 Šik sukcesis denove aperigi longan artikolon en *Rudé právo*. Grandparto de la redaktoroj de la gazeto subtenis la reformojn, kvankam la sama ĉefredaktoro Švestka restis konservema. Novotný kaj lia politburoo ŝajnigis konduton, kvazaŭ ili oficiale estus por la reformoj, kvankam ili abomenis, timis kaj bremsis ilin. Ĉar la popolo apogis la reformojn, Novotný vidis sin devigata elpaŝi publike kiel ilia apoganto, kio nature estis nura sinteno de ekstrema hipokriteco. Šik eĉ ricevis altan premion de la Akademio de la Sciencoj, por kiu Novotný devis gratuli lin persone okaze de ĝia transdono. Kaj D. Kolder, la respondeculo pri industria planado, kiu antaŭe sisteme sabotis la klopodojn de la komisiono de Šik, nun subite engaĝiĝis favore al la reformoj.

La laŭvica XIIIa partia kongreso de la ĉeĥoslovaka KP okazis de la 31a de majo ĝis la 4a de junio 1966. Ĉeestis ĉirkaŭ 2000 delegitoj, inkluzive delegaciojn de aliaj signifaj komunismaj partioj. La sovetia delegacio estis gvidita de Leonid Breĵnev persone. Sian bone preparitan prelegon Šik oficiale anoncis por la komenco de la unua tago, ĉar multaj prelegoj, kiuj devis sekvi poste kun aldona diskuto, forfalis pro tempomanko. Efektive, lia prelego estis registrita kiel unua sur la listo, sed Šik baldaŭ rimarkis, ke oni volas eviti, ke li elpaŝu kaj tiel lia vico estis konstante ŝovita malantaŭen. Evidentiĝis, ke Novotný timis, ke Šik povus radikaligi la diskuton en nedezirata maniero. En sia ĉefprelego Novotný mem eĉ ne menciis la reformojn, do Šik devis ion fari. Multaj delegitoj informiĝis ĉe Šik, kial li ne elpaŝas kaj ricevis la klarigon, ke Novotný volas eviti lian paroladon. La premo kontraŭ Novotný do kreskis. En tiu momento Kolder ludis sian novan miraklan rolon kaj klarigis al la anoj de la politburoo, ke oni ne povas preni decidojn pri la plia evoluo de la reformoj sen lasi paroli la estron de la komisiono mem. En la lasta tago de la kongreso Šik finfine povis prezenti sian prelegon, kiu signifis malgrandan sensacion por la publiko, ĉar ĝi entenis akran kritikon kontraŭ la bremsantoj de la reformoj. Tio kaŭzis aplaŭdojn, kiuj embarasis la konservemajn komunistojn. Kiam je la fino Šik alvokis al politika demokratiigo, eksplodis aplaŭdego, kiu havis demonstrajn trajtojn kaj eĉ ne finiĝis, kiam Šik jam delonge sidis sur sia seĝo. La rigidiĝintajn vizaĝojn de Novotný kaj Breĵnev oni povis vidi en iu filmo, kiu estis produktita de la svisa televido, kiun Šik spektis multajn jarojn poste en sia svisa ekzilo.[189] Šik estis konsiderita de Breĵnev kiel homo, kiu volas restaŭri la kapitalismon en Ĉeĥoslovakio. Tuj post la fino de la partia kongreso Hendrych renkontiĝis kun Šik, al kiu li esprimis partan malkontentecon pri lia parolado. Precipe ĝenis lin la alvoko al politika demokratiigo, kiun li konsideris nenecesa. Li eĉ volis, ke tiu parto de la parolado estu fortstrekita en la koncerna publikigo en *Rudé právo*, sed Šik rifuzis lian postulon. La teksto do aperis kun kelkaj koncizigoj, pro kio Šik estis vokita de Novotný, kiu energie riproĉis lin, ke li celas tro haste enkonduki la reformojn. En tiu okazo Novotný konfesis al Šik, ke jes li volis eviti, ke li paroladu dum la partia kongreso, ĉar li timis tumulton.[190]

Per siaj reformproponoj Šik ne povis promesi helan estontecon en la komunisma socio, kiel Richta (vd. pli sube) kaj aliaj faris. Kiel ekonomikisto Šik povis nur analizi la aktualajn ekonomiajn problemojn, eltiri konkludojn kaj fari proponojn por pliefikigi la ekonomian sistemon kun la celo plibonigi la ekonomian situacion de la entreprenoj kaj altigi la vivnivelon de la popolo. Nature li estis draste miskomprenita de la homoj en siaj klopodoj, en kiuj la partiaj ortodoksuloj vidis la forlason de la socialismo kaj la retransformon de la socialisma ekonomio al la kapitalisma sistemo.

---

[188] Pauer p. 99.

[189] Unikan foton vd. sub https://ekonomika.idnes.cz/rok-1968-ota-sik-reforma-0uz-/ekonomika.aspx?c=A180821_112134_ekonomika_jn.

[190] Šik, ĉap. II, 7.

**Daŭrigo de la politika subpremado en la tempo de Brejnev kaj la klopodo rehonorigi Stalinon**

En la sovetia KP Breĵnev enkondukis tute alian regadostilon, kiu devis esti pli demokratia, pli plurisma kaj antaŭ ĉio malpli kruda, pli afabla kaj respektema en la rilatoj kun la funkciuloj kaj kunlaborantoj de la partio. Breĵnev ne volis esti tirano kiel Stalin aŭ Ĥruŝĉov, sed la aŭskultema, pacienca moderatoro-reĝisoro, kiu ne celis trudi sian opinion al la aliaj kaj kiu submetiĝas al la kolektivo, en kies nomo li parolis. Do, necesis eviti la erarojn, kiujn faris liaj antaŭuloj. Tiu sinteno estigis fiksajn kaj kelkfoje bizarajn ritualojn, kiuj povis esti tedaj kaj streĉi la paciencon de la partoprenantoj dum la diskutado, verkado de protokoloj kaj paroladoj kaj prokrasti la decidojn. Per tiu maniero de la regado kaj gvidado Breĵnev iusence fariĝis novtipa moderna ´bona´ caro, kiu serĉis la agnoskon de la partianoj kaj de la popolo mem kun la celo plibonigi la aferojn. En la 70aj jaroj la tuta sovetia sistemo rigidiĝis pro tiuj ritualoj de la kolektiva gvidado kaj pro la pedante respektinda partia disciplino, kiun neniu kuraĝis tuŝi, kritiki aŭ ŝanĝi.[191]

La alvenontan politikon de Breĵnev, kiu devis sekurigi la propran pozicion en malfacila ĉirkaŭaĵo de obstinaj kaj rivalantaj partikorifeoj, Zdeněk Mlynár karakterizis en 1979 jene: „Breĵnev kreis iom post iom en la ideologio kaj politiko eklektikisman mikson el stalinismo kaj pragmatismo, kiu forlasis pli kaj pli la grundon de la reformkomunismo (kiu en Prago tiam pli kaj pli gajnis signifon) favore al la prioritatigo de la grandpotencaj interesoj de USSR kaj de ĝiaj imperiismaj metodoj en la landoj, kiujn ĝi regis (…)“.[192]

Kvankam Breĵnev do probable celis esti pli milda kaj pacama partiestro, koncerne la ŝtatan komunisman doktrinon kaj koherecon de la sovetia bloko, kiujn li devis defendi kiel reprezentanto de la sovetia ŝtato kaj kiel ŝtatestro mem li estis senkompromisa kaj maltolerema. La erao de Sovetunio sub la regado de Leonid Breĵnev komenciĝis per la enkonduko de nova doktrino, kiu esence anstataŭis la Ĥruŝĉov-doktrinon. Tio signifis, ke preskaŭ ĉiuj reformoj, kiuj estis enkondukitaj de Ĥruŝĉov inter 1956 kaj 1964, estis nuligitaj, kaj se ili ne estis tute abolitaj, ili estis almenaŭ limigitaj aŭ kritikitaj. Ĥruŝĉov fariĝis fipersono, pri kiu oni ne plu parolis. La periodo de Ĥruŝĉov signifis por Breĵnev nenecesan interrompon de la stalinismo, kiu tamen kaŭzis kreskon al Sovetunio, dum la periodo de Ĥruŝĉov alportis nur krizojn kaj stagnadon, do la kontinueco devis esti restarigita. Ne la ekscesoj de Stalin, kiujn Ĥruŝĉov jam kondamnis, sed la ekscesoj de Ĥruŝĉov devis esti korektitaj. Kvankam oni konservis la kondamnon de la personkulto, Stalin estis iusence rehabilitita kiel grava gvidanto kun grandaj meritoj en la historio de Sovetunio kaj de la konstruado de la socialismo. Laŭ Breĵnev kaj ties partiaj ideologoj Ĥruŝĉov troigis la malstalinismigon, do ĝi devis esti bremsita kaj parte retroigita. Samtempe, la rehabilitado de Stalin ne devis signifi la restarigon de la stalinismo laŭ la malnova maniero. La eraroj kaj meritoj de Stalin devis esti ekvilibritaj. La novaj regantaj mastroj de Sovetunio sendube konsciis pri la granda ŝarĝo, kiun la sovetia (aŭ rusa) komunismo portis sub la terorisma regado de Stalin dum tri jardekoj, kaj ili celis senŝarĝiĝi. La bildo, kiun Ĥruŝĉov pentris pri la pasinteco, do devis esti korektita kaj la malstalinismigo estis proklamita kiel finita. Nun sekvis la malĥruŝĉovigo. La 8an de majo 1965 Breĵnev denove prononcis la nomon de Stalin sen negativa senco, kaj du tagojn poste la bildo de Stalin reaperis en la publikeco. Aperis libroj, kiuj favore priskribis la homajn trajtojn de Stalin kaj iuj verkaĵoj de Stalin estis reeldonitaj. En oktobro 1966 Breĵnev vizitis Kartvelion, kie li gloris la grandan revoluciulon, kio estis respondita de la homoj per tondra aplaŭdo. Iusence la stalinismo estis restaŭrita, tiel ke oni povas paroli pri la komenco de la novstalinismo aŭ neostalinismo en la (frua) periodo de Breĵnev.

Samtempe, la nova registaro en Moskvo faris kelkajn „liberalajn” cedojn: la deviga laboro en la industrio por la studentoj estis abolita, la politeknika instruado estis limigita kaj la kolĥozanoj ricevis pli grandan privatan grundon por prilabori. Ankaŭ la etnaj malplimultoj ricevis iujn avantaĝojn. Do, oni aplikis la politikon de la vipo kaj sukerpano.

En aprilo kaj decembro 1965 sur la stratoj de Moskvo okazis malgrandaj manifestacioj, kiuj estis organizitaj de Aleksandr Ginsburg kaj Jurij Galanskov, du sovetiaj disidentoj kaj radikalaj adeptoj de la senperforteco, precipe la dua. Sed por sia opoziciemo li pagis altan prezon. Galanskov estis sendita al psikiatria kliniko (kion cetere ankaŭ Ĥruŝĉov praktikis dum sia regadotempo kun diversaj opoziciu-

191 Por sekurigi la propran potencon, Breĵnev, kiu ne estis malica aŭ kruela tipo, sukcese forpuŝis siajn partiajn rivalojn iom post iom de siaj pozicioj per ruza taktiko kaj granda pacienco. Liaj malsanoj akriĝis, psike kaj fizike li rapide degeneris, tiel ke li – kaj la ceteraj maljunuloj de la politburoo – ne nur aspektis kaj parolis kiel debiluloj, sed ankaŭ ne plu kapablis reformi la sistemon, kiu aŭtomate rigidiĝis en plena stagnado ĝis la kolapso en 1990.

192 Vd. Mlynár, en Pelikàn 1979, p. 58.

loj), poste kondamnita al sepjara severa punaresto en la gulago de Mordovio, kie li mizere mortis pro sanga veneniĝo.

Kvankam Anatolij Rybakov ade prilaboris sian romanon „Infanoj de la Arbato“, kiun li komencis skribi fine de la 1950aj jaroj kaj submetis al la cenzuraj instancoj en 1965, ĝi neniam povis aperi en tiu tempo.[193] Ne forgesinda estas ankaŭ la rolo de la aŭtoro Bulat Okudĵava, kiu kritikis la farojn de la cenzuro en la literaturo kaj subskribis peticiojn kontraŭ la arestado kaj malliberigo de verkistoj, aparte Solĵenicyn.

Se oni kredas, ke la intelektuloj, verkistoj kaj sciencistoj de Sovetunio rezignis ribeli kaj kapitulacis antaŭ la nova reĝimo, oni eraras. Male, la sciencistoj utiligis la falon de Ĥruŝĉov por postuli la praktikadon de eĉ pli forta senideologia scienco. La literaturistoj kaj artistoj esperis pli grandajn liberecojn. Kvankam Breĵnev signalis, ke li intencas pli forte kontroli la kulturan vivon, li tamen celis atingi kastelan pacon kun la krea intelektularo. La reprezentantoj de tiu branĉo komprenigis al la regantoj, ke ili ne deziras havi novan personkulton, kiu ja efektive denove minacis la landon. Kiam la XXIIIa partia kongreso de KPSU alproksimiĝis, okazis strangaj incidentoj. La verkistoj Julij Daniel kaj Andrej Sinjavskij estis kondamnitaj al multjara arestado en prizono, en la sovetia gazetaro aperis memorartikoloj pri Ĵdanov kaj ĉiuj teatraj spektakloj, kiuj kritike traktis la tempon de Stalin, estis eliminitaj el la programo. 27 konataj verkistoj, artistoj kaj sciencistoj skribis leteron al la Centra Komitato de la KP, kiu estis petita eviti la restaŭradon de la stalinismo. Inter ili troviĝis Paustovskij kaj Tvardovskij. Dum la partia kongreso Breĵnev parolis pri renegatoj. Inter la progresemaj kaj restaŭremaj intelektuloj establiĝis la frakcio de la konservemuloj, kiuj evitis apogi unu el tiuj grupoj kaj pretis aliĝi al la pli forta bataliono. Je la flanko de la konservemuloj Ŝoloĥov pledis kontraŭ la libereco de la gazetaro. Lin kontraŭis Aleksandr Solĵenicyn, kiu en majo 1967 publikigis malferman leteron al la delegitoj de la IVa kongreso de verkistoj. En ĝi li protestis kontraŭ la „daŭra neeltenebla subpremado”, pro kiu la sovetia literaturo suferas jam de jardekoj. Precipe li kritikis la cenzuron, kiu ne estis antaŭvidata de la konstitucio, kiel li rimarkigis. Li nomis ĝin restaĵo de la mezepoko, kiu malpermesas libere esprimi pensojn kaj permesas al malkleraj personoj arbitre agi kontraŭ la verkistoj. Nu, Solĵenicyn estis ege kolera, ĉar oni konfiskis lian literaturan arkivon, malpermesis iujn verkojn kaj prelegojn. Lia alvoko ne estis senefika: En junio 1967 82 renomaj sovetiaj verkistoj postulis de sia asocio honestan diskuton pri la cenzurado de la literaturo. Alian furiozan leteron skribis Andrej Voznesenskij al *Pravda* por protesti kontraŭ mensogaj praktikoj kaj bruskado de verkistoj en la verkista asocio.[194]

La kondamno de la verkistoj Daniel kaj Sinjavskij en februaro 1966 signifis la finon de la espero je libereca kulturpolitiko. La kondamnitoj estis konsideritaj kiel kontraŭsovetiaj elementoj. Sinjavskij kritikis la pervertigon de la marksismo fare de la stalinismo, kvankam li konfesis resti adepto de la oktobra revolucio. Sed tio ne helpis savi lin. La rezulton de la proceso li nomis absurda, sen ŝanĝi la proprajn vidpunktojn. Eĉ en Pollando la kondamno de tiuj verkistoj kaŭzis proteston inter studentoj de la varsovia universitato (kiuj cetere apartenis al la pola KP). Sed la kampanjo kontraŭ Daniel kaj Sinjavskij enkondukis kaj inspiris ankaŭ la homrajtan movadon en Sovetunio de la 70aj jaroj, pri kiu Breĵnev kaj KGB-ĉefo Andropov vole-nevole devis okupiĝi. Ankaŭ tuta aro da sovetiaj civitanoj protestis kontraŭ la verdikto kontraŭ Daniel kaj Sinjavskij. Kvankam Sovetunio utiligis la „Jaron de la homaj rajtoj”, kiu estis proklamita de UN en 1968, por propagandi ĝin en Sovetunio, Breĵnev rifuzis kompreni la homrajtajn aktivulojn kaj disidentojn, ĉar li opiniis, ke tiaj homoj, kiuj signifis por li kaj laj kolegoj „damaĝajn sociajn elementojn”, ne povas kaj ne devus ekzisti en socialisma lando, ĉar ili nur ĝenas la sovetian ordon. Breĵnev kaj la sovetiaj gvidantoj, kiuj evidente komprenis ion alian pri homaj rajtoj ol en Okcidento, toleris ilin nur ĝis kiam ili ne direktis sin kontraŭ „la socia ordo kaj la interesoj de la sovetia popolo”. Ĉar la sovetiaj gvidantoj timis perdi sian prestiĝon en eksterlando, al kio kontribuis diversaj disidentoj, kritikaj verkistoj kaj homrajtaj aktivuloj, kies agadoj kaj verkoj kaŭzis bruon en Okcidento, ili preferis prisilentadi ilian ekziston, malpermesi al ili publikigi librojn aŭ sendi ilin al psikiatrejoj kaj prizonoj. Podgornyj kaj Kosygin proponis eĉ pli radikalajn solvojn, se ili sugestis publikajn ekzekutojn kiel en Ĉinio aŭ la ekziladon de tiaj homoj en la malvarmajn regionojn de la nordo. Aliaj metodoj de la sovetiaj regantoj kaj de la KGB estis fizike detrui malplaĉajn ekspoziciojn de nekonformismaj artistoj kaj rifuzi la rektan dialogon kun disidentoj kiel Solĵenicyn aŭ Saĥarov, ellandigi kaj sencivitanigi ilin

[193] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Die_Kinder_vom_Arbat.
[194] Pri la konflikto inter Voznesenskij kaj Ĥruŝĉov en 1963 vd. https://www.youtube.com/watch?v=3f9izHJGIoo.

aŭ puni ilian „kontraŭsovetian sintenon" per ilia forigo de la profesia posteno aŭ sendado al izolita urbo.[195]

Eĉ en la armeo senteblis bolanta etoso kontraŭ la provo rehonorigi Stalinon. Tie oni protestis kontraŭ la mensoga legendo pri la kulpeco de marŝalo Tuĥaĉevskij, kiu estis mortigita, kvankam Stalin sciis, ke li estis senkulpa. Voroŝilov kaj Budjonnyj estis konsideritaj kiel senhonoraj aĉuloj. Iuj ĉeestantoj plendis dum memorinda kunveno de la 16a de februaro 1966, ke Stalin kulpas pri tio, ke la plej bonaj armeaj gvidantoj estis likviditaj kaj ke li malhelpis, ke ili povis prepari sin pli bone por defendi la patrujon dum la dua mondmilito. Oni klare venis al la konkludo, ke la propolo ne estis sufiĉe protektita de la registaro antaŭ la danĝeroj, kiuj minacis ĝin. Iu alia aldonis, ke oni estus devinta mortpafi Stalinon, sed anstataŭ tio oni nun klopodas rehonorigi lin, kion li trovis absolute neakceptebla. La debato montris, ke la ĉeestintaj profesoroj kaj historiistoj estis bone informataj pri la veraj okazaĵoj dum la tempo de Hitler kaj Stalin.

Tiel, la diskuto pri la rehabilitado de Stalin skuis kaj duonigis la tutan popolon. La gazeto *Juneco* publikigis iun leteron de marto 1923 de Lenin pri la krudeco kaj senskrupuleco de Stalin. La homoj perdis sian paciencon pri konstantaj promesoj. Inaj komsomolanoj plendis pri malbelaj kaj maltaŭgaj laborvestaĵoj, kvankam ekzistas pli modaj kostumoj, kiujn ili ne havas la okazon ricevi.

Dum la XXIIIa kongreso de KPSU (1966) Ŝoloĥov defendis la kondamnon de Sinjavskij kaj Daniel, kiun li eĉ nomis milda. Lidija Ĉukovskaja, alia konata verkistino, kies libroj ne povis aperi en Sovetunio, protestis kontraŭ tiu elpaŝo en malferma letero al Ŝoloĥov, kiun ŝi avertis, ke la literaturo ne estu submetata al la punjustico. Ŝi promesis al li, ke lia „hontinda parolado ne estos forgesata de la historio". Post tio formiĝis nova movado en Sovetunio, kiu instruis la sovetiajn regantojn pri juraj normoj en procesoj. Aleksandr Ginsburg verkis „Blankan libron" pri la proceso (1967), kiu estis sendita al la prezidanto de la Supera Soveto. Pro tio Ginsburg estis kondamnita en 1968 pro „kontraŭŝtata propagando" al kvinjara arestpuno en koncentrejo.[196]

19 konataj personecoj, inter ili Andrej Saĥarov (vd. sube) kaj la kompozitoro Ŝostakoviĉ, subskribis memorandon, kiu estis same sendita al la Supera Soveto de Sovetunio, por protesti kontraŭ la severigo de la punleĝaro.

Ĉar la protestoj de la opoziciuloj ne povis aperi en la oficiala gazetaro, ĝi estis des pli vigle distribuita en la subtera reto de la t.n. „samizdato" (memeldonado), kiu estis efika sistemo, ĉar ĝiaj komunikaĵoj tre rapide disvastiĝis en tuta Sovetunio pere de transdonado de mano al mano. Laŭ tiu kanalo estis ´publikigitaj´ multaj protestleteroj de nekontentaj civitanoj al la adreso de la sovetiaj partiaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj. Ekzemple naŭdek matematikistoj protestis kontraŭ la perforta sendo de iu kolego al nerva kliniko, ĉar la aŭtoritatoj konsideris lin psikmalsana. En aliaj kazoj 170 kaj 80 sciencistoj subskribis tian leteron por esprimi sian proteston kontraŭ io alia. Kiam en la Breĵnev-tempo en Ukrainio komenciĝis granda nombro de juraj procesoj kontraŭ iuj anoj de la inteligencio, 134 ukrainiaj intelektuloj protestis ĉe la registaro de USSR. Ktp. Por disvastigi tiujn verkaĵojn la homoj utiligis maŝinajn litertajpilojn, kiujn privatuloj en principo ne rajtis posedi, ĉar tiaj instrumentoj estis rezervataj al entreprenoj kaj altlernejoj sole kun rigoraj registrado kaj kontrolado fare de la aŭtoritatoj.[197]

Inter la severe persekutitaj neformalaj kaj alternativaj organizaĵoj, kiujn Borys Levytzkyj menciis en sia libro pri la politika opozicio en Sovetunio de la 60aj jaroj (kiu inter alie listigis la nomojn de 70 politikaj malliberuloj), troviĝas la „Unuiĝo de la komunistoj", kiu trovis ĉe parto de la popolo, precipe komsomolo kaj inter leningradaj intelektuloj, sufiĉe grandan eĥon. Pluraj de ĝiaj gvidantoj kiel Vadim Gaenko, Ljudmila Klemanova, Valerij Ronkin (amiko de Julij Daniel), Sergej Moskov, Valerij Smolkin, Sergej Ĥaĥaev kaj aliaj estis punitaj per multjaraj arestoj en malliberejoj. Ĉi tiu organizaĵo, kiu baziĝis sur la marksismo-leninismo, proklamis la batalon kontraŭ „negativaj fenomenoj en la sovetia realeco". Ili ofte riskis sian vivon, kiam ili agis kontraŭ armataj krimuloj, ebriuloj kaj „huliganoj". Krom tio, ili celis venki la stalinismon. Aparte pika dorno en iliaj okuloj estis partiaj gvidantoj, kiuj ludis adaptiĝeman rolon en la stalina tempo, ekzemple Miĥail Suslov, kiu estis traktita en ilia subtera bulteno *Kolokol*

195 Vd. ankaŭ Schattenberg, p. 419-36.
196 La originalan tekston vd. sub https://imwerden.de/pdf/belaya_kniga_po_delu_sinyavskogo_danielya_1967__ocr.pdf.
197 Laŭ Borys Levytzkyj, p. 18-25.

(sonorilo). Kiam la ĉi-rilata diskutcirklo estis malkovrita kaj likvidita, oni malkovris pli ol 250 membrojn. En la prizonoj kaj labor-koncentrejoj la arestitaj aktivuloj daŭrigis sian lukton por civitanaj rajtoj.

Alia marksisma studenta grupo nomiĝis „Partio de la veraj komunistoj" kaj limiĝis al la urbo Saratov. Verŝajne temis pri diskutklubo, kiu proklamis la lukton kontraŭ la stalinismo. Ankaŭ aktivuloj de tiu grupo estis severe traktitaj per arestpunoj kaj senditaj al la malliberejo.

La gvidantoj de la „Novtipa Komunisma Partio" devenis el la urbo Rjazan kaj same estis kondamnitaj al multjaraj arestpunoj en malliberejo. La sama sorto trafis la membrojn de la „Unuiĝo de la patriotoj de Ruslando", kiuj agadis en la moskva universitato kaj estis eliminitaj el la trafiko jam en la fino de la 50aj jaroj. Krom tio, ekzistis iu „Rusa Socialisma Partio", kiu disvastigis propran manifeston kaj estis same disbatita de la KGB. En Ukrainio agadis iu „Demokratia Unuiĝo de socialistoj" (precipe en Odeso). Ankaŭ iliaj gvidantoj ricevis multjarajn arestpunojn, post kiam la ŝtataj organoj riproĉis al ili, ke ili fondis kontraŭleĝan organizaĵon. Lev Lukjanenko (nask. 1927), gvidanto de la „Ukraina Laborista kaj Kamparana Unuiĝo", kiu postulis starigi sendependan ukrainan respublikon kun komunisma sociordo, estis kondamnita al morto en Lvovo, kio estis ŝanĝita al 15-jara arestpuno. Liaj kunlaborantoj ricevis same altajn punojn.

Al la plej signifaj opoziciaj grupiĝoj apartenis la „Demokratoj de Ruslando, Ukrainio kaj Baltaj Landoj", kiuj estis alkalkuleblaj al la movado de la liberala inteligencio de diversaj nacioj kaj trovis siajn adeptojn ĉefe inter sciencistoj de altlernejoj, sed sian kulminan rolon ĝi ludis nur en 1969. Ĝia programo antaŭvidis liberecan-jurŝtatan ordon en Sovetunio, en kiu la posedaĵo estas ligata kun la socio. Aparta fenomeno estis la „Batalunuiĝo por politikaj rajtoj", kiu rekrutigis siajn membrojn inter oficiroj de la Balta Floto kaj trovis ilin ĉefe en Leningrado kaj la baltaj respublikoj kaj postulis la efektivigon de la homaj rajtoj. Ĝia gvidanto Gennadij Gavrilov estis arestita en Tallinn en majo 1969 kaj kondamnita al 6-jara arestpuno.

Menciinda estas ankaŭ la „Tutruslanda Social-Kristana Unuiĝo por la liberigo de la popolo", kiu estis fondita en 1964 kaj havis sian sidejon en Leningrado. Kiam en februaro kaj marto 1967 la KGB lanĉis sian decidan baton kontraŭ tiu grupo, ĝi nombris 200 aktivulojn. Fine de juraj procesoj, kiuj estis okazigitaj kontraŭ la ĉefoj de tiu movado, Igor Ogurcev, Miĥail Sado, Evgenij Vagin kaj Boris Averoĉkin, tiuj homoj, kiuj estis sociscienciistoj, ricevis punojn de 8-15 jaroj da aresto en malliberejo. En dua jura proceso aliaj aktivuloj estis same kondamnitaj al multjaraj arestpunoj. Krom tiuj, 12 aliaj adeptoj ankoraŭ estis punitaj per arestpunoj en malliberejoj. Multaj el tiuj homoj profunde studis la marksismon-leninismon kaj devenis el „ortodoksaj sovetiaj familioj" (en politika-ideologia senco). La unuiĝo, kiu estis organizata laŭ specifa hierarkio, komprenis sin „superpartia, arme-politika sekreta organizaĵo, kiu celas liberigi la patrujon de la tirania totalisma jugo kaj starigi social-kristanan ordon". Do, en tiu ĉi kazo evidente temis pri provo konstrui armitan religian ordenon kun la celo likvidi la marksismon-socialismon per perforto. La eklezio estis rifuzita kiel organizo. La kontraŭ-komunismo de tiu movado estis pli etike-morale ol politike aŭ socie motivata. Sen propagandi kapitalisman sistemon, en ekonomia rilato la unuiĝo reprezentis la vidpunkton, ke ĉiu homo havas la rajton posedi grundon. La KGB baldaŭ sukcesis subfosi la organizaĵon per propraj agentoj. Multaj membroj de la organizaĵo estis arestitaj kaj kondamnitaj al multjaraj arestpunoj en la laborkolonioj de la iama gulago.

Fine de 1965 estis malkovrita iu rezista movado kun ĉirkaŭ 250 membroj, kiu konsistis el studentoj kaj junaj sciencistoj el diversaj sovetiaj urboj kiel Leningrad, Omsk, Novosibirsk kaj Ivanovo-Voznesensk. Ili celis formi proletan demokration laŭ la modelo de la Pariza Komunumo[198] de 1871. Kiel ligilon ili eldonis la gazeton *Kolokol* (sonorilo). Sed la gvidantoj de tiu cirklo estis kaptitaj kaj kondamnitaj. Ĉi tiu iniciato ne restis la sola, ĉar en aliaj lokoj ekzistis similaj ĉeloj kun kristana au socialisma celaro.

Krom la nomitaj opoziciaj organizaĵoj ekzistis ankaŭ rusaj naciismaj grupoj kun faŝisma kaj batalema slavema karaktero, pri kiuj plendis precipe judaj samizdat-publikaĵoj pro la antisemitismo, kiu karakterizis ilin. Tiuj grupoj reprezentis la ideojn de la ekzisto de nedividebla Ruslando, kiu devas esti aŭtoritatece kaj centrisme regata kun socia ordo laŭ la „rusa spirito". Operacoj de la KGB kontraŭ tiaj grupoj ne estas konataj, kio signifas, ke ili estis verŝajne tolerataj de ĝi kaj subtenataj de certaj rusaj naciismaj politikaj cirkloj, kiuj funkciis kiel fortoj kontraŭ demokratiaj organizoj. Antisemitismo kaj

198 Laŭ PIV eblas kaj Komuno kaj Komunumo.

ties diskriminaciaj kaj asimilismaj formoj estis integra problemo de la iama carisma kaj stalinisma sistemoj, ĝi koncernis praktike ĉiujn sovetiajn tavolojn kaj estis aparte forta en Ukrainio kaj en panislamismaj medioj. La juda etno kaj hebrea religio estis praktike ekstermitaj jam en la 30aj jaroj.[199] Krome, la „rusaj patriotoj" rifuzis agnoski la belorusajn kaj ukrainajn popolojn kaj lingvojn kiel memstarajn kaj asertis, ke temas pri partoj de la rusa popolo. Sed ekzistis ankaŭ grupo de stalinistoj ĉirkaŭ la antisemitisma ekonomikisto A. Fetistov, kiu agadis kontraŭ la malstalinismigo, pro kio ili estis konsideritaj mensmalsanaj kaj senditaj al specialaj psikiatriaj kaj nervaj klinikoj, kio ofte okazis kun similaj personoj en la tempo de Ĥruŝĉov kaj Breĵnev.

Aparte notindaj estas la protestmovadoj de la diversaj etnaj minoritatoj en Sovetunio, kiuj estis persekutitaj kaj kies rajtoj estis limigataj dum la stalina tempo. Unuavice temis pri la krimeaj tataroj,[200] judoj kaj volgiaj germanoj, sed ankaŭ pri la ĉeĉenoj, inguŝoj, kalmukoj, mesĥetoj k.a. En la 40aj jaroj dekmiloj da estonoj, latvoj kaj litovoj estis deportitaj al Siberio. Kadre de la t.n. holodomoro de la jaroj 1932-3 milionoj da homoj pereis en Ukrainio kadre de stalinisma genocido.[201] En la 60aj jaroj refortiĝis la reprezalioj kontraŭ la ukrainoj, precipe kontraŭ reprezentantoj de la pli juna inteligencio, kiu aŭdacis esprimi siajn kritikajn opiniojn. La partia aparato organizis operacojn kontraŭ gvidaj ukrainaj ĵurnalistoj, verkistoj, sciencistoj kaj studentoj, kiuj protestis kontraŭ la rusiga politiko, kontraŭ la subpremado aŭ marĝenigo de la ukrainaj etno kaj lingvo kaj kontraŭ la KGB-teroro en Ukrainio. Sub la partiestroj Vladimir Ŝĉerbickij kaj Petro Ŝelest (la ĉi-lasta konsideris sin „kozako") la ukraina kulturo estis propramaniere apogita en la limigata kadro de la sovetia diktaturo, sed sen kompromisoj rilate la sovetian ideologion kaj politikon. Aparte draste trafitaj estis ukrainaj „naciistoj" en okcidenta Ukrainio, sed la rusa ŝovinismo furoris ankaŭ en la orienta kaj suda partoj de la lando. Krom la verkisto Oles Hončar, kiu inter alie publikigis la socikritikan romanon „La katedralo", la plej eminenta ukraina disidento de tiu tempo estis sendube la ĵurnalisto Vjaĉeslav Ĉornovil, kiu kompilis dokumentaron, kiu enhavis la biografiojn de 12 ukrainaj intelektuloj (anglalinge aperinta kiel „The Chornovil Papers"), kiuj en aŭtuno 1965 estis arestitaj kaj post kelkaj juraj procesoj senditaj al diversaj prizonoj, ĉar ili protestis kontraŭ maljusto kaj arbitro flanke de la ŝtataj instancoj kaj plendis kontraŭ politika servemo kaj apatio en la propraj vicoj.

En ĉi tiu okazo devas esti menciitaj ankaŭ la disidentoj Walentyn Moroz kaj Iwan Dzjuba. Moroz, instruisto en kamparanaj lernejoj de okcidenta Ukrainio, estis arestita en septembro 1965 kaj kondamnita pro kontraŭsovetia agitado kaj propagando. Sian kvarjaran arestpunon li devis plenumi en iu lagro de Mordovio. Kune kun Vjaĉeslav Ĉornovil kaj Wassyl Stus Dzjuba organizis la unuan publikan proteston en la moderna historio de Ukrainio, kiam dum la premiero de la filmo „Fajraj ĉevaloj" en septembro 1965 en la kieva kinejo „Ukrainio" ili manifestaciis kontraŭ la malliberigo de ukrainaj intelektuloj. Stus perdis sian stud- kaj laborlokon en en la instituto pri literaturo de la Akademio de la Sciencoj. Poste oni malpermesis al li publiki proprajn poemojn. Ankaŭ Stus poste devis pasigi sian vivon en diversaj prizonoj de Mordovio, kien li estis sendita post kondamno pro „kontraŭsovetia agado". Stus forpasis (en 1985![202]) en la laborlagro ITK-6 (poste: Perm-36), kiu ekzistis inter 1946 kaj 1987 kaj kiu estis fifama pro sia ege severa reĝimo. En Perm-36 multajn jarojn pasigis ankaŭ aliaj sovetiaj disidentoj kiel Balys Gajauskas, Natan Ŝaranskij, Sergej Kovaljov, Levko Lukjanenko, Gleb Jakunin, Jurij Orlov k.a.[203]

Kiel centra punkto en Kievo, kie kolektiĝis diversaj protestantoj, servis la Taras-Ŝevĉenko-monumento. El tiu periodo fariĝis konate, ke tri mortkondamnoj estis efektivigitaj, sed ili estis verŝajne nur la pinto de la glacimonto, ĉar multaj ŝtataj krimoj okazis sekrete sen fariĝi publika. Oni kalkulis, ke la justico esprimis verdiktojn, kiuj sume signifis 600 jarojn da mallibereco por la kondamnitoj. Precipe en okcidenta Ukrainio la komunistoj klopodis elsarki burĝajn kaj naciismajn (ukrainajn, rumanajn) elementojn. En 1967 okazis en Ivano-Frankivsk jura proceso kontraŭ la „Ukraina Nacia Fronto", kiu aktivis strikte laŭ konspiraj metodoj. La gvidantoj de tiu organizaĵo Dmitrij Kwecko, Zinowij Krasiwskyj[204] kaj Miĥail Djak estis kondamnitaj al 15- kaj 12-jara arestpunoj en malliberejo, aliaj aktivuloj ricevis malpli

[199] Levytzkyj, p. 189-95.
[200] La ĉi-koncernan historion vd. sub http://www.planlingvoj.ch/Tataroj_de_Krimeo.pdf, precipe p. 30-.
[201] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Holodomoro.
[202] Li pereis en septembro verŝajne pro frostiĝo en la ĉelo. La 11an de marto 1985 Miĥail Gorbaĉov fariĝis nova ĝenerala sekretario de KPSU, sed Stus devis resti en tiu terura malliberejo.
[203] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Perm-36_Gulag-Museum.
[204] Vd., https://uateka.com/ru/article/personality/dissidents/547.

altajn punojn. En Lvovo ekzistis iu „Ukraina Nacia Komitato, kies aktivuloj estis krom intelektuloj plimulte laboristoj. La ĉefaj fontoj por sciigi novaĵojn pri tiaj inci-dentoj kaj la subpremado de la opozicio en Ukrainio estis la bulteno *Ukrainskyj Wisnyk* kaj la *Kroniko de aktualaj eventoj* (Chronika tekuščich sobytii), kiuj cirkuladis kiel eldonaĵoj de la samizdato. La 5an de novembro 1968 la instruisto kaj iama membro de la ukraina ribela armeo Vasyl Makuĥ el Dnepropetrovsk, kiu estis eksa prizonano de koncentrejo, bruligis sin sur la strato Ĥreŝĉatik en Kievo, ĉar li volis protesti kontraŭ senespero. Iom poste alia ukraino faris la saman provon, sed kompare kun la unua postvivis ĝin kaj estis sendita al la prizono por kelkaj jaroj. La ukraina ribela armeo UPA estis venkita jam komence de la 50aj jaroj.

Ankaŭ en Armenio okazis en la jaroj 1969 kaj 1970 du grandaj tribunalaj procezoj kontraŭ lokaj disidentoj, al kiuj oni riproĉis, ke ili eldonis neoficialajn revuojn kaj fondis kontraŭleĝajn organizaĵojn, kritikis la nacian politikon kaj la sovetian registaron, „kalumniis" la internan kaj eksteran politikon de Sovetunio kaj propagandis la sendependecon de Armenio kun inkludo de la turka parto de la lando, krome ke ili produktis kaj disvastigis flugfoliojn, manifestaciis por rememorigi la armenan genocidon de 1915 kaj prelegis pri la historio de la armena popolo. En la procezoj la akuzitoj neis, ke ili faris krimojn, kvankam ili eble lezis la sovetiajn leĝojn.

En 1962 la sovetiaj aŭtoritatoj malkovris en la baltaj respublikoj iun „Baltian Federacion", kies aktivuloj, kiuj evidente estis ĉefe latvoj, protestis kontraŭ la rusigo de la baltaj landoj. Samizdato publikigis ankaŭ iun memorandon de intelektuloj el la Estona SSR, kie oni postulis bazajn rajtojn por la etnaj minoritatoj, malburokratiigon de la sovetia sistemo kaj publikan kontroladon de la tuta administracio. La aktivuloj deziris, ke la Supera Soveto fariĝu vera parlamento kaj ne nur instrumento por formale aplaŭdi partiajn decidojn kaj ke en la elektoj partoprenu pluraj partioj. Postulitaj estis ankaŭ amnestio por la politikaj malliberuloj, suvereneco por la ŝtata gvidado de nerusaj respublikoj kaj egaleco por ĉiuj sociaj grupoj kaj tavoloj. Protestoj, manifestacioj kaj tumultoj okazis ankaŭ en aliaj sovetiaj respublikoj, ekzemple en Uzbekio, kie ankaŭ lokaj taĝikoj koleris pro maljusta traktado de siaj etnanoj.[205]

Ĉiuj tiuj ekzemploj montras, ke la opozicia movado en Sovetunio estis multfaceta kaj ke la Breĵnev-reĝimo alergie reagis per subpremado, persekutado kaj punado. Opoziciuloj, kiuj pledis por senperforto, malarmado, evito de nukleaj armiloj kaj pacifismo, sed ankaŭ por rusa kaj ukraina naciismo, religia etiko ktp. estis konsideritaj de la reĝimo kiel mensmalsanuloj kaj senditaj al psikiatrejoj kaj malliberejoj. La rajtoj de tiuj homoj estis sisteme malrespektitaj kaj lezitaj en Sovetunio en grandskala kaj groteska stilo. Iliaj organizaĵoj estis severe persekutitaj, subpremitaj kaj senkompate likviditaj de la sekurecaj organoj kaj malpermesitaj de la reĝimo. La situacio estis absurda, ĉar Breĵnev mem konstante palavris pri malarmado, paco kaj evito de nukleaj armiloj. Malgraŭ enlandaj kaj internaciaj protestoj, la juraj procesoj kontraŭ disidentaj verkistoj estis daŭrigitaj. La juna verkisto Vladimir Bukovskij, kiu pledis por la rajtoj, kiuj estis eksplicite garantiitaj de la sovetia konstitucio kaj provis disvastigi la libron „La nova klaso" de Milovan Đilas en Sovetunio, estis same sendita al la psikiatrejo (1963, 1965 kaj 1966) kaj pro organizado de protesta manifestacio en januaro 1967 estis prezentita antaŭ la tribunalo, kiu kondamnis lin al trijara arestpuno en labortendaro.

La juraj procesoj kontraŭ tiuj verkistoj estis akre kritikitaj de 22 kolegoj, kiuj postulis de la partio kaj registaro de Sovetunio reekzameni tiujn juĝojn. La nepo de la iama sovetia ministro pri ekste-raj aferoj, Litvinov, malkaŝis kune kun la edzino de Daniel la malpravecon de tiuj procesoj kaj ke la kulpuloj estu punitaj. Sed li perdis sian laborlokon. Svetlana Allilueva, la filino de Stalin, kiu kritike rilatis al la politika evoluo en sia patrujo, en 1966 forlasis Sovetunion kaj petis azilon en la usona ambasadejo en Novdelhio, Hindio, antau ol ŝi forveturis tra Svislando al Usono kaj poste ekrestadis en Britio.

### Andrej Saĥarov

Inter la plej popularaj disidentoj, kiuj aperis en Sovetunio, estis, krom la verkisto Aleksandr Solĵenicyn, sendube la fizikisto Andrej Saĥarov, fama fakulo pri nuklea teknologio. Post 1955 Saĥarov komencis kritike rilati al la nuklea bombo, ĉar en tiu ĉi jaro okazis akcidento dum iu bombotesto, kiu kaŭzis mortviktimojn. Saĥarov pli kaj pli konsciiĝis pri la altgrada danĝereco de la nuklea teknologio, kiun Sovetunio volis evoluigi al supera formo. En 1961 li rekomendis al Ĥruŝĉov rezigni pri la testado de 100-megatuna nuklea bombo en la kosmo. Li atentigis la homaron, ke nuklea milito povus komplete detrui ĝin.

[205] Levytzkyj, p. 25-117.

Dum sub Ĥruŝĉov okazis nur ´personaj´ kvereloj, en la tempo de Breĵnev lia sistemkritika kaj opozicia sinteno komencis ĝeni la sovetiajn gvidantojn, kiuj volis revenigi la „geniulon" al la „ĝusta vojo" de la politiko. Sed tiu klopodo fiaskis, ĉar Saĥarov, kiu kritikis pli kaj pli ankaŭ la malbonan situacion de la homaj rajtoj en Sovetunio, restis principa kaj obstina, tiel ke li ekhavis seriozajn problemojn kun la partiaj ka ŝtataj potenculoj. En 1966 Saĥarov subskribis kun 24 aliaj aktivuloj de la sovetia scienco leteron, kiu estis sendita al Breĵnev kaj malkonsilis rehonorigi Stalinon.[206]

Krom tio Saĥarov esprimis sin kontraŭ politika subpremado, dogmismo kaj demagogio, kiuj karakterizis la sovetian sistemon. En tio Saĥarov alvokis Sovetunion kaj Usonon, ke tiuj landoj kunlaboru por plibonigi la mondon. Lia politika programo enhavis jenajn punktojn: Ĝenerala amnestio por politikaj malliberuloj, likvido de la politikaj labortendaroj, publikigo de la arkivoj de NKVD kaj rehonorigo de la viktimoj de la stalinismo; garantiado de la civitanaj rajtoj kaj de la rajtoj de la naciaj minoriatoj; libereco de la informado; forpuŝado de la stalinistoj kaj maoistoj el la ĉefaj pozicioj de la partio kaj registaro; venko de la burokratiisma dogmismo en la ekonomio; abolo de la cenzuro; enkonduko de la partia plurismo. Per siaj postuloj Saĥarov celis ankaŭ kontribui al la purigo de la kosmo, al la kreado de jura ŝtateco kaj al la starigo de demokratia komunismo en Sovetunio. La „demokratian centrismon"[207] li volis anstataŭigi per science demokratia gvidmetodo kun la celo konstrui demokration ne nur por laboristoj, sed por ĉiuj tavoloj de la socio sur la fundamento de la socialismo. Per tio Saĥarov, kiu estis triobla „heroo de la socialisma laboro", posedis la Stalin-premion, estis portanto de la Lenin-ordeno kaj Lenin-premio kaj de diversaj aliaj ŝtataj premioj, ankaŭ konfirmis, ke li ne estas kontraŭkomunisto, sed apartenas al la realismaj fortoj de la komunismo. Do, ekzemple pri privatigo de la industrio li ne parolis. Esence li venis al la samaj konkludoj kiel Milovan Đilas 15 jarojn antaŭe, kaj li laŭdis la klopodojn de la ĉeĥoslovakaj reformistoj. Finfine, lia memorando, kiu prezentis „Pensojn pri progreso, paca kunekzistado kaj intelekta libereco" de julio 1968 kaj kiu estis publikigita en diversaj gazetoj de multaj landoj, direktis sin al ĉiuj homoj kun bona volo en la mondo.[208] Ĉar Saĥarov pledis kontraŭ nukleaj armiloj kaj por nuklea malarmado, li estis forpelita de la sekreta nuklea objekto Arzamas-16 en Sarov, kie estis konstruita la sovetia nuklea bombo.[209]

Sed Breĵnev tute ne interesiĝis pri la opinioj kaj proponoj de la kritikema fizikisto, kies memorando ne kongruis kun la politika kaj ekonomia linio de la sovetiaj regantoj. Male, Breĵnev ege ĉagreniĝis pri la faroj de Saĥarov, kiun li cetere bone konis de pli fruaj tempoj kaj kiun li rifuzis persone akcepti, cetere laŭ konsilo de Suslov, alia ege konservema membro de la sovetia politburoo, por diskuti kun li pri la aktualaj problemoj de la mediprotektado kaj homaj rajtoj, kiel Saĥarov proponis kaj petis en personaj leteroj al Breĵnev mem.[210]

En septembro 1965 la CK de KPSU decidis pri nova ekonomia reformo, kiu antaŭvidis pli rigoran planadon de supre, kiu estis kombinita kun pli granda flekseblo de sube kaj kiu ebligis al la personaro de entrepreno kontribui per propraj iniciatoj. Sed en la realeco nur la direktoroj ricevis pli grandan liberecon. La popolekonomiaj konsilioj estis likviditaj kaj la entreprenoj kunigitaj laŭ branĉoj anstataŭ laŭ la principo de la rentabilitato. De la origina koncepto de Liberman do postresis nur malmulto kaj lia nomo malaperis el la gazetaro. Okaze de la 50a datreveno de la oktobra revolucio Breĵnev anoncis, ke la peza industrio havas prioritaton anstataŭ la agrikulturo kaj la konsumindustrio. La fifamaj kontraŭdiroj de la socialisma planado do ne malaperis el la sovetia ekonomio, kiu restis misgvidata pro la ideologia obstino, sed eĉ reakriĝis, ĉar oni retropuŝis la ekonomion al malnovaj stalinsmaj konceptoj.

---

206 Ĝian ruslingva teksto estas legebla sub http://www.ihst.ru/projects/sohist/document/letters/antistalin.htm.
207 Pri ĝia signifo vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Demokratischer_Zentralismus.
208 Ĝia ruslingva teksto estas legebla sub http://www.kabbalah.info/rus/content/view/frame/46820?/rus/content/view/full/46820&main.
209 La 10an de decembro 1975 Saĥarov ricevis la nobelpremion pri paco. Ĉar la sovetia registaro malpermesis al li vojaĝi al Oslo, lia edzino Jelena Bonner akceptis ĝin. Por la KGB Saĥarov fariĝis malamiko de la ŝtato. Post lia protesto kontraŭ la sovetia invado de Afganio en 1979, Saĥarov estis arestita la 22an de januaro 1980 kaj ekzilita al la urbo Gorkij (Niĵnyj Novgorod), kie li devis vivi sub la observado de la KGB, kie li apenaŭ havis kontakton kun la ekstera mondo (la urbo estis fermita por eksterlandanoj) kaj ellaboris novan sovetian konstitucion. En 1984 ankaŭ lia edzino estis ekzilita al Gorkij. Nur en la tempo de Gorbaĉov Saĥarov estis rehonorigita kaj povis reveni al Moskvo. (Vd. liajn memuarojn en la rusa lingvo vd. sub http://www.ihst.ru/projects/sohist/memory/sakhmem/content.htm).
210 Vd. ankaŭ Schattenberg, p. 433-7.

**Ekstera politiko de Sovetunio kaj la sinteno de la satelitoj en orienta Eŭropo**

Saĥarov kontraŭstaris ankaŭ la koncepton de influaj zonoj en dependaj geostrategiaj regionoj kaj postulis revizii la eksteran politikon de Sovetunio. Nu, Breĵnev formale agnoskis la rajton de la memstareco de la socialismaj landoj en orienta Eŭropo, kiuj ricevis de la cetera mondo la stigmon de satelitoj de Moskvo. La socialismo en tiuj satelitaj landoj tamen evoluis laŭ diversaj vojoj, je la granda malplaĉo de la Kremlo.

Ĉar Sovetunio ja agnoskis la reziston de Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Rumanio, Albanio kaj Jugoslavio kontraŭ la germana okupacio dum la dua mondmilito, la sovetianoj retiris la aserton, ke la orienteŭropaj popoldemokratioj dankas sian ekzistadon sole al Sovetunio, kiu liberigis ilin. Pri la kontraŭ-stalinismaj ribeloj en orienta Eŭropo oni silentis. Krom tio Moskvo instruis, ke la principo de la kunekzistado validas nur en la senco de la klasbatalo inter la socialismo kaj kapitalismo kaj ne plu kiel formo de la kunlaboro de antagonismaj socialismaj sistemoj. Fadeev, la sovetia ĝenerala seketario de Comecon, neis en februaro 1965 en Prago la intencon de Moskvo krei supernacian komunisman socion. Kiel la tri ĉefajn malamikajn fluojn Moskvo konsideris la reviziismon (jugoslavian), dogmismon (ĉinan) kaj naciismon (rumanan). Kvankam Moskvo ĉesigis la publikan polemikon kontraŭ la maoismo, la abismo inter Moskvo kaj Pekino fariĝis eĉ pli granda kaj ne plu povis estis venkita. Kaj Pekino ne hezitis provoki Moskvon per diversaj ĝenaj aktivecoj kaj ideologiaj akuzoj, tiel ke la kverelo denove atingis ekscesan dimension sub Breĵnev preskaŭ ĝis la interrompo de la diplomatiaj rilatoj, kio tamen povis esti evitata. Kiel nova faktoro aldoniĝis la „fidelismo” (aŭ „kastrismo”) en Havano, Kubo, kiu fariĝis kroma centro de la internacia komunismo kaj iusence sekreta aliancano de la orienteŭropa revolucio, kvankam la kubanoj havis tute aliajn revoluciajn celojn ol la orienteŭropanoj.

Tiel, iom post iom elkristaliĝis diversaj branĉoj de la socialismo aŭ komunismo. Oni povis paroli pri stalinismo en Sovetunio, maoismo en Ĉinio, titoismo en Jugoslavio, fidelismo (aŭ kastrismo) en Kubo, dubĉekismo en Ĉeĥoslovakio, eŭrokomunismo en Francio kaj Italio. Ĉi tiuj tendencoj reprezentis samtempe diversajn modelojn, kiujn oni povis nomi ŝtata monopol-komunismo en Sovetunio, GDR kaj Bulgario, nacia komunismo en Jugoslavio (kun ĝia specifa aŭtonoma administrado), Rumanio kaj Albanio kaj liberala komunismo en Hungario kaj Pollando, dum en Ĉeĥoslovakio la demokratia „socialismo kun homa vizaĝo”,[211] progresis. Kun Günter Bartsch, kiu eble verkis la plej bonan enkondukan aŭ resuman) analizon pri la orienteŭropa revolucio dum la komunisma tempo, el kiu multaj indikoj estas utiligataj por ĉi tiu studo, oni povas konkludi, ke en la 60aj jaroj la ŝtatkomunismaj modeloj ne plu estis vivkapablaj, dum la modelo de la nacia komunismo estis jam realeco kaj la demokratia komunismo ankoraŭ ne plene realiĝis, kvankam Ĉeĥoslovakio estis survoje al ĝi. Eblis klare observi, ke la plimulto de la komunismaj sistemoj ĉiukaze evoluis en la direkto de naciaj, sed ne nepre demokratiaj solvoj.

* * *

En ***Rumanio*** la 22an de marto 1965 la potencon akaparis <u>Nicolae Ceauşescu</u>, kiu sekvis tri tagojn post la forpaso de Gheorghe Gheorgiu-Dej. Ceauşescu daŭrigis la provokan politikon de la teritoriaj pretendoj, kiu rilatis precipe Besarabion kaj Nordan Bukovinon, kiuj troviĝis sub sovetia kontrolo, sed estis konsideritaj de Bukareŝto kiel rumania teritorio. Ceauşescu ne postulis reviziadon de la limoj, sed li admonis la potenculojn en Moskvo, ke Rumanio ne forgesos tiujn landojn. Do, Besarabio (Moldavio) kaj Norda Bukovino povis esti utiligataj kiel instrumentoj de la aŭtonomeca politiko de Rumanio rilate al Ruslando. Sed Ceauşescu trovis ankaŭ aliajn kampojn por kritiki, ekzemple la ombrajn flankojn de Komintern, ĉe kiu li malŝatis, ke ĝi estis gvidata de Moskvo kaj diktis la kurson al siaj membroj precipe rilate ilian nacian suverenecon. La fiera rumania ŝtatestro kontraŭstaris ĉiujn provojn restarigi tian organizaĵon kaj per tio celis trafi unuavice la Kominformon.

Kadre de la malbolŝevismigo la rumania KP enkondukis kelkajn reformojn, kiuj havis demokratian karakteron. En la klopodo forviŝi la limojn inter partiaj kaj ŝtataj funkcioj, fine de 1967 Ceauşescu lasis surtronigi sin kiel ŝtatprezidenton, kiu unuigis la plej superan ŝtatan kaj partian funkciojn. Tio estis unika pozicio en la orienta bloko, en kiu post la morto de Stalin oni preferis praktiki la kolektivan regadon. La ĝenado de okcidentaj radioelsendoj estis ĉesigita kaj la arto fariĝis pli libera. En elektoj povis esti nomitaj pluraj kandidatoj, kaj en la entreprenoj estis enkondukitaj administraj komitatoj, kiuj anstataŭis la gvidadon fare de ŝtataj direktoroj. Kvankam ĉe tiu nova sistemo ne temis pri sama

[211] Ŝajnas, ke tiu esprimo estis ´inventita´ de Radovan Richta.

aŭtonoma administrado kiel en Jugoslavio, ĉar al tiuj komitatoj apartenis nur kelkaj elektitaj membroj de la personaro, sed ili tamen ne plu signifis sistemon de la monopolo de ŝtataj direktoroj. Ĉe tiuj reformoj, kiuj evidente fariĝis eblaj post repuŝo de la influo de la fifama sekreta servo (Securitate), kies arkitekto estis Gheorgiu-Dej, oni sentis klaran influon de la idealoj de la hungara revolucio kaj de la jugoslavia modelo, kvankam samtempe la naciaj kapricoj de la rumanoj restis klare videblaj.

Timante novajn frakciajn batalojn en la partio, Ceauşescu, kiu montris simptomojn de la paranojo, fariĝis pli kaj pli suspektema pri partiaj funkciuloj, kiuj povus agi memstare kaj fari aferojn sen la konsento de la ĉefoj. En tio li precipe timis homojn, kiuj povus rilati kun partiaj membroj preter la gvidantoj de la Centra Komitato kun la celo agi kontraŭ la partio en la intereso de Moskvo kontraŭ Rumanio. Probable Ceauşescu celis partiajn membrojn, kiuj simpatiis kun Moskvo aŭ Pekino, kiuj tra tiuj centroj povus influi la internajn aferojn de Rumanio, aŭ povus funkcii kiel rivaloj de li mem. Ŝajnas, ke Ceauşescu sciis, ke kelkaj funkciuloj de la rumania sekreta servo konspiris interkonsente kun KPSU kontraŭ lia partio kaj li mem. La ministerio de la internaj aferoj estis kritikita, ĉar en la tempo de Stalin la rumania sekreta servo Securitate akiris tro da potenco, kiun eĉ la partio ne plu kapablis kontroli. La nombro de la kunlaborantoj de la sekureca servo do estis reduktita kaj ĝi mem submetita al speciala ŝtata konsilio por sekureco.

En aprilo 1968 devis demisii Alexandru Drăghici, anstataŭanta ĉefministro de Rumanio, kiu estis senigita de ĉiuj partiaj funkcioj. Ŝajnas, ke li estis la gvidanto de la sovetia frakcio en la rumania KP, kiu provizis Moskvon per informoj kaj do signifis danĝeron por la unueco de la rumania KP, la lando kaj Ceauşescu mem. Ŝajnas, ke Moskvo planis anstataŭigi Ceauşescu-n ĝuste per Drăghici, pro kio li vidis en tiu kamarado danĝeran kontraŭulon kaj rivalon. Al Drăghici oni donis la tutan kulpon por la krimoj de la Securitate. Post tio Drăghici, kiu tamen ne estis punita, retiriĝis de la politiko kaj en 1989 migris al Hungario, kie li forpasis.

Aliflanke, en aprilo 1968 sekvis la rehonorigo de la iama ministro pri justico, Lucrețiu Pătrășcanu, kiu estis arestita en 1948 kaj mortigita en 1954, kvankam la pruvoj por la faritaj akuzoj ne povis esti trovitaj aŭ evidentiĝis falsaj. Ĉar Stalin tiam ne plu vivis, la ordono por ekzekuti lin devis esti donita de la rumanaj komunistoj mem. Kiel ĉefa kulpulo estis prezentita Gheorghe Gheorgiu-Dej persone, kiu siatempe estis la unua sekretario de la CK de la rumania KP. Estis konstatite, ke en somero 1946 laŭ ordono de Gheorghiu-Dej estis mortigita ankaŭ Ştefan Foriş, ĝenerala sekretario de la rumania KP, kiu estis de juda deveno. Rehonorigita estis krome Miron Constantinescu, kiu devis forlasi la CK en junio 1957, ĉar li postulis seriozan malstalinismigon. La popolo eksciis ankaŭ, ke en la jaroj 1936-38 en Sovetunio pereis ne malpli ol 19 rumaniaj partiaj funkciuloj.

Kvankam Gheorghiu-Dej starigis la fundamenton de la nacia komunismo, en Rumanio, ĝi reale formiĝis nur post la surtroniĝo de Ceauşescu. La nacia komunismo, kiu celis „propran vojon" al la komunismo, servis al Ceauşescu ankaŭ kiel „ideologio de la subpremado de aliaj popoloj" en la propra lando, precipe hungaroj kaj germanoj (kiuj forlasis Rumanion). La doktrino de Ceauşescu estis miksaĵo de ĥruŝĉovismo, kiu akcentis la gvidan rolon de la partio, kaj titoismo, kiu emfazis la aŭtonomecon kaj blokneŭtralecon. La ĉi-lasta aspekto akiris apartan signifon en la rilato kun la Varsovia Pakto, kiu funkciigis armeajn bazojn en aliaj landoj. Por Ceauşescu tio estis neakceptebla, pro kio li postulis reformi tiun aliancon, kiu antaŭvidis pli fortan gradon de la konsultiĝo inter la membroŝtatoj. La postulita rotacia principo klare direktis sin kontraŭ la centra gvidado de Moskvo. La sovetianoj estis sufiĉe ĉagrenataj pri Rumanio, tiel ke marŝalo Greĉko diris en marto, ke estus neniu perdo, se Rumanio forlasus la pakton.[212] Sed Ceauşescu vidis ankaŭ en NATO hegemoniajn strebojn, kiuj servas al ĝi por limigi la suverenecon de malgrandaj ŝtatoj. Ceauşescu opiniis, ke la mal- kaj mezgrandaj landoj ludas kaj ludu pli kaj pli fortan rolon en la monda politiko. Ĉi tiu partikulara doktrino eĉ trovis ian agnoskon en Bulgario kaj Hungario kaj ĝuis certagradan respekton ankaŭ en Okcidento. Sed tio ne estis ĉio. Bukareŝto simpatiis kun la reformstreboj en Ĉeĥoslovakio, kie anstataŭ Novotný ekde 1968 Dubček diktis la tonon, kvankam la plurismon de liberaj opinioj kaj ideoj en tiu lando Ceauşescu tamen suspektis. Sian politikan memstarecon Rumanio bazis sur la kritiko de la sovetia hegemonio kaj demonstris krome per la adopto de diplomatiaj rilatoj kun Federacia Respubliko Germanio (FRG) en februaro 1968. Kvankam iuj decidoj de la ekstera politiko de Rumanio parte iris principe la ĝusta direkto (almenaŭ el la vidpunkto de la Okcidento), Rumanio pli kaj pli suferis pro la drasta interna subpremado kaj bizara personkulto laŭ stali-

[212] Detale pri la rilatoj inter Rumanio kaj la Varsovia Pakto vd. Csizmas, p.113-120.

nisma maniero, tiel ke en eksterlando oni komencis kompari tiun landon kun Albanio aŭ eĉ Norda Koreio, kiuj estis regitaj de similaj komunismaj diktatoroj, Enver Hoĝa kaj Kim Il Sung (aŭ Ir Sen).

* * *

Surpriza evento en ***Bulgario*** de la jaro 1965 estis la dua puĉprovo de bulgaraj naciaj komunistoj en aprilo, kiuj volis fari el sovetia satelito memstaran kaj egalrajtan partneron. En la puĉprovo partoprenis altrangaj armeanoj, kiuj estis verŝajne mortpafitaj post kiam oni kaptis ilin, kaj unu el la CK-anoj faris verŝajne suicidon. En la konspiro partoprenis ankaŭ la urba komandanto de Sofio, Todorov, kaj la anstataŭanta ministro pri defendo kaj ĉefo de la bulgara aerarmeo kaj aerdefendo, Slavĉo Trânski. Ĉiuj tiuj homoj batalis en la dua monmdilito kiel partizanoj. Laŭ albanaj informoj, ĉirkaŭ 500 personoj estis arestitaj. En junio la sovetia ĉefideologo Suslov aperis en Sofio por averti la bulgarajn kamaradojn, ke ili evitu „nacian egoismon”. En tiu periodo unuafoje aperis la nomo de Ĵeliu Mitev Ĵelev, kiu estis filozofo de la sofia universitato. Kiam li kritikis iujn detalojn de la marksismo-leninismo, Ĵelev estis forigita de la universitato, kio kaŭzis protestojn en la urbo.[213] Eĉ Todor Ĵivkov, ŝanceliĝante inter pragmatisma sovetia lojaleco kaj emancipata aŭ emancipanta bulgara memkonscio, komunikis en septembro 1965, cetere kune kun sia rumana kolego Ceauşescu, ke ĉiu komunisma partio havas la rajton mem difini sian politikan linion. Se la rumanoj atentigis pri Besarabio kaj Bukovino, la bulgaroj rememorigis la „iaman gloran grandecon” de Bulgario en la mezepoko, kiun ili ne forgesis kiel la rusoj la grandecon de la iama Kieva Rusujo.

Koncerne la reformojn, kiuj en Bulgario limiĝis al la ekonomio, kiu konservis la centran planadon, per kelkaj kosmetikaj modifoj oni celis iom fleksebligi la bazan strukturon. Inter alie oni opiniis, ke la negvidanta personaro de la entreprenoj ankaŭ partoprenu en la gajno kaj ke kun eksterlandaj, ĉefe francaj kaj italaj aŭtomobilaj fabrikoj estu komencata konkreta kunlaboro. Pro sia marĝena geografia situo sur la balkana duoninsulo, Bulgario volis malfermi sin ankaŭ al Okcidento por eskapi sian tradician izolitecon.

* * *

Precipe en ***Hungario*** la faligo de Ĥruŝĉov vekis maltrankvilon ĉe la homoj. Oni timis, ke la reĝimo revivigos siajn reakciajn metodojn, kaj esperis, ke Kádár povos eviti tiun scenaron. Sed la reputacio de lia partio, kiu estis skuita de korupto kaj moralaj skandaloj, mem estis grave difektita. Kiam en januaro 1966 la prezoj draste altiĝis, okazis publikaj protestoj inter studentoj kaj laboristoj. La reĝimo reagis per amasa arestado de homoj. 12 junulojn oni akuzis, ke ili fondis armatan organizaĵon por forigi la registaron. Inter la arestitoj troviĝis ankaŭ la iama gazetara estro de Imre Nagy. Kiel Gomułka, Kádár reagis foje kontraŭ stalinistoj, foje kontraŭ liberaluloj, eĉ superante sian polan kolegon laŭ ambivalenco. En 1967 la kritika filozofo Georg Lukács,[214] kiu pledis por la renovigo de la marksismo kaj kies verkoj estis malpermesataj en la orienta bloko, estis rehonorigita kaj reinkluzivita en la komunisman partion. La reformoj en Ĉeĥoslovakio tamen vekis en Hungario ambivalentan impreson.

* * *

***GDR*** reagis aparte alergie kaj panike kontraŭ ĉia provo de malstalinismigo. Tie eĉ la libroj de kritikemaj sovetiaj aŭtoroj estis malpermesataj. En decembro 1965 Ulbricht distanciĝis de ĉiuj „reviziismaj tendencoj en la socialisma tendaro”. La partia gazeto *Nova Germanio* kritikis gvidajn komunistojn de Italio kaj Aŭstrio, kiuj preferis demokratian komunismon. Malagrable tuŝite SED reagis ankaŭ rilate la rumanian KP, kiu forlasis la „klasan vidpunkton”, kiel opiniis la betonkomunistoj en orienta Berlino, al kiuj apartenis krom Ulbricht ankaŭ Willi Stoph, Alfred Neumann, Erich Honecker, Günter Mittag kaj financministro Willy Rumpf. Tie dume okazis tragika incidento. En la strebado atingi plenan integriĝon de GDR en la ekonomio de COMECON sub la gvido de Sovetunio, la GDR-ĉefoj celis komplete rezigni pri ĉia ekonomia dependeco de FRG. Sed Erich Apel, la estro de la ekonomia planado de GDR, kredis, ke li povas eviti damaĝojn por la ekonomio de sia lando, nur se li kontraŭstaras la unuflankajn intencojn de Ulbricht. Apel, kiu ankaŭ celis reformi la GDRan plansistemon, eksportigis kelkajn varojn al Okcidento por akiri urĝe bezonitajn devizojn, ĉar la kontraktoj kun Sovetunio ne povis esti ĉiam centprocente plenumitaj. En aŭtuno 1965 tiu situacio akriĝis kaj kondukis al grava konflikto en Moskvo, kiun Apel

[213] De 1990-97 Ĵelev estis prezidento de Bulgario.
[214] Vd. piednoton 68. Apel estis iama kunlaboranto de la nazioj en la raketkonstrua sektoro.

forlasis seniluziigite. Post kiam li rifuzis subskribi la novan kontrakton, ĉar ĝi ŝajnis al li diskriminacia por GDR, Apel estis elŝaltita el la intertraktoj. Sed la sovetianoj kaj Ulbricht nepre volis subskribi la novan kontrakton. La GDR-flanko estis premita de la sovetianoj kaj devis akcepti la kondiĉojn de Moskvo. Ĝis la dua de decembro Apel ankoraŭ kontraŭstaris ĉiujn minacojn laŭ siaj fortoj, sed ankaŭ lia propono por nova kvinjara plano estis rifuzita. La venontan tagon, kiam la kontrakto devis esti subskribita, oni trovis lin morta kun pafo en la kapon kaj apuda pistolo en sia oficejo en la Domo de la ministerioj.[215] Tiel, ankaŭ Apel fariĝis viktimo de la (post)stalinisma betonsocialismo, kiu evidente estis komplete malkapabla reformi sin mem, ĉar la ideologio (por konservi la potencon) ludis pli grandan rolon ol la racio kaj pragmatismo aŭ la bonfarto de la popolo.[216]

Kiel reago al tiu tuta embarasa situacio, kiu metis la kamaradojn en orienta Berlino sub enorma premo, la konduto de SED kaj GDR fariĝis pli kaj pli memfiera, aroganta, instruema kaj misiema. La orient- germana partio sentis sin kiel forton ene de la komunisma mondo, kiu devas fari ordon en la propra tendaro kaj eĉ inter okcidentaj komunismaj partioj kiel speco de subgvidanto de KPSU. En tio la GDR-gvidantoj mem strebis fari sin pli sendependaj de Moskvo kaj do praktikis propran reviziismon. Eĉ kun la ideo de unuiĝinta Germanio ili nenion komunan plu volis havi. GDR enkondukis propran ŝtatanecon por siaj civitanoj kaj difinis sin aparta (germana) popolo aŭ nacio. Pragon oni rigardis kvazaŭ kiel ĝermon de la subfosado kaj degenero de la socialisma ordo, kiel la gazeto *Nova Germanio* notis en julio 1968.

* * *

Ankaŭ ***Albanio*** fariĝis pli kaj pli ekstrema kazo. La faligo de Ĥruŝĉov vekis en Tirana la esperon je la totala rehabilitado de la verko kaj persono de Stalin en Sovetunio (kiu cetere malmulte respektis Albanion kaj malŝatis la albanajn komunistojn). Kiam tio tamen ne okazis, la albanoj reagis kolere kaj furioze kaj nomis la novan regantan bandon en la Kremlo „eĉ pli malica kaj diabla ol Ĥruŝĉov mem”. Kvankam Albanio konsideris sin plena membro de la Varsovia Pakto, ĝi tamen rifuzis ĉiujn invitojn por partopreni ĝiajn kunsidojn kaj insistis esti konsultata anticipe antaŭ ĉiu kunveno. Koncerne la reformojn en la armeo, Albanio sekvis la modelon de Ĉinio, kiu apogis la malgrandan landon ĉe la starigo de raketaj bazoj. Samtempe, gvidanto Enver Hoĝa konstatis reviziismajn kaj burĝajn tendencojn en la albana literaturo, febliĝon de la revolucia vervo ĉe la gvidaj albanaj komunistoj, kiuj havis inter si parencajn kaj boajn rilatojn, kaj indiferentan sintenon de la amasoj. Multaj suspektindaj funkciuloj estis forigitaj. Ĉar ankaŭ en Albanio la ekonomiaj problemoj kreskis, oni enkondukis sistemon de malcentralizado, kiu okazis laŭ propraj imagoj. En la ekstera politiko Jugoslavio estis traktita iom pli milde, Sovetunio pli krude; tie laŭ la kompreno de la albanaj komunistoj la „diktaturo de la proletaro” estis anstataŭigita per la „diktaturo de la reviziismo”. Sur la kulmino de la politika provokado en novembro 1964 okazis en Tirana unua konferenco de la internacia maoismo kun partoprenantoj krom el Ĉinio ankaŭ el Nordkoreio, Nordvjetnamio, Indonezio, Japanio, Novzelando, Francio, Italio, Hispanio kaj Aŭ-strio. Kiam en novembro 1966 denove estis organizita tia konferenco, aperis delegitoj de 29 maoismaj frakcioj, inter alie el Ĉilio, Kolombio, Egiptio, Sudano kaj Usono. Mao Zedong nomis Albanion, kiu devis fariĝi la centro de la maoismo, „elstaranta monto” kompare kun Sovetunio, kiu estis abomenita kiel „amaso da rubaĵo”. Mao, kiu celis konstrui el Ĉinio popolkomunumon, kondamnis la „gulaŝan (!) komunismon” de Ĥruŝĉov kiel pseŭdo-komunismon, kiu per la helpo de Liberman volis fari sintezon de produktiva laborista ŝtato kaj burĝa bonfarto-ŝtato, anstataŭ konduki la oktobran revolucion al la fina celo. Sekvis nova purigo de la partio. Albanio fermis siajn limojn kaj fariĝis unu el la plej izolitaj landoj de la mondo. Iuj kritikistoj parolis pri komunismo de la ŝtonepoko, kiu estis praktikita en tiu balkana landeto. En 1967 Albanio malpermesis ĉiujn religiojn kaj ekleziojn, proklamis sin unua ateisma ŝtato de la mondo, detruis ĉiujn preĝejojn kaj religiajn instalaĵojn kaj sendis ekleziulojn en la prizonojn kaj laborlagrojn.[217]

* * *

La plej ekstremaj ekscesoj kadre de la komunisma movado, kiuj estis kompareblaj nur kun la enlanda milito en Ruslando post la oktobra revolucio de 1917 kaj la stalinismaj perspektuoj de la 30aj jaroj en

[215] Vd. https://www.berliner-zeitung.de/der-selbstmord-des-chefs-der-staatlichen-plankommission-und-das-ende-der-wirtschaftsreformen-1965-in-der-ddr-warum-ging-erich-apel-in-den-tod--17314146.
[216] Detalan prezenton de la opozicio en GDR vd. en germana lingvo: Neubert, Ehrhart: Geschichte der Opposition in der DDR 1949–1989. Berlin 1997.
[217] Politikajn librojn verkitajn de Enver Hoĝa oni povas legi sub http://www.enver-hoxha.net.

Sovetunio, sendube okazis en ***Ĉinio***, kie Mao Zedong, kiu vidis sian influon en danĝero. Li lanĉis la t.n. kulturrevolucion per la helpo de la armeo, kiun la junularo kaj la Ruĝaj Gvardioj esence movis kontraŭ la partia hierarkio, ĉefe kelkaj unuopaj politikistoj kaj burĝaj kaj kapitalismaj elementoj, inkluzive reprezentantojn de la literaturo, kontraŭ kiuj la maoisma agresemo aparte direktiĝis. Tiu movado alprenis pli kaj pli sovaĝajn formojn, kiam furiozaj hordoj de diversideaj junularoj kaj anoj de Ruĝaj Gvardioj kuradis tra la lando por detrui ĉiuspecajn simbolojn de tiuj elementoj. En Makao tiuj anarkiismaj revoluciuloj kriis „mortigu la eksterlandanojn!" kaj en Tibeto ili detruis kultajn objektojn en budhismaj monaĥejoj. Kiam Mao ne plu kapablis kontroli kaj bridi sian kulturan revolucion, li utiligis la saman armeon, kiu devis fari ordon, kvankam ĝi mem kulpis pri la kaoso kaj teroro, kiu furoris en la lando. La kulturrevolucio en Ĉinio, kiu traŭmatigis la popolon, daŭris de 1966 ĝis 1976 kaj kaŭzis nekonatan nombron de viktimoj. La nombron de mortviktimoj, kiuj estis kaŭzitaj de la maoisma regado, historiistoj taksas inter 30 kaj 50 milionoj da homoj. Se oni aldonas la malsatkrizojn, ekzemple tiun de 1961, kiu kaŭzis inter 20 kaj 45 milionojn da mortintoj, oni ricevas esence pli grandan nombron, kiu povas atingi ĝis 70 milionoj laŭ la (kontestata) Mao-biografino Jung Ĉang.[218] Laŭ la „Nigra libro de la komunismo" de Stéphane Courtois, kiu estis publikigita en novembro 1997, la aŭtoroj baziĝis pri minimume 94 milionoj da mortviktimoj, kiuj estis rekte aŭ malrekte kaŭzitaj de la internacia komunismo.[219] Sed verŝajne la reala nombro estas pli granda kaj superas 100 milionojn.

Ĉinio ne restis sen protestoj. Komence de 1967 en la pekina gazetaro aperis novaĵoj pri konspiro kontraŭ Mao. En Kantono aperis afiŝoj, kiuj montris Maon kiel Hitleron. En Ŝanhajo, unu el la centroj de la opozicio, okazis ĝenerala striko. En Ŝenjang laboristoj postulis pli altajn salajrojn. En aro da urboj oni starigis armatajn grupojn. Radio Pekino raportis pri kamparanaj ribeloj en la provinco Gueiĝou. En aŭgusto kaj januaro 1967 eksplodis sangaj bataloj en diversaj partoj de la landego. La armeo grandparte fidelis al Mao, kvankam ekzistis onidiroj pri puĉoj ĉe la aerarmeo. Kelkaj oficiroj fuĝis al Sovetunio. En iuj regionoj kun etnaj malplimultoj esprimiĝis separatismaj tendencoj. Ĉirkaŭ 60 mil rifuĝintoj serĉis foriron el la provinco Sinkiango. El la ŝanhaja komunumo formiĝis la t.n. Nova Maldekstro, kiu verŝajne rekrutigis siajn anojn el la Ruĝaj Gvardioj – temis precipe pri lernantoj, studentoj kaj laboristoj, kiuj konsistigis tiun organizon kaj orientiĝis laŭ la hungara kaj pola ribeloj kaj laŭ la vivistilo de la uso-naj hipioj. Iliaj postuloj estis eĉ pli radikale maldekstraj ol tiuj de Mao. Unu el iliaj celoj estis la forigo de Ĉu Enlai,[220] aliaj celoj konsistis en la detruado de la malnova ŝtata aparato, la likvido de la revoluciaj komitatoj favore al la starigo de popolkomun(um)oj, la efektivigo de la demokratio ĉe samtempa kreado de nova komunisma partio kaj starigo de la perfekta burokratia socio, kaj la forigo de la diferenco inter armeo kaj popolo. Mao, kiu ege timis scenarojn kiel en Hungario kaj Pollando, por kiu laŭ li kulpis la jugoslaviaj reformoj, tamen konsideris la Novan Maldekstron kontraŭ-revolucia. Ĉar multaj el ĝiaj anoj estis publike ekzekutitaj, oni devas supozi, ke almenaŭ la gvida hierarkio estis likvidita. Post tiu revolucio en la revolucio la dilemo de Mao estis, ke li ne plu sciis, al kiu li povas fidi.[221]

## Nova junulara maldekstro en Pollando

En ***Pollando*** Władysław Gomułka sukcesis savi sin ankaŭ kiel konsilanton de Breĵnev, sed lia regado krizis pli kaj pli. La ambigua pola partiestro kontraŭbatalis kaj malnovajn stalinistojn kaj demokratiajn komunistojn. En novembro 1964 la CK rifuzis lian proponon akceli la pezindustrion malfavore al la agrikulturo. En Pollando estiĝis la nova ´klaso´ de la senlaboruloj, kvankam la centra planado de la ekonomio ne antaŭvidis tiun tavolon. Kiel liaj rivaloj formiĝis ĉefe du homoj: Edward Gierek kaj Mie-

---

218 Vd. https://www.planet-wissen.de/geschichte/diktatoren/mao_zedong_gnadenloser_machtmensch/pwiechinauntermao102.html, https://eo.wikipedia.org/wiki/Kultura_Revolucio, https://de.wikipedia.org/wiki/Rote_Garde_(China), http://hss.ulb.uni-bonn.de/2010/1981/1981.pdf; https://en.wikipedia.org/wiki/Jung_Chang. Jung Ĉang mem estis unu el la ruĝaj gvardianoj, tiam 14-jara. Pri tiu epizodo ŝi rakontas en sia familia novelo „Sovaĝaj cignoj", kiu estis tradukita al 37 lingvoj.

219 Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/La_nigra_libro_de_la_komunismo. Cetere, la kulpo pri la krimoj de la maoistoj dum la Kultura revolucio estis donita post 1976 al la t.n. „Bando de la Kvar" por malŝarĝi Maon (vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Bando_de_la_Kvar).

220 Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Zhou_Enlai.

221 La ĉefa literatura fonto por tiu temo en la germana lingvo estas: Mehnert, Klaus: Peking und die Neue Linke. Stuttgart 1967. La Nova Maldekstro de la 60aj jaroj ne estas la sama kiel la Nova Maldekstro de la 80aj jaroj, kiu aperis kiel reago al la enkonduko de kapitalismaj elementoj en la ekonomiajn reformojn de Ĉinio en tiu tempo. (Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/New_Left_in_China).

czysław Moczar. Okaze de la Sejm-elektoj de 1965 Gierek ricevis pli da voĉoj ol Gomułka. La frakcio de la iamaj „patriaj komunistoj" (partizanoj), de kiuj Gomułka komence estis apogita, nun klopodis forpuŝi lin. En decembro 1964 Moczar fariĝis ministro pri internaj aferoj, post kelkaj jaroj ankaŭ kandidato de la politburoo. La delegitoj de la komunisma junulara kongreso tondre aplaŭdis lin. La frakcio de Moczar strebis prezenti sin kiel renoviganton kontraŭ la malnovaj regantoj ĉirkaŭ Gomułka kun la averto, ke ili blokas la evoluon de la junularo. La potenco de la uzurpanto Moczar, kiu celis lanĉi kontraŭ-revolucion, kreskis same kiel lia reputacio en la popolo malkreskis. Kiam li perdis la elektojn en Kielce, li fariĝis des pli kruda. Lia agresemo direktis sin precipe kontraŭ la kritika inteligentularo, kiu rifuzis submetiĝi al kontrolo kaj cenzuro. Kiel viktimon oni elektis ekzemple la sendependan verkiston Melchior Wańkowicz, kiun Gomułka persone tre malŝatis kaj kiu estis arestita kaj devis esti kondamnita de iu tribunalo pro siaj kontaktoj kun Radio Libera Eŭropo. Pro la internacia protesto la verkisto povis eviti longan arestpunon en la malliberejo. Alia proceso estis lanĉita kontraŭ la poeto, satiristo kaj kritikisto Janusz Szpotański, de kiu Gomułka estis ridindigita en lia opereto „Silentantoj kaj Babilantoj" (1964), kiu eĉ ne estis montrita publike. Gomułka, kiu eltenis neniun kritikon kaj ege malŝatis ankaŭ tiun verkiston, reagis kontraŭ li eĉ en oficialaj paroladoj, nomante lin „homo kun la pensmaniero de prostituito", dum lia verko rememorigis al li tiun de „reakcia hundo", kiu „spiras per sadisma veneno kontraŭ nia (komunisma) aŭtoritato". Tiuj du verkistoj servis en Pollando kiel modelaj ekzemploj por montri, kiel homoj estas traktitaj de la komunistoj, se ili kritikas ilin kaj ne volas respekti ilian aŭtoritaton. Sed ankaŭ aliaj famiĝontaj polaj intelektuloj kiel Jacek Kuroń kaj Karol Modzelewski malagrable spertis la povon de la regantaj komunistoj, kiel celas montri la venonta ĉapitro .

### La skandalo ĉirkaŭ Jacek Kuroń kaj Karol Modzelewski en la varsovia universitato

La 14an de novembro 1964 estis arestitaj la studentoj (aŭ universitataj asistentoj) Jacek Kuroń kaj Karol Modzelewski, kiuj kritikis la aktualan politikan kaj ekonomian situacion en Pollando el la vidpunktoj de radikalaj marksistoj. En la varsovia universitato ekzistis iu diskutklubo, kiu estis gvidita de Modzelewski.[222] La arestoj evidente servis al la police por konfiski iun manuskripton de studaĵo, pri kiu oni diskutis en la klubo. Temis pri radikalaj kritikaj konsideroj pri la aktuala politika kaj ekonomia sistemo de Pollando, kiuj estis prezentitaj en diversaj fakultatoj. Kvankam Modzelewski kaj Kuroń estis liberigitaj post du tagoj, la unua perdis sian stipendion kaj la dua sian funkcion kiel ĉefon de la polaj skoltoj. La politikaj organoj disvastigis onidirojn, ke tiuj du junaj sciencistoj, kiuj cetere estis de juda deveno, estas kunlaborantoj de okcidentaj imperiistoj kaj celas perfortan renverson en Pollando. La 29an de novembro ili estis eksigitaj el la komunisma partio.

En la sekvo Modzelewski kaj Kuroń verkis, en kunlaboro kun Adam Michnik, „malferman leteron" al la partio, kiu esence ripetis la enhavon de la menciita konfiskita studo kaj signifis intelekte elstaran tekston, kiu liveris maturan analizon de la situacio de la marksismo en Pollando kiel oni jam delonge ne plu vidis ĝin depost „La nova klaso" de Đilas kaj „Homo sen alternativo" (1964) de Kołakowski. Kuroń kaj Modzelewski, ambaŭ pli malpli 30-jaraĝaj, parolis klartekston. Laŭ ilia opinio, la komunisma partio akaparis la ŝtaton, kiu fariĝis ĝia instrumento, posedante la pozicion de monopolisto, kiu konsideras kaj toleras aliajn politikajn organizaĵojn nuraj satelitoj. Eĉ pli malbone estas, ke la komunisma partio mem fariĝis instrumento de la partia aparato, kiu reprezentas bone organizatan, hierarkie konstruatan burokration, kiu unuigas la eliton de la partio kaj ŝtato kaj koncentras la tutan povon en siaj manoj, kiu estas libera de ĉiu socia kontrolo kaj eĉ rifuzas, ke oni diskutas pri ĝi. Ĉar la ŝtato apartenas al la komunisma partio, ankaŭ la ŝtata posedo de la produktiloj apartenas al ĝi, kvankam tiu posedo devus aparteni al la diversaj grupoj de la socio, al kiuj la ŝtato apartenas. Estas klare, ke la aŭtoroj ne povis akcepti la pretendon de tiu partio pri ties gvida rolo kadre de la formala plurpartia sistemo kaj opiniis, ke tiu ŝtato ne povas signifi socialismon. Socialismo aŭ komunismo ekzistas en orienta Eŭropo nur, ĉar komunismaj partioj havas la monopolon de la politika kaj ekonomia povo super la socio, do iusence temas ne nur pri monpolisma, sed ankaŭ pri formala socialismo. Laŭ la aŭtoroj ankaŭ ekster la komunismaj organizaĵoj libereco ne ekzistas. La elektoj en la komunisma partio estas nura farso, ĉar ili ne okazas surbaze de diversaj opinioj kaj programoj kaj ĉar decidoj estas faritaj nur supre kaj estas truditaj malsupren. Anstataŭ diktaturo de la proletaro oni havas diktaturon de la monopola burokratio, kies socian bazon konsistigas privilegiata tavolo de oficistoj, propagandistoj kaj teknokratoj, kiu estas korup-

[222] La patro de Modzelewsi estis fama komunisto kaj ministro pri eksteraj aferoj de Pollando en 1947/48.

tataj kaj nutritaj per la plusvaloro, kiu estas produktita de la laboristoj. Ne la laboristoj, kiun ĝi cetere konsideras ĉefa malamiko, sed tiu monopola burokratio disponas la kolektivan povon pri la produktiloj. Pro tio la laboristoj estis senigitaj de siaj rajtoj sin defendi kaj fondi proprajn partiojn. Ilian batalon por pli altaj salajroj, kiuj formas la minimuman bazon por vivi, oni konsideras kontraŭleĝa kaj kontraŭŝtata. Se la laboristoj, kiuj formas la plej suban ekspluatatan tavolon de la socio, faras ion alian ol reprezenti la truditan programon de la monopola burokratio, ĝi tuj kontraŭstaras kaj kontraŭagas ilin per ŝtataj rimedoj de la perforto. Tiel, la laboristoj estas organizataj kiel obeemaj servantoj de tiu burokratio kaj malorganizataj por la propraj interesoj. La aŭtoroj konkludis, ke la laboristoj, kiuj estas daŭre devigitaj vendi sian laborforton, ricevas la minimumon por ekzisti kaj financas la ŝtatan potencon kontraŭ si. La produkto de ilia laboro estas komplete fremda al ili, ĉar ĝi ne apartenas al ili, kvankam ili kreas ĝin. La aŭtoroj faris diferencon inter naciigitaj aŭ sociigitaj unuflanke kaj ŝtatigitaj produktiloj aliflanke. Ankaŭ la prioritato de la pezindustrio, kiu estis akcelita malfavore al la konsum-industrio, kies nivelo estas ege malalta, servas nur al la egoismaj interesoj de la regantaj burokratoj kaj ties helpantoj. Ĉar la reganta monopol-burokratio celas konservi la ekzistantan situacion, ĝi vole-nevole kaŭzas konflikton kun la socio. Samtempe, Kuroń kaj Modzelewski kritikis la intelektulojn kaj laboristajn gvidantojn, ĉar post la „pola oktobro” (de 1956) ili baze neglektis sian devon lanĉi novan organizaĵon kaj klaran programon por la socio kaj tiel esence kontribuis al la konservado de la monopola partia burokratio, kiu alfrontas ĝeneralan ideologian, politikan, ekonomian kaj moralan krizon kaj al kiu restas apliki nur rimedojn de la perforto anstataŭ de la reformoj. Kuroń kaj Modzelewski estis konvinkataj, ke ĉiuj tiuj kontraŭdiroj faros la kolapson de la monopol-burokratia diktaturo neevitebla. La solan solvon de tiu krizo ili vidis en la lanĉo de revolucio, ĉar la monopola burokratio devis esti forigita kaj anstataŭigita per la laborista demokratio kompare kun parlamenta demokratio, kiu estis evitenda laŭ ili, ĉar ĝi ne taŭgas por la starigo de vere socialisma socio, pro tio ke ĝi konservas ĉiujn malnovajn problemojn de la socio kaj ŝtato. Tiu revolucio estas efektivigenda de la laboristoj kaj junularo. La revolucio estas realigenda per pacaj rimedoj por eviti intercivitanan militon, sed se necese armiloj povas esti utiligataj, ĉar la produktistoj estas la laboristoj. Interesa logiko! La jugoslavian modelon la aŭtoroj malakceptis por enkonduki en Pollandon, ĉar por ili ĝi estis same monopol-burokratiisma kaj tro teknokratiisma. Sed Kuroń kaj Modzelewski kompletigis la analizon de Milovan Đilas, kiu estis unu el iliaj teoriaj antaŭuloj, kaj ili eĉ superis la konkludojn de Kołakowski, ĉar en ilia analizo la politika konscio de la marksisma alo de la orienteŭropaj revoluciuloj estis eĉ pli forte akcentita ol ĉe aliaj aŭtoroj. La novaj elementoj de la pola „Nova Maldekstro”, kiel ĝin reprezentis Kuroń, Modzelewski, Michnik, k.a. estis la emfazado de la gvida rolo de la junularo kaj de la laboristaro en la revolucio, la postulado de novaj laboristaj, junularaj kaj kamparanaj partioj kaj la atentigo pri la danĝero de la teknokratiismo. La strikta tradicia marksisma kadro estis forlasita. Baze, la programo de Kuroń kaj Modzelewski konsistis el jenaj ĉefaj punktoj: Permeso de pluraj laboristaj kaj kamparanaj partioj; transdono de la fabrikoj al sendependaj laboristaj konsilioj, al kiuj la direktado estas submetita; konstruado de la laborista aŭtonomeco al tutnacia sistemo de konsilantaroj, en kiuj la laboristoj mem decidas la problemojn de la produktado; libereco de la frakciismo en la politikaj organizaĵoj; disigo de la sindikato(j) de la ŝtato kaj garantiado de la rajto striki; libereco de la scienco kaj instruado, arto kaj literaturo; abolo de la cenzuro; likvido de la ŝtata sekureco; anstataŭigo de la armeo per popola milico; transformado de la ekonomio de abstrakta planado al socialisma merkatekonomio.

Post kiam Kuroń kaj Modzelewski sendis kopiojn de sia „malferma letero” al la komunisma partio kaj la socialisma junulara ligo de la varsovia universitato, ili estis ree arestitaj la 19an de marto 1965 kune kun kvar studentoj, kiuj estis konsideritaj kiel iliaj ĉefadeptoj. Iu anoncita diskuto en la fizika fakultato kun 300 studentoj ne povis okazi. En protestoj en du aliaj fakultatoj oni postulis la liberigon de tiuj homoj. La studentoj postulis la starigon de komisiono, kiu objektive taksu la „malferman leteron”. Al tiu komisiono apartenis Leszek Kołakowski, Zygmut Bauman kaj Włodzimierz Brus, kiuj estis konataj kiel „reviziistoj“ kaj defendantoj de la kritikema marksisma junularo. Ĉar tia komisiono ricevis la konsenton de la universitata senato, ĝi efektive povis esti kreita. Sed anstataŭ okupiĝi pri la enhavo de la nomita letero, la komisiono decidis, ke ĝi devas esti sendita al tiuj, al kiuj ĝi estis adresita, nome al ĉiuj membroj de la KP kaj ties junulara asocio. Do, la letero estis ekspoziciita en la oficejo de la universitato. Sed la funkciuloj faris la eblon legi ĝin dependa de skriba permeso donita de la partia sekcio de la koncerna fakultato, kiun devis havi ĉiu, kiu volis legi ĝin. Ĉiuj legantoj estis registritaj kaj devigitaj esprimi sian opinion, kiun oni same skribe registris.

Post nepublika farsproceso, kiu komenciĝis la 13an de julio 1965, la juĝoj kontraŭ la junuloj sekvis ses tagojn poste: Modzelewski ricevis 3,5 jarojn, Kuroń tri, ĉar ili „alvokis al perforta renverso de la politika kaj ekonomi-socia sistemo de Pola Popola Respubliko”. Ambaŭ kondamnitoj estis traktitaj kiel ordinaraj krimuloj anstataŭ kiel politikaj viktimoj. Kuroń estis transportita al la fifama malliberejo en Sztum (sude de Malbork), kiu samtempe funkciis kiel laborlagro.[223] Ĉar tie Kuroń rifuzis labori, oni ĵetis lin en humidan izolan ĉelon kaj donis al li manĝi nur unufoje en la tago. Li ne rajtis akcepti vizitantojn, sendi leterojn, legi gazetojn. Post eksterlanda protesto li estis sendita al la prizono en Potulice (okcidente de Bydgoszcz), kiu estis iama nazia koncentrejo.[224] Modzelewski devis iri en la prizonon de Barczewo (nordoriente de Olsztyn), kie li same ne rajtis ricevi vizitantojn aŭ sendaĵojn kun nutraĵoj.[225] Advokatino Aniela Steinbergerowa, kiu kuraĝe defendis la akuzitojn, rezignante pri honorario, devis elteni ŝtatajn reprezaliojn. La edzino de Kuroń, kiu laboris kiel asistentino en la Filozofia fakultato, estis maldungita. Ĉar ambaŭ familioj havis infanon por nutri, la forfalo de enspezoj kaŭzis al ili seriozajn financajn problemojn, kiujn provis mildigi monkolekto flanke de la studentaro, kiun la ministerio de la internaj aferoj klopodis eviti. Ankaŭ aliaj amikoj de la kondamnitoj estis trafitaj de reprezalioj flanke de la ŝtato. La universitata aŭtonomeco, kiu jam tiam estis malgranda, komplete malaperis post tiu jurpolitika skandalo. La ministerio de la internaj aferoj instalis iun prorektoron (Rybicki), kiu kunlaboris kun la sekreta servo kaj havis la taskon observi ĉiujn aktivecojn en la universitato. La koncerna studkurso pri marksisma filozofio estis nuligita kaj la nombro de studentoj limigita.[226]

La 21an de oktobro 1966 Kołakowski parolis okaze de la 10a datreveno de la „pola oktobro” en la varsovia universitato. Lia prelego estis amase vizitita. Sed lia parolado estis karakterizita de profunda malespero. Li plendis pri manko de demokratio precipe en balotoj por elekti la politikajn gvidantojn, kiuj laŭ lia opinio kondutis arogante kaj orgojle. Due, li bedaŭris la mankon de organizata opozicio kaj sekve de debato inter tiuj, kiuj havas la potencon en la ŝtato kaj la ceteraj. Li kritikis la ekziston de malkapablo kaj burokratiismo en la politika sistemo de Pollando. Li asertis, ke la respondeco de la registaro rilate al la popolo estas fremda al ĝi. Li konstatis, ke regas sistemo de privilegioj por kelkaj malmultaj homoj, kiuj kredas, ke ili rajtas agi ekster la leĝoj. Li trovis malbone, ke la principoj de la konstitucio povas esti arbitre interpretataj, kaj ke mankas publika kritiko kaj libereco de kunvenado. La ekziston de la cenzuro en la historiografio, sociologio kaj literaturo li kondamnis. Li diris, ke ne ekzistas perspektivo nek espero, ke la ŝtato, la partio kaj la socio fariĝis viktimoj de tiu stagnado, ke ekzistas nenio por festi. La registaron kaj la gvidantojn de la partio li alvokis al demisio. Kun fatalaj sekvoj.

Kiel oficiala respondo al la detrua bilanco de Kołakowski li estis eksigita el la komunisma partio. Kvin studentoj, kiuj estis la plej aktivaj diskutantoj, devis forlasi la universitaton kaj Adam Michnik malaperis en la esplorprizono. Tiuj rimedoj sekvigis pliajn kontraŭreagojn: 21 verkistoj kaj 14 profesoroj protestis kontraŭ la eksigo de Kołakowski el la partio. Studentoj kolektis 1036 subskribojn por peticio, kiu postulis la ĉesigon de la jura punado de Michnik. La partio formis specialan komisionon por kontroli kaj ekzameni ĉiujn siajn membrojn de la varsovia universitato. La CK volis forigi profesoron Kołakowski ankaŭ de lia katedro, sed tio kaŭzis fortan kontraŭstaron flanke de la Scienca Akademio. Kiam en 1968 oni malpermesis al li instrui, Kołakowski preferis forlasi Pollandon kaj daŭrigi sian laboron en universitatoj de Kanado, poste Usono, Germanio kaj fine Britio (Oksfordo), kie estiĝis lia fama ĉefverko „Ĉefaj tendencoj de la marksismo”.

Ĉiuj tiuj provokoj kaj eventoj tute ne kontribuis al la kvietigo de la situacio en Pollando. Male, la pola studentaro troviĝis en ribelema stato.

---

223 Vd. https://pl.wikipedia.org/wiki/Zakład_Karny_Sztum.

224 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Zentrales_Arbeitslager_Potulice.

225 Ankaŭ Adam Michnik kaj aliaj politikaj disidentoj estis senditaj al tiu prizono (vd. https://pl.wikipedia.org/wiki/Zakład_Karny_Barczewo).

226 Pli detale pri la skandalo ĉirkaŭ Modzelewski kaj Kuroń verkis Raina, Peter K.: Die Krise der Intellektuellen. Eine Rebellion für die Freiheit in Polen. Ein Modellfall. Olten/Freiburg i. Brsg. 1968. En 1966 Raina estis petita forlasi Pollando pro „kontraŭŝtataj aktivecoj”.

## La ribelo de marto 1968 en Pollando

La venonta kunpuŝiĝo inter la studentaro kaj la polico okazis en Pollando en marto 1968, kiam devis esti prezentita la pola nacia dramo de Adam Mickiewicz „Dziady“ („Ceremonio de la forpasintoj”).[227] Ĉar la spektaklo temis pri la *carisma* despoteco, ĝi ne povis plaĉi al la kultura fako de la CK de la komunisma partio. Do, jam post la unua prezento de la dramo aperis la opinio, ke la spektaklo estas klare kontraŭ-*sovetia* kaj ke oni devas malpermesi ĝian prezentadon por eviti, ke Sovetunio povus senti sin provokata. Krom la memoro pri la deka datreveno de la „pola oktobro”, en 1968 oni festis en Pollando la 50-an datrevenon de la Oktobra Revolucio. Sed en Pollando la koncerna teatraĵo estis ludita jam 17 fojojn post la milito. Reĝisoro Kazimierz Dejmek klarigis, ke la dramo ne estas kontraŭsovetia sed kontraŭcarisma. La decido fermi la teatraĵon eksplodigis spontanan proteston ĉefe flanke de la studentoj, kiuj kolektis 3000 subskribojn por daŭrigi ĝin. Kiam la polico aplikis perforton kontraŭ la studentoj, inter kiuj unu grave vundiĝis, ĉe la Politeknika Instituto en Varsovio, kiu fariĝis la ĉefrezidejo de la ribelo, 8000 studentoj postulis „en la nomo de la socialismo”, ke oni respektu la konstitucion, garantiu la liberecon de la parolo, la liberigon de la politikaj malliberuloj, la korekton de la tendencisma gazetara raportado kaj la daŭrigon de la diskuto en la televido. Oni publikigis rezoluciojn kaj montris afiŝojn, kiuj enhavis politikajn sloganojn kiel „For la cenzuron!” „Veron en la gazetaro!”, „Ĉesu mensogi!”, „Socialismon kaj demokration!”, „Gestapo!” ktp. Dekmiloj da scivolemaj varsovianoj alkuris por rigardi la surstratan spektaklon, dum iuj kredis, ke la revolucio eksplodis. La polico forpelis la manifestaciantojn per larmgaso kaj batbastonoj. La agresemo direktiĝis antaŭ ĉio kontraŭ Mieczysław Moczar, la ministro pri internaj aferoj kaj ĉefo de la sekreta polico. Sed la timemo de la popolo kaj la minaco de la rektoro, ke protestantaj kaj ribelantaj studentoj riskas esti eliminitaj de la universitato, tamen havis sian efikon kaj seniluziigis parton de la studentoj. Per ultimato la rektoro eĉ minacis fermi la Teknikan Altlernejon. Sub tiaj kondiĉoj la studentoj ĉesigis sian okupacian strikon je la 23a de marto, post kiam la provo fiaskis vastigi la ribelon al ĝenerala striko. La plimulto de la studentoj malaperis, sed kelkcent restis malgraŭ malpermeso kaj anoncis, ke la ribelo estos prokrastita. Tamen, la ribelo disvastiĝis tra la tuta lando kaj atingis la urbojn Krakovo, Lublino, Gdansko, Poznano, Lodzo, Vroclavo kaj Radom, kie la polico same brutale klopodis forpeli la manifestaciantojn. En la universitatoj la protestoj de la studentoj kontraŭ policaj metodoj estis apogitaj de la filozofia, sociologia, biokemia kaj biofizika fakultatoj.

Dume, Kuroń kaj Modzelewski estis liberigitaj de la prizono, sed baldaŭ rearestitaj por la tria fojo. Ilia juda deveno servis al la bando de Moczar kiel preteksto kaj pruvo por kulpigi „cionismajn cirklojn” por la tumultoj en Pollando. Ankaŭ Zygmut Bauman, Włodzimierz Brus, Kazimierz Brandys, Ludwik Hass kaj aliaj, kiuj apogis la proteston de la studentoj, havis judan originon. Moczar utiligis tiun antisemitisman ondon por purigi sian ministerion de la internaj aferoj. Nun li utiligis ĝin por ĉiuj, kiuj estis opoziciuloj aŭ suspektindaj elementoj. La „partizanoj” de Moczar organizis milojn da kunvenoj en la entreprenoj kaj ŝtataj institucioj por postuli rigoran punadon de la cionistoj. Eĉ la ĵurnalista asocio aliĝis al tiu ĥoro. Okaze de iu kunveno en Varsovio 3000 partiaj aktivuloj kriis „Cionistojn for!”. Profesoro Toeplitz, rektoro de la pola filmaltlernejo, devis foriri, ĉar li malaprobis la krudan traktadon de la lodzaj studentoj fare de la polico. Kvar profesoroj kaj du docentoj de la varsovia universitato estis eksoficigitaj. Profesoro Bauman kaj verkisto Brandys preferis la emigracion. La kontraŭcionisma kampanjo eĉ ne protektis registaranojn: juddevenaj ministroj devis demisii. La ministro pri sano devis foriri, ĉar lia filo partoprenis en la studenta ribelo. Prezidento Oĥab, kies filino partoprenis en la studenta ribelo, devis aŭ preferis retiriĝi, ĉar la antisemitisma politiko ne kongruis kun liaj imagoj pri komunisma internaciismo. La kampanjo eĉ trafis la edzinon de Gomułka, kiu estis judino. Li mem klopodis bagateligi la kampanjon, certigante, ke la cionismo ne signifas antisemitismon kaj ne estas danĝero por la socialismo en Pollando. La fakto estas, ke en iu parolado Gomułka mem kulpigis juddevenajn polojn pri la eksplodo de la ribelo en la universitato. Se li rekomendis al la „judaj naciistoj” forlasi la landon, li malrekte alvokis la judojn entute elmigri, kion 13 mil da ili ankaŭ fakte faris por tiri la konsekvencojn, ĉar en tiu eterne antisemitisma lando neniu judo plu volis vivi.[228] Kardinalo Stefan Wyszyński malaprobis la starpunkton de la komunisma partio kaj montris por-judan aŭ por-israelan sintenon.[229]

---

[227] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Dziady_(poem).

[228] En tiu tempo ekzistis en Pollando ĉirkaŭ 40 mil judoj, de kiuj la plimulto estis asimilita en la pola socio.

[229] Pliajn informojn vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Marto_1968_(Pollando).

**Daŭrigo de la lukto por reformoj kaj konflikto kun la verkistoj, studentoj kaj la slovakoj en Ĉeĥoslovakio en 1967**

Kiel Zdeněk Mlynář atentigis, la ĉefaj portantoj de la reformkomunismo en la ĉeĥoslovaka KP en la 60aj jaroj estis la generacio de la kvardekjaraĝuloj. Temis pri homoj, kiuj post la milito havis dudek jarojn kaj kiuj membris en la KP ne pro konjunkturaj aŭ oportunismaj kaŭzoj, sed pro ideologia konvinkiĝo. Certe, kelkaj el ili iam estis ankaŭ blindigitaj stalinistoj, sed post la kritiko de Stalin kaj de la stalinismo en la jaro 1956 fare de Ĥruŝĉov ili transformiĝis al reformistoj. La ŝanĝo de iliaj konvinkoj dependis ankaŭ de iliaj propraj vivspertoj. Ili reiris al la idealo de la demokratia socialismo, kiu estis la moda idealo post la milito, estante ankaŭ la oficiala celo de la ĉeĥoslovaka KP ĝis la puĉo de la stalinistoj en februaro 1948. Antaŭ tiu tempo la ĉeĥoslovaka KP eĉ asertis, ke la sovetia[230] modelo ne estos kopiata de Ĉeĥoslovakio. Tiuj komunistoj, kiuj do revenis al siaj originaj idealoj, revenis kaj esprimis ilin en la „Agadprogramo“ de la ĉeĥoslovaka KP de la 5a de aprilo 1968 (vd. p. 119).[231]

Fakte, la 13a partia kongreso de la ĉeĥoslovaka KP en 1966 decidis akceli la reformojn, kiuj devis esti oficiale enkondukitaj en januaro 1967 en limigita formo kiel eksperimento sub la nomo „Nova ekonomia modelo“. Baldaŭ evidentiĝis, ke tia amputita formo de la originaj intencoj de la reformoj (de Šik) ne povis havi sukceson. La kontraŭstarado de la burokratia aparato, kiu havis la apogon de Novotný, ne finiĝis. Krom tio aperis duboj pri la taŭgeco de la nova sistemo por la slovaka ekonomio, kiu estis pli subevoluinta (aŭ postrestinta) ol tiu en Ĉeĥio, tiel ke oni timis novan malekvilibron inter ambaŭ landopartoj. Do, nenio esence ŝanĝiĝis. La malnovaj direktoroj restis en la entreprenoj kaj la novaj estis elektitaj laŭ la principo de la politika lojaleco. Sed por la reformistoj estis grave daŭrigi la lukton por la liberaligo de la ekonomio kaj la demokratiigo de la politiko. Eĉ en Hungario, kie regis Kádár, la politikistoj kaj ekonomikistoj pli multe interesiĝis pri reformoj ol en Ĉeĥoslovakio, kie la maltrankvileco en la popolo dume fortiĝis. Dubček estis konvinkata, ke antaŭ ol enkonduki ekonomiajn reformojn necesas reformi la politikan sistemon mem.

Plej forte la malkontenteco manifestiĝis inter verkistoj kaj filmistoj, kiuj subtenis la reformideojn de Ota Šik aŭ de aliaj reformistoj (Šik ne estis la sola) kaj kiuj ne kaŝis sian koleron kontraŭ la reĝimo de Novotný, kiu ne ĉesis subpremi la verkistojn laŭ ′bona′ malnova stalinisma maniero. Do, de tiu reĝimo oni ne povis atendi liberaligon kaj demokratiigon de la sistemo, fakte ĝis la fino. En tiu streĉata etoso okazis en junio 1967 la IVa kongreso de la verkista asocio, kiun partoprenis ankaŭ delegacio de la KP sub la gvido de J. Hendrych. Cetere, ankaŭ Hendrych (kaj la patro de Dubček) estis deportita en la koncentrejon de Mauthausen, kie Šik konatiĝis kun li kaj Novotný. Laŭ Šik, Hendrych estis la tipa oportunisma partia funkciulo kaj dogmulo, tamen iom pli klera ol Novotný almenaŭ rilate la ideologion. Sed li ne superis la nivelon de konformisma marksisto-leninisto kaj krome nenion komprenis pri ekonomio kiel Novotný mem. Kiam Hendrych sentis, ke Novotný perdis la apogon de Moskvo, li mem ambiciis okupi la oficon de la unua sekretario de la partio. Šik ĉiam esperis, ke Hendrych ne ricevos tiun postenon, ĉar li certe tuj entombigus la reformojn. Novotný estis almenaŭ speco de pragmatisto, kiu povis apogi la reformojn, se tio utilis por la konservado de lia politika potenco.

Diference de la reformoj de Šik, kiuj reagis al la ekonomia krizo de tiu jaro, Hendrych subtenis la idearon de Radovan Richta, kiu verkis laŭtan palavron pri la grandiozaj perspektivoj de la komunismo kadre de la „scienc-teknika revolucio“, tiam moda nocio en la komunisma bloko, kiu estis proklamita kiel oficiala doktrino dum la XIIa kongreso de la ĉeĥoslovaka KP en decembro 1962. Ĉar la partio vidis eksterordinaran signifon en tiu laboro, Richta ricevis la taskon „esplori la sekvojn de la scienc-teknika revolucio por la socio“. Lia projekto ricevis stabon de 61 kunlaborantoj, estis rekte submetita al la prezidanto de la Akademio de la Sciencoj kaj akompanata de speciala komisiono de la CK. La esperoj je tiu projekto flanke de la partio estis grandegaj. La laboro de la teamo de Richta (kiu mem verkis la faman libron „Civilizo ĉe la vojkruciĝo“) estis laŭte laŭdita de la partiaj oficialuloj, ĉar ili vidis en ĝi la daŭrigon de la marksa verko sub la ŝanĝiĝintaj kondiĉoj de la dua duono de la 20a jarcento. Ankaŭ ĉefideologo Hendrych montris sin ege fascinata de la verko de Richta, pri kiu li opiniis, ke la homoj bezonas ĝuste tian „grandiozan perspektivon“. Dum Richta do fantaziis pri la scienc-teknika revolucio, la celo de la teamo de Šik estis pliefikigi la ekonomion per la enkonduko de merkataj elementoj. Do, estis klare, ke la konceptoj de Richta kaj Šik neniel rekte kongruis aŭ koheris, ĉar ili reprezentis diversajn sferojn

[230] Pri la diferenco inter sovea kaj sovetia vd. sub http://vortaro.net/#Sovetia.

[231] Vd. Mlynár en: Pelikán 1979, p. 59.

de la sciencoj. Laŭ Šik, nek Hendrych nek Richta povis au volis kompreni la esencon kaj neceson de liaj reformoj, do estis malfacile, eĉ sensence gvidi kun ili ajnan racian diskuton pri tiu temo, ĉar ilin interesis nur la sciencteknika revolucio, dum la diskuto pri merkata ekonomio komplete forestis en iliaj konsideroj.[232] Rentabilitato, profito kaj malcentralizado, eĉ iom da konkurenco eble jes, sed privatigo, merkato kaj kapitalismo estis striktaj tabuoj. Sed la raporto de Richta, kiu anoncis novan eraon, estis verŝajne ne pli ol varmega aero.[233] Tamen kredi, ke la laboro de Richta estis vana aŭ rapide forgesita, estus erare. Male, ĝi helpis al li persone fari grandan ´intelektan´ karieron en Ĉeĥoslovakio kaj eĉ internacie. La partio donis al li la Klement-Gottwald-medalon, kaj eĉ la sovetianoj interesiĝis pri liaj ideoj. Liaj konkludoj trafis tempon, en kiu oni diskutis pri kibernetiko kaj komputila teknologio, pri nova modelo de la socialismo kaj pri la rolo de la homo en ĝi.[234] Richta eĉ inventis la sloganon de la „socialismo kun homa vizaĝo", kiun Dubček poste transprenis por siaj celoj, kaj ludis poste iom ambiguan rolon dum la „Praga printempo".[235]

Utiligante la agadon de Richta kaj liaj kunlaborantoj, kiuj iusence ricevis la oficialan benon de la partio, Hendrych klopodis intrigi kontraŭ la reform-projekto de Šik, kiun li konsideris minora kaj etburĝa. Laŭ Hendrych la ideoj de Šik, kiun li celis bruski kaj marĝenigi per glorado de Richta, estis de hieraŭ, dum tiuj de Richta de morgaŭ.

La tria grava reform-komisiono estis tiu de la juristo Zdeněk Mlynář, kiu estas CK-sekretario kaj okupiĝis pri la reformado de la politikaj, ŝtataj kaj juraj strukturoj. Kiel partia funkciulo, kiu faris en principo similan karieron kiel Ota Šik, li emancipiĝis de marksismaj kaj stalinismaj dogmoj kaj venis al la konkludo, ke Ĉeĥoslovakio povos prosperi nur, se ĝi adaptos la modelon de la aŭtentika „politika demokratio", kiu posedas ĉiujn trajtojn de la jura ŝtateco kaj de la partia plurismo kaj garantias al ĉiuj siaj civitanoj sendepende de klaso, konfeso aŭ etno la homajn rajtojn. Ankaŭ la laboristoj kaj kamparanoj estis inkluzivitaj kiel egalrajtaj civitanoj. Aliaj eroj de la reformoj de la komisiono de Mlynář koncernis la reorganizadon de la rilatoj inter ŝtato kaj partio, kiujn Mlynář celis apartigi, liberigante la ŝtaton de la partio. Kiel atendeble, la partiaj konservemuloj profunde malfidis la koncepton de Mlynář, kiuj ŝajnis al ili forlasi la koncepton de la „socialisma demokratio", kiu devis esti la demokratio de la laboristoj kaj kamparanoj, fajfante pri la principoj de la jura ŝtateco, kiu estis konsiderita de ili kiel burĝa inventaĵo, kiun la komunistoj abolis. Ĉi tiuj reformprovoj, kiuj malmulte interesis la ĉeĥoslovakojn, fin-fine fiaskis ankoraŭ antaŭ la fino de la „Praga printempo" inter alie pro tio, ke ili komplete neglektis la temon de la federigo de la rilatoj inter Ĉehio kaj Slovakio.[236]

Dum tiu memorinda IVa kongreso de la verkista asocio la partiaj funkciuloj devis aŭdi fortajn plendojn pri la situacio de la literaturo en Ĉeĥoslovakio kaj pri la monopolisma kaj diktatur-totalisma unupartia regado flanke de ĉeĥoslovakaj verkistoj kiel Milan Kundera, Aleksandr Kliment, Ivan Klíma, Pavel Kohout, Jan Procházka, Václav Havel, Ludvík Vaculík, Antonín Liehm kaj aliaj, kiuj incitis ilian koleron kaj ilustris la profundan abismon inter la kritikemaj intelektuloj de la lando kaj la pintaj partiaj funkciuloj. En sia inaŭgura parolado Milan Kundera kritikis „bigoton, vandalismon, senkulturecon kaj mankantan amon al la libereco" kaj emfazis la neceson de libera literaturo, se la ĉeĥa kaj slovaka nacioj volas pluekzisti. Ludvík Vaculík, kiu membris en la partio ekde 1950, ne hezitis ataki la komunisman partion per akraj komparoj kaj mallaŭdis ĝin pro tio, ke ĝi favoras ĉefe malkapablajn homojn kiel gvidantojn, kiuj plej malmulte kontraŭstaras la malmoralajn influojn, kiujn la politika potenco laŭ li produktas. La renoma verkisto vidis la danĝeron de la restaŭrado de la stalinismo kaj postulis garantion

[232] Imagon pri la enhavo de la teorioj de Richta donas https://opac.nebis.ch/ objects/pdf/z01_003273489_01.pdf (la libro mem estas havebla ĉ e https://www.swissbib.ch/Record/269279946).
[233] Vd. Richta-Report. Politische Ökonomie des 20. Jahrhunderts: Die Auswirkungen der technisch-wissenschaftlichen Revolution auf die Produktionsverhältnisse. Frankfurt am Main 1971. 427 p. (La enhavon vd. sub https://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_003273489_01.pdf).
[234] Laŭ Wessel, p. 67-90.
[235] En julio 1968 Richta publikigis manifeston, kiu finkalkulis kun la politiko de la komunisma partio de la pasintaj jardekoj kaj enhavis nigran prognozon en kazo, ke la „Praga printempo" fiaskos, tiel ke Brejnev suspektis lin pro „kontraŭ-revolucia" sinteno. Post la finode la „Praga printempo" Richta adaptis sin al la novaj politikaj kondiĉoj kun la espero, ke li povos ludi gravan rolon ankaŭ en la Husák-tempo. En la Okcidento oni ne plu parolis pri la ideoj de Richta, preferante la opiniojn kaj verkaĵojn de la literaturaj intelektuloj, kiuj parte migris eksterlanden kaj estis konsiderataj kiel veraj herooj de la „Praga printempo", ĉar rifuzis fari kompromisojn kun la politika reĝimo.
[236] Pli detale pri la reformlaboro de Mlynář vd. ĉe Schulze Wessel, p. 112-34.

de liberecoj por la civitanoj. Kvankam li estis konvinkata, ke en Ĉeĥoslovakio la evoluo al la socialismo estis necesa, li opiniis, ke en la pasintaj 20 jaroj neniu socia demando estis solvita.

La plimulto de la ĉeestantoj pledis kontraŭ la cenzuro. Kohout ne nur komparis la aktualan staton de la libereco de la gazetaro en Ĉeĥoslovakio kaj okcidenta Germanio, kie ĝi estis multe pli bona, sed li ankaŭ kritikis la por-araban kaj kontraŭ-israelan politikon de la ĉeĥoslovaka registaro. Arnošt Lustig, kiu travis kiel judo la koncentrejojn de Theresienstadt, Auschwitz-Birkenau kaj Buchenwald kaj kies patro estis mortigita en Aŭŝvico, eĉ komparis la politikon de la ĉeĥoslovaka KP kun la „antisemitisma propagando de la germanaj nacisocialistoj". Ivan Klíma prelegis pri la historio de la gazetara libereco kaj komparis la ĉi-rilatan situacion de la habsburga regno dum la baĥa absolutismo en 1867 kun tiu en Ĉeĥoslovakio en 1967, kiu nature estis pli malbona en la dua kazo. La interesaĵo estis, ke en Ĉeĥoslovakio la cenzuro estis leĝe enkondukita ĝuste en la 100a jaro post ĝia abolo en Aŭstrujo-Hungarujo. La spirito de Kafka ŝvebis en la aero, kvankam lia nomo ne estis menciita. Kiam la partoprenantoj voĉdonis pri la demando, ĉu la „Malferma letero al la Sovetia Verkista Kongreso" de la rusa verkisto Aleksandr Solĵenicyn de 1967, en kiu li esprimiĝis kontraŭ la subpremado kaj cenzurado de la literaturo en Sovetunio,[237] estu laŭtlegita, oni unuanime akceptis tiun proponon kaj menciis la koncernan leteron en la protokolo. Ĉio-ĉi nature tute ne plaĉis al Hendrych, kiu montris sin konsternata kaj kolere forlasis la salonon. La venontan tagon li reaperis en la konferencejo kun kontraŭa reago de la prezidio, kiu timigis multajn ĉeestantojn. Rifuzante ĉiujn riproĉojn kontraŭ la partia politiko, li mallaŭdis kun ĉagreno la „anarkion" dum la kongreso kaj la „disvastigon de reakciaj kontraŭ-socialismaj opinioj" en tiu „ideologie devianta" medio, kvankam la verkistoj postulis nenion alian ol pli da libereco, demokratio kaj humaneco kaj la abolon de la cenzuro. Nature, la paroladoj de la kritikemaj verkistoj ne povis aperi en la gazetaro, sed anstataŭ tio ili cirkuladis samizdate.[238]

Post tiu embarasa kongresa okazaĵo la prezidio de la KP decidis puni la herezajn verkistojn, kun fatalaj sekvoj. Procházka estis malhelpita fariĝi asocia prezidanto kaj forigita de la CK, Kohout enkasigis akran oficialan riproĉon kun severa averto kaj kontraŭ Kundera oni enkondukis disciplinigan proceduron. 11 reformemaj kandidatoj estis forstrekitaj de la elektolisto por la CK de la verkista asocio. Tio kaŭzis novajn protestojn flanke de la asociaj membroj, kiuj solidariĝis kun la ekskluditoj. La plej akraj kritikistoj, do Vaculík, Liehm kaj Klíma estis eksigitaj el la partio. Kontraŭ la verkistoj Pavel Tigrid, Beneš kaj Stanislav Zámečník oni lanĉis jurajn procesojn kaj Ladislav Mňačko perdis sian ĉeĥoslovakan civitanecon, ĉar li defendis Israelon, kien li elmigris. La punitaj verkistoj ne plu rajtis publiki siajn verkojn. De antisemitismaj ekscesoj, kiuj tiam ankaŭ okazis en Ĉeĥoslovakio, estis koncernataj precipe juddevenaj homoj kiel Ota Šik,[239] František Kriegel, Eduard Goldstücker, Josef Pavel k.a.). Iuj venĝemuloj el malnovaj tempoj utiligis la novan liberecon kaj sendis anonimajn leterojn al la gazetaro, precipe *Rudé právo*, aŭ cirkuligis flugfoliojn, en kiuj oni krude ofendis tiujn homojn kiel cionistojn, faŝistojn kaj malamikojn de la laborista klaso, k.s.[240] Novotný polemikis kontraŭ Šik persone, ĉar li entuziasme parolis favore al demokratiaj valoroj, kiun Novotný evidente abomenis. Malantaŭ ĉio tio la partiestro suspektis konspiron kontraŭ lia politburoo kaj la socialismo mem. La gazeto *Literárni Noviny*, la verkista eldonejo kaj la sociala fonduso por la verkistoj estis metitaj sub ŝtatan kontrolon de la kultura ministerio kaj la revuo ricevis novan, pli lojalan redakcion. La legantoj reagis per amasa malabonado de la gazeto. Laŭ alia fonto *Literárni Noviny* estis malpermesita kaj anstataŭigita per alia bulteno kun la titolo *Erárky*. La literatura gazeto *Tvar* ĉesigis sian aperadon, ĉar ĝia ĉefredaktoro rifuzis transformi la redakcion laŭ la proponoj de la partio. Al la verkista asocio oni altrudis novan prezidion, al kiu apartenis precipe konservativaj verkistoj. Fakte, Hendrych proklamis la malnovan verkistan asocion likvidita kaj anstataŭigis ĝin per iu verkista kolektivo, kiu estis lojala al la partio kaj do egalŝaltita kun ĝi. La malnova asocio tamen almenaŭ provizore daŭrigis sian ombran ekzistadon, formante propran komisionon. Nur post la falo de Novotný en januaro 1968 la malnova verkista asocio povis esti restarigita kaj Eduard Goldstücker fariĝis ĝia nova prezidanto.

---

[237] La tekston vd. sub http://antology.igrunov.ru/authors/solzh/letter-to-wrighters.html (ruslingve), https://www.spiegel.de/spiegel/print/d-46394393.html (germanlingve).
[238] Vd. https://www.radio.cz/de/rubrik/kultur/beim-schriftstellerkongress-1967-oeffnet-sich-tiefe-kluft-zwischen-kulturschaffenden-und-parteispitze.
[239] Laŭ propra klarigo, Šik ne estis judo laŭ la difino de la „Nurnbergaj leĝoj" de 1935, ĉar lia patrino estis ĉeĥino kaj lia patro judo, kies patrino jam estis „miksaĵo". Kaj Šik mem estis edukata senreligie.
[240] Vd. Schulze Wessel, p. 245-51.

Sed tiuj rigoraj rimedoj kontraŭ la kritikemaj verkistoj, kiuj estis deciditaj de Novotný kaj Hendrych, estis malaprobitaj ne nur de la popolo, kiu estimis tiujn intelektulojn, sed ankaŭ de kelkaj aliaj anoj de la politburoo, precipee Jaromír Dolanský, Černík kaj Kolder (!), kiuj pli kaj pli formiĝis kiel kontraŭuloj de la aŭtokratiisma partiestro.

La psikoza milito, kiun la stalinistoj kaj poststalinistoj gvidis kontraŭ la disidentaj kaj opoziciaj intelektuloj, estis senprecedenca en la historio. Pri la rolo de la verkistoj kaj de la literaturo, Ismail Kadaré, la fama albana verkisto kaj opoziciulo, skribis (en 1990): „Kontraste kun la ĝenerala opinio, ĝuste la malfacilaj tempoj, en kiuj la diktatoroj furoras, estas la plej fekundaj tempoj por la literaturo. La diktaturo kaj literaturo povas kunekzisti nur laŭ unu sola maniero: reciproke disŝiregante kaj turmentante unu la alian tage kaj nokte. La verkisto estas la natura malamiko de la diktaturo. Li kontraŭbatalas ĝin senĉese eĉ kiam li opinias, ke li dormas. Ĉar tiu lukto estas engravurita en sia gena kodo. La diktaturo kaj literaturo estas imageblaj nur kiel du sovaĝaj bestoj, kiuj konstante kaptas unu la alian ĉe la gorĝo. Kvankam iliaj ungoj estas diversaj, ili kaŭzas lezojn unu al la alia, kiuj estas diversaj. La lezoj, kiujn la verkistoj ricevas, estas kelkfoje teruraj, ĉar ili estas tuj videblaj. La lezoj, kiujn la verkistoj kaŭzas al la diktaturo, efikas kun prokrasto, sed ili estas nekuraceblaj. (…)“[241]

Kompare kun la stalinisma diktaturo sub Enver Hoĝa en Albanio, kie ĉirkaŭ unu triono de la popolo estis rekte koncernata de drastaj reprezalioj kaj minimume 100 mil civitanoj estis internigitaj en teruraj prizonoj, koncentrejoj kaj laborlagroj de la albania „gulago“,[242] de kiuj 7-10 mil estis mortigitaj, nature, la formo de la diktaturo en Ĉeĥoslovakio de la jaro 1967 estis nekompareble pli milda, ankaŭ kompare kun la tempo de la klasika stalinismo de la 50aj jaroj. Kaj malgraŭ la severa cenzuro eblis publikigi kritikajn artikolojn. La komunistoj preferis apliki la rimedon de la subtila diskriminacio kiel integra parto de la sistemo anstataŭ nuda perforto. Tiun ´progreson´ la popolo certe alte taksis, kvankam oni neniel povis paroli pri demokratia sistemo, pri kiu oni pli kaj pli vigle diskutis en Ĉeĥoslovakio. Kiam en oktobro 1967 la Centra Komitato, kiu opiniis, ke la prezidio devas raporti al ĝi, unuafoje kritikis la ĝisnunan reĝimon, tio signifis la unuan atakon kontraŭ la diktaturo kaj la unuan paŝon al demokratiigo de la sistemo. Do, la ĝenerala diskuto pri la demokrati(ig)o kaj ĝiaj diversaj eblaj formoj estis lanĉita.[243] Sed la kompreno de la leninismaj-stalinismaj komunistoj pri demokratio ne kongruis kun la kompreno, kiun havis la „demokratiaj“ komunistoj (aŭ socialistoj). Grave tordante kaj misutiligante la originan ideon de la demokratio, la regantaj komunistoj, kiuj reprezentis la sovetian modelon, nomis siajn satelitajn ŝtatojn „popolrespublikoj“ kaj asertis, ke en ili estas efektivigita la demokratio de la progresemaj klasoj de la laboristoj kaj kamparanoj sub la gvido de la komunisma partio. Samtempe ili kredis, ke ĉi tiu speco de demokratio donis al ili la rajton subpremi kaj ekskludi ĉiujn kaj ĉion, kiuj/kio troviĝas ekster tiuj klasoj, precipe la „burĝoj“ kaj „kapitalistoj“, t.e. nekomunistoj kaj apogantoj de la privata posedo, kiujn la komunistoj misfamigis kaj persekutis kiel „klasajn malamikojn“. La celo de la „humanisma socialismo“[244] de la „Praga printempo“ ne estis meti *klason* en la centron de la demokratio, sed la *popolon*, t.e. la homan individuon mem. Sed tiu koncepto de la socialismo koliziis kun la valida sovetia modelo, kiu insistis pri la aŭtonoma potenco de la partio, kiu reprezentis la laboristan klason kaj la ŝtaton, anstataŭ la povo de la aŭtonomeco de la civitanoj, kion la ĉeĥoslovakaj reformistoj postulis. En la sovetia modelo homo ne estis „ĉelovek“ sed „(tovariŝĉ) graĵdanin“, kiu perdis sian indviduecon favore al la kolektivo. Koncerne la demandon de la posedo, demokratiaj intelektuloj reprezentis la opinion, ke ne gravas la formo de la posedo, sed esencas la intelekta nivelo de la produkta procezo.[245]

Novotný eĉ ne rimarkis, ke li faris eraron post eraro. Kiam la studentoj protestis en Prago la 21an de oktobro kaj marŝis kun kandeloj kun 2000 aliaj homoj, la polico provis forpeli la amason per larmgaso kaj apliko de batbastonoj, postĉasante fuĝintajn studentojn ĝis la universitato, kie ili estis sovaĝe traktitaj per batoj. La 31an de oktobro ripetiĝis polica interveno kontraŭ iu manifestacio de studentoj en la ĉefurbo. La studentoj postulis nenion alian ol la formado de institucioj, en kiuj ili povas formuli kaj diskuti siajn opiniojn kaj dezirojn. Fakte estis starigita iu „Akademia Klubo de la amikoj de

---

[241] Vd. Kadaré, I.: Albanischer Frühling. Berichte, Briefe, Betrachtungen. Kiel 1991.
[242] La plej teruraj prizonoj kaj laborlagroj de la albana gulago dum la Hoĝa-tempo en Albanio troviĝis en Spaĉ, Qafë Bar, Ballsh, Tepelena, Porto Palermo kaj Burrel (vd. https://www.youtube.com/watch?v=HQ5WG_bNc_s).
[243] Löbl/Grünwald, p. 59-67, 68-76.
[244] Löbl atentigis, ke Markso pruvis, ke socio, en kiu la homo povas plene efektivigi sian ekzistadon, bezonas la abolon de la klasoj. En tio li vidis la kondiĉon por la humanisma socialismo. Nature, ekzistis kritikistoj de la marksismo kiel Richard Pipes, kiuj vidis neniun humanismon en la teorioj de Markso (vd. lian libron pri la komunismo).
[245] Löbl/Grünwald, p. 68-76.

la artoj", kiu estis utiligata por interŝanĝi vidpunktojn inter studentoj kaj opoziciaj verkistoj. La regantoj reagis per eksigo de kelkaj studentoj el la partio kaj universitato aŭ senprokraste vokis ilin al la armea servo. Sed la studentoj, kiuj estis apogitaj de la verkista kongreso, tute ne perdis sian kuraĝon. Ilia kritiko kontraŭ diversaj man-koj en sia vivo fariĝis pli kaj pli laŭta. Junaj viroj, kiuj portis longan hararon, kio estis alia esprimo de protesto, estis postĉasitaj de sekurecaj fortoj, kiuj ordonis, ke ilia hararo estu senprokraste tondita surloke, laŭdire pro higienaj kialoj.[246] Estas klare, ke tiuj brutalaj intervenoj de la polico, kiu estis kontrolita de la tiama ministro pri internaj aferoj Josef Kudrna,[247] kaŭzis grandan konsternon ĉe la ĝenerala publiko. La protestoj kaj manifestacioj de la studentoj, kiuj sendis rezoluciojn al la partio kaj registaro, estis daŭrigitaj. La nova ĉefredaktoro de la revuo *Kulturní tvorba*, F. Kolár, riproĉis al la studentoj, ke ili estas agentoj de la okcidenta kontraŭ-komunisma propagando. En la praga universitato, kies filozofia fakultato estis la centro de la studenta protestmovado, okazis kvinhora manifestacio, dum kiu la partoprenantoj postulis la punadon de kulpuloj inter la policistoj, kiuj aplikis larmgason kaj perforton kontraŭ protestantoj. En ultimato por la ministro pri instruado oni postulis ĉesigi la perforton kontraŭ studentoj. La ĵurnalista asocio postulis en malferma letero la eksigon de Novotný kaj la abolon de la cenzuro. Kompreneble, la postuloj de la ultimato ne estis plenumita kaj la studentoj, kies radikoj estis en la (nekomunisma) subtera movado kaj kies protesto poste kunfandiĝis kun la ĝenerala opozicio, daŭrigis ribeli kontraŭ la malŝatata aŭtoritatisma ŝtatpotenco. Eĉ Rudi Dutschke, unu el la centraj figuroj de la eŭropa junulara movado de la 1968-a jaro, kiu influis la vivon de la studentaro fakte tutmonde, aperis en Prago por diskuti kun la studentoj. Koncerne la marksismon, multaj junuloj rifuzis la sovetian modelon kaj estis pli impresataj de la ĉina, kuba kaj jugoslavia komunismo, kvankam tiu sinteno ja sendube estis same naiva.

Kiam Novotný ankoraŭ komencis polemiki kontraŭ la slovaka opozicio, li faris novan gravan eraron kaj perdis la plej lastan krediton, kiun li ankoraŭ havis. Kiam en somero 1967 Novotný vojaĝis tra Slovakio, kie li permesis al si fari malkonvenajn provojn gajni la ´amon´ de la slovakoj, kritikante la slovakan naciismon, li rikoltis negativajn reagojn kaj devis kompreni, ke li ne estas bonvena en Slovakio. Pli kaj pli da slovakaj membroj de la CK, kiuj signifis ĉirkaŭ trionon, komencis rifuzi Novotný kiel partian gvidanton kaj per sia kritika sinteno esence kontribuis al la preparado de lia baldaŭa falo. La regado de Novotný signifis ankaŭ ĉiaman konflikton kun la slovakoj, precipe kelkaj konkretaj kamaradoj. Unu el la ĉefaj politikistoj de Slovakio, Gustáv Husák, estis suspektita de Novotný kiel „slovaka naciisto", kio signifis, ke samtempe li estis konsiderita kiel kontraŭ-socialisma elemento, eĉ se Novotný estis devigita rehonorigi la slovakajn komunistojn, kiuj partoprenis en la slovaka ribelo de 1944. Novotný klopodis eviti, ke Husák okupu iun gvidan funkcion en Prago. Ne estis sekreto, ke Husák ege malŝatis Novotný, kiun li konsideris kulpa, ke li devis sidi multajn jarojn en la malliberejo. La grupo de Šik, kiu tamen apogis la deziron de Husák federigi la ŝtaton, konsideris Husák-on natura aliancano por forpeli Novotný de sia posteno. Sed je la seniluziiĝo de Šik, Husák ne tro interesiĝis pri liaj reformoj. Lin interesis ĉefe la forpuŝo de Novotný de la potenco, kaj por atingi tiun celon Husák pretis alianciĝi kun ĉiu, kiu havis la saman celon.[248]

Ankaŭ Alexander Dubček, alia slovako, kiu jam estas kelkfoje menciita en ĉi tiu studo, laŭ Šik ne montris troan entuziasmon por ekonomiaj reformoj, kvankam en siaj memuaroj Dubček asertis, ke li subtenis la ideon de ekonomiaj reformoj jam en 1961/62. Kvankam Šik eble ne tro alte taksis tiun partian funkciulon, ĉar li estis iom pala aŭ timema, ne necesas subtaksi lian rolon en la partio. Dubček, kiu fariĝis membro de la slovaka KP en 1939, same kiel Husák partoprenis en la slovaka ribelo de 1944, sed bonŝancis, ke li ne fariĝis stalinisma viktimo. Ekde 1949 li okupis diversajn partiajn oficojn en la slovaka provinco kaj en 1953 fariĝis partia sekretario en la urbo Banská Bystrica. En 1955 li iris al Sovetunio por studi en la partia altlernejo de KPSU en Moskvo. En 1958 li revenis al Ĉeĥoslovakio, kie en Bratislavo li fariĝis partia sekretario. Kompare kun aliaj alilandaj komunistoj, Dubček estis infano de la degela vetero sub Ĥruŝĉov. En Moskvo, kie li vizitis la partian altlernejon, li iĝis atestanto de la malfermaj kaj kritikaj diskutoj pri la politiko de Stalin, dum en lia lando la stalinismo ankoraŭ funkciis sen esti tuŝita de la kritiko. En Moskvo Dubček tiam konatiĝis ankaŭ kun Breĵnev, kiu pozitive pritaksis liajn kapablojn. La unua malkonsento pri la politiko de Novotný okazis en 1958, kiam Dubček malaprobis la konstitucian reformon de 1958, ĉar laŭ li la nomŝanĝo de ČSR al ČSSR kun la aldono de la adjektivo „socialisma" ne taŭgas, ĉar al li malplaĉis, ke la partio estas fiksita kiel centra integra elemento en

[246] Tio okazis en aŭgusto kaj septembro 1966 en Prago kaj Bratislavo (vd. Schulze Wessel, p. 142).
[247] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ministry_of_the_Interior_(Czechoslovakia).
[248] Šik, ĉap. III, I.

la ŝtato, kio kontraŭdiris la konstitucion de 1948 kaj ĉar li sentis, ke la rajtoj kaj politikaj atingoj de la slovakoj estos limigitaj per tiu nova konsitucio. En 1959 Dubček estis vokita al la CK de la ĉeĥoslovaka KP kiel sekretario por industriaj aferoj, kie li devis respondeci pri metalurgia, maŝina, kemia kaj konstrua industrioj. Kiam en Sovetunio oni efektivigis unuajn rehonorigojn de stalinismaj viktimoj, Dubček levis al saman demandon pri la rehablitado de ĉeĥoslovakaj viktimoj, precipe batalantoj de la slovaka rezisto, kiuj estis likviditaj en 1951-53. Okazis akraj diskutoj ene de la partio, ĉar Novotný esprimis sin kontraŭ tia rehabilitado. Dubček devis cedi kaj estis sendita kiel subalterna sekretario al iu slovaka distrikto. En 1960 Novotný vokis lin al Prago por labori en la CK, kie ĝis 1963 li funkciis kiel sekretario. En 1962 li fariĝis kandidato kaj poste plena membro de la politburoo Okaze de la 12a partia kongreso (decembro 1962) Dubček atingis, ke estis kreita komisiono, kiu okupiĝu pri la stalinisma teroro kaj la rehonorigo de viktimoj. En 1963 la koncerna raporto de tiu komisiono, kiu estis gvidita de Kolder, estis finverkita, kaj Dubček postulis la rehonorigon de Husák kaj Clementis. En aprilo 1963 Novotný sendis lin al Bratislavo por transpreni la postenon de la Unua sekretario de la slovaka KP kiel posteulo de Bacílek. Kial Novotný favoris Dubček-on, kiu poste fariĝis lia kontraŭulo, ne estas klare, sed povas esti, ke li konsideris tiun slovakan partian karierulon lojala instrumento por reprezenti la centran regadon en Slovakio. Eble helpis lin liaj ruslingvaj konoj kaj bonaj rilatoj kun la sovetianoj. Do, en tiu tempo ankoraŭ neniu povis imagi lian rolon kiel unua sekretario de la ĉeĥoslovaka KP kaj kiel ĉefprotagonisto de la „Praga printempo“.

Post kiam la ekonomiaj reformoj estis formale enkondukitaj en Ĉeĥoslovakio en januaro 1967, la grupo de Šik komprenis, ke la politika lukto estos ankoraŭ daŭrigenda kaj ke multaj skeptikuloj devos esti konvinkitaj pri la avantaĝoj de tiuj reformoj, antaŭ ĉio en la medio de la (konservativaj) partianoj mem, precipe en ĝia CK. Al la popolo mem oni devis klarigi, ke la politikaj celoj kiel la altigo de la vivnivelo ne estas atingeblaj sen plibonigo de la produktiveco kaj efikeco de la ekonomio. Pro tio necesis rigore efektivigi la novan sistemon. Sed estis klare, ke la ĉefa rezisto kontraŭ tiu nova sistemo venis de burokratoj, kiuj alkutimiĝis al la malnova sistemo kaj ne pretis adapti sin al la nova, ĉar ili timis perdi siajn profesiajn kaj partiajn poziciojn. Dum multaj konservativaj profesoroj ignoris kaj eĉ bremsis ĝin, la studentoj de la ekonomiaj institutoj devis estis trejnataj por adopti la novan pensmanieron. Ota Šik ĝenerale ricevis por siaj prelegoj aplaŭdojn de la publiko, sed li estis observita de la sekreta polico, kiu raportis pri ĉiu prelego al Novotný kun la danĝero, ke Šik estos diskreditita ĉe li (kaj la sovetianoj). Novotný ege malŝatis tiun prelegan aktivecon de Šik kaj precipe la grandan publikan atenton, kiun li rikoltis, kaj volis malpermesi ĝin al li, sed Šik simple ignoris tiujn minacojn kaj konkludis, ke la politika lukto kontraŭ la bando de Novotný devas esti des pli fortigata.[249]

La 18an de oktobro 1967 komenciĝis la kunsido de la CK de la ĉeĥoslovaka KP, kun fatalaj sekvoj por Novotný, kiu ankoraŭ klopodis tiri la CKn, esperante je la apogo de la oportunistoj, sur sian flankon, kaj senkulpiĝis ĉe la slovakaj kamaradoj pro sia malkonvena atako kontraŭ la slovaka naciismo. Sed liaj penoj estis vanaj. Dum tiu kunsido Šik prezentis akran kritikon kontraŭ Novotný, kiu havis la karakteron eble iomete kompareblan kun la sekreta parolado de Ĥruŝĉov en februaro 1956 kaj sendube havis sian efikon. Plej akre la parolado de Šik, kiu rekte postulis la demision de Novotný kiel unua sekretario, estis malaprobita de la slovako Jozef Lenárt, tiama ĉefministro, kio estis iom surpriza, ĉar pli frue Lenárt montriĝis iom liberala politikisto.

Fine de oktobro 1967 okazis skismo – aŭ frakciiĝo – en la Centra Komitato kaj prezidio (politburoo). En ĝia kunsido Dubček, kiu iusence travivis kvazaŭ metamorfozon de Saŭlo al Paŭlo, kritikis, la konservemajn fortojn, al kiuj li riproĉis, ke ili subpremas ĉiujn progresemajn ideojn kaj de kiuj li postulis ĉesigi tiun praktikon. Nature, Dubček celis trafi per tiu kritiko unuavice Novotný persone, kiun li ŝajne nomis diktatoro. Li kulpigis lin, ke li sabotis la novan ekonomian sistemon (kiu estis enkondukita en tiu jaro) kaj postulis lian demision. En tio Dubček havis la apogon de František Kriegel kaj František Vodsloň, (iamaj) ĉeĥoslovakaj parlamentanoj kaj aktualaj membroj de la CK de la ĉeĥoslovaka KP. Vodsloň kritikis la maldemokratiajn metodojn de la partio, per kiuj ĝi pretendas gvidi la socion. Ankaŭ la du potencaj sekretarioj de la moraviaj distriktoj, J. Špaček el Brno kaj D. Voleník el Ostrava, kaj aliaj CK-anoj subtenis la opinion de Dubček kaj de la slovakaj kolegoj. Dubček postulis, ke la nova ekonomia ondo estu ankaŭ akompanata de enkonduko de nova politika sistemo. Tio estis forta tabako por Novotný, kiu rimarkis, ke li pli kaj pli izoliĝas. Novotný ege ĉagreniĝis kaj tuj reagis per kritiko kontraŭ la slovakaj partiaj gvidantoj, kiun la slovakaj CK-membroj perceptis kiel ofendon. Ili kolere forlasis la kunsidon

[249] Šik, ĉap. III, II.

kaj reaperis nur en la venontaj kunvenoj, kie la etoso estis karakterizata de reciprokaj akuzoj kaj intrigaj ludoj flanke de Novotný, kiuj celis elimini Dubček-on favore al Michal Chudík, kiu apartenis al la konservema alo en la prezidio (politburoo). Novotný planis ampleksan transformon de la registaro kaj prezidio, el kiu ankaŭ Oldřich Černík kaj Drahomír Kolder, du aliaj apogantoj de la reformoj, devis esti eliminitaj. Sed liaj kritikistoj repafis, riproĉante al Novotný diktatoran gvidstilon, kaj signalis al li, ke estus pli bone, se li demetus siajn funkciojn. Kiel unua sekretario kaj ŝtatprezidento li ĉiukaze estis tro ŝarĝata kaj ne plu kapablis reale plenumi ambaŭ funkciojn samtempe. Kiam la 10 membroj de la prezidio devis voĉdoni pri la sorto de la duobla funkcio de Novotný, 5 membroj (Černík, Dolanský, Dubček, Hendrych kaj Kolder) voĉdonis kontraŭ la akumulado de funkcioj (do kontraŭ Novotný), dum 5 aliaj (Chudík, Laštovička, Lenárt, Šimůnek kaj Novotný mem) voĉdonis por ĝi (kaj sekve por Novotný). Ĉar aperis ege embarasa patsituacio, la decido devis esti prokrastita kaj transdonita al la CK.

En la sekvo okazis diversaj privataj renkontiĝoj en sekret-konspira etoso inter diversaj CK-anoj, pri kiuj Šik detale rakontis en siaj memuaroj. Unu el ili Alois Indra, iama estro de la ŝtata plankomisiono kaj ministro pri trafiko, evidentiĝis agento de Moskvo, kiu raportis al la Kremlo pri internaj okazaĵoj en la ĉeĥoslovaka prezidio (politburoo). Post tio en Prago subite aperis Leonid Breĵnev por certiĝi, kio reale okazas en la ĉeĥoslovaka KP kaj kiel statas la situacio de la politikaj fortoj. Dum tiu vizito la sovetia ĉefo parolis ankaŭ kun Dubček kaj Hendrych, kiu montris sin preta transpreni la oficon de la Unua sekretario, por solvi la krizon. Breĵnev evidente ne estis kontraŭ la anstataŭigo de Novotný kiel unua sekretario per alia homo. Post kiam Breĵnev diris al la ĉeĥoslovakaj kamaradoj, ke ili mem decidu pri la sorto de Novotný („eto vaše delo“), li reveturis al Moskvo.[250]

La 19an de decembro komenciĝis la kunsido de la CK, dum kiu Novotný klopodis savi sian haŭton kaj rifuzis demisii. Sed tio jam ne plu helpis al li, ĉar pluraj membroj postulis lian eksiĝon kiel unua sekretario. En la kunsida tago de la 21a de decembro nur 4 de 15 membroj ankoraŭ subtenis Novotný, kiu komprenis la dilemon kaj disponigis la oficon de la Unua sekretario. Por decidi, kiu estu lia posteulo, la CK prokrastis sian kunsidon al la 3a de januaro 1968.

Kiel iuj ĉeĥoslovakaj gazetoj poste malkaŝis, iuj generaloj volis mobilizi parton de la armeo por fari puĉon kaj konservi la potencon de Novotný. La plano estis forĝita de Novotný-lojaluloj per la helpo de la oka sekcio de la CK, kiu respondecis pri ŝtata sekureco kaj armeo, kaj elektitaj armeaj fortoj. La ĉefo de tiu sekcio estis Miroslav Mamula, kiu estis ankaŭ intimulo kaj dekstra mano de la partiestro. Estis antaŭvidite, ke la tankoj de generalkolonelo Janko, vicministro pri defendo, devis surprize okupi Pragon, kaj ke diversaj reformistoj kiel Dubček, Josef Smrkovský, Šik, Prchlík, Martin Vaculík, Špaček, Borůvka kaj Liehm devis estis arestitaj laŭ iu sekreta listo kun 1030 nomoj, kiu estis kompilita de Mamula kaj subskribita de Novotný. Kiam Prchlík eksciis pri tiu plano, li informis Dubček-on kaj la Centran Komitaton. Feliĉe oni sukcesis atingi la neŭtralecon de la armeo, en kiu ekzistis ankaŭ subtenantoj de la reformoj. Generalkolonelo Janko faris suicidon kaj generalmajoro Jan Šejna, la plej alta politika oficiro de la ĉeĥoslovaka armeo, kiu subtenis la puĉon de Novotný, fuĝis (la 2an de marto) tra Hungario al eksterlando (Usono).[251]

Informoj pri la fiaskinta puĉo atingis ankaŭ la Okcidenton. Tra la okcidentaj radiostacioj tiuj novaĵoj nature rapide reatingis la publikon en Ĉeĥoslovakio, kiu estis malkontenta pri la nesufiĉa informado en sia lando mem.

### La falo de Novotný kaj la elekto de Dubček kiel nova partiestro en januaro 1968

La 4an de januaro 1968 Novotný cedis post kiam li ankoraŭ klopodis prokrasti sian anstataŭigon. La granda plimulto de la CK-anoj akceptis lian eksiĝon kiel unua sekretario de la partio, sed Novotný mem nature malvolonte akceptis la decidon.

Kiam en la venonta tago la membroj de la CK devis diskuti, kiu sekvu lin, ne estis tuj klare, kiu(j) kandidato(j) estu elekteblaj. Estis menciitaj la nomoj de Hendrych, Kolder, Černík, Piller, Lenárt, eĉ tiuj de Šik kaj Smrkovský, sed pro diversaj kaŭzoj neniu el ili estis dezirinda. Subite aperis la nomo

[250] Šik, ĉap. III, III.
[251] En Usono li disponigis al CIA siajn konojn pri la mobilizaj planoj de la armeoj de la Varsovia Pakto. La kazo de Šejna, kiu mem estis suspektata pro ekonomia spionado aŭ korupto kaj krom tio estis amiko de la filo de Novotný, signifis la unuan publikan gazetaran skandalon de Ĉeĥoslovakio en la tempo post Novotný.

de Aleksander Dubček, kiun oni konsideris taŭga kompromiso, kaj vidu, li estis *demokratie* elektita unuanime de la pleno de la CK de la ĉeĥoslovaka KP kiel nova unua sekretario de la ĉeĥoslovaka KP. Ke tiun postenon ricevis slovako tamen estis surprizo. Dum inter la komentantoj kelkaj opiniis, ke estas pura hazardo, ke tiu provinca funkciulo akaparis la ĉefan povon en Prago, aliaj kredis, ke temas pri favorulo de Moskvo, kiu preferis instali iun homon, kiu reprezentas mezan pozicion inter la dogmuloj kaj reformuloj[252] kaj kiu ne estas malamiko de Sovetunio.[253] Kvankam la evento havis la odoron de palaca puĉo, Dubček, kiu ĉiam restis afabla kaj formala, dankis al Novotný pro la farita laboro. Ĝis la 8a de januaro Novotný devis forlasi sian oficejon en la domo de la Centra Komitato. En la praga kastelo li ankoraŭ havis sian prezidentan oficejon, ĉar dume li restis ŝtatprezidento. Leonid Breĵnev estis ĉagrenata, ke la ĉeĥoslovakaj kamaradoj ne konsultis lin pri internaj personaraj reguligoj, sed li ja diris al ili en decembro, ke ili faru kion ili volas („eto vaše delo“) kaj estis kontenta pri la elekto de Dubček, kiun li preferis al Novotný kaj konsideris kiel amikon, ĉe kiu ekzistis neniu risko, ke li transiros al la „kontraŭrevoluciaj“ fortoj. En Prago Breĵnev havis kun li longan noktan interparoladon. Ankaŭ la posta letera korespondado inter ambaŭ partiestroj restis akcentite amiktona, precipe flanke de Breĵnev. Ĉion kion la sovetia estro entreprenos en la interpartiaj rilatoj, li konsideros kiel rilatojn inter „honestaj amikoj kaj sinceraj fratoj.“ Sed tiu tro persona stilo, kiu estis tipa sinteno de Breĵnev kaj kiun li utiligis por starigi ian artefaritan devigan aŭ truditan harmonion kun la kamaradoj por gajni iliajn amikecon kaj fidon, tamen ne tre plaĉis al Dubček, kiu, kiel ni vidos, ne pretis danci laŭ la melodio de la sovetianoj. Por Breĵnev plej gravis la „neskuebla reciproka fido“ inter la partneroj kaj la nerompebla „amikeco“ inter la socialismaj landoj.[254]

La reagoj al la elekto de Dubček estis ambiguaj. La popolo ŝajnis rilati indiferente al la ŝanĝo ĉe la pinto de la partio, des pli ke Dubček en sia unua parolado ne anoncis revoluciajn agadojn. *Rudé právo* kvitancis la ŝanĝon per seka komuniko, honoris la meritojn de Novotný, publikigis kurtan biografion de Dubček kaj prezentis la novan partiestron kiel konservanton de la tradicioj kaj garantianton de la stableco.[255] La vero estis, ke Dubček ricevis la novan postenon sen esti preparata al ĝi kaj verŝajne ankaŭ sen havi konkretajn imagojn, kion ĝi signifas kaj kion li faru, ĉar lia unua parolado enhavis, kiel dirite, neniujn indikojn pri gravaj reformoj aŭ ŝanĝojn. Ota Šik eĉ pridubis la taŭgecon de Dubček kiel nova ĉefo de la tutlanda partio, ĝuste ĉar Dubček ne estis konata al li kiel reformemulo, do li estis tre skeptika pri lia kapablo gvidi la reformojn, la ŝtaton kaj partion entute kaj do ne atendis tro multe de li. Dubček havis tro molan karakteron por tia malmola politiko, kiun li devis gvidi, kaj neniam lernis rilati kun lupoj kaj hienedoj, kiel Šik pike rimarkigis en siaj memuaroj. Kiel oni poste vidos, Šik ne estis trompita de tiu impreso, sed kiel oni ankaŭ vidos, ne ĉio en la politiko dependis de Dubček mem. Kio tamen plaĉis al la homoj estis la komplete novtipa retorika stilo de Dubček en la rilatoj kun la partianoj kaj la popolanoj, kiujn li traktis kun granda respekto kaj nekutima afableco. Ankaŭ la verkistojn kaj intelektulojn li renkontis kun estimo. Kvankam Dubček ne estis politikisto kun sensaciaj vizioj kaj utopiaj programoj por la estonteco (kiel Richta aŭ simile), li almenaŭ enportis sian bonan volon kaj la talenton de peranta moderatoro kun homeca komunikmaniero en ĉirkaŭaĵon, en kiu oni ĝis nun utiligis nur oficialajn protokolecajn kaj malplenajn frazaĵojn en sterila burokrateca lingvaĵo. Eduard Goldstücker, ekde januaro nova prezidanto de la ĉeĥoslovaka verkista asocio, entuziasmis pri tia homo, kies elekto signifis por li epokfaran eventon. Aliflanke, gravaj partiaj eminentuloj kiel Vasil Biľak, kiu estis la nova partiesto en Slovakio, ne hezitis diskomuniki – en la slovaka partia organo *Pravda* – sian negativan pritakson pri la nova reguligo en Prago kaj avertis pri la danĝero de „anarkio kaj arbitro“ flanke de „dekstraj oportunistoj“. Laŭ Biľak, novaj reformoj ne necesis en Slovakio, ĉar ĝi demokratiiĝis jam en la fruaj 60aj jaroj kaj ĉi-rilate do troviĝis sur pli alta nivelo ol la ĉeĥa landoparto, kiel li klarigis. Ankaŭ Dubček timis blinde enkonduki la demokration, ĉar li timis ĝian anarkiecon. postulis

[252] Reitzner, p. 10.
[253] Inter 1925 kaj 1938 Dubček vivis kun sia familio en Sovetunio, tiel ke li estis konsiderata en Ĉeĥoslovakio kiel komunisto de la sovetia tipo kaj poste (en 1955/56) li vizitis, kiel jam menciite, la partian altlernejon en Moskvo.
[254] Vd. Schattenberg, p. 462-6. Legante la libron de tiu ĉi germana aŭtorino, oni ofte ricevas la impreson, ke ŝi traktis la biografion de Breĵnev en tro hela lumo favore al tiu sovetia potenculo, kiu tamen politike subpremis kun sia bando de poststalinismaj komunistoj kelkcent milionojn da homoj en Sovetunio kaj tuta orienta Eŭropo.
[255] Vd. https://www.pragerzeitung.cz/vor-50-jahren-begann-der-prager-fruehling.

La „Manifesto de la junularo de ĈSSR“ postulis i.a. „demokratiigon de la socialisma sistemo, respektadon de ĉiuj homaj rajtoj kaj liberecoj, liberecon de la parolo, publikan kontrolon de ĉiuj ŝtataj kaj politikaj institucioj, rajton de la kunvenado kaj asociiĝo, nuligon de ĉiuj formoj de la cenzuro.“[256]

Kiel Ota Šik bedaŭris, en la unua tempo post la enoficigo de Dubček kiel unua sekretario de la KP, nenio esenca okazis, kaj la tuta partio refalis en la malnovan ritmon. Dubček ŝajne subtaksis la maĥinaciojn de la malnovaj apogantoj de Novotný, kiuj ne malaperis, sed restis sur la samaj lokoj kaj pozicioj kiel antaŭe. La trankvila kaj afabla sinjoro Dubček, kiu mem ne tro urĝis okupiĝi pri la temo de la reformoj, riskis endormiĝi, tiel ke la reformistoj devis veki kaj averti lin, por ke li aktiviĝu kaj ŝanĝu almenaŭ la personaron de sia plej proksima ĉirkaŭaĵo. La tuta dinamiko estis tro rapida por Dubček, kiu komencis paniki, kiam li konstatis, ke ĝi kaŭzis tiel fortajn sociajn ŝanĝojn kaj viglan kritikeman publikecon, al kiu ankaŭ Dubček ne estis preparata.

## La „Praga printempo“ vekas esperojn kaj rikoltas kontraŭstaron

La laboro de la nova Unua sekretario montriĝis malfacila. La koalicio, kiu forpelis Novotný, estis kvalite heterogena, kaprica kaj malreformema kaj kvante ĝi formis la plimulton de la fortoj en la partio. Kelkaj funkciuloj ja sendube estis adeptoj de la reformoj, sed ili havis malgrandan influon. Pro tio Dubček ne povis tuj anstataŭigi grandstile malnovajn funkciulojn, ĉar ilia rezisto estis tro forta. Kaj kelkaj centraj kolegoj, kiuj ankoraŭ staris je la sama flanko post la eksoficigo de Novotný kiel unua sekretario, baldaŭ komencis kontraŭstaradi kaj malhelpadi la laboron de Dubček. La interna informfluo lamis kaj la gazetaro hezitis tro laŭte trakti la temon de la reformoj. Des pli viglaj estis la diskutoj dum amaskunvenoj en Prago, Brno ka Bratislavo, kiuj estis persone vizititaj de kelkaj CK-anoj kiel Smrkovský, Šik, Švermová, Goldstücker kaj Husák kaj verkistoj kiel Pavel Kohout kaj Jan Procházka por informi la partiajn ĉelojn kaj diskuti kun la ĉeestantoj pri la aktuala stato de la aferoj. En Prago tiaj kunvenoj kun miloj da partoprenantoj okazis en la Slava Domo kaj en la kongresejo de la Fučík-parko. En Bratislava elpaŝis kadre de tia aranĝo Gus-táv Husák, kiu ne hezitis meti kontraŭ-israelajn kaj antisemitismajn akcentojn en la debato, kiuj eĉ trovis aplaŭdon de la publiko. Tio neniam povintus okazi en Prago. Sed la antisemitisma ondo de tiu tempo en la orienta bloko tamen ne estis tiel forta en Ĉeĥoslovakio kompare kun Pollando, kie ĝi vere trovis novan eksplodon kadre de la Moczar-kampanjo.[257]

La sovetiaj gvidantoj kutimis krude enmiksiĝi en la aferojn de siaj satelitaj landoj, kiujn ili konsideris kvazaŭ propra teritorio rezulte de la milita gajno. La nova politiko, kiu estis lanĉita en Ĉeĥoslovakio, dekomence faris ilin skeptikaj kaj suspektemaj, kvankam ili esperis ankaŭ lerni de ĝi, precipe de la proponoj pri ekonomiaj reformoj, laŭ la moto de Lenin, kiu diris, ke „estas malnova saĝo, ke en la politiko oni devas lerni de la malamiko.“ Kiam fine de januaro Dubček flugis al Moskvo laŭ invito de Breĵnev, li sidis antaŭ tuta vico de ĉefaj funkciuloj kiel Podgornyj, Kosygin, Suslov, Kirilenko kaj Ŝelest, kiuj aŭskultis kun ŝtoniĝintaj vizaĝoj lian neformalan raporton pri la nova politika evoluo en Ĉeĥoslovakio. Kvankam ili ne estis kontraŭ li persone, Dubček notis en siaj memuaroj, ke tiam li komprenis, ke „tiuj burŝoj estas tro duraj por li“, kvazaŭ kelkajn numerojn tro grandaj, kaj ke ili ne aprobis nek pretis aprobi, kion li klarigis al ili. Fakte, tiuj betonaj homoj de la poststalinisma epoko montris nul komprenon por alia politiko, kiu ne harmoniis kun la diktita kurso de Moskvo, eĉ se Dubček promesis al ili, ke lia politiko enhavas nenion, kio povus esti direktita kontraŭ la interesoj de Sovetunio, de la Varsovia Pakto aŭ kontraŭ la ekonomia kunlaboro kun aliaj socialismaj landoj.

Okazis ankaŭ interparoloj kun la hungaro Kádár kaj la polo Gomułka, sed la diskutoj postlasis al Dubček la strangan impreson, ke ili volis nur aŭdi, kion li havas por diri kaj ke ili tuj raportis al Breĵnev, kion ili aŭdis de li. Nature, GDR-ĉefo Ulbricht rekte atakis la ĉeĥoslovakajn reformplanojn dekomence en neimageble aroganta maniero. Ceauşescu, la rumana KP-ĉefo, kiu kuiris sian propran menuon, kritikis la enmiksiĝon de Sovetunio en la internajn aferojn de la aliancanoj, sed tion li ne nepre faris unuavice por helpi al Ĉeĥoslovakio.

Nur en februaro Dubček finfine komencis elŝanĝi siajn plej proksimajn kunlaborantojn. Pro la malurĝemo de la nova partiestro la reformistoj perdis multe da valora tempo. Tiel tamen aperis pli junaj kaj pli reformemaj funkciuloj. Jam en januaro estis eksoficigita la danĝera estro de la ŝtata sekureco,

---

256 Kamberger, p. 107.
257 Schulze Wessel, p. 163-7.

generalo Miroslav Mamula, kiu fervore efektivigis ĉiujn ordonojn de Novotný, dediĉante sin al la kontraŭbatado de la studentaj protestoj kaj okupiĝante pri la eliminado de ĉiuj „malamikoj“, precipe intelektuloj. En sia plumpa potencavido li eĉ superis Novotný mem. Mamula-n anstataŭis generalo Václav Prchlík, kiu respondecis en la CK pri armeo kaj sekureca servo. Kiel ĉefo de grava politika sekcio de la armeo li ellaboris novan defendan doktrinon de Ĉeĥoslovakio, en kiu la ĉeĥoslovaka armeo devus ludi pli memstaran rolon kadre de la Varsovia Pakto, kies decidostrukturojn li kritikis, same la tro malgrandan politikan influon de la unuopaj membroj en tiu milita organizaĵo.

Kiam en la sama monato oni celebris la 20an datrevenon de la akaparo de la povo fare de la komunistoj en Ĉeĥoslovakio, Dubček diris: „Ni nepre devas serĉi novajn vojojn. Ne necesas diskuti pri tio, ĉu la partio devas konservi la gvidan rolon aŭ ne, sed ni devas reekzameni la manieron de la efektiva apliko de tiu rolo.“ Tiaj kaj similaj eldiroj probable sufiĉis por fari la sovetianojn suspektemaj pri Dubček kaj la tuta politika kurso, kiun li celas stiri en sia lando.

Krom tio oni abolis la preventan cenzuron. Kiam tio okazis en marto, la amaskomunikiloj komencis informi la publikon pli kaj pli malferme kaj honeste kaj pri la pasinteco kaj pri la aktualaj okazaĵoj. Precipe la ĉeĥoslovaka televido kaj kelkaj gazetoj kiel *Literárni listy*, *Reporter* kaj *Student* en Ĉeĥio kaj *Smena* en *Slovakio* ludis la centran rolon de transportiloj de freŝaj novaĵoj kaj liberaj opinioj. Rudé právo skribis, ke „la pario ne povas pretendi paroli en la nomo de la tuta popolo“ kaj „eraroj estu korektataj laŭ demokratia maniero“. La publiko rapide degelis kaj partoprenis kun kreskanta interesiĝo en la novaj ĵurnalismaj liberecoj.[258] En marto okazis vasta televida diskuto pri la sorto de la politikaj malliberuloj de 1948 kaj de la 50aj jaroj. Atestantoj de politikaj murdoj kaj farsprocesoj dum tiu malsankta tempo komencis raporti pri la okazaĵoj kaj propraj spertoj. La esplorado de tiuj krimoj fakte estis unu el la centraj intencoj kaj deziroj de la protagonistoj de la „Praga printempo“. La rompo de ĉi-koncernaj tabuoj kondukis inter alie al la fondo de la fama klubo „K 231“, kiu havis 80 filiojn kaj 30 mil membrojn ĉefe en la ĉeĥa landoparto, kaj al la starigo de la ĝemela „Klubo de engaĝitaj nepolitikaj partiaj membroj“ (KAN).[259] La partio pretigis la rehonorigon de 40 mil personoj, kiuj fariĝis viktimoj de la reĝimoj de Gottwald kaj Novotný. Tiu nova transparenteco nature tute ne plaĉis al la sovetiaj gvidantoj, ĉar tiuj ege malagrablaj kaj embarasaj temoj povis esence endanĝerigi ilian reputacion kaj baze kompromiti la gvidan rolon de la komunisma partio. Malgraŭ tiu nova libereco, dum la Dubček-tempo oni malhelpis publikigi la raporton de la komisiono, kiu devis esplori tiujn jurajn procesojn kaj justic-murdojn en Ĉeĥoslovakio, tiel ke ĝi povis aperi nur en eksterlando post la fino de la „Praga printempo“.[260]

Sed multaj laboristoj restis malfidemaj al la partio, kiu ofte faris promesojn, kiuj restis varma aero. Per plena energio Novotný relanĉis misfamigan kampanjon, kiu celis influi la laboristojn en lia senco kun la rezulto, ke tiu tavolo konfuziĝis. Antaŭ ĉio li provis demagogie timigi ilin en rilato kun la reformoj, kiuj atendos ilin, kaj avertis, ke la kontestataj merkatmekanismoj certe alportos nur novajn pro-blemojn. En grandaj kunvenoj li klarigis al la homoj, ke la prezoj kaj la senlaboreco kreskos, ke aperos novaj krizoj, ke la laboristoj sentos pli grandan laborpremon ktp. Fakte, lia propaganda kampanjo ne restis tute senefika ĉe tiu publiko. Subtenon Novotný ricevis de iuj koleraj malnovaj stalinistoj, de la tiel nomita Jodas-grupo, kiu aktiviĝis per ĉasado de laŭdire kaŝitaj restaŭrantoj de la kapitalismo. En tio ilia furiozo trafis precipe intelektulojn kaj ĵurnalistojn. Al la laboristoj ili diris, ke ili perdos la atingojn de la socialismo kaj estos regataj de la novaj kapitalistoj k.s.

Por komprenigi al la publiko, kion la reformistoj entute celas, la grupo ĉirkaŭ Šik estis devigita lanĉi novan vastan informkampanjon por klarigi la avantaĝojn de la merkataj mekanismoj, ĉar ekzistis la risko, ke la kampanjo de la reakciuloj povos konvinki la homojn kredi iliajn vidpunktojn. Por resti honestaj, sinceraj kaj objektivaj, la reformistoj ja devis klarigi al la laboristoj, ke la reformoj ne povos funkcii sen iu grado de la altiĝo de la laborpremo, de maldungoj kaj de la senlaboreco, se oni volas atingi

[258] Schulze Wessel, p. 163-7.156-163.
[259] Temis pri la Unuiĝo de iamaj politikaj malliberuloj (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/K_231), kiu apartenis kun la klubo „KAN“ al la plej signifaj sendependaj organizaĵoj de la tempo de la „Praga printempo“, kiuj estiĝis kaj agis ekster la influo de la komunisma partio de Ĉeĥoslovakio kaj tial estis dorno en la okuloj de la konservativaj poststalinismaj komunistoj, kiuj kontraŭstaris la rehonorigon de la vikitimoj de la stalinisma tempo. Vd. Schulze Wessel, p. 197-203.
[260] En la angla lingvo sub la titolo: The Czechoslovak Political Trials 1950-1954. The Suppressed Report of the Dubcek Government's Commission of Inquiry, 1968. Edited by Jiří Pelikán. Stanford University Press, 1971. Germanlingve: Pervertierte Justiz: Bericht der Kommission des ZK der KPTsch über die politischen Morde und Verbrechen in der Tschechoslowakei 1949-1963. Hrsg. Jiří Pelikán. Wien 1972.

pli altan kvaliton de la produktoj. Krom tio, la laboristoj devos vole-nevole lerni novajn profesiojn. Ĉar la reformoj de Šik ja ne estis projekto por restaŭri la malnovan kapitalismon, kiel la stalinistoj asertis, oni esperis, ke la homoj havos komprenon por tiaj intertempaj negativaj fenomenoj.

Šik kalkulis al la ĉeĥoj, kiom da horoj ili devas labori por aĉeti konkretajn produktojn de la ĉiutaga vivo kaj kiom da horoj la okcidentaj germanoj devas labori por tio. Ĉe ĉiuj tiuj komparoj evidentiĝis, ke la ĉeĥoj devas labori multe pli longe ol la okcidentaj germanoj. La ekzemploj validis por la jaro 1965.[261] Sed ĉu tiu atentigo impresis la skeptikulojn de la reformoj, estas malklare.

Lige kun la elŝanĝo de la gvida funkciularo komence de marto Hendrych estis eksoficigita kiel sekretario de la ideologia sekcio. J. Špaček anstataŭis lin kaj Č. Císař fariĝis estro de la kultura fako.

La 10an de marto miloj da gejunuloj manifestaciis ĉe la tombo de Jan Masaryk, filo de Tomáš Garrigue Masaryk kaj ministro pri eksteraj aferoj dum la unua respubliko,[262] kun la publika mesaĝo, ke ili ne deziras iompostioman transformadon de la socialismo, sed tujan realiĝon de la vera demokratio, kiel ĝi ekzistis en la tempo inter la militoj.

La regantaj komunistoj en la aliaj socialismaj landoj observis la evoluon en Ĉeĥoslovakio kun kreskanta abomeno. Dum iu konferenco de la partiaj pintoj de la „frataj landoj“ en Dresdeno de la 23a de marto ili – t.e. Breĵnev, Ulbricht, Gomułka, Kádár kaj la bulgaroj (Ĵivkov persone ne ĉeestis) – en parte histeria maniero esprimis al la kolegoj el Ĉeĥoslovakio sian konsternon kaj zorgon pri la liberalaj reformoj en ilia lando, pri kiuj ili opiniis, ke ili kondukis al „kontraŭ-revoucia” situacio. Ili devis aŭdi la riproĉon, ke ili „perdis la kontrolon“ pri la evoluo de la socialismo en Ĉeĥoslovakio. De Dubček ili postulis ŝanĝi la politikon, kiu por ili tute ne estis akceptebla. Dubček reagis trankvile sed alergie kaj defendis sian kurson, informante ilin pri la preparata 14a partia kongreso kaj la publikigota „Agadprogramo“ kaj kritikante la misevoluon de la politiko sub Novotný. Certe, la gvidantoj de la „frataj landoj“ altgrade timis, ke ankaŭ aliaj socialismaj landoj aŭ sovetiaj respublikoj povus esti infektitaj de la ĉeĥoslovaka reformviruso, kiu povus endanĝerigi ilian politikan potencon, kion ili nature klopodis eviti per ĉiuj fortoj kaj rimedoj, komence per retorikaj admonoj aŭ „frataj“ „konsiloj”, poste per minacoj, ĉantaĝoj kaj fine per kruda perforto. Havante Hungarion de la jaro 1956 en la memoro, falkoj kiel Ŝelepin, Solomencev kaj KGP-ĉefo Andropov proponis perfortajn rimedojn kontraŭ Ĉeĥoslovakio, dum Breĵnev dume preferis pacan solvon de la krizo, kvankam li same akre kritikis kaj riproĉis la ĉeĥoslovakajn gvidantojn. La klimato dum tiu konferenco, kie ĉeestis ankaŭ altrangaj oficiroj de la sovetia kaj GDR-armeoj, estis ege frosta, tiel ke la fratoj ne disiris kiel kutime. Tiu premo de ekstere nenecese radikaligis la evoluon en Ĉeĥoslovakio, ĉar la popolo ege timis reakcian refalon en malnovajn (stalinismajn) tempojn, kio ja konstante minacis ĉiujn socialismajn landojn, kiuj deziris fari memstaran politikon.

Reveninte hejmen, Dubček, kiu sentis sin en Dresdeno kiel Jan Hus antaŭ la tribunalo de la Konstanca Koncilio, daŭrigis labori al la reformoj, kiujn li ne kredis en danĝero, tiel longe ke Ĉeĥoslovakio respektis la eksterpolitikajn devojn de la orienta alianco kaj ne principe forlasis la vojon de la socialismo. La konflikto en Dresdeno estis interne kaj ekstere krude prisilentita, tiel ke nek la gvidantoj sur la pli malalta partia nivelo, nek la gazetaro (kiu ĵus forigis la cenzurajn katenojn), nek la ĝenerala publiko eksciis ion ajn pri ĝi. Oni timis, ke la kontraŭsovetia etoso povus fortiĝi en la lando kaj la apogantoj de Novotný povus ricevi freŝan venton por agadi kontraŭ la reformoj.

Dum la sekvanta pleno de la CK de KPSU okazinta en aprilo en Moskvo la sovetiaj gvidantoj konstatis „pliakriĝon de la batalo inter socialismo kaj kapitalismo“, sed rezignis pri tro drasta kritikado de la „malfacila“ situacio en Ĉeĥoslovakio. Sed Moskvo ne restis indiferenta aŭ pasiva, ĉar la zorgo, ke Prago povus forlasi la sovetian blokon, estis reala. Post nelonge, Dubček ricevis „amikan leteron“ de Breĵnev, en kiu li donis patrecajn konsilojn kaj rekomendojn al la ĉeĥoslovaka partia gvidanto, atentigante lin pri la ekzistantaj danĝeroj flanke de la reviziismaj kaj imperiismaj fortoj kaj esperante, ke la ĉeĥoslovakaj kamaradoj adekvate solvos la problemon.

---

261 Vd. https://www.youtube.com/watch?v=vHWfF2l2c30.
262 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Jan_Masaryk kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Tomáš_Garrigue_Masaryk.

### De Novotný al Svoboda, nova KP-prezidio kaj nova registaro de Ĉeĥoslovakio

En la monatoj marto kaj aprilo okazis regionaj kaj distriktaj konferencoj por prepari novan kongreson de la ĉeĥoslovaka KP, kies dato ankoraŭ ne estis fiksita, sed ĝi devintus okazi komence de junio, eble jam en majo. Dubček konstante prokrastis ĝian daton, dum la popolo komencis perdi la paciencon. Sed la okazigo de tia kongreso estis ege kontestata, precipe ĉar Moskvo ne estis interesata pri ĝi antaŭ ol la situacio ne „normaliĝis“ en Ĉeĥoslovakio, kiel la sovetiaj komunistoj kutimis diri, kaj celis nepre eviti ĝin. La problemo, ke multaj konservativaj partiaj gvidantoj efikis kiel bremsantoj de la evoluo, kondukis al konflikto kun la amaskomunikiloj, kiuj starigis pli kaj pli da radikalaj postuloj kaj komencis ankaŭ malkaŝi tiklajn skandalojn en partiaj medioj. La ĉefa celo de la kritiko fariĝis Novotný mem, kiun la gazetoj plene kulpigis pri la mizero de la pasintaj jaroj kaj al kiu ili donis la respondecon por la stalinismaj krimoj en Ĉeĥoslovakio. Ĝiaj civitanoj venis pli kaj pli al la konkludo, ke por tia homo ne decas, ke li restu kiel prezidento ĉe la pinto de la ŝtato. Fine de marto li do estis anstataŭigita per generalo Ludvík Svoboda, kiu posedis altajn meritojn en la dua mondmilito kaj kies familio estis persekutita de la nazioj kaj li mem de la stalinistoj. Rehonorigita de Ĥruŝĉov, en 1965 li ricevis la titolon de „heroo de Sovetunio“. Kiel alternativaj kandidatoj por la ofico de la prezidento estis konsideritaj cetere ankaŭ Smrkovský kaj Cisář, sed finfine Svoboda, kiu certe pli plaĉis al la sovetianoj, estis *elektita* de la parlamento. Sed ankaŭ Svoboda ne apartenis al la entuziasmaj reformistoj, kvankam lia nomo signifas liberecon. Nu, almenaŭ li proklamis vastan amnestion, kiu koncernis ĉiujn politikajn malliberulojn, kiuj estis kondamnitaj al malpli ol tri jaroj. Laŭ enketo, farita de iu nova demografia instituto, kiu okazis tri semajnojn poste, 88 procentoj de la ĉeĥoslovakoj, trovis la elekton de Svoboda en ordo. Laŭ du aliaj enketoj, kiuj estis publikigitaj ankoraŭ antaŭ la demisio de Novotný kiel prezidento, proksimume same multaj homoj apogis la demision de Novotný, kio probable kontribuis al lia decido forlasi la postenon. Dum 73% de la ĉeĥoslovakoj aprobis la novan politikon, plej kredindaj estis tutlande pritaksitaj la aktualaj politikistoj Dubček (53%), Smrkovský (39%), Cisář kaj Svoboda (po 26%), Husák (20%), Šik (17%) kaj Goldstücker (16%). En Ĉeĥio Dubček ricevis 28 procentojn kaj Husák 2%, en Slovakio Dubček havis 68 procentojn, Husák 19%, Svoboda nur 7%.[263] Kvankam la metodoj de la enketoj estis dubindaj, ilia politika mesaĝo estis klara, nome ke Dubček estas senalternativa, do li havis sufiĉe grandan legitimecon ĉe la popolo en ambaŭ partoj de la komuna ŝtato, eĉ se li ne estis demokratie elektita de ĝiaj civitanoj. Povas esti, ke Dubček tiam estis unu el la plej konataj kaj popularaj politikistoj de la mondo entute. Svoboda tamen havis du vizaĝojn: Unuflanke li senkritike adoris Sovetunion, aliflanke li admiris ankaŭ la fondinton de la ĉeĥoslovaka respbliko, Tomáš Garrigue Masaryk, kiun li rehonorigis en aprilo 1968.[264]

Samtempe okazis, la 4an de aprilo, ŝanĝoj en la konsisto de la prezidio (politburoo): Novotný, Hendrych, Šimůnek, Laštovička, Chudík kaj Dolanský kaj Bořůvka estis eliminitaj. En la nova prezidio, kiu havis la politikan decidpovon en la ŝtato, tri reformistoj (Kriegel, Smrkovský, Špaček) kontrastis kun kvin konservativuloj (Biľak, Kolder, Piller, Rigo, Švestka) kaj tri centristoj (Černík, Dubček, Barbírek). La kandidatoj Kapek, Lenárt kaj Martin Vaculík, kiuj estis sen escepto adeptoj de Novotný, ne havis voĉdonrajton. Kriegel, kiu fariĝis prezidanto de la Nacia Fronto, fortigis la flankon de la reformistoj, same Smrkovský, kiu fariĝis prezidanto de la Nacia Asembleo, do de la parlamento. Simile laŭ la ekvilibro de la fortoj aspektis la konsisto de la sekretariato de la CK, en kiu membris (laŭ Šik) tri konservativuloj, tri reformistoj kaj tri centristoj. Do, estis klare, ke la rezulto de ĉiu unuopa voĉdono dependis de la sinteno de la centristoj, kiuj ludis la balancilon de la potenco. Homoj kiel Kolder, Biľak, Švestka povis ankaŭ ŝanĝi la flankon laŭ oportuneco.

Estis videble, ke la kontraŭstaro de la konservativaj kaj reakciaj fortoj en la partio, kiuj klare sentis la skeptikon de Moskvo, kontraŭ la reformprojekto de Šik ne ĉesis, kvankam sur la nivelo de la regionaj kaj distriktaj konferencoj ili havis la absolutan malplimulton. Fakte, la konservativaj fortoj volis ŝanĝi nenion en la sistemo kaj la reakciuloj celis restarigi la situacion, kiu regis sub Novotný, sed sen Novotný, kiu forlasis la CK-on en majo. Aliflanke, estis antaŭvideble, ke la onta partia kongreso konsistos el plimulto de progresemaj fortoj, do 80-90 procentoj, kiuj subtenos la politikon de la reformistoj.

La nova ĉeĥoslovaka registaro, kiu estis gvidata de Oldřich Černík (anstataŭ Jozef Lenárt), ekofi-cis la 8an de aprilo 1968, tri tagojn post la adopto de la fama „Agadprogramo“ de la ĉeĥoslovaka

[263] Schulze Wessel, p. 175-6.
[264] Brahm, p. 21.

KP (vd. venontan ĉapitron). Al tiu registaro apartenis inter alie Peter Colotka, Gustáv Husák, Lubomir Štrougal kaj Ota Šik kiel vicĉefministroj, Jiří Hájek kiel ministro pri eksteraj aferoj, Josef Pavel kiel ministro pri internaj aferoj, por mencii la plej konatajn nomojn.[265] En la registara programo oni emfazis la daŭrigon de la „demokratiigo de la rajtoj kaj burĝaj (!) liberecoj, de la komencita ekonomia kaj kultura evoluo, kiu enhavas eksteran malfermiĝon, kaj de pli aktiva ekstera politiko", sed ankaŭ akcentis la gravecon de la egala traktado de la naciaj grupoj en Ĉeĥoslovakio.[266] Sed nur ĉirkaŭ unu triono de la 29 ministroj subtenis la ekonomiajn kaj politikajn reformojn, sed Šik, Pavel kaj Jiří Hájek, la nova ministro pri eksteraj aferoj, kiu ne timis kunpuŝiĝojn kun siaj kolegoj de la aliaj socialismaj landoj, estis iliaj plej fortaj proparolantoj. Šik, kiu fariĝis kunordiganto por la ekonomiaj reformoj, konsentis eniri la registaron nur post longa hezito, sed li fine opiniis, ke kiel ĝia membro li povus atingi pli multe por la ekonomiaj reformoj ol se li restus ekster ĝi, kiel li skribis en siaj memuaroj. Josef Pavel intencis purigi la ministerion de iamaj stalinismaj elementoj, kiuj organizis persekutojn, arestojn kaj jurajn procesojn. En la ŝtata sekureco de Ĉeĥoslovakio sidis tuta aro da sovetiaj agentoj. Sed la sovetianoj, al kiuj la intencoj de Pavel tute ne plaĉis, limigis lian agadliberecon, havigante al li iun ŝtat-sekretarion kiel „asistanton", kiu estis KGB-agento kaj devis „kunlabori" kun Pavel, kies laboro estis praktike sabotita de tiu kontrolisto.

## La fama „Agadprogramo" de la ĉeĥoslovaka KP de la 5a de aprilo 1968

La 5an de aprilo la CK de la ĉeĥoslovaka KP adoptis la tiel nomitan *Agadprogramon*, kiu devis montri al la partio kaj al la popolo la novajn perspektivojn kaj argumentaron por la ekonomiaj reformoj kaj la transformado de Ĉeĥoslovakio al ŝtato kun demokratia socialismo. Kiel premisojn la programo emfazis la gravecon de la libera interŝanĝo de opinioj kaj de la demokratiigo de la tuta socia kaj politika sistemo por ĝia transformado al dinamika socialisma socio, por ke Ĉeĥoslovakio povu sukcese partopreni la mondan konkuradon. Kiel ĉefan taskon la programo antaŭvidis la analizadon de la eraroj kaj misformiĝoj de la politika sistemo, kiuj estis fariaj en la pasintaj jardekoj (t.e. 1948-68), kaj kie troviĝas iliaj kaŭzoj. Oni konstatis, ke la konservado de metodoj el la tempo de la klasbatalo generis artefaritajn tensiojn inter la sociaj grupoj, nacioj kaj etnoj, inter la diversaj generacioj, inter komunistoj kaj senpartiuloj kaj kaŭzis abismon inter teorio kaj praktiko. La programo, kiu liveris klaran analizon de la misaj tendencoj de la ĝisnuna socialisma evoluo, postulante novan modelon de la socialisma demokratio, klare kondamnis la burokratian centrismon de la pasinteco, prilamentis la ekonomian stagnadon kaj la politikan misformiĝon, la subpremadon de la kritiko, la senrespondecon kaj senrespektecon, la misuzadon de la potenco, la moralajn difektojn en la interhomaj rilatoj kaj la internacian izoliĝon de la lando. Aliflanke, ĝi promesis la rehonorigon de la senkulpaj viktimoj de la stalinismo, la abolon de la preventa cenzuro, la liberecon de la arto kaj informado, de la kunvenado kaj koaliciado, la restarigon de la libera moveblo por ĉiuj civitanoj, la radikalan purigon de la aparatoj de la justico kaj ŝtata sekureco kaj la reorganizadon de la naciaj rilatoj inter ĉeĥoj kaj slovakoj surbaze de la principoj de la egalrajteco kaj libereco. La samo devis validi por la ceteraj etnaj minoritatoj. Reprezalioj kontraŭ ajnaj minoritatoj estis malpermesitaj,[267] ankaŭ la diskriminado de la senpartiuloj estis malpermesita. La gvida rolo de la komunisma partio, pri kiu oni tamen ne volis rezigni, ne estis komprenita en la senco de la absolutisma regado de la socio de supre, sed de la servado al la produktiva kaj progresema socialisma evoluo per la libervola apogo de la popolo. Nur la objektivan diskutkulturon oni konsideris kiel garantion por respondecaj decidoj de la kolektivaj organoj por trovi la plej bonan solvon. La „diktaturo de la proletaro" estis konsiderita kiel falsa koncepto, ĉar oni opiniis, ke ĝi subfosas la respondecon de la ŝtato, de la ekonomiaj kaj sociaj institucioj, kaj damaĝas la aŭtoritatecon de la komunisma partio, kiu estis malhelpata plenumi la plej esencajn devojn. Aliflanke, la „Agadprogramo" evitis terminojn kiel opozicio, partia plurismo, reformoj, merkato, laboristaj konsilioj k.s. kaj anstataŭ tio parolis pri la utiligo de la moderna entreprenado. Sed la „Agadprogramo", kiu kunigis ideojn kaj sugestojn de Richta, Mlynář kaj Šik,[268] enhavis

---

[265] La plenan konsiston vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Regierung_Oldřich_Černík_I.
[266] Kamberger, p. 110, 111.
[267] Sen mencii la problemon eksplicite, ĉe tiu punkto la aŭtoroj verŝajne pensis ankaŭ pri la forpelado de la sudetaj germanoj kaj madjaroj el Ĉeĥoslovakio, kiun en 1968 traktis la historiisto Hübl, la verkisto Procházka kaj la ĵurnalisto Blažek.
[268] Al la teksto, idearo kaj koncepto de la „Agadprogramo" kontribuis multaj homoj: Jan Fojtík, Radovan Richta, Pavel Auers-perg, Karel Kaplan, Zdeněk Mlynár, Ota Šik, Bohumil Šimon, Antonín Červinka, Stanislav Provazník. La koncerna komisiono aŭ laborgrupo estis gvidata de Drahomír Kolder kaj kompletiĝis per diversaj kontribuaĵoj fare de Jozef

ankaŭ utopian vizion, se ĝi parolis pri la batalo kontraŭ la kapitalismo kaj la konstruado de la ideala demokratia socialisma socio. Nature, temis pri tute alia socialismo ol tiu de la stalinisma epoko. La nomoj de Lenin kaj Stalin eĉ ne estis menciitaj, nur la marksismo-leninismo. Sovetunio ne estis kritikita, sed male, oni emfazis la heroan rolon de ĝia armeo en la historio kaj la neceson de la kunlaboro kun tiu lando. La maniero formuli tian programon ebligis ligon inter reformistoj kaj teknokratoj, inter demokratiaj komunistoj kaj sciencteknika intelektuaro. Dubček nomis ĝin la korbato de la „Praga printempo", ĉar ĝi malfermis tute novan aliron al praktike ĉiuj gravaj demandoj de la ĉeĥoslovaka socio de la proksima estonteco.[269]

Lige kun la „Agadprogramo" Dubček promesis la separon inter la partio kaj ŝtato, sekretajn balotojn al la parlamento, kiu devis ricevi la realan povon en la ŝtato. Anstataŭ permesi la opozicion kaj partian plurismon oni strebis al la reaktivigo de la Nacia Fronto. Sed laŭ iu enketo, kiu estis publikigita en *Rudé právo*, 90 procentoj de la senpartianoj kaj 60 procentoj de la anoj de la KP deziris realan plurpartian sistemon. En alia enketo, kiun Šik menciis en siaj memuaroj, kiu estis realigita en julio 1968 de la Instituto por la esplorado de opinioj de la Akademio de la Sciencoj de Ĉeĥoslovakio kaj publikigita en la revuo *Politika*, n-ro 5/1969, 57 procentoj de la enketitoj fidis al la nova politiko de la ĉeĥoslovaka KP kaj nur 16 malfidis ĝin, dum 27 procentoj ne havis klaran opinion. Nur minimumaj 5 procentoj pledis por la enkonduko de la kapitalisma sistemo, dum 89 procentoj subtenis la daŭrigon de la plua evoluigo de la socialisma sistemo, t.e. de la reformpolitiko. Laŭ iu alia enketo, en aprilo 1968 67 procentoj de la demanditoj opiniis, ke la reformprocezo estos daŭra, dum 14 procentoj kredis, ke ĝi estas provizora kaj 19% ne havis konkretan opinion. Ĉiuj tiuj ciferoj klare indikis, ke la ĉeĥoslovaka popolo deziris efektivigi la socialismon anstataŭ reveni al la kapitalismo.

La 19an de aprilo en la partia organo *Rudé právo* oni postulis propran ĉeĥoslovakan vojon al la socialismo kaj rifuzis la aŭtomatan imitadon de sovetiaj praktikoj.[270]

Samtempe aperis ankaŭ klaraj duboj pri la trajtoj kaj la kontroleblo de la reformprocezo, ne nur inter la kontraŭuloj de la reformoj, da kiuj ekzistis konsiderinde multaj ene de la CK de la KP. Ĉar la „Praga printempo" ŝajnis esti precipe projekto de sciencistoj kaj intelektuloj, multaj laboristoj rilatis al ĝi kun skeptiko, konsiderante sian historian mision elĉerpita aŭ superflua. Cetere, estas interese, ke ankaŭ la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj ne apartenis al la prioritatoj de la programo de la „Praga printempo",[271] kvankam tiuj valoroj estis fundamentaj en la socialismo. En tiu senco do ekzistis iuj gravaj sociaj tavoloj kiel la laboristoj kaj virinoj, kiuj devis senti sin iusence kiel malgajnintoj de la „Praga printempo".

Kvankam, kiel dirite, la rezigno pri la gvida rolo de la komunisma partio restis tabuo, la plimulto de la ĉeĥoslovakoj volis almenaŭ duan politikan forton apud la komunisma partio. Sed kiam Zdeněk Bechyně volis refondi la Socialdemokratian Partion, la komunistoj, kiuj entute ne emis toleri la ekziston de aliaj politikaj partioj apud si, kontraŭstaris ankaŭ tiun provon.[272] Dubček mem rifuzis fine de majo 1968 ĉian rajton de la (dekstraj) socialdemokratoj refondi propran partion per la atentigo pri la „historiaj atingoj de la laborista klaso". Ĉi tiu epizodo pruvas, ke la ĉeĥoslovakaj komunistoj ne intencis cedi al la nekomunismaj fortoj eĉ nur etan pecon de la politika potenco. Dubček eĉ riskis plene refali en la malnovan retorikon, se dum la plenkunsido de la CK, okazinta fine de majo 1968, li kritikis „kontraŭkomunismajn elementojn inter la malnovaj ekspluatantaj klasoj", „restaĵojn de la venkitaj burĝaj klasoj" kaj „bankrotajn antaŭrevoluciajn dekstrajn politikistojn", celante sendependajn klubojn kiel K 231 kaj KAN, kiuj agis ekster la kontrolo de la KP, ktp. En alia kazo li kvalifikis la kritikajn (aŭ opoziciajn) verkistojn kiel „etburĝan medion", kiu strebas senbordan demokration. Ĉi tiuj ekzemploj montras, ke Dubček restis ankrita en la komunisma (t.e. stalinisma) pensmaniero kaj ne povis esti kredinda kiel centprocenta demokrato, aŭ li simple adaptis sian lingvaĵon por trankviligi la sovetianojn, kies venĝon li timis. Ĉar Dubček neniam vivis ekster la socialismo kaj do ne disponis pri demokratiaj spertoj, Mlynář dubis en siaj memuaroj, ke Dubček entute havis ian imagon pri demokratio. Ĉefministro Černík kon-

---

Smrkovský, Lubo-mír Štrougal kaj Vasil Biľak. En novembro 1968 Breĵnev volis scii, kiu verkis la „Agadprogramon"; Mlynár donis la respon-don dek jarojn poste.

[269] Pri la programo en la ĉeĥa lingvo vd. https://cs.wikipedia.org/wiki/Akční_program_KSČ. La tekston de la programo mem vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/405_1.pdf. La indikon pri la germanlingva viena eldonaĵo vd. en la bibliografio.

[270] Kamberger, p. 110.

[271] Schulze Wessel, p. 186-96.

[272] Schulze Wessel, p. 203-7.

fesis, ke pro manko de praktikaj spertoj la partio ne sciis kiel plej taŭge trakti la publikon sub la novaj kondiĉoj de la libereco, ĉar en antaŭaj tempoj la homoj simple devis obei.

Aliflanke, la komunistoj rapide reviziis sian sintenon ekzemple rilate al la (katolika) eklezio, kiun ili grandparte liberigis de la malnova stigmatizado, tiel ke la religia kaj eklezia vivo povis renaskiĝi, dum pluraj persekutitaj episkopoj estis rehonorigitaj. La revigligon de la grek-katolika eklezio la sovetianoj tamen kontraŭstaris, ĉar ili timis, ke ĝia aktiveco povus havi nedezirindajn efikojn por la renaskiĝo de tiu eklezio en okcidenta Ukrainio, kio estis evitenda.[273] Lige kun la malstreĉigo de la rilatoj kun religioj kaj eklezioj formiĝis ankaŭ la kontraŭstaro kontraŭ antisemitismo kaj judfobio. La judaj komunumoj povis denove libere spiri, planiĝis diversaj aktivecoj por memori pri la historio de la judoj kaj la holokaŭsto, kiun la stalinistoj maljudigis.[274]

La „Agadprogramo“ de la ĉeĥoslovaka KP de la 5a de aprilo 1968, kiu ampleksis ĉiujn supre menciitajn temojn kaj sferojn, do respegulis ege ampleksan kaj multfacetan reformvizion *en principo*, kiun tiu partio en la aktualaj politikaj kondiĉoj apenaŭ povis plenumi, kion Dubček mem komprenis kaj konfesis (ĉar por ĝia sukcesa realigo la sovetianoj devintus doni al la ĉeĥoslovakaj reformistoj la necesan spacon kaj verdan lumon, kion ili ne pretis fari). Kaj la verkintoj de tiu „Agadprogramo“ baziĝis sur la imago, ke la kurso de la XXa partia kongreso de KPSU estos daŭrigata en Sovetunio kaj en la landoj de la orienta bloko. Sed la vizioj de la „Agadprogramo“ riskis fariĝi malplenaj promesoj, se reala politika alter-nativo mankis, ĉar la sama komunisma reĝimo devis esti konservata. Krom tio, la tezoj de la „Agadprogramo“ rapide ŝajnis naturaj kaj memkompreneblaj al la homoj, kiuj volis pli multe, ekzemple plurajn politikajn partiojn. Oni riproĉis al Dubček, ke li agis kaj reagis multe tro heziteme, timeme, malrapide kaj malfrue, ŝanceliĝante inter diversaj pozicioj, tiel ke oni perdis valoran tempon, kiel Šik klarigis en siaj memuaroj. Estas vere, ke Dubček kaj ĉefministro Černík tute ne apartenis al la protagonistoj de rapidaj kaj radikalaj reformoj, pro kio oni nomis ilin centristoj aŭ mezuloj. Fakte, Dubček evitis ĉian urĝon, preferante agi laŭ la oficiala partia linio, kaj faris, ke la partiaj organoj decidu paŝon post paŝo en nova partia kongreso, kiun li volis baldaŭ konvoki. Kaj la prezidio (politburoo) restis pasiva kaj ne elpaŝis kiel gvidanto de la „Agadprogramo“, tiel ke ĝi devis esti puŝata de ekstere.

Al la sovetianoj tute ne plaĉis, ke la „Agadprogramo“ estis verkita sen iliaj kunlaboro, konsultado kaj konsento. Dubček certe konsciis pri la hereza karaktero de la programo, ĉar ĝi proklamis diktatorajn, dogmajn kaj burokratiajn metodojn eksaj, kvankam oni klopodis kaŝi tiajn eldirojn por eviti malfermajn provokojn. Kvankam la sovetianoj ja suspektis tion, la aŭtoroj de la ĉeĥoslovaka „Agadprogramo“ tute ne pensis pri la likvido de la socialismo, eĉ se oni adiaŭis kelkajn principojn de la leninismo – kaj stalinismo. Dubček certigis en siaj memuaroj, ke la protagonistoj de la „Praga printempo“ kredis je socialismo, kiu ne estas disigebla de la demokratio kaj kiu baziĝas sur socia justeco. Krom tio oni estis konvinkata, ke tia socialismo povus pli bone funkcii kun la merkataj kaj privetekonomiaj elementoj. Kvankam oni ne menciis tiujn terminojn, tiuj ideoj formis la kernajn ideojn de la „humanisma socialismo“, de la „socialismo kun homa vizaĝo“ kaj de la „humana ekonomia demokratio“ kaj estis subtenitaj de la plimulto de la homoj en tiama Ĉeĥoslovakio, laŭ iu tiama enketo de 78 procentoj.

En la aliaj socialismaj landoj la „Agadprogramo“ de la pragaj reformistoj estis rifuzita kaj strikte prisilentita, kvankam temis pri oficiala dokumento de la CK de la tiama ĉeĥoslovaka KP. Gomułka opiniis, ke oni devas „kontraŭbatali“ ĝin. La konservativaj fortoj en Moskvo, orienta Berlino, Varsovio, Budapeŝto kaj Sofio strebis eviti la efektivigon de tia programo, pro kio ili pli kaj pli alprenis agreseman kaj reakcian pozicion kontraŭ la reformistoj en Prago. La gvidantoj de la „frataj landoj“, ĉefe Breĵnev kaj Ulbricht plus Kurt Hager, la ĉefideologo de SED en GDR, komencis polemiki kontraŭ Ĉeĥoslovakio, precipe en la gazeto *Nova Germanio*, kredante la socialismon en morta danĝero. La ĉeĥoslovaka gazetaro reagis al tiuj ekscesoj kun granda ĝagreno kaj David, minstro pri eksteraj aferoj, sentis la neceson protesti ĉe la GDRa ambasadoro. La Asocio de la subteraj batalantoj de Ĉeĥoslovako vidis „la nacian honoron de la ĉeĥoslovaka popolo krude lezata“. En tiaj okazoj Karl-Eduard von Schnitzler, la plej sarkasma kaj plej kontestata ĉefkomentisto de la GDR-televido, kutimis verŝi aldonan oleon en la fajron per sukaj vidpunktoj, ankaŭ rilate al la reformoj en Ĉeĥoslovakio.[275] Sed ĝuste tiuj fortoj, kiuj toleris neniun demokratiigon de la politiko en siaj landoj, estis videble diskreditataj ĉe granda parto de la ĉeĥo-

[273] Schulze Wessel, p. 207-16.
[274] Schulze Wessel, p. 252-3.
[275] Vd. https://www.spiegel.de/spiegel/print/d-46094013.html. Ekzemple pri Dubček, kiun li evidente tre malestimis, li opiniis, ke en GDR li eĉ ne havintus la ŝancon fariĝi estro de subdistrikto.

slovaka popolo. Ankaŭ Hermann Axen, judo kaj arkitekto de la ekstera politiko de GDR, atakis la ĉeĥoslovakajn reformistojn, nomante ilian reformprocezon reviziisma kaj kontraŭ-revolucia. Dum orienta Berlino konstante kriaĉis kontraŭ la „novnaziismo", „militismo" kaj „socialdemokratio"en FRG, la ĉeĥoslovakaj politikistoj emfazis sian intereson pri „fekunda kunlaboro de ĉiuj ŝtatoj de Eŭropo", inkluzive okcidentan Germanion. Sed la ĉeĥoslovaka registaro evitis kontakti okcidentajn registarojn en tiu tempo, kaj la Okcidento hezitis rilati kun Ĉeĥoslovakio. La registaraj kaj partiaj kontaktoj limiĝis precipe al la sovetia bloko mem, kie okazis dekoj da renkontiĝoj inter oficialaj reprezentantoj de tiuj ŝtatoj. Prago eĉ konsideris necese formale protesti kontraŭ iuj raportoj, kiuj aperis en la okcidenta gazetaro pri la reformoj en Ĉeĥoslovakio. Aliflanke, kiam la ĉeĥoslovaka gazetaro, kiu estis liberigita de la cenzuro, raportis pri la martaj tumultoj en Pollando, tio kondukis al oficiala protesto de la pola flanko. Same prudente Prago agis en la konfliktoj de la sovetia tendaro kun Jugoslavio kaj Ĉinio. Kvankam Prago kaj Pekino rifuzis la sovetian hegemonian strebadon, la ĉinoj malaprobis la „Pragan printempon" kaj la ĉeĥoslovakoj kontraŭis la kulturan revolucion de Mao. Kvankam ĉeĥoslovakoj kaj jugoslavoj reciproke simpatiis pri la reformprojektoj de la alia, kion oni ne diris publike, ne okazis pli intima kunlaboro de ambaŭ flankoj, kaj la planata vizito de Tito en Ĉeĥoslovakio estis prokrastita al aŭgusto. Tito, kiu ja avertis pri la fatalaj sekvoj de armea interveno en Ĉeĥoslovakio, ne strebis krei aliancon kontraŭ Moskvo, ĉar neniu volis ludi per la fajro.[276]

Sendube plej perfide kondutis la kamaradoj de SED en orienta Berlino, kiuj entreprenis ĉiun provon nigrigi la situacion en Ĉeĥoslovakio ĉe la sovetiaj kolegoj. Tiel, la 28an de julio Honecker, ĉefministro Willi Stoph kaj defendoministro Heinz Hoffmann vojaĝis al Moskvo, kie ili submetis al la sovetianoj projekton de „proklamaĵo" al la popolo de Ĉeĥoslovakio kaj volis diskuti pri la komencotaj armeaj ekzercoj en la najbara lando. Samtempe, la orientgermanoj lamentis pri imitaj tendencoj de la „Praga printempo" en GDR, kiujn ili volis kontraŭbatali per „administraj reprezalioj". Anstataŭ „naivuloj", la SED-politburoo nomis la ĉeĥoslovakajn reformistojn „ruzaj reviziistoj". En Ĉeĥoslovakio Ulbricht estis konsiderita kiel negativa simbolfiguro de la restaŭra politiko. Sed tio tute ne malhelpis la ĉeĥoslovakajn kamaradojn transdoni al li okaze de lia 75a naskiĝtago la plej altan armean ordenon de Ĉeĥoslovakio. Per tio la ĉeĥoslovaka registaro, kiu ankaŭ ne hezitis apogi la polemikan eksteran politikon de GDR rilate al FRG, celis fari nenion alian ol formale dokumenti sian lojalecon, kvankam la abismo inter ambaŭ landoj estis nekontestebla kaj ĝenerale konata.[277]

Dum en aliaj socialismaj landoj regis malnovaj stalinistoj, la ĉeĥoslovakaj laboristaj liberigis sin de siaj stalinismaj gvidantoj. La sindikatan opozicion reprezentis 70´000 laboristoj. Sed tio ne sufiĉis. Por fortigi la ĝeneralan premon kontraŭ la ŝtato kaj partio ili organizis strikojn por postuli pli altajn salajrojn. En tiuj strikoj, kiuj kulminis en aprilo 1968, pioniris la laboristoj de la elektrofabriko en Písek kaj la ferfabriko en Vltkovice. La reformistoj ellaboris novan leĝon por oficiale enkonduki la aŭtonomajn laboristajn konsiliojn. La situacio en la lando similis al la jaro 1917 en Ruslando, en 1956 en Hungario kaj en Jugoslavio. Ĉar la koncerna leĝo ankoraŭ ne estis preta, la laboristoj perdis la pa-ciencon kaj en aŭgusto komencis transpreni la administraciojn en la industriaj entreprenoj. La komencon faris la kemia fabriko en Bratislavo.

### Duboj, timo, esperoj pesimismo kaj optimismo alternas

Sub la giganta premo flanke de la ĉeĥoslovakaj konservativuloj kaj reakciuloj, de Moskvo kaj de la „frataj landoj" ajna rapida kaj sukcesa reformlaboro do fariĝis pli kaj pli malfacila kaj malverŝajna, sed plej laste mortas la espero, kiel diras malnova proverbo.[278]

Sed ankaŭ en la tendaro de la reformistoj formiĝis diverĝaj sintenoj. Ekzemple Smrkovský vidis la danĝeron de sovetia armea interveno kaj klopodis eviti ĝin, alproksimiĝante al la centrismo. Tie oni volis eviti ĉian provokadon de la sovetianoj kaj strebis neŭtraligi tro radikalajn esprimiĝojn en la gazetaro. Husák eĉ proponis reenkonduki la cenzuron. Dubček klopodis trankviligi la sovetianojn per iuj promesoj, kiujn li poste ne povis plenumi. Do, oni pli kaj pli aplikis kurson de la retenemo kaj evitis mencii sloganojn kiel „demokratian plurismon" k.s. Sed Šik estis poste konvinkata, ke eĉ ĉiuj tiuj klopodoj ne povis ŝanĝi la opinion de la sovetianoj, kiuj jam decidis kio estas farenda en Ĉeĥoslovakio por

276 Pauer, p. 83-85, 92-94.
277 Pauer, p. 86s.
278 Šik, ĉap. III, 5.

haltigi la „Pragan printempon“. Nur la restaŭro de la malnova sistemo, t.e. la reenkonduko de la cenzuro, la nuligo de ĉio progresema, la malpermeso de la novaj organizaĵoj, la reenpostenigo de la malnovaj Novotný-aparatuloj (nature sen Novotný) kaj la restarigo de la rigora partia kontrolo estus verŝajne povintaj eviti la intervenon de la Varsovia Pakto.

En la registaro Šik kunpuŝiĝis en diskutoj kun Husák, do li povis konkrete flari la etoson, kiu tute ne favoris la reformistojn. Kvankam Husák atingis la federigon de Ĉeĥoslovakio (kiu devis ekvalidi la 1an de januaro 1969), li signifis por Šik grandan seniluziiĝon. Kiel povis okazi, ke tiu komunisto, kiu tiel multe kaj longe suferis sub la stalinistoj, povis fariĝi tia agresema, potencavida kaj orgojla persono kaj samtempe timema politikisto, kiu eĉ unu milimetron ne moviĝis en la direkto de la demokratio? Li ankaŭ tute ne interesiĝis pri la projekto de la ekonomiaj reformoj, kiun li komplete ignoris. Lia sola vivcelo estis verŝajne heredi la tronon de Dubček, kaj por atingi tiun celon li permesis al si ĉian specon de malmoraleco kaj senskrupuleco.

Sed ankaŭ pri Dubček Šik estis seniluziigata. Malgraŭ tiuj malagrablaj spertoj, Šik kredis, ke ankoraŭ ne ĉio estas perdata, kvankam la situacio por liaj reformistoj estis pli kaj pli senespera. Šik kredis, ke la realigo de plurisma demokratio ne estas realisma en la aktuala situacio. Kiam Šik komprenis, ke liaj ideoj ne estas efektivigeblaj, li koncentriĝis pri la akcelado de la enkonduko de la aŭtonomaj administracioj en la entreprenojn por almenaŭ ion atingi sur tiu kampo, ĉar en la tempo de Novotný tute ne eblis eĉ pensi pri la enkonduko de tia aŭtonomeco. Sed iuj kritikistoj nomis tiun solvon teknokratia en la opinio, ke ĝi povus malhelpi la „entreprenan demokration“; ankaŭ en la registaro de Černík oni ne volis tuj enkonduki ĝin, ĉar la plimulto de la CK volis ion alian. Sub la kondiĉoj de la unupartia sistemo ekzistis la danĝero, ke tiu aŭtonoma administrado fare de laboristaj konsilioj povus esti manipulata de la partia burokratio, kiel tio okazis en Jugoslavio. Pli promesplena tia sistemo do estis laŭ Šik sub la kondiĉoj de la partia plurismo. Sed la laboro en la registaro estis konstante ĝenita de la politika lukto kaj de la eksterlanda premo, kiu kaŭzis streĉatan etoson en tiu politika organo. La registaranoj adaptis sin laŭ la vento, kiu plej konvenis por ili persone. Finfine, Šik devis akcepti iujn modifojn de siaj reformoj kaj defendi iujn transirajn solvojn por almenaŭ savi parton de la reformprojekto, kiu estis pli kaj pli nebuligita kaj fuŝita. Samtempe necesis okupiĝi pri praktikaj problemoj de la ekonomio mem, por ke ĝi ne evoluu en la malĝusta direkto. Ekzistis la risko, ke la kresko de la prezoj kaj la falo de la vivnivelo povis havi fatalajn sekvojn. Por klarigi siajn planojn kaj ideojn Šik preparis serion da prelegoj en la televido, kie li volis prezenti ilin en facila, komprenebla lingvo. Kiel Šik rakontis en siaj memuaroj, tiuj elsendoj radikale malplenigis la stratojn de Prago, ĉar ĉiuj ĉeĥoj sidis antaŭ la ekrano kiel se oni montrus al ili sensacian filmon. La reagoj de la popolo estis grandioza: multaj homoj skribis, ke ili pretas dume vivi pli malbone, se ili povas esti certaj, ke post kelkaj jaroj ili vivos denove pli bone kaj la lando reatingos la mondan ekonomian nivelon. Spontane naskiĝis la ideo starigi landan fonduson por enpagi valoraĵojn por helpi al la respubliko. Tio estis la plej lasta ondo de la vana optimismo antaŭ la sovetia interveno. Tiam Šik ankoraŭ ne povis scii, ke per tiuj televidaj elsendoj li praktike adiaŭis de sia kompatinda popolo, al kiu li volis pretigi pli bonan estonton.[279]

La ĉeĥoslovaka popolo, kiu fariĝis pli optimisma kaj esperoplena malgraŭ la krizo, ankoraŭ gaje festis la unuan de majo, unuafoje post 1948 sen premo de supre kiel en antaŭaj jaroj. Kvankam la tribuno, sur kiu staris la ĉefaj partiaj eminentuloj (ĉi-foje ili estis Dubček, Svoboda, Smrkovský kaj Kriegel), troviĝis sur la sama loko en la strato Na příkopě, ne plu temis pri organizitaj paradoj de Novotný, sed pri entuziasma kaj sincera festado de la popolo. Homoj deziris ricevi aŭtogramon de la popularaj politikistoj. Ĉar ĉio estis libervola, esence spontana kaj nepreparata, eĉ skoltoj, hipioj, veteranoj de la ĉeĥoslovakaj legionoj de la unua mondmilito kaj anoj de la asocioj K 231 kaj KAN (kiuj postulis liberajn balotojn) partoprenis la paradon (kion Breĵnev poste kritikis). Eĉ homgrupo portanta la usonan flagon kunmarŝis (kio aparte malplaĉis al la sovetianoj). Ankaŭ satiraj sloganoj estis videblaj, kiuj mokis pri la „eterna amikeco kun Sovetunio“. Dubček kvazaŭ proklamis la novan socialismon. La unua de majo de la jaro 68 do transformiĝis al pozitiva referendumo pri la „Praga printempo“. Cetere, en la sama jaro la ĉeĥoslovakoj festis la 50an datrevenon de la fondo de sia unua respubliko. En Slovakio la unua de majo montris naciismajn trajtojn. Du tagojn poste la junularo organizis en Prago propran manifestacion, kiun ĉeestis 4000 personoj. La gvida rolo de la partio estis kritikita kaj la alianco kun Sovetunio pridubita.

[279] Šik, ĉap. III, 6.

### La aliancanoj parolas pri „kontraŭ-revolucio“

Komence de majo Dubček, Černík, Smrkovský kaj Biľak estis vokitaj al Moskvo, kie ili devis aŭskulti punpredikon flanke de la sovetiaj regantoj. Jan Pauer detale raportis pri tiu kunveno en sia libro „Prago 1968“. La konduto de Breĵnev estis harhirtiga. Li riproĉis al la ĉeĥoslovakoj, ke ili perdis la kontrolon pri la gazetaro, li atakis la klubojn K 231 kaj KAN, kiujn li kritikis, ke ili reprezentas „malmaturan junularon“ (sic), kiu unue devus esti edukata de la Komsomolo (sic). Lin ĝenis, ke la anoj de KAN marŝis surstrate, montrante sloganojn de T.G. Masaryk. Li kritikis, ke la socialdemokratoj formiĝas kiel opozicia partio. Li asertis, ke en Ĉeĥoslovakio restis la tuta burĝaro kaj „ĉiuj kulakoj“, kiuj pludonis sian politikan konvinkon al siaj idoj. Finfine li asertis, ke la membroj de la iamaj burĝaj partioj formas la terenon por la kontraŭrevolucio. Oni devus ellabori klaran politikan planon kiel trakti tiun danĝeron. Kosygin kaj Podgornyj rimarkigis, ke FRG probable apenaŭ serĉas novajn merkatojn en Ĉeĥoslovakio, sed ĝi celas politike influi ĝin. Kosygin sarkasme aldonis, ke en Ĉeĥoslovakio baldaŭ ekzistos ankaŭ „Sudetgermana klubo“.[280] Pri la ĉeĥoslovakaj ĵurnalistoj Breĵnev mokis, ke „eĉ ebriaj muĵikoj en bazaro kondutas pli bone“ ol ili. Alia tiutipa diraĵo de Breĵnev estis, ke la ĉeĥoslovakoj estis atentigitaj, ke ili riskas perdi sian „sendependecon“ kaj fali sub la „servutecon de la imperiistoj“. Breĵnev volis de Dubček la konfirmon, ke ĉeĥoslovakaj intelektuloj kiel V. Černý, J. Procházka, I. Synek kaj P. Kohout estas aŭ okcidentaj agentoj, aŭ provokistoj aŭ simple senrespondecaj skribuloj. Laŭ Breĵnev, Černý kaj Procházka rilatis kun trockiistoj. Kontraŭ la ĉeĥoslovaka novaĵagentejo ČTK li polemikis, ke ĝi videble kolumnias Markson kaj Leninon kaj disvastigas falsajn informojn, pri kiuj nur la diablo scias, de kie ili venas. Kadre de siaj paranojaj konspiraj teorioj Breĵnev suspektis, ke inter la amaso de la okcidentaj turistoj en Ĉeĥoslovakio la duono estas spionoj. Li konsterniĝis pro la forigo de Václav David, kiun li nomis „bona antifaŝisto kaj komunisto kaj amiko de Sovetunio“, kiel ministro pri eksteraj aferoj kaj lia anstataŭigo per lojalulo de Dubček. Pri la rehonorigoj de iamaj punitaj kamaradoj li konsilis, ke oni ne tro publike traktu tiun aferon, sed prefere ĝi restu interna afero de la partio. Pri la federigo de Ĉeĥoslovakio li vidis neniun neceson urĝi. Li pravigis la subpreman kurson de Gomułka en Pollando. Li rekonsciigis la gigantan nombron da viktimoj dum la liberigo de Ĉeĥoslovakio fare de la Ruĝa Armeo kaj lamentis pri la altegaj kostoj, kiujn Sovetunio pagas por la sekureco de la Varsovia Pakto kaj por amikaj landoj en Azio, Ameriko kaj Arabio. Kosygin verŝis aldonan fajron en la oleon kaj klarigis al la ĉeĥoslovakaj kolegoj per demagogiaj frazoj, ke post la sukceso de la kontraŭ-revolucio certe sekvos la enkonduko de la kapitalismo, kio signifus la finon de la konstruado de la socialismo. Li avertis, ke multaj landoj havas la intereson renversi la socialisman ordon en Ĉeĥoslovakio. La sencon de okcidenta kredito por modernigi la konsumindustrion Kosygin nete pridubis, ĉar li opiniis, ke Okcidento ne bezonas konsumvarojn el Ĉeĥoslovakio; krom tio li avertis, ke tia kredito nepre estos ligata kun la problemoj de la repago. Li atentigis, ke Ĉeĥoslovakio produktas po persono same multajn teksaĵojn kiel Usono, do altigo de la produktado sur tiu kampo ne necesas; krom tio li avertis, ke ankaŭ la ĉefaj okcidentaj landoj investas pli kaj pli en la pezindustrion. Entute Kosygin dubis, ke la planataj reformoj kondukos al la antaŭvidita ekonomia prospero, sed male li timis, ke la ĉeĥoslovakaj laboristoj spertos la saman sorton kiel la jugoslavaj kolegoj, kiuj devas foriri al eksterlando por labori. Ktp. ktp. La litanio de klarigoj, avertoj kaj admonoj de la sovetianoj, kiujn la gastoj el Prago devis elteni, estis senlima, ege teda kaj ege fia. Kvankam Podgornyj certigis al la ĉeĥoslovaka delegacio, ke la sovetianoj ne enmiksiĝos en la internajn aferojn de ilia lando, ili ekzakte faris tion. Nu, ili nature celis diri, ke ili ne enmiksiĝos, se Prago ne forlasos la socialismon kaj respektos la principojn de la ekstera politiko de la oriena bloko. Entute la sovetianoj montris dum tiu renkontiĝo sian veran vizaĝon, kiu estis tipa por ilia ĉantaĝa kaj prema konduto; ili argumentis unuflanke, supraĵe kaj torde, en la senco de la sovetiaj politiko kaj ideologio. Por ili ĉiu momento kaj ero de la sendependa pensado, kiu devias de la sovetia doktrino, signifis signon de la kontraŭ-revolucio, de la kontraŭ-sovetia konspiro de organizataj centroj. La nekomunismaj intelektuloj kaj la okcidentaj turistoj (pri kiuj la sovetianoj asertis, ke ili kontrabandas armilojn, ekipaĵojn kaj propagandan materialon) estis misfamigitaj de ili kiel imperiismaj agentoj kaj spionoj. Eĉ la kritikemaj komunismaj verkistoj estis konsideritaj kiel malamikoj, memstaraj ĵurnalistoj kaj malobeemaj redaktoroj devis esti maldungitaj kaj prezentitaj antaŭ la tribunalo, ribelemaj junuloj senditaj al ŝtataj organizaĵoj kiel la Komsomolo aŭ en la prizonojn por reedukado, popolaj iniciatoj, kiuj estis sendependaj de la KP, devis esti disbatitaj kaj iliaj proparolantoj devis esti malliberigitaj. Ĉi tiuj plumpaj atakoj estis

[280] La sudetaj germanoj, kiuj estis forpelitaj el Ĉeĥoslovakio kun la beno de la KP, estis suspektataj de la sovetianoj kiel helpantoj de la iamaj nazioj kaj kiel burĝa tavolo, kiu celas restaŭri la kapitalismon en sia iama patrujo.

kombinitaj kun hipokritaj alvokoj al „frataj sentoj“ inter komunistoj, kiuj amas la popolojn, kaj akompanataj de krudaj minacoj kaj arogantaj konsiloj.

La reago de la ĉeĥoslovakaj partiestroj limigis sin al defensiva akcepto de la sovetia kritiko, al klopodoj eviti troan koleron de la sovetia flanko, al konfirmado de la politika lojaleco kaj al ĝeneralaj promesoj agi en la senco de la sovetia kritiko. Oni povis vidi en tiu reago ruzan sintenon. Sed estis klare, ke la ĉeĥoslovakaj „fratoj“ estis timigitaj. Sed anstataŭ firme montri al la sovetianoj sian pozicion, riproĉante al ili ties neakcepteblan enmiksiĝon, ili lasis trudi al si la sovetiajn argumentojn kaj cedis en senkoncepteco, ne vere sciante kiajn rimedojn kaj vojojn ili elektu por malakrigi la konflikton kun la sovetiaj gvidantoj.[281] Breĵnev bone rimarkis tiun embarason, kiun li senskrupule ekspluatis malfavore al Dubček, al kiu li riproĉis, ke li parolas unu aferon kaj faras alian aferon, kaj apogante la sintenon de kamarado Vasil Biľak, kies opinioj tendence kongruis kun la sovetiaj vidpunktoj. Tiun situacion ankaŭ Suslov krude eluzis, proponante al Biľak, ke estus bone aldoni sovetiajn trupojn al la ĉeĥoslovaka armeo ĉe la okcidenta limo de Ĉeĥoslovakio „por eviti la danĝeron, ke Ĉeĥoslovakio povus esti ŝirita el la sovetia bloko”. Kaj Andrej Gromyko, ministro pri eksteraj aferoj de Sovetunio, atentigis, ke Ĉeĥoslovakio povus fariĝi „dua Rumanio“, kio povus kaŭzi disfalon de la Varsovia Pakto.[282]

Pri la interparoloj en Moskvo Dubček kaj liaj kamaradoj devis strikte silenti, tiel ke la ĉeĥoslovaka popolo ne eksciis, kia dramo okazis malantaŭ la kulisoj. Same la publiko ankaŭ ne informiĝis pri la skismo, kiu okazis en la prezidio de la partio, do inter Dubček kaj Biľak kaj iliaj amikoj. Dum la kunsido de la sovetia politburoo de la 6a de majo Breĵnev unuafoje aludis, ke lia fido al Dubček estas skuita. La 8an de majo okazis sekreta konferenco de la partiaj gvidantoj de la ŝtatoj de la orienta bloko sen Rumanio kaj sen la partopreno de la ĉeĥoslovakaj partiaj gvidantoj en Moskvo, dum kiu Breĵnev raportis pri la ĵusaj interparoloj kun la ĉeĥoslovaka delegacio. En tiu okazo Breĵnev ne hezitis malkaŝi sian malfidon al Dubček, kiun li pritaksis sensperta kaj malforta, sed li ne ekskludis la eblon, ke li ankaŭ povus esti ruza. Laŭ Breĵnev la problemo de la ĉeĥoslovaka partia gvidantaro konsistis en tio, ke ĝi konsentas pri ĉio, kion la sovetianoj kritikas kaj deziras, sed poste nenion entreprenas por apliki tiun kritikon. Ulbricht, kies tiradoj eĉ superis laŭ agresemo kaj fanatiko tiujn de Breĵnev, nomis Dubček-on „senespera kazo“, anoncante, ke li malpermesis la ĉeĥoslovakan gazetaron en GDR. Ĉar la sovetianoj strebis retroigi la reform-politikon de Ĥruŝĉov en sia lando, kies logika sekvo estis la ĉeĥoslovakaj reformoj, la sovetianoj devis trovi iun kredindan manieron por ataki la ĉeĥoslovakan reform-politikon. La 10an de majo la moskva registara organo *Izvestija* malfermis la gazetaran kampanjon kontraŭ la ĉeĥoslovakaj reformoj, skribante, ke per siaj liberaligaj ideoj la imperiismo provas subfosi la unuecon de la komunismaj landoj. „La imperiismaj ideologoj laboras per mensogoj, kalumnioj, misinformoj kaj tordado de faktoj kaj kalkulas pri tio, ke ili povas influi certajn personojn en la socialismaj landoj, personojn, kiuj ne estas sufiĉe firmaj en ideoloigiaj kaj politikaj aferoj kaj kiuj lasis sin korupti de ili, personoj, kiuj volonte estas laŭditaj de la Okcidento kaj falas en la kaptilojn de ĝia propagando. Ĉar ili ne disponas pri firmaj ideologiaj konvinkoj, ili ripetas kaj disvastigas la burĝan ideologion, kiu estas malamika al la socialismo.“[283] Estis klare, ke *Izvestija* celis ataki Dubček kaj lian reformkompanion.

En aprilo aŭ majo la sovetia generalo Jepiŝev, ĉefo de la politika ĉefadministracio de la sovetia armeo kaj milita floto, elpuŝis la unuan konkretan minacon kontraŭ Ĉeĥoslovakio, kiam li ŝajne diris, ke oni ne povas ekskludi, ke grupo de lojalaj ĉeĥoslovakaj komunistoj direktos peton al Sovetunio kaj aliaj socialismaj landoj pri interveno de la „sovetia armeo“ en Ĉeĥoslovakio.

La gazeto *Práce* komentis tiun minacon, skribante, ke la „informojn de kamarado Jepiŝev ni konsideras nekredinda“ kaj rimarkigis, ke „ĉia armea interveno estus tiel aventureca politiko, ke estus simple nekredeble, ke unu el la membroj de la CK de KPSU povus konsideri ĝin“ reala. La argumento de la „savado de la socialismo“ por tia interveno estis konsiderita de la gazeto kiel absurda, ĉar gi detruus la evoluon de la socialismo en la „nova“ Ĉeĥoslovakio kaj bremsus ĝin en la tuta mondo“.[284]

La pariza gazeto *Le Monde* redonis la deklaron de Jepiŝev, kiu avertis, ke la Ruĝa Armeo devos „plenumi sian devon“, se „lojalaj ĉeĥoslovakaj komunistoj“ direktos peton al Sovetunio por interveni.

[281] Pauer, p. 112.
[282] Pauer, p. 49-62.
[283] Reitzner, p. 75-76.
[284] Csizmas, p. 89-90.

Kádár estis la sola, kiu ne volis nomi la situacion en Ĉeĥoslovakio „kontraŭ-revolucia“, ĉar tia diagnozo nun fakte ŝvebis en la aero de la aliancanoj de Prago. Male ol la aliaj, la hungara ĉefo argumentis iom pli diferencite, ne pretis kondamni Dubček-on kaj ties amikojn, sed bonvole laŭdis lin kiel sinceran komuniston, kiu nur celas korekti faritajn erarojn de la pasinteco. Tiaj argumentaj manovraj tamen mirigis la sovetianojn, kiuj volis scii de Kádár kiel li komprenas tiun aŭ alian eldiron. Kvankam li kritikis la reformprocezon en Ĉeĥoslovakio kaj bedaŭris precipe la publikigon de la „Agadprogramo“ de la ĉeĥoslovaka KP, Kádár kondutis plej modere iusence neŭtrale, kaj ne estis aprioria apoganto de perarmea interveno, ĉar li opiniis, ke ĝi ne povas solvi ĉiujn problemojn. Cetere, li rifuzis kompari la situacion en Ĉeĥoslovakio de la jaro 1968 kun la situacio en Hungario de 1956; iujn erarojn de Dubček li tamen komparis kun tiuj de Nagy,[285] kvankam Dubček ne proklamis la neŭtralecon kaj eksiĝon de sia lando el la Varsovia Pakto.

Gomułka, kiu ne povis dividi la opiniojn de Kádár koncerne la kontraŭ-revolucion, atentigis, ke la okcidenta orientiĝo de Prago ne estis lanĉita nur sub Dubček, sed komenciĝis jam sub Novotný. Tio veras, ĉar fakte jam Novotný parolis en 1955 en Moskvo pri „propra vojo de Ĉeĥoslovakio al la socialismo“ kaj pri la principo de la egalrajteco inter la socialismaj ŝtatoj kaj en 1965 li intencis plibonigi la rilatojn kun FRG.[286] Sed la polo ne volis severe verdikti pri Dubček, pri kiu li havis la esperon, ke li revenos al la ĝusta flanko, se la „dekstraj elementoj“ povos esti venkitaj. Kvankam li obstine praktikis siaspecan memstaran politikon rilate al Sovetunio, Gomułka tamen postulis unuecan pritakson de la situacio en Ĉeĥoslovakio por povi agi kontraŭ ĝi kune kun la aliaj aliancanoj. Ankaŭ la sovetia ambasadoro en Varsovio, Aristov, pledis por la alvenigo de sovetiaj trupoj en Ĉeĥoslovakion. Eĉ Edward Gierek, la posteulo de Gomułka, kiu estris la partion de la vojevodio de Katovico, reprezentis saman pozicion. Wojchiech Jaruzelski, la tiama defendoministro de Pollando,[287] same pledis por la interveno en Ĉeĥoslovakio, pro kio li ricevis laŭdon el Moskvo.[288] Ankaŭ la bulgaro Ĵivkov malaprobis la „reviziisman“ kurson de Dubček kaj plene apogis la analizon de Breĵnev, dirante, ke li ne povas konsenti pri la pritakso de Kádár, kiun li konsideras danĝera por la kohereco de la bloko, subtenante la ideon de armeaj ekzercoj en Ĉeĥoslovakio.

Malgraŭ malfavoraj premisoj, Dubček esperis gajni la subtenon de la partiestroj de la frataj landoj por sia reforma politiko, sed tiu espero estis sendube tro naiva kaj vana, ĉar ĝuste tiuj pariestroj montriĝis deklaritaj kontraŭuloj de la ĉeĥoslovakaj reformoj. La fatala eraro de Dubček estis, ke li komplete neglektis fari objektivan pritakson de la realaj politikaj fortoj, konstelacioj kaj intencoj en la orienta bloko. Tiu neglektemo fontis el la cirkonstanco, ke la problemo de Dubček estis, ke li malmulton komprenis pri la problemoj de la interna kaj ekstera politiko de la frataj landoj, kiu probable eĉ ne tro interesis lin. Verŝajne li ankaŭ ne povis vere imagi, kio okazas malantaŭ la kulisoj, ĉar informojn pri tiuj okazaĵoj li ne disponis.

Post tio Aleksej Kosygin vizitis Ĉeĥoslovakion por sperti persone, kio tie okazas. Unue la sovetia ambasado en Prago sendis lin al Karlovy Vary por fari kuracadon, sed tio apenaŭ povis esti la ĉefa kialo por veturi al tiu urbo. En ĝi oni aŭdis paroli multajn homojn en la germana lingvo, do la sovetia ĉefministro ricevis la impreson, ke tie abundas imperiistoj kaj reviziistoj el Germanio. Efektive multaj germanoj el okcidento kaj oriento troviĝis en Karlovy Vary, germanlingve nomata Karlsbad, sed ne por ludi la rolon de imperiistoj kaj reviziistoj, kiel Kosygin kredis. Unuavice ili vizitis tiun urbon por renkonti siajn parencojn, kiuj vivis en ambaŭ gernanaj ŝtatoj, krome pro turismaj kialoj kaj ne plej laste jes por fari kuracan restadon. La misa konkludo de la sovetia ĉefministro do povis servi nur kiel plumpa preteksto por povi agiti kontraŭ Ĉeĥoslovakio. Antaŭ ol reflugi al Moskvo, Kosygin ankoraŭ akre atakis la reformpolitikon de la ĉeĥoslovakaj kolegoj kaj prognozis la totalan faligon de la ĉeĥoslovaka KP, se radikala ŝanĝiĝo de la interna politiko ne okazos.[289]

Sekve, la sovetia ambasado en Prago, kiu kolektis pruvojn por la ĉeesto de eksterlandaj malamikoj en Ĉeĥoslovakio, disvastigis la legendon pri la kontraŭ-revolucio, kiun la sovetia ĉefministro nature volonte kredis. Ankoraŭ en majo dufoje aperis en Prago grupoj de altrangaj sovetiaj generaloj – unue marŝaloj Konev, Leljuŝenko kaj Moskalenko, poste marŝaloj Greĉko (defendoministro) kaj Koĵe-

---

[285] Pauer, p. 87-91.
[286] Reitzner, p. 49-50.
[287] Kiel konate, en decembro 1981 Jaruzelski enkondukis la militan staton en Pollando.
[288] Pauer, p. 62-71, 73-79.
[289] Pauer, p. 100.

voj plus generaloj Ogarkov kaj Jepiŝev – por renkontiĝi kaj kunsidi kun la ĉeĥoslovaka registaro. Tiuj vizitoj aspektis kvazaŭ britaj oficiroj vizitis sian kolonion kiel arogantaj reĝaj princoj kaj kaŭzis sarkasmajn komentojn en la ĉeĥoslovaka gazetaro. Konev kontestis ondirojn, ke la sovetianoj planas intervenon en Ĉeĥoslovakio, do aŭ li ne sciis kio okazos aŭ li mensogis. Greĉko kaj Jepiŝev ripetis sian postulon de la neceso translokadi dekmil sovetiajn soldatojn en Ĉeĥoslovakion por fortigi la protekton de ĝia okcidenta limo de tiu lando.

La 25an de majo Vasil Biľak, kiu estis ukraino (ruteno) el orienta Slovakio laŭ etna deveno, renkontiĝis kun sia sovetukraina komplico Ŝelest ie apud la limo en orienta Slovakio por festi la „ĉeĥoslovak-sovetian amikecon". La 29an de majo komenciĝis la plenkunsido de la CK de la ĉeĥolsovaka KP, dum kiu Antonín Novotný, Karol Bacílek, Pavol David, Viliam Široký kaj aliaj estis ekskluditaj el la partio.[290] La 30an de majo aperis en Ĉeĥoslovakio trupoj de la Varsovia Pakto por fari grandajn armeajn ekzercojn sur ĝia teritorio, kiuj kaŭzis akrajn protestojn en Ĉeĥoslovakio. Longan tempon Dubček (kaj ankaŭ Šik) kredis, ke la sovetianoj kaj la „frataj landoj" ne kuraĝos perforte interveni. Kiam en majo-julio iliaj armeoj komencis moviĝi, necesis radikale ŝanĝi la opinion.

La 4an de junio Dubček, Černík, Smrkovský kaj Biľak ree vojaĝis al Moskvo, kie ili klarigis al Breĵnev, Podgornyj kaj Kosygin la sintenon de la ĉeĥoslovakaj partio kaj registaro, sed ili ne sukcesis konvinki la sovetianojn, kies pozicio restis rigida. Inter alie ili provis klarigi la diferencon inter la rolo de la libera gazetaro kaj la oficialaj komunikoj de la registaro, kiuj ne estas identaj. Sed la sovetianoj restis malkomprenemaj kaj ripetis la kritikon de Dresdeno tamen dume sen minaci la ĉeĥoslovakojn per armea interveno. Kiam Dubček menciis, ke la Okcidento ofertis al Ĉeĥoslovakio krediton de 400-500 milionoj da dolaroj por modernigi la industrion, la sovetianoj perceptis la aferon kiel provokon kaj konsideris ĝin kiel „vendon al la kapitalismaj potencoj" kaj kiel „donacon al la kontraŭ-revolucio".

La 20an de junio du sovetiaj divizioj trapasis la ĉeĥoslovakan limon ĉe Ostrava.

La nacia parlamento, kiu kunvenis la 24an de junio, konfirmis sian volon daŭrigi la vojon de la reformoj, komencitan en januaro. Interalie ĝi adoptis novajn leĝojn pri la federigo de Ĉeĥoslovakio kaj pri la rehonorigo de politikaj viktimoj de la stalinismo. Unuafoje depost 1918 estis kreitaj la kondiĉoj por vera ŝtata federacio de la ĉeĥoj kaj slovakoj, kvankam sub komunismaj kondiĉoj. Post kiam la 11an de junio Sovetunio oficiale protestis kontraŭ diversaj publikigoj en la ĉeĥoslovaka gazetaro, la 26an de junio la ĉeĥoslovaka parlamento abolas la cenzuron por la gazetaro, radio kaj televido.

## La „Manifesto de la 2000 vortoj" kaj la histeria reago de la aliancanoj

Dum la parlamento ankoraŭ kunsidis, aperis la „Manifesto de la 2000 vortoj", kiu estis „dediĉita al la laboristoj, kamparanoj, oficistoj, sciencistoj, artistoj kaj ĉiuj" ceteraj profesiuloj kaj civitanoj. La Manifesto aperis en tiuj tagoj en la periodaĵoj *Literární listy* (literatura), *Práce* (sindikata), *Mladá fronta* (junulara) kaj *Zemědělské noviny* (kamparana), kiuj kune havis eldonkvanton de 1,3 milionoj da ekzempleroj, kaj en kelkaj regio-naj gazetoj, do ĝin legis amasego da homoj. Krom tio la teksto aperis en la viena gazeto *Die Presse*. La Manifesto estis skribita de la opozicia verkisto Ludvík Vaculík, kiu estis la proparolanto de 69 aliaj konataj personecoj de la publika vivo, laŭ iniciato de kelkaj kunlaborantoj de la Ĉeĥoslovaka Akademio de la Sciencoj kiel Otto Wichterle, Jan Brod, Otakar Poupa kaj Miroslav Holub.[291]

La Manifesto kaŭzis sufiĉe grandan eĥon, ĉar ĝi imprese reliefigis la ĝisnunan evoluon de Ĉeĥoslovakio el la vidpunkto de la aŭtoro kaj malkaŝis la moralan disfalon de la partio, ŝtato kaj socio dum la pasintaj 20 jaroj depost la akaparo de la politika potenco fare de la komunistoj en februaro 1948, kiel la aŭtoro asertis. En la Manifesto estis skribite, ke post la milito la popolo ankoraŭ bonvenigis la enkondukon de la socialismo kun plena espero por pli bona estonto. Sed la partio falis en malĝustajn manojn de grupo de homoj, kiuj ne posedis sufiĉe da politika sperto, fakaj konoj kaj filozofia erudicio por aŭskulti la opinion de la popolo, kion oni neglektis fari. La faritaj eraroj de la gvidantoj de tiu partio transformis la komunisman partion de politika partio kaj ideologia unuiĝo al potencavida organizaĵo, en kiu la politika povo koncentriĝis en la manoj de malgranda grupo de egoismaj regemuloj, kalkulemaj malbravuloj kaj homoj kun malbona konscienco, kiuj estis forte allogitaj de tia organizo kaj formis la karak-

[290] Reitzner, p. 79.
[291] La tiama prezidanto de la Akademio estis František Šorm, kiu apogis la „Pragan printempon".

teron kaj la konduton de la partio, en kiu decaj kaj bonaj homoj povis havi neniun influon. Kvankam multaj komunistoj batalis kontraŭ tiu degenero, ili ne sukcesis eviti kio sekvis. En la ŝtato, kiu estis fatale interplektita kun la partio, komencis regi la samaj malfavoraj kondiĉoj, kiel ili ekzistas en la komunisma partio, forfalis la avantaĝo de la ekzekutivo, kaj la aktiveco de la ŝtato kaj ekonomio efektiviĝis sen kritiko. La parlamento, la registaro kaj la direktoroj de la entreprenoj perdis siajn originajn funkciojn kunsidi, regadi kaj gvidi. La elektoj havis neniun signifon kaj la leĝoj perdis sian valoron, dum la homoj perdis sian intereson pri la publikaj aferoj kaj ilia fido al la politikaj institucioj komplete mankis. Al la deputitoj oni ne plu povis fidi, ĉar ili estis malkapablaj por atingi ion ajn en la politiko. Plie estis skribite, ke la individua kaj kolektiva honoroj degeneris, ke honesteco kaj kapabloj ludis neniun rolon, ke la plimulto de la homoj okupiĝas nur pri si mem kaj pri sia mono, kvankam eĉ la mono ne plu estis fidinda, ke la interhomaj rilatoj degeneris, ke la ĝojo pri la laboro malaperis kaj ke la psika sano kaj identeco de la nacio estas en danĝero. La ĉefrespondecon por la mizero la aŭtoro ŝovis al „ni ĉiuj“, sed precipe al la menciita grupo de komunistoj, kiu „senkontrole“ regadis la landon per la helpo de la centra partia aparato, kontrolante el Prago ĉiun aktivecon en la provinco, kaj decidis pri tio, kion la individuoj faru aŭ ne faru. La ĉefa kulpo de tiuj regantoj estas, laŭ la Manifesto, ke ili aplikis siajn arbitron kaj krimojn ĉe la senkulpa laboristaro, kiu praktike nenion povis decidi. Iuj laboristoj false kredis, ke ili regadas, sed anstataŭ ili en ilia nomo regadis aparte edukita tavolo de funkciuloj de la partia kaj ŝtata aparato, fariĝante la nova supera klaso. La plej granda trompo konsistis en tio, ke tiu grupo pretendis reprezenti la volon de la laboristoj. Tiu grupo kulpas ankaŭ pri la enkonduko de la cenzuro, kiu evitis kritikon kaj malferman diskuton. Krom tio estis kritikitaj la fuŝaj investoj, la ekonomiaj perdoj kaj la manko de loĝejoj. La Manifesto atentigis pri tio, ke ekde la komenco de la jaro la lando travivas renovigan kaj demokratiigan procezon, kiu komenciĝis en la komunisma partio, kiu devis repagi la ŝuldon al la nekomunistoj, kiuj estis malegale traktitaj. Sed granda parto de tiuj funkciuloj kontraŭstaras ŝanĝojn. Pro tio, la verkinto de la Manifesto sentis neniun bezonon danki al tiu partio, eble nur esprimi agnoskon pro ĝia plej lasta klopodo savi sin kaj la honoron de la nacio. La aŭtoro avertis samtempe, ke la ideoj kaj proponoj esprimitaj en la Manifesto ne estas vere novaj, sed ke ili estas pli malnovaj ol la eraroj de nia socialismo mem; kelkaj el ili devintus esti eldiritaj jam delonge, sed ili estis subpremitaj. Anstataŭ subpremi la ekzistantajn problemojn, oni estus devinta mencii kaj diskuti ilin. Multaj eraraj elementoj jam troviĝis en la ideologio, tiel ke ili povis ĝermi kaj plene maturiĝi dum la lastaj dudek jaroj. Vaculík ne vidis kialon por festi ian venkon, sed nur kialon por la espero, kiu estas daŭre minacata, ĉar multaj homoj ankoraŭ ne kuraĝas paroli libere. Alia iluzio estis laŭ la aŭtoro, ke la demokratia renoviĝo povos esti efektivigata sen komunistoj aŭ eĉ kontraŭ ili, ĉar la komunistoj havas la spertajn funkciulojn kaj la potencon. Krom tio ili estas la solaj, kiuj havas konkretan agadprogramon. Dum al la socialismo estis donita la statuso de provizora projekto, Vaculík verdire donis al la komunistoj la plej lastan ŝancon por fari bonan politikon surbaze de la fido de la civitanoj anstataŭ perforto, kaj esperis, ke la nova CK de la ĉeĥoslovaka KP estos pli bona ol la nuna.

Kiam la Manifesto estis eldonita, la reforma procezo stagnis, kio maltrankviligis la homojn en Ĉeĥoĥslovakio. Tiun senton parte respegulis fenomeno de la laciĝo post la ekscitaj okazaĵoj. Efektive, la plej sensaciaj eventoj pasis. Nun oni batalis por efektivigi la substancon kaj enhavon de la novaj leĝoj. Krom tio, la novaj funkciuloj bezonis tempon por intimiĝi kun sia laboro. Plej grava punkto por la aŭtoro de la Manifesto estis la ekonomio. La Manifesto rekomendis, ke la ekonomio estu gvidata de la plej kapablaj fakuloj kaj ke la direktoroj de la entreprenoj klarigu al la popolo, kiujn produktojn ili faru kaj kiom ili kostu en la vendado, kiun monon oni povas perlabori, reinvesti kaj disdonadi. Se oni ne povas atendi pli multe de la centraj politikaj organoj, oni devas atingi pli multe en la distriktoj kaj komunumoj. La Manifesto postulis la demision de tiuj homoj, kiuj misuzis la potencon kaj la publikan posedon kaj agis malbone sen esti akuzitaj. La Manifesto alvokis la popolon al plej diversaj aktivecoj kadre de la validaj leĝoj kiel la organizado de manifestacioj kaj kunvokado de publikaj kunsidoj, esprimado de kritiko, verkado de rezolucioj kaj leteroj, formado de laborbrigadoj kaj komisionoj, strikado kaj bojkotado, sed ankaŭ utiligado de la gazetaro kaj starigado de redakciaj konsilioj, fondado de novaj gazetoj, sendado de delegacioj al kompetetaj instancoj, malkaŝado de agentoj ktp. Sed ankaŭ mono estu kolektata por funkciuloj, kiuj fariĝis senlaboruloj kaj rentuloj. La ĵurnalistoj estis alvokitaj transformi siajn gazetojn, kiuj ĝis nun nur distrompetis la oficialaĵojn de la partio pri la grandaj sukcesoj de la socialismo, al forumoj por esprimi proprajn vidpunktojn kaj pozitivajn voĉojn. Krom tio, la Manifesto menciis la federigon de la rilatoj inter ĉeĥoj kaj slovakoj, kiun Vaculík bonvenigis, sed li ankoraŭ ne vidis ĝin konkrete efektiviĝinta.

La aŭtoro de la Manifesto nature ne prisilentis la eblon, ke eksterlandaj potencoj povus interveni en Ĉeĥoslovakio por ĝeni, interrompi aŭ sufoki la komencitan reformprocezon. Ilian mobilizon Vaculík atendis en somero, kiam la homoj ferios. Por eviti la intervenon de eksterlandaj potencoj Vaculík konsilis konservi la disciplinon kaj la laŭleĝan karakteron de la agadoj. La popolon li alvokis esti singarda, observi kio okazos, provi kompreni la okazaĵojn kaj doni la taŭgan respondon. Li certigis, ke la registaro estos defendata se necese per armiloj dum la plenumado de la taskojn, kiujn ĝi ricevis de la popolo. Al la aliancanoj de la socialisma tendaro la Manifesto promesis, ke oni respektos la traktatojn kaj interkonsentojn kun aliaj ŝtatoj kaj ke oni ne deziras malpacon.[292]

En alia okazo, Vaculík alvokis la turistojn el GDR, kiuj amase troviĝis en Ĉeĥoslovakio (kaj kiuj estis baldaŭ revokitaj, dum la GDR-limo estis fermita), ke ili disvastigu la veron en sia patrujo pri la karaktero de la ĉeĥoslovaka ribelo, kiu ne estas kontraŭ-revolucio, kiel ĝiaj malamikoj asertas. Li aldonis, ke la ĉeĥoslovakoj ne volas vidi denove germanajn soldatojn en Ĉeĥoslovakio, ĉar tio rememorigus ilin pri la invado de la hitlera armeo en la jaro 1938. Antaŭ la GDR-ambasadejo en Prago homoj postulis, ke la amaskomunikiloj en GDR ne falsu la veron pri la eventoj en Ĉeĥoslovakio.

Kvankam la „Manifesto de la 2000 vortoj“ tute ne komprenis sin kontraŭ-socialisma pamfleto, sed proklamaĵo de la demokratia socialismo, la ortodoksaj komunismaj ŝtatpartioj en la orienta bloko nature negative reagis al tiu alvoko, dum ĝi estis entuziasme bonvenigita de la laboristaro. Laŭ ĝia aŭtoro, dekmiloj da homoj aprobis aŭ subskribis ĝin, inter alie ankaŭ la rektoro de la Karola universitato, Oldřich Starý, krome plej diversaj intelektuloj kiel la verkisto Jaroslav Seifert, reĝisoro Jiří Wenzel, aktoro Jan Werich kaj aliaj eminentaj personecoj de Ĉeĥoslovakio. Kvankam la Manifesto ne estis publikigita en la nomo de la Komunisma Partio, ĝi kaŭzis eĉ pli grandan bruon ol ĝia oficiala „Agadprogramo“ de aprilo. Ĉar kaj protagonistoj kaj kontraŭuloj de la reformoj estis devigitaj esprimi siajn vidpunktojn, la Manifesto kaŭzis grandan atenton kaj vastan diskuton, kun fatalaj sekvoj.

Moskvo nature reagis kun ĉagreno al la „Manifesto de la 2000 vortoj, kiun la sovetianoj kondamnis kiel „platformon de la kontraŭ-socialismaj fortoj“ „venenan provon“ por nigrigi la ĉeĥoslovakan KP ĉe la popolo kaj „eksterordinare danĝeran“ alvokon por subfosi kaj renversi la validan povon en Ĉeĥoslova-kio. Ankoraŭ en la tago de ĝia publikigo Breĵnev telefonis kun Dubček por transdoni sian plendon pri tiu nova klopodo subfosi la socialisman ordon, kiun ĝiaj subskribintoj kaj apogantoj celas forigi en Ĉeĥoslovakio. La moskva gazeto *Pravda* pentris la diablon de la hungara ribelo de 1956 al la muro kaj certigis, ke Sovetunio helpos al la „sanaj fortoj“ en Ĉeĥoslovakio, se ili estas minacataj de la restaŭro de la kapitalismo en tiu lando.

Generalmajoro Samuel Kodaj nomis la Manifeston alvoko al la kontraŭ-revolucio kaj minacis per la aktivigo de la ŝtata prokuroro. Alois Indra verkis cirkuleron al ĉiuj distriktaj partiaj gvidantoj, en kiu li same atentigis pri la danĝero de la kontraŭ-revolucio en Ĉeĥoslovakio kaj ordonis aresti ĉiujn personojn, kiuj provas subskribi la Manifeston. Kvankam Ota Šik plene konfirmis la principan pravecon de la kritiko farita en la Manifesto, li tamen konsideris ĝian aperon en tiu momento taktike maltaŭga.

En letero de la 4a de julio al la CK de la ĉeĥoslovaka KP la CK de SED akrigis la tonon kaj resumis la tutan kritikon de orienta Berlino kaj de la kvinopo kontraŭ la politiko de Dubček, menciante ankaŭ la „Manifeston de la 2000 vortoj“, pri kiu oni esprimis sian konsterniĝon. La aliancanoj vidis „dekstrajn fortojn“ tiri la fadenojn en Ĉeĥoslovakio kaj estis konvinkataj, ke la gvida rolo de la KP estas en danĝero. La situacio en Ĉeĥoslovakio estis oficiale taksita kiel kontraŭ-revolucio. Krom tio, oni suspektis konspiron flanke de iamaj naziaj kunlaborantoj kaj socialdemokratoj. En propra letero la sovetianoj memorigis pri la liberigo de Ĉeĥoslovakio de la hitlergermana jugo fare de la Ruĝa Armeo kaj ne hezitis riproĉi al la ĉeĥoslovakoj, ke ili favoras „revenĝisman“ okcidentan Germanion, kiun oni konsideris rekta heredanto de la Tria Regno. Ajna alproksimiĝo de Prago al okcidenta Germanio estis konsiderita de Moskvo kaj ĝiaj vasaloj en orienta Berlino, Varsovio, Budapeŝto kaj Sofio kiel minaco de la socialismo kaj de la bloka kohereco. Ĉar Ulbricht insistis pri la ŝtata suvereneco de GDR, kiu estis pridubita de FRG, kaj Gomułka, en kies cerbo fantomis fantazioj pri invado de FRG en la najbara orento

---

[292] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Du_mil_vortoj (la germana versio, kiu havas ligon al la ĉeĥlingva teksto, estas pli detala). Tie oni trovas ankaŭ la originalajn tekstojn en la ĉeĥa kaj germana lingvoj kun listo de la subskribintoj. La germana teksto aperis en *Prager Volkszeitung* de la 19a de julio 1968 kaj en Studer, p. 59-62. Klarigojn pri tiu manifesto vd. ankaŭ Schulze Wessel, p. 254-62.

por liberigi la okupitajn teritoriojn, celis la certigon de la okcidenta limo de Pollando, ili toleris absolute neniun revizion de la historio.

Kvankam la ĉeĥoslovakoj montris sin dankemaj al la helpo de Sovetunio dum la dua mondmilito,[293] kiu formis la bazon de ilia amikeco, neniu homo en Ĉeĥoslovakio povis konsideri la bizarajn riproĉojn kaj akuzojn de la sovetianoj seriozaj. La sovetianoj verŝajne mem ne kredis ilin. Temis pri pure politike-ideologie konstruitaj pravigoj, kiuj servis sole al la firmigo de la sovetia potenco en orienta Eŭropo. La 13an de julio la CK de la ĉeĥoslovaka KP respondis al la sovetianoj, konfirmante sian konfeson je la socialisma internaciismo kaj petante duflankan kunsidon kun la sovetia politburoo, anstataŭ nova formala konferenco kiel en Dresdeno. La plej multaj ĉeĥoslovakaj reformistoj rifuzis la argumentojn de la sovetia letero, en kiu Kriegel ne povis trovi ajnan objektivan analizon de la situacio en Ĉeĥoslovakio. Sádovský konsideris la leteron „neakceptebla enmiksiĝo“, eĉ Indra, unu el la ĉefaj komplicoj de la sovetianoj, nomis la nivelon de la konoj de la aktuala situacio „unuflanka“ kaj eĉ Rigo, kiu en principo sekvis la sovetian pritakson, ne povis vidi „kontraŭ-revolucion“ en sia lando.[294] Laŭ generalo Prchlík, kiu respondecis en la CK pri armeo kaj sekureca servo, la sovetianoj venis al malĝustaj konkludoj pri la situacio en Ĉeĥoslovakio. An-taŭsentante la malbonaĵojn, kiuj povus sekvi, en sia reago sub la titolo „1000 vortoj“ Smrkovský avertis, ke la alvoko al strikoj, bojkotoj kaj protestoj povas esti interpretataj kiel kontraŭleĝaj agadoj, kaj konsilis rezigni pri politika romantikismo, kiu povus konduki la reforman procezon de la ĉeĥoslovaka socio al fiasko.

Sub la premo de la konservativaj komunistoj la prezidio de la ĉeĥoslovaka KP estis devigita distanciĝi de la „Manifesto de la 2000 vortoj“, kiun oni konsideris senrespondeca pamfleto, kaj konfirmis, ke oni reprezentas alian, pli moderan pozicion kompare kun la Manifesto, kies tono senteble radikaliĝis. La ĉeĥoslovaka registaro devis malstreĉi la situacion per la deklaro, ke ĝi apogas la kritikon faritan kontraŭ la kontestata Manifesto kaj preferas la propran Agadprogramon, per kiu oni klopodas efektivigi la celojn, kiuj estas postulitaj de la Manifesto. Tiu deklaro devis esti konfirmita de la parlamento.

En Slovakio, kie oni konsideris ĝin afero de la ĉeĥoj, la „Manifesto de la 2000 vortoj“ trovis neniun entuziasmon, kvankam la subskribintoj opiniis, ke la federigo de Ĉeĥoslovakio estas bona ideo por solvi naciajn problemojn. Sed la samaj subskribintoj opiniis ankaŭ, ke por plibonigi la vivon de la slovakoj necesas pli profunda demokratiigo de la politiko. La slovaka KP plendis, ke la aŭtoroj de tiaj manifestoj ne estas sufiĉe bone informitaj pri la projekto de la federigo de Ĉeĥoslovakio.

De la 20a ĝis 30a de junio en Ĉeĥoslovakio okazis ampleksaj armeaj ekzercoj de la Varsovia Pakto sub la nomo „Šumava“ („Bohemia arbaro“). La fino de tiuj manovroj, en kiuj partoprenis 30 mil soldatoj kaj kiuj forte maltrankviligis la popolon en Ĉeĥoslovakio, estis ĉiam denove prokrastita. La 8an de julio almenaŭ la trupoj de Hungario kaj GDR estis retiritaj el Ĉeĥoslovakio, sed la sovetiaj soldatoj restis en ĝi. La 10an de julio Prchlík komunikis en la televido, ke la sovetiaj trupoj rifuzis forlasi la landon, kio igis la sovetiajn trupojn malrapide retiriĝi, tiel ke la 3an de aŭgusto ili estis malaperintaj el Ĉeĥoslovakio. Ne estis klare, ĉu tiuj manovroj servis nur por timigi la ĉeĥoslovakan popolon aŭ ĉu malantaŭ ili kaŝiĝis ankoraŭ aliaj intencoj kaj planoj. Ŝik havis neniun dubon, ke temis pri konkreta preparado de la perarmea interveno, kiu sekvos ankoraŭ en aŭgusto. Fakte, tiu monato estis taŭga periodo por tia paŝo, ĉar la popolo estis laca kaj elĉerpata de la streso de la pasintaj monatoj aŭ feriis eksterlande. Nur la datoj, kiam tiu interveno okazu, ne estis klaraj. En gazetara konferenco de la 15a de julio Prchlík prezentis, kiel gvidanto de la 8a sekcio de la CK (armeo kaj ŝtata sekureco), ekzaktajn ciferojn pri la forteco kaj amplekso de la ĵusaj manovroj de trupoj de la Varsovia Pakto kaj la dezirojn de la ĉeĥoslovakaj reformistoj koncerne la juran statuson de la Varsovia Pakto kaj ne hezitis kritiki la unuflankan gvidon de tiu alianco, en kiu regis ĉefe sovetianoj kaj kion li volis ŝanĝi. En tiu okazo li atentigis, ke en la traktato pri la Varsovia Pakto ne ekzistas pravigoj, kiuj donus al unuopaj membroj la rajton transloki laŭ propraj decido kaj deziro armeajn trupojn en alian membro-ŝtaton. Male, la preamblo kaj artikolo 8 de tiu traktato devigas la membrojn reciproke respekti la suverencon de la aliaj kaj rezigni pri neemiksiĝo en la internajn aferojn de la aliaj membroj. Krom tio Prchlík atentigis, ke marŝalo Jakubovskij, ĉefkomandisto de la unuiĝintaj armeoj de la Varsovia Pakto, ne plenumis sian promeson, kiun

[293] Kiel menciite pli supre sur p. 10, Ĉeĥoslovakion povintus liberigi la usona armeo, kiu staris antaŭ Prago. Sed la interkonsentoj de Jalta malpermesis tion, krom tio la ĉeĥoslovakaj komunistoj celis instali socialisman ordon en sia lando, en kio ili estis apogataj de Moskvo.
[294] Pauer, 106-111. Ĉeĥlingvan materialon pri la partiaj diskutoj lige kun tiu Manifesto vd. sub http://csds.cz/cs/g6/4724-DS.html.

li faris al Dubček kaj Černík, retiri la trupojn de la armeaj ekzercoj, tiel ke estus kompreneble, ke la ĉeĥoslovaka registaro nun postulus la returon de tiuj trupoj en ultimata formo, ĉar la traktato de la Varsovia Pakto posedas neniun juran bazon por la lokado de fremdaj trupoj kontraŭ la volo de iu membro-ŝtato sur ĝia teritorio. [295] Nature tiuj anoncoj estis ege aŭdaca kaj riska manovro, per kiu Prchlík eble transiris siajn kompetentojn, sed li estis almenaŭ honesta. Kelkajn tagojn poste en la sovetia armea gazeto *Ruĝa Stelo* oni povis legi, ke Prchlík intencas subfosi la pakton kaj celas eksigi Ĉeĥoslovakion el ĝi. Generalo Prchlík, kiu estis unu el malmultaj, kiuj reale komprenis la minacantajn danĝerojn flanke de Sovetunio kaj de la Varsovia Pakto kaj ne hezitis paroli klartekston pri la evoluo en la lando, estis subite eksigita de sia ofico, kiun dume transprenis Dubček mem, ĉar li volis mem okupiĝi pri la aferoj de la armeo kaj ŝtata sekureco. Šik volis persvadi Dubček-on pri la sensenceco de tiu decido, sed Dubček ne trovis tempon.[296]

### Kunveno en Varsovio sen ĉeĥoslovakoj kaj la fifama „Varsovia letero"

La 14-15ajn de julio en Varsovio ankoraŭfoje kunvenis la partiaj reprezentantoj de la kvin ŝtatoj de la Varsovia Pakto, Sovetunio, Pollando, GDR, Hungario kaj Bulgario, sen reprezentantoj de Ĉeĥoslovakio, kiuj ne sekvis la inviton, malgraŭ insista peto de Kádár, kiu antaŭe ankoraŭ kunvenis kun Dubček en Komárom por sondi lian aktualan pozicion. Dubček volis eviti duan „tribunalon" kiel li travivis ĝin en Dresdeno kaj anstataŭ kolektiva renkontiĝo proponis duflankajn kunvenojn, En tiu varsovia konsultiĝo la orientaj aliancanoj volis trakti la demandon, ĉu en Ĉeĥoslovakio okazas „kontraŭ-revolucio" aŭ alia formo de ribelo kaj diskuti konkretajn rimedojn kontraŭ Prago. Anstataŭ paroli pri kontraŭ-revolucio, Władysław Gomułka prezentis la nuancatan hipotezon, ke en Ĉeĥoslovakio okazas „paca procezo de la transiro de la socialisma stato al respubliko kun burĝa karaktero", alivorte al „nova kapitalismo", kaj ke la ĉeĥoslovaka KP transformiĝas al partio de „socialdemokratia tipo". Kompare kun Hungario, kie en 1956 oni povis observi klasikan kazon de armata kontraŭrevolucio, kiu estis perforte ĉesigita de ekstere, en Ĉeĥoslovakio okazis „kontraŭrevolucia procezo laŭ paca vojo". La pola partiestro kritikis la abolon de la cenzuro, la „detruadon de la komunisma gvidstrukturo", la deziron rezigni pri la gvida rolo de la partio kaj la malfortigon de la socialisma bloko. En sia kutima ambigua (sed ĉi-foje jam pli klara) maniero, la hungara partiestro János Kádár sekvis en principo la pritakson de la ĉeĥoslovaka situacio fare de Gomułka, atentigante, ke en Ĉeĥoslovakio la kontraŭrevolucio tamen ankoraŭ ne venkis. Anstataŭ tio oni devus paroli pri fortiĝo de la reviziismaj elementoj, kiu okazas en tiu lando, kiuj verŝajne celas evoluigi Ĉeĥoslovakion laŭ jugoslavia modelo kaj „restaŭri la burĝan reĝimon". Ĉar oni devus timi akriĝon de la situacio, Kádár alvokis al mobilizado de la „sanaj fortoj" kontraŭ la „reviziismaj fortoj". Kvankam Kádár signalis distanciĝemon rilate la ĉeĥoslovakan demandon, li ne maltrafis deklari, ke li apogas la sovetian starpunkton. Kiel kutime, Walter Ulbricht plej draste polemikis kontraŭ la ĉeĥoslovakaj reformistoj, al kiuj li riproĉis, ke ili jam estas kontrolataj de la reviziismaj kaj kontraŭ-revoluciaj fortoj. Laŭ li la planon de la kontraŭ-revolucio oni povus legi en la ĉeĥoslovaka gazetaro kaj precipe en la „Manifesto de la 2000 vortoj". Li opiniis, ke la plano de la integrado de Ĉeĥoslovakio en la Okcidenton estas jam certa kaj en preparado, ĉar en Prago oni vidis aperi diversajn gravajn reprezentantojn de okcidentaj ŝtatoj kaj organizaĵoj (kiel Henry Kissinger kaj Zbigniew Brzezinski, konsilistoj de la usonaj prezidentoj Kennedy kaj Johnson, aŭ kiel Blessing, ĉefo de la okcident-germana banko, k.a.). Inter la groteskaj proponoj, kiujn Ulbricht faris, troviĝis la „marŝo ĝis Prago" por „klarigi al Dubček nian vidpunkton" kaj okazigi armeajn ekzercojn en Slovakio. Al la bulgaro Todor Ĵivkov, kiu ĉiam fidele apogis kaj pli hipokrite ol sincere la sovetian pozicion, restis nur proponi „helpon" al Ĉeĥoslovakio per „armataj fortoj de la Varsovia Pakto" por „restarigi la diktaturon de la proletaro", ĉar „fidi al la internaj fortoj" de Ĉeĥoslovakio estus vana klopodo kaj paroli kun Dubček havus neniun sencon. Por la savado de la socialismo en Ĉeĥoslovakio li garantiis la plenan subtenon de la bulgara popolo.

Aŭdinte la elpaŝojn de siaj kolegoj, Leonid Breĵnev komentis la sovetiajn vidpunktojn per buntaj formuloj. En la pozo de patrono li amare konstatis, ke „la ĉeĥaj kamaradoj ne volas aŭskulti la konsilojn de siaj amikoj kaj rifuzas kolektivan interkonsultiĝon", kaj bedaŭris, ke ili ankaŭ „ne volas vidi, ke en ilia lando okazas ofensivo de la kontraŭ-revolucio, kiu koncernas ne nur Ĉeĥoslovakion". Por eviti, ke Ĉeĥoslovakio forlasos la socialisman vojon, la sovetia ĉefo avertis, ke oni devas enkalkuli „ĉiujn rimedojn". Sen ankoraŭ preni definitivan decidon, unuafoje Breĵnev rekte deduktis la rajton de la frataj par-

[295] Csizmas, p. 92.
[296] Šik, ĉap. III, 7.

tioj enmiksiĝi en la internajn aferojn de alia frata lando, kiun li pravigis per la „internacia devo“ de tiuj frataj landoj defendi la socialismon surbaze de la ekzisto de duflankaj kontraktoj kaj konvencioj, kiuj devigas la partnerojn doni la necesan helpon al alia frata lando, kiel en ĉi tiu kazo al Ĉeĥoslovakio.Tiel naskiĝis la fifama historia „Breĵnev-doktrino“, kiu celis limigi la suverencon de la membroŝtatoj de la sovetia bloko kaj en si mem signifis negacion de la principoj kaj valoroj, kiuj estis postulitaj de la UN-Ĉarto koncerne la suverenecon kaj sendependecon de la ŝtatoj, la neenmiksiĝon en la internajn aferojn de aliaj ŝtatoj kaj la respekton de la internacia juro en la interŝtataj rilatoj. La principo de la rezigno pri la rajtoj de ĉiu ŝtato favore al iu nebula „internaciisma solidareco“ laŭ la modelo de la sovetia socialismo kaj ankaŭ ĝenerale, kiu povas esti manipulata en ĉiu momento, ne estis antaŭvidita de la UN-Ĉarto. La efektiva celo de la „Breĵnev-doktrino“ estis la provo ekskludi tutan aron da ŝtatoj el la valideco de la internacia juro por submeti ilin sub iun specialan rajton, kiu estis nomita „socialisma internacia juro“, kiun la komunistoj konsideris pli „progresema“ ol la ĝenerale akceptitaj normoj de la universala juro.[297]

En komuna letero de la „frataj partioj” al adreso de la CK de la ĉeĥoslovaka KP, kiu estis publikigita la 18an de julio sur la paĝoj de la SED-ĉeforgano *Nova Germanio*, aperis formuloj, kiuj ne kaŝis la intencojn de la „frataj landoj kaj partioj”, kion ili faros, se Ĉeĥoslovakio daŭrigos sian reformkurson kiel ĝis nun kaj ne rezignos pri la „kontraŭ-socialismaj” aktivecoj. Tiu fifama letero, kiu eniris la historiografion kiel „Varsovia letero”, estis verkita, ĉar laŭ la klarigo de la subskribintoj,[298] la ĉeĥoslovaka CK maltrafis sekvi la inviton al la kunveno, kiu estis proponita de la frataj partioj por la 14a de julio en Varsovio kun la celo fari „kolektivan kamaradan analizon” pri la aperinta situacio en Ĉeĥoslovakio.

En la publikigita letero, kiu estis laŭ propra deklaro „diktita de sincera amikeco kaj bazita sur la principoj de la marksismo-leninismo kaj de la proleta internaciismo” kaj kiu celis detale prezenti la konsiderojn de la koncernataj frataj partioj, oni povis enkonduke legi inter alie, ke tiuj partioj estis „profunde maltrankviligataj pri la evoluo de la okazaĵoj” en Ĉeĥoslovakio, kiuj estis konsideritaj kiel „ofensivo de la reakciaj fortoj, kiuj estas subtenataj de la imperiismo kontraŭ la ĉeĥoslovaka KP kaj la fundamento de la socia ordo en Ĉeĥoslovakio”. La letero esprimis la timon de la frataj partioj, ke tiu evoluo „portas en si la danĝeron, ke Ĉeĥoslovakio povus forlasi la vojon de la socialismo kaj ke sekve la interesoj de la tuta socialisma sistemo povus esti minacataj”. Oni memorigis, ke tiun zorgon la aliancanoj esprimis jam okaze de la kunveno de la ses komunismaj partioj en Dresdeno (vd. supre) kaj en pluraj leteroj, kiujn tiuj partioj lastatempe direktis al la CK de la ĉeĥoslovaka KP. Sen pliaj formalaj frazoj, la aŭtoroj de la letero rapide venis al la aktualaj temoj por klarigi al la ĉeĥoslovakoj, kiuj punktoj konkrete ĝenas ilin, trovante sufiĉe ambiguajn formulojn.

Unuflanke ili emfazis, ke ili ne intencas „enmiksiĝi en la internajn aferojn de Ĉeĥoslovakio” kaj ankaŭ ne celas influi „la metodojn de la planado kaj gvidado de la socialisma ekonomio de Ĉeĥoslovakio” por malhelpi „agojn, kiuj celas perfektigi la strukturojn de la ĉeĥoslovaka ekonomio, prosperigi la socialisman demokration” kaj reguligi la rilatojn de la ĉeĥoj kaj slovakoj. Por pravigi sian rajton tamen enmiksiĝi en la internajn aferojn de alia socialisma lando, ili atentigis aliflanke pri tio, ke ili „ne povas konsenti, ke malamikaj fortoj forpuŝas vian landon de la socialisma vojo kaj provokas la danĝeron de disigo de Ĉeĥoslovakio de la socialisma komunumo”. Laŭ la opinio de la subskribintoj, tiu danĝero koncernis ne nur Ĉeĥoslovakion, sed ĉiujn komunismajn partiojn kaj socialismajn ŝtatojn de la Varsovia Pakto. La neceso unuiĝi en tiu komunumo estis pravigita per la atentigo, ke tiuj landoj pagis altan prezon dum la dua mondmilito kaj oferis grandegan kvanton da viktimoj por venki la „hitleran faŝismon” por „iri la vojon de la libereco, sendependeco, progreso kaj socialismo”. La subskribintoj avertis, ke ili „neniam konsentos”, ke „la historiaj atingoj de la socialismo estos endanĝerigitaj” kaj „ke la imperiismo detruos la socialisman sistemon por ŝanĝi la ekvilibron de la fortoj en Eŭropo.“ Ili asertis, ke la „subfosado de la gvida rolo de la komunisma partio kondukos al la likvido de la socialisma demokratio kaj de la socialisma ordo kaj signifas danĝeron por la fundamentoj de nia alianco kaj por la sekureco kaj komunumeco de niaj landoj”. En la kazo de Ĉeĥoslovakio la frataj partioj „ĝis nun baziĝis sur la supozo, ke la ĉeĥoslovaka KP tenas la kondukilojn de la potenco en siaj manoj kaj ne permesas al la kontraŭkomunisma reakcio misuzi la novan programon de la CK de la ĉeĥoslovaka KP de januaro 1968 por propraj celoj”. La aŭtoroj de la varsovia letero esprimis sian konsterniĝon, ke la evoluo en Ĉeĥoslovakio

[297] Csizmas, p. 100-111.

[298] Nome Ĵivkov, Todorov. Velĉev, Kubadinski (Bulgario); Kádár, Fock (Hungario), Ulbricht, Stoph, Axen (GDR); Gomułka, Spychalski, Cyrankiewicz, Kliszko (Pollando); Breĵnev, Podgornyj, Kossygin, Ŝelest, Katuŝev (Sovetunio).

videble prenis alian vojon malgraŭ la promesoj de la ĉeĥoslovaka flanko eviti ĉiujn tiujn danĝerojn. Laŭ la subskribintoj, la „fortoj de la reakcio demagogie misuzis la sloganon de la ´demokratiigo´ por lanĉi kampanjon kontraŭ la komunisma partio de Ĉeĥoslovakio kun la evidenta intenco likvidi la gvidan rolon de la partio kaj subfosi la socialisman ordon” por „restarigi la burĝan ordon” kaj por „krei kontraŭdiran situacion inter Ĉeĥoslovakio kaj la ceteraj socialismaj landoj”.

Plue ili riproĉis al la ĉeĥoslovakaj kolegoj, ke „la kontraŭ-socialismaj kaj reviziismaj fortoj akaparis la gazetaron, radion kaj televidon por fari el ili parolilojn kontraŭ la KP. Laŭ la aŭtoroj la ĉeĥoslovakaj amaskomunikiloj „konfuzis la laboristan klason”, praktikas „senbridan kontraŭ-socialisman demagogion” kaj „sisteman moralan teroron kontraŭ tiuj homoj, kiuj esprimis sian zorgon pri la evoluo de la okazaĵoj” en Ĉeĥoslovakio. Al la ĉeĥoslovakaj amaskomunikiloj oni krome riproĉis, ke ili lanĉis kampanjon kontraŭ la ekzercoj de la armeoj de la Varsovia Pakto en Ĉeĥoslovakio kaj kritikis la sovetian armeon, ke ĝi lezis la suverenecon de tiu lando, kie la homoj estas dankaj al la sovetiaj soldatoj, kiuj redonis al ili la liberecon kaj suverenecon (post la dua mondmilito). Laŭ la subskribintoj nur malamikoj de la socialismo povas fari tion. „La inspirantoj de tiu malamika kampanjo evidente celas malklarigi la konscion de la ĉeĥoslovaka popolo, disorienti ĝin kaj renversi la veron, ke Ĉeĥoslovakio povas konservi sian suverenecon nur kiel socialisma lando kaj kiel membro de la socialisma ŝtataro.”

La organizaĵoj kaj kluboj (kiel K 231 kaj KAN, aK), kiuj estiĝis ekster la Nacia Fronto de Ĉeĥoslovakio kaj la fortoj proksimaj al la socialdemokratio, estis misfamigitaj kiel lakeoj de la reakcio. La subskribintoj timis, ke la socialdemokratoj „skismigos la laboristan movadon en Ĉeĥoslovakio kaj akaparos la politikan povon por restaŭri la burĝan ordon”.[299]

Apartan mencion trovis la supre prezentita „Manifesto de la 2000 vortoj”, kiu ŝajnis esti por ili aparte malfacile digestebla legaĵo. Laŭ ilia kompreno, la manifesto senskrupule instigis al batalo kontraŭ la komunisma partio kaj kontraŭ la konstitucia aŭtoritato, ĉar ĝi alvokis al strikado kaj tumultoj. La manifeston ili konsideris aparte serioza danĝero por la partio, la Nacia Fronto kaj la socialisma ŝtato, ĉar laŭ ilia opinio ĝi estis provo por krei anarkion, pro kio ili konsideris ĝin „platformo de la kontraŭ-revolucio”. Oni admonis la publikon ne kredi la „malplenajn frazojn“ de la manifesto, al kiu la verkintoj „provis doni laŭleĝan statuson”. Aparte ĉagrenis ilin la fakto, ke la manifesto trovis vastan aprobon inter partianoj, inkluzive ĝiajn gvidantojn, kiuj „subtenas la kontraŭ-socialismajn alvokojn”, kaj ili estis konsternataj, ke tiu agado ne estis „rifuzita de la partio kaj de la popola potenco”, kiel tio estus atendebla kaj „necesa”, ĉar ili opiniis, ke la manifesto „malpurigas la komunisman partion, kalumnias kaj misfamigas la sincerajn komunistojn” kaj malrespektas la „sovetiajn soldatojn, kiuj donis sian vivon por la libereco kaj suvereneco” de Ĉeĥoslovakio. Krom tio ili esprimis sian koleron, ke en Ĉeĥoslovakio ekzistas ho-moj, kiuj atakas ankaŭ la validan eksteran politikon kaj la amikecon kun la socialismaj landoj, ĉar oni intencas revizii tiun politikon rilate al okcidenta Germanio. Al la ĉeĥoslovakaj „kamaradoj” la subskri-bintoj riproĉis, ke ili ne vidis la danĝerojn flanke de la „okcident-germana burĝa gazetaro”, kiu plene „laŭdas la ´demokratiigon´ kaj ´liberaligon´” en Ĉeĥoslovakio kaj klopodas semi malpacon inter la so-cialismaj landoj. La subskribintoj avertis, ke necesas respekti la traktatojn kaj konvenciojn, kiuj ekzistas inter la diversaj socialismaj landoj kaj kiuj celas „defendi la socialismon kaj garantii la kolektivan seku-recon de la socialismaj landoj”. Krom la kreskanta danĝero de „novnaziaj fortoj en okcidenta Germa-nio”, kiu „strebas konkeri GDRn”, ne volas „rezigni pri la aliro al nuklaj armiloj” kaj estas „kontraŭ malarmado en Eŭropo”, oni menciis ankaŭ la usonan militon en Vjetnamio kaj la „israelajn agresojn en Proksima Oriento”. Ĉiujn tiujn agresemajn agadojn oni kontrastigis kun la intencoj de la socialisma tendaro, kiu celas garantii pacon kaj sekurecon al la popoloj.

Do, por la subskribintoj ekzistis neniu dubo, ke en Ĉeĥoslovakio estiĝis „absolute neakceptebla” situacio, kiu endanĝerigas la komunajn interesojn de la socialismaj landoj. Kaj ili konkludis, ke por protekti la potencon de la laborista klaso kaj la atingojn de la socialismo necesas „aŭdace” rebati la atakon de la „dekstraj kaj kontraŭ-socialismaj fortoj kaj mobilizi ĉiujn rimedojn de la defendo, kiujn la socialisma ŝtato kreis, t.e. ĉesigi ĉiujn aktivecojn de la politikaj organizoj, kiuj elpaŝas kontraŭ la socialismo, certigi la gvidon de la amaskomunikiloj, t.e. gazetaro, radio kaj televido, per la partio kaj utiligi ilin en la servo de la socialismo”. La subskribintoj promesis apogi la „sanajn fortojn“, kiuj „kapablas defendi la socialisman ordon en la batalo kontraŭ la fortoj de la kontraŭ-revolucio por kaŭzi al ili klaran

[299] Alia partio, kiu refortiĝis en tiu periodo, estis la (katolika) Ĉeĥoslovaka Popolpartio, kiu havis 40 mil membrojn, kio signifis 55 procentojn pli ol en la 1a de januaro 1968. (Kamberger, p. 114).

malvenkon” kun la celo konservi kaj fortigi la socialismon en Ĉeĥoslovakio. Je la fino de la skribaĵo la aŭtoroj esprimis sian esperon, ke la ĉeĥoslovaka KP „decidos taŭgajn rimedojn por bari la vojon al la reakcio”, kaj promesis, ke „en tiu batalo ili povas ĉiam kalkuli je la solidareco kaj ĉiuspeca helpo flanke de la socialismaj frataj landoj.“[300]

La „Varsovia letero“, kiel kia ĝi eniris la historiografion, liverante la tutan arsenalon de la municio de argumentoj de la ortodoksaj komunistoj de la sovetia bloko kontraŭ la reformoj de Dubček kaj liaj samideanoj, estis legita de tiuj kiel proskriba buleo kaj perceptita kiel frua atesto de la t.n. Breĵnev-doktrino pri la limigita suvereneco de la socialismaj ŝtatoj; ĝi signifis fortan tobakon eĉ por tiuj ĉeĥoslovakoj, kiuj intertempe jam alkutimiĝis al tiu demagogia retoriko el Moskvo kaj la ĉefurboj de la aliancanoj, kiuj evidente timis, ke Ĉeĥoslovakio povus rompiĝi el la orienta bloko. Kiu ĝuste komprenis la koditan lingvaĵon de tiu ĉantaĝa verkaĵo, kiu probable estis diktita de la sovetianoj, tiu komprenis, ke ĝi entenis la minacon de armea interveno, se Ĉeĥoslovakio ne rezignas pri la komencitaj reformoj kaj ne submetiĝos al la disciplino de Moskvo kaj de la sovetia bloko, kaj tiu komprenis ankaŭ la klaran anoncon, ke tia armea interveno probable baldaŭ okazos.

En sia oficiala respondo la prezidio de la ĉeĥoslovaka CK afable replikis, ke la danĝeroj, kiujn la aŭtoroj de la varsovia letero vidas, recipe la danĝero de la kontraŭ-revolucio, ne estas vere realaj kaj ke la faritaj konkludoj ne kongruas kun la reala situacio en Ĉeĥoslovakio, malgraŭ iuj internaj problemoj, kiuj akompanas la politikan renoviĝon en tiu lando. La letero konfirmis la lojalecon de Ĉeĥoslovakio al la socialisma komunumo kaj la marksismo-leninismo kaj petis la partnerojn havi pli da fido kaj kompreno por la nova politiko, kiun ili bonvole apogu. Oni distanciĝis de la „Manifesto de la 2000“ vortoj kaj atentigis, ke sole la „Agadprogramo“ de la 5a de aprilo kaj la decidoj de la CK-pleno de majo formas la bazon de la politiko en Ĉeĥoslovakio. La letero atentigis la aliancanojn, ke la akcepteco de la gvida rolo de la KP dependas de la popolamasoj, ĉar la partio ne povas akiri sian aŭtoritatecon pere de ordonoj, sed per la kredindeco ĉe la amasoj. Eĉ se oni abolis la cenzuron, tio ne aŭtomate signifas, ke la gvida rolo de la partio estas perdita. La partio plenumas sian rolon nur per tio, se ĝi servas al la libera, progresema kaj socialisma evoluo.[301]

Nature, la sovetianoj atendis iom alian reagon kaj ne povis esti kontentaj pri la respondo el Prago. La lingvaĵoj uzitaj en la „Varsovia letero“ kaj en la respondo de la ĉeĥoslovaka KP-prezidio estis tro diferencaj. La publikigo de la ĉeĥoslovaka respondo al la „Varsovia letero“ en la amaskomunikiloj de la lando kaŭzis furiozan telefonalvokon de Kosygin al Černík, kiu heroe rifuzis ĉiujn riproĉojn.

Okaze de la pleno de la CK de KPSU de la 17a de julio Breĵnev laŭtlegis sian prelegon, kiun li prezentis en Varsovio, konfirmante la sovetian starpunkton, ekskludis la eblecon de la eksiĝo de Ĉeĥoslovakio el la socialisma komunumo kaj komprenigis al la ĉeestantoj, ke en ĉi tiu kazo validas la doktrino de la limigita suvereneco de ĝiaj membroj (t.n. Breĵnev-doktrino). Dum la kunsido de la politburoo de KPSU, kiu sekvis du tagojn poste, Breĵnev eĉ vidis la pozicion de Sovetunio mem en danĝero. Dum tiu kunsido devis okazi verva disputo inter Andropov kaj Kosygin, kiuj reprezentis diverĝajn opiniojn. Kiel ajn, oni konfirmis la intencon malpermesi ĉiujn „kontraŭ-socialismajn“ partiojn kaj klubojn en Ĉeĥoslovakio; laŭ sovetia deziro la gazetaro devis esti remetita sub partia kontrolo, la gvida rolo de la partio devis esti restarigita kaj funkciuloj kiel Kriegel, Špaček, Císař, Slavik, Šik, Pavel kaj generalo Prchlík devis esti eksigitaj de siaj oficoj. Defendoministro Greĉko estis taskita sekurigi tiujn decidojn se necese per armeaj rimedoj. Kiel akompana propaganda muziko aperis artikoloj en la sovetia kaj bulgara gazetaro kun diversaj provokoj kaj riproĉoj kontraŭ Ĉeĥoslovakio, kiuj devis liveri la materialon por pravigi baldaŭan intervenon. La sovetia partia organo *Pravda* sciigis, ke ekzistas plano de Usono „liberigi“ orientan Germanion kaj Ĉeĥoslovakion, kaj la sovetia armea organo *Ruĝa Stelo* kritikis generalon Prchlík kaj mallaŭdis la ĉeĥoslovakan armean gvidantaron.

La 20an de julio la Varsovia Pakto eldonis alarmon por la kvin armeoj. La 23an de julio en la kvar okcidentaj respublikoj de Sovetunio, do en Ruslando, Belorusio, Ukrainio kaj Latvio, komenciĝis la plej granda armea ekzerco („Njemen“) post la dua mondmilito, kaj du tagojn poste sekvis la grandega aerdefenda ekzerco „Ĉiela ŝildo“.[302] Kadre de la ekzerco „Danubo“, kiel nomiĝos la operaco por invadi

[300] Esperantigita de aK surbaze de la menciita artikolo en *Nova Germanio*.
[301] La ĉeĥlingvan version vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/717.pdf. La teksto estis germanlingve publikigita en Studer, p. 68-71.
[302] Vd. https://www.spiegel.de/spiegel/print/d-45950113.html.

Ĉeĥoslovakion, parto de la GDR-armeo pretiĝis en la regionoj de Halle kaj Dresden[303] – nature strikte sekrete. Sole en GDR estis mobilizitaj 650 mil soldatoj. Bulgaraj trupoj devis partopreni en la okupado de Slovakio. Ankaŭ Kádár kaj lia defendo-ministro Czinege konsentis, ke la hungara armeo enpenetros Ĉeĥoslovakion kune kun tri-kvar sovetiaj divizioj. Tiuj armeoj ricevis la ordonon disbati ĉiun reziston.

Sendube ĉiuj tiuj armeaj manovroj havis neniun alian celon ol simuli la baldaŭan armean intervenon. Kiel dato de la preteco por la invado estis fiksita la 26/27ajn de julio. Kiel Kádár poste sciigis, komence de aŭgusto Ĉeĥoslovakio estis ĉirkaŭita de tiuj armeoj. En tiuj tagoj Prago – kaj ankaŭ la Okcidento – fakte atendis la invadon de la armeoj de la Varsovia Pakto en Ĉeĥoslovakio. Ĉi tiu aro-ganta demonstrado de la sovetia potenco kondukis al kriza kunsido en la prezidio de la ĉeĥoslovaka KP, kies anoj komencis dubi, ke Ĉeĥoslovakio estas suverena ŝtato.[304] Sed la invado estis dume prokrastita – pro la kunsido en Čierna nad Tisou, pri kiu temas la sekvanta ĉapitro.[305]

## La kunvenoj de Čierna nad Tisou kaj Bratislavo

Du semajnojn post la memorinda varsovia epizodo estis konvokita nova renkonto de ĉeĥoslovakaj kun sovetiaj registaranoj kaj partiaj gvidantoj. Ĉar la ĉeĥoslovaka delegacio ne volis vojaĝi al Sovetunio kaj la sovetianoj evitis veturi al iu pli granda ĉeĥoslovaka urbo, kie oni timis amasmanifestaciojn, Breĵnev proponis kunveni en la stacidomo de Čierna nad Tisou en orienta Slovakio kelkcent metrojn apud la sovetukraina limo. Ĉi tiu loko estis elektita, ĉar la ĉeĥoslovaka flanko deziris, ke la interparoloj okazu sur ĉeĥoslovaka teritorio, kion la sovetianoj akceptis. La legendiĝonta kunveno de ambaŭ konflikt-partioj en tiu dezerta loko devintus okazi dum unu sola tago, sed ĝi daŭris kvar tagojn de la 29a de julio ĝis la 1a de aŭgusto kaj havis memorindajn okazaĵojn.

La publiko en Ĉeĥoslovakio reagis ege maltrankvile al tiu nova evoluo, pri kiu oni ne sciis, kion la sovetianoj faros kun la ĉeĥoslovakaj registaranoj, kiuj devos vojaĝi al Čierna, kaj amase (2 milionoj) subskribis iun publikan manifeston lanĉitan de la konata ĉeĥoslovaka verkisto Pavel Kohout, kiu aperis en la gazeto *Literární listy* la 26an de julio 1968. La manifesto direktiĝis al la ĉeĥoslovaka delegacio, kiu estis veturonta al Čierna nad Tisou por renkonti delegacion de la sovetia politburoo. En sia manifesto la aŭtoro esprimis la lojalecon de la ĉeĥoslovaka popolo al la socialismo kaj la solidarecon kun la ĉeĥoslovaka delegacio sub la moto „Ni pensas pri vi. Vi pensu pri ni!“ por faciligi ĝian taskon interparoladi kun la sovetianoj. La alvoko certe servis ankaŭ kiel averto al la adreso de la konservativuloj inter la partiaj gvidantoj esti konsciaj pri la risko de adekvataj reagoj flanke de la popolo, se ili perfidos Ĉeĥoslovakion, kiu devis atendi punon de tiuj, kiuj volas bremsi aŭ ĉesigi la reformojn. Laŭ Kohout, tiu scenaro estis evitenda, ĉar necesis konduki la procezon de la „renaskiĝo“ de Ĉeĥoslovakio al bona fino sub la kondiĉoj de la „socialismo, alianceco, suvereneco, libereco“. Kohout taskis la ĉeĥoslovakan delegacion klarigi al la sovetianoj la kaŭzojn de la „interna opozicio“ en Ĉeĥoslovakio kaj konvinki ilin, ke la pozicio de la socialismo en Ĉeĥoslovakio estas hodiaŭ nekompareble pli forta ol antaŭe. „Agu, klarigu, sed firme defendu la vojon, kiun ni decidis iri kaj kiun ni neniam forlasos, tiel longe ni vivas.“ „Diru al ili, ke ni bezonas liberecon, pacon kaj tempon.“ Kohout anoncis, ke oni atente sekvos la interparolojn en Čierna horon post horo kun granda interesiĝo kaj senpacience atendos freŝajn raportojn de tie. Se la okazo, kiun Kohout nomis unika, trovi interkonsenton en Čierna estos maltrafita, li timis, ke tio signifos „niajn malfeliĉon kaj honton“. „Ni fidos je vi.“[306]

Dubček parolis en la televido kaj reciprokis la sloganon de Kohout, ke „Vi pensu pri ni! Ni pensos pri vi!“ Li dankis al la popolo pro ĝia apogo kaj sentis sin kuraĝigata rifuzi kompromisojn kun la sovetianoj. Al la „Praga printempo“ li donis kvazaŭ la mistikon de speciala misio per la vortoj „en la intereso de la komuna socialisma afero ni estas devigataj obstine iri tiun vojon ĝis la fino sen deflankiĝi de ĝi eĉ nur unu paŝon“. Goldstücker trovis tiun alvokon same maltaŭga kiel la „Manifeston de la 2000 vortoj“, ĉar laŭ li ĝi superflue provokis la sovetianojn. Samtempe, la slovaka junulara gazeto *Smena*

---

[303] Pli detale pri la poziciigo de la GDR-armeo vd. sub https://www.bundesarchiv.de/DE/Content/Virtuelle-Ausstellungen/21-August-1968-Einmarsch-Kein-Einmarsch-Die-Beteiligung-Der-Nationalen-Volksarmee-Der-Ddr-An-Der-Niederschlagung-Des-Prager-Fruhlings/21-august-1968-einmarsch-kein-einmarsch-die-beteiligung-der-nationalen-volksarmee-der-ddr-an-der-niederschlagung-des-prager-fruhlings.html.

[304] Pauer p. 101-4.

[305] Pauer, p. 120-135.

[306] La ĉeĥlingvan tekston vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/726.pdf, la germanlingvan tradukon vd. en Studer, p. 72-73.

alvokis al ĝenerala striko apoge al la ĉeĥoslovaka delegacio. En tio ĝi ricevis la subtenon de prestiĝaj slovakaj intelektuloj. Sed Breĵnev ne estis impresata de tiu pseŭda optimisma patoso de la ĉeĥoslovakoj, kiu devis konvinki la sovetianojn pri la granda apogo de la reformistoj flanke de la ĉeĥoslovaka popolo. Male, li premos la ĉeĥoslovakan delegacion denove per la riproĉo de la „kontraŭ-revolucio“, pri kiu li surtabligos novajn ´faktojn´, kiuj devos kompromiti la kamaradojn de Dubček. Sed la ĉeĥoslovaka delegacio restis heroe firma kaj ne cedis de siaj principaj pozicioj, malgraŭ la kutimaj timigoj, ofendoj kaj ĉantaĝoj flanke de la sovetianoj. Nur Biľak, Švestka kaj Rigo pretis adaptiĝi al la sovetiaj vidpunktoj.

Sendepende de la rezulto, Čierna do signifis unikan pintkunvenon en la historio de la diplomatio: Neniam antaŭe kunvenis du kompletaj registaroj en simila loko. Antaŭ la komenco de la konferenco la sovetia sekreta servo KGB detale inspektis la lokon. La samon faris la ĉeĥoslovakoj, kiuj timis, ke la sovetianoj povus fortiri la trajnon de la ĉeĥoslovaka delegacio sur sovetian teritorion, sed surloke ili konstatis, ke tio apenaŭ eblus pro la diversaj larĝecoj de la reloj en ambaŭ landoj.

La sovetia delegacio, kiun konsistigis krom Breĵnev mem ankaŭ Kosygin, Podgornyj, Suslov, Ŝelepin, Ŝelest, Pelŝe, Mazurov kaj iuj aliaj,[307] aperis ĉiumatene per sia vagonaro sur la larĝa sovetia spuro en la stacidomo de Čierna kaj retiriĝis al la alia flanko de la limo por manĝi kaj tranokti en siaj vagonoj (pro kaŭzoj de la sekureco), kie la spaco estis mallarĝa same kiel en la kunvenejo mem – al kiu servis la fervojista kulturdomo de Čierna. Sur la teritorio de Sovetunio troviĝis trupoj de la Varsovia Pakto, kiuj estis pretaj por ataki Ĉeĥoslovakion en ajna momento.

La bonvenigo de la delegacioj estis, laŭ iuj observantoj, frosta kaj la psika premo, kiu devis esti aplikata kontraŭ la ĉeĥoslovakoj, sentebla.[308] Breĵnev kisis nur sian malnovan batalkamaradon Svoboda, dum al la aliaj li distancite donis la manon. La ĉeĥoslovakan delegacion konsistigis Dubček, Barbírek, Biľak, Černík, Kolder, Kriegel,[309] Piller, Rigo, Smrkovský, Špaček kaj Švestka. La sovetiestro enkondukis la konferencon per longa draŝa punprediko, ripetante la konatan kritikon kaj ĉiuspecajn akuzojn kontraŭ la ĉeĥoslovakaj politikistoj – la ´tribunalo´ de Dresdeno estis nenio kompare kun tio, kion ili spertis en Čierna.

La kolera Breĵnev riproĉis al la ĉeĥoslovakoj, ke ili malrespektas la devigojn de la alianco kaj ke la ĉeĥoslovaka gazetaro estas plena de kontraŭsovetiaj asertoj. Ĉe la malfermita okcidenta limo de Ĉeĥoslovakio li vidis la danĝeron, ke tra ĝi povus penetri eksterlandaj agentoj, kiuj povus kontrabandi sekretajn armilojn el Okcidento. Li montris sin ĉagrenata pri la kritiko pri la stato de la ĉeĥoslovaka eko-nomio fare de Ota Šik. La plendon pri la malbona ĉeĥoslovaka ekonomio, pri kiu Breĵnev evidente sentis sin respondeca, li klopodis malfortigi per ciferoj pri la ekonomia kresko de la orienta bloko, kiu laŭ li superis tiun de la Okcidento, kaj emfazis la avantaĝojn de la ekonomia kunlaboro inter Sovetunio kaj Ĉeĥoslovakio. Entute Breĵnev konkludis, ke en Ĉeĥoslovakio la kontraŭ-revolucio jam estas plena realaĵo. Kiam li estis ĉe la temo, ke Sovetunio devas kulpi pri ĉiuj problemoj de Ĉeĥoslovakio, kiu estis devigita kopii la sovetian modelon, la sovetia ŝtatestro kolere diris: „Neniam ni eĉ nur iomete pensis trudi al Ĉeĥoslovakio aŭ aliaj landoj nian ordon. La palavro pri la trudo de iu ajn sovetia socialisma modelo al la ĉeĥoj kaj slovakoj estas nenio alia ol malica, provoka mensogo, kiun disvastigas malamikaj elementoj por subfosi la amikecon de niaj landoj, partioj kaj popoloj.“[310]

En sia same longa duhora repliko Dubček restis afabla en la tono, elektis vortojn kaj diris frazojn por trankviligi la sovetianojn kaj malakrigi la etoson. Li kurte komentis ĉiun unuopan punkton, kiun Breĵnev aludis kaj provis fari pozitivajn proponojn. Samtempe li avertis, ke la ĉeĥoslovakoj ne ŝatas la polemikon kaj premon, kiu alfrontis ilin en la pasinta tempo, kaj petis komprenon kaj pli multe da tempo por solvi la problemojn en Ĉeĥoslovakio. Li neis la konkludon de la sovetianoj, ke en Ĉeĥoslovakio okazas kontraŭ-revolucio kaj certigis la alian flankon, ke la ĉeĥoslovaka popolo ne konsentus fari tian revolucion. Li donis garantion, ke lia lando restos lojala al la socialismo, marksismo-leninismo kaj al Sovetunio kaj ke en ĝi oni ne toleras kontraŭ-socialismajn fortojn kaj ne volas restaŭri la kapitalismon.

[307] Kirilenko kaj Poljanskij restis en Moskvo.
[308] Tamen, iuj fotoj de la kunveno, kiujn oni povas trovi serĉante en „Google bildoj“ laŭ „Čierna nad Tisou 1968“, donas pli pozitivan impreson, sed inter la ekstera publiko Breĵnev eble faris alian mienon ol dum la kunsidoj mem.
[309] Rilate al Kriegel, kiu estis judo kaj havis iom misteran pasintecon, atestantoj de la kunsidoj konfirmis, ke certaj delegacianoj de ambaŭ flankoj traktis lin kun malrespekto, tiel ke oni povis paroli pri „antisemitisma odoro“, kiu regis en la konferencejo. Laŭ Pauer, en la memuaroj de Biľak oni povas trovi plurajn antisemitismajn aludojn pri Kriegel (Pauer, p. 164).
[310] La ĉeĥlingvan tekston de la pritakso de la CK de KPSU de la situacio en Ĉeĥoslovakio de la 29a de julio vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/729.pdf.

Dubček klarigis ankaŭ la diferencojn kun la jaro 1956 en Hungario kaj ripetis la pozitivajn intencojn de la „Agadprogramo“ de la ĉeĥoslovaka KP, konfirmante, ke la ĉeĥoslovaka ekonomio evoluas kontentige. Li promesis, ke la sekvonta partia kongreso reguligos la aferojn en bona ordo kaj ke la ĉeĥoslovaka armeo protektas la limon. Li atentigis, ke oni volas atingi libervolan agnoskon de la gvida rolo de la partio ĉe la popolo kaj ke la elektoj, kiuj estas antaŭvidataj por la venonta jaro, devus havi rezultojn en la intereso de la partio. Fine, Dubček proponis kunvoki renkontiĝon de la COMECON-ŝtatoj kaj komunismaj partioj por trakti demandojn de la sekureco kaj esprimis sian esperon pri amikecaj kaj korporaciaj solvoj de la problemoj.[311]

La diskutoj, kiuj esence konsistis el longaj monologoj de Breĵnev kaj Dubček, baldaŭ troviĝis en la sakstrato, ĉar ambaŭ flankoj restis rigide sur siaj pozicioj.

Ĉefministro Černík aldonis, ke la ĉeĥoslovaka KP intencas daŭrigi la vojon, kiun ĝi komencis en la jaroj 1945-48, kaj ke lia registaro ne koketas kun FRG nek interparolis kun la registaro de ajna kapitalisma lando. La sovetianoj, precipe Breĵnev, Kosygin, Podgornyj kaj Ŝelest, interrompis la klarigojn de la ĉeĥoslovakoj, al kiuj ili starigis diversajn pedantajn demandojn pri principoj kaj detaloj rilate la „Agadprogramon“ kaj la praktikojn de la ĉeĥoslovaka gazetaro, radio kaj televido aŭ pri la „dekstraj“ kaj „maldekstraj“ fortoj“ en la partio. Atendinte solvon de la problemoj en la sovetia senco, en iu momento Breĵnev diris al la ĉeĥoslovakoj: „Mi havas la impreson, de kiu mi ne liberiĝas, ke vi nur ŝajnigas, ke vi faras ion.“

Rilate la gazetaran liberecon, Breĵnev klopodis logi la ĉeĥoslovakojn per ĉantaĝa marĉandaĵo. Li promesis ĉesigi la sovetian kampanjon kontraŭ la ĉeĥoslovaka gazetaro, se la partio kaj registaro reenkondukos ĝian kontroladon. Antaŭ la okuloj de la ĉeĥoslovakaj delegacianoj li telefone vokis la oficistojn en Moskvo, kiuj respondecas pri la aferoj de la gazetaro, kaj ordonis al ili senprokraste ĉesigi la kampanjon, dirante al la ĉeĥoslovakoj: „Nun vi montru, kion vi kapablas fari!“ Ĉi tiu skurila anekdoto, kiun Dubček rakontis en siaj memuaroj, klare ilustras, laŭ kiuj diferencaj manieroj la socioj funkciis tiam en Sovetunio kaj Ĉeĥoslovakio. Eĉ Dubček ne plu povis simple ordoni al la ĉeĥoslovakaj gazetaraj funkciuloj, ke ekde hodiaŭ ili faru tion aŭ jenon aŭ skribu politike lojale.

Dum Breĵnev konstante montris ĉagrenatan mienon, la aroganteco de malnovaj poststalinismaj grandpoenculoj kiel Podgornyj kaj Kosygin konis neniun limon. Podgornyj miris, ke en iuj ĉeĥoslovakaj gazetoj oni publike diskutas pri la temo, kiuj membroj apartenu al la gvidantaro de la partio kaj kiuj restus ekster ĝi. Kosygin sciigis al la ĉeĥoslovakoj, ke iliaj argumentoj ne konvinkas la sovetianojn. Li kritikis la ekonomiajn reformojn kaj precipe retorike atakis ilian ĉefprotagoniston Ota Šik, al kiu li imputis, ke li celas enkonduki la kapitalisman modelon (unue la jugoslavian kaj poste la okcidentgermanan) en Ĉeĥoslovakio. Li instruis la ĉeĥoslovakojn, ke inter la okcidenta limo de Ĉeĥoslovakio kaj ĝia limo kun Sovetunio ne ekzistas diferenco, ĉar tiu limo kongruas kun la limo de la dua mondmilito, de kiu Sovetunio neniam cedos. Per aliaj vortoj, Moskvo konsideris la okcidentan limon de Ĉeĥoslovakio kiel limon de la sovetia imperio. Pro tio en Sovetunio oni kredis, ke oni havis la rajton sendi siajn trupojn al Ĉeĥoslovakio sen demandi iun ajn. Kosygin avertis, ke Sovetunio povus submeti Ĉeĥoslovakion ene de 24 horoj sub sian plenan kontrolon. Tio estis klara minaco al la adreso de la ĉeĥoslovakaj gvidantoj. Kosygin trovis strange, ke nun oni rifuzas la sovetiajn trupojn post kiam pli frue (t.e. post la dua mondmilito) oni ankoraŭ bonvenigis ilin. Li konkludis, ke la ĉeĥoslovakoj devas esti kontraŭ la Varsovia Pakto, kontraŭ la socialismo kaj kontraŭ la amikeco kun la socialismaj landoj.

Smrkovský kontestis la riproĉon de la sovetianoj, ke la politiko de la gvidantoj de la ĉeĥoslovaka KP estas direktata kontraŭ Sovetunio, kaj klarigis al ili, ke la ĉeestanta ĉeĥoslovaka delegacio havas la mandaton de la popolo por defendi la humanigan kaj demokratiigan procezon en la lando, por ke la socialismo ricevu „homan vizaĝon“.

En la dua tago de la konferenco prezidento Svoboda humile dankis al Sovetunio, ke ĝi savis la ĉeĥoslovakan popolon de la pereo en la dua mondmilito, kaj substrekis la signifon de Sovetunio dum la enkonduko de la socialismo en Ĉeĥoslovakio. Kune kun Dubček Svoboda montris sin konvinkata, ke Ĉeĥoslovakio ne povas kaj ne volas ekzisti sen Sovetunio. Post tiu servila deklaro Svoboda tamen savis sian honoron kaj la dignon de la ĉeĥoslovaka popolo, atentigante la sovetianojn, ke la situacio en lia lando estas karakterizata de stagnado kaj ke ekzistas la risko, ke la popolo ĉesos kredi je la socialismo.

[311] La ĉeĥlingvan tekston vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/729_1.pdf.

Li klarigis, ke la ĉeĥoslovaka KP degeneris al pura kaj ordonema ĉefadministristo de la lando, tiel ke estis urĝa tempo okupiĝi pri la solvado de la amasiĝintaj problemoj. Pri la stato de la partio li diris, ke mankas al ĝi memfido, sed la armeon li laŭdis pro ĝia fidindeco. Samtempe li petis la subtenon de Sovetunio. Probable Svoboda ne prezentis ĉiujn facetojn de sia pensado, sed la ĉefa celo de lia parolado estis rifuzi la sovetian hipotezon pri la kontraŭ-revolucio en Ĉeĥoslovakio.[312]

Vasil Biľak evidentiĝis vera fariseo, se li kritikis la grupon ĉirkaŭ Dubček, pri kiu li dubis, ke ili estas veraj komunistoj, kaj aludis, ke ili estas perfiduloj. Li mem prezentis sin viktimo de tiu grupo kaj pardonpetis ĉe la sovetianoj, ke li subskribis la respondon de la gvidantoj de la ĉeĥoslovaka KP al la varsovia letero, kiu cetere ne povis esti kritikata de la ĉeĥoslovaka gazetaro. La „Manifeston de la 2000 vortoj“ li denuncis kiel pamfleton. En Ĉeĥoslovakio regis laŭ lia pritakso la etoso de la spirita teroro kaj timo; la opinio, ke Sovetunio minacas Ĉeĥoslovakion, estis laŭ li trudita al la popolo. Estus bone, se Sovetunio helpus al Dubček kaj al Ĉeĥoslovakio entute, li pledis ambigue. Smrkovský rifuzis la riproĉojn faritajn de Biľak. Kolder aldonis, ke li ne povas konstati, ke la sovetianoj enmiksiĝis en la internajn aferojn de Ĉeĥoslovakio, sed li konfirmis, ke li observas subfosadon kaj degeneron de la partia aparato kaj ke oni faras politikon malantaŭ la kulisoj, kiu estas direktata kontraŭ certaj kamaradoj kiel Indra, Biľak k.a. Li esprimis komprenon por la pozicio de la frataj partioj kaj pledis por sovetia subteno.

Sian (komplete superfluan) komenton pri la aktuala situacio, kiu neniel kontribuis al la solvado de la problemoj, donis ankaŭ Suslov, Ŝelepin, Ŝelest. Iliaj akuzoj kontraŭ la ĉeĥoslovakaj reformistoj estis parte tiel drastaj, absurdaj kaj neelteneblaj, ke Dubček en iu momento proteste forlasis la konferencejon kaj revenis nur kiam la sovetianoj senkulpiĝis kaj denove interfratiĝis. Ambiguan rolon ludis ankaŭ Piller kaj Rigo, kiuj parte denuncis la reformistojn, tiel ke la grupo de Dubček devis senti fortan embarason. Ŝajnas, ke Breĵnev estis malkontenta pri la fluo de la diskuto kaj signalis, ke li intencas mallarĝigi la partoprenantaron de la kunsido kaj limigi la diskuton al la grupo kun Dubček, Svoboda, Černík kaj Smrkovský, ĉar li volas serioze paroli kun la ĉeestantaj politikaj respondeculoj. Flanke de la sovetianoj devis ĉeest nur Breĵnev, Kosygin, Podgornyj kaj Suslov.

Necesas aldoni la klarigon, ke por la ĉeĥoslovaka delegacio ne ekzistis unueca linio por paroli kun la sovetianoj en Čierna. Černík diris en 1990, ke la delegacio ne preparis sin kolektive por tiuj interparoloj, sed ĉiu membro havis la liberecon esprimi sian propran opinion. Biľak plendis, ke Dubček ne submetis sian paroladon al la CK de la partio por ricevi la benon.

Ankaŭ inter la sovetianoj regis nuancataj sintenoj. Ŝajnas, ke ĉefministro Kosygin kaj Suslov preferis pacan solvon, malgraŭ ilia malmola konduto en Čierna, dum Podgornyj, la ŝtatestro, Ŝelest, Kirilenko, Mazurov kaj Pelŝe apartenis al la falkoj kaj pledis por la interveno. Breĵnev, pri kies vera politika influo ekzistis duboj, defendis iun mezan, atendeman vojon, ĝis kiam fariĝis klare, kiu pozicio venkis por povi aliĝi al la opinio de la plimulto en la politburoo.[313]

Dum la sovetianoj komunikadis kun Moskvo per propra telefono, kiu estis je la dispono en ilia trajno, la linio de la ĉeĥoslovaka delegacio estis elŝaltita kaj blokita al la registaro en Prago, kiu siaflanke vane provis telefoni al Čierna. Tio signifis, ke la ĉeĥoslovaka registaro ne ricevis freŝajn informojn pri la evoluo de la interparoloj en Čierna kaj ne povis informi la ĵurnalistojn, kiuj petis aktualajn sciigojn pri la tie okazantaj kunsidoj. Inverse, la ĉeĥoslovaka delegacio en Čierna restis sen informoj pri la aktuala situacio en la lando. Nur Štefan Sádovský, kiu sidis en la Centra Komitato, havis ĉiuvesperan komunikan ligon kun Čierna kaj povis informi la CK-anojn per la magraj scioj, kiujn li ricevis.[314]

Dum la kunsidoj en Čierna la sovetianoj, kiuj aplikis siaspecan taktikon, menciis, ke en Germanio ekzistas granda grupo, kiu planas revenigi la Sudetan landon, do la terenon rande de Bohemio, kaj ke en flugfolioj estis prostulita la rehavigo de Karpata Ukrainio. En la dua kazo temis pri la plej orienta parto, kiu antaŭ la milito apartenis al Ĉeĥoslovakio kaj kiu en 1944 estis aneksita de Sovetunio. La ĉeĥoslovaka flanko ne povis identigi la fonton de tiuj flugolfioj, ĉar neniu partia ĉelo aŭ registara sekcio estis trovita, kiu lanĉis tian kampanjon aŭ eĉ nur alude pensis pri tia intenco. Do, temis pri provoko, kiu estis kalkulita de la sovetia flanko kun la celo meti la ĉeĥoslovakojn sub premo. Sed neniu provoko de la sovetianoj, kiu volis renkonti la tutan ĉeĥoslovakan registaron por ekscii la pozicion de

[312] La historiisto Jan Moravec, kiu povis konsulti la notaĵojn de Svoboda, kiujn li faris en Čierna, raportis, ke li principe aprobis la kritikon de Biľak kaj Kolder kiel „konkretan“ kaj „bonan“.
[313] Brahm, ĉap. II, 6.
[314] Goldstücker, p. 334.

ĝiaj unuopaj membroj, sukcesis skismigi ĝin. Dum Dubček atentigis la sovetianojn, ke ili enmiksiĝas en la internajn aferojn de Ĉeĥoslovakio, Breĵnev perdis la paciencon kaj volis scii la nomojn de la „dekstraj fortoj“ en la supera gvidorgano de la ĉeĥoslovaka KP.[315]

Protokolo pri la du unuaj tagoj estis verkita de propra sovetia stenografistino.[316]

En la tria tago Breĵnev sciigis, ke li sentas sin malbone kaj deziras paroli nur kun Dubček. Ĉi tiu retrovis lin en lia vagono vestita en piĵamo kun lamentado pri laceco, febro kaj kapdoloroj. Poste Dubček kritikos lin, ke li ŝajnigis sin malsana (kion Dubček nomis „diplomatia gripo“). Sed Breĵnev efektive fartis malbone, kiel aliaj atestantoj konfirmis, ĉar li ja staris sub enorma politika premo kaj tial fariĝis pli kaj pli nervoza.[317] Pri tiu plurhora interparolado ne ekzistas protokolo nek stenogramo, sed nur iu redonaĵo de laŭdiraj interkonsentoj kaj iu persona eldiro de Dubček. La interparolado devis esti malfacila, kvankam Breĵnev ne minacis per armea interveno. Ŝajnas, ke Breĵnev komprenis, ke li ne sukcesis ŝanĝi la sintenon de la ĉeĥoslovakaj reformistoj ĉirkaŭ Dubček kaj tial klopodis serĉi ian eliron el la sakstrato. Anstataŭ kvazaŭ-privataj kunvenoj Breĵnev renovigis sian proponon pri pli granda kolektiva konferenco kun la aliaj partioj de la Varsovia Pakto. Tia kunveno ne devis okazi en Moskvo, sed en Bratislavo, Slovakio, la 3an de aŭgusto, kie oni volis alpreni komunan deklaraĵon, cetere sen Rumanio kaj Jugoslavio, pri kies partopreno Dubček pli frue insistis.

La 1an de aŭgusto[318] Breĵnev kaj Dubček resumis la enhavon de la interparoloj en Čierna kaj anoncis, ke ili intencas kunvoki „modestan renkontiĝon“ de la ses frataj partioj en Bratislavo por subskribi komunan deklaraĵon, en kiu ĉiuj partioj proklamos sian lojalecon al la marksismo-leninismo, la socialisma internaciismo kaj la Varsovia Pakto, por demonstri antaŭ la tuta mondo la unuecon de la socialisma tendaro rilate la eksteran politikon. La ĉeĥoslovakan delegacion Breĵnev alvokis serioze konsideri kaj plenumi la interkonsentojn en Čierna kaj trakti la tieajn interparolojn strikte konfidence. En alia kazo li minacis per malagrablaj sekvoj. Same la stenografia protokolo de la interparoloj en Čierna devis esti traktita sekrete kaj konservita en la koncernaj partiaj arkivoj, por ke la okcidentanoj ne havu aliron al ĝi.[319] Ankaŭ la ĉeĥoslovaka gazetaro ne rajtis komenti la kunsidojn de Čierna. Dubček akceptis la admonojn de la sovetianoj, esprimis sian kontenton pri la interparoloj en Čierna, bonvenigis la proponon renkontiĝi en Bratislava, dankis la sovetianojn pro la „esprimitaj internaciismaj sentoj“ kaj pledis por eviti reciprokajn „ofendojn“. Breĵnev finis la „gazetaran konferencon“ per la atentigo, ke la „helpo“ al Ĉeĥoslovakio „jam estas plene preparita“, se la ĉeĥoslovakoj trompos la sovetianojn.[320]

Dubček pensis, ke la situacio estas savita. Li eĉ kredis, ke li gajnis la ludon kun la sovetianoj kaj ke certe venkos la „kolomboj“ anstataŭ la „falkoj“, kiel Šik rimarkigis en siaj memuaroj. Sed tio evidente estis granda memtrompo. La sekretaj servoj de Britio kaj Usono venis al la konkludo, ke en la sovetia politburoo ekzistis nur falkoj.[321] Sed Breĵnev verŝajne konsideris sin packolombo kaj kredis, ke li ricevos la nobelpremion. La fataleco de Čierna konsistis en la diferenca logiko de la komunikado kaj la diverĝa interpretado de la diskutoj. Dum la sovetianoj konsideris siajn klarigojn devigaj interkonsentoj, kiujn la ĉeĥoslovakoj devis serioze respekti kaj plenumi, Dubček kredis, ke Breĵnev esprimas nur personajn opiniojn, kiujn oni povas ignori. Ankaŭ Černík konkludis, ke temis nur pri informaj kunsidoj, ĉar mankis deviga skriba konvencio, kiel li diris post la interveno. Dum la reformistoj, precipe Dubček, do kredis, ke ilia pozicio fortiĝos en la sekvonta tempo, la sovetianoj daŭrigis interne diskuti pri diversaj opcioj kaj solvoj de la ĉeĥoslovaka krizo, kiu por ili ne estis finata, sed tiuj diskutoj restis nealireblaj de ekstere. Mazurov, tiama membro de la sovetia politburoo, kiu ĉeestis la kunsidojn en Čierna, diris en

[315] Schattenberg, p. 471.
[316] La ĉeĥlingvan tekston vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/729.pdf.
[317] Schattenberg, p. 471. Al sia konsilisto Aleksandrov-Agentov Breĵnev diris, ke li demisios kiel ĝenerala sekretario, „se ni perdos Ĉeĥoslovakion“ (Schattenberg, p. 475).
[318] La protokolon de la sesa kunveno vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/801.pdf.
[319] La protokolo de la kunsidoj inter la kvaropoj estis redaktita en Moskvo kaj poste sendita al Dubček por aprobo, kiu miris, ĉar li kredis, ke protokolo ne estis verkita. En intervjuo de 1990 Dubček konfirmis sian impreson, ke tiu protokolo estis manipulita en sovetia senco por ŝajnigi, ke en Čierna klaraj interkonsentoj estis faritaj. Tio igis Dubček-on konstati, ke la senco de la protokolo estis falsita de la sovetianoj. Ankaŭ pri la verkado de protokolo entute regis konfuzo: Dum Dubček ŝajne kredis, ke protokolo entute ne estos farita, la sovetianoj insistis nur pri ĝia sekreta traktado ekster la kunsidoj. Černík poste asertis (en 1990), ke la sovetianoj kolektis la notaĵojn de la delegacianoj, inkluzive la ĉeĥoslovakajn. Tamen la koncernaj notaĵoj de la ĉeĥoslovakaj delegacianoj estis poste trovitaj en la arkivo de la CK de la ĉeĥoslovaka KP.
[320] La ĉeĥlingvan finan dokumenton vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/801_1.pdf.
[321] Pauer, p. 198.

intervjuo 21 jarojn poste, ke la renkontiĝo en Čierna estis koŝmara sperto por la sovetianoj, tiel ke ili maltrankvile revojaĝis al Moskvo.

Dum Dubček kaj aliaj ĉeĥoslovakaj partoprenantoj de la kunsidoj en Čierna akcentis la gravecon de la „egalrajteco, suvereneco, nacia sendependeco kaj teritoria integreco“ de Ĉeĥoslovakio kaj TASS emfazis la signifon de la „nerompebla fideleco al la marksismo-leninismo, de la edukado de la popolamasoj en la spirito de la socialismo kaj proleta internaciismo, de la senkompromisa lukto kontraŭ la burĝa ideologio kaj ĉiuj kontraŭ-socialismaj fortoj“, oni povis klare rimarki la diferencojn inter ambaŭ pozicioj. La ĉeĥoslovakoj kaj sovetianoj parolis pri tute diversaj aferoj, uzante parte eĉ la saman terminologion, pro kio la racia komunikado inter ambaŭ flankoj ne povis funkcii kaj la diskuto perdis siajn sencon kaj utilon kaj estis kondukita al la absurdo, kvankam *Pravda* disvastigis pozitivajn konkludojn pri la konferenco de Čierna (kio nature estis pura propagando, ĉar objektivan analizon de la ekzistantaj problemoj tiu gazeto ne kapablis publikigi). La politikaj kaj ideologiaj diferencoj estis tro grandaj por meti ĉion ĉi sur komunan denominatoron, tiel ke en Čierna aperis gravaj miskomprenoj kaj falsaj, fikciaj kompromisoj, kiuj ne povis esti evititaj, kun fatalaj sekvoj.[322]

Sovetunio dume retiris siajn trupojn el Ĉeĥoslovakio kaj la naiva monda gazetaro entuziasme raportis pri la rezultoj de la ´kuraĝigaj´ interparoloj en Čierna.[323] Podgornyj telefone informis Kádár-on pri la kunsidoj en Čierna. Todor Ĵivkov, la bulgara ĉefo, esprimis publike sian malfidon al la ĉeĥoslovakaj kolegoj, precipe Dubček, Černík kaj Smrkovský, kiuj estis laŭ li „naciistoj, reviziistoj kaj malamantoj de Sovetunio“. Li avertis, ke la sovetkomunisma bloko jam perdis Jugoslavion, Albanion, Ĉinion kaj Rumanion, tiel ke la eksiĝo de Ĉeĥoslovakio el tiu bloko signifus grandan danĝeron ankaŭ por la ceteraj socialismaj ŝtatoj. „Dio helpu nin, se ni eraras“, li elvokis. Ankaŭ la GDR-pintuloj opiniis, ke la grupo de Dubček estas „ruzaj reviziistoj“.[324] Ŝajnis, ke la armea interveno en Ĉeĥoslovakio ne plu estis evitebla.[325]

La interŝanĝo de „frataj“ kisoj (kiujn Dubček tamen sukcesis eviti) inter la partiaj gvidantoj dum la unutaga „plurflanka renkontiĝo inter kamaradoj“ de ĉiuj ses „frataj partioj“ en Bratislavo de la 3a de aŭgusto, ĉefurbo de Slovakio, antaŭ la televidaj kameraoj de la tuta mondo ŝajnigis pacan kaj harmonian aliancon kaj kondukis la observantojn al la (erara) konkludo, ke en ĝi regas plena harmonio kaj ke la „kolomboj“ finfine venkis. La fina rezolucio estis denove verkita en stilo ´ligna´ kaj demagogia, kiu uzis la tipan frazeologion de la orienta bloko, per kiu per kaŝitaj formuloj kaj nebulaj esprimoj estis aluditaj la problemoj, kiujn oni havis kun Ĉeĥoslovakio, sen eksplicite mencii pri kio vere temas. Anstataŭ tio oni kritikis la „subfosan aktivecon“ kaj „agreseman politikon“ de la (usona) „imperiismo“, laŭdis la historiajn atingojn kaj la prosperan evoluon de la socialismo kaj emfazis la „neskueblan batalon kontraŭ la burĝa ideologio kaj la kontraŭ-socialismaj fortoj“. Oni esprimis la solidarecon kun la vjetnama popolo, kiu troviĝis en kruela milito, kontraŭ kiu precipe la komunisma mondo lanĉis laŭtan propagandan kampajnon, akompanatan de la maldekstra okcidenta pacmovado, kondamnis la „agreseman politikon“ de Israelo kaj nomis la „revenĝismon, militismon kaj novnaziismon“ en okcidenta Germanio kaj ties „aliĝon al la agresema imperiisma bloko de NATO“ „danĝero por la monda paco“.[326] La totala prisilentado de la ĉeĥoslovakaj reformoj kaj la cinikaj formuloj pri „helpo“ de la frataj landoj al Ĉeĥoslovakio kaj aliaj avertoj ilustris la verajn intencojn de la sovetianoj, kiuj nur ĝisatendis la momenton de la bato kontraŭ Ĉeĥoslovakio. Do, la interkonsento de Bratislavo ne estis pactraktato, sed nura armistico.[327] En la sama vespero Dubček lamentis en privata interparolo kun Kádár pri la kunsidoj en

---

[322] En diplomatia historiografia eldonaĵo publikigita de Andrej Gromyko en la ĉeĥa lingvo (Praha 1984) la koncerna ero pri la kunsidoj en Čierna tekstis jene: „Dum la renkontiĝo en Čierna nad Tisou en la prezidio de la CK de la ĈKP montriĝis seriozaj diferencoj. Dum la minoritato de ĝiaj membroj senkaŝe elpaŝis per dekstraj oportunismaj pozicioj, la plimulto adoptis principan sintenon kaj deklaris, ke estas necese gvidi decidan batalon kontraŭ la reakciaj, kontraŭ-socialismaj fortoj kaj kontraŭ la tolerema sinteno rilate al la reakcio.“ (Pauer, p. 138 (el la germana lingvo de aK). Povraj legantoj, kiuj devis kredi tian fuŝan analizon!

[323] Schulze Wessel, p. 272-7.

[324] La tuta histerio kaj propagando de la tiamaj GDR-pintuloj kontraŭ Ĉeĥoslovakio ŝajne estis ĝis iu grado pura hipokriteco. Kiel la iama GDRa historiisto Siegfried Prokop asertis (en unu el siaj kontribuaĵoj de sia libro „Die DDR hat´s nie gegeben“, 2017), ke Ulbricht mem simpatiis kun la ĉeĥoslovakaj reformgvidantoj, kies rezisto kontraŭ Breĵnev plaĉis al li (vd. https://alexander-amberger.de/rezension-von-die-ddr-hats-nie-gegeben). Pri tiu aserto oni tamen povas forte dubi.

[325] Laŭ Pauer, p. 135-171 kaj la memuaroj de Dubček.

[326] La ĉeĥlingvan tekston vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/803.pdf.

[327] Brahm, p. 56.

Čierna kaj la metodoj de la timiga diplomatio de la politburo de KPSU, pri kiuj li ne estis kontenta kiel amiko de Sovetunio.

Smrkovský revenis al Prago kun ĝoja mieno kaj la certigo, ke „ni sukcesis kaj venkis“ aŭ simile, kaj ke „nun ni devos plene okupiĝi pri la venonta partia kongreso“. Ankaŭ *Washingon Post* interpretis la bratislavan konferencon kiel sovetian cedon kaj ĉeĥoslovakan sukceson. Eĉ la hungara partiestro János Kádár parolis pri pozitiva turnopunkto en la kverelo ĉirkaŭ la ĉeĥoslovakaj reformoj. Fakte ĉiuj membroj de la ĉeĥoslovaka KP-prezidio dividis tiun optimismon kaj eĉ la skeptikema Ota Šik lasis sin infekti de ĝi, kiel li poste amare konfesis. Kiel Šik multe pli poste eksciis, ĝuste en la tagoj de la bratislava kunveno la preparado de la armea interveno de la Varsovia Pakto estis seninterrompe daŭrigita kaj intensigita. Sed Dubček konstatis, ke li sukcesis „igi la sovetianojn retiri“ siajn poziciojn kaj konkludis, ke „ne plu ekzistas kialo por timi pri nia suvereneco“. Sed la kredo de la ĉeĥoslovakoj pri reala venko nature estis nura iluzio. La GDR-gazeto *Nova Germanio*, kiu ĉiam fidele ludis la moskvan melodion, notis pri tiu kunveno, ke en Bratislavo „la kontraŭaj fortoj de la socialismo en Ĉeĥoslovakio estis repuŝitaj kaj malvenkis, kion ili meritis“, kaj certigis, ke la „ĉeĥa kaj slovaka popoloj“ ricevos adekvatan subtenon de la socialisma tendaro. Do, la bratislava renkontiĝo estis pura cinika teatra komedio, kiu devis trompi la ĉeĥoslovakojn kaj deflankigi la mondan publikon, kiu ne komprenis la kaŝitajn minacojn de tiu interkonsento, de la atento pri la krizo en Ĉeĥoslovakio.

### Per ĉiuflanka premo kaj rapidaj paŝoj survoje al la interveno

Kiel ajn, post la kunvenoj en Čierna kaj Bratislavo, en Ĉeĥoslovakio la publiko kredis, ke la interparoloj estis sukcesaj kaj ke la reformoj povos esti daŭrigataj, sed kun kelkaj modifoj. Ekzemple Josef Pavel, ministro pri internaj aferoj, devis forlasi sian postenon kaj la agado de la grupoj K-231 kaj KAN devis esti malpermesata, se ĝi mem ne ĉesis aktiviĝi. Malgraŭ tiuj intencoj, Breĵnev ne povis konstati principan pliboniĝon de la situacio en Ĉeĥoslovakio, des pli ke en *Rudé právo* oni povis legi, ke „kiel suverena ŝtato kaj egalrajta komunisma partio ni faros nian propran eksteran kaj internan politikon kaj solvos la la demandojn de la disvolviĝo de la socialismo laŭ niaj imagoj“.[328] La 9an de aŭgusto Breĵnev informiĝis pertelefone el Krimeo ĉe Dubček en Prago pri la progresoj, kiuj devis esti faritaj laŭ la interkonsentoj en Čierna, sed Dubček reagis laŭ la kutima nedeviga maniero kaj diris al Breĵnev, ke la sovetianoj ne devas havi zorgojn. Breĵ-nev probable jam rimarkis, ke Dubček supozeble celas ludi katon kaj muson kun li, kion li nature ne povis akcepti. Kádár riproĉis al Dubček, ke li neglektis serioze konsideri la admonojn de la sovetianoj, kiuj kredis aŭ esperis, ke post ilia timiga taktiko en Čierna la konservativa turniĝo baldaŭ okazos en Ĉeĥoslovakio ankoraŭ sub Dubček. Ĉi-lasta celis eviti novajn perturbojn kun la sovetianoj, provante formale kontentigi iliajn postulojn, kaj atendi ĝis la laŭvica partia kongreso, kies okazigo estis planita en septembro, pri kiu li kredis kaj esperis, ke ĝi reguligos la aferojn en lia senco.

En la telefona interparolo kun Dubček, kiu estis registrita,[329] Breĵnev demandis la ĉeĥoslovakan partiestron, kiun li cidire nomis foje „Saŝa“ aŭ „Aleksandr Stěpanovič“ laŭ la rusa maniero, kiamaniere Moskvo povus helpi la plenumadon de la sovetiaj postuloj. Dubček montris komprenon por la sovetiaj zorgoj, sed respondis, ke li ne intencas peti sovetian helpon en la nuna momento. Laŭ sovetia analizo, Breĵnev klarigis al Dubček, ke en Ĉeĥoslovakio la „dekstraj elementoj“ denove provas saboti la komunajn decidojn de Čierna. Kiel en ´surda dialogo´ Dubček konsentis pri tiu problemo kaj aŭskultis la konsilojn de Breĵnev, ke Dubček akceptu la helpon de la „sanaj fortoj“ en la ĉeĥoslovaka partio, kiuj povus helpi lin haltigi la agadon de la dekstraj fortoj. Breĵnev opiniis, ke sen la helpo de la „malmolaj helpantoj“ Dubček ne povos gajni la batalon kontraŭ tiuj fortoj. Aŭ oni savu la „sanktan amikecon kun Sovetunio“ aŭ oni revenu al la malnovaj problemoj, kiuj estis traktitaj en Čierna. Dubček certigis la sovetian gvidanton, ke kun Černík io estas farata por plenumi la interkonsentojn de Čierna. Kiam Breĵnev volis scii, *kiam* la demando de la personaro estos traktita, Dubček anoncis, ke tiu demando devos esti priparolata dum la venonta pleno de la CK, kiu okazos post dek tagoj. La kritikon de Breĵnev li replikis per diversaj promesoj, sed iĝis klare, ke tio estis pura trankviliga kaj prokrasta taktiko, pri kiu Breĵnev iĝis pli kaj pli suspektema.

---

[328] Kamberger, p. 155.
[329] La ĉeĥlingvan tekston vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/809.pdf.

Kelkajn tagojn poste, la 13an de aŭgusto, Breĵnev denove telefonis el Krimeo al Prago, ĉi-foje dum kunsido de la prezidio de la ĉeĥoslovaka KP kaj kadre de intrigo, kiu estis aranĝita de la „sanaj fortoj" de la ĉeĥoslovaka KP-prezidio. Breĵnev postulis, ke Biľak ĉeestu kiel atestanto de la telefona interparolo, sed la ĉagrenata Dubček elektis Smrkovský, tiel ke la „sanaj fortoj", do la Biľak-Indra-Kolder-grupo, la ĉefaj komplicoj de la sovetianoj, ne atingis la celitan efikon. Ĉi tiu telefona interparolo, kiu same estis registrita,[330] okazis principe laŭ la sama modelo kiel la antaŭa, sed ĝi havis evoluon multe pli draman. Ju pli insiste kaj konkrete Breĵnev demandis kiam la interkonsentoj pri la rekontrolado de la gazetaro kaj la ŝanĝoj en la personaro ĉe la pinto de la partio kaj en la ministerio de la internaj aferoj (t.e. sekreta servo) estos plenumitaj, des pli paŭtaj estis la reagoj de Dubček al la urĝiga premo de Breĵnev, kiu ne hezitis riproĉi al la ĉeĥoslovakoj „trompadon". Dubček provis komprenigi al li, ke la decidoj en la partio ne dependas unuavice de li persone aŭ de la prezidio, sed de la CK-pleno entute. Breĵnev respondis, ke li devas konstati, ke la prezidio de la ĉeĥoslovaka KP estas malkapabla solvi la aktualajn problemojn, kaj aldonis la minacon, ke la sovetia politburoo estos devigita alpreni „novajn rimedojn". En sia senespera ĉagreno Dubček diris la fatalajn vortojn, ke la sovetia politburoo decidu la rimedojn, kiujn ĝi konsideras ĝustaj. Malagrable tuŝata de tiu eldiro Breĵnev respondis, ke tia respondo estas „malserioza", kaj Dubček incitite ripetis: „Se vi konsideras nin trompantoj, do alprenu tiajn rimedojn, kiujn via politburoo konsideras ĝustaj." Breĵnev, kiu konsciis pri la fataleco de tiaj vortoj, provis, vane, trankviligi sian „amikon" „Saŝa", dirante, ke li celas por li „nur la plej bonan" solvon. En tia momento kategorioj kiel reciproka fido, sincereco kaj netrompado inter „amikoj kaj fratoj" kaj la emfazado de la graveco de la batalo por komuna afero fariĝis pli esencaj ol suvereneco, sendependeco kaj respektado de ŝtataj limoj.[331] Breĵnev insistis en la nomo de la sovetia politburoo pri ekzakta respondado de ĝiaj demandoj kaj tiel aldone pre-mis la nervoziĝintan ĉeĥoslovakan partiestron, kiu subite parolis pri la intenco demisii kiel partia ĉefo. Ŝajnas, ke Dubček perdis la nervojn. Breĵnev admonis lin, ke li ne „falu en la ekstremon". Sed Dubček ripetis sian intencon demisii kaj atentigis, ke la ĉeĥoslovakaj partiaj gvidantoj povas „propraforte" solvi ĉiujn problemojn. Se la sovetianoj havas alian opinion, ili do alprenu adekvatajn rimedojn. Ĉiujn tiujn klarigojn kaj anoncojn la sovetianoj povis preni laŭvorte en ilia senco. Breĵnev cinike aldonis, ke li bedaŭras, ke en Čierna li ne sciis, ke la prezidio de la ĉeĥoslovaka partio ne plu estas ag- kaj gvidpova organo. Je la fino de la interparolo Dubček konfesis, ke „liaj fortoj estas elĉerpitaj" kaj konfirmis, ke li intencas rezigni pri la posteno de la unua sekretario. Breĵnev probable ricevis la impreson, ke Dubček estas tro streĉata politikisto, kies intencoj estas tro malklaraj kaj nefidindaj por la sovetia flanko. Kvankam Breĵnev ja havis komprenon por la ekscitiĝo de sia ĉeĥoslovaka kolego dum la telefona interparolado, li tamen insistis ricevi klarajn respondojn al la ĝis nun ne solvitaj demandoj. Li proponis, ke Dubček transdonu ilin al la sovetia ambasadoro. Sed kiel supre menciite, Dubček ne vidis en la interparoloj de Čierna iajn devigojn, sed nur intencojn kaj informojn. Per tiu riska sinteno la ĉeĥoslovaka partiestro klopodis eskapi la dilemon, en kiu li fatale troviĝis.[332]

Tri tagojn poste la sovetia politburoo sendis leteron al Dubček, en kiu oni komunikis, ke oni ricevis „neniun respondon" rilate la demandojn pri la restarigo de la kontrolo pri la gazetaro kaj la interkonsentitaj ŝanĝoj en la personaro ĉe la partia pinto. Oni ankaŭ skribis, ke oni ricevis la impreson, ke la prezidio de la ĉeĥoslovaka CK ne prenis la necesan iniciaton en la batalo kontraŭ la dekstraj, kontraŭ-socialismaj kaj kontraŭ-revoluciaj elementoj.[333]

Intertempe, novan ĉagrenon kaŭzis en Moskvo nova statutpropono por la ĉeĥoslovaka KP, kiu celis forstreki la demokratian centrismon,[334] ĉar tiu leninisma heredaĵo ne plu taŭgis por la koncepto de la reformoj.

La 9an aŭ 10an de aŭgusto la partia kolektivo de la verkista asocio sendis al la sovetia ambasadoro leteron, en kiu oni admonis Sovetunion rezigni pri lokado de trupoj en Ĉeĥoslovakio. Ankaŭ 2000 GDR-anoj subtenis tiun alvokon.

La 15an de agusto manovroj de sovetiaj kaj hungaraj trupoj en Hungario, dum kelkaj divizioj de la ĉeĥoslovaka armeo estis translokitaj al okcidenta Bohemio, do proksime al la limo kun la „imperiisma" Okcidento. Per tio oni celis distancigi la ĉeĥoslovakan armeon, gviditan de Martin Dzúr, disde

---

[330] Vd. http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/813.pdf.
[331] Schattenberg, p. 473-4.
[332] Vd. Pauer, p. 204-9.
[333] La tekston vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/817.pdf.
[334] Vd. Brahm, ĉap. I, 16. Pri la signifo de la termino vd. piednoton 203.

la ceteraj trupoj en la orienta landoparto. Ĉar en Ĉeĥoslovakio oni ne informis la publikon pri tiuj manovroj, ekzercoj kaj armeaj aktivecoj, la homaro eksciis pri ĉio-ĉi nur multe pli poste. En Ĉeĥoslovakio do regis ĝenerala optimismo, al kiu kontribuis la vizitoj de Tito, Ulbricht kaj Ceauşescu, kiuj devis kuraĝigi aŭ traŭnkviligi la ĉeĥoslovakan popolon antaŭ la prokrastita ŝtormo.

Lanĉante novan polemikan kampanjon kontraŭ Prago, la 16an de aŭgusto la sovetia gazeto *Pravda* ĉesigis la ´kastelan pacon´, kiu validis depost Čierna kaj Bratislavo, akuzis la ĉeĥoslovakan gazetaron, ke ĝi „misuzas la liberecon de la vorto per instigo per kontraŭ-socialismaj fortoj“ kaj postulis de la ĉeĥoslovaka KP efektivigi la interkonsentojn de Bratislavo.[335]

Akompane al la premo el Moskvo, la gazetaro de la ŝtatoj de la Varsovia Pakto dume lanĉis novan kampanjon kontraŭ la ĉeĥoslovaka reformpolitiko. *Nova Germanio* (*Neues Deutschland*) ripetis la sovetian kritikon, laŭ kiu grupo ĉirkaŭ Dubček ne respektis la interkonsentojn kaj devigojn de Čierna kaj Bratislavo, sed male ke ĝi eĉ pli daŭrigis „sian dekstran kurson“ kaj „kuraĝigis la kontraŭ-socialisman grupon por kaŝi la interkonsentojn antaŭ la membroj de la ĉeĥoslovaka KP kaj antaŭ la ĉeĥoslovaka popolo“. La riproĉoj estis gravegaj: „Ĝi hipokrite akceptis eĉ publike la decidojn de Bratislavo kaj samtempe permesis, ke la kontraŭ-socialismaj fortoj povas lanĉi insidan kampanjon kontraŭ la decidoj de la konsultiĝo de Bratislavo. (…)“ Plue estis skribite, ke „la plano de la kontraŭ-socialismaj grupiĝoj kaj kluboj celis malkomponi la komunisman partion de Ĉeĥoslovakio kaj fari ĝin maltaŭga por la batalo por tiumaniere liberigi la vojon por la celo, al kiu ili strebis: faligi la socialismon por starigi ŝtatkapitalisman reĝimon en Ĉeĥoslovakio, kiu estas orientata laŭ la imperiismaj okcidentaj potencoj.“ La artikolo enhavis plumpajn hipokritajn frazojn pri „la laboristoj de GDR, kiuj „amas la laboremajn kaj bravajn popolojn de la ĉeĥoj kaj slovakoj“, ke „ni konas kaj estimas la grandajn revoluciajn tradiciojn kaj farojn, la signifajn sciencajn kaj kulturajn atingojn de la frata ĉeĥoslovaka popolo“, ke „la popoloj de Ĉeĥoslovakio ne meritis, ke ili estis portitaj de senprincipaj politikistoj al tia danĝero“, ke „ni sentas nin ligataj kun la amikaj kaj aliancataj ĉeĥa kaj slovaka popoloj en bonaj kaj precipe en malfacilaj horoj“ kaj „al la laborista klaso, la kooperativaj kamparanoj kaj la progresema intelektularo (…) ni donas la fratan manon!“ kaj finiĝis per pliaj tiaj frazoj kontraŭ la „agresemaj cirkloj de la imperiistoj, kiuj volas eksporti pere de la tiel nomita nova orienta politiko[336] la kontraŭ-revolucion al la socialismaj landoj de Eŭropo“.[337] Ĉi tiuj linioj donis impreson pri la kurioza oficiala tono, per kiu la poststalinistoj ĉirkaŭ Breĵnev, Honecker kaj kompanio celis pravigi la armean intervenon de la Varsovia Pakto en Ĉeĥoslovakio por ĉesigi la reforman politikon de Dubček, Ota Šik kaj liaj samideanoj.

Samtempe akriĝis la tono en la sovetia gazetaro kontraŭ Ĉeĥoslovakio. Paralele okazis en tiuj tagoj vigla aktivismo de diversaj interparoloj inter la partiaj ĉefoj de la kvin socialismaj landoj. Kádár renkontiĝis kun Breĵnev, kiu feriis kun Podgornyj kaj Kosygin sur Krimeo, por konfirmi, ke la hungara pozicio en principo ne malkongruas kun tiu de la sovetianoj, kvankam li vidis iom aliajn kaŭzojn de la krizo kaj ne volis kompari la situacion kun tiu de la jaro 1956 Hungario. La 16an de aŭgusto la sovetia politburoo venis al la konkludo, ke la politikaj rimedoj estas elĉerpitaj kaj ke Ĉeĥoslovakio bezonas armean helpon. La 16an aŭ 17an generalo I.G. Pavlovskij ricevis de ministro Greĉko la ordonon iri al Legnica en Pollando, kie instaliĝis la ĉefkomandejo de la interveno, por transpreni la gvidon de la operaco „Danubo“. Marŝalo Jakubovskij, kiu faris la tutan praktikan preparadon, instruis lin. Kiel dato de la komenco de la interveno estis fiksita la 21a de aŭgusto, 1a horo matene. La 17an Breĵnev informis la politburoon pri la renkontiĝo kun Kádár kaj la telefonaj interparoloj kun Dubček (kiu prisilentis ilin ĉe la prezidio) kaj avertis pri la „danĝero“, kiu minacus, se la „dekstruloj“ venkus dum la XIVa kongreso de la ĉeĥoslovaka partio. En la sama tago la sovetia politburoo sendis al la prezidio de la ĉeĥoslovaka KP leteron, en kiu estis konfirmite, ke oni ne povas konstati, ke la interkonsentoj de Čierna kaj Bratislavo flanke de la ĉeĥoslovakoj estis plenumitaj. Husák kaj Biľak asertis poste, ke la letero enhavis eksplicitan ultimaton, klaran averton, ke la interveno okazos tre baldaŭ. En siaj memuaroj Dubček neis, ke tiu letero, kiu estis transdonita al li nur la 19an vespere, enhavis ultimaton aŭ tian averton. La „ultimato“ konsistis en tio, ke la aŭtoroj de la letero postulis, ke ĉiuj membroj de la prezidio estu „senprokraste“ informitaj pri ĝia enhavo. La 17an Kádár renkontiĝis kun Dubček en Komárno por provi komprenigi al li la seriozecon de la situacio kaj por eltrovi, ĉu Dubček estas preta ŝanĝi sian sintenon, kion li nature ne faris.[338]

[335] Kamberger, p. 158.
[336] Pri la „nova orienta politiko“ vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ostpolitik.
[337] El la germana lingvo de aK.
[338] La protokolon vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/820.pdf.

Do, post „profunda ĉiuflanka analizo“ de la situacio en Ĉeĥoslovakio fare de la sovetia politburoo, Breĵnev definitive konstatis, ke Dubček kaj lia registaro ne plenumis kaj probable ne plenumos la interkonsentojn, ĉar li „ŝanĝis al la flanko de la dekstruloj“, kaj anoncis, ke la kvin frataj partioj „helpos al la sanaj fortoj per armeaj rimedoj“, ĉar la „nuna okazo estas favora“ por tio.

La sovetia interveno en Ĉeĥoslovakio estis definitive kaj formale decidita dimanĉe, la 18an de aŭgusto en kunsido de la kvin „frataj partioj“ en Moskvo, kiel iu stenografia noto, kiu estis trovita nur post la fino de la komunismo, dokumentas. En tiu kunsido Breĵnev laŭtlegis ankaŭ la misteran leteron de la membroj de la ĉeĥoslovaka prezidio, kiuj petis ĉiuflankan helpon de Moskvo, sen mencii la verajn nomojn de la aŭtoroj (vd. sube). En tio li faris esencan korekton kaj aldonis al la frazo pri „ĉiuj rimedoj, pri kiuj ili disponas“ la vortojn „inkluzive perarmean“ kaj do grave manipulis la leteron, kies aŭtorojn li ne volis nomi. Krom tio, al la letero devis esti aldonitaj la subskriboj de kvindeko da aliaj personoj el la partiaj kaj ŝtataj organoj. Kvankam Breĵnev proponis forstreki la plej lastan alineon pri sekreta traktado, li volis, ke tiu letero estu publikigita en taŭga momento. La tuta planado de la interveno tamen devis resti strikte sekreta.

Poste la unuopaj partiaj ĉefoj ankoraŭ ricevis la okazon esprimi sian vidpunkton. Ĉiuj, t.e. Ulbricht, Ĵivkov, Gomułka kaj Kádár, konsentis pri la sovetia pritakso de la afero kaj ke oni devas helpi al la „sanaj fortoj“ en Ĉeĥoslovakio. Gomułka proponis certigi la helpon al la „sanaj fortoj“, ankaŭ se plimulto por tiu decido ne povos esti akirita en la ĉeĥoslovaka KP-prezidio. La pola partiestro estis konvinkata, ke kelkajn tagojn post la interveno la ĉeĥoslovaka popolo subtenos la maldekstrajn fortojn, kaj proponis liveri al la ĉeĥoslovaka gazetaro „bonajn artikolojn“, kiuj apogu tiun sintenon. Ankaŭ Kádár opiniis, ke oni devas fortigi la propagandon en la radio kaj gazetaro.

La partiaj gvidantoj estis konvinkataj, ke la interveno povos okazi sen grandaj perturboj, sed ili supozis, ke verŝajne okazos diversaj rezistagadoj flanke de la popolo, tiel ke en la unua fazo de la operaco oni devos tuj sekurigi la urbojn kaj la armeajn centrojn. Greĉko devis ordoni, ke oni ne malhelpu al rifuĝintoj trapasi la okcidentan limon, ĉar oni ne scias kion fari kun tiuj homoj, eble „kondamni aŭ pendigi“ ilin, kiel Breĵnev rimarkigis. Se „kontraŭ-revoluciuloj“ volas forlasi la landon, ili iru. Tamen, de la okcidenta flanko neniu estu lasita *en* la landon. Por trajnoj kaj civilaj aviadiloj el la kvin koncernataj socialismaj landoj oni ordonis fermi la limojn. Kosygin avertis, ke la cetera mondo verŝajne ekkrios pro la interveno. Sed oni baziĝis je la certa kredo, ke la Okcidento ne enmiksiĝos per propra interveno. Kaj pri la antaŭvidebla hurlado de la okcidentaj komunismaj partioj, kiuj timas katastrofon por la internacia komunisma movado, se tia perarmea interveno okazos, la sovetianoj ne zorgis.

Post la subskribado de sekreta protokolo, kiu fiksis la konsenton de la partiaj ĉefoj de la kvinopa koalicio pri helpo per armeaj rimedoj, la sovetia politburoo informis, malgraŭ strikte sekreta traktado de la plano, la sovetiajn CK-anojn pri la decido pri la baldaŭa armea interveno en Ĉeĥoslovakio, [339] kiun nek la politikaj nek la armeaj gvidantoj en Prago konsideris ebla.

Dume, Viliam Šalgovič, la ĉefo de la ĉeĥoslovaka sekreta servo, revenis de siaj ´ferioj´ en Bulgario por ekokupiĝi pri la preparado de la interveno. Li havis la taskon fermi la okcidentan limon de Ĉeĥoslovakio. La 18an la homoj, kiuj devis prepari la politikan puĉon, kiu devis akompani la intervenon, konspire kunvenis en Orlík en suda Bohemio, kie ili ricevis telegramon el Moskvo, kiu konfirmis, ke ili ricevos la petitan helpon. Indra, la ĉefa gvidanto de la puĉo, asertis, ke kvar tagojn antaŭ la interveno li ricevis la komunikon pri la definitiva intenco interveni en Ĉeĥoslovakio per armeaj rimedoj en la sovetia ambasadejo de iu nekonata sovetia ĵurnalisto „Saŝa“.

### La mistera(j) „petletero(j)“ al Breĵnev

Lige kun la sovetia interveno en Ĉeĥoslovakio leviĝis ankaŭ la demando pri iu fifama letero al Breĵnev, kiun verkis kelkaj partianoj de la kontraŭ-Dubček-a frakcio de la ĉeĥoslovaka KP por ricevi kaj pravigi la petitan intervenon de la trupoj de la Varsovia Pakto por kontraŭbatali la „kontraŭ-revolucion“ en Ĉeĥoslovakio. La ekzisto de ĉi tiu mistera letero estis ĉiam nur menciita, sed mem neniam prezentita kiel reala dokumento, pro kio okazis vigla diskuto pri ĝiaj troviĝo kaj enhavo. Speciala komisiono, kiu esploris la eventojn en Ĉeĥoslovakio en tiuj aŭgustaj tagoj de la jaro 1968, klopodis akiri ĝin, ĉar ĝi estis

[339] Pauer, p. 222-8.

grava ilo por la prilaborado de la historio. Kiel oni eksciis, ĝi estis sen dato verkita en la rusa lingvo por persone rilati kun la „estimata Leonid Iliĉ“ [Breĵnev]. Laŭ la memoro de Vasil Biľak[340] ĝi estis transdonita al la sovetianoj la 3an de aŭgusto 1968 okaze de la renkontiĝo de kvin ŝtatoj de la Varsovia Pakto en Bratislavo.

En tiu letero estis skribite, ke la „demokratia procezo“ kaj la politika gvido pli kaj li perdiĝas de la kontrolo de la Centra Komitato de la ĉeĥoslovaka KP. La gazetaro, radio kaj televido praktike troviĝas en la manoj de dekstraj fortoj, kiuj eĉ sufiĉe forte influas la publikan opinion. En la politika vivo de la lando komencas sen publika kontraŭstaro partopreni diversaj kontraŭpartiaj elementoj, kiuj disvolvas ondon de la naciismo kaj ŝovinismo kaj provokas kontraŭ-komunisman kaj kontraŭ-sovetian psikozon. En la senco de memkritiko, kiu devus kulpigi aliajn, la subskribintoj konfesis, ke la gvidantoj de la partio faris aron da eraroj. Ili ne kapablis ĝuste defendi kaj realigi la marksismajn-leninismajn normojn kaj la principojn de la demokratia centrismo por la partia vivo. La subskribintoj asertis, ke ankaŭ en la sekvonta tempo la partiaj gvidantoj ne plu scipovos sukcese defendi sin kontraŭ la atakoj kontraŭ la socialismo kaj ne kapablos organizi ideologian kaj politikan rebatadon de la dekstraj fortoj. La politikaj kaj ŝtataj iloj estas jam altgrade paralizataj. La dekstraj fortoj kreis favorajn kondiĉojn por kontraŭ-revolucia renverso. Do, la socialismo estas minacata en la lando. En tiu malfacila situacio la subskribintoj direktiĝis al la sovetiaj komunistoj kaj la gvidantoj de KPSU kaj USSR kun la peto doni efikajn subtenon kaj helpon per ĉiuj rimedoj, kiujn ili havas. Sole per ilia helpo eblas tiri Ĉeĥoslovakion el la minacanta danĝero de la kontraŭ-revolucio. La subskribintoj ankoraŭ aldonis, ke ili konscias, ke tia paŝo por defendi la socialismon en Ĉeĥoslovakio certe ne estos facila por KPSU kaj USSR. Pro tio la subskribintoj klopodos lukti per propraj rimedoj. Se iliaj fortoj kaj ebloj tamen elĉerpiĝos aŭ se ili ne alportos pozitivajn rezultojn, tiukaze la sovetianoj povas konsideri ilian leteron insistaj peto kaj postulo por agi per ĉiuflanka helpo. Lige kun la komplika kaj danĝera situacio en Ĉeĥoslovakio ili petis la sovetianojn trakti la leteron per maksimuma sekreteco.[341]

Kiel supre menciite, Breĵnev laŭtlegis ĉerpaĵojn el tiu letero la 18an de aŭgusto en Moskvo al la kunvenintaj partiaj ĉefoj sen malkaŝi la nomojn de la subskribintoj.

Nu, la letero estis subskribita de Alois Indra, Drahomír Kolder, Oldřich Švestka, Antonín Kapek kaj Vasil Biľak, la ĉefaj komplicoj kaj lakeoj de la sovetianoj en la ĉeĥoslovaka dramo.

Ankoraŭ dum la erao de Gorbaĉov la sovetianoj rifuzis transdoni tiun leteron al la ĉeĥoslovaka registaro malgraŭ insista ripeta petado de ĝia flanko. En julio 1992, do 24 jarojn post la okazaĵo, la rusia prezidento Boris Jelcyn havigis tra speciala ambasadoro al la ĉeĥoslovaka prezidento Václav Havel dosieron kun sep dokumentoj, kiuj troviĝis en la arkivo de la politburoo de KPSU. Ĉefarkivisto R.G. Piĥoja konfir-mis la aŭtentikecon de la dokumentoj. En fermata konverto, kiu surhavis noton de la tiama ĝenerala sek-retario Konstantin Ĉernenko „ne malfermi sen permeso“ aŭ „neniam rajtas esti malfermita“ troviĝis la originalo de la koncerna invitletero.

La dosiero enhavis ankaŭ alian personan leteron subskribitan de Antonín Kapek, membro de la CK de la ĉeĥoslovaka KP, kiu havis similan enhavon kaj kiu estis transdonita jam la 29/30an de julio 1968 al la sovetianoj en Čierna nad Tisou. En tiu letero Kapek denuncis kolegojn Smrkovský, Kriegel, Špaček, Šimon, Císař kaj Slavík, kiuj formis laŭ li „duan centron“, kiu regadas preter la prezidio. Li asertis, ke tiu ĉi grupo strebas kontroli ĉiujn komunikilojn kaj per ili la publikan opinion, kaj skribis, ke ĝi subpremas aliajn, kiuj havas alian opinion. Kapek (kiu estis nur kandidato de la prezidio) petis „fratan helpon“ de Breĵnev por kontraŭbatali la fortojn, kiuj signifas danĝeron por la sorto de la socialismo en Ĉeĥoslovakio.[342]

Aperis onidiroj pri la ekzisto de aliaj tiaj leteroj, kiuj portas la subskribon de aliaj funkciuloj de la ĉeĥoslovaka partio, sed fakte neniaj tiaj leteroj povis esti trovitaj ĝis nun.[343]

---

340 Vd. Bilak, Vasil: Ich rief Moskau zu Hilfe. Der ´Prager Frühling´ aus der Sicht eines Beteiligten (Berlin 2006).

341 Vd. http://www.68.usd.cas.cz/files/studie/Pribeh_zvaciho_dopisu.pdf; http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/803_1.pdf. El la rusa lingvo de aK.

342 Pauer, pp. 176 kaj 193. La originalon de la letero vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/802.pdf.

343 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Einladungsbrief. Kiam la reformkomunisto František Pavliček demandis en oktobro 1968 dum la CK-kunsido en Prago, kiuj personoj subskribis la petleteron al la sovetianoj, li ricevis neniun respondon. Pragaj ĵurnalis-toj esploris dum monatoj kaj trovis, ke naŭ ĉehoslovakoj direktis sub la gvido de la sovetia ambasadoro Ĉervonenko leteron al la Kremlo kun la peto sendi trupojn. Jenaj kvin nomoj estis menciitaj, kiujn publikigis la germana ĵurnalo *Spiegel*

Malgraŭ tiuj ŝajnaj denuncoj kaj perfidoj flanke de la kritikantoj kaj kontraŭuloj de Dubček, la faka literaturo ĝenerale reprezentis la opinion, ke ankaŭ la por-sovetiaj fortoj en la ĉeĥoslovaka KP subtenis la reformpolitikon de Dubček kaj lia grupo.

### La interveno de la trupoj de la Varsovia Pakto en Ĉeĥoslovakio en detaloj, arestado kaj deportado de Dubček kaj de la ĉeĥoslovaka registaro al Sovetunio

La 20an de aŭgusto je la 21a horo sur la flughaveno de Prago-Ruzyně surteriĝis du aviadialoj kun 80 armitaj civiluloj el Sovetunio kaj Pollando, kiuj senprokraste transprenis la kontrolon pri la flughaveno, arestis la teknikan personaron kaj eldonis malpermeson por ĉiuj aviadiloj surteriĝi, escepte de tiuj de la intervenontaj trupoj. La sama operaco okazis samtempe kun la sama celo sur la flughavenoj de Bratislavo kaj Ostravo.[344]

Je la 22a horo la prezidio de la ĉeĥoslovaka KP ekkunsidis en la domo de la sekretariato por trakti du ĉefajn punktojn: la preparon de la kongreso de la slovaka KP kaj la prezenton de la reagoj de la publiko pri la propono de nova statuto por la ĉeĥoslovaka KP, kiu estis publikigita kelkajn tagojn antaŭe. Antaŭ ol komenci la diskuton, Vasil Biľak, unua sekretario de la slovaka KP, kaptis la parolon, riproĉis al Dubček emon al personkulto kaj esprimis sian malŝaton, ke Dubček ĝuas en la partio kaj popolo pli grandan prestiĝon ol ĉiuj ceteraj pintaj funkciuloj. Stenec Mlinac, sekretario pri juraj aferoj, replikis, ke oni ne povas malpermesi la simpation de la popolo por Dubček. Sekvis akra disputo inter Švestka kaj Kolder unuflanke kaj Dubček aliflanke, kiun interrompis Indra, kiu proponis nuligi ambaŭ antaŭviditajn tagorderojn kaj anstataŭe trakti iun dokumenton, kiu estis ellaborita de la grupo Biľak-Indra-Kolder. Dubĉek rifuzis diskuti tiun ellaboraĵon, ĉar ĝi entenis la riproĉon de kontraŭ-revoluciaj agadoj en Ĉeĥoslovakio. Do, oni transiris al la planita tagordo. Je la 22h30 ĉefministro Černík estis telefone vokita de defendoministro Dzúr, kiu komunikis al li, ke la operaco „Danubo“ komenciĝis. La ĉeestantoj estis profunde ŝokataj kaj Dubĉek diris, ke li ne kredis, ke tio povus okazi. Nur Kolder, Indra kaj Švestka, la komplicoj de la sovetianoj, ne estis surprizataj. Post tio Dubĉek laŭtlegis la leteron, kiun li ricevis de Breĵnev, en kiu la sovetia partiestro faris al la ĉeĥoslovakaj gvidantoj la riproĉon, ke ili ne respektis la interkonsentojn de Čierna, sed en ĝi mankis aludo pri armea invado kontraŭ Ĉeĥoslovakio, do Dubček ne povis imagi tian operacon. Do longe ignorinte „onidirojn pri la invado“, Dubček konfesis, ke tio estas la „tragedio de lia vivo“, kaj li komencis plori. Dubček skribis en siaj memuaroj, ke li daŭre atendis televonalvokon, per kiu oni diros al li, ke ĉio estas nura granda miskompreno

La trupoj de la Varsovia Pakto, kiuj devis invadi Ĉeĥoslovakion kadre de la „operaco Danubo“, kiu aspektis kiel fulma milito kontraŭ Ĉeĥoslovakio, rememoriganta la invadon de la lando fare de la germana armeo en marto 1939 por likvidi „rest-Ĉeĥion“,[345] venis el norda, orienta kaj suda direktoj kaj rapide moviĝis okcidenten kaj kontraŭ la ĉefurbo Prago mem. La unuaj sciigoj pri la invado, kiujn iuj loĝantoj ricevis en Prago, venis el Bärenstein kaj Zinnwald ĉe la GDR-limo, kie iuj civiluloj observis la scenojn. La operacon inaŭguris 250 transport-aviadiloj plenaj de armiloj kaj paraŝutistoj, kiuj estis akompanitaj de 550 militaviadiloj.

La 1a sovetia armeo de gvardiaj tankoj kun kvar sovetiaj divizioj kaj la 11a motorizata pafista divizio de la Nacia Popolarmeo de GDR el Halle moviĝis tra Karlovy Vary kaj Plzeň ĝis Budějovice.

La 20a sovetia gvardia armeo kun kvin sovetiaj divizioj (inter ili unu surteriĝa divizio) kaj la 7a tanka divizio de GDR el Dresdeno okupis Pragon.[346]

---

n-ro 48/1968: Karel Hoffman, Miroslav Sulek, Pavel Auersperg kaj Bohumil Chňoupek, (vd. http://www.spiegel.de/spiegel/print/d-45922020.html. Nur dum la kunsido de la CK de la ĉeĥoslovaka KP, kiu okazis la 11an de decembro 1970, estis publikigita iu letero kun la plena nomlisto. (vd. http://www.spiegel.de/spiegel/print/d-43380541.html). Ŝajnas, ke oni precipe celis damaĝi al Husák, kiu ne subskribis la leteron, por embarasi lin.

[344] Kamberger, p. 10.

[345] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Zerschlagung_der_Rest-Tschechei.

[346] Koncerne la (mal)partoprenon de la GDR-armeo ekzistas konfuzo ĝis hodiaŭ. Laŭ *Spiegel*, 20a de aŭgusto 2008, tiu 11a motorizata pafista divizio de NVA, kiun BND volis esti vidita en la regiono de Budějovice, restis en GDR. La GDRaj tankoj estis haltigitaj antaŭ la limo laŭ ordono de la sovetianoj. Sed atestantoj raportis, ke la 21an de aŭgusto 1968 minimume 70 GDR-tankoj, kies personaro parolis germane, estis viditaj sur ĉeĥoslovaka teritorio. Oficiroj de la GDR-armeo garantiis, ke la sovetianoj povis glate ataki la najbaran landon. Pri la malpartopreno de la GDR-armeo en la invado mem estis menciitaj diversaj eblaj kialoj. Ŝajnas, ke la sovetianoj volis eviti, ke oni komparu la situacion kun la jaro 1939, kiam germanaj trupoj

Per kvar divizioj la pola armeo moviĝis tra la pasejoj de la Sudeta montaro kontraŭ norda Bohemio kaj Moravio.

Kvin sovetiaj divizioj okupis Slovakion.

20 sovetiaj aviadilaj regimentoj de la 23a aerarmeo el la sudo de GDR okupis ĉiujn flughavenojn en Ĉeĥoslovakio.

Unu bulgara regimento estis transportita sur sovetiaj ŝipoj trans la Nigra Maro kaj, ĉirkaŭante Rumanion, kiu rifuzis partopreni en la operaco, estis veturigita per fervojo de Odeso en la regionon de la operaco.[347]

Sume, la operacon partoprenis 300-400 (aŭ 500) mil soldatoj el Sovetunio kaj 70-80 mil el Pollando (24), Hungario (17) kaj Bulgario (2).[348] Laŭ Dzúr, entute 650´000 soldatoj de la Varsovia Pakto invadis la landon.[349] La invadon akompanis 6300, laŭ alia fonto 7500 tankoj (de tiuj estis 2000 sovetiaj), 800-1000 aviadiloj kaj pli ol 2000 alispecaj armitaj aŭtomobiloj.

Laŭ iuj raportoj, la hungara registaro, kiu klopodis haltigi la intervenon, estis informita de la ĉefkomandisto de la Varsovia Pakto pri la ordono al la hungaraj trupoj nur post la komenco de la operaco.[350]

La ĉeĥoslovaka registaro decidis rezigni pri armea kontraŭstaro (kvankam defendoministro Dzúr iam antaŭe fanfaronis, ke Ĉeĥoslovakio teorie kapablus defendi sin kontraŭ atako de la armeoj de la Varsovia Pakto), ĉar tio estis konsiderita kiel senperspektiva. Male, la ĉeĥoslovaka armeo obeis la ordonojn de la sovetianoj. Dzúr ordonis al siaj trupoj resti en la kazernoj, rezigni pri la apliko de armiloj kaj disponigi sian apogon al la sovetiaj trupoj. Ĉiuj ĉeĥoslovakaj armeaj aviadiloj ricevis malpermeson flugi. La ĉeĥoslovaka armeo devis esti senarmigita. Greĉko elpuŝis krudan minacon kontraŭ sia ĉeĥoslovaka kolego Dzúr kaj anoncis, ke li „pendigos lin ĉe la plej proksima arbo", se liaj armeanoj komencos pafi kontraŭ la intervenantaj trupoj. Kaj li minacis ankaŭ, ke la sovetianoj brutale reagos, se oni ne respektos iliajn ordonojn kaj blokos la trafikon de la ĉeĥoslovaka fervojo senkonsidere pri la sekvoj por la provizado de la civila loĝantaro per varoj kaj nutraĵoj. Aktivan reziston la sovetianoj estus konsiderintaj kiel efektivan „kontraŭ-revolucion".[351]

Antaŭ ol disiri kvaronon antaŭ la 2a horo, la CK-prezidianoj ankoraŭ reagis kaj verkis oficialan komunikon, kiu devis estis laŭtlegita en la radio. En tiu komuniko la prezidio de la ĉeĥoslovaka KP kondamnis la intervenon laŭ decido, kiu estis farita de ĝi per 7 poraj kaj 4 kontraŭaj voĉoj.[352] Iuj prezidianoj restis en la konstruaĵo de la partio, dum ĉefministro Černík veturis al sia rezidejo, kiun sovetiaj fortoj komencis okupadi.[353]

Je la 2a horo matene Radio Prago disaŭdigis la unuan komunikon pri la invado, kiu havis jenan tekston: „Hieraŭ, la 20an de aŭgusto 1968, ĉirkaŭ la 23a horo, taĉmentoj de Sovetunio, Pola Popola Respubliko, Germana Demokratia Respubliko, Hungara Popola Respubliko kaj Bulgara Popola Respubliko transiris la limon de Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko. Ĝi okazis sen la scio de la prezidento de la respubliko, de la prezidanto de la Nacia Asembleo, de la ĉefministro kaj de la unua sekretario de la CK de la ĉeĥoslovaka KP kaj de la respondecaj organoj. (…) La prezidio de la CK de la ĉeĥoslovaka KP postulas de ĉiuj civitanoj de la respubliko resti trankvilaj kaj ne kontraŭstari la taĉmentojn. Pro tio ankaŭ la taĉmentoj de la armeo kaj de la popola milico ordonis rezignis pri rezisto. La CK de la ĉeĥoslovaka KP konsideras tiun agon rompo de la rilatoj inter socialismaj ŝtatoj kaj lezo de la fundamentaj principoj de la internacia juro. Ĉiuj funkciuloj de la ĉeĥoslovaka KP restas en siaj funkcioj, al kiuj ili estis elektitaj laŭ la validaj leĝoj. La konstituciaj organoj senprokraste kunvokis la Nacian Asembleon. La CK de la

okupis Ĉeĥoslovakion per tankoj. Laŭ V. Falin, tiu rezigno estis ligata kun la neklara internacijura statuso de GDR. Gomułka kaj la sovetia generalo Mazurov parolis pri tio, ke Indra kaj Biľak petis, ke GDR-trupoj ne partoprenu la intervenon.

347 Vd. https://www.spiegel.de/spiegel/print/d-45950113.html.

348 Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Warsaw_Pact_invasion_of_Czechoslovakia. Mapon de la operaco vd. sub https://www.truppendienst.com/themen/beitraege/artikel/einsatz-des-bundesheeres-waehrend-der-krisenhaften-situation-in-der-cssr-1968/#page-1.

349 Csizmas, p. 94.

350 Csizmas, p. 108-9.

351 Pauer, p. 228-33.

352 Kontraŭe voĉdonis Biľak, Kolder, Rigo, Švestka.

353 Kamberger, p. 9-12.

ĉeĥoslovaka KP kunvokas la plenon de la CK por analizi la situacion. Ni do estas okupataj, karaj amikoj (…). Ni estas konvinkataj, ke vi ĉiuj restos trankvilaj kaj post kelkaj horoj iros kiel kutime al via laboro. Tio nun vere estas la sola eblo.“[354] En la sekvantaj horoj la sama radiostacio ripetis la alvokon al la civitanoj, ke ili restu trankvilaj kaj iru labori.

Radio Bratislavo ĉesigis siajn elsendojn kaj disaŭdigis rusan programon! En la slovaka ĉefurbo cirkuladis flugfolioj, kiuj anoncis, ke oni liberigas la popolon de la kontraŭ-revoluciuloj.

Je la 3a horo matene sovetiaj marinfanteriaj paraŝutistoj sturmis la oficejojn de Černík kaj arestis la ĉefministron. Aliaj blokis la oficejon de Dubček.

Antaŭ la konstruaĵo de la CK amasiĝis plurcent aŭ kelkmil homoj portantaj naciajn flagojn kaj kantantaj la Internacion aŭ la nacan himnon, vokante la nomon de Dubček. Soldatoj pafis en la aeron, sed unu junulo estis trafita de kuglo kaj forpasis. Je la 4a horo kontraŭ la domo de la CK veturis nigra Volga-limuzino en kolono de tankoj el norda direkto trans la Hlávka-ponto. La kolono kunpuŝiĝis kun la tie starantaj homoj kaj la sovetianoj pafis per fusiloj. Unu civilulo estis mortigita. Post tio paraŝutistoj kun fusiloj saltis el la veturiloj kaj ĉirkaŭis la domon, kiu estis ĉirkaŭita de sovetiaj trupoj. Ĉiuj telefonoj en la CK ĉesis funkcii. Taĉmento de soldatoj penetris en la domon.

Je la 5h25 la radiostacio „Vltava“, kiu estis instalita de la okupaciaj trupoj (apud Dresdeno!), disvastigis en ĉeĥa kaj slovakaj lingvoj komunikon de TASS pri la operaco. En ĉi tiu komuniko estis dirite, ke la interveno okazis surbaze de „peto de partiaj kaj ŝtataj funkciuloj de Ĉeĥoslovakio al la adreso de Sovetunio“, kiuj deziris „urĝan helpon al la ĉeĥoslovaka frata popolo ankaŭ per armeaj rimedoj“. La interveno estis pravigita per la fakto, ke en Ĉeĥoslovakio okazis „konspiro“ flanke de „kontraŭ-revoluciaj fortoj“ kaj ke ekzistas la „konstitucia“ kaj „internacia devo“ eviti la kontraŭ-revolucian danĝeron en „la intereso de la sekureco de la socialismaj landoj“ se necese per la „rajto de la individua kaj kolektiva memdefendo“ por sekurigi „la pacon en Eŭropo“, kiu estas minacata de la „militismo kaj revenĝismo“, ktp. La komuniko ankaŭ emfazis, ke la interveno „ne direktiĝas kontraŭ unuopa ŝtato“, sed sole „servas al la afero de la paco“, kaj promesis, ke la intervenintaj trupoj estos retiritaj tuj kiam la kontraŭ-revolucia danĝero estos forigita.[355] La sama radiostacio disaŭdigis aliajn plumpajn propagandaĵojn kontraŭ la ĉeĥoslovakaj „provokistoj“.

Intertempe la sovetia ambasadoro en Prago, Stepan Ĉervonenko, aperis en la praga kastelo kaj „informis“ prezidenton Svoboda pri la interveno. Tiu sambasadoro, kiu krude enmiksiĝis en la internajn aferojn de la ĉeĥoslovaka politiko, kie li povis, forĝante perfidajn intrigojn kontraŭ la ĉeĥoslovakaj gvid-organoj, al kiuj li klarigis, ke la sovetianoj sentis sin trompitaj en Čierna, kio kondukis al la decido pri la interveno, „proponis“, ke la nova ĉeĥoslovaka registaro estu formata de Svoboda kiel ĉefo kaj Štrougal kaj Lenárt kiel liaj anstataŭantoj. Puĉisto Indra postulis, ke prezidento Svoboda estu senprokraste konfirmita kiel ĉefo de „revolucia laborista kaj kamparana registaro“. Kiel nova partiestro estis antaŭvidita Drahomír Kolder. Je la 6a horo I.G. Pavlovskij veturis kun Indra kaj Lenárt sur la Pragan kastelon por ricevi la konfirmon de Svoboda pri la formado de nova registaro. Svoboda konsideris la informon pri la demisio de Černík kiel fakton kaj komencis kun la puĉistoj diskuti pri la formado de nova registaro. Laŭ alia fonto, Svoboda montris al Lenárt kaj lia akompananto la pordon. La registaron kaj la prezidion de la parlamento li petis rezigni pri oficiala protesto kontraŭ la interveno.

Sed la prezidio de la ĉeĥoslovaka parlamento disvastigis oficialan komunikon al la ĉefministroj kaj parlamentoj de la kvin intervenintaj ŝtatoj, en kiu ĝi plendis pri la „senkiala okupado de nia respubliko“, kiun ĝi nomis „lezado de la suvereneco de nia ŝtato, kiu estas neakceptebla por niaj estontaj rilatoj“ kaj „postulis de ili ordoni la senprokrastan retiron de ĉiuj trupoj troviĝantaj sur la tuta ĉeĥoslovaka teritorio“. Radio Budějovice disvastigis similan rezolucion,, kiu redonis la vidpunkton de la parlameno kaj registaro, neante la ekziston de kontraŭ-revolucio, kaj konfirms, ke oni apogas la elektitajn politikajn gvidantojn.[356]

---

[354] Kamberger, p. 20. Esperantigo de aK.

[355] La ĉeĥlingvan tekston vd. sub http://www.68.usd.cas.cz/files/dokumenty/edice/821_1.pdf; la germanan tradukon oni trovas ĉe Kamberger, p. 13-14. En tiu perfida demagogia komunikaĵo la aŭtoroj i.a. asertis, ke iuj dekstraj ekstremistoj atakis la konstruaĵon de la sekretariato de la ĉeĥoslovaka KP en Prago, sen mencii pliajn detalojn. Detalan juran analizon de tiu komuniko vd. ĉe Csizmas, p. 94-100.

[356] Kamberger, p. 21.

Je la 7h30 la ĉeĥoslovaka radio anoncis, ke la ĉefurbo estas ĉirkaŭata de sovetiaj tankoj. Eksonis la unuaj pafoj el la direkto de la radiostacio. La sovetianoj pafis kontraŭ la fasadoj de iuj domoj por dispeli la homojn, kiuj alkuris, okupante sovetiajn tankojn kaj kamionojn, ĵetante ŝtonojn kontraŭ la tankoj kaj vokante „faŝistojn!“ „Dubček, Dubček!“, „Svoboda!“, „Vivu la libereco!“, „Vivu la respubliko!“, „Sovetianoj foriru!“ ktp.

La oficiala komuniko al „ĉiuj civitanoj kaj civitaninoj“ pri peto helpi al Ĉeĥoslovakio, kiu pentris la danĝeron de intercivitana milito kaj alvokis la popolon apogi la intervenantajn trupojn kaj kiu devintus esti publikigita nome de la CK de la ĉeĥoslovaka KP, de la registaro kaj de la Nacia Asembleo de Ĉeĥoslovakio,[357] ne sukcesis forlasi la oficejon de la ĉeĥoslovaka novaĵagentejo ČTK. Kaj Miroslav Sulek, la ĝenerala direktoro de tiu agentejo, estis malhelpita de la propraj kunlaborantoj publikigi proklamaĵon pri la akaparo de la povo fare de „revolucia laborista kaj kamparana registaro“. Tiel okazis, ke tiu longeta kaj embarasa komuniko, kiu akre atakis la „fortojn“, kiuj lastatempe „agis kontraŭ la interesoj de la partio“, „misuzis la celojn de la partio“ kaj intencis „diskrediti ĝin“ ktp., ne fariĝis publika kaj iusence restis sekreta, dum la sciigo pri la malaprobo flanke de ĉiuj registaraj organoj rapide disvastiĝis.

Švestka, la konservativa ĉefredaktoro de la gazeto *Rudé právo*, same fiaskis, kiam li provis produkti specialan numeron kun iu „bonvenigo“ de la Ruĝa Armeo. Anstataŭ tio, *Rudé právo* publikigis deklaraĵon, en kiu estis skribite, ke Dubček, Svoboda kaj Černík daŭre ĝuas la subtenon de ĝiaj redaktoroj. La sekvonta eldono de la gazeto, kiu ricevis novan ĉefredaktoron kaj ne plu povis libere raporti, tamen ne estis distribuita de la poŝto. Tagmeze fariĝis konate, ke ankaŭ la konstruaĵo de la redakcio de tiu gazeto estis okupita. Ĉefredaktoro Švestka forlasis ĝin en akompano de sovetiaj soldatoj.

Je la 8h15 Svoboda parolis en la radio, diris, ke li ne disponas pri novaj informoj (!), kaj alvokis la popolon resti trankvila kaj saĝa. Lia elpaŝo iusence rememorigis la senhelpan vekrion de Imre Nagy en oktobro 1956 en Hungario. Post tio Radio Prago silentiĝis, ĉar ĝi estis fermita. Anstataŭ Radio Prago aŭdeblis la radiostacioj en Plzeň kaj Ùsti por ripeti la alvokon, ke la popolo restu trankvila. Radio Plzeň, la „plej lasta libera radiostacio de Ĉeĥoslovakio“, anoncis, ke ne estas vere, ke la ĉeĥoslovaka registaro petis la helpon de Sovetunio, kaj neis la ekziston de kontraŭ-revolucio. Ĝi dissendis alvokon interrompi la laboron dum du minutoj kaj sonigi la sirenojn je la 12a horo de tiu tago por protesti kontraŭ la invado. La alvoko estis aŭdita en multaj lokoj kaj la striko fakte realiĝis. Radio Gottwaldov sendis alvokon al UN. La ĉeĥoslovaka radio instalis sub la gvido de sia iama gvidanto Zdeněk Hejzlar moveblan stacion, kiu informis la popolon pri la eventoj, ĉar tra la oficialaj kanaloj la popolo estis mise aŭ entute ne informita pri la okazaĵoj. Krome ekfunkciis iuj pirataj radiostacioj, kiuj ne povis esti tute elŝaltitaj de la sovetianoj. Tiuj kaj aliaj radiostacioj estis aŭskulteblaj en Germanio kaj do povis liveri kelkajn magrajn informojn pri la aktuala situacio en Ĉeĥoslovakio eksteren al la okcidenta mondo. Inverse, la aŭstra radio disaŭdigis novaĵojn per kurtondoj al Ĉeĥoslovakio por informi la publikon pri la evoluo en la lando. Inter la novaĵoj miksiĝis ankaŭ konfuzaj onidiroj, ekzemple ke Kosygin kaj Greĉko demisiis aŭ eĉ ke Dubček mortis.[358]

Dum la nokto validis malpermeso por la homoj troviĝi sur la stratoj. En tiuj horoj la sovetianoj ricevis la rajton pafi kontraŭ ĉiu persono, kiu malrespektas tiun malpermeson. Matene, en la centro de Prago centoj aŭ miloj da ĉefe junaj homoj kolektiĝis ĉe la konstruaĵo de la radio por starigi barikadojn, kiuj devis protekti ĝin kontraŭ la alvenontaj tankoj, kiuj abrupte akcelis sian rapidecon, elpuŝante bluan benzinan fumon, kaj perforte kontraŭveturis la homojn. Je la 9a horo sovetiaj trupoj enpentris la konstruaĵon de la radio malgraŭ la barikadoj, kiuj konsistis el malplenaj ŝarĝkamionoj, busoj kaj tramoj, kiuj estis platigitaj de sovetiaj tankoj. Iuj tankoj estis bruligitaj de la ĉeestantaj defendantoj, kiuj ankaŭ saltis sur la tankojn por diskuti kun ĝiaj stirantoj, kiuj kaŝiĝis en sia monstro, kaj por demandi ilin kial ili venis al Prago. Sed la sovetiaj soldatoj tute ne volis diskuti kun la praganoj. Male, la sovetianoj minacis la protestantojn per pafado, kiel ilustras foto de oficiro, kiu montras sian pistolon sur la turo de la tanko.[359] Al la sovetiaj soldatoj oni montris paskvilajn desegnaĵojn por komprenigi al ili, ke ili ne estas bonvenaj.[360] Kontraŭ la fremdaj trupoj oni aplikis sloganojn kiel „Ivano iru hejmen!“, „Lenin vekiĝu!“, „Breĵnev freneziĝis“, „Liberecon, suverenecon, socialismon!“ k.s. Sur iujn tankojn oni desegnis naziajn

---

357 Plena teksto ĉe Kamberger, p. 14-19.

358 Kamberger, p. 29-33.

359 Vd. la fototabelon en la libro de Reitzner.

360 Brahm, p. 83.

simbolojn.[361] Tabuloj, kiuj indikis la nomojn kaj numerojn de la stratoj, estis malmuntitaj. Okazis ankaŭ sidaj strikoj por malhelpi la traveturon de la tankoj. Iuj protestantoj estis arestitaj. La Placo de Vaclavo transformiĝis al vera batalkampo. Aŭdiĝis enorma bruo de tankoj kaj kunpuŝitaj objektoj, krioj de homoj kaj pafado. La fasado de la Nacia Muzeo estis difektita de tanka pafado. En iuj domoj eksplodis incendio. Kiam Svoboda plendis ĉe la rusoj pri la pafado en la stratoj de Prago, ili respondis al li, ke Breĵnev malpermesis pafadon kontraŭ homoj kaj ordonis, ke la interveno devas okazi en trankvilo. Malgraŭ tio, iuj homoj mortis en tiuj horoj, ĉu pro pafado aŭ pro akcidento ne estas klare.

Kompreninte la neantaŭviditajn paneojn, la puĉistoj, t.e. Biľak, Kolder kaj Indra, kvazaŭ fuĝis en la sovetian ambasadejon, kie ili konsultiĝis kun generalo I.G. Pavlovskij, la armea gvidanto de la interveno, kiu intencis proklami la militan staton, kiun la puĉistoj tamen povis eviti. Laŭ Biľak, Breĵnev reagis kun mirado kial eblis, ke la „marksismaj-leninismaj fortoj“ permesis, ke la „kontraŭ-revoluciaj fortoj“ dume venkis. Ĉar ŝtata renverso ne okazis laŭ la plano de la sovetanoj, la puĉistoj ankoraŭ provis savi la situacion, disvastigante la aserton, ke Dubček kaj Černík demisiis de siaj postenoj kaj ke necesas formi novan registaron. Serĉante novan fundamenton de la potenco, la puĉistoj vizitis la kunvokitan kunsidon de la CK de la ĉeĥoslovaka KP, kiu okazis en la hotelo „Praha“, kie anstataŭ la tuta CK kolektiĝis nur kvindeko da membroj, inter kiuj estis kaj simpatiantoj de la puĉistoj kaj adeptoj de Dubček. La simpatiantoj de la puĉistoj esperis, ke la CK revizios la decidon de la prezidio pri la malaprobo de la interveno, sed ili trompiĝis. Anstataŭ tio, tiu rest-parto de la CK, kiu estis decidpova, konfirmis en rezolucio la malaprobon de la interveno fare de la prezidio. Dum unu parto de la CK-anoj poste kuris al la kunvokita partia konferenco, la alia transiris al la parlamentejo. Laŭ tiu maniero la malnova CK dissolviĝis kaj montriĝis ne plu funkcipova en tia gravega historia momento.

Posttagmeze, ĉiuj gravaj konstruaĵoj kaj strategiaj punktoj en Prago estis okupitaj de la sovetianoj: la ministerioj de la internaj kaj eksteraj aferoj kaj de la defendo, la Praga Kastelo, kiu estis la rezidejo de la ŝtatprezidento, eĉ la domo de la ĉeĥoslovaka verkista asocio en Prago kaj nature la limpunktoj al Germanio. Turistoj troviĝintaj en Prago fuĝis en la ambasadejojn de siaj landoj por trovi protekton.

Kvankam la ĉeĥoslovaka ĉefurbo estis okupata de sovetiaj tankoj, ĉirkaŭata de sovetiaj raketaj taĉmentoj, la trajna trafiko haltigita (kaj ree normale funkciis nur kelkajn tagojn poste), la taksioj ne veturis kaj la entreprenoj ĉesis funkcii, la moskva gazeto *Pravda* karakterizis la situacion en la urbo „normala“.[362]

Kiel Heinrich Böll (1917-85), kiu restadis en tiuj tagoj en Prago, atestis, paniko ne regis en la urbo. Sed la restoracioj estis fermitaj kaj alkoholaĵoj ne aĉeteblis en publikaj lokoj por eviti, ke la pragaj ebriuloj kunpuŝiĝas kun la sovetiaj trupoj. Antaŭ la naskiĝdomo de Franz Kafka staris tanko, kiu direktis sian tubon kontraŭ la busto de la verkisto.[363]

La 22an generalo Pavlovskij premis la ĉeĥoslovakojn per ultimato, kiu postulis enoficigi novan registaron, al kiu devis aparteni Lenárt, Indra, Biľak, generalo Riti, Barbírek, Kolder kaj Švestka. La ultimato ne estis respektita kaj perdis sian signifon. La anoj de la rest-CK rifuzis tiujn provojn kaj proponojn ŝanĝi la gvidantaron kaj anstataŭ la ´nova´ ĉeĥoslovaka registaro prezentiĝis la malnova.

Je la naŭa horo sep aŭ ok sovetiaj paraŝutistoj kaj unu aŭ du malaltrangaj oficiroj aperis en la oficejo de Dubček, fermis la fenestrojn kaj blokis la pordojn. La sceno aspektis kiel armita rabatako. Kiam Dubček volis preni la telefonon probable por plendi ĉe la sovetia ambasadoro, sed unu el la soldatoj direktis la pafilon kontraŭ li kaj deŝiris la kablon. Kelkaj partiaj kolegoj troviĝis en la oficejo, almenaŭ Smrkovský, Kriegel, Špaček, Sádovský kaj Šimon. La pordo krude malfermiĝis kaj aperis kelkaj pli atrangaj oficiroj de KGB plus sovetia tradukisto. Malgranda sovetia kolonelo inter ili klarigis, ke li prenos la ĉeestantajn personojn „sub sian protekton“.´Iu KGB-oficiro ordonis al Dubček, Smrkovský, Kriegel kaj Špaček sekvi lin. Ili estis kondukitaj en la oficejon de Čestmír Císař, kiu mem malaperis, kie pluraj sovetiaj oficiroj plus kelkaj civiluloj atendis ilin – temis pri anoj de la propra sekureca servo, kiuj devis aresti Dubĉek-on kaj liajn kolegojn. Unu el ili diris per monotona voĉo: „Mi arestas vin en la nomo de la laborista kaj kamparana registaro, gvidita de kamarado Indra.“ Krom tio li anoncis, ke oni

---

[361] Brahm, p. 83.
[362] Kamberger, p. 52.
[363] Böll, Heinrich: Der Panzer zielte auf Kafka. En: Gruša, J., Kosta, T.: Prager Frühling – Prager Herbst. Blicke zurück und nach vorne. Köln 1988. p. 11-24.

prezentos la arestitojn al iu „revolucia tribunalo“, kies prezidanto estos la sama kamarado Indra, unu el la ĉefaj komplicoj de la sovetianoj. Dum Dubček diris, ke tio ne havas sencon, la ribelema Smrkovský, kiu estis konata pro sia retorika talento, protestis kaj demandis pri la leĝa statuso de tiu tribunalo. Du horojn poste aperis alia KGB-oficiro kaj ordonis al Dubček sekvi lin. Ili atingis iun korton, en kiu staris tankoj kaj aliaj armeaj veturiloj. Al Dubček oni ordonis eniri tian veturilon, kiu estis grandega kaj havis ok radojn. Iom poste ankaŭ Kriegel estis puŝita en la veturilon, kiu ekmoviĝis. Post la tagmezo ili atingis la flughavenon Ruzyně (kie ankaŭ troviĝis fifama prizono), kie oni kondukis Dubček-on en iun oficejon, dum en apudaj ĉambroj estis retenitaj Smrkovský, Símon kaj Špaček. Iom poste aldoniĝis ĉefministro Černík al la grupo, kiu antaŭe estis arestita en sia oficejo.

Kiam Svoboda demandis la sovetianojn, kie troviĝas la arestitaj ĉeĥoslovakaj politikistoj, Ĉervonenko kaj Pavlovskij respondis, ke ili ne scias tion, rifuzis esti respondecaj por ilia arestado, sed promesis informiĝi pri ilia sorto.[364] Kiam ankaŭ iuj CK-anoj klopodis ĉe iuj reprezentantoj de la sovetia armeo atingi la liberigon de la arestitaj prezidianoj, tiuj sovetianoj respondis, ke ili ne estas kompetentaj por solvi tiun problemon. La ĉeĥoslovaka radio disvastigis alvokon, kiu estis subskribita de generalo Kučera, anstataŭanta ĉefo de la stabo de la ĉeĥoslovaka armeo, kaj kiu postulis de la sovetianoj senprokrastan reenoficigon de la arestitaj ĉeĥoslovakaj funkciuloj, alikaze oni atendas de prezidento Svoboda utiligi la ĉeĥoslovakan armeon por protekti la laŭleĝajn ŝtatajn kaj partiajn reprezentantojn. Sed tio estis vana espero, aŭ malplena minaco.

Vespere je la naŭa horo oni ordonis al Dubček eniri iun aviadilon, en kiu li devis longe atendi. Iom poste li devis ŝanĝi al pli granda aviadilo (Tupolev), kiu ekflugis for. Post unu-du horoj la aviadilo surteriĝis ie en suda Pollando (Legnica), kie troviĝis la ĉefkomandejo de la operaco. Sen mencii ĉiujn detalojn, pri kiuj Dubček rakontis en siaj memuaroj, la vojaĝo, kiu similis al odiseado, estis daŭrigita – al Karpata Ukrainio (Uĵgorod), kie Dubček kaj Černík estis „bonvenigitaj“ de iu KGB-oficiro en civilaj vestaĵoj kaj puŝitaj en iun aŭtomobilon, kiu veturigis ilin al iu montara pozicio, kie ili restadis la venontan tagon. Nur el la televido, kiun ili povis spekti, il eksciis, kie ili troviĝas. Ankaŭ tiu sceno similis al la deportado de Imre Nagy kaj liaj kunbatalantoj en Hungario (1956), kiuj estis transportitaj al Rumanio. Dubček protestis kontraŭ la traktado de Černík, pri kiu li atentigis la sovetianojn en rusa lingvo, ke li tamen estas la oficanta ĉefministro de suverena ŝtato. La tuta ekzerco ŝajnis al Dubček granda improvizaĵo, sed li ne povis trovi klarigojn, eble la sovetianoj ŝanĝis siajn planojn kaj ne sciis kion fari kun Dubček kaj liaj kolegoj aŭ devis atendi novajn ordonojn el Moskvo, kiu ŝajne sentis sin en dilemo, ĉar la planita puĉo ne okazis en Prago. Dubček, kiu estis traktita kiel ostaĝo de teroristoj, estis komplete izolita sen novaĵoj pri kio okazos. La venontan tagon la sovetianoj revenis, malhelpis la vidon de Dubček per malhelaj okulvitroj kaj kondukis lin al iu veturilo, per kiu li veturis malsupren de la monto. En iu oficejo oni forprenis de li la malhelajn okulvitrojn. La telefono sonis kaj Dubček estis petita preni la aŭdilon. Sur la alia flanko parolis Nikolaj Podgornyj, la prezidanto de la Supera Soveto, kiu diris al Dubček, ke ili devas paroli – en la Kremlo. Tiel, Dubček, separita de la aliaj kamaradoj, kiuj estis fortransportitaj en aparta grupo, flugis per sovetia aviadilo al Moskvo.

Kiel Husák kaj aliaj ĉeĥoslovakaj politikistoj poste diris, ili efektive kredis, ke Dubček kaj liaj kamaradoj estos mortpafitaj, ĉar estis intencite kunvoki „revolucian tribunalon“ por trakti la kazon de Dubček kaj liaj registaranoj. Fakte la samon kredis ŝajne ankaŭ kelkaj arestitaj politikistoj mem.[365]

En siaj memuaroj Dubček konfesis, ke li komplete mistaksis la intencojn de la sovetianoj. Ĝis la plej lasta momento li ne povis kredi, ke ili lanĉos armean atakon kontraŭ Ĉeĥoslovakio, des pli ke Sovetunio ĉiam varbis por paca kunekzistado de la socialismaj landoj. Nur en la momento de la invado Dubček komprenis, ke la sovetianoj kaj ĝiaj komplicoj estis nenio alia ol „krimuloj“ (cit.). Dubček konfesis, ke liaj konsideroj baziĝis parte sur naiveco, bona volo kaj la principo de la reciproka respektado, kiu estis tiel kruele lezita de la sovetianoj kaj iliaj komplicoj en GDR, Pollando, Hungario kaj Bulgario. Sian mankantan kapablon antaŭvidi la okazaĵojn Dubček senkulpigis per la manko de scioj pri la reala poten-co de Breĵnev kiel ĝenerala sekretario de la sovetia KP kaj la necerteco, ĉu li devis dividi ĝin kun aliaj, ĉar siatempe Ĥruŝĉov bezonis plurajn jarojn por firmigi sian povon. Kiam Dubček fariĝis la posteulo de Novotný, li ne estis instruita de li pri la kondiĉoj en la sovetia politburoo, kvankam Novotný havis multe pli grandajn scion kaj sperton ol Dubček, kiu ankaŭ plendis, ke li neniam ricevis iujn ajn

[364] Pauer, p. 242-5, 250-60.
[365] Pauer, p. 284.

politikajn analizojn pri la politiko de la Kremlo de iu ajn flanko.[366] Al tiu manko de konoj de la sovetia politiko apartenis la opinio, ke Breĵnev lernis el la hungaria krizo de 1956, ke por defendi la interesojn kaj la koherecon de la sovetia bloko estas utile kaj necese, kiel plej lasta rimedo, perarmee interveni por eviti la eksiĝon de la koncerna ribelema lando el la orienta tendaro mem.

Koncerne la viktimojn, kiujn tiu armea interveno kostis, priplorinda estis la morto de 108 homoj, kiuj pereis ĝis la fino de la jaro, de kiuj la plimulto estis mortigitaj aŭ pro pafado aŭ pro akcidentoj kun armeaj aŭtomobiloj aŭ aliaj cirkonstancoj. Laŭ aliaj indikoj mortis 72 ĉeĥoj kaj slovakoj kaj ĉirkaŭ 50 soldatoj de la intervenantaj trupoj dum la interveno mem. 267 personoj estis grave kaj 422 malpli grave vunditaj. En la venontaj monatoj de la okupacio la nombro de viktimoj kreskis al 94, laŭ alia cifero al 98 mortintoj, fidindaj ciferoj ne ekzistas. Ŝajnas, ke neniu soldato de la intervenintaj trupoj estis mort-pafita de ĉeĥoslovaka pafilo. Tragika mort-incidento okazis la 26an de aŭgusto, kiam la 25-jara studentino Marie Charousková, kiu volis doni al iu sovetia soldato sian ĉeĥoslovakan flagon, kiun ŝi portis kun nigra rubando sur sia vestaĵo, estis trafita de kuglo de sovetia soldato, kiu pafis kontraŭ ŝia ventro sen averto.[367] Alia sekvo de la interveno estis, ke inter 120 kaj 200 mil ĉeĥoslovakoj forlasis sian patrujon. 50 mil turistoj, por kiuj la hungara limo fermiĝis por reiri al la patrujo, troviĝis en Jugoslavio. Ĉirkaŭ 162 mil ĉeĥoslovakoj fuĝis al Aŭstrio, kie nur 12 mil petis azilon.[368] La plimulto de ĉeĥoj kaj slovakoj forveturis al Germanio, Svislando kaj aliaj landoj de la okcidenta mondo, kie ili plej ofte restis por ĉiam en la diasporo, fariĝante civitanoj de siaj gastlandoj.[369]

## Reagoj en Ĉeĥoslovakio kaj eksterlande

La invado kaj ĉeesto de fremdaj trupoj estis klare malaprobitaj ankaŭ de grandparto de la ĉeĥoslovaka popolo.[370] Laŭ tiama sociologia enketo, 98,3% de la demanditaj ĉeĥoslovakaj civitanoj malaprobis la intervenon kaj 93% rifuzis la ideologian pravigon de la sovetianoj kaj ties aliancanoj pri la „minacanta danĝero de la kontraŭ-revolucio“. En aliaj pli grandaj urboj de Ĉeĥoslovakio okazis amasaj protestmani-festacioj kontraŭ la invado, sed ili estis oficiale prisilentitaj kaj iuj protestantoj malaperis en la mallibe-rejo. En multaj urboj homoj distribuis flugfoliojn kontraŭ la interveno. Sennombraj afiŝoj mokis pri la okupantoj kaj alvokis al pasiva rezisto. En Liberec Václav Havel observis kiel tankoj pafis kaj detruis konstruaĵojn. Elstaran rolon ludis la lokaj gazetredakcioj, kvankam ili estis okupitaj de la fremdaj trupoj, eldonante specialajn eldonojn kun freŝaj informoj. Ankaŭ en suda Slovakio, kien enpenetris hungaraj trupoj, estis sentebla la sama defenda solidareco inter hungarlingvaj popol-minoritatanoj kiel en la cetera respubliko.

La konsternata ĉeĥoslovaka popolo reagis per t.n. civila rezisto aŭ malobeo. Ĉiuspeca kunlaboro kun la sovetiaj trupoj estis rifuzita. Post kiam la sovetia propagando rekomencis esprimi siajn „sentojn de la amikeco“, la strategio de la rezisto estis ŝanĝita: La trupoj estis ignoritaj, ĉiuspecaj kontaktoj kun ili estis evititaj, havigo de informoj rifuzita. Al la legendecaj aktivecoj por montri tiun rezistan sintenon apartenis la turnado aŭ malmuntado de vojmontriloj por konfuzi, erarigi kaj devojigi la fremdajn trupojn al malĝustaj direktoj. Kelkaj ŝildoj sekve portis la novajn indikojn „Moskvo 1800 km, Dresden 200 km, Siberio 4000 km. Urbomapoj estis malaperigitaj aŭ detruitaj. La ĉeĥoslovaka fervojo kondukis la vago-nojn kun varoj por la Ruĝa Armeo al apudaj reloj. Okazis spontanaj formoj de memadministrado, de provizado per pano ĝis distribuado de politikaj komunikoj.[371]

Kiel menciite, ankoraŭ en la nokto de la invado ĉiuj ĉefaj ŝtataj organoj de Ĉeĥoslovakio – la registaro, parlamento kaj Centra Komitato de la partio – malaprobis la operacon de la Varsovia Pakto kaj protestis kontraŭ la invado de sia lando fare de ĝiaj armeoj.

---

366 Šik konfirmis (p. 338), ke nek Dubček nek la aliaj kredis, ke la sovetianoj intervenos per sia armeo, pro kio ili tute ne pensis pri la neceso de la preparado de propra armea sindefendo.
367 Ĉeĥlingvajn informojn vd. sub http://okupace.evangnet.cz/marie-charouskova. Pri la loko de la incidento vd. https://www.youtube.com/watch?v=WNfCwRPd1hQ.
368 Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Prager_Früling#Österreich.
369 Al Svislando veturis ĉ. 12 mil ĉeĥoslovakoj (vd. https://www.sozialarchiv.ch/2018/03/11/vor-50-jahren-der-prager-fruehling-und-die-schweiz).
370 La ciferojn de la enketo vd. ĉe Pauer, p. 376.
371 Pauer, p. 375.

Kvankam la supre nomitaj pintaj funkciuloj estis arestitaj, la registaro restis agipova. En la posttagmezaj horoj ĝi kunvenis kaj eldonis protestnoton, kiu inter alie postulis, ke la arestitaj registaranoj estu liberigitaj. Ankaŭ la ministerio de la eksteraj aferoj atentigis, ke tiu armita interveno okazis kontraŭ la volo de la ĉeĥoslovakaj registaro, prezidento kaj parlamento kaj ke neniu ŝtata organo petis aŭ permesis ĝin. Ĝi emfazis, ke la intervenintaj ŝtatoj „krude lezis la bazajn principojn de la internacia juro, tretante la UN-Ĉarton per piedoj.“ Ĝi klarigis, ke „ĝis la interveno“ sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio“, kiu estis nomita „brutala ago“, regis absoluta trankvilo kaj ke la interesoj de aliaj socialismaj ŝtatoj neniel estis minacataj.“[372] Ankaŭ la prezidio de la praga urba komitato de la ĉeĥoslovaka KP protestis kontraŭ tiu „agreso“ kaj la „lezo de la socialisma internaciismo“.[373] La ĉeĥoslovaka PEN-Klubo direktis al la Monda Verkista Asocio peton kondamni la invadon. La konata ĉeĥa filozofo Ivan Sviták, kiu postulis „demokration anstataŭ demokratiigo“ (de la socialismo), nomis la „agreson“ de la sovetianoj „krima ago“.[374] La sovetian operacon cetere akompanis ankaŭ arestado de ĉeĥoslovakaj verkistoj, ĵurnalistoj kaj sciencistoj. Čestmír Císař sukcesis kaŝiĝi por eviti sian kaptiĝon, kiam la sekreta servo traserĉadis la urbon por kapti arestotajn personojn.

Dum la ŝtatoj, kiuj partoprenis en la interveno, pravigis la operacon laŭ kutima maniero kaj per la konata argumentaro,[375] en eksterlando kaj precipe ekster la orienta bloko oni ĝenerale klare malaprobis la invadon de Ĉeĥoslovakio per trupoj de la Varsovia Pakto.

En la nokto de la invado la usona prezidento Johnson, kiu estis informita de la sovetia ambasadoro pri la operaco, senprokraste kunvokis la nacian sekurecan konsilion kaj esprimis en publikigita deklaraĵo la „konsternon de la mondo“ pri ĝi. „Estas malgaje konstati, ke laŭ komunisma kompreno la signoj de la libereco en Ĉeĥoslovakio estas konsideritaj kiel baza minaco de la sekureco de la sovetia sistemo,“ estis skribite en ĝi. La pravigo de Sovetunio por invadi Ĉeĥoslovakion ŝajnis al li „inventita“, ĉar laŭ lia scio „la ĉeĥoslovaka registaro ne petis siajn aliancanojn interveni en la internajn aferojn“ de sia lando.[376] Krom tio li atentigis, ke la procedo de la Varsovia Pakto baze kontraŭdiras la principojn de la UN-Ĉarto. George W. Ball, usona ambasadoro ĉe UN, ricevis instrukciojn por rilati kun aliaj membroj de la Sekureca Konsilio por engaĝiĝi favore al la rajtoj de la popoloj de Ĉeĥoslovakio. La usona prezidento estis evidente surprizita de la interveno, ĉar en CIA oni ŝajne kredis, ke Sovetunio ne invados Ĉeĥoslovakion „pro respeko al la monda publikeco“.[377] La usona prezidento Johnson nuligis sian planon viziti Sovetunion en 1968. La pintkonferenco kun la sovetianoj estis prokrastita al nefiksita estonto. Nur en majo 1972 la sekva usona prezidento Nixon veturis al Moskvo.

Je la unua horo nokte la franca registaro estis informita de la sovetia ambasadoro en Parizo pri la interveno en Ĉeĥoslovakio. Mallonge post tio la ĝenerala sekretario de Charles de Gaulle informis la francan prezidenton en sia rezidejo en Colombey-les-deux-Eglises. En sia komuniko de Gaulle „bedaŭris la pragajn okazaĵojn“, kiuj „endanĝerigas la politikon de la malstreĉiĝo“; li konstatis, ke Moskvo ankoraŭ ne rezignis pri sia „politiko de la blokoj“.

Ankaŭ la brita registaro senprokraste kondamnis la invadon. En komuniko de ĉefministro Willson estis dirite, ke „tio estas ne nur tragedio por Ĉeĥoslovakio, sed ankaŭ por Eŭropo kaj la tuta mondo“. Laŭ la brita registaro la invado de Ĉeĥoslovakio ne nur krude lezis la UN-Ĉarton, sed ĝi estis ankaŭ kontraŭdiro al la ofte ripetitaj deklaraĵoj de la sovetia registaro pri neenmiksiĝo en la suverenajn rajtojn de sendependaj ŝtatoj.

En okcidenta Germanio je la 8h30 kunvenis diversaj ministroj kun la prezidanto de la parlamento por publikigi similan deklaraĵon kiel faris la supre menciitaj okcidentaj potencoj. Antaŭ la sovetia ambasadejo en Bonn okazis protestoj kontraŭ la invado. En Erfurt (GDR) protestis junuloj, kiuj estis atakitaj de la polico.

Same la itala registaro parolis en oficiala komuniko pri „malmola bato“ kontraŭ „la libereco kaj sendependeco de la popolo“ de Ĉeĥoslovakio kaj pri „malferma lezo de la naturaj rajtoj de tiu popolo,

---

[372] Kamberger, p. 29-30.
[373] Kamberger, p. 26-28.
[374] La tekston de lia alvoko de la 23a de aŭgusto 1968 vd. ĉe Kamberger, p. 56-57.
[375] Vd. ĉe Kamberger, p. 33-38.
[376] Nu, la cirkonstancoj de la peto estas klaraj, vd. la ĉapitron pri la la mistera(j) „petletero(j)“ al Breĵnev, kiu evidente ne estis konataj al Johnson.
[377] Vd. https://www.spiegel.de/geschichte/geheimdienste-und-prager-fruehling-a-947780.html.

de la normoj de la internacia juro kaj de la principoj de la UN-Ĉarto" kaj postulis la senprokrastan retiron de la sovetiaj trupoj.

Eĉ la papo (Paŭlo VIa) esprimis sian doloron pri la eventoj en Ĉeĥoslovakio, kie la „paco estis grave vundita".[378]

Ŝajnas, ke en la momento de la interveno en Okcidento oni tute „sciis nenion" pri ĝi, kiel konfirmis ĉi-rilataj dokumentoj el la NATO-ĉefsidejo en Bruselo, kie oni komplete maltrafis antaŭvidi la tagon de la invado, kiun evidente neniu okcidenta agento rimarkis. La sovetianoj scipovis perfekte kaŝi la starton de sia operaco „Danubo", pri kiu en Okcidento oni kredis, ke post Hungario 1956 Moskvo ne kuraĝos ripeti ĝin en la kazo de Ĉeĥoslovakio, ĉar la internacia reputacio de Sovetunio certe estus ruinigita. Associated Press disvastigis la koncernan komunikon je la 2h09 de la 21a de aŭgusto, do kvar horojn post la komenco de la operaco. Unu horo ankoraŭ pasis ĝis kiam la alarmo eksonis en Bruselo, kie la teletajpilo ne funkciis, kio ne estis rimarkita, ĉar la respondeca deĵoranto iris dormi. Ŝajnas, ke en la ĝenerala konfuzo, kiu regis post la komenco de la invado, la registaroj de la tri menciitaj okcidentaj landoj, kiuj estis informitaj de la sovetiaj ambasadoroj, ´forgesis´ informi la aliancanojn aŭ konservis la informojn ĉe si, tiel ke la NATO-armeanoj devis kontentiĝi je gazetaraj komunikoj, kiel ili poste mem lamentis. Sed ankaŭ NATO ne pludonis informojn, pri kiuj ĝi disponis, al la aliancanoj, kvankam ĝi ja observis de iu ĉelima monto en Bavario la aktivecojn de la sovetia armeo sur la flughaveno de Prago. Malgraŭ tiuj altgrade embarasaj paneoj ĉe la okcidentaj sekretaj servoj, la oficistoj en Pullach fanfaronis post la invado, ke ili ja ekzakte sciis kaj antaŭvidis ĉion. Kadre de la operaco „Nepomuk" BND sendis en somero 1968 spionojn al Ĉeĥoslovakio kun la tasko kolekti informojn pri armeaj ekzercoj kaj kontakti gravajn personojn en la ĉirkaŭaĵo de Dubček, kion ili fidinde faris.[379]

La plimulto de la komunismaj partioj en Eŭropo kaj la cetera mondo kondamnis, parte per komplikaj formuloj de la embaraso, la intervenon de trupoj de la Varsovia Pakto en Ĉeĥoslovakio, antaŭ ĉio la ´eŭro´-komunismaj partioj de Italio, Francio, Britio, Belgio kaj Aŭstrio, kiuj liberiĝis, post 1956, de siaj stalinismaj strukturoj. Nur 6 de 90 komunismaj partioj, kiuj estis agnoskitaj de Moskvo, aprobis la intervenon – temis pri tiuj de Mongolio, Sirio, Ĉilio, Kolombio, Luksemburgio, Grekio, Kipro kaj Usono. Sed ankaŭ la centra organo de la germana KP kaj la okcident-berlina SED bonvenigis ĝin. Fidel Castro, la fifama komunisma diktatoro de Kubo, konfirmis, ke la suvereneco de Ĉeĥoslovakio estis lezita kaj malatribuis al la interveno ajnan juran legitimecon, var ĝi okazis pro pure politikaj motivoj.[380] En iuj ŝtatoj de la „Tria Mondo" okazis protestoj, kie Sovetunio estis kritikita kiel imperiisma, koloniisma kaj faŝisma ŝtato.

Nature ankaŭ Nicolae Ceaușescu, la bizara ŝtatestro de Rumanio, kiu ludis propran kaprican ludon en la komunisma bloko, senprokraste kondamnis la intervenon de la trupoj de la Varsovio Pakto en Ĉeĥoslovakio, trovante akrajn vortojn kontraŭ „la enmiksiĝo en la internajn aferojn de alia ŝtato".

Sen rekte kritiki Sovetunion, Tito tamen konstatis, ke „la suvereneco de la socialismaj landoj estis lezita kaj la progresemaj fortoj en la mondo ricevis baton" kaj lamentis, ke „la interkonsentoj de Bratislavo estis unuflanke rompitaj". En Belgrado okazis amasprotestoj kontraŭ la invado de Ĉeĥoslovakio, dum kiu la sekretario de la ekzekutiva komitato de la CK de la jugoslavia KP kondamnis la intervenon kontraŭ Ĉeĥoslovakio. La jugoslavia registaro pretis akcepti ĉeĥoslovakan ekzilregistaron, sed Ota Šik, kiu ankoraŭ estis oficanta vicĉefministro de Ĉeĥoslovakio kaj troviĝis en Jugoslavio en la ferioj, klarigis al la jugoslavaj kamaradoj, ke tia intenco ne ekzistas flanke de la ĉeĥoslovaka registaro.

Kritikante samtempe la „sovetiajn reviziistojn", kiuj „okupis per armeaj fortoj" Ĉeĥoslovakion, kaj la „ĉeĥoslovakajn reviziistojn", kiuj „perfidis la ĉeĥoslovakan popolon", la komunismaj regestroj en Albanio alvokis la ĉeĥoslovakojn ribeli kontraŭ la okupantoj kaj la „perfidaj gvidantoj" de ilia lando. Tirana utiligis la krizon ĉirkaŭ Ĉeĥoslovakio kiel okazon por eksiĝi el la Varsovio Pakto je la 13a de septembro de la sama jaro. Pro la ĉeesto de la ĉinoj en tiu lando, Moskvo evitis interveni en Albanio por konservi ĝin kiel strategian partneron, kio nature signifis grandan perdon por la sovetianoj.[381]

---

[378] Kamberger, p. 38-40.
[379] Vd. https://www.spiegel.de/geschichte/geheimdienste-und-prager-fruehling-a-947780.html.
[380] Csizmas, p. 112.
[381] Csizmas, p. 124.

Plej akre kontraŭ la sovetia agreso polemikis la ĉinaj komunistoj en Pekino, kiuj komparis la sovetian intervenon kun la „reakcia teorio de Hitlero“ pri la „Nova ordigo de Eŭropo“ kaj nomis la regantojn en Moskvo „kliko de la sovetreviziismaj renegatoj“, kiuj trompis la popolamasojn kaj kiuj montris sian veran „faŝisman grimacan vizaĝon“, farinte „komploton kun la usona imperiismo por denove dividi la mondon“.[382] La teorio pri la limigita suvereneco de la socialismaj ŝtatoj estis nomita „gangstra logiko“.[383] Estas klare, ke tiuj komunismaj regimoj, kiuj kritikis la intervenon de la Varsovia Pakto en Ĉeĥoslovakio, kiuj mem kulpis pri plej gravaj kaj teruraj krimoj en la historo de la homaro, tro multe malfermis la buŝon, ĉar en iliaj landoj estis sufiĉe multe da malpuraĵo por forigi.

La 25an de aŭgusto ok personoj protestis sur la Ruĝa Placo en Moskvo kontraŭ la sovetia interveno, montrante afiŝon kun la surskribo „Por via kaj nia libereco“.[384]

Ankoraŭ en la sama 21a de aŭgusto la sekureca konsilio de UN kunvenis laŭ la postulo de ses membroŝtatoj por kritiki la sovetian intervenon en Ĉeĥoslovakio. 10 ŝtatoj voĉdonis por la kondamno, 2 kontraŭ kaj 3 sindetenis, inter alie Hindio, kiu tamen esprimis sian bedaŭron pri la okazaĵoj.[385] Ĉar Sovetunio, kiu nature protestis kontraŭ la kondamno, reagis per vetoo, la koncerna rezolucio estis senvalida kaj la ĉi-rilata debato prokrastita. Klarigante, ke pri tiu temo ne ekzistas kialo por debato, ĉar temas pri afero inter la socialismaj landoj, la sovetia ambasadoro ĉe UN alvokis ĉiujn ŝtatojn „respekti la principojn de la suvereneco kaj sendependeco kaj strikte atenti, ke la rekta kaj nerekta agreso kontraŭ ŝtatoj kaj popoloj estas malpermesata“ (!!!). Estis klare, ke ajna diskuto kun la sovetianoj en rilato kun tiu temo estis neebla, ĉar ili tuj tordis la faktojn, inversigis la lancon, rifuzis ĉian kulpon kaj sabotis la koncernan debaton. La sovetia ambasadoro firme esprimis sin ankaŭ kontraŭ la vizito de U Thant en Prago por atingi, ke la arestitaj ĉeĥoslovakaj politikistoj estu liberigitaj.

Jan Muzik, la oficanta ĉeĥoslovaka reprezentanto ĉe UN, replikis al la sovetia ambasadoro, ke la petletero de la ĉeĥoslovaka registaro estas „falsaĵo“ kaj la interveno signifas „rompon de la internacia juro.“[386] Jiří Hájek, la oficanta ĉeĥoslovaka ministro pri eksteraj rilatoj, flugis de Belgrado al Novjorko por protesti ĉe UN kontraŭ la okupacio de Ĉeĥoslovakio fare de trupoj de la Varsovia Pakto. Kiam Hájek revenis al Ĉeĥoslovakio, li perdis sian ministran postenon.[387]

Per sia kruda armea interveno en Ĉeĥoslovakio la sovetianoj kaj ties aliancanoj do ne nur lezis la principojn de la internacia juro kaj de la UN-Ĉarto, sed ili kondukis ankaŭ la koncernajn paragrafojn de la traktato pri la Varsovia Pakto al absurdo. Nome, la artikolo 1 de la Varsovia Traktato de la 14a de majo 1955 devigis la aliancanojn rezigni pri la apliko de ĉiuspecaj minaco kaj perforto. Krom tio, en la artikolo 4 de la sama traktato estis fiksita, cetere en kongruo kun la artikolo 51 de la UN-Ĉarto, ke armea helpo povas esti donita al aliancita ŝtato nur en kazo de „armita atako“ kontraŭ la koncerna membroŝtato. Do, armita interveno de la trupoj de la Varsovia Pakto en iu ajn tia ŝtato, kiel ĝi okazis en Ĉeĥoslovakio, havis neniun juran legitimecon. Ankaŭ la nocio de la „danĝero de la kontraŭ-revolucio“ estis pura ideologia inventaĵo de la sovetianoj, kiu kondukis al la t.n. Breĵnev-doktrino, por pravigi la agreson kontraŭ la aliancanoj kaj la potencon kaj hegemonion de Moskvo en aliaj landoj. La plenumo de la „internaciisma devo“ de la „defendo de la socialismo“ estis pura preteksto por atingi tiun celon. Se do Breĵnev diris al Svoboda, ke la operaco celas forigi politikajn malamikojn por „savi la socialismon“, tio estis la opinio de la sovetianoj, kiu havis neniun internacijuran statuson. Kaj se la sovetiaj generaloj klarigis al al ĉeĥoslovakoj ekster ĉiuj traktatoj, konvencioj kaj ĉartoj, ke ili ne celas okupacion, sed nur ĉeeston de la armeo, la tasko de ilia interveno do estis puŝi politikajn celojn seeble sen sangoverŝado kaj sen atendi armean kontraŭstaron de la atakita lando. La interveno devis impresi aŭ ŝoki la ĉeĥoslovakajn politikistojn, timigi la ĉeĥoslovakan popolon, finfine akceli la falon de la reformistoj, ŝanĝi la persona-

[382] La ĉi-rilatajn tekstojn de Rumanio, Jugoslavio, Albanio kaj Ĉinio oni trovas ĉe Kamberger, p. 44-46. Apenaŭ konata estas jena cetera epizodo: 2-3 tagojn post la invado de la trupoj de la Varsovia Pakto en Ĉeĥoslovakio, ĉe la limoj de Rumanio koncentriĝis sovetiaj, bulgaraj kaj hungaraj trupoj, dum sur la rumana flanko aŭdiĝis minacoj, ke oni kontraŭstaros ĉiun provon invadi Rumanion. La 24an Tito kaj Ceauşescu renkontiĝis en Vrŝac por interkonsultiĝi. En la sekvo la sovetia propagando lanĉis agreseman retorikon kontraŭ ambaŭ ŝtatoj, kiuj estis nomataj lakeoj de la imperiismo kaj helpantoj de la ĉeĥoslovaka kontraŭ-revoluco. (Kamberger, p. 66-67)

[383] Csizmas, p. 109.

[384] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Warsaw_Pact_invasion_of_Czechoslovakia#Reactions_in_Czechoslovakia.

[385] La ĉi-koncerna rezolucio estis proponita de Usono, Britio, Francio, Brazilo, Danlando, Paragvajo kaj Senegalo.

[386] Kamberger, p. 47.

[387] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Warsaw_Pact_invasion_of_Czechoslovakia#Reactions_around_the_world.

ron de la politikaj gvidorganoj laŭ la gusto de la sovetianoj kaj reakiri la politikan kontrolon fare de grupo de komunistoj, kiuj apogis tiujn celojn.

La 21an de aŭgusto la „Praga Libera Radio“ disvastigis kunvokon al la delegitoj por partopreni la XIVan eksterordinaran kongreson de la ĉeĥoslovaka KP. La venontan tagon la kongreso efektive komenciĝis en iu maŝina halo de ČKD[388] de iu industria kvartalo en Prago-Vysočany, kiu estis protektita kaj de laboristoj kaj ĉirkaŭita de sovetiaj tankaj bariloj. La delegitoj, kiuj povis veni, alveturis parte per bicikloj. En la kongreso, kiu daŭris nur unu solan tagon, partoprenis entute 1192 de 1543 delegitoj; multaj slovakaj delegitoj estis malhelpitaj veturi al Prago kaj partopreni ĝin. La kongreso konfirmis la oficojn de Dubček kaj de la ceteraj arestitaj partiaj gvidantoj per unu sola sindetena voĉo kaj minacis partiajn membrojn, kiuj kontraŭstaras tiun decidon, per la eksigo el la partio. La delegitoj estis alvokitaj akcepti nur instrukciojn de la organoj, kiuj estis elektitaj de la partia kongreso. Al la prezidio kun 28 membroj de la nove elektita CK, kiu ampleksis 160 membrojn, apartenis ĉiuj gravaj reprezentantoj de la demokratiigo kiel Dubček, Černík, Smrkovský, Kriegel, Císař, Špaček, Šimon, Svoboda, sed ankaŭ Ota Šik, Václav Slavík, Libuše Hrdinová Vojtěch Matějíček, Vladimír Kabrna, Zdeněk Hejzlar, Jaromír Litera, Eduard Goldstücker, Bořivoj Vojáček, Milan Hübl, Zdeněk Moc, Václav Šimeček, Gustáv Husák, Jozef Zrak, Anton Ťažký, Štefan Sádovský, Peter Colotka, Július Turček, Viktor Pavlenda, Andrej Zámek kaj Zdeněk Mlynář. Věněk Šilhán estis elektita kiel provizora unua sekretario de la CK por gvidi la kongreson dum la foresto de Dubček. La reformistoj, kiuj formis la plimulton de la delegitoj, faris kelkajn gravajn decidojn: Reage al la ultimato de la sovetianoj formi novan registaron ili adoptis sukan kontraŭ-ultimaton, per kiu oni postulis la retiron de la fremdaj trupoj, la liberigon de la arestitaj politikistoj ene de 24 horoj kaj la restarigon de la civitanaj liberecoj kaj rajtoj. Oni minacis per striko, se tiuj postuloj ne estos plenumitaj. En sia rezolucio la kongresanoj konstatis, ke „Ĉeĥoslovakio estas libera ŝtato, kiu perdis sian suverenecon je la 21a de aŭgusto pro la okupacio fare de trupoj de kvin amikaj ŝtatoj de la Varsovia Pakto kaj ke la ĉeĥoslovaka KP ne agnoskas novajn registaranojn, kiuj estis engaĝitaj de la okupaciaj potencoj“. Krom tio la kongreso postulis kunvoki internacian konferencon de la komunismaj partioj por trakti la okupacion de Ĉeĥoslovakio fare de trupoj de la Varsovia Pakto.[389]

Kun plurtaga malfruo la CK de la slovaka KP en Bratislavo esprimis sian fidon al Dubček, Svoboda kaj Černík, kvankam en ĝia unua reago post la invado ĝi hezitis eksplicite kondamni la okupacion de Ĉeĥoslovakio kaj ankaŭ ne postulis la liberigon de la arestitaj politikistoj aŭ la retiron de la trupoj, kion ĝi tamen faris la 26an de aŭgusto. Anstataŭ pri okupacio kiel kontraŭleĝa ago ĝi parolis pri „nepravigita enmarŝado“ de la trupoj de la Varsovia Pakto, pri kiu la CK de la slovaka KP sciis nenion. Oni deklaris la lojalecon al la ĉeĥoslovakaj organoj kaj konfirmis la postjanuaran politikon. Sovetunio ne estis kritikita. La slovaka popolo ne estis alvokita rifuzi ĉiuspecan kunlaboron kun la intervenintaj trupoj kiel tion faris la centraj partiaj kaj ŝtataj organoj en Prago, sed oni alvokis la homojn obei la instrukciojn de la laŭleĝaj organoj kaj resti trankvilaj. Postulita estis pragmata politika solvo de la krizo. En la sama spirito esprimis sin la Slovaka Nacia Konsilio, sed la Slovaka Nacia Fronto, kiu staris sub la influo de la entreprenoj kaj intelektularo, klare kondamnis la intervenon kaj okupacion.[390]

La 25an de aŭgusto *Rudé právo* publikigis jenan alvokon al la popolo: „La retiron de la fremdaj trupoj kiel bazan kondiĉon por ĉiuspeca memstara kaj krea politiko de nia partio ni ne povas devigi per la perforto de armiloj, sed nur per la forto de la moralo kaj de la juro. Ne hezitu postuli ĉiujn laŭleĝajn rimedojn kaj subtenu sole la laŭleĝan, laŭkonstitucian registaron kaj la funkciulojn de la ŝtato, de la partio kaj de ĉiuj organizaĵoj de la Nacia Fronto, kiuj estis elektitaj laŭ validaj ĉeĥoslovakaj leĝoj.“[391]

La gazeto de la verkista Asocio, *Literárni listy*, alvokis ĉiujn verkistojn, artistojn kaj intelektulojn de la mondo ne lasi Ĉeĥoslovakion sola en la krizo. Al tiu alvoko reagis grupo de (maldekstraj) sciencistoj, verkistoj, ĵurnalistoj kaj eldonistoj el FRG per impresa deklaro, en kiu oni kritikis la „brutalan potenc-politikon de Sovetunio“ kiel „refalon en la Malvarman militon“.[392] La plej akran proteston

---

[388] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/ČKD.
[389] Vd. https://cs.wikipedia.org/wiki/Vysočanský_sjezd_KSČ. La ordinara laŭvica 14a kongreso de la ĉeĥoslovaka KP estis prokrastita al la jaro 1971; Pauer, p. 368-70; Kamberger, p. 49-50.
[390] Pauer, p. 273.
[391] Kamberger, p. 68. Esperanto de aK
[392] Kamberger, p. 68-69. Inter la subskribintoj troviĝis famaj okcidentaj intelektuloj kiel Theodor W. Adorno, Ilse Aichinger, Jürgen Becker, Peter Bichsel, Heinrich Böll, Marion Gräfin Doenhoff, Friedrich Dürrenmatt, Jürg Federspiel, Max Frisch, Günter Grass, Martin Walser k.a. En simila maniero kiel la okcidentaj kolegoj reagis la membroj de la estraro de la Germana Verkista Asocio de GDR nature sen kritiki la invadon de la Varsovia Pakto aŭ Sovetunion, sed por esprimi la „aktivan pacpo-

eble esprimis la renoma ĉeĥa verkisto Jan Procházka en sia artikolo en la sama gazeto, se li skribis: „La sovetia grandpotenco revenas al la sukcese elprovitaj tradicioj de la kozaka diplomatio. Per tiu retropaŝa ago Sovetunio perdis la rajton ludi la gvidan rolon en la monda komunisma movado. La deziron de la nacioj esti liberaj oni ne povas sufoki per armeoj de tankoj. Pensojn oni ne povas mortpafi. En Ĉeĥoslovakio ne ekzistas sufiĉe multaj malliberejoj por akcepti ĉiujn, kiuj levas la flagon de nia volo je libereco. (…) La rusoj estas okupantoj, kiuj povas dikti. (…) Okupantoj ne parolas pri la libereco de la gazetaro. Ili nur postulas, ke ni silentu. (…) Ni ne povas akcepti kompromison, ĉar ĉiu kompromiso malhonorigus ĉion, kion ni travivis. La falsa amikeco kun murdistoj povas fari ankaŭ el ni murdistojn. Memoru ni pri Pollando kaj Hungario. (…) Ni direktas nin al la intelektuloj de la mondo: Levu vian voĉon por defendi Ĉeĥoslovakion. Bojkotu ĉiujn aktivecojn de la okupantoj en la tuta mondo. Ĉesigu ĉiujn kulturajn rilatojn kun tiu malpura alianco. (…)“[393]

„Preĝo por Marta“, la kanto de Marta Kubišová, fariĝis la simbolo de la funebro pro la perdita libereco kaj por la rezisto de la ĉeĥoslovakoj kontraŭ la sovetia okupacio.[394]

### La „Moskva protokolo“ de la 26a de aŭgusto 1968

Kvankam la ĉeĥoslovaka parlamento alvokis lin rezigni pri tiu vojaĝo, la 23an de aŭgusto prezidento Svoboda flugis per sovetia aviadilo al Moskvo (ĉar la ĉeĥoslovakaj aviadiloj havis malpermeson), kie li estis solene bonvenigita en la flughaveno. Ankoraŭ antaŭ sia vojaĝo li klarigis tra la radio al la „karaj kuncivitanoj“, ke li veturos al Moskvo por interparoli kun la plej altaj sovetiaj reprezentantoj, ĉar en Prago li ne sukcesis solvi kun la surlokaj responsuloj de Sovetunio la situacion, kiu estiĝis post la enmarŝado de trupoj de Sovetunio kaj aliaj landoj en Ĉeĥoslovakion, por refunkciigi la konstituciajn organojn de la lando. Al la „karaj amikoj“ li dankis pro la ĝisnuna subteno, pri kiu li esperis, ke li ricevos ĝin ankaŭ en estonteco. Li urĝe petis la homojn en Ĉeĥoslovakio konservi sobran menson kaj rezigni pri ĉiuspecaj agadoj, kiuj povus provoki la fremdajn trupojn reagi. „Ni konsciu, ke ni devos trovi honestan kaj dignan vojon el tiu situacio, kiu minacas nian popolon kaj ties patrujon per siaj tragikaj rezultoj. Ni volas pluiri la vojon de la demokratia disvolviĝo en nia socialisma patrujo“. Svoboda antaŭvidis reveni ankoraŭ en la sama tago al Prago, sed tio estis iluzio. Dum sia vojaĝo al Moskvo Svoboda estis akompanita de Husák, Biľak, Indra, Dzúr, Kučera kaj Piller.[395]

La sovetia televido montris jubilantajn amasojn mansvingi al Breĵnev, Podgornyj kaj Svoboda, kiuj veturis tra la stratoj en limuzino por esti entuziasme akceptitaj de la "popolo" – kompreneble tiu sceno estis artefarite aranĝita de la propagando por trompi la publikon. La tuta mondo devis fariĝi atestanto de la „amikeco“ inter Sovetunio kaj Ĉeĥoslovakio.

Sed la granda ĝojo baldaŭ pasis. La interparolojn en Moskvo la sovetianoj enkondukis per ultimato al Svoboda: Se li ne elŝanĝos la registaron kaj partian gvidantaron, oni transformos Slovakion al sovetia respubliko kaj Bohemio-Moravio fariĝos aŭtonomaj entoj sub sovetia kontrolo (!!!)[396] Svoboda replikis, ke li eĉ ne pensos diskuti kun la sovetianoj, se ili ne liberigos la arestitajn, deportitajn kaj internigitajn ĉeĥoslovakajn politikistojn. Intertempe, Dubček, Smrkovský, Špaček, Černík kaj Šimon estis transportitaj al la Kremlo, kie ili aldoniĝis al la delegacio de Svoboda por kunsidi kun la sovetianoj. En la ĉeesto de Kosygin, Podgornyj kaj Voronov, la reĝisoroj de la sovetia interveno, Breĵnev komprenigis al Dubček, ke „dekstraj, kontraŭ-socialismaj fortoj“ provis en konspiro „konverti Ĉeĥoslovakion al burĝa respubliko“, pro kio tiuj fortoj kulpas pri la interveno de la trupoj de la Varsovia Pakto. Laŭ Breĵnev neniu celis „okupi“ Ĉeĥoslovakion aŭ enmiksiĝi en la internajn aferojn de tiu frata lando, kaj li proponis, ke „ni forgesu, kio okazis, rigardu ni antaŭen“. La psike elĉerpata Dubček, kiu svenis plurfoje, esprimis al Breĵnev sian profundan seniluziiĝon pri la interveno, kiu laŭ li estis grava eraro kun tragikaj sekvoj. Ankaŭ Husák pridubis la neceson de la interveno (post tiu rimarko li estis krude silentigita de Breĵnev). Same Svoboda malaprobis la intervenon, dirante, ke li ne invitis fremdajn trupojn kaj atentigante la ru-

litikon de nia ŝtato, de la partio de la laborista klaso kaj de la Nacia Fronto“ en la senco de la „internaciismo“ kaj kontraŭ la „kontraŭ-revolucio“, sed por la paco kaj socialismo. (Kamberger, p. 69-70)

393 Kamberger, p. 81-82. Esperantigo de aK.

394 Vd. https://www.youtube.com/watch?v=S3UaBQSYQCU, https://hudba.zoznam.sk/marta-kubisova/piesen/modlitba-pro-martu, https://de.wikipedia.org/wiki/Marta_Kubišová, https://www.youtube.com/watch?v=npMZ7UxwVgU.

395 Kamberger, p. 61-62. Esperantigo de aK.

396 Vd. Kamberger, p. 62; Brahm, p. 85.

sojn, ke 95% de la ĉeĥoslovaka popolo subtenas la politikon de Dubček kaj samtempe la amikecon kun Sovetunio.

En Moskvo la ĉeĥoslovakoj estis devigitaj agnoski la „laboristan- kaj kamparanan registaron de Indra“ (kion ili ne faris) kaj konsenti pri la sovetia interpetado de la eventoj. Ŝajnas, ke en tiu diskuto Svoboda tute ne konsultis siajn registarajn kolegojn kaj malantaŭ la dorso de Dubček sciigis al la sovetianoj sian intencon formi laboristan- kaj kamparanan registaron. Krom tio li esprimis la preferon, ke Dubček demisiu, ĉar li perdis la fidon pri li kaj opiniis, ke li estas tro sentema por elteni tian streĉan situacion. Sed la propono, ke Dubček demisiu, estis rifuzita eĉ de kelkaj el liaj kritikantoj, ĉar oni timis, ke tia demisio povus konduki al eĉ pli malfacila situacio.

Oficiala konfirmo, ke la supre menciitaj ĉeĥoslovakaj pajlohomoj petis la sovetianojn interveni, ne ekzistis, ĉar la sovetia klarigo pri petita helpo dekomence perdis sian kredindecon. Tiu petskribo probable estis kaŝita, ĉar ĝi ne plu estis necesa nek oportuna por la intertraktoj. Embarasaj demandoj (de Smrkovský) pri la temo kiu invitis la trupojn de la Varsovia Pakto, ne plu havis lokon, kaj tiuj homoj, kiuj estis misuzitaj por skribi la petleteron kiel Indra kaj Biľak, ludis jam duarangan rolon.

En Moskvo la ĉeĥoslovaka flanko prezentis al la sovetianoj sian rigardon al la aferoj kiel bazon por kompromisa interkonsento. Inter alie oni insistis pri la opinio, ke en Ĉeĥoslovakio ne okazis kontraŭ-revolucio. Sed la sovetianoj arogante rifuzis tiujn vidpunktojn. Kosygin klarigis al la ĉeĥoslovakoj, ke en la situacio, en kiu ili troviĝas, oni ne povas fari postulojn. Dubček ricevis la instruon, ke li estas la ĉefa respondeculo por Ĉeĥoslovakio kaj devas pripensi kiel eliri el tiu tikla afero. Breĵnev tamen konsolis sian ´amikon´ „Saŝa“, ke la sovetiaj gvidantoj ne kulpigas lin persone pri la okazintaĵo, ĉar supozeble li simple multon ne sciis. Sed evidente Breĵnev estis tre ĉagrenata pri Dubček, ĉar laŭ lia opinio li ne plenumis la promesojn de Čierna. Breĵnev anoncis, ke la ĉeĥoslovaka registaro estos baldaŭ transformata, kaj se la problemoj ne povos esti solvitaj, li timis, ke okazos interna milito en Ĉeĥoslovakio, por kiu Dubček estos persone respondecigita, kiel Kosygin aldonis. Per diversaj nekredeblaj duonveroj kaj mensogoj, konfuzaj misinformoj, krudaj ofendoj kaj ĉantaĝaj provoj, al kiuj apartenis ankaŭ antisemitismaj aludoj, kiuj celis trafi la judojn inter la partiaj gvidantoj, la sovetianoj provis deflankigi la ĉeĥoslovakojn de la veraj problemoj, intermiksante diversajn historiajn temojn kaj cirkonstancojn. La tuta konduto de la sovetianoj estis tiel falsa, perfida kaj mensoga, ke eĉ ĉeĥoslovakaj komunistoj, kiuj havis longan sperton kun ili, miregis. Tamen, Dubček ne pretis ludi falsan ludon. Kiam la sovetianoj rimarkis, ke ili ne sukcesas anstataŭigi la personaron de la ĉeĥoslovaka registaro per obeemaj hibridaj lakeoj el la partio kaj ŝtato laŭ la hungara modelo de 1956, ili komencis serĉi novan pravigon de sia interveno, ĉar ilia aserto, ke la ĉeĥoslovaka registaro (aŭ partio) petis ilian helpon, ja perdis ĉian kredindecon. Ili premis la ĉeĥoslovakojn oficiale konfesi, ke la interveno estis „necesa“, ĉar en Ĉeĥoslovakio okazis „kontraŭ-revolucio“. Dum la ĉeĥoslovakoj obstine rifuzis tiun riproĉon, la kontraŭdiroj en la sinteno de la sovetianoj fariĝis pli kaj pli evidentaj.

Por akcenti sian proteston pri la maljusta traktado de la ĉeĥoslovaka delegacio kaj de sia lando mem fare de Sovetunio Dubček rifuzis ĉeesti la kunvenojn en la Kremlo kaj mem proponis sian demision kiel unua sekretario de la ĉeĥoslovaka KP, sed tio estis rifuzita de liaj partiaj kaj registaraj kolegoj. La deziro de Dubček kaj Černík tranokti en la Kremlo por resti proksimaj al ilia delegacio estis rifuzita de la sovertianoj. Por dormi ili estis transportitaj sur la Leninan montaron. La plej sanajn nervojn konservis preskaŭ heroe František Kriegel, kiu estis aparte perfide traktita de la sovetianoj, kiuj konsideris lin spirita gvidanto de la „dekstraj fortoj“, kaj tipoj kiel Biľak abomenis lin, ĉar li estis judo. Kriegel, kiu same kiel Dubček estis deportita tra la Karpatoj kaj poste flugigita de Lvovo al Moskvo, restis realisma, firma, sentima kaj mirinde kuraĝa kaj ne kompromitiĝis. Dum sia restado en Moskvo la ĉeĥoslovakaj delegacianoj estis severe kontrolitaj kaj subaŭskultitaj kaj iliaj reciprokaj kontaktoj estis strikte reguligitaj.

En la nokto de la 23a al la 24a de aŭgusto la ĉeĥoslovaka Nacia Asembleo kunvenis en sekreta loko kaj decidis, ke konvencio kun Moskvo bezonas la konsenton de la parlamento. En la malfrua vespero de la 24a de aŭgusto „Praga Libera Radio“ disaŭdigis mesaĝon de Svoboda, kiu anoncis, ke li devos resti pli longe en Moskvo por interparoli kun la sovetianoj. Aperis duboj pri la aŭtentikeco de la mesaĝo, sed efektive Svoboda ne revenis al Prago en la sama tago.

La 24an la situacio en Prago komencis normaliĝi. La tramoj denove veturis, la vendejoj estis malfermitaj, sed ekzistis problemoj kun la provizado per nutraĵoj. La sindikata gazeto *Práce* komunikis,

ke Dubček estis internigita en sekreta loko en Sovetunio. Kaj la „Praga Libera Radio" disaŭdigis la novaĵon, ke Špaček povis liberigi sin de la sovetia aresto.

La sovetia gazeto *Pravda* skribis pri „tre komplika kaj malfacila situacio por la trupoj". Korespondanto de la norvega gazeto *Aftenposten* sukcesis paroli kun „simpla sovetia soldato", kiu donis interesajn respondojn al liaj demandoj. La soldato kredis, ke la sovetiaj trupoj venis por helpi al la laborista klaso. Li jesis la demandojn, ĉu li konscias, ke liaj trupoj venis kiel okupantoj kaj ĉuli aŭdis pri tio, ke en Ĉeĥoslovakio oni komparas la situacion kun la enmarŝado de germanaj trupoj en 1939. Li ankaŭ sciis, ke Dubček kaj aliaj ĉeĥoslovakaj politikistoj estis arestitaj de la sovetianoj, kaj li ankaŭ sciis, ke Dubček estis populara gvidanto. Li kaj liaj kamaradoj konsciis, ke estis eraro veni al Ĉeĥoslovakio laŭ tia maniero.[397]

La 24an en Moskvo aperis la gvidantoj de la interveninta koalicio el la frataj landoj, al kiuj Breĵnev raportis pri la interveno mem kaj la aktuala situacio ĉirkaŭ Ĉeĥoslovakio. Li klarigis al ili, ke la interveno okazis sukcese kaj preskaŭ sen viktimoj. Sed la espero, ke per la alveno de la trupoj de la frataj landoj la kontraŭ-revoluciuloj aŭtomate elvaporiĝos, ne plenumiĝis. Male, li lamentis, ke la rezisto de ilia flanko estas sufiĉe forta kaj bone organizata. Breĵnev ankaŭ menciis, ke Svoboda rifuzis formi laboristan- kaj kamparanan registaron kaj ke Husák diris, ke la invado postlasis malbonan impreson ĉe la ĉeĥoslovaka popolo. Kiel alternativo estis menciita iu „registaro de la nacia unueco" kun Svoboda ĉe la pinto kaj Černík kiel partoprenanto. Sed ŝajnas, ke la sovetianoj ne sciis, ĉu oni povas fidi al li. Koncerne la demandon, kiu sekvu post Dubček kiel unua sekretario de la ĉeĥoslovaka KP, Breĵnev ŝanceliĝis inter Černík kaj Husák, ĉar li komprenis, ke en la nuna histeria etoso Indra aŭ Biľak ne estus akceptitaj de la ĉeĥoslovaka popolo. Kiel ajn, oni devus eviti, ke „iu eĉ pli terura" funkciulo anstataŭos Dubček-on, li klarigis. La ĉefoj de la kvin socialismaj ŝtatoj kaj partioj, kiuj partoprenis la operacon kontraŭ Ĉeĥoslovakio, ricevis la okazon komenti la raporton de Breĵnev. Gomułka kaj Ulbricht daŭrigis sian agreseman retorikon kontraŭ la ĉeĥoslovakaj reformistoj. La bulgaro Ĵivkov eĉ proponis likvidi la „kontraŭrevoluciajn bandojn" en Ĉeĥoslovakio kaj pledis por armea administrado de tiu lando. Ĉar tiuj gvidantoj sentis, ke ili troviĝas en la sakstrato, ili komencis kontraŭdiri unu la aliajn kaj fari absurdajn proponojn, kiuj eĉ por la sovetianoj ne estis akcepteblaj. Sub tiaj kondiĉoj la ĉeĥoslovakaj reformistoj preferis rezigni pri komuna kunsidado kun la sovetiaj gvidantoj kaj tiuj de la aliaj kvar ŝtatoj kaj partioj.

La 25an alvenis ankoraŭ alia delegacio el Prago al Moskvo, kiu konsistis el kamaradoj Švestka, Lenárt, Jakeš, Barbírek, Rigo kaj Mlynář. Tiel, en Moskvo kolektiĝis en tiu ĉi tago entute 22 gvidaj ĉeĥoslovakaj politikistoj, kiuj jene dividiĝis laŭ politika sinteno en la konflikto: Biľak, Jakeš, Rigo, Švestka, Lenárt kaj Koucký, la ĉeĥoslovaka ambasadoro en Moskvo, staris plej proksime al la sovetia pozicio kaj do iusence estis sovetiaj lakeoj, agante en la spirito de la menciita petletero; Svoboda, Husák, Dzúr, Kučera, Piller kaj Barbírek pretis kunlabori kun la sovetianoj en ilia senco, sed ne konsentis pri la sovetia interveno kaj postulis de ili konsideri la ĉeĥoslovakajn interesojn; nur ses homoj, nome Dubček, Černík, Smrkovský, Šimon, Špaček kaj Mlynář,[398] plene malaprobis la intervenon, reprezentante la grupon de la senkompromisaj reformistoj, kiuj estis klara minoritato. Kriegel, la estro de la Nacia Fronto, bojkotis la interparolojn kun la sovetianoj kaj rifuzis subskribi iun ajn dokumenton submetitan de la sovetianoj al la ĉeĥoslovakoj.

La interparoloj evidentiĝis malfacilaj kaj karakteriziĝis de unuflanka sovetia premo, kontraŭ kiu la ĉeĥoslovakoj provis sin defendi, kio estis ilia sola ebla strategio, sed la granda frato diktis la tonon kaj senskrupule el- kaj misuzis la vakuon. Kompare kun Čierna, kie ili ankoraŭ povis senti sin memkonsciaj suverenoj sur propra teritorio, en Moskvo la ĉeĥoslovakoj troviĝis en la embarasa situacio de malliberuloj aŭ deportitaj ostaĝoj, kiuj ne estis certaj, ĉu ili entute povos forlasi Sovetunion vivaj. Ŝajnas, ke Dubček en iu(j) momento(j) perdis la konscion kaj svenis – kiel siatempe Imre Nagy en Budapeŝto en 1956 – kaj devis esti admonita de Svoboda respekti la respondecon, kiun li tamen havas por la lando. La persona kuracisto de Dubček devis doni al li injekcion, por ke li restu trankvila dum la kunsido.

Iom post iom la sovetiaj gvidantoj ŝajne alvenis al konkludoj kun tri opcioj por solvi la registaran krizon en Ĉeĥoslovakio: 1a: Formado de revolucia registaro kun Svoboda ĉe la pinto kaj Černík kiel lia anstataŭanto; 2a: Registaro kun Černík ĉe la pinto kaj Husák kiel unua sekretario de la ĉeĥoslovaka KP; 3a: Konservado de la nuna registaro, en kiu Kriegel, Císař, Pavel, Šik kaj Hájek tamen ne plu estas

[397] Kamberger, p. 65-66.
[398] Pri la tiama rolo de Mlynář vd. https://www.spiegel.de/spiegel/print/d-45865149.html.

reprezentataj. Pri tiuj variantoj ekzistis diversaj opinioj en la sovetia politburoo. Ŝajnas, ke Breĵnev kaj Kosygin tendencis favori la trian varianton, kvankam Kosygin nomis Dubček-on „kanajlo n-ro 1“, dum Podgornyj preferis la duan varianton.

Fakte pli gravan rolon komencis ludi nun Gustáv Husák, kiu malgraŭ kritiko pri la invado kaj apogo de la reformoj finfine ŝanĝis sian pozicion al la sovetia flanko. Tiu persona metamorfozo de Husák, kiu sentis, ke lia horo venis, certe multe plaĉis al la sovetianoj, ĉar ili povis prepari lian instaladon kiel alternativon al Dubček en la senco de cinika kompromiso laŭ moskva kompreno. Husák ne estis klasika stalinisto (kiel Novotný), sed male eĉ viktimo de la stalinismo, krome li estis slovako (kiu malŝatis ĉeĥojn, precipe praganojn) kaj li promesis esti homo, kiu ideale servos al Moskvo dum la efektivigo de la „normaligo“. Do, li estis la perfekta elekto por solvi la krizon en la sovetia senco, ĉar li pretis akcepti la rolon de marioneto je la kostoj de la reformoj kaj favore al la propra potenc(avid)o.

Dume la sovetianoj volis rapide veni al la celo sen prokrasto. Anstataŭ kompromisa vortumo, ili submetis al la ĉeĥoslovakoj propran version de teksto, kiun ili estis devigitaj subskribi. Laŭ tiu ili devis konsenti, ke en ilia lando okazis kontraŭ-revolucio kaj ke la interveno estis legitima. La punkto pri retiro de la sovetiaj trupoj, kiun la ĉeĥoslovakoj postulis, mankis. Krom tio, la sovetianoj postulis reenkonduki la partian kontrolon pri la gazetaro kaj elŝanĝon de la respondeculoj por la radio kaj televido. La ĉefaj protagonistoj de la „Praga printempo” devis esti forigitaj de la gvidaj funkcioj en la partio kaj registaro. Krome, la sovetianoj volis, ke la ĉeĥoslovakoj retiru sian plendon ĉe UN. Sed la ĉeĥoslovakoj rifuzis tiujn postulojn. Kiam Černík kaptis la parolon, montrante sian malkontenton pri la proponita protokola teksto kaj rifuzante la riproĉojn de la sovetianoj kontraŭ Dubček kaj la kunvokota XIVa eksterordinara partia kongreso de la ĉeĥoslovaka KP, li postulis, ke la laŭŝtupa retirado de la fremdaj trupoj estu menciita en la protokolo. Kaj kiam Dubček nepetite elpaŝis por defendi siajn reformojn en Ĉeĥoslovakio, la sovetianoj reagis kun alergio kaj signalis, ke ili malemas aŭskulti lin kaj ne volas ŝanĝi la enhavon de la proponita protokolo. Breĵnev ankoraŭfoje resumis la kaŭzojn de la interveno kaj regurdis ĉiujn staciojn de la konflikto, ekde sia vizito de decembro 1967 en Prago ĝis la interparoloj en Čierna, kaj certigis, ke Moskvo neniam celis altrudi sian socialisman modelon al Ĉeĥoslovakio. Al Dubček, kies obstinon li evidente subtaksis, li sciigis, ke la sovetia flanko perdis la fidon je la ĉeĥoslovaka KP, kiu tamen rekte koncernas la sekurecajn interesojn de Sovetunio. Li konsilis al Dubček adopti la sintenon de Gomułka, kiu laŭ Breĵnev estis ĝoja kaj dankema pro la ĉeesto de sovetiaj trupoj en sia lando depost 1956.

Post kiam Černík kaj Dubček ankoraŭfoje provis klarigi al la sovetianoj siajn starpunktojn, Breĵnev koleriĝis kaj forlasis kun siaj kamaradoj la salonon. La ĉeĥoslovakoj, kiuj sentis sin en senespera situacio, kiu similis al premsonĝo, venis al la konkludo, ke estus eble tamen pli bone subskribi la protokolon, ĉar en alia kazo povus sekvi io pli terura. La ĉeĥoslovakoj opiniis, ke la sovetianoj ĉiukaze faros kion ili volas, ĉar ili estis pli fortaj. Finfine la sovetianoj iomete cedis kaj konsentis, ke la ĉeĥoslovakoj ne devas agnoski la legitimecon de la interveno kiel „frata helpo“ nek akcepti la aserton, ke en Ĉeĥoslovakio okazis kontraŭ-revolucio. La rezigno pri tiu formulo flanke de la sovetianoj estis konsiderita de la ĉeĥoslovakoj kiel (mal)granda venko, kiu faris ilin pli pretaj subskribi tian protokolon. Aliflanke, la nuligo de la XIVa eksterordinara partia kongreso, kiu devis okazi en septembro, estis grava bato. Pri la retiro de siaj trupoj la sovetianoj konsentis nur, kiam laŭ ilia pritakso „la socialismo ne plu estas minacata en Ĉeĥoslovakio“. Sed laŭ la ĉeĥoslovakaj politikistoj tia minaco neniam ekzistis. Krom tiuj punktoj, en la plej lasta versio de la subskribota interkonsento, kiu fariĝos konata kiel „Moskva protokolo“, eĉ mankis la kondamno de la ĉeĥoslovakaj reformoj. Malgraŭ tiuj „plibonigoj“, al la protokolo, kiun la ĉeĥoslovakoj devis subskribi kaj kiu aspektis por ili kiel kapitulaco, Kriegel rifuzis doni sian subskribon,[399] dum Dubček finfine povis esti konvinkita subskribi ĝin. Ponomarjov minacis la ĉeĥoslovakojn: „Se vi ne subskribos nun, vi subskribos post unu semajno. Se ne post unu semajno, tiukaze post du semajnoj, kaj se ne post du semajnoj, tiam post monato.“ Kio koncernas la sintenon de Svoboda dum la kunsidoj kun la sovetianoj en Moskvo, ŝajnas, ke li minacis plurfoje per suicido por havi efikan premilon kontraŭ la sovetianoj.[400] Ĉi tiu legendo formis iuspecan heroan miton ĉirkaŭ Svoboda, kiu elpaŝis en tiu periodo ege ambigue, kvankam ŝajnas, ke li rifuzis kunlabori kun la grupo, kiun la sovetianoj sub-

[399] Pri tio vd. https://www.radio.cz/de/rubrik/geschichte/das-moskauer-protokoll-war-die-kapitulation-historiker-precan-im-interview.

[400] Kiom ofte Svoboda minacis la sovetianojn per suicido ne estas klare; Pauer menciis, ke tio okazis tri-kvar fojojn.

tenis dum la interveno. Finfine, Svoboda ne mortpafis sin kaj ĉu li vere estus farinta tion – neniu scias. Ankaŭ Dubček diris, ke li ne timas la morton.

La „Moskva protokolo“, kiun la ĉeĥoslovakoj devis subskribi, konsistis el 15 punktoj (interkonsentoj aŭ postuloj) kaj enhavis jenan esencon:

1. Necesas respekti la ĝenerale agnoskitajn principojn en la rilatoj inter la frataj landoj surbaze de la finaj dokumentoj de la kunsidoj de Čierna nad Tisou kaj la konsultiĝoj de Bratislavo.
2. La ĉeĥoslovakaj komunistoj devas nuligi la validecon de la eksterordinara XIVa partia kongreso de la 22a de aŭgusto 1968. Nova XIVa partia kongreso estos kunvokita, kiam la situacio en la lando normaliĝos.
3. La ĉeĥoslovakoj devas eksoficigi la ĉefajn funkciulojn de la „Praga printempo“, kiuj „ne konformas al la bezonoj de la firmigo de la gvida rolo de la laborista klaso“.
4. Necesas reakiri la kontrolon (r. vladanie) pri la gazetaro, eviti publikajn aktivecojn de ĉeĥoslovakaj grupoj kaj organizaĵoj, kiuj „reprezentas kontraŭ-socialismajn poziciojn“. Estas malpermesate allasi la agadon de la „kontraŭ-marksisma socialdemokratia partio“. Necesas adopti novajn leĝojn por „kontraŭbatali la kontraŭ-socialismajn fortojn en la lando“ kaj rigore kontroladi la „malamikajn individuojn kaj kolektivojn“.
5. La iom-post-ioma retirado de la „aliancataj trupoj“ okazos nur, kiam la aliancanoj konstatos, ke „la minacoj por la socialismo en Ĉeĥoslovakio ne plu ekzistas“.
6. Necesas eviti konflikton inter la okupaciaj trupoj kaj la civitanoj de Ĉeĥoslovakio.
7. La ĉeĥoslovaka KP devas promesi, ke la laboro de la funkciuloj, kiuj laboras cele al la firmigo de la socialismo kaj de la „amikaj rilatoj kun USSR“ kaj kiuj batalas kontraŭ la „kontraŭkomunismaj fortoj“, ne estu malhelpata.
8. Antaŭvidiĝas baldaŭaj interparoloj pri la kreskigo de la ĉeĥoslovaka ekonomio kaj evoluigo de la scienca kaj teknologia kunlaboro kun USSR.
9. Necesas fortigi la defendan sistemon kaj aliajn formojn de la kunlaboro inter la socialismaj landoj fone de la „perfidaj aktivecoj de la imperiismo, kiuj estas direktataj kontraŭ la paco kaj sekureco de la nacioj kaj kontraŭ la socialismo“.
10. Necesas „fortigi la unuecon de la socialisma komunumo, la pacon kaj internacian sekurecon“, rezisti kontraŭ militismaj, novnaziaj kaj revenĝismaj klopodoj lige kun la rezultoj de la Dua Mondmilito, daŭre batali kontraŭ la malicaj agoj de la imperiismo, apogi la naciliberigajn movadojn, strebadi al internacia malstreĉiĝo.“
11. Necesas forstreki la traktaĵon de la t.n. „ĉeĥoslovaka afero“ de la tagordo de la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj („La gvidantoj de la ĉeĥoslovaka KP kaj de la ĉeĥoslovaka registaro deklaris, ke la ĉeĥoslovaka registaro ne petis, ke ĉi tiu afero estu diskutata en la Sekureca Konsilio“; „La reprezentantoj de la ĉeĥoslovaka KP raportis, ke la registaro de Ĉeĥoslovakio estas instruita strikte kontraŭi la debaton pri la situacio en Ĉeĥoslovakio en la Sekureca Konsilio aŭ alia organo de UN kaj kategorie peti la forigon de ĉi tiu tagordero.“)
12. La oficejo de la ĉeĥoslovaka KP devas repritaksi la aktivecojn de la membroj de la ĉeĥoslovaka registaro, kiuj troviĝas ekster Ĉeĥoslovakio kaj tie reprezentas ĝian internan kaj eksteran politikon kaj la politikon de la registaro. En kazo de neceso estos farendaj ŝanĝoj de la personaro en la partiaj kaj ŝtataj organoj, precipe en la ministerio de la internaj aferoj.
13. Necesas interŝanĝi la partiajn kaj ŝtatajn delegaciojn „por reciproke pritaksi la aperantajn problemojn por trakti internaciajn demandojn“.
14. „La delegacioj konsentis en la intereso de ambaŭ komunismaj partioj kaj de la amikeco inter Ĉeĥoslovakio kaj Sovetunio konsideri la kontaktojn inter la estroj de KPSU kaj la ĉeĥoslovaka KP en la periodo post la 20a de aŭgusto strikte sekretaj.“
15. „Ambaŭ partioj promesis en la nomo de la partioj kaj registaroj profundigi la tradician historian amikecon de la popoloj de ambaŭ landoj por eternaj tempoj.“ [401]

Post la subskribado de tiu protokolo, kiu devis fariĝi kvazaŭ nova Agadprogramo por Ĉeĥoslovakio, la sovetianoj, kiuj sentis sin liberigitaj de la premo, reagis per interbrakumado kaj frata interkisado kaj

[401] Laŭ https://cs.wikisource.org/wiki/Protokol_o_jednání_delegace_SSSR_a_ČSSR_(1968), http://csds.cz/cs/g6/4654-DS.html.

invitis la ĉeĥoslovakojn festadi la eventon per komuna drinkado kun la ĉefoj de la aliaj komunismaj partioj, kion la ĉehoslovakoj danke rifuzis. La plej lasta konflikto estiĝis ankoraŭ pro tio, ke la sovetianoj hezitis liberigi Kriegel de sia izola arestado, ĉar la ĉeĥoslovakoj insistis pri tio, ke li povu reveturi al Ĉeĥoslovakio kune kun ili. La sovetianoj volis reteni lin ankoraŭ dum kelkaj semajnoj en Moskvo, verŝajne por havi ankoraŭ unu garantiaĵon aŭ ostaĝon en la manoj, per kiu en kazo de neceso oni povus premi aŭ ĉantaĝi la ĉeĥoslovakojn. Tiuj avertis la sovetianojn, ke la retenado de Kriegel negative influos la plenumadon de la protokolo. Tiu averto ŝajne impresis Breĵnev-on, kiu jam estis tedata de tiuj konfliktoj kun la ĉeĥoslovakoj, tiel ke li konsentis liberigi Kriegel kun la kondiĉo, ke li rezignu pri politika aktiveco. Dum la sekvanta vespermanĝo la ĉeĥoslovaka delegacio okazigis festparoladojn kun reciprokaj laŭdegoj por konservi la fasadon: Černík laŭdegis Svoboda-n, Mlynář laŭdegis Dubček-on kaj Husák-on pro iliaj meritoj kaj ne forgesis emfazi la amikecon kun Sovetunio. En sia interparolo kun Mlynář Kosygin laŭdegis Husák-on, kiu „faris en Moskvo bonan impreson“. En la interparolo kun „Saŝa“, kiun li ci-diris, Breĵnev denove fariĝis la afabla kaj bonvola patreca tipo, kiun li ŝajnigis esti jam pli frue. Li laŭdis ankaŭ la „multpromesan“ kamaradon Špaček, kiu devis fariĝi nova ĉeĥoslovaka ambasadoro en Moskvo, kvankam li ne estis interesata pri tiu oferto. Antaŭ la disiĝo de la delegacioj do ankoraŭ aperis io kiel bonega etoso, kvankam la tuta afero estis morte serioza.

En la nokto de la 26a al la 27a de aŭgusto la sovetia politburoo ankoraŭfoje renkontiĝis kun la gvidantoj de la kvar aliaj aliancanoj. Breĵnev informis ilin pri la ekzisto de la „Moskva protokolo“, kiun subskribis 21 ĉeĥoslovakoj. Laŭdante sin mem, Breĵnev emfazis, ke li, Kosygin kaj Podgornyj laboris tage kaj nokte por atingi la sukcesan rezulton. Oni drinkis je la honoro de la laboro de la koalicio, al kiu oni atribuis historian signifon por savi la socialismon. En la mateno de la 27a de aŭgusto, parto de la ĉeĥoslovaka delegacio (Svoboda, Dubček, Černík kaj Smrkovský kaj iliaj plej proksimaj kamaradoj) estis kvazaŭ sekrete resendita per sovetia aviadialo kaj sen protokolaj adiaŭaj honoraj al Prago, dum alia parto (Husák, Dzur, Kučera, Biľak, Indra kaj Kolder, la komplicoj de la sovetianoj) ankoraŭ restis en Moskvo por pliaj interparoloj kun la sovetianoj. Kiam en la sama tago la delegito de la sovetia politburoo, Mazurov, revenis el Prago al Moskvo, li estis eŭforie bonvenigita de Breĵnev per la vortoj „Dank´ al dio, ke ĉio pasis“.[402]

La sovetianoj celis ŝajnigi, ke la ĉeĥoslovakoj libervole subskribis ĉi tiun „Moskvan protokolon“, kvankam ĝi estis krude altrudita al ili. Ĉiu unuopa punkto enhavis admonon al la adreso de la ĉeĥoslovaka KP, kiu estis devigita respekti la volon de Moskvo kaj obei la disciplinon difinitan de la sovetia KP. Ĉiu punkto ilustris la metodon, laŭ kiu la sovetianoj celis gvidi kaj kontroli la agadon de la ĉeĥoslovakaj KP kaj registaro por estonte eviti scenarojn kiel la „Praga printempo“. Ĉiu gvida ĉeĥoslovaka partia funkciulo malmiskomprenis la enhavon kaj sencon de tiu protokolo, kies direktivoj devis esti centprocente respektitaj kaj plenumitaj en la estonto por eviti novan intervenon de trupoj de la Varsovia Pakto. Se Dubček ne obeos ilian volon, la aliancanoj estis pretaj eksigi lin de lia ofico senprokraste. La ĉefaj konsideroj de la ĉeĥoslovakaj politikistoj do ĉefe turniĝis ĉirkaŭ la demando kiel la principoj de la „Moskva protokolo“ povas esti utiligataj por la reala pragmata politiko sen tute rezigni pri la celataj reformoj.[403]

En la patrujo la ĉeĥoslovaka delegacio estis entuziasme rebonvenigita de la senscia popolo, al kiu oni kaŝis la veran situacion. Svoboda, Dubček, Černík kaj Smrkovský nebuligis ĝin en siaj publikaj paroladoj en la radio kaj anstataŭ honesta informado kontentigis la ĉeĥoslovakan publikon per ĝeneralaj patosaj frazaĵoj pri fido, lojaleco, funebro pri perditaj viktimoj, alta disciplino de la popolo, unuanimeco kaj unueco kaj la eblo daŭrigi la reformojn laŭ la akceptita „Agadprogramo“ de la ĉeĥoslovaka KP de la 5a de aprilo 1968 kaj en kunlaboro kun la Nacia Fronto por efektivigi la humanismajn idealojn de la socialismo kaj „konstrui nian landon kiel veran patrujon de la laboranta popolo“. En la parolado de Svoboda ankaŭ ne mankis la emfazo de la propra heroa rolo dum „tiuj malfacilaj tagoj“. Parolante kiel iama „soldato“, kiu bone scias, „kian sangoverŝadon tia konflikto inter civitanoj kaj de moderne ekipata armeo povas kaŭzi“, Svoboda diris, ke kiel „via prezidento“ kaj „patrioto“ li „sentis la devon fari ĉion por eviti tian sensencan sangoverŝadon“. Krom tiaj trankviligaj vortoj al la „karaj kuncivitanoj“ kaj „miaj karaj amikoj“, kiujn li laŭ propra konvinko certe „ne seniluziigis“, Svoboda samtempe klare avertis, ke oni ne toleros homojn, al „kiuj la socialismaj interesoj estas fremdaj“ kaj kiuj celas malhelpi la „normaligon“, kiu sekvos post la „tagoj kaj horoj“, „kiuj riskis iĝi tragikaj“. Por li „la loko de nia lando

[402] Pli detale vd. Pauer, p. 283-327.
[403] Schattenberg, p. 477.

povas esti nur en la socialisma komunumo“. Kvankam li evitis vortojn kiel invado aŭ okupacio, Svoboda aludis, ke la fremdaj armeoj „iom post iom plene retiriĝos“, sed tio dependos de la sukcesa efektivigo de la normaligo. „Ĝis tiam ilia ĉeesto restos politika realeco“.[404]

Kvankam Dubček parolis eĉ pli longe en la radio, lia „improvizita“ mesaĝo al la ĉeĥoslovaka popolo enhavis la saman esencon kiel tiu de Svoboda. Dubček alvokis la popolon en Ĉeĥoslovakio respekti la „realecon“, eviti „provokojn“, „pasiojn“ kaj „psikozon“, kiuj povus „akrigi la streĉitan situacion“, kaj prepari sin al la „normaligo“, kiu neeviteble limigos kelkajn ĝis nun atingitajn liberecojn. Li certigis, ke ĉiuj laŭleĝaj organoj denove funkcias kaj dankis al ĉiuj, precipe al la armeo, polico kaj milico, kiuj kontribuis por eviti pliajn konfliktojn. Krom tio li petis la homojn resti fidelaj al la socialismo. Koncerne la propran rolon, Dubček promesis, ke „en mia vivo mi faros nenion alian ol labori por la efektivigo de la idealoj de mia popolo“. Kiel unua sekretario de la partio kaj ĉefkomandisto de la popolmilicoj li atendis de la homoj, ke ili obeos la ordonojn, kiujn li donos al ili.

Ambaŭ paroladoj vekis en la publiko skeptikajn reagojn kaj profundan malfidon rilate la moskvajn interparolojn kaj la rezultojn atingitajn en Moskvo.[405]

Anstataŭ la „Moskva protokolo“, kiu estis nomita jen „perfido“, jen „politika suicido, „kapitulaco“ aŭ „kompromiso, aŭ eĉ komparita kun la Munkena interkonsento de 1938,[406] en Ĉeĥoslovakio oni publikigis iun sekan komunan deklaraĵon de la ĉeĥoslovaka kaj sovetia komunismaj partioj. Tiu oficiala komunikaĵo, kiu listigis la nomojn de la partoprenintoj en la moskvaj interparoloj kaj estis disaŭdigita en la radio, inter alie enhavis la frazojn, ke „dum la interparoloj oni traktis en malferma, kamaradeca diskuto demandojn, kiuj koncernas la farojn de la imperiismo kontraŭ la socialismaj landoj kaj estis ligataj kun la situacio en Ĉeĥoslovakio kaj la provizora restado de trupoj de kvin socialismaj landoj sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio.“ La komunikaĵo ripetis la neceson plenumi la interkonsentojn de Čierna nad Tisou kaj Bratislavo kaj emfazis la gravecon de la efektivigo de la „praktikaj paŝoj“, kiuj estis deciditaj en la interparoloj kun ambaŭ flankoj por „evoluigi la socialisman demokration, firmigi la socialisman ordon sur la bazo de la marksismo-leninismo“ kaj „normaligi la situacion en Ĉeĥoslovaki kiel eble plej rapide“. En la klopodoj atingi tiujn celojn kaj en la intereso de ĉiuj esencaj fortoj de la socio estis emfazita la graveco de la principoj de la „kunlaboro, reciproka respekto, egalrajteco, teritoria integreco, sendependeco kaj socialisma solidareco“. Kun tio estis ligita la promeso, ke „la trupoj de la aliancataj landoj, kiuj provizore troviĝas sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio, ne enmiksiĝos en la internajn aferojn“ de la okupata lando. Estis skribite, ke oni „interkonsentis pri la kondiĉoj por la retiro de tiuj trupoj de la ĉeĥoslovaka teritorio depende de la mezuro de la normaliĝo de la situacio en Ĉeĥoslovakio“. En la komunikaĵo ne mankis ankaŭ la mencio, ke „la ĉeĥoslovaka flanko“ rezignis „peti la trakton de la [ĉeĥoslovaka] demando en la Sekureca Konsilio de UN kaj postulas la forstrekon [de tiu temo] de la tagordo“. Sekvis la kutimaj frazoj pri la firmigo de la solidareco inter la socialismaj landoj, la fortigo de la paco sur la internacia nivelo kaj de la batalo kontraŭ militismaj, revenĝismaj kaj novnaziaj fortoj, kiuj deziras revizii la rezultojn de la dua mondmilito, ktp. Pri la moskvaj interparoloj estis notite, ke ili „okazis en etoso de la sincereco, kamaradeco kaj amikeco.“[407]

Post la publikigo de tiu komunikaĵo diversaj sekretaj radiostacioj en Ĉeĥoslovakio alvokis la popolon rifuzi tiun falsan kompromison kaj postulis la malaperon de la fremdaj trupoj antaŭ ol iu ajn interkonsento povas esti konsiderata. Fakte, la popolo nur duonkore subtenis la politikon de Dubček rilate la interkonsentojn kun la sovetianoj kaj rifuzis ĉiuspecajn cedojn al ili aŭ kompromisojn kun ili. Ĉiuj fifaroj de la sovetianoj kaŭzis precipe en la ĉeĥaj landoj, kie establiĝis iu speco de radikala nihilismo, aparte akran rifuzon flanke de la popolo.

En Prago aperis sarkasmaj afiŝoj kun 10 principoj de la pasiva rezisto: „ni lernis nenion, ni scias nenion, ni havas nenion, ni donas nenion, ni povas nenion, ni komprenas nenion, ni vendas nenion, ni ne helpas, ni ne perfidas, ni forgesos nenion.“[408]

Malgraŭ la ĝenerala skeptiko, kiu eble anstataŭis la esperon kaj la naivecon, Dubček daŭre ricevis preskaŭ centprocentan apogon de la popolo, kiel montris enketo farita la 28an de aŭgusto. Ankaŭ

---

[404] Kamberger, p. 73-75. Esperantigo de aK.
[405] Kamberger, p. 76-79. Esperantigo de aK.
[406] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Munkena_interkonsento.
[407] Kamberger, p. 70-73. Esperantigo de aK.
[408] Kamberger, p. 79. Esperantigo de aK.

Svoboda estis sur la pinto de sia populareco.[409] Tio estas rimarkinda fakto, ĉar oni povus ankaŭ imagi, ke tiu krude trompita kaj agresita popolo komplete rezignis kaj seniluziiĝis pri Dubček, kies politiko finfine totale fiaskis malgraŭ iom heroa kontraŭstarado. Laŭ Dubček, multaj ĉeĥoslovakoj ne tute komprenis la novan situacion en la lando kaj ne scipovis ĝuste taksi la realaĵojn sub la kondiĉoj de la sovetia okupacio. Al li ŝajnis, ke la ĉeĥoslovaka popolo taksis la fortecon de sia registaro pli granda ol ĝi efektive estis. Malgraŭ duboj, Dubček dume restis la sola simbolo de la espero por la *libereco* en Ĉeĥoslovakio. Ĝenerale la homoj kredis, ke la reformpolitiko estos iel daŭrigata, sed oni ankaŭ devis kompreni, ke la politiko estos alia kaj ke ĝi ne dependos nur de la ĉeĥoslovakoj mem.

La 26an de aŭgusto en Bratislavo komenciĝis la kongreso de la slovaka KP, dum kiu la sovetia interveno finfine estis kondamnita ankaŭ de tiu partio, kiu deklaris sin solidara kun la ĉeĥaj komunistoj.[410] En tiu kongreso Gustáv Husák, kiu ĵus revenis el Moskvo, jam ludis la centran rolon kaj diktis la politikan tonon. Lia tuta konduto donis impreson pri tio, kio sekvos, se Husák estos la ĉefo de la slovaka, poste neeviteble ankaŭ de la ĉeĥoslovaka KP. La taktiko, kiun li elektis, estis samtempe komplika kaj ruza, ĉar ĝi estis ambigua. Lia parolado estis miksaĵo de ´racia´ argumentado kun mizera oportunisma hipokritado, funkciaj mensogoj en demagogia stilo kaj naciismaj akcentoj. Unuflanke li atentigis, ke al la solvo laŭ la „Moskva protokolo“ ne ekzistis alternativo por eviti sangoverŝan internan militon, kaj kvazaŭ konsolis la kamaradojn, ke „ni ne kulpas“ pri la interveno, kiu ne okazis laŭ la deziro de la ĉeĥoslovakaj gvidantoj kaj kiu estis „tragika miskompreno“. La interparoloj kun la sovetianoj en Moskvo estis nete plibeligitaj. Aliflanke, li esprimis plenan fidon al la registaro de Dubček kaj Svoboda, kiujn li nomis „honorindaj homoj“. Laŭ li ĉiuj gvidaj ĉeĥoslovakaj politikistoj estis pretaj sekvi la elektitan vojon, kiu kondukos la landon el la sakstrato, kaj ne dizertos en tiu malfacila momento de la historio de la ĉeĥoslovaka popolo. Lian paroladon sekvis kritika diskutado inter la ĉeestantaj delegitoj. Kvankam la plimulto de la parolantoj, kiuj plendis, ke ili ne ricevis aktualajn informojn pri la moskvaj interparoloj, kondamnis la intervenon, la okupacion kaj la politikan diktaton, ili tamen montris sin senhelpaj. La elekto de la nova Centra Komitato de la slovaka KP kaŭzis radikalan elŝanĝon de 84% de la membroj. Ne reelektitaj estis en principo ĉiuj membroj, kiuj konsistigis la CKn antaŭ januaro 1968. Inter ili troviĝis ankaŭ Vasil Biľak, kiu forestis kaj perdis la postenon de la unua sekretario de la slovaka KP, kiun transprenis Husák mem. La slovaka partia kongreso tamen rifuzis la decidojn de la XIVa eksterordinara kongreso de la ĉeĥoslovaka KP en Vysočany kaj aprobis la „provizoran restadon de la trupoj“ de la Varsovia Pakto en Ĉeĥoslovakio. La ´pragmatisman´ „novan realismon“ de Husák devis respeguli la kongresa rezolucio, kiu atribuis al la gvidantoj de la ŝtato kaj partio kaj al Husák persone „altajn moralajn kvalitojn“, ke ili ne trompis la fidon de la popolo ktp. Ĝi entenis ŝmiran hipokritan konfeson pri la maksimoj de la „demokratia socialismo“ kaj la „proleta internaciismo“ kaj al Dubček estis esprimita laŭ komunisma maniero „neskuebla fido“. Sed multaj delegitoj ne estis tre feliĉaj pri tiaj eklektikismaj formuloj. Tamen nur 29 de 600 delegitoj voĉdonis kontraŭ la proponita rezolucio kaj 69 sindetenis, kio signifis, ke almenaŭ 18% de la delegitoj esprimis sian dubon pri la enhavo de tiu rezolucio, kiu estis plena demagogia falsaĵo. Por deflankigi la kritikan diskuton Husák parolis pri la slovaka nacia ribelo de 1944, en kiu li mem partoprenis, kaj pri la ĉeĥoslovaka federismo, kiu estis kvazaŭ lia ideo kaj kiun li volis definitive efektivigi por fortigi la slovakan parton de la gvido en la ŝtato rilate al la praga centro,[411] kiu en Slovakio neniam estis populara. Tiel Husák povis mem elstarigi sin sur la podion, grandigi sian potencon kaj kreskigi sian popularecon. La sovetianoj sciis, ke tiu kurso ne estas danĝera por ili, ĉar ĝi ne insistos pri la politiko de la radikalaj reformoj de la „dekstraj fortoj“. Por ili Husák estis la ideala alternativo al Dubček, ĉar li scipovis ruze kaj oportunisme adapti sin al ilia volo kaj krom tio li mem povos realigi sian malnovan revon fariĝi la unua numero en la ĉeĥoslovaka KP. En tiu momento nature ankoraŭ neniu povis imagi, kiel aspektos la venontaj jaroj kaj jardekoj sub la regado de tiu Husák kiel ĉeĥoslovaka vasalo de Sovetunio, kiu sufokos ĉian politikan kaj socian reziston.

En la tagoj de la 27a kaj 28a de aŭgusto kaj en Bratislavo kaj en Prago do okazis akraj diskutoj inter radikalaj reformistoj kaj tiuj politikistoj de la komunisma partio, kiuj akceptis la moskvan diktaton, kies internacijura statuso estis pli ol dubinda. Per sia interveno Sovetunio klare lezis tri fundamentajn principjn de la universala juro: la rajton de ciu popolo mem decidi pri sia sorto, la neenmiksiĝon en la internajn aferojn de la ŝtatoj kaj la respekton de la internacia juro en la interŝtataj rilatoj. La protokolo ne povis esti konsiderata kiel legitima internacia traktato inter du egalrajtaj ŝtatoj, ĉar ĝi estis subjektive

---

409 Ciferojn vd. ĉe Pauer, p. 379.

410 Vd. Schulze Wessel, p. 282, laŭ *Rudé právo* de la 27a de aŭgusto 1968, p.1.

411 Pauer, p. 349-359.

klare direktita kontraŭ la reforma movado, precipe kontraŭ ĝiaj ĉefaj protagonistoj en Ĉeĥoslovakio. Ankaŭ la aserto pri la „neenmiksiĝo“ estis pure mensoga frazaĵo. La diskutoj riskis disŝiri la koherecon de la reformkomunisma tendaro ene de la partio.

La 27an en Prago komenciĝis interkonsultiĝo de la CK-membroj, kiuj estis demokratie elektitaj en Vysočany. Dum tiu kunveno Bohumil Šimon prezentis sian raporton pri la rezultoj de la diskutoj en Moskvo kaj resumis la devigojn por la ĉeĥoslovaka flanko. La CK-membro Jaroslav Šabata, radikala reformisto el Brno, konstatis politikan fiaskon de la okupacio kaj avertis, ke la sovetianoj provas atingi siajn celojn nur per minacoj, premo kaj perfidaj manovroj. Al Dubček li riproĉis, ke li faris kelkajn gravajn politikajn erarojn, tiel ke nun estus malfacile fidi nur al tiu persono. Li timis, ke la demokratia kontrolo perdiĝos, se oni stilizos lin kiel netuŝeblan figuron. Ankaŭ Lubomir Sochor diagnozis politikan kaj moralan malsukceson de Sovetunio, al kiu li riproĉis, ke ĝi cinike rompas konvenciojn. V. Šilhán, la reprezentanto de Dubček en la XIVa eksterordinara partia kongreso de Vysočany dum lia foresto en Moskvo, rifuzis la oficialan komunikaĵon kiel „dikton de superpotenco” kaj komparis la „barbaran konduton” de la sovetianoj kun la konduto de la usonanoj en Vjetnamio. Kvankam Císař, kiu apartenis al la opozicio de la Vysočany-CK, nomis Sovetunion „furioza tigro, kiu kapablas fari ĉion”, li esprimis la fidon al la homoj de Dubček, kiu dume restis unua sekretario. Oni diskutis ankaŭ pri la demandoj de la honoro, de la legitimeco de la XIVa eksterordinara partia kongreso de Vysočany kaj pri la ŝanĝoj de la personaro. Post kiam la membroj de la Vysočany-CK adoptis iun rezolucion, kiu koncernis la reviziadon de la personaro, la rekunvokadon de nova partia kongreso, la rekonstruadon de la partia aparato, la forigon de diskreditataj partiaj funkciuloj kaj la renovigon de la Centra Komitato, sekretariato kaj prezidio, oni esprimis la fidon al la partiaj gvidantoj, kiuj revenis el Moskvo, kaj ĉesigis la aktivecon de la CK de Vysočany, kiu daŭris nur naŭ aŭ dek tagojn, nome ĝis la 31a de aŭgusto, pro la nuligo fare de la „Moskva protokolo”. En tiu CK la adeptoj de la reformoj havis la plimulton, sed ĉar mankis la slovakaj delegitoj, ĝi estis praktike nur la afero de la ĉeĥoj kaj do ne sufiĉe reprezenta por la tuta lando. Per tio finiĝis ankaŭ la duobla regado de du Centraj Komitatoj. Per la memdissolviĝo de la CK de Vysočany la radikalaj reformistoj ricevis historian baton, de kiu ili ne resaniĝos kaj kiu ebligos al la malnova reĝimo restaŭriĝi. Šilhán tute pravis, se li avertis, ke Ĉeĥoslovakio reakiros sian plenan suverenecon nur, kiam la „nenormala disdivido de la mondo” estos venkita (por kio necesis atendi ĝis 1989).[412]

La oficiala misinformado de la publiko rilate la aktualan situacion kondukis en Ĉeĥoslovakio al altgrada diletantismo en la politiko kun nekvalifikataj eldiroj flanke de diversaj reformistoj kaj intelektuloj, kiuj restis sen scioj pri la realaj procezoj malantaŭ la kulisoj, kiuj estis stiritaj esence de Breĵnev kaj lia bando en Moskvo plus Gomułka, Ulbricht, Kádár kaj Ĵivkov, kies opinioj devis influi la finajn decidojn de la sovetianoj.

Treege strangan rolon ludis Oldřich Černík, la estro de la ĉeĥoslovaka registaro, kiu informis la 28an de aŭgusto gvidajn reprezentantojn kaj ĉefredaktorojn de amaskomunikiloj dum interna gazetara konferenco, kiun li kunvokis sur la Praga kastelo. Lia tiama maniero disvastigi fuŝajn informojn devas esti konsiderata kiel intenca misinformado de la publikeco. Pri la okazaĵoj en Moskvo li elpuŝis plej kuriozajn asertojn, kiuj estis altgrade dubindaj aŭ simple malĝustaj. Ĉi tiu celtrafa misinformado de la amaskomunikiloj fare de la tiama ĉefo de la ĉeĥoslovaka registaro fariĝis unu el la plej gravaj fontoj por politikaj iluzioj kaj formado de mitoj en la post-aŭgusta tempo en Ĉeĥoslovakio.[413]

En sia kunsido de la 28a de aŭgusto, la Nacia Asembleo (parlamento) de Ĉeĥoslovakio publikigis deklaraĵon, en kiu oni nomis la okupacion de Ĉeĥoslovakio fare de la armeoj de la Varsovia Pakto „kontraŭlega“ kaj postulis de la registaro, ke ĝi „energie insistu pri la momento de la plej baldaŭa foriro de la eksterlandaj trupoj“.[414]

La 31an de aŭgusto kunvenis la pleno de la malnova CK de la ĉeĥoslovaka KP, kiu ne estis malpermesita de la „Moskva protokolo“. En ĝi, male, eĉ partoprenis ankaŭ 80 kooptitaj delegitoj de la eksterordinara XIVa partia kongreso en Vysočany. Dum tiu kunsido, kiu havis nur du tagorderojn, nome la analizadon de la aktuala situacio kaj demandojn de la personaro, Dubček rifuzis pritaksi pasintajn eventojn, precipe la intervenon mem, kiu ja estis nura punoperaco de la sovetianoj kontraŭ Ĉeĥoslovakio, kion oni ja ne povis diri en tiu formo, tamen ne sen samtempe celebri sian funebron pri la „tragika“

[412] Pauer, p. 342-8; https://cs.wikipedia.org/wiki/Vysočanský_sjezd_KSČ.
[413] Pauer, p. 374.
[414] Kamberger, p. 79-80.

situacio, kaj klopodis prezenti sin kiel politikan realiston. En sia memkritiko li tamen konfesis, ke lia politiko tro malmulte respektis la „limigan faktoron“ de la strategiaj interesoj de Sovetunio kaj de la Varsovia Pakto kaj emfazis la neceson liberiĝi de la „liberalismaj kaj sektemaj tendencoj“ (sic). Sen klarigi la kondiĉojn, kiujn li trovis dum sia restado en Moskvo kaj sen kritiki Sovetunion, li alvokis al la plenumado de la moskvaj interkonsentoj, solidigo de la ekonomio, efektivigo de la federigo de la ŝtato, fortigo de la gvida rolo de la partio (!) kaj respektado de la interesoj de la ŝtatoj de la Varsovia Pakto. Fine li rekomendis prokrasti la laŭvican oficialan XIVan partian kongreson, ĉar tiu de Vysočany estis, kiel konate, nuligita. Pri la diversaj aktualaj kaj gravaj temoj Dubček restis malkonkreta kaj nur esprimis fortan senton de optimismo. Tiel multaj brulaj demandoj ligataj kun la okazaĵoj dum la restado de la ĉeĥoslovakoj en Sovetunio kaj kun la morala sinteno kaj politika respondeco de la ĉeĥoslovaka delegacio dum la interparoloj kun la sovetianoj en Moskvo restis verŝajne ne responditaj en kulturo de politikaj tabuoj, kiuj lasis Sovetunion kaj la „moralon“ de la komunisma partio ekster ĉia kritiko.[415]

Svoboda, kiu estis stilizita kiel ĉefa heroo, pravigis sian konduton post la interveno kaj rakontis diversajn stultaĵojn, kiuj estis hontindaj por ŝtatestro de suverena ŝtato, kiu troviĝis sub la okupacio de fremda potenco. Sed lia elpaŝo tamen rikoltis aplaŭdon kaj ĝeneralan aprobon. Smrkovský havis la maldankan taskon laŭtlegi la tekston de la „Moskva protokolo“, kiu ne estis skribe distribuita al la delegitoj pro sia sekreta karaktero. En la diskuto la frakcio de la konservativuloj direktis fortan kritikon kontraŭ Dubček kaj la ceteraj partiaj gvidantoj, al kiuj ili ŝovis la respondecon por la invado. Vilém Nový entute dubis pri la kredindeco de la Dubček-gvidantaro. Miloš Jakeš kritikis la koopton de tiuj 80 delegitoj kaj rekomendis imiti la sintenon de Gustáv Husák. Biľak, Piller, Jakeš kaj Kolder certigis, ke ili faris neniun perfidon kaj klopodis adopti la rolon de martiroj. Sed Jaroslav Šabata, la radikala reformisto el Brno, akre kritikis la sintenon de la konservativaj fortoj. Kiel kaŭzon de la okupacio li nomis la ´malsanktan´ koalicion de la „dogmaj gvidantoj de la sovetia KP kaj aliaj partioj kun niaj dogmuloj“ kaj avertis, ke estas falsa recepto fari la „normaligon“ kondiĉo por la retiro de la fremdaj trupoj. Laŭ li, la amikeco kun Sovetunio povas baziĝi nur sur la bazo de la suvereneco kaj egalrajteco. Al la sovetianoj li klarigis, ke al ili mankas kompreno por la „demokratia substanco de la marksismo kaj internaciismo“. La moskvan dikton li ne konsideris taŭga bazo por realisma politiko. Laŭ li tia politiko estas nur ebla, se ĝi baziĝas je la apogo de naŭ dekonoj de la popolo, kiu deziras tian politikon. Sed li restis pli malpli la sola, kiu kritikis la novan realismon. Mlynář, kiu mallaŭdis kaj la konservativulojn kaj la radikalajn reformistojn, admonis, ke estus granda eraro subfosi la „Moskvan protokolon“ per iuj trukoj, ĉar tio neeviteble kondukus al la katastrofo. Ambaŭ tendaroj estis atakitaj ankaŭ de Husák per sukaj vortoj, kvankam li defendis la koopton de la novaj CK-delegitoj. Černík, kiu daŭre estis estro de la registaro, esperis, ke la ideoj esprimitaj dum la XXa partia kongreso de la sovetia KP en 1956 povos esti kondukitaj al bona fino kaj ke la „pozicioj de la monda imperiismo povos esti malfortigitaj“. Krom tio li defendis la honoron de la porsovetiaj kunlaboremuloj kaj admonis, ke la plenumado de la moskvaj interkonsentoj estas la sola ĝusta vojo, sed li ankaŭ avertis la ĉeĥajn komunistojn, ke ili ĉesigu sian „arogantecon“ rilate al Slovakio. Dum tiu CK-kunsido aperis nova konflikto kun Breĵnev, kiu telefonis al Prago por esprimi sian ĉagrenon pri la koopto de tiel multaj Vysočany-delegitoj. Kiel en ritualo la nesekretaj voĉdonoj havigis unuanimajn rezultojn, malgraŭ la kritiko kontraŭ Dubček. Svoboda kaj Husák ricevis 100% de la aprobaj voĉoj. La konservativa alo povis esti neŭtraligita kaj la radikalaj reformistoj, reprezententitaj de J. Šabata (Brno) kaj J. Knébl (Ostrava), estis marĝenigitaj.

La nova prezidio konsistis nun el: Alexander Dubček (unua sekretario), Vasil Bil'ak, Oldřich Černík, Evžen Erban, Libuše Hrdinová, Jarolím Hetteš, Gustáv Husák, Vladimír Kabrna, Zdeněk Mlynář (ĝis la 17a de novembro 1968), Karel Neubert, Jan Piller, Josef Pinkava, Štefan Sádovský, Václav Slavík, Josef Smrkovský, Ludvík Svoboda, Bohumil Šimon, Josef Špaček kaj la slovakaj reformistoj Anton Ťažký kaj Josef Zrak. František Barbírek, Jozef Lenárt kaj Karel Poláček estis elektitaj kiel kanndidatoj. La plimulto de tiuj membroj pli malpli simpatie rilatis al la reformpolitiko de Dubček. Kelkaj el ĝiaj plej akraj kontraŭuloj kiel O. Švestka (kiu perdis ankaŭ la postenon de la ĉefredaktoro de *Rudé právo*), D. Kolder, E. Rigo, A. Kapek, O. Voleník, sed ankaŭ F. Kriegel kaj Č. Císař ne plu estis elektitaj. La nomoj de Biľak, Indra, Kolder, Švestka k.a. ricevis la predikaton „perfiduloj“. La posteulo de Kriegel kiel prezidanto de la Nacia Fronto fariĝis la iama socialdemokrato Evžen Erban. De la iama reakcia porsovetia frakcio en la prezidio do restis nur V. Biľak kaj en la sekretariato A. Indra. Ambaŭ probable restis utilaj por ili ne nur kiel komplicoj, agentoj kaj informantoj, sed ankaŭ kiel eblaj organizantoj de

[415] Pri kelkaj el tiaj demandoj vd. Pauer, p. 327-338.

„revolucia laborista kaj kamparana registaro“ en kazo de nova konflikto kun Moskvo, kiu nature restis suspektema pri Ĉeĥoslovakio. Rigardante la liston de la aktualaj membroj de la prezidio de la 31a de aŭgusto 1968, oni ne povis forgesi, ke nur la fortega premo flanke de la ĉeĥoslovaka socio evitis kompletan rezignon pri la ĉefaj elementoj kaj reprezentantoj de la reforma kaj demokratiiga movado. Sed tiuj politikistoj, kiuj estis firme ligataj kun la komunismo, kiun ili ne povis eskapi, troviĝis en triobla konflikto de la lojaleco – rilate al sia popolo, la partio kaj Sovetunio kaj la Varsovia Pakto. La „pasivan reziston“ anstataŭis la „rezisto per kunlaboro“, kiu fariĝis la nova formulo de la politiko post la elimino de la plej radikalaj reformistoj kaj kontraŭuloj de Dubček.

La nova CK de la ĉeĥoslovaka KP akceptis la „Moskvan protokolon“ dum sia kunsido de la 31a de aŭgusto 1968. Tio ne signifis, ke la sovetia propagando kontraŭ la ĉeĥoslovakaj reformistoj ĉesis. Tion male montris artikolo, kiu estis publikigita en tiu tago en la centra partia organo *Pravda*. Laŭ tiu artikolo, la „kontraŭ-revoluciaj bandoj“ konsistis el „40 mil neplibonigeblaj burĝoj“ en Ĉeĥoslovakio kaj estas „likvidendaj.“ La „Moskva protokolo“ ne estis ratifebla en la ĉeĥoslovaka parlamento kaj devis resti publika sekreto. Per ĝi la sovetianoj sekurigis al si kiel okupacia potenco la rajton kundecidi en la ĉeĥoslovaka politiko, kaj la ĉeĥoslovaka registaro devis agnoski tiun rajton. Pensi pri la retiro de la sovetiaj trupoj estis ankoraŭ tro frue.

Fine eble taŭgas kelkaj klarigoj, kiujn liveris Evžen (Eugen) Löbl, kiu verkis inteligentan libron pri la „Praga printempo“, kial la sovetianoj estis devigitaj sufoki la „Pragan printempon“. Unue necesas konscii pri la premiso, ke Sovetunio konsideris sin granda mondpotenco, kiu havis siajn interesojn kiel tia. La socialismo ludis nur duarangan rolon, ĝi estis kvazaŭ preteksto por ludi la ideologian rolon de grandpotenco, kiu bezonis iun teorian instrumentaron por atingi siajn celojn. La sovetia modelo ne estis socialisma modelo kaj Sovetunio ne estis socialisma ŝtato. En la socialismaj ŝtatoj efektiviĝis nur la unua fazo de la socialismo – la eksproprietigo de la (privataj) posedantoj de la produktiloj. La ĉefa intereso de Sovetunio konsistis en tio determini la politikon de ĉiuj okupataj landoj. La konflikto kun Jugoslavio en 1948 estis konflikto de grandpotenco kun lando de la propra ideologia influa sfero. La sama peripetio ripetiĝis kun Albanio, Rumanio kaj Ĉinio. En la kazo de Ĉeĥoslovakio, Sovetunio fakte malpli timis sendependan politikon de tiu lando aŭ ĝian eksiĝon el la sovetia bloko, kio cetere tute ne estis intencata flanke de Prago. Sed Sovetunio multe pli timis la danĝerojn, kiuj troviĝis en la specifecoj de la ĉeĥoslovaka reform-koncepto por la politiko kaj ekonomio. Tiu koncepto enhavis elementojn, kiuj estis komplete fremdaj kaj kontraŭdiraj por Sovetunio, kiu aplikis politikan, socian kaj ekonomian sistemon bazitan sur iaj marksismaj, leninismaj kaj stalinismaj teorioj. La danĝero por la sovetianoj konsistis en la koncepto de ŝtato, kiu bazas sian politikan, ekonomian kaj kulturan fundamentojn sur principojn, kiuj povus subfosi la ideologian koherecon de Sovetunio kiel grandpotenco. La sovetianoj do timis, ke pere de siaj reformoj Ĉeĥoslovakio forlasos la socialismon kaj realproksimiĝos al la Okcidento. Ŝajnas, ke tiu timo estis vana. La ĉeĥoslovakaj reformistoj tute ne celis reenkonduki la kapitalismon kaj eĉ ne in-tencis forlasi la socialismon, sed nur modifi la sovetian socialisman modelon per la enkonduko de kelkaj merkataj elementoj en la ekonomion por pliefikigi la socialisman sistemon entute. Laŭ la interpretado de la sovetianoj, la reformemaj intelektuloj de Ĉeĥoslovakio preparis kontraŭ-revolucion, kvankam en la realeco ili celis demokratiigi la stalinisman socialismon surbaze de valoroj kiel libereco, humanismo, scienc-teknika revolucio kaj forigo de la ekspluatado de la homo far la homo. Sed valoroj kaj konceptoj kiel libereco, demokratio, humanismo, merkato k.s. estis por la sovetianoj altgrade suspektaj nocioj, kiuj rememorigis ilin pri la malnovaj burĝaj kaj kapitalismaj tempoj, kiujn ili abomenis kaj abolis (pro kio ili havis eternan konflikton kun la Okcidento). Do, Sovetunio estis devigata elimini la influon de tiuj intelektuloj, kiuj celis ŝanĝi la sovetian modelon kaj elekti propran, „trian“ vojon al la socialismo, kaj altrudi al Ĉeĥoslovakio sian modelon, kvankam la sovetianoj asertis, ke ili altrudas nenion al aliaj popo-loj. Anstataŭ akcepti tiujn reformojn, al Ĉeĥoslovakio oni rabis ĝian ŝtatan suverenecon kaj malhelpis al la reformemaj intelektuloj ludi la gvidan rolon en tiu ŝtato.[416]

La ĉeĥa verkisto Pavel Kohout diris en intervjuo kun la svisa televido en 2010, ke la sovetianoj prokrastis la armean intervenon, ĉar ili volis atendi kiel la ekonomiaj reformoj en Ĉeĥoslovakio evoluas

[416] Löbl/Grünwald, p. 29-31, 47.

por vidi, ĉu ili eventuale utilas al Sovetunio. Kiam ili rimarkis, ke la reformoj celas ŝanĝi la tutan sistemon, ili devis agi kaj ĉesigi la eksperimenton, ĉar ili vidis sian socialismon en danĝero.[417]

Ĉar Sovetunio do agis kiel ĝi devis agi kiel hegemonia imperiisma grandpotenco, ĝi obstine kontraŭstaris, subpremis kaj sabotis la intencojn, celojn kaj strebojn de alternativaj socialismaj reformistoj kaj reagis per senkompataj sufokado, disbatado kaj detruado de ĉiuj alternativaj konceptoj proponitaj de tiuj reformistoj, ĉar ili ne konformis al la sovetia sistemo aŭ modelo. Tiel la sovetianoj agis kaj reagis en GDR 1953, en Hungario 1956 kaj en Ĉeĥoslovakio 1968 kaj en principo intencis fari la samon ankaŭ en Pollando, kie la homoj volis forlasi la stalinisman modelon, pledante por pli humanisma kaj efika socialismo.

### Survoje al la „normaligo“ (aŭ „normaliĝo“)

La sekva historio pri la persona sorto de Ota Šik respegulas samtempe la politikan evoluon en Ĉeĥoslovakio post la sovetia interveno de aŭgusto 1968. En Belgrado Šik ricevis la komunikon el Prago, ke li demisiu kiel anstataŭanta ĉefministro. Post tio li povus ricevi ĉe la ĉeĥoslovaka ambasado en Jugoslavio specialan konsilistan postenon en rilato kun ekonomio. La 3an de septembro prezidento Svoboda konfirmis lian demision, kiu okazis „laŭ propra deziro“ de Šik, kiel li skribis, kun danko pro lia laboro. Tio estis la unua paŝo de la forigo de Šik kaj de la nuligo de liaj reformoj fare de la reakciuloj, kiuj celis restaŭri la malnovan reĝimon en Ĉeĥoslovakio. Formale, Šik restis direktoro de la Ekonomia Instituto. Dum ĉiuj anoj de la ĉeĥoslovaka registaro, kiuj feriis en Jugoslavio, reveturis al Prago, Šik restis en tiu lando, kies registaro afable akceptis lin kaj lian familion per unika gastamo kaj helpis kiel eble plej longe, ke tio estis necesa. Sed labori ĉe la ĉeĥoslovaka ambasado en Belgrado ne estis la revo de Šik kaj resti en Jugoslavio por ĉiam ne povis esti realisma opcio. Tiel, Šik finfine decidis veturi al Svislando, malgraŭ la kontraŭstaro de liaj familianoj, kiuj volis reveturi al la patrujo (la edzino laboris en iu ŝtata eldonejo). Sed por si mem Šik ne plu vidis vivperspektivon en Ĉeĥoslovakio, nek en la politiko aŭ scienco. Tio nature estis realisma pritakso, ĝusta konkludo. Samtempe li ricevis amason da invitoj el plej diversaj landoj por prelegi aŭ labori kiel universitata profesoro. Ĉar li malbone scipovis la anglan kaj bone regis la germanan lingvon, Svislandon li konsideris plej ideala loko, ĉar Aŭstrio kaj Germanio ne povis esti konsiderataj pro diversaj kialoj. En Svislando, kiu interesis lin pro sia specifa demokratia sistemo kaj la paca solvo de la nacia demando, Šik volis studi ĝiajn sistemon kaj nekutiman ekonomian sukceson, kiu portis tiun landon ĝis la monda pinto. Do, komence de oktobro Šik veturis tra Zuriko al Bazelo, kie lin bonvenigis profesoro Salin de la bazela universitato. La bazela registaro eĉ donis al li provizoran restad- kaj laborpermeson, tiel ke li ne devis peti azilon.[418] De la ĉeĥoslovaka registaro Šik estis akre kritikita pro sia decido preferi la elmigron. Dubček kaj Černík daŭre funkciis kiel partiaj pintuloj, sed Dubček pretis abdiki, se la „perfiduloj“ tro sabotas lian politikan laboron. La konfuzata popolo ne plu sciis kion aŭ kiun ĝi subtenu.

La 13an de septembro la nacia parlamento adoptis novan leĝon pri la kontrolado de la gazetaro, kiu esence limigis la liberan raportadon en la gazetaro. Meze de oktobro sekvis la subskribado de la t.n. traktato pri la lokado de sovetiaj trupoj en Ĉeĥoslovakio, kiu antaŭvidis la longdaŭran konservadon de sovetiaj trupoj en ĉi tiu lando kaj do formale pravigis la sovetian okupacion de Ĉeĥoslovakio. La traktado estis ratifita de la ĉeĥoslovaka parlamento en la 18a de oktobro. en la foresto de 60 delegitoj per 228 jesaj voĉoj kaj kvar kontraŭaj voĉodoj (Kriegel, Prchlík, Vodsloň kaj Sekaninová-Cakrtová).[419]

La „Breĵnev-doktrino“, kiu estis menciita supre, alprenis konkretan formon fakte nur post la interveno, kiam la sovetianoj komencis pravigi ĝin per ideoj, kiuj supre estis aluditaj. La 26an de septembro la sovetia gazeto *Pravda* publikigis artikolon de iu S. Kovaljov sub la titolo „Suvereneco kaj internaciaj devoj de la socialismaj landoj“, kiu klopodis adapti la nocion de la suvereneco de la socialismaj ŝtatoj laŭ la situacio, kiu estiĝis post la interveno en Ĉeĥoslovakio. La aŭtoro de tiu artkolo asertis, ke la internaciismo estas leĝo, kiun ĉiuj socialismaj landoj kaj komunismaj partioj devas respekti, kaj ke la nerespektado de tiu leĝo estas ligata kun sankcioj, kvankam „la popoloj de la socialismaj landoj

---

[417] Vd. https://www.youtube.com/watch?v=PCJ7NeUYqeY, ekde min. 13´30.

[418] Kiam Šik petis azilon en Svislando post sia tria vojaĝo al Ĉeĥoslovakio, li perdis en 1970 ĝian ŝtatanecon, kion li eksciis tra la gazetaro. Krom tio sekvis furioza kalumniado de lia persono flanke de ĉeĥoslovakaj reakciuloj. En 1983 li kaj lia edzino Lilli ricevis la svisan civitanecon.

[419] Brahm, ĉap. II, 5.

kaj la komunismaj partioj ja havas senliman liberecon, kiun ili devas havi por determini la evoluon de sia lando“. Samtempe estis dirite, ke „neniu decido de ilia flanko damaĝu aŭ al la socialismo en ilia lando aŭ al la fundamentaj interesoj de la aliaj landoj kaj al la tuta internacia laborista movado, kiu gvidas la batalon por la socialismo“. El tio sekvas, ke sole la komunisma partio estas respondeca por sia popolo kaj ke, due, la internaciismo bezonas gvidcentron, kiu gvidas kiel plej supera leĝdonanto kaj juĝisto kaj ne nur kontrolas la agadon de la unuopaj komunismaj partioj, sed ankaŭ ekzekutas verdiktojn. Pri la identeco de tiu plej supera juristo kaj kontrolorgano oni ne plu povis havi dubon post la 20a de aŭgusto 1968. Krom tio, Kovaljov skribis, ke la socialisma ŝtato ne povas esti sendependa de la komunaj interesoj de tiu internaciisma socio aŭ meti sian suverenecon kontraŭ la interesoj de la monda socialismo kaj de la revolucia movado. Do, la suvereneco de la komunisma partio de iu socialisma ŝtato estas „neseparebIe“ ligata kun la internacia respondeco por la socialisma ŝtataro kaj la internacia komunisma movado. Laŭ tiu kompreno la suvereneco estis ligata kun la koncepto de la „klaso“, dum la neklase bazita suvereneco estis kondamnita kiel „dekstra oportunismo“, „reviziismo“, „kontraŭ-socialismo“, „raciismo“ kaj „abstraktaĵo“. Sed la artikolo ankoraŭ ne estis finata. Ĝia aŭtoro asertis, ke la soldatoj de la intervenintaj trupoj ne enmiksiĝis en la internaciajn aferojn de Ĉeĥoslovakio, sed batalis por la aŭtonoma principo de la popoloj de Ĉeĥoslovakio kaj ke ilia operaco estis diktita de la leĝoj de la klas-batalo. En tio li skribis, ke „la normoj de la juro estas subordigataj al la leĝoj de la socia evoluo“, ĉar en senklasa socio ne ekzistas kaj ne povas ekzisti senklasa leĝo. La suvereneco povas esti ĝuste juĝata nur laŭ klasaj kriterioj. Fine estis dirite, ke la operaco de la kvin armeoj de la Varsovia Pakto defendis la interesojn de la socialisma socio kaj de la tuta movado kaj la interesojn de la socialismo en Ĉeĥoslovakio mem. La sovetianoj regurdis tiun teorion por ´pruvi´, ke la interveno en Ĉeĥoslovakio baziĝis sur la „socialisma internacia juro“, kiu baziĝas sur la „socialisma internaciismo“.[420]

La moskva revuo *Kommunist*, organo de la CK de KPSU, aldonis, ke „absoluta sendependeco de ŝtato de la ŝtata sistemo, en kiu ĝi ekzistas, ne povas esti. Ĉia babilado pri la ebleco de absoluta sende-pendeco de homo aŭ ŝtato estis kaj restas burĝa trompo“.[421]

Okaze de la plenkunveno de UN je la 3a de oktobro 1968 Gromyko, ministro pri eksteraj aferoj de Sovetunio, idealigis la bildon pri la komuneco de la socialisma ŝtataro, kiu havas proprajn vivinteresojn kaj devojn por garantii la sekurecon kaj proprajn principojn de la reciprokaj rilatoj, kiuj estas bazataj sur frata helpo, solidareco kaj internaciismo. Li klarigis, ke tiu komunumo estas nesepa-rebla unueco, kiu estas kunveldata per nedetruebla bando. Pri la operaco kontraŭ Ĉeĥoslovakio li opiniis, ke ĝi ne estis „surprizo“ nek lezo de la suvereneco de Ĉeĥoslovakio, sed nura rimedo de la „memdefendo“, ĉar „Sovetunio kaj la aliaj socialismaj landoj ree atentigis tiujn, kiuj provas repuŝi la socialisman komunumon aŭ almenaŭ elŝiri unu el ĝiaj membroj, ke ni ne toleros tion“.[422]

Sian proteston kontraŭ la sovetia okupacio la ĉeĥoj kaj slovakoj montris la 28an de oktobro okaze de la 20a datreveno de la fondo de Ĉeĥoslovakio kaj la 7an de novembro okaze de la datreveno de la bolŝevisma revolucio en Ruslando.

La 12an de novembro Breĵnev pravigis la intervenon dum la 5a partia kongreso de la Pola Unui-ĝinta Laborista Partio, klarigante sian doktrinon pri la „limigata suvereneco“ de la socialismaj ŝtatoj kaj ke oni (t.e. Sovetunio) havas principan rajton interveni en ajna lando de la bloko, se oni konstatas, ke la socialismo estas en danĝero, kvankam „la socialismaj landoj estas por strikta respektado de la suvere-neco de ĉiuj landoj kaj decidite kontraŭ la enmiksiĝo en la aferojn de ĉiuj ŝtatoj, kontraŭ la lezado de ilia suvereneco“, kiel li rekonfirmis la malnovan principon.[423] Lia doktrino, kiu metis la interesojn de la socialismo super la rajtoj je ŝtata aŭtonomeco kaj permesis draste limigi tiun aŭtonomecon de la „fratiaj landoj“, estis direktita ankaŭ al ĉiuj ceteraj ŝtatoj de la sovetia bloko. Se ili ne plenumos sian „internaci-isman devon“, ili devas enkalkuli la riskon, ke Sovetunio intervenos per armeaj rimedoj. La komunismaj ŝtatoj en Azio kiel Mongolio, Nordvietnamio kaj Nordkoreio aliĝis vole-nevole al la sovetia verdikto post la 21a de aŭgusto.[424] Ĉi tiu doktrino validis ĝis 1988.[425] La okcidentan eĥon al la interveno en Ĉeĥo-slovakio li nomis „plej pura fraŭdo kaj demagogio“. La sovetiaj politikistoj kaj gazetaro ankaŭ poste

[420] Csizmas, p. 102-4.
[421] Csizmas, p. 104.
[422] Csizmas, p. 104-5.
[423] Csizmas, p. 105.
[424] Brahm, ĉap. II, 6.
[425] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Breschnew-Doktrin.

plurfoje revenis al la temo de la suvereneco de la socialismaj ŝtatoj kaj opiniis, ekzemple, ke „neniu povas malhelpi la rajton de iu popolo baziĝi je la amikoj, kiuj estas fidelaj al sia internaciisma devo kaj al la devigoj de la reciprokaj konvencioj, kaj neniu povas forpreni la rajton de la amikoj helpi al ili“ kaj simile.[426] Similajn aferojn skribis en tiu tempo ankaŭ la organoj de aliaj ŝtatkomunismaj partioj en la sovetia bloko kiel *Népszabadság* (Hungario) kaj *Trybuna Ludu* (Pollando).[427]

Por la CK-kunsido, kiu devis okazi la 12an de decembro, Šik ne ricevis apartan invitilon, sed nur komunikon. Liaj amikoj deziris, ke Šik vojaĝu al Prago por partopreni tiun kunsidon. Sed la 10an de decembro la ĉeĥoslovaka ambasado en Berno komunikis al li, ke en Prago estos lanĉita jura proceso kontraŭ lia persono. Evidente temis pri ruza intrigo, kiu estis aranĝita de la reakcia konservativulo Miloš Jakeš, kiu gvidis la Centran Kontrolan kaj Revizian Komisionon kaj planis kontroli la agadon de ĉiuj ĉeĥoj kaj slovakoj, kiuj forveturis al eksterlando post la sovetia interveno. En decembro eĉ estis fondita speciala komisiono, kies tasko estis ekzameni la eksterlandan restadon de Šik. Sed Šik rifuzis submetiĝi al la disciplina esplorado de homo, kiu estis anstataŭanta ministro pri internaj aferoj sub Novotný kaj vicĉefministro sub Dubček. Šik ne pretis reiri al Ĉeĥoslovkio sub tiaj kondiĉoj, kiujn li ne povis akcepti, des pli ke lia reveno ankaŭ ne ŝanĝus la novan situacion en lia lando. Do, lia koro retiris lin hejmen, sed lia kapo konsilis al li resti en Okcidento. Malgraŭ tiu dilemo, Šik ne ekskludis la eblon reveturi al Prago tiel longe, ke tio ankoraŭ eblis, ĉar la limoj ne estis fermitaj kaj li disponis pri diplomata pasporto.[428]

La 3an de oktobro Dubček, Černík kaj Husák denove restadis en Moskvo. Breĵnev ege kritikis ilin, ĉar la aktuala konsisto de la Centra Komitato kaj de la partia prezidio tute ne plaĉis al li, precipe la ruza maniero, laŭ kiu Dubček aranĝis ĝian re-formadon (kiun Breĵnev trovis „maldemokratia“!). Tial li postulis la eliminon de la „neakcepteblaj“ elementoj kaj aparte menciis homojn kiel Dubček, Smrkovský, Špaček kaj Mlynař. Tiuj kaj ankoraŭ kelkaj aliaj politikistoj kiel nature ankaŭ Ota Šik kaj Jiří Hájek do fariĝis ĉefaj malamikoj de la sovetianoj, kiuj volis eviti, ke ili revenos al la politiko de Ĉeĥoslovakio. La radiostacio „Vltava“, kiu estis instalita en GDR por disvastigi dum la interveno propagandon kontraŭ la ĉeĥoslovakaj reformistoj, nomis Šik-on „kontraŭ-revoluciulo n-ro 1“.[429] La eldonisto de la loka gazeto en Ostrava estis minacita de la sovetianoj per mortigo, se li ne tuj ĉesigas sian ĵurnalisman agadon. La strategion de la minacoj kaj ĉantaĝoj la sovetianoj daŭrigis paŝon post paŝo. Ĉiuj sovetiaj minacoj estis komunikitaj buŝe. Se la ĉeĥoslovakoj ne tuj obeis subskribi iun diktitan konvencion, Greĉko minacis ilin per okupado de ĉeĥoslovakaj urboj. Samtempe, la sovetianoj komencis kampanjon kontraŭ la reformistoj, kiuj devis esti misfamigitaj de politikaj ekstremuloj kiel krimaj elementoj. Atakitaj de la sovetianoj estis precipe Smrkovský, Kriegel kaj Šik, la ĉefaj aliancanoj de Dubček, kiuj estis konsideritaj de la popolo kiel speco de herooj (precipe en Ĉeĥio).

La konsisto de la CK de la ĉeĥoslovaka KP je la 17a de novembro 1968, kiam okazis nova kunsido, esence estis la sama kiel tiu de la 31a de aŭgusto. Dubček restis unua sekretario. En la listo okulfrapas la nomo de Lubomír Štrougal, kiu estis alelektita kiel sekretario; li prezidis la „Oficejon de la administracio (aŭ organizado) de la partia laboro en la ĉeĥaj landoj“ kaj poste ankoraŭ karieros dum la tempo de la „normaligo“.

### Fino de la „Praga printempo“ - de Dubček al Husák (1969)

La 1an de januaro 1969 ekoficis nova ĉeĥoslovaka registaro sub la gvido de Oldřich Černík kun Peter Colotka, Samuel Falťan, František Hamouz, Václav Valeš kaj kiel anstataŭantaj ĉefministroj, Ján Marko kiel ministro pri eksteraj aferoj, Martin Dzúr kiel ministro pri defendo, Jan Pelnář kiel ministro pri internaj aferoj, Bohumil Sucharda kiel ministro pri financoj kaj Josef Krejčí, Jaroslav Havelka, Bohuslav Kučera kaj aliaj kiel membroj kun konkretaj taskoj.[430]

[426] Csizmas, p. 106.
[427] Vd. Csizmas, p. 107-8.
[428] Šik, ĉap. IV, 2 kaj 3.
[429] Šik, ĉap. IV, 1.
[430] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Regierung_Oldřich_Černík_II.s

Lige kun la formala federigo de Ĉeĥoslovakio ekfunkciis la 1an de januaro 1969 ankaŭ la registaro de la Ĉeĥa Socialisma Republiko, kiu estis prezidita de Stanislav Rázl.[431] Kiel leĝodona organo samtempe ekfunkciis la Ĉeĥa Nacia Konsilio, al kiu la koncernaj elektoj okazis en julio 1968. De ĝiaj 150 deputitoj 85 apartenis al la komunisma partio, 22 al la ĉeĥoslovaka socialisma partio, 22 al la ĉeĥoslovaka popolpartio kaj 21 estis formale sendependaj. La prezidantoj de la Ĉeĥa Nacia Konsilio estis dum la komunisma tempo Čestmír Císař (1968-69), Evžen Erban (1969-81) kaj Josef Kempný (1981-89).[432] La formala federigo de Ĉeĥoslovakio ne devis trompi la fakton, ke tiu lando troviĝis nun praktike sub sovetia okupacio kaj ke ĝin minacis la kompleta forigo de la demokratiigaj reformoj, kiujn la popolo(j) en tiu lando tiel forte deziris.

La 9an de januaro 1969 okazis en Plzeň tutlanda konferenco de la reprezentantoj de la laboristaj konsilioj. Temis pri la provo de la entreprenoj apogi sin reciproke kaj vivteni la aŭtonomecon. Ankaŭ la sindikatoj klopodis eviti la restaŭradon de la malnova sistemo. La kongreso de la ĉeĥaj sindikatoj, kiu okazis inter la 21a kaj 23a de januaro, pledis por la daŭrigo de la reformprocezo.

Dume, la popolo de Ĉeĥoslovakio daŭre klopodis konservi la ĉefajn reformcelojn sen konsideri la strebadojn de la konservativuloj kaj reakciuloj, kiuj celis returni la radojn de la historio. Sed la protesto de la ĉeĥoslovaka popolo ne finiĝis kaj alprenis ankaŭ ekstremajn formojn. La 18an de januaro 1969 la studento Jan Palach bruligis sin sur la Vaclava Placo en Prago por protesti kontraŭ la okupacio. En la letero, kiun li postlasis, li postulis la senprokrastan nuligon de la cenzuro kaj la malpermeson de la sovetia propaganda gazeto *Zpravy*. Tiun tragikan incidenton sekvis popoloj manifestacioj dum tuta semajno kaj Dubček denove svenis. Kelkajn tagojn poste juna viro bruligis sin en Plzeň, du aliaj en Brno. Unu monaton poste la samon faris en Prago ankaŭ Jan Zajíc.[433] Tiaj sinmortigoj neniam antaŭe okazis en Ĉeĥio. Al la loko de la sinbruligo de Palach alkuris 200 mil homoj. La pompa entombigo de Jan Palach, kiu iĝis kvazaŭ la unua martiro de la „Praga printempo“, estis partoprenita de 10 mil homoj kaj alprenis la formon de potenca amasmanifestacio kontraŭ la sovetia okupacio kaj kontraŭ la komunismo.

La tragika morto de Palach, kies entombigon li volis ĉeesti, servis al Šik kiel preteksto por revojaĝi al Prago. Tie li volis ĉeesti ankaŭ iun kunsidon de la Ĉeĥa Nacia Konsilio, al kiu li estis elektita kiel deputito. La 23an de januaro li devintus esti jure enoficigita fare de Čestmír Císař, kiu tiam estis prezidanto de tiu parlamento. En Prago Šik rimarkis kiel anoj de la sekureca servo postsekvis kaj observis lin paŝon post paŝo, ĉar ili volis eviti, ke li kontaktu la popolon aŭ aliajn opoziciulojn. Intertempe, la sekureca servo ankaŭ vizitis lian loĝejon kaj malfermis la ŝrankojn, kie troviĝis liaj privataj konfidencaj korespondaĵoj, kiuj estis verŝajne fotitaj. Probable la agentoj serĉis „pruvojn“ por povi akuzi Šik-on kiel „kontraŭ-revoluciulon“. Šik povis renkontiĝi kun Václav Havel kaj Ludvík Vaculík. Šik pli kaj pli sentis profundan malkongruon inter la propraj opinioj kaj la sinteno de la kolegoj, kiuj komencis adaptiĝi al la nova politika kurso. La supre menciita komisiono, kiu devis esplori la cirkonstancojn de la eksterlanda restado de Šik, konsideris lian agadon kontraŭpartia, liajn forveturon al Jugoslavio kaj translokiĝon al Svislando, kiu okazis kontraŭ la volo de la registaro, oni pritaksis eraraj. Post sia vizito en la Ekonomia Instituto Šik reflugis al Svislando, ĉar nenio plu retenis lin post tiuj malagrablaj spertoj. La ĵusa restado de Šik en Ĉeĥoslovakio estis polemike komentita de la gazetaro de Sovetunio kaj GDR. TASS publikigis komunikon, laŭ kiu Šik kaj Goldstücker „partoprenis en sekreta cionisma (!) kunveno en Londono por ricevi monon de Usono kaj Israelo kaj organizis movadon kontraŭ la socialisma evoluo en Ĉeĥoslovakio“. La sovetianoj do plumpe reutiligis malnovajn receptojn de la stalinismo por diskrediti kaj kalumnii reformistojn kaj opoziciulojn per plej primitivaj mensogoj.

Dum diversaj kontraŭsovetiaj manifestacioj, kiuj eksplodis lige kun la duobla venko de la ĉeĥoslovaka hokea teamo super la sovetia teamo, kiu perdis la titolon de la monda ĉampiono, en Prago kolektiĝis 150 mil feliĉaj homoj. Sur la Vaclava Placo ŝtonoj estis ĵetitaj kontraŭ la konstruaĵo de la sovetia flugkompanio Aeroflot, kiuj antaŭe estis deponitaj de policaj agentoj, kiuj portis vestaĵojn de laboristoj. Ŝajnas, ke la tuta provoko estis lanĉita de la ĉeĥoslovaka sekureca servo, kiu estis sub la kontrolo de Josef Grösser, ministro pri internaj aferoj de la registaro Rázl de la Ĉeĥa Socialisma Respubliko, kiu mem estis aĉa sovetia agento. La sovetianoj volis sendi trupojn kontraŭ la manifestaciantoj, sed Dubček

---

[431] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Czech_Socialist_Republic, https://cs.wikipedia.org/wiki/Vláda_Stanislava_Rázla, https://www.vlada.cz/cz/clenove-vlady/historie-minulych-vlad/prehled-vlad-cr/1960-1990-cssr/stanislav-razl/prehled-ministru-24698.

[432] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Tschechischer_Nationalrat.

[433] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Jan_Palach kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Jan_Zajíc.

estis kontraŭ tia rimedo. En Prago aperis la sovetia marŝalo A.A. Greĉko kun la anstataŭanta sovetia ministro pri eksteraj aferoj, V.S. Semjonov, kiuj ŝokis la ĉeĥoslovakojn per sia nekutime aroganta konduto. Ili postulis la reenkondukon de la gazetara cenzuro kaj apliko de armataj fortoj por sufoki la „kontraŭ-revolucion". En kazo de novaj manifestacioj la sovetianoj anoncis, ke ili utiligos proprajn armilojn por haltigi la tumultojn. Dubček, kiu faris pli kaj pli kuriozajn kompromisojn, klarigis al la sovetianoj, ke la ĉeĥoslovaka popolo havas la rajton publike esprimi sentojn de la ĝojo aŭ funebro. Dum Semjonov diris al Dubček, ke „la kontraŭ-revolucio devas esti senkapigita", Greĉko anoncis sendi pliajn 8000 sovetiajn soldatojn al Ĉeĥoslovakio. La fakto, ke en Ĉeĥoslovakio aperis libro de la historiisto Josef Macek, kiu dokumentis la sovetian intervenon kaj estis konata kiel „Nigra libro", aldone kolerigis la sovetianojn.[434]

Per sia premo la sovetianoj esperis, ke Dubček mem detruos la reformmovadon, kiun li kreis, kaj restarigos la malnovan polican ŝtaton kiel dezirate de Moskvo. Post tio Husák komencis paroli pri la neceso elŝanĝi la partian estron. En la kazo de Husák, kiu mem havis la ambicion transpreni altajn funkciojn en la partio kaj ŝtato, Dubček parolis pri la fama puŝo de la ponardo en la dorson de la malamiko. En tiu senco Husák preparis la prezidion de la slovaka KP, kiu postulis la demision de Dubček, kiun Husák unuafoje rekte atakis en Nitra per la riproĉo, ke li maltrafis „fari ordon en la respubliko". Kiel oni eksciis poste. Husák eĉ sekrete renkontiĝis kun Breĵnev en Uĵgorod, kie la sovetia ĉefo kuraĝigis lin strebi al la ofico de la unua sekretario. Post tio fariĝis pli facile konvinki la anojn en la ĉeĥoslovaka KP, ke Dubček demisiu. Tiel, la klubo de la „perfiduloj" en la CK, kiu distanciĝis de Dubček, fariĝis pli kaj pli granda. Sub tiu premo Dubček mem cedis kaj proponis sian demision. Sed por eviti, ke Husák fariĝu lia posteulo, Dubček proponis la 12an de aprilo 1969 Černík-on kiel kandidaton, kiu rifuzis la proponon. Tiel, Husák restis la sola kandidato por tiu ofico. La 13an de aprilo Greĉko, al kiu Svoboda *promesis* la demision de Dubček, reflugis al Moskvo por transdoni al Breĵnev la ĝojigan novaĵon.

De 1969 la influo de Svoboda rapide malfortiĝis, ĉar ankaŭ li ne plu povis konteraŭstari la „normaligon", kiel la periodo post la „Praga printempo" estis nomita. Li fariĝis pli kaj pli pasiva kaj indiferenta kaj ne plu trovis la forton rezisti la sovetian okupacion de Ĉeĥoslovakio, kiu estis komparita kun la okupacio fare de la germanaj nazioj. La 29an de majo 1975 Svoboda estis liberigita de la parlamento de sia ofico, pro malsano. Lia posteulo fariĝis Gustáv Husák, kiu unuigis la postenojn de la partiestro kaj ŝtatprezidento en unu mano.

Ĉar por la 17a de aprilo 1969 la partio anoncis kunsidon de la CK, dum kiu devis okazi gravaj personaj ŝanĝoj, Ota Šik decidis riski duan vojaĝon al Prago por partopreni en tiu kunveno, en kiu la demisio de Dubček devis esti oficialigita. Surloke li eksciis, ke ĉiuj komplicoj de la sovetianoj, al kiuj oni riproĉis ilian ´perfidan´ partoprenon en la preparado kaj helpado de la sovetia interveno, do Biľak, Kolder, Jakeš, Indra, Piller, Barbírek, Lenárt kaj Kapek, estis rehonorigitaj, tiel ke ili povis esperi je gvidaj postenoj en estonto. En la salono Šik rimarkis la malvarmon de la kamaradoj, de kiuj Šik ricevis malicajn rigardojn. Dum tiu kunsido Dubček fakte formale ofertis sian demision kaj proponis, ke Husák fariĝu lia posteulo. Tiel, Husák estis elektita preskaŭ unuanime, eĉ Šik, kiu ne volis bruski siajn amikojn, levis la manon por li (kion li poste terure bedaŭris).

La CK elektis novan prezidion, kiu konsistis el Biľak, Colotka, Černík, Dubček (ĝis la 26a de septembro), Erban, Husák. Piller, Sádovský,[435] Svoboda, Štrougal kaj Poláček. Kiel sekretarioj estis elektitaj Bil'ak, Hetteš, Indra, Kempný, Lenárt, Penc, Špaček (ĝis la 30a de majo) kaj Štrougal. La sekretariaton esence konsistigis la samaj homoj. Fakte, ankaŭ Lubomír Štrougal, kiu siatempe ankoraŭ apogis la reformojn kaj malaprobis la sovetian intervenon, intertempe ŝanĝis la flankon, kiam la politika vento turniĝis, kaj tiel evidentigis sin pura oportunisto (aŭ pragmatikisto). Nature ankaŭ Štrougal komplete submetiĝis al la volo de la sovetianoj por repurigi sian kunlaboron kun la „kontraŭ-revoluciuloj", kiel Šik amare notis. Smrkovský ne plu apartenis al la nova prezidio. Ĉar la akceptita rezolucio estis direktita kontraŭ la „kontraŭ-socialismaj tumultoj", Šik sindetenis ĉe la koncerna voĉdono.[436]

Kvankam la novaj mastroj klopodis silentigi kaj ignori la opinion de Dubček, li estis elektita kiel prezidanto de la Federa Asembleo, kiel la iama Nacia Asembleo nun estis nomita, cetere laŭ la

---

[434] Temas pri: https://www.swissbib.ch/Record/495447617 (pri la aŭtoro vd. https://cs.wikipedia.org/wiki/Josef_Macek.
[435] Štefan Sádovský estis la ĉefministro de la Slovaka Socialisma Respubliko inter la 2a de januaro 1969 kaj la 5a de majo 1969.
[436] Šik, ĉap. IV, 4.

propono de Husák. Sed tiu parlamento refalis en sian malnovan rolon kiel formala organo, kiu estis politike egalŝaltita kaj devis konfirmi la decidojn de la partio. Al la taskoj de la parlamentestro apartenis la devo solene akcepti la sovetian ambasadoron Ĉervonenko, kiu apartenis al la ŝlosilaj motoroj de la sovetia interveno, kio nature estis ege embarasa laboro por Dubček. Dubček kulpigis en siaj memuaroj tiun sovetian ambasadoron, kiun li karakterizis kiel plumpan, memplaĉan kaj intrigeman viron kun stulta, malkapabla kaj absurda konduto, kiu multe kontribuis al la malbonaj rilatoj inter ambaŭ landoj.

Inter ĉeĥoj kaj slovakoj ekzistis homoj, kiuj esperis, ke Husák kuraĝos kritike rilati al la sovetianoj tiel, ke ili ne povos fari kun Ĉeĥoslovakio kion ajn ili volis. Sed tiu espero estis komplete vana kaj trompita. Husák vendiĝis kiel obeema vasalo de la sovetianoj, kiuj favoris lin kiel novan unuan sekretarion de la ĉeĥoslovaka KP, al kiu ili centprocente fidis, por povi trakti la landon en sia senco, evitante ĉiujn riskojn, tiel ke Husák eĉ ne ricevis la okazon fari sendependan politikon.

Eduard Goldstücker, kiu konatiĝis kun Husák en 1935 inter studentoj en Bratislava, karakterizis lin inteligenta, orgojla kaj aŭtokrata tipo, kiu sentis neniun bezonon ricevi konsilon de iu ajn, ĉar li estis konvinkata, ke liaj opinioj estas la sole veraj. Li posedis la politikan kapablon realisme pritaksi situaciojn por trafi la ĝustan opcion. Malgraŭ tio, Goldstücker trovis lin simpatia kaj fariĝis lia amiko – ĝis aŭgusto 1968.[437]

Por majo estis preparita nova pleno de la CK de la ĉeĥoslovaka KP, kiu devis esti purigita de la reformaj fortoj, kvankam la centristoj esperis, ke ili povos savi sin. Ankaŭ tio estis nura dezirpensado. Jam antaŭ la kongreso aperis indicoj, kiuj signalis, ke la ekonomiaj reformoj devos esti komplete nuligitaj. En la partia organo *Rudé právo* oni kritikis la principojn de la ekonomiaj reformoj de Šik, kiuj estis proklamitaj kiel neharmoniigeblaj kun la socialisma ekonomia sistemo. Ĉiuj klopodoj de Šik kaj ties kunlaborantoj do estis vanaj kaj praktike perdataj.

Malgraŭ ĉiuj riskoj, Ota Šik decidis veturi trian fojon al Prago, ĉar li volis ĉeesti la momenton, kiam oni forpelas lin de la CK, al kiu li ankoraŭ povos diri sian opinion, kvankam multaj konatoj malrekomendis al li fari tiun vojaĝon. Efektive ĝi estis akompanat de kelkaj malagrablaĵoj. La ĉeĥoslovaka ambasadoro en Berno, kiu postulis de Šik, ke li fordonu sian diplomatan pasporton, volis malhelpi lian veturon. Ankoraŭ sur la germana aŭtoŝoseo Šik rimarkis internacian kamionon, kiu konstante sekvis lin eĉ sur malgrandaj apudaj stratoj, al kiuj li devojiĝis por eskapi la kamionon, tiel ke preskaŭ okazis akcidento. Kion la stiranto de tiu kamiono intencis fari? Sur ĉeĥoslovaka teritorio tiu kamiono subite malaperis. Dum la koncerna kunsido de la CK, kiu komenciĝis la 29an de majo, Šik denove sentis la saman malvarmecon, per kiu la delegitoj renkontis lin kaj kiu estis eĉ pli drasta ol la pasintan fojon. Al ĉiuj delegitoj oni havigis raporton, en kiu la esploraĵo pri la eksterlanda restado de Šik estis aldonita kaj kiu estis tiel manipulita, ke Šik estis akuzita pro kontraŭ-partiaj kaj kontraŭ-socialismaj agadoj kaj kiu konkludis la aferon per la postulo eksigi lin el la CK. Nu, Šik ankoraŭ povis almenaŭ komenti la raporton, sed tio jam interesis neniun plu kaj li mem nenion plu povis ŝanĝi aŭ atingi, ĉar ĉiuj estis kontraŭ li. Klarigi al tiuj konservativaj, reakciaj kaj oportunismaj delegitoj, kiuj poste per granda plimulto aprobis lian eksigon, ion ajn jam havis neniun sencon. Lin kolerigis precipe la primitivaj kriaĉoj kontraŭ li, kiujn li aŭdis dum sia elpaŝo kaj kiuj venis de „malnovaj amikoj“, kaj la riproĉoj, ke li uzis ŝtatan monon, kiam li estis en Jugoslavio. La maljustaj demagogiaj atakoj, mensogoj kaj kalumnioj estis sendube reĝisoritaj kaj aprobitaj de Moskvo, kiu konsideris Šik-on partia malamiko.

Post la CK-kunveno Husák fortigis la demagogian bruon kontraŭ la opozicio, festante la „venkon super la kontraŭ-revolucio“. Šik skribis en siaj memuaroj, ke liaj paroladoj antaŭ la amasoj memorigis lin iusence pri la paroladoj de la nazio Goebbels en la 40aj jaroj kontraŭ komunistoj kaj malamikoj de la popolo. La judo Kriegel, kiun oni same forpelis el la CK, devis elteni plumpajn antisemitismajn aludojn. Post tiuj naŭzaj spertoj Šik urĝis forveturi de Ĉeĥoslovakio, ĉar li timis, ke ĝiaj limoj estos baldaŭ fermitaj, kaj reveturis al Svislando.[438]

La restaŭrado de la malnova sistemo estis dume daŭrigita. La 31an de majo Černík kondamnis la aŭtonomecon de la entreprenoj kiel esprimon de reviziisma skismigo de la potenco.

---

[437] Vd. Goldstücker, p 74-75.

[438] Mi ankoraŭ havis la okazon konatiĝi kun Ota Šik kiel studento de la zurika universitato, kie li prelegis pri la „Tria vojo”, kiun li evoluigis. Ota Šik forpasis en 2004 en St. Gallen, Svislando.

En junio okazis purigo de la partiaj gvidantoj de Prago, kie la plej krudaj reakciuloj akaparis la povon. La kulturaj organizaĵoj de la „Praga printempo“ estis malfonditaj. Kontraŭ la ĉefaj reprezentantoj de la kulturo, precipe Václav Havel, Ludvík Vaculík kaj Pavel Kohout, kaj kontraŭ kelkaj ĵurnalistoj oni enkondukis jurajn procesojn.

En la unua datreveno de la interveno, kiu okazis la 21an de aŭgusto 1969, la nervozeco de la Husák-reĝimo, kiu iĝis pli kaj pli aroganta, cinika kaj brutala, kreskis. Fakte, homoj rekomencis protestadi surstrate en diversaj urboj de Ĉeĥoslovakio, kaj iuj flugfolioj alvokis la popolon ne uzi publikajn transportilojn, rezigni pri butikumado kaj ne viziti restoraciojn. Sed bone armataj specialaj ĉeĥoslovakaj bataltrupoj, kiuj havis pli ol 35 mil anojn, klopodis forpuŝi ilin. Gomułka sendis larmgason, plastikajn protektŝildojn kaj aparte grandajn batbastonojn por la ĉeĥoslovakaj policistoj. Kvin (laŭ Dubček estis probable 50) personoj mortis kaj 2414 estis arestitaj. Kontraŭ 260 personoj oni lanĉis juran proceson. Dubček (kiu estis parlamentestro!) devis forlasi la urbon kaj Husák intencis proklami la militan staton. Kvankam Dubček ankoraŭ provis eviti ĝian adopton per prokrastado de ĝia subskribado, la fifama „Leĝo n-ro 99“, kiu malfermis la pordon al la grandstila subpremado de la opozicio en Ĉeĥoslovakio, estis subskribita de Dubček, Černík kaj Svoboda. Ĉi tiu leĝo antaŭvidis drastajn monpunojn por homoj kaj maldungojn por instruistoj, kiuj „ĝenas la publikan ordon“.[439] Poste Dubček ege bedaŭris, ke li subskribis ĝin, konsiderante sian subskribon granda eraro kaj nomante la leĝon mem „mortanonco de la Praga printempo“. Oni povus riproĉi al Dubček, ke li kapitulacis paŝon post paŝo, sed kiel li klarigis en siaj memuaroj, kiel estro de la parlamento li troviĝis en tia embarasa situacio, en kiu li ne povis rifuzi la subskribon al tiu malsankta leĝo.

Dum la septembra kunsido de la CK estis eksigita tuta vico de partiaj aktivuloj kiel Smrkovský, Hájek, Mlynař, Hübl, Vlasák kaj aliaj. Dubček estis forigita de la prezidio de la CK kaj perdis la funkcion de la parlamentestro; Slavík, Prchlík kaj Černík estis eksigitaj de la partio. Tiel, en 1969 estis eksigitaj 150 mil partiaj membroj. La partio perdis entute 500 mil membrojn. Poste sekvis ondo de arestoj en la tuta lando. De la partio estis eksigitaj ankaŭ ĉiuj membroj, kiuj forlasis la landon: krom Šik ankaŭ Hejzlar, Liehm, Pelikán kaj aliaj. La iama promeso de Husák, ke neniu kamarado estos persekutata pro sia diverĝa opinio aŭ sinteno, estis malplena frazaĵo, fakte mensogo, farso. La historiografio estis tiel reviziita, ke oni jam parolis pri „frata helpo kontraŭ la minacanta kontraŭ-revolucio“ anstataŭ pri interveno aŭ invado. En 1969 ankaŭ unu triono de la ĉeĥoslovakaj judoj forveturis de sia patrujo, ĉar ili ne plu pretis elteni la oficialan antisemitismon, kiu reaktiviĝis sub la Husák-reĝimo.

Ĉar dum la tempo de la dua registaro de Černík okazis ampleksaj partiaj purigoj inter la reformistoj, kiuj estis engaĝitaj dum la „Praga printempo“, kiuj havis sekvojn ankaŭ por la registaro, kiu devis esti re-formita per nova personaro. La 29an de septembro do ekoficis la tria registaro de Černík. Dum multaj ministroj povis konservi sian postenon, ekzepinter la plej signifaj viktimoj de tiuj purigoj troviĝis František Vlasák, ministro pri planado. Ankaŭ financministro Bohumil Sucharda perdis siajn funkciojn. Karel Hoffmann, kiu subskribis la petleteron al la sovetianoj, fariĝis nova ministro pri komunikado, poŝto kaj telekomunikado, kaj nia malnova konato Drahomír Kolder fariĝis estro de la komisiono de la „popola kontrolo“. Václav Hůla, kiu estis konata kiel lojala defendanto de la planekonomio, transprenis la gvidon de la ŝtata plankomsiono. La personara karuselo do turniĝis sen halto, sed la konservativa pezo en la registaro klare fortiĝis

## 1970 kaj poste

La reorganizado de la ĉeĥoslovaka politiko kadre de la „normaligo“, kiu estis ligata kun novaj leĝoj kaj vastaj purigoj de ĉiuj ŝtataj, partiaj, ekonomiaj kaj kulturaj institucioj, krome de la gazetaro, la sociaj asocioj kaj la sindikatoj, atingis sian kulminon per la elimino de Dubček el la CK komence de 1970. Li estis sendita al Turkio kiel ĉeĥoslovaka ambasadoro. Koncernataj de tiuj purigoj estis ĉiuj homoj, kiuj estis iel ligataj kun la reformoj aŭ protestis kontraŭ la sovetia interveno kaj ne konsentis pri la „normaligo“,[440] kiel estis nomita la periodo, kiu sekvis la „Pragan printempon“. En marto estis eliminitaj el la partio Smrkovský, Vodsloň, Špaček, Hájek, Čísař, Mlynař, Šimon kaj multaj aliaj iamaj CK-membroj. La saman sorton trafis Dubček-on en junio. Tiuj homoj ne plu rajtis labori en ŝtataj institucioj kaj

[439] Vd. Brahm, epilogo.
[440] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Normalization_(Czechoslovakia).

organizaĵoj kaj devis ofte akcepti minoran ´fizikan´ laboron ekzemple en iu fabriko (la plej fama ekzemplo tiurilate estis Václav Havel, al kiu la ŝtato malpermesis publikigi kaj kiu devis labori en bierfabriko). Tiel, miloj da altkvalifikataj profesiuloj estis malaperigitaj de la ekonomio kaj kulturo, kio signifis gigantan resursan perdon de kapablaj laborfortoj por la lando. Ĉiuj tiuj iamaj reformistoj, kiuj nun fariĝis opoziciuloj kaj disidentoj ekster la leĝoj, do estis kondamnataj „vivi rande de la socio“, kiel Gustáv Husák kutimis diri sarkasme.

La 28an de januaro 1970 la registaro de Černík venis al sia fino kaj estis anstataŭigita per la registaro gvidita de Lubomir Štrougal. En tiu registaro, kiu oficis ĝis la 9a de decembro 1971, pluraj ministroj estis transprenitaj de la registaro Černík. La registaro de Štrougal tamen adoptis novan deklaraĵon, kiu klare distanciĝis de la „Praga printempo“.[441] Ĉi tiu politika kurso estis konservita ĝis la fino de la komunisma epoko en 1989, en kiu Štrougal gvidis 6 registarojn.[442]

La 25an de majo 1971 komenciĝis nova partia kongreso, kiu jam estis purigita de ĉiuj reformismaj fortoj, tiel ke ĝi povis esti oficialigita kiel laŭvica XIVa partia kongreso kaj manipulita en la senco de la konservativuloj, reakciuloj kaj sovetianoj. La novan prezidion konsistigis unue ĉiuj komplicoj de la sovetianoj, kiuj aprobis kaj organizis la sovetian intervenon (Biľak, Indra, Hoffmann, Kapek), due ĉiuj oportunistoj, kiuj ŝanĝis sian pozicion (Husák, Colotka, Lenárt, Svoboda, Štrougal, Kempný, Korčák, Hruškovič, Hůla). La ŝanĝoj de la personaro do plene sukcesis kaj Husák akaparis la tutan povon, kiun Breĵnev kvazaŭ donacis al li por danki lian lojalecon kaj por puni la ĉeĥoslovakajn reformistojn. Ankaŭ Moskvo probable estis kontenta pri tiu solvo, kiu restarigis la sovetian ordon en la orienta bloko. Eĉ Novotný estis reintegrita en la sinon de la CK de la ĉeĥoslovaka KP (li forpasis en januaro 1975). La historiografio devis esti reinterpretita per la klarigo, ke „la reviziistoj ene de la partio celis likvidi la socialismon kaj distranĉi Ĉeĥoslovakion de la socialisma tendaro“. Estis notite, ke en tio ili ricevis la helpon de la okcidentaj imperiistoj kaj ligiĝis kun kontraŭ-komunismaj fortoj interne de la lando. Surbaze de tiu historia prezento estis faritaj ĉiuj ceteraj konkludoj. Per tiu interpreto ĉiuj faktoj kaj veroj estis simple inversigitaj. Ĉe la „instruoj el la krizo“ do ne temis pri objektiva analizo de la veraj problemoj de la malnova sistemo, kiuj estigis vole-nevole reforman movadon por solvi ilin, sed nur pri politika pravigo de la renverso de la potenco per la helpo de Sovetunio kaj la armeoj de la Varsovia Pakto kaj de la restaŭrado de la malnova reĝimo, kiu similis al tiu de Novotný. La samaj instruoj poste fariĝis strikte tabuita ideologia fundamento de la politiko, kiu daŭris ĝis novembro 1989, kiam la komunismo kolapsis ankaŭ en Ĉeĥoslovakio post la falo de la Berlina Muro. En la jaroj 1971/72 efektiviĝis la plej lasta finkalkulado kun la kontraŭuloj de la „normaligo“ (aŭ „normaliĝo“), kiam okazis amasaj arestoj kaj kondamnoj en juraj procesoj de ĉiuj, kiuj ne ĉesigis sian kontraŭstaron kontraŭ la reakcio. Eĉ tiuj, kiuj apogis kaj elektis Husák-on, ne estis protektitaj de persekutoj kaj reprezalioj. Temis pri akto de la venĝo de la poststalinistoj kontraŭ homoj, kiuj ĝenis la reakciulojn transformi la „Pragan printempon“ en longan glacian vintron, en kiu oni ne plu parolis pri la reformoj de Ota Šik kaj Zdeněk Mlynář, pri la tekstoj de la verkistoj Ludvík Vaculík, Pavel Kohout kaj Milan Kundera aŭ pri la ideoj de politikistoj kiel Dubček, Čísař, Černík, Smrkovský, Hájek kaj ceteraj. Eugen (Evžen) Löbl, kiu eble verkis la plej klarvidan libron pri la „Praga printempo”, parolis pri „fetisismo de la potenco kaj perforto”.

Alia efiko de la „normaliĝo“ estis, ke la „normaligita“ ĉeĥoslovaka KP perdis sian ´organisman´ ligon, kiun ĝi iam havis kun la ĉeĥoslovaka popolo. Tiu KP ne plu estis la partio, kun kiu la membroj kaj ceteraj civitanoj esperis konstrui pli bonan estonton. Ĝi restis nur la KP de la adeptoj de la valida ordo kaj de tiuj, kiuj pretis kaj konsentis submeti la naciajn interesojn al la bezonoj de la sovetia hegemonio. Ne-niu plu atendis de tiu KP reformojn, kaj tiu KP ankaŭ ne plu parolis pri reformoj, ĉar ĝi timis ilin. Zdeněk Mlynář, kiu nomis la periodon de la „normaliĝo” „socialismo de la ansera haŭto”, profetis, ke tiu reĝimo estos konservata, restos nereformita kaj degeneros, kaj prognozis, ke la libera kaj demokratia ĉeĥoslovaka respubliko iam renaskiĝos.[443]

### Kio estis la „Praga printempo“ kaj kial ĝi okazis kaj kial ĝi estis haltigita?

La „Praga printempo” estis la unua serioza provo transformi komunisman sistemon de la sovetia (stalinisma) tipo paŝon post paŝo kaj per pacaj rimedoj al pli demokratia kaj pli efika sistemo. Tiu provo

[441] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Regierung_Lubomír_Štrougal_I.
[442] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Regierungen_der_Tschechoslowakei.
[443] Mlynár en: Pelikán 1979, p. 60-64.

ne fiaskis, kiel oni kelkfoje asertis, sed ĝi estis perforte sufokita kaj haltigita de ĝiaj kontraŭuloj. La „Praga printempo" ankaŭ ne estis klasika revolucio aŭ ribelo (kiel en orienta Germanio en 1953 aŭ en Hungario en 1956), sed ĝi estis transformo de la sovetia sistemo en la sferoj de la ekonomio, juro kaj politiko sur scienca bazo. Samtempe, ĝi celis la starigon de libera demokratia civilsocio kiel oni konis ĝin en la postmilitaj okcidentaj landoj. Kio de la socialismo devis esti aŭ estintus konservata, estas alia demando. Ĉe la fino de la evoluo probable okazintus la likvido de la monokratiisma regadotipo de la sovetia socialismo anstataŭ ĝia modernigita versio, sed tio restas spekulativo, ĉar tia fina fazo neniam estis atingita.

Oni riproĉis al la ĉeĥoslovakaj reformistoj naivecon, sed ili kredis, ke iliaj reformoj estas harmoniigeblaj kun la interesoj de la socialismo kaj de Sovetunio surbaze de la XXa partia kongreso de KPSU en februaro 1956. Sed la ĉeĥoslovakaj politikistoj havis iluziojn, kio koncernis la suverenecon de ilia ŝtato, kiu estis limigita de la „Breĵnev-doktrino". Tiu suvereneco estis nur formala kaj devis konformi al la interesoj de la sovetia politiko. Eugen Löbl rimarkigis, ke la suvereneco de socialisma ŝtato en la sovetia bloko estis en la realeco pli malgranda ol tiu de ajna afrika lando ekster tiu bloko. La sovetianoj limigis la suverenecon de la aliaj socialismaj ŝtatoj, ĉar ili timis, ke la orienta bloko, kiu jam suferis pro la praktika eksiĝo de Jugoslavio, Ĉinio, Albanio kaj Rumanio, povus plie disfali.

Surbaze de la memdeklarita lojaleco rilate al la aliancanoj kaj la ripetitaj promesoj de Moskvo, ke ĝi ne enmiksiĝos en la internajn aferojn de aliaj socialismaj landoj, la ĉeĥoslovakaj politikistoj ankaŭ neniel kredis, ke Sovetunio decidos interveni per la trupoj de la Varsovia Pakto. Kvankam la ĉeĥoslovakaj reformpolitikistoj fakte neniam celis forlasi la Varsovian Pakton (kompare kun la hungaro Imre Nagy en 1956, kiu proklamis la neŭtralecon de sia lando kaj la eksiĝon el la pakto), la sovetianoj kaj ties aliancanoj tamen intervenis en aŭgusto 1968 en Ĉeĥoslovakio, Per tio ili krude lezis, kiel supre priskribite jam en la kazo de Hungario (1956), la principojn de la internacia juro rilate al la suvereneco de la ŝtatoj, la neenmikŝiĝo en la internajn aferojn de aliaj landoj kaj la aŭtonomeco kaj egalrajteco de ĉiuj nacioj, kiujn Moskvo promesis respekti, kaj pravigis sian agon per la devo savi la socialismon, kiu laŭ ili estis en danĝero.

La sovetiaj gvidantoj kaj tiuj de la aliaj socialismaj ŝtatoj, precipe de GDR, Pollando, Hungario kaj Bulgario, konsideris la ĉeĥoslovakajn reformojn esenca minaco por la fundamentoj de la tuta komunisma sistemo kaj opiniis, ke ili baze endanĝerigas iliajn ekzistajn kaj sekurecajn interesojn. La pritakso de la ĉeĥoslovakaj reformoj kiel „kontraŭ-revolucio" klare ilustris la pensmanieron de la gvidaj komunistoj de la orienta bloko, kiuj mem grandstile sufokis ĉiujn opoziciajn tendencojn en siaj landoj, kiuj ne kongruis kun la oficiala politika linio. La ĉefoj de tiuj landoj samtempe komprenis, ke ankaŭ iliaj reĝimoj estas en danĝero, se oni permesas reformojn de la sistemo. Kvankam Breĵnev volis lerni de la ĉeĥoslovakaj reformistoj, li devis finfine haltigi la eksperimenton, kiu riskis subfosi la potencon de Moskvo, kiu timis, ke Ĉeĥoslovakio forlasos la sovetian socialismon.

La ribeloj en orienta Germanio kaj Hungario de la jaroj 1953 kaj 1956, kiuj profunde ŝokis kaj maltrankviligis tiujn gvidantojn, do fariĝis impresa instruo por ili, ke io simila ne ripetiĝu. Kvankam ĉiuj politikaj rimedoj devis esti elĉerpataj, la sovetianoj kaj ĝiaj aliancoj tamen decidis preferi perfortan solvon en Ĉeĥoslovakio post taktiko de timigo, premado kaj ĉantaĝado malgraŭ ĉia pacretoriko de la sovetianoj. Fakte neniu ĉefa ŝtat-politikisto de la orienta bloko (krom Ceaușescu) simpatiis kun la ĉeĥoslovakaj reformoj kaj neniu komunisma partiestro (eble krom Kádár) insistis pri alia solvo ol la perforta interveno, ĉar la sovetianoj ne volis ´perdi´ Ĉeĥoslovakion, kiu estis konsiderita de la Kremlo kiel gajnaĵo de la dua mondmilito kaj kiel sekureca zono kontraŭ la Okcidento, kun kiu Ĉeĥoslovakio havis komunan limon. Krom tio, la komunismaj vasaloj de Moskvo en la orienteŭropaj landoj probable ankaŭ konsciis, ke la komunismaj reĝimoj en iliaj satelitaj ŝtatoj, kiuj estis enkondukitaj per la helpo de Sovetunio, povas ekzisti nur dank´al la sovetia potenco. La sufokado kaj haltigado de la „Praga printempo" do estis ŝlosila momento por ĉiuj tiuj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj, kiuj aktuale regadis la landojn de la orienta bloko, kaj havis gravajn sekvojn por la plua evoluo de la komunismo en la koncernataj landoj, kies limoj estis hermetike fermitaj disde la cetera, precipe okcidenta mondo.

La ruza kutimo de Breĵnev starigi personajn, preskaŭ patrecajn rilatojn kun Dubček por ligi lin al si estas komparebla kun la maniero de rilatoj de feŭdisma absolutisma reganto al sia loka vasalo. Neniu krom Dubček ricevis tian intiman kaj unikan atenton de la sovetia ŝtatestro. En la komenco la rilato inter ambaŭ viroj aspektis preskaŭ kiel rilato inter patro kaj filo. Sed kiam la filo ne obeis la patron,

la patro ĉagreniĝis kaj forlasis la amikecon kun sia filo, kiu perdis lia fidon. Preskaŭ kiel en fabelo, kiu malbone finiĝas.

Nature, la subskribado de la „Moskva protokolo" fare de la ĉeĥoslovakaj gvidantoj signifis specon de kapitulaco de la Dubček-frakcio, ĉar tiu protokolo estis sovetia dikto, kiun la ĉeĥoslovakaj reformistoj devis senti kiel profundan humiligon. Sian doloron ili povis publike nur en aludoj esprimi aŭ dividi kun la ĉeĥoslovaka popolo, kiu estis same tragike trafita de tia sorto, pri kiu la partiaj kaj ŝtataj respondeculoj devis silenti laŭ la volo de la sovetianoj. Anstataŭ honeste raporti pri la faritaj spertoj en Moskvo, ili misinformis la ĉeĥoslovakan publikon, ĉar la sovetianoj ordonis al ili prisilenti la interparolojn kaj interkonsentojn okazintajn en Moskvo. La trompita ĉeĥoslovaka popolo do ne konsciis pri tio, sub kiaj kondiĉoj iliaj gvidantoj povis reveni al Prago kaj kredis, ke ĉio estas pli malpli en ordo, malgraŭ profunda skeptiko disvastiĝis tra la popolo sub la statuso de la okupacio.

La perarmea interveno mem ne signifis grandan riskon por Moskvo kaj ankaŭ ne estis granda praktika problemo sendi trupojn al Ĉeĥoslovakio, ĉar armea rezisto ne estis atendebla. Kaj la Okcidento restis pasiva, Usono estis engaĝata en Vjetnamio. Al la ĉeĥoslovaka armeo oni povus riproĉi, ke ĝi ne defendis la landon, sed en aŭgusto 1968 mankis la politikaj kondiĉoj por perarmea defendo. Al la politikaj gvidantoj de tiama Ĉeĥoslovakio oni povus krome riproĉi, ke ili ne sufiĉe realisme pritaksis la eksterpolitikajn limojn de la propra politiko kaj la seriozecon de la intencoj kaj minacoj de la sovetianoj, kvankam inter ili ekzistis kelkaj klarvidaj homoj kiel generalo Prchlík aŭ kiel Smrkovský, Hájek, Mlynař, Hübl, Löbl, Goldstücker, Kriegel, Vlasák kaj aliaj. Alia politiko estus kaŭzinta konfliktojn kun la demokratie orientata movado, kiu tamen estis tre forta. Dubček estis pacema politikisto kaj idealisto. Li ne intencis agreseme trakti la demokratian movadon nek la sovetianojn mem, kiuj tiel multe ĝenis, kritikis kaj premis lin. Eĉ se li eventuale estis tro naiva, tiu sinteno certe estis forta trajto en la karaktero de Dubček. Por subteni la demokratian movadon li pretis eĉ konflikti kun la sovetianoj, ĉar reprezalioj kontraŭ la demokratia movado estus povintaj eviti sovetian intervenon. Anstataŭ solvi la problemojn, Dubček prokrastis ilin per gajnado de tempo. La partian kongreson antaŭvidatan por la 9a de septembro 1968 la sovetianoj devis malpermesi, ĉar en ĝi estus gajnintaj la reformismaj fortoj, de kiuj la publiko estus postulinta akceli la demokration. La sovetianoj strebis eviti tiun spiralon. Por fari pli saĝan politikon al la tiamaj ĉeĥoslovakaj gvidantoj verŝajne mankis la kompreno kaj la sperto. La koncernataj politikistoj do havis nur la eblon limigi la damaĝon, kaj al la demoralizata ĉeĥoslovaka publiko restis nur la daŭrigo de la pasiva rezisto.[444]

Kompare kun la stalinisma socialismo, la „Praga printempo" estis maldogmeca, ĉar ĝi permesis la diskuton pri diversaj aliroj al la socialismo, de la plena demokratio ĝis la jugoslavia modelo de la korporacioj. Ĝi reprezentis diversajn fluojn de la politiko kaj filozofio, de la kontraŭ-totalismo ĝis la rifuzo kaj neado de la naciismo, antisemitismo kaj rasismo. En sia artikolo „La ĉeĥa sorto", kiun li ankoraŭ verkis en 1968, Milan Kundera gloris la „Pragan printempon" kiel provon „esti kreinta finfine socialismon, unuafoje en la monda historio, kiu estas sen sekreta polico, sed kun la libereco de la skribado kaj parolado, kun publika opinio, kiu estas aŭdata, kaj kun politiko, kiu baziĝas sur tiu opinio, kun libere evoluanta kulturo kaj kun homoj, kiuj perdis la timon". Eksplicite li laŭdis sian popolon pro la kuraĝa konduto dum la sovetia interveno. Per la projekto de la „Praga printempo" „la ĉeĥoj kaj slovakoj troviĝis unuafoje post la mezepoko denove en la centro de la monda historio".[445] Per tiu averto Kundera celis rekonsciigi la tradicion de Jan Hus kaj de la reformacio, per kiu Ĉeĥio siatempe staris en la centro de la monda historio kaj internacie famiĝis. Sed la slovakoj, kiuj havis kun Dubček ĉe la pinto nekontesteblajn meritojn en la „Praga printempo", ne sentis sin tro koncernataj de tiu interpreto, ĉar ili ne konis tiajn tradiciojn, havante iom alian nacian historion. Ankaŭ Václav Havel reagis kun skeptiko al tia interpreto de la historio, ĉar tian komprenon li taksis ridinda provincismo en mondo, en kiu la libereco de la opinio jam delonge realiĝis kaj en kiu en multaj landoj la arbitreco de la sekreta polico estas abolita.

La ĉefa tragedio de la „Praga printempo" konsistis krome en tio, ke neniu signifa ekstera politika forto aŭ potenco substance subtenis ĝin, kvankam ĝi havis multajn platonajn simpatiantojn kaj admirantojn en multaj landoj. La germana verkisto Günter Grass (1927-2015) riproĉis al la germanaj maldekstruloj indiferentecon rilate al la sorto de la ĉeĥoj kaj slovakoj, kies „kuraĝan provon" ili ne komprenis, preferante figurojn kiel Che Guevara kaj Ho Ĉi Minh kiel idolojn de la revolucio anstataŭ Havel kaj

---

[444] Pauer, p. 381-91.
[445] Vd. http://www.kundera.de/Info-Point/Polemik_Kundera_-_Havel/polemik_kundera_-_havel.html.

Vaculík.[446] Willy Brandt, tiama ministro pri eksteraj aferoj de FRG kaj „amiko” de Breĵnev, volis esti nur „atestanto kaj observanto kaj nenio alia”. Laŭ li, „la plej bona afero, kiun ni povas fari por Prago, estas fari nenion”. Klare, neniu en Okcidento emis enmiksiĝi en la internajn aferojn de Ĉeĥoslovakio, ĉar tio estus signifinta ludon kun la fajro. De Gaulle, kiu moke-malestime nomis la ĉeĥoslovakajn reformistojn „profesoroj”,[447] ne volis detrui la bonajn rilatojn kun Moskvo kaj emis doni la kunkulpon al Germanio, kiu strebis plibonigi la rilatojn kun Prago, por la sovetia interveno. Do, fine restis esence nur la polaj studentoj, Jugoslavio kaj Ceaușescu, kiuj esprimis sian solidarecon por Dubček kaj ties reformistoj, kvankam ankaŭ ili ne povis kaj ne volis konkrete agi por helpi lian venkon.[448] Löbl kaj aliaj ĉeĥoslovakaj maldekstruloj donis al la komunismaj partioj en Okcidento parton de la kulpo por la katastrofa situacio en la sovetia bloko. Nu, almenaŭ Waldeck Rochet, la ĉefo de la franca KP, vojaĝis al Moskvo por admoni la sovetianojn, ke ili rezignu apliki „ekstremajn rimedojn” en la kazo de Ĉeĥoslovakio. Post la interveno aro da komunismaj partioj en la mondo tamen akre protestis kontraŭ la puno, kiun Ĉeĥoslovakio ricevis de Moskvo, sed tiu hurlado de malamikoj de la bando en la Kremlo evidente ne tro impresis ĝin.

Eĉ se do la Okcidento restis ĝenerale indiferenta kaj pasiva rilate al la ĉeĥoslovaka tragedio, la sovetia krucmilitiro kontraŭ Ĉeĥoslovakio havis gravajn longdaŭrajn sekvojn. La peno de Sovetunio liberiĝi de sia stalinisma heredaĵo estis komplete detruata, la pacretoriko de Breĵnev diskreditata, kaj multaj landoj kiel ekzemple Japanio komencis pli multe okupiĝi pri sia sekureco kontraŭ la sovetia agresemo. NATO ricevis novajn impulsojn kaj la ĝenerala pritakso de Sovetunio kiel danĝera komunisma potenco, kiu ne hezitis ataki en kazo de neceso malagrandajn senkulpajn liberecamajn popolojn, kiuj volis mem decidi sian sorton, por sekurigi sian influan zonon, profunde enradikiĝis en la konscio de la homaro.

Malgraŭ ĉia kritiko, kiu estis farita al la adreso de Alexander Dubček, ĉar li ŝajne fuŝis la „Pragan printempon” kaj simile, li sendube meritas grandan admiron, ĉar li neniam intencis forlasi siajn politikajn principojn, kiuj estis esprimitaj en la Agadprogramo de la ĉeĥoslovaka KP de aprilo 1968, kiel Ota Šik, unu el liaj ĉefaj kritikintoj, emfazis en la fino de sia memuarlibro. Dubček estis vera heroo, ĉar li riskis sian vivon por defendi siajn ideojn kaj konvinkojn, ĉar li sciis, kio okazis dek jarojn antaŭe kun Imre Nagy, Pál Maléter k.a. en la kazo de la hungara ribelo. Ankaŭ post la sovetia interveno Dubček ne kapitulacis nek kompromitiĝis morale, sed preferis rezigni pri sia politika povo anstataŭ submeti sin sub la dikton de la sovetia jugo kiel multaj aliaj kolegoj faris en la tempo de la „normaliĝo”, kiuj ŝanĝis la flankon kaj daŭrigis la politikan karieron. Dubček do estis ĉio alia ol politika oportunisto.[449]

## La „Praga printempo” post la komunismo

La „Velura revolucio” de la jaro 1989 en Ĉeĥoslovakio ne bazis sian legitimecon sur la klopodoj de la „Praga printempo” de 1968 por trovi sintezon inter la demokratio kaj socialismo, sed strebadis adaptiĝi kiel eble plej rapide al la novliberala[450] ekonomia kaj politika transformado de la orienteŭropaj landoj por trovi la konekton kun la kapitalisma mondo. En Ĉeĥio la „Praga printempo” estis traktita kiel epizodo de la totalisma erao de 1948 ĝis 1989, de kiu oni klopodis liberiĝi, kaj do konsiderita kiel afero de la komunisma movado, kun kiu oni volis havi nenion komunan. Krom Aleksander Dubček, kiu fariĝis, kvazaŭ simbole, prezidanto de la ĉeĥoslovaka parlamento, neniu grava protagonisto de la „Praga printempo” ludis centran rolon en la nova ĉeĥoslovaka, poste ĉeĥa kaj slovaka ŝtatoj. Pluraj disidentoj de la „Praga printempo” troviĝis en la eksterlanda ekzilo, kaj homo kiel Václav Havel[451] restis en la lando malgraŭ gravaj malhelpoj gvidi normalan vivon, fariĝis la nova ŝtatestro, ĉar li estis konsiderita kiel morala instanco.

Ankaŭ Slovakio radikale distanciĝis de la komunismo kaj eĉ pli rapide ol Ĉeĥio integriĝis en la okcidentajn strukturojn, kvankam oni havis la impreson, ke la malnova slovaka naciismo revekiĝis.

446 Vd. la koncernan tekston en la libro de Gruša, J., Kosta, T.: Prager Frühling – Prager Herbst. Blicke zurück und nach vorne. Köln 1988. P. 49-54.
447 Vd. Brahm, p. 90.
448 Vd. Schulze Wessel, p. 235.
449 Vd. Šik, p. 364.
450 Pri la signifo de la termino vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Novliberalismo, preferu la anglan aŭ germanan version.
451 En intervjuo kun Jiří Lederer, Tschechische Gespräche. Schriftsteller geben Antwort. Reinbek, 1979, p. 50-51, Havel klarigis, ke li konsideras sin socialisto sed neniam estis komunisto.

Kvankam en Slovakio oni rekonsciiĝis pri la ´malsanktaj´ jaroj inter 1939 kaj 1945, kiam tiu lando estis unuafoje en sia historio sendependa ŝtato malfeliĉe en formo de vasalo de nazia Germanio, tio ne signifis, ke oni neglektis la esploradon de la historio de la „Praga printempo”. Male, en ambaŭ landoj aperis konsiderindaj sciencaj studoj pri tiu neforgesebla evento. Al tiu materialo aldoniĝis legindaj memuaroj de pluraj protagonistoj de la „Praga printempo”, kiuj kontribuis, ke la ĉefaj figuroj, kiuj ludis centran rolon en ĝi kiel Dubček, Šik kaj Biľak, ricevis parte novan sciencan, politikan kaj historiografian pritakson. Tamen, ŝajnas, ke la plimulto de nuntempaj ĉeĥoj kaj slovakoj ne plu tiom interesiĝas pri tiu iom eksa temo nek havas profundajn sciojn pri ĝi, des pli ke ambaŭ ŝtatoj evitis organizi pompajn memorfestojn pri la datreveno de 1968 kvindek jarojn poste.[452]

La historie faritaj, supre prezentitaj spertoj de ĉeĥoj kaj slovakoj kaj aliaj orienteŭropaj popoloj kun Sovetunio montras, ke ĉiuj landoj kaj popoloj, kiujn trafis ĝiaj influo, enmiksiĝo, kontrolo kaj jugo, perdis siajn naciajn liberecon kaj suverenecon kaj estis traktitaj de la sovetiaj regantoj kiel imperiaj kolonioj per aplikado de perforto kaj subpremado, per politiko de konstantaj agresado, trudado, ĉantaĝado kaj venĝado. La sovetianoj konis nur la strategion de la mensogado kaj trompado, tordado de la faktoj kaj falsado de la historio. Ilia socialismo celis esti sistemo de la inversigo kaj kontraŭado de la valoroj, kiuj validis en la ĝisa mondo aŭ civilizo, kiu estis formita de la Okcidento, kiun la sovetianoj profunde malamegis, por konstrui novan geostragtegian hegemonion kiel kontraŭpezon al la Okcidento, kiun ili celis detrui ideologie kaj fizike (kio nature estis utopio). La sovetia socialismo celis esti sistemo de la humanismo, justeco kaj paco, kiel ĝia oficiala propagando fanfaronis, sed en la realeco ĝi estis sistemo de la brutaleco, maljusteco kaj malpaco. Kiel pluraj analizantoj kaj komentantoj de la komunisma mondo atentigis, en Sovetunio kaj la ceteraj „socialismaj” landoj la socialismo neniam ekzistis, t.e. realigita estis nur ĝia unua fazo, nome la eksproprietigo de la privataj posedantoj de la produktiloj. La resto estis la senkompromisa defendo de la politika povo de la komunisma partio, gvidita de relative malgranda elito de oligarkoj kaj kleptokratoj, kiuj kontrolis la tutan landon, per ĉiuj rimedoj.

Eĉ se la komunismo (kiu neniam povis nomi sin tia) intertempe mortis en Ruslando, la aktuala interna kaj ekstera politiko de Moskvo sub prezidento Vladimir Putin montras, ke pluraj esencaj elementoj de la malnova pensmaniero de la imperiismo kaj „totalismo” daŭre gvidas la opciojn de la regantoj en la Kremlo, kio faris, ke Ruslando restis danĝera grandpotenco, kiel la rusa opoziciulo Garri Kasparov kaj aliaj klarvidaj observantoj prave atentigis.[453] Historiistoj, jurnalistoj kaj politikistoj denove diskutas pri la demando, ĉu la nuntempa Ruslando de Putin estas pli proksima al faŝismo aŭ stalinismo, sen esti trovinta definitivan respondon, ĉar eble temas pri novtipa sintezo, kiu estas kompletigita per carismaj trajtoj. Ruslando, kiu forĵetis la diktaturon de la komunisma partio, fariĝis nur formala demokratio kun kruda konsorcia ŝtatkapitalisma ekonomia sistemo, kiu lasas nur malgrandan spacon al la privata merkatekonomio de la meza socia tavolo, kiu konsistas plejparte el „novaj riĉuloj” kaj eble formas 10-20 procentojn de la popolo, precipe en la ĉefurboj Moskvo kaj Sankt-Peterburgo, dum la resto de la lando mizeras en malriĉeco. La konkurenco sur la ekonomia, politika kaj ĵurnalisma kampoj estis preskaŭ plene elŝaltita, la kulturo troviĝas sub la kuratoreco de konservativaj politikistoj kaj ortodoksaj ekleziuloj, kiuj arogante enmiksiĝas en la moralan sferon de la homoj, kiujn ili ĉikanas arbitre pere de la rimedoj de la justico, se iliaj verkoj ne plaĉas al ili. Ruslando restas danĝera lando ankau pro tio, ĉar ĝia malmoderna nedemokratia aŭ nedemokratiigita civilizo, kiu rilatas al la Okcidento per mikso de amo kaj malamo, kutimas apogi naciismajn, ŝovinismajn kaj kontraŭ-okcidentajn diktatorojn – de Lenin kaj Stalin ĝis Breĵnev kaj Putin – kaj krom tio restas pasiva kaj indiferenta. La ruslanda civilizo, kiu estas fortranĉita de la Okcidento, do estas profunde negativa, reakcia kaj nihilisma fenomeno. Ĝia historia misio estas la detruado de la okcidenta civilizo, precipe de la okcidenta demokratio. La politika opozicio en Ruslando estis praktike eliminita kaj estas krude subpremata kaj ĉiu iom laŭta kaj konata kritikisto de Putin kaj lia sistemo estas konsiderata kaj traktata kiel malamiko. Ankaŭ hodiaŭ, la politiko de la Kremlo, kiu estas reakcia kaj venĝema (aŭ revenĝisma), estas bedaŭrinde denove klare direktata kontraŭ la Okcidento, kaj la fino de tiu kurso ne estas videbla.[454] Ĉiu lando, kiu estis trafita de la „rusa reĝimo”,

---

[452] Laŭ Schulze Wessel, p. 12-19.

[453] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Garri_Kimowitsch_Kasparow kaj lian legindan libron *Winter Is Coming: Why Vladimir Putin and the Enemies of the Free World Must Be Stopped* (New York 2015) aŭ germanlingve: *Warum wir Putin stoppen müssen. Die Zerstörung der Demokratie in Russland und die Folgen für den Westen*, DVA, München 2015.

[454] Tiujn kaj similajn temojn mi traktis en studo aperinta sub http://plansprachen.ch/Ruslando_prezidenta_elekto2018.pdf.

estis koncernata de tiuj problemoj. Tiel estis en la carismo (kiu ne estis kontraŭ-okcidenta), tiel estis sub la komunismo, tiel estas hodiaŭ kaj kialo por kredi, ke tiu praktiko povus ŝanĝiĝi, ne ekzistas.

Kiel la rusoj traktas mem deklaritajn „malamikojn", ili montris dum la komunisma tempo en GDR 1953, Hungario 1956 kaj Ĉeĥoslovakio 1968 kaj ne nur tie kaj tiam. Ili montris ĝin ankaŭ en Ĉeĉenio en la 90aj jaroj, en Kartvelio en 2008, en Ukrainio en 2014, en Sirio de 2015 kaj aliloke. Ĝuste la nuntempa traktado de Ukrainio fare de de Kremlo povas esti en principo komparata kun la traktado de Hungario en 1956 kaj de Ĉeĥoslovakio fare de la sama Kremlo en 1968 en aliaj politikaj-ideologiaj cirkonstancoj. Oni devas supozi, ke Moskvo same traktos tiajn „malamikojn" ankaŭ en estonto, eĉ se la politika ideologio estas alia, ĉar ĝiaj tradiciaj politikaj mekanismoj kaj agmanieroj restas en principo la samaj. La politiko de la Kremlo disponas pri tuta arsenalo por manipuli kaj trompi la en- kaj eksterlandan publikon, kion ĝi lastatempe ofte faris ŝajne kun sukceso, ĉar la kontraŭstaro estas minimuma. Al tio apartenas la senskrupula kaj bone kamuflata „ombra milito" de la sekretaj servoj de Ruslando kontraŭ diversaj eŭropaj landoj, kiel montris gravaj lastatempaj incidentoj.[455] Tamen, la publiko en Okcidento kaj Eŭropo intertempe konscias pri tiu problemo kaj reagis kun skeptiko al la rusa propagando. La konstanta lezado de la internacia juro fare de Ruslando (ĉar aliaj faras la samon) restas granda problemo por la homaro, kiu eble povus esti parte solvata per la forigo de Putin, kiu estas la ĉefa instiganto de tiu negativa politiko.

Sed kiu forigu aŭ povas forigu lin ? Kvankam en Ruslando lastatempe okazis diversaj amasaj stratprotestoj kontraŭ la aktuala reĝimo, kiujn ĝi kutimas kruele subpremi kaj sufoki, oni devis konstati laŭ la tutlandaj balotoj de la pasintaj jaroj kaj jardekoj, ke la popolo de Ruslando grandparte apogis la politikon de Putin, en kiu multaj vidas specon de rusa mesio, kvankam li praktikas naciisman, imperiisman kaj kontraŭ-okcidentan kurson. Ĉe tiuj balotoj, kiuj estis diversmaniere manipulitaj de la Kremlo, oni devas konsideri la cirkonstancon, ke la ruslanda popolo kutimas voĉdoni por tiu kandidato, kiun la Kremlo oficiale proponas kaj prezentas al ili.

Pri la demando, kiel la Okcidento reagu al la agresemo de Ruslando, ekzistas diverĝaj opinioj, de milda komprenema traktado ĝis la neceso de nova nuklea armado kontraŭ ĝi. Nuntempe, do en la jaro 2019, ŝajnas, ke la mondo iom indiferente rilatas al Ruslando, kiu troviĝas en la fina fazo de la Putina epoko, ĉar centraj landoj de la Okcidento kiel Usono, Britio, Germanio estas okupataj pri si mem. En Eŭropa Unio regas la demokratia kaoso kaj Ĉinio senhalte pretiĝas por la rolo kiel unua monda ekonomia potenco, kompare kun kiu Ruslando estas nano. La malgrandaj orienteŭropaj landoj, kiuj troviĝas inter okcidenta Eŭropo kaj Ruslando, emancipiĝis, sed estas minacataj de novaj aŭtoritatismaj tendencoj, kiuj ŝajne sukcesas kiel politika modelo, sen rezigni pri la okcidenttipa formo de la demokratio, kiu povas helpi al novaj diktatoroj gajni balotojn kiel en Hungario, Pollando, Ĉeĥio kaj Slovakio, la epicentroj de la kontraŭ-komunisma, kontraŭ-stalinisma, kontraŭ-totalisma kaj kontraŭ-rusa opozicio dum la 20a jarcento.

Oni devas bedaŭri, ke Ruslando esence konservis sian reputacion kiel „imperio de la malbono", kiel ĝi estis siatempe trafe nomita de la usona prezidento Ronald Reagan. Ŝajnas, ke – almenaŭ el okcidenta vidpunkto – Ruslando nenion lernis el la spertoj kaj eraroj de la pasinteco, sed male, klopodas reveni al la stilo de malnovaj tempoj. Se oni komparas la konduton de grandpotenculoj kiel Breĵnev, Kosygin kaj Podgornyj en la tempo de la „Praga printempo" en 1968 kun la konduto de grandpotenculoj kiel Putin, Lavrov ktp. en la nuna tempo, oni devas konstati, ke la spirito de la rusa politiko esence ne ŝanĝiĝis. Sufiĉas ankaŭ rigardi la ŝtatan ruslandan televidon por fariĝi atestanto de la agresema histerio kaj demagogia tono de la diskuto kontraŭ Ukrainio, Eŭropo kaj aliaj landoj kaj popoloj, per kiu Ruslando defendas siajn unuflankajn vidpunktojn, konsiderante sin unusola viktimo de la monda historio.

* * *

[455] Vd. https://www.spiegel.de/politik/ausland/militaergeheimdienst-gru-moskaus-schattenkrieg-in-europa-a-1290606.html.

**Nomoj de menciitaj personoj, nur komunistoj (regantaj politikistoj kaj disidentoj, laŭlande kaj alfabeta vico):**

Albanoj:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Enver_Hoĝa

https://de.wikipedia.org/wiki/Ismail_Kadare

https://de.wikipedia.org/wiki/Mehmet_Shehu

https://en.wikipedia.org/wiki/Koçi_Xoxe

Bulgaroj:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Georgij_Dimitrov

https://eo.wikipedia.org/wiki/Ĵelju_Ĵelev

https://eo.wikipedia.org/wiki/Todor_Ĵivkov

https://de.wikipedia.org/wiki/Wassil_Kolarow

https://de.wikipedia.org/wiki/Trajtscho_Kostow

https://bg.wikipedia.org/wiki/Владимир_Топенчаров

https://de.wikipedia.org/wiki/Slawtscho_Transki

https://en.wikipedia.org/wiki/Valko_Chervenkov

https://en.wikipedia.org/wiki/Pavel_Vezhinov

https://en.wikipedia.org/wiki/Anton_Yugov

Ĉeĥoslovakoj (t.e. ĉeĥoj kaj slovakoj):

https://de.wikipedia.org/wiki/Karol_Bacílek

https://de.wikipedia.org/wiki/Rudolf_Barák

https://de.wikipedia.org/wiki/Jan_Beneš_(Schriftsteller,_1936)

https://cs.wikipedia.org/wiki/Vasil_Biľak

https://cs.wikipedia.org/wiki/Jan_Brod

https://de.wikipedia.org/wiki/Čestmír_Císař

https://de.wikipedia.org/wiki/Michal_Chudík

https://de.wikipedia.org/wiki/Oldřich_Černík

https://de.wikipedia.org/wiki/Václav_David

http://www.litcentrum.sk/slovenski-spisovatelia/stefan-drug

https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Dubček

https://de.wikipedia.org/wiki/Martin_Dzúr

https://cs.wikipedia.org/wiki/Evžen_Erban_(politik)

https://de.wikipedia.org/wiki/Julius_Fučík_(Autor)

https://de.wikipedia.org/wiki/Eduard_Goldstücker

https://eo.wikipedia.org/wiki/Klement_Gottwald

https://cs.wikipedia.org/wiki/Josef_Grösser

https://de.wikipedia.org/wiki/Jiří_Hájek
https://plus.rozhlas.cz/milos-hajek-mluvci-charty-77-a-ucastnik-slavne-snidane-s-mitterandem-6512262

https://de.wikipedia.org/wiki/Václav_Havel

https://cs.wikipedia.org/wiki/Zdeněk_Hejzlar

https://de.wikipedia.org/wiki/Jiří_Hendrych

https://de.wikipedia.org/wiki/Karel_Hoffmann_(Politiker)

https://de.wikipedia.org/wiki/Miroslav_Holub

https://de.wikipedia.org/wiki/Václav_Hůla

https://eo.wikipedia.org/wiki/Gustáv_Husák

https://cs.wikipedia.org/wiki/Milan_Hübl

https://de.wikipedia.org/wiki/Alois_Indra

https://de.wikipedia.org/wiki/Miloš_Jakeš

https://cs.wikipedia.org/wiki/Milan_Jungmann

https://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Kafka

https://cs.wikipedia.org/wiki/Vašek_Káňa

https://de.wikipedia.org/wiki/Antonín_Kapek

https://de.wikipedia.org/wiki/Ivan_Klíma,

https://de.wikipedia.org/wiki/Alexandr_Kliment

https://de.wikipedia.org/wiki/Drahomír_Kolder

https://de.wikipedia.org/wiki/Jiří_Kosta

https://de.wikipedia.org/wiki/Pavel_Kohout

https://cs.wikipedia.org/wiki/Vladimír_Koucký

https://de.wikipedia.org/wiki/František_Kriegel

https://cs.wikipedia.org/wiki/Josef_Kudrna_(politik),

https://de.wikipedia.org/wiki/Milan_Kundera

https://sk.wikipedia.org/wiki/Ivan_Kupec

https://de.wikipedia.org/wiki/Jiří_Lederer

https://en.wikipedia.org/wiki/Jozef_Lenárt

https://de.wikipedia.org/wiki/Antonin_Jaroslav_Liehm.

https://cs.wikipedia.org/wiki/Eugen_Löbl

https://de.wikipedia.org/wiki/Arnošt_Lustig

https://cs.wikipedia.org/wiki/Miroslav_Mamula_(generál)

https://de.wikipedia.org/wiki/Ján_Marko

https://de.wikipedia.org/wiki/Zdeněk_Mlynář_(Politiker)

https://de.wikipedia.org/wiki/Ladislav_Mňačko

https://de.wikipedia.org/wiki/Vítězslav_Nezval

https://cs.wikipedia.org/wiki/Miroslav_Němec_(politik)

https://de.wikipedia.org/wiki/Ladislav_Novomeský

https://en.wikipedia.org/wiki/Antonín_Novotný
https://www.youtube.com/watch?v=nSw6XxkXO1k, https://www.youtube.com/watch?v=eLge2K2VyeE, https://www.youtube.com/watch?v=tflXrk6L2As, https://www.youtube.com/watch?v=zHQhQVFgKU4

https://cs.wikipedia.org/wiki/Vilém_Nový

https://cs.wikipedia.org/wiki/Miroslav_Pastyřík

https://cs.wikipedia.org/wiki/Ondrej_Pavlík

http://abicko.avcr.cz/archiv/1999/12/obsah/zemrel-prof.-mudr.-otakar-poupa-drsc..html

https://cs.wikipedia.org/wiki/Václav_Prchlík

https://de.wikipedia.org/wiki/Jan_Procházka

https://cs.wikipedia.org/wiki/Stanislav_Rázl

https://en.wikipedia.org/wiki/Radovan_Richta

https://cs.wikipedia.org/wiki/Josef_Rybák

https://de.wikipedia.org/wiki/Jaroslav_Seifert

https://de.wikipedia.org/wiki/Rudolf_Slánský

https://de.wikipedia.org/wiki/Josef_Smrkovský

https://www.phil.muni.cz/fil/scf/komplet/sochor.html

https://cs.wikipedia.org/wiki/Miroslav_Stehlík

https://de.wikipedia.org/wiki/Bohumil_Sucharda

https://en.wikipedia.org/wiki/Ivan_Sviták

https://de.wikipedia.org/wiki/Ludvík_Svoboda

https://en.wikipedia.org/wiki/Jaroslav_Šabata
https://dissidenten.eu/laender/tschechien/biografien/jaroslav-sabata
https://plus.rozhlas.cz/jaroslav-sabata-vzdycky-nekdo-vyhraje-a-nekdo-prohraje-6512321

https://cs.wikipedia.org/wiki/Viliam_Šalgovič

https://de.wikipedia.org/wiki/Jan_Šejna

https://de.wikipedia.org/wiki/Ota_Šik

https://cs.wikipedia.org/wiki/Věněk_Šilhán

https://cs.wikipedia.org/wiki/Bohumil_Šimon_(politik_KSČ)

https://de.wikipedia.org/wiki/Viliam_Široký

https://de.wikipedia.org/wiki/František_Šorm

https://de.wikipedia.org/wiki/Lubomír_Štrougal

https://cs.wikipedia.org/wiki/Marie_Švermová

https://de.wikipedia.org/wiki/Oldřich_Švestka

https://de.wikipedia.org/wiki/Dominik_Tatarka

https://de.wikipedia.org/wiki/Pavel_Tigrid

https://en.wikipedia.org/wiki/Stepan_Chervonenko

https://de.wikipedia.org/wiki/Ludvík_Vaculík

https://cs.wikipedia.org/wiki/František_Vodsloň

https://eo.wikipedia.org/wiki/Otto_Wichterle

https://www.perlentaucher.de/autor/stanislav-zamecnik.html

Germanoj (GDR):

https://de.wikipedia.org/wiki/Anton_Ackermann

https://en.wikipedia.org/wiki/Erich_Apel

https://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_Axen

https://eo.wikipedia.org/wiki/Johannes_R._Becher

https://de.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Behrens

https://de.wikipedia.org/wiki/Herbert_Belter

https://de.wikipedia.org/wiki/Arne_Benary
https://eo.wikipedia.org/wiki/Manfred_Bieler
https://de.wikipedia.org/wiki/Wolf_Biermann
https://eo.wikipedia.org/wiki/Ernst_Bloch
https://de.wikipedia.org/wiki/Heinz_Brandt_(Widerstandskämpfer)
https://de.wikipedia.org/wiki/Max_Fettling
https://de.wikipedia.org/wiki/Jens_Gerlach_(Lyriker)
https://de.wikipedia.org/wiki/Otto_Grotewohl
https://eo.wikipedia.org/wiki/Peter_Hacks
https://de.wikipedia.org/wiki/Kurt_Hager
https://de.wikipedia.org/wiki/Wolfgang_Harich
https://eo.wikipedia.org/wiki/Robert_Havemann
https://de.wikipedia.org/wiki/Stephan_Hermlin
https://de.wikipedia.org/wiki/Rudolf_Herrnstadt
https://de.wikipedia.org/wiki/Stefan_Heym
https://de.wikipedia.org/wiki/Erich_Honecker
https://eo.wikipedia.org/wiki/Heinz_Kahlau
https://de.wikipedia.org/wiki/Gunther_Kohlmey
https://de.wikipedia.org/wiki/Jürgen_Kuczynski
https://de.wikipedia.org/wiki/Günter_Kunert
https://de.wikipedia.org/wiki/Walter_Janka
https://eo.wikipedia.org/wiki/Heinz_Kahlau
https://de.wikipedia.org/wiki/Wolfgang_Leonhard
https://de.wikipedia.org/wiki/Hans_Mayer_(Literaturwissenschaftler)
https://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Merker
https://de.wikipedia.org/wiki/Wolfgang_Natonek
https://de.wikipedia.org/wiki/Fred_Oelßner
https://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Othma
https://de.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_Pieck
https://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Schirdewan
http://www.17juni53.de/tote/stauch.html
https://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Streubel
https://eo.wikipedia.org/wiki/Walter_Ulbricht
https://de.wikipedia.org/wiki/Kurt_Vieweg
https://de.wikipedia.org/wiki/Christa_Wolf
https://de.wikipedia.org/wiki/Ernst_Wollweber
https://de.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_Zaisser
https://de.wikipedia.org/wiki/Arnold_Zweig
https://de.wikipedia.org/wiki/Gerhard_Zwerenz

Hungaroj:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Jozefo_Bem
https://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor_Déry
https://de.wikipedia.org/wiki/Miháy_Farkas
https://de.wikipedia.org/wiki/Ernő_Gerő
https://eo.wikipedia.org/wiki/János_Kádár
https://eo.wikipedia.org/wiki/Géza_Losonczy
https://de.wikipedia.org/wiki/Georg_Lukács
https://eo.wikipedia.org/wiki/Imre_Nagy_(politikisto)
https://eo.wikipedia.org/wiki/Sándor_Petőfi
https://eo.wikipedia.org/wiki/László_Rajk
https://de.wikipedia.org/wiki/Mátyás_Rákosi
https://en.wikipedia.org/wiki/József_Révai
https://eo.wikipedia.org/wiki/Péter_Veres_(verkisto)

Jugoslavoj:
https://en.wikipedia.org/wiki/Milovan_Djilas
https://en.wikipedia.org/wiki/Milan_Gorkić
https://de.wikipedia.org/wiki/Ante_Pavelić
https://eo.wikipedia.org/wiki/Josip_Broz_Tito
https://de.wikipedia.org/wiki/Franjo_Tuđman

Poloj:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Zygmunt_Bauman
https://de.wikipedia.org/wiki/Bolesław_Bierut
https://en.wikipedia.org/wiki/Czesław_Bobrowski
https://en.wikipedia.org/wiki/Kazimierz_Brandys
https://en.wikipedia.org/wiki/Włodzimierz_Brus
https://en.wikipedia.org/wiki/Antoni_Czubiński
https://en.wikipedia.org/wiki/Józef_Chałasiński
https://de.wikipedia.org/wiki/Józef_Cyrankiewicz
https://de.wikipedia.org/wiki/Edward_Gierek
https://de.wikipedia.org/wiki/Władysław_Gomułka
https://pl.wikipedia.org/wiki/Ludwik_Hass
https://en.wikipedia.org/wiki/Jerzy_Holzer
https://de.wikipedia.org/wiki/Roman_Ingarden
https://de.wikipedia.org/wiki/Mieczysław_Jastrun
https://en.wikipedia.org/wiki/Krystyna_Kersten
https://de.wikipedia.org/wiki/Leszek_Kołakowski
https://ihpan.edu.pl/emerytowani/357-andrzej-korzon
https://de.wikipedia.org/wiki/Tadeusz_Kotarbiński

https://de.wikipedia.org/wiki/Jan_Kott
https://pl.wikipedia.org/wiki/Marcin_Kula
https://de.wikipedia.org/wiki/Jacek_Kuroń
https://de.wikipedia.org/wiki/Oskar_Lange
https://en.wikipedia.org/wiki/Edward_Lipiński
https://en.wikipedia.org/wiki/Paweł_Machcewicz
https://de.wikipedia.org/wiki/Adam_Michnik
https://de.wikipedia.org/wiki/Mieczysław_Moczar
https://de.wikipedia.org/wiki/Stanisław_Mikołajczyk
https://de.wikipedia.org/wiki/Hilary_Minc
https://de.wikipedia.org/wiki/Karol_Modzelewski
https://de.wikipedia.org/wiki/Edward_Ochab
https://en.wikipedia.org/wiki/Stanisław_Ossowski
https://en.wikipedia.org/wiki/Andrzej_Paczkowski
https://de.wikipedia.org/wiki/Krzysztof_Pomian
https://de.wikipedia.org/wiki/Julian_Przyboś
https://en.wikipedia.org/wiki/Wojciech_Roszkowski
https://de.wikipedia.org/wiki/Adam_Schaff
https://de.wikipedia.org/wiki/Antoni_Słonimski
https://de.wikipedia.org/wiki/Marian_Spychalski
https://de.wikipedia.org/wiki/Tomasz_Strzembosz
https://pl.wikipedia.org/wiki/Hanna_Świda-Ziemba
https://en.wikipedia.org/wiki/Jerzy_Szacki
https://en.wikipedia.org/wiki/Janusz_Szpotański
https://de.wikipedia.org/wiki/Władysław_Tatarkiewicz
https://pl.wikipedia.org/wiki/Andrzej_Urbański
https://de.wikipedia.org/wiki/Andrzej_Walicki
https://de.wikipedia.org/wiki/Melchior_Wańkowicz
https://de.wikipedia.org/wiki/Adam_Ważyk
https://pl.wikipedia.org/wiki/Andrzej_Werblan
https://pl.wikipedia.org/wiki/Włodzimierz_Wesołowski
https://pl.wikipedia.org/wiki/Wiesław_Władyka
https://de.wikipedia.org/wiki/Stefan_Wyszyński
https://pl.wikipedia.org/wiki/Janusz_Żarnowski
Rumanoj:
https://de.wikipedia.org/wiki/Nicolae_Ceaușescu
https://de.wikipedia.org/wiki/Miron_Constantinescu
https://de.wikipedia.org/wiki/Alexandru_Drăghici
https://de.wikipedia.org/wiki/Ștefan_Foriș
https://eo.wikipedia.org/wiki/Gheorghe_Gheorghiu-Dej
https://en.wikipedia.org/wiki/Alexandru_Jar

https://de.wikipedia.org/wiki/Vasile_Luca
https://de.wikipedia.org/wiki/Lucrețiu_Pătrașcanu
https://de.wikipedia.org/wiki/Ana_Pauker
https://de.wikipedia.org/wiki/Gheorghe_Tătărescu

Sovetianoj:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Svetlana_Allilujeva
https://de.wikipedia.org/wiki/Juri_Wladimirowitsch_Andropow
https://ru.wikipedia.org/wiki/Аверкий_Борисович_Аристов
https://de.wikipedia.org/wiki/Olga_Fjodorowna_Bergholz
https://eo.wikipedia.org/wiki/Lavrentij_Berija
https://de.wikipedia.org/wiki/Leonid_Iljitsch_Breschnew
https://ru.wikipedia.org/wiki/Михаил_Шлёмович_Бирман
https://eo.wikipedia.org/wiki/Iosif_Brodskij
https://de.wikipedia.org/wiki/Wladimir_Konstantinowitsch_Bukowski
https://de.wikipedia.org/wiki/Aram_Chatschaturjan
https://de.wikipedia.org/wiki/Nikita_Sergejewitsch_Chruschtschow
https://de.wikipedia.org/wiki/Juli_Markowitsch_Daniel
https://fr.wikipedia.org/wiki/Anatoli_Dorodnitsyne
https://de.wikipedia.org/wiki/Iwan_Dsjuba
https://de.wikipedia.org/wiki/Wladimir_Dmitrijewitsch_Dudinzew
https://de.wikipedia.org/wiki/Ilja_Grigorjewitsch_Ehrenburg
https://en.wikipedia.org/wiki/Alexei_Yepishev
https://de.wikipedia.org/wiki/Juri_Timofejewitsch_Galanskow
https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Iljitsch_Ginsburg
https://de.wikipedia.org/wiki/Wiktor_Michailowitsch_Gluschkow
https://en.wikipedia.org/wiki/Andrei_Grechko
https://de.wikipedia.org/wiki/Andrei_Andrejewitsch_Gromyko
https://de.wikipedia.org/wiki/Wassili_Semjonowitsch_Grossman
https://de.wikipedia.org/wiki/Oles_Hontschar
https://de.wikipedia.org/wiki/Wera_Michailowna_Inber
https://de.wikipedia.org/wiki/Iwan_Ignatjewitsch_Jakubowski
https://de.wikipedia.org/wiki/Frol_Romanowitsch_Koslow
https://de.wikipedia.org/wiki/Alexei_Nikolajewitsch_Kossygin
https://ru.wikipedia.org/wiki/Анатолий_Эммануилович_Краснов-Левитин
https://uk.wikipedia.org/wiki/Квецко_Дмитро_Миколайович
https://eo.wikipedia.org/wiki/Lenin
https://en.wikipedia.org/wiki/Olga_Lepeshinskaya_(biologist)
https://de.wikipedia.org/wiki/Jewsei_Grigorjewitsch_Liberman
https://de.wikipedia.org/wiki/Lasar_Aronowitsch_Ljusternik
https://en.wikipedia.org/wiki/Trofim_Lysenko

https://en.wikipedia.org/wiki/Vasyl_Makukh
https://eo.wikipedia.org/wiki/Georgij_Malenkov
https://de.wikipedia.org/wiki/Anastas_Mikojan
https://uk.wikipedia.org/wiki/Валентин_Якович_Мороз
https://de.wikipedia.org/wiki/Ernst_Iossifowitsch_Neiswestny
https://en.wikipedia.org/wiki/Vasily_Sergeevich_Nemchinov
https://de.wikipedia.org/wiki/Bulat_Schalwowitsch_Okudschawa
https://eo.wikipedia.org/wiki/Boris_Pasternak
https://de.wikipedia.org/wiki/Konstantin_Georgijewitsch_Paustowski
https://ru.wikipedia.org/wiki/Павловский,_Иван_Григорьевич_(генерал)
https://de.wikipedia.org/wiki/Nikolai_Wiktorowitsch_Podgorny
https://ru.wikipedia.org/wiki/Пётр_Николаевич_Поспелов
https://en.wikipedia.org/wiki/Nikolai_Pogodin
https://de.wikipedia.org/wiki/Anatoli_Naumowitsch_Rybakow
https://de.wikipedia.org/wiki/Andrei_Dmitrijewitsch_Sacharow
https://de.wikipedia.org/wiki/Andrei_Donatowitsch_Sinjawski
https://de.wikipedia.org/wiki/Michail_Sergejewitsch_Solomenzew
https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Issajewitsch_Solschenizyn
https://de.wikipedia.org/wiki/Michail_Michailowitsch_Soschtschenko
https://eo.wikipedia.org/wiki/Josif_Stalin
https://de.wikipedia.org/wiki/Wassyl_Stus
https://de.wikipedia.org/wiki/Michail_Andrejewitsch_Suslow
https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Nikolajewitsch_Schelepin
https://de.wikipedia.org/wiki/Andrei_Alexandrowitsch_Schdanow
https://de.wikipedia.org/wiki/Petro_Schelest
https://de.wikipedia.org/wiki/Michail_Alexandrowitsch_Scholochow
https://de.wikipedia.org/wiki/Dmitri_Dmitrijewitsch_Schostakowitsch
https://de.wikipedia.org/wiki/Wladimir_Wassiljewitsch_Schtscherbitzki,
https://ru.wikipedia.org/wiki/Борис_Владимирович_Талантов
https://eo.wikipedia.org/wiki/Lev_Trockij
https://en.wikipedia.org/wiki/Stepan_Chervonenko
https://de.wikipedia.org/wiki/Wjatscheslaw_Tschornowil
https://de.wikipedia.org/wiki/Lidija_Kornejewna_Tschukowskaja
https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Trifonowitsch_Twardowski
https://de.wikipedia.org/wiki/Kliment_Jefremowitsch_Woroschilow
https://de.wikipedia.org/wiki/Andrei_Januarjewitsch_Wyschinski
https://de.wikipedia.org/wiki/Michail_Sergejewitsch_Woslenski
https://en.wikipedia.org/wiki/Leonid_Zorin

**Utiligita kaj kroma pritema fakliteraturo:**

Bartsch, Günter: Revolution und Gegenrevolution in Osteuropa 1948-1968. Bonn 1971.

XX. Parteitag der Kommunistischen Partei der Sowjetunion. Düsseldorf 1956.

Medwedew, L.; Havemann, R.; Steffen, J. u.a.: Entstalinisierung. Der XX. Parteitag der KPdSU und seine Folgen. Frankfurt a.M. 1977.

Die Geheimrede Chruschtschows. Über den Personenkult und seine Folgen. Berlin 1990.
(La tekston vd. Sub https://de.wikipedia.org/wiki/Über_den_Personenkult_und_seine_Folgen).

Naumov, Vladimir: Zur Geschichte der Geheimrede N.S. Chruščevs auf dem XX. Parteitag der KPdSU. En: Lobkowicz, Nikolaus k.a.: Forum für osteuropäische Ideen- und Zeitgeschichte. Kajero 1/2007. Köln, Weimar, Wien 1997. P137-177 (la rusa teksto aperis en la revuo *Novaja i novejšaja istorija*, 4/1996, vd. http://vivovoco.astronet.ru/VV/PAPERS/HISTORY/ANTIST.HTM). (Lige kun tio vd. ankaŭ https://www.alexanderyakovlev.org/almanah/inside/almanah-doc/55752).

Liberman, Evsej G.: Methoden der Wirtschaftslenkung im Sozialismus. Ein Versuch über die Stimulierung der gesellschaftlichen Produktion. Frankfurt/M. 1974.

Raina, Peter K.: Die Krise der Intellektuellen. Eine Rebellion für die Freiheit in Polen. Ein Modellfall. Olten/Freiburg i. Brsg. 1968.

Kersten, Heinz: Aufstand der Intellektuellen. Wandlungen in der kommunistischen Welt. Ein dokumentarischer Bericht. Stuttgart 1957.

Rösler-Schmidt, Andrea: Polen. Vom Mittelalter bis zur Gegenwart. Regensburg/München 1996.

Hauszmann, Janos: Ungarn. Vom Mittelalter bis zur Gegenwart. Regensburg/München 2004.

Völkl, Ekkehard: Rumänien. Vom 19. Jahrhundert bis in die Gegenwart. Regensburg/München 1995.

Härtel, Hans-Joachim; Schönfeld, Roland: Bulgarien. Vom Mittelalter bis zur Gegenwart. Regensburg 1998.

Bartl, Peter: Albanien. Vom Mittelalter bis zur Gegenwart. Regensburg 1995.

Von Kohl, Christine: Albanien. München 1998.

Tönnes, Bernhard: Sonderfall Albanien. Enver Hoxhas „eigener Weg“ und die historischen Ursprünge seiner Ideologie. München 1980.

Lubonja, Fatos: Second Sentence: Inside the Albanian Gulag. London 2009.
(pri Lubonja vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Fatos_Lubonja)

Schroeder, Klaus: Der SED-Staat. Geschichte und Strukturen der DDR 1949-1990. Köln 2013.

Weber, Hermann: Geschichte der DDR. München 1999.

Richter, Hedwig: Die DDR. Paderborn 2009.

Kowalczuk, Ilko-Sascha: Der 17. Juni 1953. C.H. Beck 2013.

Baring, Arnulf.: Der 17. Juni 1953. DVA 1983.

Herzberg, Guntolf: Anpassung und Aufbegehren. Die Intelligenz der DDR in den Krisenjahren 1956/58. Berlin 2006. (Über den Autor: https://www.christoph-links-verlag.de/index.cfm?view=6&autoren_id=144)

Neubert, Ehrhart: Geschichte der Opposition in der DDR 1949-1989. Berlin 2/1998.

Djilas, Milovan: Idee und System. Politische Essays. Wien 1982.

Bartl, Peter: Grundzüge der jugoslawischen Geschichte. Darmstadt 1985.

Simić, Pero: Tito – Geheimnis des Jahrhunderts. Ljubljana 2011.

Pirjevec, Jože. Tito. Die Biographie. München 2016.

Pipes, Richard: Kommunismus. Berlin 2003. (Anglalingve: Pipes, Richard: Communism. New York 2001.)

Kuroń, Jacek; Modzelewski Karol: Monopolsozialismus. Offener Brief an die Polnische Vereinigte Arbeiterpartei. Hamburg 1969. (La pola versio estas havebla en Svislando ĉe: https://www.swissbib.ch/Record/262967499)

Friszke, Andrzej: War die Volksrepublik Polen ein besetztes Land? Ein „Historikerstreit“. En: Lobkowicz, N. k.a.: *Forum* für osteuropäische Ideen- und Zeitgeschichte. Kajero 1/1997. p. 232-250.

Kaplan, Karel: Politische Persekution in der Tschechoslowakei 1948-1972. Köln 1983.

Kaplan, Karel: Die politischen Prozesse in der Tschechoslowakei 1948-1954. München 1986.

Lobkowicz, Nikolaus; Prinz, Friedrich: Schicksalsjahre der Tschechoslowakei:1945-1948. München/Wien 1981.

Šik, Ota: Das kommunistische Machtsystem. Hamburg 1976.

Šik, Ota: Prager Frühlingserwachen. Erinnerungen. Herford 1988.

Dubček, Alexander: Leben für die Freiheit. München 1993.

Pauer, Jan: Prag 1968. Der Einmarsch des Warschauer Paktes. Hintergründe, Planung, Durchführung. Bremen 1995. (Probable plej detala analizo pri la eventoj dum la „Praga printempo".)

Schulze Wessel, Martin: Der Prager Frühling. Stuttgart 2018.

Studer, Hans. K. (eld.): Tschechoslowakei August 68. Die Tragödie eins tapferen Volkes. Kilchberg 1968. (https://doc1.bibliothek.li/aah/000A006386.pdf)

Kamberger, Klaus (Red.): Der Fall CSSR. Strafaktion gegen einen Bruderstaat. Eine Dokumentation. Frankfurt/M. 1968.

Segert, Dieter: Prager Frühling. Gespräche über eine europäische Erfahrung. Wien 2008.

Böll, Heinrich: Der Panzer zielte auf Kafka. Heinrich Böll und der Prager Frühling. Köln 2018. https://www.kiwi-verlag.de/buch/der-panzer-zielte-auf-kafka/978-3-462-05155-1; https://www.perlentaucher.de/buch/heinrich-boell/der-panzer-zielte-auf-kafka.html; https://digilib.phil.muni.cz/bitstream/handle/11222.digilib/105383/1_BrunnerBeitratgeGermanistikNordistik_09-1994-1_10.pdf?sequence=1; https://www.spiegel.de/spiegel/print/d-45950112.html.

Prag 1968. Beilage zur Wochenzeitung *Das Parlament*: http://www.bpb.de/system/files/pdf/X86YIA.pdf.

Kohout, Pavel: Aus dem Tagebuch eines Konterrevolutionärs. Luzern/Frankfurt/M. 1969.

Kommunistische Partei der Tschechoslowakei: Aktionsprogramm der Kommunistischen Partei der Tschechoslowakei. Beschlossen von der Plenartagung des ZK der KP der Tschechoslowakei am 5. April 1968. En: Informationsbulletin. Materialien und Dokumente kommunistischer und Arbeiterparteien. Beilage zu Nr. 23/24. Wien 1968. 61 S. Eld. kaj resp. Red.: Erwin Zucker-Schilling. (https://www.swissbib.ch/Record/077980220)

Mlynár, Zdeněk: Das Aktionsprogramm der KPČ 1968 nach zehn Jahren. En: Pelikán, Jiří, Wilke, Manfred: Opposition ohne Hoffnung? Jahrbuch zu Osteuropa 2. Reinbek bei Hamburg 1979. P. 52-67.

Mlynár, Zdeněk: Nachtfrost: Erfahrungen auf dem Weg vom realen zum menschlichen Sozialismus. Köln, Frankfurt am Main 1978; Mlynár, Zdeněk: Nachtfrost. Das Ende des Prager Frühlings. 2a eld. Frankfurt/M. 1988.

Pelikán, Jiří, Wilke, Manfred: Opposition ohne Hoffnung? Jahrbuch zu Osteuropa 2. Reinbek bei Hamburg 1979.

Pelikán, Jiří (eld.): Das unterdrückte Dossier. Bericht der Kommission des ZK der KPTsch über politische Prozesse und „Rehabilitierungen" in der Tschechoslowakei 1949-1968. Wien/Frankfurt/Zürich 1970.

Pelikán, Jiří (eld.): Pervertierte Justiz. Bericht der Kommission des ZK der KPTsch über die politischen Morde und Verbrechen in der Tschechoslowakei 1949-1963. Wien/Frankfurt/Zürich 1972.

Reden zum IV. Kongress des Tschechoslowakischen Schriftstellerverbandes, Prag, Juni 1967. Frankfurt/M. 1969. (https://doc1.bibliothek.li/aba/A030838.pdf)

Gruša, Jiří, Kosta, Tomas: Prager Frühling – Prager Herbst. Blicke zurück und nach vorne. Köln 1988.
Bertleff, Erich: Mit blossen Händen. Der einsame Kampf der Tschechen und Slowaken. Wien/München/Zürich 1968.

Reitzner, Almar: Alexander Dubcek. Männer und Mächte in der Tschechoslowakei. München 1968. (Almar Reitzner estis la filo de https://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Reitzner)

Liehm, Antonín J.: Gespräch an der Moldau. Das Ringen um die Freiheit der Tschechoslowakei. Wien 1968.

Goldstücker, Eduard: Erfahrungen eines Mitteleuropäers. München/Hamburg 1989.

Kosta, Jiří: Nie aufgeben. Ein Leben zwischen Bangen und Hoffen. Berlin/Wien 2004.

Hejzlar, Zdeněk: Reformkommunismus. Zur Geschichte der Kommunistischen Partei der Tschechoslowakei. Frankfurt a.M. 1976. https://www.swissbib.ch/Record/268803439

Brahm, Heinz: Der Kreml und die ČSSR 1968-1969. Stuttgart 1970.

Lachmann, Hannes: Die „Ungarische Revolution“ und der „Prager Frühling“. Eine Verflechtungsgeschichte zweier Reformbwegungen zwischen 1956 und 1968. Verflechtungsgeschichte. Essen 2018.

Dokumenta filmo pri la „Praga printempo“: https://www.youtube.com/watch?v=Z8YpRV4Cppc

Löbl, Eugen; Grünwald, Leopold: Die intellektuelle Revolution. Hintergründe und Auswirkungen des „Prager Frühlings“. Düsseldorf 1969.

Havel, Václav.: Versuch, in der Wahrheit zu leben. (Originaltitel: Die Macht der Ohnmächtigen). Reinbek 1978.

Grebing, Helga: Der Revisionismus. Von Bernstein bis zum ´Prager Frühling´. München 1977.

Kołakowski, Leszek: Der Mensch ohne Alternative. Von der Möglichkeit und Unmöglichkeit, Marxist zu sein. München 1960.

Kołakowski, Leszek*:* Die Hauptströmungen des Marxismus – Entstehung, Entwicklung, Zerfall. 3 vol., München 1977-78.

Brzezinski, Zbigniew K.: Der Sowjetblock. Köln/Berlin 1962.

Hacker, Jens: Der Ostblock. Entstehung, Entwicklung und Struktur 1939-1980. Baden-Baden 1983.

Csizmas, Michael: Der Warschauer Pakt. Bern 1972.

Tatu, Michel: Macht und Ohnmacht im Kreml. Frankfurt 1967.

Dietrich Beyrau, Ivo Bock: Das Tauwetter und die Folgen. Bremen 1988 (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf03/z01_3-924444-31-5_01.pdf)

Ivo Bock (Hg.): Scharf überwachte Kommunikation. Zensursysteme in Ost(mittel)europa (1960er - 1980er Jahre). Berlin 2011 (Enhavo: https://opac.nebis.ch/objects/pdf/z01_978-3-643-11181-4_01.pdf)

Crankshaw, Edward: Der Rote Zar. Nikita Chruschtschow. Frankfurt/M. 1967.

Neumann-Hoditz, Reinhold: Chruschtschow in Selbstzeugnissen und Bilddokumenten. Reinbek 1980.

Dornberg, John: Breschnew. Profil des Herrschers im Kreml. München 1973.

Schattenberg, Susanne: Leonid Breschnew: Staatsmann und Schauspieler im Schatten Stalins. Eine Biographie. Köln/Weimar/Wien 2017.

Ein schöner Traum. *Der Spiegel*, 21.4.1969. https://www.spiegel.de/spiegel/print/d-45741685.html.

„Wir werden auch in Zukunft nicht schweigen.“ Intervjuo kun J. Hájek. *Der Spiegel,* 2.1.1978. https://www.spiegel.de/spiegel/print/d-40693826.html.

ZEIT-artikolo de la 19a de januaro 1990 https://www.zeit.de/1990/04/die-tragoedie-des-alexander-dubcek/komplettansicht

Dokumentoj de la „Praga printempo“ 1968 de Ústav pro soudobé dějiny AV ČR, v.v.i., Prago:
http://www.68.usd.cas.cz
http://www.68.usd.cas.cz/cz/dokumenty-2.html

Registaroj de Ĉeĥoslovakio
https://de.wikipedia.org/wiki/Regierungen_der_Tschechoslowakei

Membroj de la CK de la ĉeĥoslovaka KP 1921-1988
https://www.ustrcr.cz/data/pdf/projekty/funkcionari-ksc/nejvyssi-organy.pdf

Komento pri la (taŭga) uzado de la resursoj de Vikipedio:

Malgraŭ la senlimaj mankoj, kiujn karakterizas la Vikipedio, tiu enciklopedio estas eksterordinara kaj unika fonto de informoj, kiuj povas esti parte tre utilaj, se oni adekvate konsideras kaj utiligas ilin. La ĉefaj meritoj de Vikipedio estas, ke ĝi disponigas utilajn bazajn informojn pri raraj temoj kaj diversaj personoj, kiujn oni povas rapide trovi per la komputilo en la interreto sen longe serĉadi. Se en tiu studo aperis ligoj al Vikipedio, kiujn multaj sciencistoj evitas, ili tamen povas esti utiligataj kiel resursoj, kiuj servas por rapida baza informiĝo pri homaj biografioj aŭ havigas bibliografiajn indikojn. La kvalito kaj kvanto de la klarigoj en la artikoloj mem estas alia temo. Ĉar la Esperanta Vikipedio ankoraŭ estas tre magra kaj pli servas al propagandaj ol sciencaj celoj, mi konsilas utiligi la lingvan version, kiu estas plej kompleta pri la koncerna temo aŭ biografio. Pere de la gugla aŭ alia tradukilo oni povas kompreni preskaŭ ĉiujn lngvojn kaj tekstojn publikigitajn de Vikipedio.

Koncerne la solvon de la -ata-/-ita-demando, mi ĝenerale orientiĝis laŭ la germanlingva modelo (war/wird/wurde depende de la tempo, plej parte pasinteco). Sed la tuta problemo estas komplikata/ita per la dimensioj de la adjektiva, tranzitiva kaj verbaspekta demandoj. Do, restas dubo en kelkaj kazoj (devigita/ata, akompanita/ata, miskomprenita/ata, konsiderita/ata, nomita/ata, imagita/ata k.s.), pri kiuj oni povas verve diskuti.

Ĉi tiu teksto estos relegata probable en 2020 por kontroli la kvaliton.

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, 2019

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Jam en la 70aj jaroj li lernis la rusan kaj aliajn orienteŭropajn lingvojn kaj ekinteresiĝis pri la situacio en la komunismaj landoj, kiujn li komencis viziti ekde 1981. Post 1995 pliklerigado kaj laborado en la informadika branĉo kaj en neregistaraj organizaĵoj. Esperantisto de 1979. Retestro de www.plansprachen.ch (ankaŭ: www.planlingvoj.ch kaj www.zamenhof.ch) kaj de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).P